

J. R. R. Tolkien

LA MASTRO DE L' RINGOJ

LA DU TUREGOJ



Serio
MONDLITERATURO
Volume 4




John Ronald Reuel Tolkien

LA DU TUREGOJ

La dua parto de
La Mastro de l' Ringoj

Kaliningrado
2007



John Ronald Reuel Tolkien
LA DU TUREGOJ

La titolo de la originalo
The Two Towers

Serio *Mondliteraturo*, volumo 4

2a eldono, korektita 2007
1a eldono 1996

Tradukis el la angla lingvo
William Auld

Redaktis, kompostis kaj enpaĝigis
Aleksander Korjenkov

Provlegis
Brian Drake, Andreas Emmerich, William Harmon

Korektis
Halina Gorecka

Kovrilo de
Vladimiras Beresniovass

La eldonon ebligis seninteresa prunto de FAME-Fondaĵo.

TOLKIEN, J. R. R.

La du turegoj: La dua parto de *La Mastro de l' Ringoj* / Trad. el la angla William Auld. — 2a eld., kor. — Kaliningrado: Sezonoj, 2007. — 368 pĝ. — (Serio *Mondliteraturo*; №4).

© Traduko William Auld, 1996.
© Mapoj, aranĝo *Sezonoj*, 2007.

*Tri ringoj por la elfoj sub la hela ĉiel',
Sep por la gnomoj en salonoj el ŝton'.
Naŭ por la homoj sub la morto-sigel',
Unu por la Nigra Reĝo sur la nigra tron'
Kie kuŝas Ombroj en Mordora Land'.
Unu Ringo ilin regas, Unu ilin prenas,
Unu Ringo en mallumon ilin gvidas kaj katenas
Kie kuŝas Ombroj en Mordora Land'.*

RESUMO

Tio ĉi estas la dua parto de *La Mastro de l' Ringoj*.

La unua parto, *La Kunularo de l' Ringo*, rakontis kiel Gandolfo la Griza eltrovis, ke la ringo, posedata de la hobito Frodo, estas fakte la Unu Ringo, reganto de ĉiuj Ringoj de Potenco. Ĝi priskribis la fuĝon de Frodo kaj ties kunuloj el ilia hejmo en la kvieta Provinco, persekutate de la teroro de la Nigraj Rajdantoj de Mordoro, ĝis finfine, helpate de Aragorno, disirulo el Eriadoro, ili trapasis gravajn danĝerojn ĝis la Domo de Elrondo en Rivendelo.


Tie kunsidis la granda Konsilio de Elrondo, en kiu estis decidite provi detruon de la Ringo, kaj Frodon oni nomumis kiel Ringoportanton. La membroj de la Kunularo de la Ringo estis elektitaj por helpi lin al lia celo: veni se eble al la Monto de Fajro en Mordoro, la lando de la Malamiko, la sola loko, kie eblis malfari la Ringon. En tiu Kunularo estis Aragorno kaj Boromiro, filo de la Mastro de Gondoro, reprezentantaj la homojn; Legolaso, filo de la elfa reĝo en Mornarbaro, por la elfoj; Gimlio, filo de Gloino, de la Soleca Monto, por la gnomoj; Frodo kun sia servisto Samsaĝo, kaj liaj du junaj parencoj Gajadoko kaj Peregrino, por la hobitoj; kaj Gandolfo la Griza.

La kunuloj vojaĝis sekrete foren el Rivendelo en la nordo, ĝis malsukcesinte je sia provo transiri vintre la altan pasejon de Karadraso, ili estis kondukitaj de Gandolfo tra la kaŝita pordo kaj eniris la vastajn minejojn de Morio, serĉante vojon sub la montoj. Tie Gandolfo, batalante kontraŭ timinda spirito de la submondo, falis en malhelan abismon. Sed Aragorno, nun rivelita kiel la kaŝita heredanto de la antikvaj reĝoj de l' okcidento, gvidis la Kunularon antaŭen de la Orienta Pordo de Morio, tra la elfa lando Lorieno, kaj sur la granda rivero Anduino, ĝis ili alvenis la akvofalojn de Raŭroso. Ili jam konstatis, ke ilian vojaĝon observas spionoj, kaj ke la kreaĵo Golumo, kiu iam posedis la Ringon kaj daŭre avidis ĝin, sekvas iliajn spurojn.

Nun estiĝis necese, ke ili decidu ĉu turniĝi orienten al Mordoro; ĉu akompani Boromiron al Minaso Tirit, la ĉefurbo de Gondoro, helpo en la venonta milito; ĉu dispartiĝi. Kiam evidentiĝis, ke la Ringoportanto obstine intencas daŭrigi sian senesperan vojaĝon al la lando de

la Malamiko, Boromiro klopodis preni perforte la Ringon. La unua parto finiĝis per la submetiĝo de Boromiro al la logo de la Ringo; per la eskapo kaj malapero de Frodo kaj ties servisto Samsaĝo; kaj per la dispeliĝo de la ceteraj kunularanoj pro subita atako de orkaj soldatoj, iuj servantaj la Malhelan Mastron de Mordoro, iuj la perfidulon Sarumano el Isengardo. La celo de la Ringoportanto ŝajnis jam trafita de katastrofo.

Tiu ĉi dua parto, *La Du Turegoj*, rakontas kiel la membroj de la Kunularo de l' Ringo fartis post la disiĝo de la kunuleco, ĝis alveno de la granda Malhelo kaj la komenciĝo de la Milito de la Ringo, kiu estos rakontata en la tria, lasta, parto.



1. Travadejoj de Iseno
2. Profundaĵo de Helmo
3. Dunharo
4. Osgiliado
5. Minaso Morgul

Ĉapitro 1

LA FORPASO DE BOROMIRO

Aragorno rapidis supren laŭ la deklivo. De tempo al tempo li kliniĝis al la tero. Hobitoj paŝas malpeze, kaj iliajn piedsignojn eĉ disirulo ne sekvas facile, sed proksime al la supro la padon transfluis rojeto, kaj sur la malseka tero li vidis tion, kion li serĉis.

— Mi legis la signojn ĝuste, — li diris al si. — Frodo kuris ĝis la deklivosupro. Mi scivolas, kion li tie vidis? Sed li reiris laŭ la sama vojo, kaj denove malsupreniris.

Aragorno hezitis. Li deziris mem iri al la alta sidloko, esperante tie vidi ion, kio konsilus al li pri la perpleksaĵoj, sed la tempo urĝis. Subite li saltis antaŭen kaj kuris ĝis la verto, laŭ la grandaj pavimslaboj, kaj supren laŭ la ŝtuparo. Poste, sidante sur la alta seĝo li forrigardis. Sed la suno ŝajnis ombriĝinta kaj la mondo malklara kaj fora. Li turniĝis de l' nordo reen ĝis la nordo, kaj vidis nenion krom la malproksimajn montojn, kun escepto de tio, ke tre fore li povis denove vidi en la alto grandan birdon aglosimilan, kiu malrapide descendis laŭ larĝaj cirkloj teren.

Dum li rigardadis, liaj sentemaj oreloj ekaŭdis sonojn en la suba arbaro, sur la okcidenta bordo de l' Rivero. Li rigidiĝis. Aŭdiĝis krioj, kaj inter ili, li terurite rimarkis raŭkajn voĉojn de orkoj. Tiam subite per basvoĉa voko blovis kornego, kaj ties blekoj trafis la montetojn kaj eĥis en la kavoj, laŭtiĝante je kriego pli forta ol la akvofala bruego.

— Jen la korno de Boromiro! — li ekkriis. — Li bezonas helpon! — Li salte malsuprenkuris la ŝtuparon, kuregis laŭ la pado. — Ve! Plagas min hodiaŭ sorto malbona, kaj ĉiu mia faro misas. Kie estas Sam?

Dum lia kuro la krioj laŭtiĝis, sed jam pli mallaŭte kaj senespere blovis la korno. Feroce kaj akrasone leviĝis la krioj de la orkoj, kaj subite la kornovokoj ĉesis. Aragorno trakuris la lastan deklivon, sed antaŭ ol li atingis la montosubon, la sonoj estingiĝis; kaj kiam li sin turnis maldekstren kaj kuris direkte al ili, ili retiriĝis, ĝis fine li ne plu povis aŭdi ilin. Elingiginte sian helan glavon kaj kriante "Elendilo! Elendilo!" li trakraegis la arbojn.

Je ĉirkaŭ unu mejlo de Part Galeno en maldensejeto li trovis Boromiron. Tiu sidis, apoginte sian dorson per granda arbo, kvazaŭ li ripozus. Sed Aragorno vidis, ke li estas trapikita per multaj nigraplumaj sagoj; lia glavo plu restis en lia mano, sed ĝi estis rompita ĉe la tenilo; lia korno fendita je duonoj estis apud li. Multaj orkoj kuŝis mortigitaj, amasigitaj ĉirkaŭ li kaj antaŭ liaj piedoj.

Aragorno genuiĝis apud li. Boromiro malfermis siajn okulojn kaj klopodis paroli. Finfine aŭdiĝis lantaj vortoj:

— Mi provis forpreni de Frodo la Ringon. Mi bedaŭras. Mi jam pagis. — Lia rigardo turniĝis al la falintaj malamikoj; minimume dudek kuŝis tie. — Ili estas foririntaj, la duonuloj, la orkoj kaptis ilin. Mi opinias, ke ili ne estas mortintaj. Orkoj ligis ilin. — Li paŭzis kaj liaj okuloj fermiĝis lace. Post momento li ekparolis denove. — Adiaŭ, Aragorno! Iru al Minaso Tirit kaj savu mian popolon! Mi malsukcesis.

— Ne! — diris Aragorno, kaptante lian manon kaj kisante lian frunton. — Vi venkis. Malmultaj plenumis similan venkon. Trankvil-igu! Minaso Tirit nepre ne falos.

Boromiro ridetis.

— Kien ili iris? Ĉu Frodo ĉeestis? — diris Aragorno.

Sed Boromiro ne plu parolis.

— Ve! — diris Aragorno. — Tiel forpasis la heredonto de Denetoro, Mastro de l' Turego Garda! Jen fino amara. Nun la Kunularo estas ruinigita. Estas mi la malsukcesinto. Vane Gandolfo fidis min. Kion mi nun faru? Boromiro ŝarĝis min per irado al Minaso Tirit, kaj mia koro tion deziras; sed kie estas la Ringo kaj la Portanto? Kiel mi trovu ilin kaj ŝparu al la Serĉo katastrofon?

Li surgenuis kelkan tempon, kurbiĝinta pro ploroj, ankoraŭ tenante la manon de Boromiro. Tia trovis lin Legolaso kaj Gimlio. Ili venis de la okcidentaj deklivoj de l' monteto, silente, rampante tra la arboj, kvazaŭ ili ĉasus. Gimlio tenis sian hakilon en la mano, kaj Legolaso sian longan tranĉilon; ĉiuj liaj sagoj estis uzitaj. Kiam ili atingis la maldensejon, ili haltis mirigite; kaj poste ili staris momenton kun dolore klinitaj kapoj, ĉar ŝajnis al ili evidente, kio okazis.

— Ve! — diris Legolaso, irinte al Aragorno. — Ni persekutis kaj mortigis multajn orkojn en la arbaro, sed ni pli utilis ĉi tie. Ni venis aŭdinte la kornon, sed tro malfrue, videble. Timeble vi grave vundiĝis.

— Boromiro estas mortinta, — diris Aragorno. — Mi estas netuŝita, ĉar mi ne ĉeestis kun li. Li mortis defendante la hobitojn, dum mi estis sur la monteto.

— La hobitojn! — ekkriis Gimlio. — Do kie ili estas? Kie estas Frodo?

— Mi ne scias, — lace respondis Aragorno. — Antaŭ la morto Boromiro diris, ke la orkoj ligis ilin; laŭ lia opinio ili ne estis mortintaj. Mi sendis lin sekvi Gajan kaj Grinĉjon; sed mi ne demandis, ĉu Frodo aŭ Sam ĉeestis, ĝis tro malfrue. Ĉiu mia hodiaŭa faro rezultis misa. Kion fari nun?

— Unue necesas prizorgi la falinton, — diris Legolaso. — Ne konvenas lasi lin kuŝanta kvazaŭ bestkadavro inter tiuj fiaj orkoj.

— Sed ni devas rapidi, — diris Gimlio. — Li ne volus, ke ni restu longe. Ni devas sekvi la orkojn, se restas espero, ke iuj el nia Kunularo estas vivaj kaptitoj.

— Tamen ni ne scias, ĉu la Ringoportanto estas kun ili aŭ ne, — diris Aragorno. — Ĉu indas forlasi lin? Ĉu ni ne serĉu unue lin? Antaŭ ni estas aĉa elekto!

— Do ni faru unue tion, kion nepras fari, — diris Legolaso. — Mankas al ni tempo kaj laboriloj por taŭge entombigi nian kamaron aŭ starigi super li tumulon. Eble ŝtonamason ni povus konstrui.

— Tia laboro estus longa kaj malfacila: mankas ŝtonoj uzeblaj pli proksime ol apudrivere, — diris Gimlio.

— Do, ni kuŝigu lin en boato kune kun liaj armiloj, kaj la armiloj de liaj venkitaj malamikoj, — diris Aragorno. — Ni sendu lin al la Raŭrosa akvofalo kaj donu lin al Anduino. La Gondora Rivero almenaŭ zorgos, ke neniu fikreaĵo malhonoru liajn ostojn.

Ili rapide traserĉis la kadavrojn de la orkoj, amasigante ties glavojn, fenditajn kaskojn kaj ŝildojn.

— Vidu, — ekkriis Aragorno. — Jen ni trovas signojn! — El la amaso da minacaj armiloj li levis du tranĉilojn, foliklingajn, damaskenitajn per oro kaj ruĝo; kaj post plua serĉado li trovis ankaŭ la nigrajn ingojn, ornamitajn per etaj ruĝaj gemoj. — Ne orkaj iloj! Tiujn portis hobitoj. Sendube la orkoj prirabis ilin, sed timis reteni la tranĉilojn, ĉar ili sciis, kio ili estas: laboraĵoj de Okcidentio, envolvitaj per sorĉaĵoj por misfartigi Mordoron. Nu, do, se ili ankoraŭ vivas, niaj amikoj estas senarmilaj. Mi prenos la jenaĵon, firme esperante redoni ilin.

— Kaj mi, — diris Legolaso, — kunprenos ĉiujn sagojn troveblajn, ĉar mia sagujo malplenas. — Li traserĉis la amason kaj la ĉirkaŭan teron kaj trovis multajn, kiuj estis nedifektitaj kaj stange pli longaj ol la sagoj, kiujn la orkoj kutimis uzi. Li rigardis tre proksime ilin.

Aragorno rigardis la mortigitajn kaj diris:

— Ĉi tie kuŝas multaj nemordoranoj. Iuj venis el la nordo, el la Nebulecaj Montoj, se mi konas iom la orkojn kaj ties specojn. Kaj jen estas aliaj nekonataj al mi. Ilia ekipaĵo tute ne estas orkeca.

Troviĝis kvar goblenaj soldatoj stature pli grandaj, malpalaj, oblikv-okulaj, kun dikaj kruroj kaj grandaj manoj. Ili estis armitaj per mallongaj larĝklingaj glavoj, ne per la kurbaj scimitaroj kutimaj ĉe orkoj; kaj ili havis pafarkojn taksusajn laŭ longo kaj laŭ formo similajn al pafarkoj de la homoj. Sur iliaj ŝildoj vidiĝis stranga blazono: blanka mano meze de nigra fono; sur la antaŭo de iliaj feraj kaskoj estis metita runo "S" forĝita el iu blanka metalo.

— Tiajn signojn mi neniam antaŭe vidis, — diris Aragorno. — Kion ili signifas?

— "S" signifas Saŭrono, — diris Gimlio. — Tion oni facile legas.

— Ne! — diris Legolaso. — Saŭrono ne uzas elfajn runojn.

— Li ankaŭ ne uzas sian propran nomon, nek permesas ĝin uzi skribe aŭ parole, — diris Aragorno. — Kaj blankon li ne uzas. Orkoj servantaj al Baraduro uzas la signon de la Ruĝa Okulo. — Momente li staris pensante. — "S" signifas Sarumano, mi supozas, — li diris finfine. — En Isengardo okazas misaĵoj, kaj la okcidento ne plu sekuras. Estas tiel, kiel Gandolfo timis: iel la perfidulo Sarumano sciigis pri nia vojaĝo. Tre verŝajne li ankaŭ scias pri la falo de Gandolfo. Persekutantoj el Morio eble evitis la atenton de Lorieno, aŭ eble ili ne trapasis tiun landon kaj venis al Isengardo laŭ aliaj vojoj. Orkoj vojaĝas rapide. Kaj Sarumano havas multajn rimedojn por ekkoni novaĵojn. Ĉu vi memoras la birdojn?

— Nu, mankas al ni tempo solvi enigmojn, — diris Gimlio. — Ni forportu Boromiron!

— Sed poste ni devos solvi la enigmojn, se ni volas elekti ĝustenan farotaĵon, — respondis Aragorno.

— Eble ne troviĝas elekto ĝusta, — diris Gimlio.

Per sia hakilo la gnomo tranĉis plurajn branĉojn. Tiujn oni kunligis per pafarkaj ŝnuroj kaj sternis siajn mantelojn sur la framon. Sur tiu kruda kadavroportilo ili portis la korpon de sia kunulo ĝis la bordo kune kun elektitaj trofeoj de lia lasta batalo forsendotaj kun li. Kvankam la vojo estis mallonga, ili trovis la taskon nefacila, ĉar Boromiro estis homo tiel alta kiel forta.

Aragorno restis apud la akvofluo, gardante la portilon, dum

Legolaso kaj Gimlio rapidis perpiede reen al Part Galeno. Temis pri mejlo aŭ pli, kaj pasis iom da tempo antaŭ ol ili revenis, rapide padelante du boatojn laŭlonge de la bordo.

— Stranga afero estas rakontenda! — diris Legolaso. — Troviĝis nur du boatoj sur la bordo. Ni trovis neniun postsignon de la tria.

— Ĉu orkoj estintis tie? — demandis Aragorno.

— Ni vidis neniun signon pri ili, — respondis Gimlio. — Kaj orkoj forprenus aŭ detruus ĉiujn boatojn, kaj krome la pakaĵojn.

— Mi esploros la teron, kiam ni venos tien, — diris Aragorno.

Ili kuŝigis Boromiron meze de l' boato, kiu lin forportos. La grizan kapuĉon kaj la elfan mantelon ili faldis kaj metis sub lian kapon. Ili kombis liajn longajn malblondajn harojn kaj aranĝis ilin ĉe liaj ŝultroj. La ora zono de Lorieno ekbrilis ĉirkaŭ lia talio. Lian kaskon ili metis apude, kaj sur lia sino ili metis la fenditan kornon kaj la tenilon kaj splitojn de lia glavo; sub liajn piedojn ili metis la glavojn de liaj malamikoj. Poste, liginte la pruon al la poŭpo de l' alia boato, ili trenis lin sur la akvon. Triste ili remis laŭ la bordo, kaj enirinte la rapidan fluon ili pasis la verdan herbejon de Part Galeno. La abruptaj deklivoj de Tol Brandiro ardis: estis jam meze de l' posttagmezo. Dum ili iris suden, la fumo de Raŭroso leviĝis kaj tremetis antaŭ ili, ora nebuleto. La impeto kaj tondro de la akvofalo skuis la senventan aeron.

Malĝoje ili liberigis la sepultan boaton: tie kuŝis Boromiro, trankvila, paca, glisante sur la sino de la fluanta akvo. La rivero akceptis lin, dum ili retenis la propran boaton per la remiloj. Li pasis ilin flose, kaj malrapide foriris lia boato, velkante kiel malhela punkto antaŭ la ora lumo, kaj poste ĝi malaperis subite, Raŭroso plu muĝis senŝanĝe. La Rivero akceptis Boromiron, filon de Denetoro, kaj oni ne plu vidis lin en Minaso Tirit, staranta kiel li antaŭe staris sur la Blanka Turego matene. Sed dum postaj tagoj en Gondoro estis dumlonge dirite, ke la elfa boato trarajdis la akvofalojn kaj la ŝaŭmantan lageton, kaj portis lin tra Osgiliado, trans la multbuŝan Anduinon, ĝis nokte sur la Grandan Maron sub la steloj.

Dum kelka tempo la tri kunuloj restis silentaj, postrigardante lin. Tiam ekparolis Aragorno:

— De la Blanka Turego oni elrigardos por li, — li diris, — sed li revenos nek de l' montaro nek de la maro. — Poste li ekkantis malrapide:

*Tra l' kampoj de Rohano, kie longa herb' sin trovas,
la okcidenta vent' promenas, ĉirkaŭ muroj blovas.
"Kia novaĵ', ho vaga vent', el okcidento nuna?
Ĉu Boromiron vidis vi per stela lum' aŭ luna?" —
"Mi vidis lin rajdantan tra sep larĝaj grizaj rojoj;
mi vidis lin marŝantan laŭ senhomaj terovojoj
en ombrojn de la nordo. Poste pasis li de l' vido.
Ĉu kornon aŭdis norda vent' de l' Denetora ido?" —
"Ho Boromir', mi okcidenten gvatis for de l' muroj,
sed vi ne venis el la vaka land' sen homaj spuroj".*

Poste kantis Legolaso:

*De l' ŝtonaj dunoj de la mar' la suda vento fuĝas;
ĝi aŭdas kriĉojn de l' mevar', kaj ĉe la pordo muĝas.
"Kiaj novaĵoj el la sud', ho vent', vespere listas?
Kie la bela Boromir'? Li tardas, kaj mi tristas". —
"Min ne demandu, kie li — la ostoj ja tro multas
sur la malhelaj bordoj, kie la ĉiel' tumultas;
tiom trapasis Anduinon cele al la maro.
Demandu al la norda vent' pri ties senditaro!" —
"Ho Boromir'! De l' pord' la voj' kondukas al la sudo,
sed vi ne venis kun la mevoj de la mar-elsputo".*

Poste kantis denove Aragorno:

*De l' Reĝa Pord' nordvento rajdas preter akvofalo;
kaj fride ĉirkaŭ la tureg' aŭdiĝas korna knalo.
"Kiajn novaĵojn el la nord' hodiaŭ vent' atestas?
Kio pri brava Boromiro? Longe li forestas". —
"Mi aŭdis lin sub Amon Hen. Li pruvis sian bravon.
Ĝisakven oni portis la rompitaĵajn ŝildon, glavon.
La membrojn en fiera bel' sepultis oni ĝuste;
Kaj ora Raŭros-akvofalo portis lin surbruste". —
"Ho Boromir'! La Garda Tur' rigardos kun obstino
al ora Raŭros-akvofalo ĝis la tempofino".*

Tiel ili finis. Poste ili turnis sian boaton kaj pelis ĝin laŭeble rapide kontraŭ la fluo reen ĝis Part Galeno.

— Vi lasis al mi la orientan venton, — diris Gimlio, — sed nenion mi diros pri ĝi.

— Tiel estas konvene, — diris Aragorno. — En Minaso Tirit oni toleras la orientan venton, sed oni ne petas de ĝi novaĵojn. Sed jam

Boromiro laŭiris sian vojon, kaj ni devas senprokraste elekti la propran.

Li rigardesploris la verdan herbejon, rapide, sed konsciencie, ofte kliniĝante teren.

— Neniuj orkoj pasis sur tiu ĉi grundo. Krom tio, nenio estas kun certo videbla. Ĉiuj niaj paŝoj troviĝas, transire kaj retroire. Mi ne povas konkludi, ĉu iuj hobitoj revenis post kiam komenciĝis la serĉo por Frodo. — Li revenis al la bordo, proksime al kie la flueto el la fonto likiĝis en la riveron. — Ĉi tie estas kelkaj klaraj spuroj. Hobito paŝis en la akvon kaj returnen; sed mi ne povas konkludi, antaŭ kiom da tempo.

— Kiel do vi solvas ĉi enigmon? — demandis Gimlio.

Aragorno ne tuj respondis, sed reiris al la kampadejo kaj rigardis la pakaĵojn.

— Du tornistroj mankas, — li diris, — kaj unu el ili certe estas tiu de Sam: ĝi estis iom granda kaj peza. Jen do la respondo: Frodo foriris boate, kaj akompanis lin lia servisto. Frodo certe revenis, dum ni ĉiuj forestis. Mi renkontis Samon suprenirantan kaj diris, ke li sekvu min; sed evidente li tion ne faris. Li divenis la intencon de sia mastro kaj revenis ĉi tien antaŭ ol Frodo ekiris. Tiu ne trovis facile postlasi Samon!

— Sed kial li nin postlasis, kaj senmesaĝe? — diris Gimlio. — Jen, stranga faro!

— Kaj faro kuraĝa, — diris Aragorno. — Sam pravis, ŝajnas al mi. Frodo ne volis konduki kun si amikon al morto en Mordoro. Sed li sciis, ke li devas iri mem. Okazis io post kiam li forlasis nin, kio venkis liajn timon kaj dubon.

— Eble ĉasantaj orkoj trovis lin kaj li fuĝis, — diris Legolaso.

— Li fuĝis, certe, — diris Aragorno, — sed mi opinias, ke ne de orkoj. — Sian opinion pri la kaŭzo de l' subitaj decidiĝo kaj fuĝo de Frodo Aragorno ne esprimis. La lastajn vortojn de Boromiro li longe tenis sekretaj.

— Nu, almenaŭ tiom nun klaras, — diris Legolaso. — Frodo ne plu troviĝas ĉi-flanke de l' rivero: preni la boaton povis nur li. Kaj Sam estas kun li; sian tornistron preni volus nur li.

— Nia elekto do estas, — diris Gimlio, — aŭ preni la restantan boaton kaj sekvi Frodon, aŭ sekvi la orkojn perpiede. Ĉu tiel aŭ aliel, restas malmulte da espero. Ni jam perdis valorajn horojn.

— Lasu min pensi! — diris Aragorno. — Kaj nun, ke mi elektu

ĝuste, kaj ŝanĝu la misan sorton de tiu ĉi malfeliĉa tago! — Momente li staris silenta, kaj finfine diris: — Mi sekvos la orkojn. Mi gvidus Frodon al Mordoro kaj akompanus lin ĝis la fino; sed se mi nun serĉos lin en la sovaĝejo, necesos forlasi la kaptitojn al turmentado kaj morto. Mia koro fine parolas klare: la sorto de l' Portanto ne plu troviĝas en miaj manoj. La Kunularo finludis sian rolon. Tamen ni la restantoj ne rajtas forlasi niajn kunulojn dum restas al ni forto. Venu! Ni foriros nun. Postlasu ĉion nenecesan! Ni urĝe iros antaŭen tage kaj nokte!

Ili eltrenis la lastan boaton kaj portis ĝin al la arboj. Ili metis sub ĝin ĉiujn posedaĵojn nebezonatajn kaj neporteblajn. Poste ili forlasis Parton Galenon. La posttagmezo jam velkis, dum ili revenis al la verdejo, kie pereis Boromiro. Tie ili retrovis la spurojn de la orkoj. Trovi ilin ne postulis multe da lerto.

— Neniu alia popolo kulpas tian trampladon, — diris Legolaso. — Ŝajnas, ke ili ĝuas tranĉi kaj disbati kreskaĵojn, kiuj eĉ ne baras al ili la vojon.

— Malgraŭ tio ili iras tre rapide, — diris Aragorno, — kaj ili ne laciĝas. Kaj poste ni eble devos trovi la vojon sur terenoj malmolaj kaj nudaj.

— Nu, ni sekvu ilin! — diris Gimlio. — Ankaŭ gnomoj kapablas iri rapide, kaj ili ne laciĝas pli frue ol orkoj. Sed estos longa ĉasado, ili longe avantaĝas.

— Jes, — diris Aragorno, — ni bezonos la tutan eltenemon de la gnomoj. Sed ek! Kun aŭ sen espero ni sekvu la spurojn de niaj malamikoj. Kaj ve al ili, se ni pruviĝos la pli rapidaj! Ni plenumos tian persekuton, kian oni taksos mirindaĵo inter la tri rasoj: elfoj, gnomoj kaj homoj. Antaŭen la tri ĉasantoj!

Cervece li saltiris. Inter la arbojn li rapidis. Ĉiam antaŭen li gvidis ilin, senlaca kaj rapidega, ĉar lia menso jam estis senhezita. La arbaron ĉirkaŭ la lago ili postlasis. Longajn deklivojn ili supreniris, malhelajn, dur-eĝajn kontraŭ la ĉielo jam sunsubire ruĝa. Venis la krepusko. Ili forpasis, grizaj ombroj en ŝtonoza lando.

Ĉapitro 2

LA RAJDISTOJ EL ROHANO

La krepusko profundigis. Nebuleto postkuŝis ilin inter la subaj Larboj, kaj mornis sur la palaj randoj de Anduino, sed la ĉielo estis klara. Steloj ekaperis. La kreskanta luno estis en okcidento, kaj la ombroj de l' rokoj nigris. Ili alvenis la subon de ŝtonozaj deklivoj, kaj ilia iro pli lantis, ĉar la spuroj ne plu facile sekveblis. Ĉi tie la altaĵoj de Emin Muilo direktigis el la nordo suden laŭ du longaj spinoj falintaj. La okcidenta flanko de ambaŭ spinoj apikis kaj malfacilis, sed la orientaj flankoj malpli abruptis, sulkitaj de abundaj ravinetoj kaj mallarĝaj fendegajoj. La tutan nokton la tri kunuloj skrabilis sur tiu osteca tero, grimpante ĝis la supro de l' unua kaj pli alta spino, kaj suben denove en la mallumon de profunda serpentumanta valo aliflanke.

Tie dum la senmova friska horo antaŭ la aŭroro ili ripozis mallongan tempon. La luno jam delonge subeniris antaŭ ili, la steloj briletis supre; la unua taga lumo ankoraŭ ne alvenis trans la malhelajn montetojn malantaŭe. Provizore Aragorno ne sciis, kion fari: la orkaj spuroj malsupreniris en la valon, sed tie malaperis.

— Kien ili turnigis, laŭ via opinio? — diris Legolaso. — Ĉu norden por sekvi vojon pli rektan al Isengardo, aŭ Fangorno, se tien ili celas laŭ via supozo? Aŭ suden por trafi Entvaŝon?

— Ili ne direktigis al la rivero, kie ajn ilia celo, — diris Aragorno. — Kaj krom se multo misas en Rohano, kaj multe plifortiĝis la potenco de Sarumano, ili sekvas la plej mallongan vojon troveblan trans la kampojn de l' rohananoj. Ni serĉu norde!

La valetto direktigis kvazaŭ ŝtonoza trogo inter la firstitaj montetoj, kaj malabunda rojo fluis inter la rokoj ĉefunde. Klifo brovumis dekstre; maldekstre leviĝis grizaj deklivoj, malklaraj kaj ombrecaj en la malfrua nokto. Ili progresis norden tra mejlo aŭ pli. Aragorno serĉadis, klinite al la tero inter la faldaĵoj kaj ravinetoj kondukantaj supren al la okcidenta spino. Legolaso troviĝis iom antaŭe. Subite la elfo ekkriis kaj la aliaj venis al li kurante.

— Ni jam atingis kelkajn el la ĉasatoj, — li diris. — Rigardu! — Li fingromontris, kaj ili vidis, ke tio, kion ili pli frue supozis rokoj kuŝantaj ĉe la subo de l' deklivo, estis kunpremiĝantaj kadavroj. Tie kuŝis kvin mortaj orkoj. Ili estis hakitaj per multaj kruelaj batoj, kaj du estis senkapigitaj. La tero malsekis pro ilia malhela sango.

— Jen alia enigmo! — diris Gimlio. — Sed por ĝi necesas la taga lumo, kaj ĝis tiam ni ne povas atendi.

— Nu tamen, kiel ajn oni interpretas ĝin, tio ŝajnas ne malesperiga, — diris Legolaso. — Malamikoj de la orkoj tre verŝajne estas amikoj niaj. Ĉu loĝas iuj personoj en tiuj ĉi montoj?

— Ne, — diris Aragorno. — La rohananoj malofte venas ĉi tien, kaj tre malproksime estas de Minaso Tirit. Povas esti, ke ĉasis ĉi tie iu homgrupo pro kialoj al ni nekonataj. Tamen ŝajnas al mi, ke ne.

— Kion vi opinias? — diris Gimlio.

— Mi opinias, ke la malamikoj kunportis kun si proprajn malamikojn, — respondis Aragorno. — Ĉi tiuj estas nordaj orkoj de tre malproksime. Inter la mortigitoj troviĝas neniuj el la grandaj orkoj kun la strangaj insignoj. Okazis kverelo, mi konjektas: tio ne maloftas ĉe tiu ĉi fispecio. Eble okazis disputo pri la sekvota vojo.

— Aŭ pri la kaptitoj, — diris Gimlio. — Ni esperu, ke ne finis la vivon ĉi tie ankaŭ ili.

Aragorno priserĉis la teron tra larĝa cirklo, sed ne troveblis pluaj spuroj de la lukto. Ili pluiris. Jam la orienta ĉielo ekpaliĝis; la steloj velkis, kaj griza lumo malrapide plifortiĝis. Iom pli norde ili alvenis terfaldajon, en kiu eta rojo, fale kaj serpentume, estis tranĉinta ŝtonozan padon suben en la valon. En tiu kreskis arbustoj, kaj sur la flankoj estis bedoj da herbo.

— Fine! — diris Aragorno. — Jen la spuroj serĉitaj! Supren laŭ tiu ĉi rojo: tiun vojon sekvis la orkoj post sia debato.

Rapide la ĉasantoj nun sin turnis kaj laŭiris la novan padon. Kvazaŭ freŝaj post tutnokta ripozo ili saltis de ŝtono al ŝtono. Fine ili atingis la supron de l' griza monteto, kaj subita vento trablovigis iliajn harojn kaj movigis iliajn mantelojn: frida aŭrora vento.

Returniĝinte ili vidis trans la rivero la malproksimajn montojn ĉenditaj. Tago ensaltis la ĉielon. La ruĝa rando de l' suno leviĝis super la ŝultrojn de l' malhela lando. Antaŭ ili en la okcidento la mondo kuŝis senmova, senforma kaj griza: sed, jam dum ili rigardis, la ombroj de l' nokto velkis, la koloroj de la vekiga tero revenis: verdo

trafluis la larĝajn herbejojn de Rohano, muaris la blankaj nebuletoj en la akvovaletoj; kaj fore maldekstre, je tridek leŭgoj aŭ pli, blua kaj purpura staris la Blanka Montaro, leviĝanta al pintoj gagataj kap-tuŝitaj de briletaj neĝoj, tinkturitaj de la matena ruĝo.

— Gondoro! Gondoro! — kriis Aragorno. — Se nur mi rigardus vin denove en horo pli feliĉa! Ankoraŭ ne kuŝas mia vojo suden al viaj helaj riveretoj.

*Gondor'! Gondoro, kie blouis vento okcidenta,
ĉe l' montoj kaj la maro; la lum' sur Arb' Arĝenta
falas kiel hela pluvo al la Reĝ-gazono.
Fieraj muroj! Blankaj turoj! Oraj kron' kaj trono!
Ho Gondor'! Ĉu iam plu vidiĝos Arb' Arĝenta,
aŭ al mont' kaj maro blivos vento okcidenta?*

— Jam ni iru! — li diris, fortrenante siajn okulojn de la sudo, kaj elrigardante okcidenten kaj norden al la vojo devige plandota.

La firsto, sur kiu staris la kunuloj, descendis apike antaŭ iliaj piedoj. Sub ĝi je pli ol dudek klaftoj, troviĝis breto larĝa kaj malglata, kiu subite finiĝis je la rando de apika klifo: la Orienta Muro de Rohano. Tiel finiĝis Emin Muilo, kaj antaŭ ili etendiĝis la verdaj herbejoj de la rohananoj ĝis la ekstremo de vidivo.

— Rigardu! — kriis Legolaso, indikante supren en la palan ĉielon. — Jen denove la aglo! Ĝi estas tre alte. Ĝi ŝajnas forflugi nun, el tiu ĉi lando norden denove. Ĝi iras rapidege. Rigardu!

— Ne, eĉ miaj okuloj ne povas vidi ĝin, bona Legolaso, — diris Aragorno. — Ĝi ja devas esti tre alte. Mi scivolas, kia estas ĝia komisio, se temas pri la sama birdo, kiun mi vidis pli frue. Sed vidu! mi povas vidi ion pli proksiman kaj pli urĝan; io moviĝas trans la ebenaĵon!

— Multo, — diris Legolaso. — Ĝi estas multnombra piedirantaro; sed nenion plian mi povas diri, nek vidi, kia specio ili estas. Ili foras multajn leŭgojn: dek du, mi konjektas, sed la plateco de la ebenaĵo malfacile mezureblas.

— Ŝajnas al mi tamen, ke ni jam ne bezonas spurojn por indiki la irotan vojon, — diris Gimlio. — Ni trovu vojon suben al la kampoj laŭeble rapide.

— Dubinde, ke vi trovos padon pli rapidan ol tiu de la orkoj elektita, — diris Aragorno.

Nun ili sekvis la malamikojn en la klara taglumo. Ŝajnis, ke la

orkoj urĝe progresis kiel eble plej haste. De tempo al tempo la persekutantoj trovis aĵojn faligitajn aŭ forĵetitajn: nutraĵsakoĵ, ŝeloĵ kaj krustoj de malmola griza pano, ŝirita nigra mantelo, peza fernajla ŝuo rompita pro la ŝtonoj. La spuroj gvidis ilin norden laŭ la supro de la klifego, kaj finfine ili alvenis profundan fendaĵon tranĉitan en la rokajo per roĵo, kiu plaŭdis laŭte malsupren. En la mallarĝan ravinon descendis kruda pado ŝtuparece ĝis la ebenaĵo.

Sube ili alvenis strange subite al la herbeĵo de Rohano. Tiu ŝvelis verdmare ĝis la piedo mem de Emin Muilo. La falanta roĵo malaperis en profundan kreskaĵon el kresoj kaj akvo-plantaĵoj, kaj ili povis aŭdi ĝin fortinti en verdaj tuneloj, laŭ longaj malabruptaj deklivoj al la marĉeĵoj de la malproksima Entvaŝa Valo. Ili ŝajnis esti lasintaj la vintron kroĉiĝanta al la malantaŭaj montetoj. Ĉi tie la aero estis pli malmola kaj pli varma, kaj sentrude parfumanta, kvazaŭ la printempo jam estiĝus kaj la suko denove ekfluus en plantaĵoj kaj folioj. Legolaso profunde enspiris, kvazaŭ iu kiu trinkus ampleksan ĝlutaĵon post longa soifado en malfekundaj lokoj.

— Ha! la odoro verda! — li diris. — Pli profitas ol multe da dormado. Ni kuru!

— Malpezaĵ kruroj povas kuri rapidege ĉi tie, — diris Aragorno. — Pli rapide, eble, ol ferŝuitaj orkoj. Nun ni havas eblon malpliigi ties avantaĝon!

Ili iris spalire, kurante kvazaŭ dogoj pro forta aromo, kaj en iliaj okuloj estis arda lumo. Preskaŭ rekte okcidenten la larĝa falĉvoĵo de la marŝantaj orkoj tramplis sian malbelan fendon; la dolĉa herbo de Rohano estis kontuzita kaj nigriĝita pro ilia pasado. Baldaŭ Aragorno eligis krion kaj turniĝis flanken.

— Atendu! — li kriis. — Ankoraŭ ne sekvu min!

Li kuris rapide dekstren, for de la ĉefvoĵo; ĉar li ekvidis piedsignojn, kiuj iris tiudirekten, disbranĉiĝintaj de la aliaj, signoj de etaj senŝuaj piedoj. Tiuj tamen ne diste iris antaŭ ol ilin surtretis orkaj spuroj, kiuj ankaŭ lasis la ĉefvoĵon antaŭe kaj malantaŭe, kaj poste ili rekurbigis abrupte kaj perdiĝis en la tramlado. Ĉe la plej malproksima limo Aragorno kliniĝis kaj kaptis ion en la herbo; poste li retrokuris.

— Jes, — li diris, — ili estas tute klaraj: piedsignoj de hobito. De Grinĉjo, mi opinias. Li pli etas ol la alia. Kaj vidu jenon! — Li levis ion, kio ekbriletis en la sunlumo. Ĝi aspektis kiel nove-aperta folio de fago, bela kaj stranga en tiu senarba ebenaĵo.

— Broĉo de elfa mantelo! — ekkriis kune Legolaso kaj Gimlio.

— Ne sencele falas la folioj de Lorieno, — diris Aragorno. — Tio ĉi ne falis hazarde: ĝi estis forĵetita kiel signo al eventualaj sekvantoj. Mi opinias, ke tiucele Grinĉo forkuris de l' ĉefvojo.

— Tiuokaze li almenaŭ estis viva, — diris Gimlio. — Kaj li povis utiligi sian spriton kaj ankaŭ siajn kruojn. Tio estas kuraĝiga. Ne vane ni persekutas.

— Ni esperu, ke li ne tro kare pagis sian aŭdacon, — diris Legolaso. — Ek! Ni pluiru! La penso, ke tiuj gajaj junuloj estas pelataj kvazaŭ brutoj, bruligas mian koron.

La suno grimpis ĝis la zenito kaj poste iris malrapide suben sur la ĉielo. Malpezaj nuboj supreniĝis el la maro en la malproksima sudo kaj forbloviĝis per venteto. La suno sinkis. Ombroj leviĝis malantaŭe kaj etendis longajn brakojn al la oriento. Daŭre la persekutantoj eltenis. Pasis jam unu tago, depost kiam Boromiro venkiĝis, kaj la orkoj daŭre troviĝis tre antaŭe. Ili ne plu vidiĝis sur la plataj ebenajoj.

Kiam noktombro envolvis ilin, Aragorno haltis. Nur dufoje dum la taga marŝo ili estis mallonge ripozintaj, kaj dek du leŭgoj nun apartigis ilin de tiu orienta murego, sur kiu ili staris tagiĝe.

— Ni venis finfine al elekto malfacila, — li diris. — Ĉu ni ripozu nokte, aŭ ni pluiru, dum eltenas niaj volo kaj forto?

— Krom se ripozos ankaŭ niaj malamikoj, ili nin postlasos tre malproksime, se ni haltos por dormi, — diris Legolaso.

— Ĉu eĉ orkoj devas ripozi dum marŝado? — diris Gimlio.

— Malofte orkoj vojaĝas nekaŝite sub la suno, tamen tiuj farastion, — diris Legolaso. — Certe ili ne ripozos nokte.

— Sed se ni marŝos nokte, ni ne povos sekvi iliajn spurojn, — diris Gimlio.

— La vojo estas rekta kaj turniĝas nek dekstren nek maldekstren, kiom kapablas vidi miaj okuloj, — diris Legolaso.

— Eble mi povus gvidi vin konjekte en la mallumo kaj teni la linion, — diris Aragorno, — sed se ni devius, aŭ ili turniĝus flanken, poste kiam venus la lumo, eble okazus multe da prokrasto, antaŭ ol la spuroj estus retrovitaj.

— Kaj pripensindas ankaŭ jeno, — diris Gimlio: — nur tage ni povos vidi, ĉu iuj spuroj flanken iras. Se eskapus kaptito, aŭ se unu estus forportita, ni diru orienten al la Granda Rivero, al Mordoro, ni eble preterpasus la spurojn senceie.

— Tio veras, — diris Aragorno. — Sed se mi senerare interpretas tiujn jam pasitajn signojn, la orkoj de la Blanka Mano venkis, kaj la tuta bando nun direktiĝas al Isengardo. Ilia aktuala direkto konfirmas tion.

— Sed estus malprudente certi pri iliaj interkonsiliĝoj, — diris Gimlio. — Kaj kio pri eskapo? En mallumo ni preterpasus la spurojn, kiuj gvidis vin al la broĉo.

— La orkoj duoble atentos post tio, kaj la kaptitoj pli lacos, — diris Legolaso. — Ne plu okazos eskapo, krom se ni ĝin aranĝos. Kiel fari tion estas nekonjekteble, sed unue ni devos atingi ilin.

— Tamen eĉ mi, gnomo multe vojaĝinta kaj ne la malplej hardita el mia raso, ne povas kuri la tutan vojon ĝis Isengardo senpaŭze, — diris Gimlio. — Ankaŭ en mi brulegas la koro, kaj mi estus ekirinta pli frue; sed nun mi devas iom ripozi por poste kuri pli bone. Kaj se ni ripozu, la blinda nokto plej konvenas por tio.

— Mi ja diris, ke la elekto estas malfacila, — diris Aragorno. — Kiel ni finu ĉi diskuton?

— Vi estas nia gvidanto, — diris Gimlio, — kaj vi lertas pri ĉasado. Elektu vi.

— Mia koro ordonas pluir, — diris Legolaso. — Sed necesas, ke ni agu komune. Mi faros laŭ via decido.

— Vi donas la elekton al mallerta elektanto, — diris Aragorno. — De kiam ni trapasis Argonaton, ĉiuj miaj elektoj misis. — Li silentiĝis, rigardante longtempe norden kaj okcidenten en la densiĝantan nokton. — Ni ne marŝos en la mallumo, — li diris finfine. — La danĝero maltrafi la vojon aŭ signojn de alies venado-irado ŝajnas al mi granda. Se la luno havigus sufiĉe da lumo ni utiligus ĝin, sed ve! ĝi malleviĝas frue kaj ankoraŭ junas kaj palas.

— Kaj hodiaŭ nokte ĝi estas ĉiuokaze vualita, — Gimlio murmuris. — Se nur la Damo donintus al ni lumon, tian donacon, kian ŝi donis al Frodo!

— Ĝi pli necesas tie, kie ĝi estas donita, — diris Aragorno. — Ĉe li troviĝas la aŭtentika serĉo. La nia estas bagatela inter la aktualaj faroj. Vana persekuto ekde la komenco, eble, kiun neniu mia elekto povas fuŝi aŭ fliki. Nu, mi elektis. Do, ni uzu la tempon laŭeble plej trafe!

Li sin ĵetis teren kaj tuj endormiĝis, ĉar li ne dormis post ilia nokto sub la ombro de Tol Brandiro. Antaŭ ol aŭroro estis surĉiela li vekigis

kaj stariĝis. Gimlio plu dormis profunde, sed Legolaso staris rigardante norden en la mallumon, pensema kaj silenta kiel juna arbo en senventa nokto.

— Ili estas tre tre malproksimaj, — li diris malĝoje, sin turnante al Aragorno. — Mi scias en la koro, ke ili ne ripozos ĉi-nokte. Nur aglo povus atingi ilin nun.

— Malgraŭ tio ni daŭre persekutos laŭ niaj kapabloj, — diris Aragorno. Kliniĝante li vekis la gnomon. — Ek! Ni devas iri, — li diris. — La postaromo forvelkiĝas.

— Sed estas ankoraŭ mallume, — diris Gimlio. — Eĉ Legolaso sur montopinto ne povus vidi ilin ĝis la suno leviĝos.

— Timeble ili preterpasis mian vidivon de sur monto aŭ ebenaĵo, sub luno aŭ suno, — diris Legolaso.

— Kie vidivo ne kapablas, la tero eble havigos al ni informojn, — diris Aragorno. — La tero nepre ĝemas sub iliaj malmolaj plandoj. — Li etendis sin sur la teron kun la orelo premita al la herbaĵo. Li kuŝis tie senmove, tiel longe, ke Gimlio scivolis, ĉu li svenis aŭ reendormiĝis. Aŭroro venis muare, kaj malrapide kreskis ĉirkaŭ ili griza lumo. Finfine li stariĝis, kaj nun la amikoj povis vidi lian vizaĝon: ĝi estis pala kaj streĉita, kaj li aspektis ĝenata.

— La tera rumoro estas malklara kaj konfuzita, — li diris. — Sur ĝi marŝas nenio en ĉirkaŭaĵo de multaj mejloj. Mallaŭtaj kaj foraj estas la piedoj de niaj malamikoj. Sed laŭtas hufoj de ĉevaloj. Venas en mian kapon, ke mi aŭdis tiujn, eĉ dum mi kuŝis dormante sur la tero, kaj ili ĝenis miajn sonĝojn: ĉevaloj galopantaj, pasante en la okcidento. Sed jam ili pli malproksimiĝas de ni rajdante norden. Mi scivolas, kio okazas en tiu ĉi lando!

— Ni ekiru! — diris Legolaso.

Tiel komenciĝis la tria tago de ilia persekutado. Dum longaj horoj sub nuboj kaj intermita sunlumo ili apenaŭ paŭzis, jen paŝegante, jen kurante, kvazaŭ nenia laceco povis estingi la ardon, kiu brulis en ili. Ili malofte parolis. Tra la vasta soleco ili pasis, kaj iliaj elfaj manteloj fadis kontraŭ fono de la grize verdaj kampoj; eĉ en la friska sunlumo tagmeza malmultaj krom elfaj okuloj rimarkus ilin, ĝis ili proksimus. Ofte en la koro ili dankis al la Damo de Lorieno pro la donacitaj *lembasoj*, ĉar tion ili povis manĝi kaj trovi freŝan forton eĉ dum la kurado.

La tutan tagon la spuroj de la malamikoj direktiĝis rekte antaŭen, irante nord-okcidenten seninterrompe kaj sendevie. Kiam denove la

tago proksimiĝis al sia fino, ili alvenis longajn senarbajn deklivojn, kie la tero leviĝis, ŝvelante supren al linio de malaltaj ĝibaj altaĵetoj antaŭe. La orkaj spuroj iĝis malpli klaraj, kiam ili kurbiĝis norden direkte al ili, ĉar la tero pli malmoliĝis kaj la herbo pli mallongiĝis. Fore maldekstre serpentumis Entvaŝo, arĝenta fadeno sur verda planko. Nenio moviĝanta videblis. Ofte Aragorno miris, ke ili vidis nenian signon pri bestoj aŭ homoj. La loĝejoj de la rohananoj plejparte troviĝis multajn leŭgojn for en la sudo, sub la arbarumitaj tegmentorandoj de la Blankaj Montoj, nun kaŝitaj en nebulo kaj nuboj. Tamen la ĉevalmastroj antaŭe paŝtigis multajn gregojn kaj virĉevalojn en la Orientujo, ĉi tiu orienta regiono de ilia regno, kaj tie la paŝtistoj multe vagadis, loĝante en kampadejoj kaj tendoj eĉ vintre. Sed nun la tuta lando estis senhoma, kaj regis silento, kiu ne ŝajnis la kvieto de paco.

En la krepusko ili denove haltis. Jam duoble dek du leŭgojn ili trapasis sur la ebenaĵoj de Rohano, kaj la muro de Emin Muilo estis malaperinta en la ombroj de l' oriento. La juna luno briletis sur nebuleca ĉielo, sed ĝi havigis malmulte da lumo, kaj la steloj estis vualitaj.

— Nun mi plej bedaŭras ripoztempon aŭ ĉiun halton dum nia ĉasado, — diris Legolaso. — La orkoj forkuris antaŭ ni, kvazaŭ la vipoj de Saŭrono mem estus malantaŭ ili. Timeble ili jam atingis la arbaragon kaj la malhelajn montetojn, kaj jam nun eniras en la ombrojn de la arboj.

Gimlio grincigis siajn dentojn.

— Jen amara fino de nia espero kaj de nia tuta penado! — li diris.

— De espero eble, sed ne de penado, — diris Aragorno. — Ni ne returniĝos ĉi tie. Tamen mi lacegas. — Li retrorigardis al la vojo trapasita, al la nokto oriente pliprofondiĝanta. — Io stranga influas en tiu ĉi lando. Mi malfidas la silenton. Mi malfidas eĉ la palan lunon. La steloj apenaŭ videblas; kaj mi estas tiel lacega, kiel mi malofte estis antaŭe, lacega kiel neniu disirulo devus esti, kiam klaraj spuroj sekvendadas. Ia volo subtenas rapidige niajn malamikojn kaj starigas antaŭ ni nevideblan barilon: lacego pli en la koro ol en la membroj.

— Vere! — diris Legolaso. — Tion mi scias ekde kiam ni descendis de Emin Muilo. Ĉar tiu volo estas ne malantaŭ ni, sed antaŭ ni. — Li fingromontris foren tra la lando Rohano en la malheliĝantan okcidenton sub la falĉilforma luno.

— Sarumano! — murmuris Aragorno. — Sed li ne retroenigos nin!

Halti ni devos ankoraŭ unufoje; ĉar vidu! eĉ la luno enfalas denŝigantan nubon. Sed norde kuŝas nia vojo inter monteto kaj marĉo kiam la tago revenos.

Kiel antaŭe Legolaso estis la unua stariĝinto, se efektive li eĉ dormis.

— Vekiĝu! Vekiĝu! — li kriis. — Estas ruĝaŭrore. Strangaj aferoj atendas nin apud la arbarega rando. Ĉu bonaj, ĉu misaj, tion mi ne scias; sed ni estas vokitaj. Vekiĝu!

La aliaj saltleviĝis, kaj preskaŭ tuj ili ekvojaĝis. Lante proksimiĝis la montetoj. Ankoraŭ mankis unu horo antaŭ la tagmezo, kiam ili ĝisvenis ilin: verdaj deklivoj leviĝantaj al nudaj firstoj, kiuj etendiĝis en linio rekte norden. Sube la tero estis seka kaj la herbo mallonga, sed longa strio de sinkinta grundo, proksimume dek mejlojn larĝa, kuŝis inter ili kaj la rivero vaganta profunde en malklaraj densejoj fragmitaj kaj junkaj. Ĝuste okcidente de l' plej suda deklivo troviĝis granda ringo, kie la grundo estis ŝirita kaj batita de multaj tramplaj piedoj. El ĝi etendiĝis denove la orkaj spuroj, turniĝante norden laŭ la sekaj orloj de l' montetoj. Aragorno haltis kaj proksime ekzamenis la signojn.

— Ili ripozis ĉi tie kelkan tempon, — li diris, — sed eĉ la antaŭeniraj signoj estas jam malnovaj. Timeble via koro parolis veron, Legolaso: jam pasis trioble dek du horoj, laŭ mia konjekto, de kiam staris la orkoj, kie ni nun staras. Se ili pluiris samrapide, ili do hieraŭ je sunsubiro alvenis la bordon de Fangorno.

— Mi vidas nenion norde kaj okcidente krom herbon fadiĝantan en nebulon, — diris Gimlio. — Ĉu ni povus vidi la arbaregon se ni grimpus la montetojn?

— Ĝi ankoraŭ tre malproksimas, — diris Aragorno. — Se mi ĝuste memoras, tiuj montoj etendiĝas ok leŭgojn aŭ pli al la nordo, kaj poste nord-oriente al la elfluejo de Entvaŝo ankoraŭ etendiĝas larĝa tereno, ankoraŭ dek kvin leŭgojn eble.

— Nu, ni pluiru, — diris Gimlio. — Miaj kruroj devos forgesi la leŭgojn. Ili tion farus des pli volonte se mia koro estus malpli peza.

La suno estis sinkanta, kiam finfine ili proksimiĝis al la montetlinio. Dum multaj horoj ili marŝis senripoze. Nun ili progresis malrapide, kaj la dorso de Gimlio estis kurbiĝinta. Rokduraj estas la gnomoj laborantaj aŭ vojaĝantaj, sed tiu senfina ĉasado komencis elĉerpi

lin, dum espero tute velkis en lia koro. Aragorno marŝis malantaŭ li, morna kaj silenta, kliniĝante de tempo al tempo por ekzameni iun signon aŭ skrapaĵon sur la grundo. Nur Legolaso paŝis kiel ĉiam malpeze, liaj piedoj ŝajne apenaŭ premis la herbon, postlasante neniujn spurojn, dum li pasis; sed el la vojpano de la elfoj li ĉerpis tiom da nutraĵo, kiom li bezonis, kaj li povis dormi, se tion povas nomi dormo la homoj, ripozigante sian menson laŭ la strangaj padoj de elfaj songoj, eĉ dum li marŝis apertokule en la lumo de la mondo.

— Ni supreniru sur tiun ĉi verdan monteton! — li diris. Lacege ili sekvis lin, grimpante la longan deklivon, ĝis ili alvenis la supron. Tiu estis ronda monteto glata kaj nuda, staranta aparte, la plej norda el la montetaro. La suno sinkis, kaj la vesperaj ombroj falis kurtenece. Ili troviĝis solaj en griza senforma mondo sen signo aŭ mezuro. Nur malproksime nord-okcidente estis mallumo pli profunda kontraŭ la velkanta lumo: la Nebulecaj Montoj kaj la suba arbarego.

— Nenion ni povas vidi por gvidi nin tien, — diris Gimlio. — Nu, denove ni devas halti kaj foruzi la nokton. Iĝas malvarme!

— Ventas el nordo elde la neĝo, — diris Aragorno.

— Kaj antaŭ la mateno ventos el la oriento, — diris Legolaso. — Sed ripozu, se tio necesas al vi. Tamen ne forĵetu ĉian esperon. Morgaŭ estas nekonata. Konsilo ofte troveblas ĉe la sunleviĝo.

— Tri sunoj jam leviĝis dum nia ĉasado kaj neniun konsilon alportis, — diris Gimlio.

La nokto pli kaj pli fridiĝis. Aragorno kaj Gimlio dormis intermite, kaj kiam ajn ili vekigis, ili vidis Legolason staranta apude, aŭ marŝanta tien-reen, mallaŭte kantante al si en sia propra lingvo, kaj dum li kantis la blankaj steloj ekaperis sur la malmola nigra volbo supre. Tiel pasis la nokto. Kune ili rigardis la tagiĝon malrapide kreskantan sur la ĉielo, nun nuda kaj sennuba, ĝis finfine okazis la sunleviĝo. Tiu estis pala kaj klara. La vento blovis el la oriento, kaj ĉiuj nebuletoj estis forruliĝintaj; largaj terenoj kuŝis ĉirkaŭ ili en la amara lumo.

Antaŭe kaj oriente ili vidis la ventoplenajn altejojn de la Rohana montetaro, kiun ili jam ekvidis antaŭ multaj tagoj de apud la Granda Rivero. Nord-okcidente embuskis la malhela arbarego Fangorno; malproksimaj ankoraŭ dek leŭgojn staris ĝiaj ombrecaj randoj, kaj ĝiaj pli malproksimaj deklivoj forfadis en la distan bluon. Post ĝi ekbriletis tre malproksime, kvazaŭ flosanta sur griza nubo, la blanka supro de alta Metedraso, la lasta pinto de la Nebulecaj Montoj. El la

arbarego fluis renkonte al ili Entvaŝo, ties fluo nun estis rapidega kaj streta, kaj la bordoj profunde fenditaj. La orkaj spuroj turniĝis de la montetaro tiudirekten.

Sekvante per siaj akraj okuloj la vojon al la rivero kaj poste la riveron retro al la arbarego, Aragorno vidis ombron sur la malproksima verdo, malhelan rapidhastan malprecizaĵon. Li ĵetis sin sur la teron kaj denove aŭskultis atente. Sed Legolaso staris apud li, ombrante siajn helajn elfajn okulojn per sia longa gracila mano, kaj li vidis ne ombron, nek malprecizaĵon, sed malgrandajn rajdantajn figurojn, multajn rajdistojn, kaj matena ekbrilo sur iliaj lancopintoj similis ekbrilon de etegaj steloj ekster la rando de mortemula vidivo. Tre fore malantaŭ ili leviĝis malhela fumo je maldensaj bukliĝantaj fadenoj.

Silento regis en la dezertaj kampoj, kaj Gimlio povis aŭdi la aeron moviĝanta inter la herboj.

— Rajdistoj! — kriis Aragorno saltstariĝante. — Multaj rajdistoj sur rapidegaj ĉevaloj alvenas nin!

— Jes, — diris Legolaso, — cent kvin da ili. Flavaj estas ties hararoj, kaj brilaj estas ties lancoj. Ilia ĉefo estas tre alta.

Aragorno ridetis:

— Akraŭdas l' okuloj de la elfoj.

— Ne! La rajdistoj malproksimas ne multe pli ol kvin leŭgojn, — diris Legolaso.

— Ĉu kvin leŭgojn aŭ unu, — diris Gimlio, — ni ne povas eskapi de ili en tiu ĉi nuda lando. Ĉu ni atendu ilin ĉi tie aŭ pluiru sur nia vojo?

— Ni atendu, — diris Aragorno. — Mi lacegas, kaj nia ĉaso malsukcesis. Aŭ almenaŭ aliaj devancis nin; ĉar tiuj rajdistoj retrorajdas laŭ la orkaj postsignoj. Eble ni ricevos de ili informojn.

— Aŭ lancojn, — diris Gimlio.

— Tri seloj malplenas, sed hobitojn mi ne vidas, — diris Legolaso.

— Mi ne diris, ke ni ricevos informojn bonajn, — diris Aragorno. — Sed ĉu malbonajn aŭ bonajn, ni ilin atendos ĉi tie.

La tri kunuloj nun lasis la montetosupron, kie ili eble prezentus facilan celon kontraŭ la pala ĉielo, kaj ili marŝis malrapide suben laŭ la norda deklivo. Iom supre de la deklivpiedo ili haltis, kaj volvinte sin per siaj manteloj ili side kunkaŭris sur la senkoloriĝinta herbo. La tempo pasis lante kaj peze. La vento malfortis kaj penetremis. Gimlio estis maltrankvila.

— Kion vi scias pri tiuj rajdistoj, Aragorno, — li diris. — Ĉu ni sidas ĉi tie atendante subitan morton?

— Mi foje estis inter ili, — respondis Aragorno. — Ili estas fieraj kaj obstinaj, sed ili estas lojalaj, pense kaj fare malavaraj; aŭdacaj sed ne kruelaj; saĝaj sed malkleraj, librojn ne verkante, sed kantante multajn kantojn, laŭ maniero de la homidoj antaŭ la Jaroj Malhelaj. Sed mi ne scias, kio okazis ĉi tie lastatempe, nek kia eble estas la animstato de la rohananoj nun inter la perfidulo Sarumano kaj la minaco de Saŭrono. Ili jam delonge estas amikoj de la gondora popolo, kvankam ili ne parencas ilin. Okazis dum la forgesitaj jaroj de la pratempo, ke Eorlo la Juna kondukis ilin el la nordo, kaj ili parencas pli vere al la Bardidoj de Dalo, kaj al la Beornidoj de l' Arbaro, inter kiuj ankoraŭ videblas multaj homoj altaj kaj belaj, kiaj estas la rajdistoj el Rohano. Almenaŭ ili ne amas la orkojn.

— Sed Gandolfo parolis pri onidiro, ke ili pagas tributon al Mordoro, — diris Gimlio.

— Tion mi ne pli ol Boromiro kredas, — respondis Aragorno.

— Vi baldaŭ ekscios la veron, — diris Legolaso. — Jam ili proksimiĝas.

Fine eĉ Gimlio povis aŭdi la lontan baton de galopantaj hufoj. La rajdistoj, sekvante la postsignojn, turniĝis disde la rivero kaj proksimiĝis la montetojn. Ili rajdis ventrapide.

Nun la krioj de klaraj fortaj voĉoj aŭdiĝis sonore tra la kampoj. Subite ili alimpetis kun tondrosimila bruo, kaj la plej antaŭa rajdisto flankeniris, preterpasante la subon de l' monteto kaj retrovidante la trupon suden laŭ la okcidentaj orloj de l' montetoj. Sekvante lin ili rajdis: longa linio da armaĵitoj rapidaj, brilaj, minacaj kaj belaspektaj.

Iliaj ĉevaloj grandstaturis, fortaj kaj longkruraj; iliaj grizaj feloj glimis, iliaj longaj vostoĵoj bloviĝis pro la vento, iliaj kolharoj estis plektitaj sur la fieraj nukoj. La viroj rajdantaj ilin tre konvenis al ili: altaj kaj longmembraj; iliaj hararoj, line palaj, ondis sub la malpezaj kaskoj kaj striiĝis malantaŭe je longaj plektaĵoj; iliaj vizaĝoj estis severaj kaj viglaj. En iliaj manoj estis longaj lancoj fraksenlignaj, farbitaj ŝildoj estis dorse pendigitaj, longaj glavoj troviĝis ĉezone, iliaj poluritaj maŝkirasoĵoj pendis ĝis la genuoj.

Po duope ili pretergalopis, kaj malgraŭ tio, ke de tempo al tempo iu el ili stariĝis surpiedinge kaj gvatis antaŭen kaj ambaŭflanken, ili ŝajnis ne rimarki la tri fremdulojn sidantajn silente kaj ilin rigardantajn. La trupo preskaŭ jam pasis, kiam subite Aragorno stariĝis kaj vokis per laŭta voĉo:

— Kiaj informoj el la nordo, rajdistoj el Rohano?

Kun mirigaj rapido kaj lerto ili bremsis siajn ĉevalojn, ronde turniĝis, kaj kurege proksimiĝis. Baldaŭ la tri kunuloj trovis sin en ringo da rajdistoj moviĝantaj en kura cirklo, supren laŭ la deklivo malantaŭ ili kaj malsupren, ĉiam denove ĉirkaŭ ilin kaj ĉiam pli proksimiĝantaj. Aragorno staris silente, kaj la du aliaj sidis senmove, scivolante kiel elturniĝos la afero.

Sen vorto aŭ krio, la rajdistoj subite haltis. Densaĵo da lancoj direktiĝis al la fremduloj; kaj iuj el la rajdistoj tenis en la mano pafarkojn, kaj la sagoj estis jam noĉitaj al la ŝnuretoj. Poste unu rajdis antaŭen, altulo, pli alta ol la ceteraj; de lia kasko fluis blanka ĉevalvosto kiel kresto. Li antaŭeniris ĝis la pinto de lia lanco preskaŭ tuŝis la bruston de Aragorno. Aragorno ne moviĝis.

— Kiu vi estas, kaj kion vi faras en tiu ĉi lando, — diris la rajdisto, uzante la komunan lingvon de la okcidento, laŭ maniero kaj tono similaj al la parolo de Boromiro, viro el Gondoro.

— Mi nomiĝas Paŝegulo, — respondis Aragorno. — Mi venis el la nordo. Mi ĉasas orkojn.

La rajdisto saltis de sia ĉevalo. Transdoninte sian lancon al aliulo kiu alrajdis kaj elseliĝis apude, li elingigis sian glavon kaj staris vizaĝ-al-vizaĝe kun Aragorno, esplorante lin atente kaj ne senmire. Fine li parolis denove.

— Komence mi supozis vin mem orkoj, — li diris, — sed nun mi vidas, ke tiel ne estas. Efektive vi scias malmulton pri orkoj, se vi ĉasas ilin tiamaniere. Ili estas rapidaj kaj bone armitaj, kaj ili estis multaj. Vi ŝanĝiĝus de ĉasantoj al predoj se vi ĝisatingus ilin. Sed io estas stranga pri vi, Paŝegulo. — Li direktis ree siajn klarajn brilajn okulojn al la disirulo. — Tio ne estas nomo konvena al homo, kiun vi anoncis. Kaj stranga estas ankaŭ via vestaĵo. Ĉu vi elsaltis la herbon? Kiel vi evitis nian vidivon? Ĉu vi estas elfpopolaj?

— Ne, — diris Aragorno. — Nur unu el ni estas elfo, Legolaso el la Arbara Regno en malproksima Mornarbaro. Sed ni trapasis Lotlorienon, kaj la donacoj kaj favoro de la Damo akompanas nin.

La rajdisto rigardis ilin kun renovigita miro, sed liaj okuloj malmoliĝis:

— Do troviĝas Damo en la Ora Arbaro, kiel rakontas la malnovaj historioj! — li diris. — Malmultaj evitas ŝiajn retojn, oni diras. Ĉi tagoj strangas! Sed se vi havas ŝian favoron, do eble ankaŭ vi estas

retplektantoj kaj sorĉistoj. — Li subite ĵetis fridan rigardon al Legolaso kaj Gimlio. — Kial vi ne parolas, silentuloj? — li demandis.

Gimlio starigis kaj firme dismetis siajn piedojn: lia mano pretenis la tenilon de lia hakilo, kaj liaj malhelaj okuloj fajreris.

— Sciigu al mi vian nomon, ĉevalmastro, kaj mi sciigos al vi la mian kaj multon krome, — li diris.

— Rilate al tio, — diris la rajdisto, fiksrigardante de supre la gnomon, — fremdulo devus sin deklari unue. Tamen mi nomiĝas Eomero, filo de Eomundo, kaj mia rango estas la Tria Marŝalo de Rajdmarkio.

— Do, Eomero, filo de Eomundo, Tria Marŝalo de Rajdmarkio, avertu vin la gnomo Gimlio, filo de Gloino, kontraŭ malsaĝaj vortoj. Vi parolas mise pri tio, kio estas bela super la atingopovo de via pensado, kaj povas senkulpiĝi vin nur manko de sprito.

La okuloj de Eomero fajris, kaj la viroj el Rohano murmuris kolere kaj proksimiĝis, antaŭenŝovante siajn lancojn.

— Mi fortranĉus vian kapon, inkluzive la barbon, se ĝi troviĝus nur iom pli malproksime de la tero, — diris Eomero.

— Ne sola li staras, — diris Legolaso, kurbigante sian pafarkon kaj almetante sagon per manoj, kiuj moviĝis pli rapide ol la vido. — Vi mortus antaŭ ol la bato trafus.

Eomero levis sian glavon, kaj la afero eble elfalus mise, sed Aragorno saltis inter ilin kaj levis sian manon.

— Pardonpete, Eomero! — li kriis. — Sed kiam vi scios pli, vi komprenos kial vi kolerigis miajn kunulojn. Ni intencas nenion malbonan al Rohano, nek al ties popolo, nek al homoj nek al ĉevaloj. Ĉu vi ne volas aŭdi nian historion antaŭ ol vi batos?

— Mi volas, — diris Eomero, mallevante sian glavon. — Sed vagantoj en Rajdmarkio pli saĝe estu malpli orgojlaj en ĉi duboplenaj tagoj. Unue sciigu al mi vian ĝustan nomon.

— Unue sciigu al mi, kiun vi servas, — diris Aragorno. — Ĉu vi estas amiko aŭ malamiko de Saŭrono, la Malhela Mastro de Mordoro?

— Mi servas nur la Mastron de Markio, Teodenon filon de Tengelolo, — respondis Eomero. — Mi ne servas la Potencon de l' malproksima Nigra Lando, tamen ni ankaŭ ne ankoraŭ malkaŝe militas kontraŭ ĝin; kaj se vi fuĝas de ĝi, prefere forlasu tiun ĉi landon. Okazas malordo nun ĉe ĉiuj niaj limoj, kaj ni estas minacataj; sed ni nur deziras esti liberaj kaj vivi kiel ni vivis, retenante la propran kaj servante nenion

fremdan mastron, ĉu bonan, ĉu malbonan. Ni bonkore bonvenigis gastojn dum l' epoko pli bona, sed nuntempe la neinvititaj fremduloj trovas nin rapidaj kaj duraj. Ek! Kiu vi estas? Kiun vi servas? Laŭ kies ordono vi ĉasas orkojn en nia lando?

— Mi servas neniun, — diris Aragorno; — sed la servantojn de Saŭrono mi persekutas kien ajn ili iras. Malmultaj inter la mortemuloj scias pli pri orkoj; kaj mi ne persekutas ilin tiel laŭ propra elekto. La orkoj, kiujn ni ĉasis, kaptis du el miaj amikoj. Pro tia neceso homo senĉevala iros piede, kaj li ne petos permeson sekvi la spurojn. Li ankaŭ ne kalkulos la kapojn malamikajn krom per glavo. Mi ne estas senarmila.

Aragorno retroĵetis sian mantelon. La elfa ingo ekbriletis kiam li kaptis ĝin kaj la brila klingo de Andurilo fajris kiel subita flamo kiam li elingigis ĝin.

— Elendilo! — li kriis. — Mi estas Aragorno, filo de Aratorno, kaj oni nomas min Elesaro, la Elfŝtono, Dunadano, heredonto de Isilduro, la filo de Elendilo el Gondoro. Jen la Glavo kiu estis Rompita kaj estas reforĝita! Ĉu vi helpas aŭ malhelpas min? Elektu rapide!

Gimlio kaj Legolaso rigardis mirigite sian kunulon, ĉar ili neniam antaŭe vidis lin en tia humoro. Li ŝajnis stature kreskinta, dum Eomero ŝrumpis; kaj sur lia viva vizaĝo ili trafis kurtan vizion pri la potenco kaj majesteco de la reĝoj el ŝtono. Momente ŝajnis al la okuloj de Legolaso, ke blanka flamo flagras sur la frunto de Aragorno kvazaŭ brilanta krono.

Eomero retropaŝis kaj sur lia vizaĝo estis mieno imponiĝa. Li mallevis siajn fierajn okulojn.

— Jen efektive estas tagoj strangaj, — li murmuris. — Songoj kaj legendoj ekvivas el la herbo. Diru al mi, mastro, — li diris, — kio venigis vin ĉi tien? Kaj kion signifas la malhelaj vortoj? Jam delonge Boromiro, filo de Denetoro, iris serĉi respondon, kaj la ĉevalo, kiun ni prunte donis al li, revenis senrajdiste. Kian sorton vi venigas el la nordo?

— La sorton de elekto, — diris Aragorno. — Vi povas diri jenon al Teodeno, filo de Tengelo: malkaŝa milito kuŝas antaŭ li, kun Saŭrono aŭ kontraŭ li. Jam neniuj rajtas vivi kiel ili vivis, kaj malmultaj retenos tion, kion ili nomas propra. Sed pri tiuj gravaj aferoj ni parolos poste. Se hazardo permesos, mi venos mem al la reĝo. Nun mi havas grandan bezonon kaj mi petas helpon aŭ almenaŭ informojn. Vi aŭdis, ke ni persekutas ork-bandon, kiu forportis niajn amikojn. Kion vi povas sciigi al ni?

— Ke ne necesas plu persekuti ilin, — diris Eomero. — La orkoj estas detruitaj.

— Kaj niaj amikoj?

— Ni trovis nur orkojn.

— Sed tio estas vere stranga, — diris Aragorno. — Ĉu vi traserĉis la mortigotojn? Ĉu ne estis kadavroj ne-orkej? Tiuj estus malgrandaj, laŭ via takso nur infanoj, senŝuaj sed grize vestitaj.

— Troviĝis nek nanoj, nek infanoj, — diris Eomero. — Ni nombris la mortintojn kaj prirabis ilin, kaj poste ni amasigis la kadavrojn kaj bruligis ilin laŭ nia kutimo. La cindroj ankoraŭ fumas.

— Ni ne parolas pri nanoj aŭ infanoj, — diris Gimlio. — Niaj amikoj estis hobitoj.

— Hobitoj? — diris Eomero. — Kaj kio estas ili? Estas stranga nomo.

— Stranga nomo de stranga popolo, — diris Gimlio. — Sed tiuj estas al ni tre karaj. Ŝajnas, ke en Rohano vi aŭdis pri la vortoj, kiuj ĝenis Minason Tirit. Ili parolis pri la duonuloj. Tiuj hobitoj estas duonuloj.

— Ĉu duonuloj! — ridis la rajdisto staranta apud Eomero. — Duonuloj! Sed tiuj estas nur eta popolo en malnovaj kantoj kaj infanaj rakontoj el la nordo. Ĉu ni promenas en legendoj aŭ sur la verda tero en taglumo?

— Eblas fari ambaŭ, — diris Aragorno. — Ĉar ne ni sed la posteuloj kreos la legendojn pri nia epoko. La verda tero, ĉu vi diras? Tio estas potenca afero legenda, kvankam vi surpaŝas ĝin en la taga lumo!

— La tempo urĝas, — diris la rajdisto, ne atentante Aragornon. — Ni devas rapidi suden, mastro. Ni lasu ĉi sovaĝulojn al iliaj fantazi-aĵoj. Aŭ ni ligu ilin kaj konduku ilin al la reĝo.

— Silentu, Eotano! — diris Eomero propralingve. — Lasu nin provizore. Diru al la *eored*, ke ĝi aranĝu sin sur la pado, kaj pretiĝu rajdi al la Entvaŝo.

Murmurante Eotano retiriĝis kaj alparolis la aliajn. Baldaŭ ili retroiris kaj lasis Eomeron sola kun la tri kunuloj.

— Ĉio kion vi diras estas stranga, Aragorno, — li diris. — Tamen vi diras la veron, tio estas klara: la homoj de Markio ne mensogas, kaj sekve ne estas facile trompeblaj. Sed ne ĉion vi rakontis. Ĉu vi ne volas nun paroli pli detale pri via komisio, tiel ke mi povu juĝi kion fari?

— Mi ekvojaĝis el Imladriso, kiel oni nomas ĝin en la rimaĵo,

antaŭ multaj semajnoj, — respondis Aragorno. — Kun mi iris Boromiro el Minaso Tirit. Mia komisio estis iri al tiu urbo kun la filo de Denetoro por helpi lian popolon en la milito kontraŭ Saŭrono. Sed la Kunularo, kun kiu mi vojaĝis, havis alian aferon. Pri ĝi mi ne povas paroli nun. Gandolfo la Griza estis nia estro.

— Gandolfo! — Eomero ekkriis. — Gandolfo Grizmantelo estas konata en Markio; sed lia nomo, mi avertas vin, ne plu estas pasvorto al la reĝa favoro. Li gastis en la lando multfoje laŭ la homa memoro, veninte laŭvole, post sezono aŭ post multaj jaroj. Li ĉiam heroldas pri strangaj okazaĵoj: Misheroldo, diras nun iuj.

» Efektive depost lia lasta alveno en la somero al ĉiuj aferoj okazis mise. Tiam komenciĝis nia problemo pri Sarumano. Ĝis tiam ni taksis Sarumanon nia amiko, sed Gandolfo venis tiam kaj avertis nin, ke subita milito prepariĝas en Isengardo. Li diris, ke li mem estis enkarcerigita en Ortanko kaj nur malfacile eskapis, kaj li petegis helpon. Sed Teodeno ne volis aŭskulti lin, kaj li foriris. Ne parolu laŭte la nomon Gandolfo al la oreloj de Teodeno! Li koleras. Ĉar Gandolfo prenis la ĉevalon, kiu nomiĝas Ombrofakso, la plej valoran el ĉiuj ĉevaloj de la reĝo, ĉefo de l' *Mearasoj*, kiun rajtas rajdi nur la Mastro de Markio. Ĉar la patro de ilia raso estis la granda ĉevalo de Eorlo, kiu scipovis la lingvon de la homoj. Antaŭ sep noktoj Ombrofakso revenis; sed la reĝa kolero ne malpliigis, ĉar la ĉevalo estas nun sovaĝa kaj permesas al neniu tuŝi ĝin.

— Do Ombrofakso sola trovis sian vojon el malproksima nordo, — diris Aragorno, — ĉar tie disiĝis li kaj Gandolfo. Sed ve! Rajdos Gandolfo ne plu. Li falis en mallumon en la Minejoj de Morio kaj ne plu eliros.

— Tio estas peza informo, — diris Eomero. — Almenaŭ al mi kaj al multaj; kvankam ne al ĉiuj, kiel vi eble konstatos, se vi alvenos la reĝon.

— Ĝi estas informo pli doloriga, ol iu ajn en tiu ĉi lando povas kompreni, kvankam ĝi eble efikos ilin severe antaŭ ol la jaro multe pli aĝiĝos, — diris Aragorno. — Sed kiam falas la grandaj, malpli grandaj devas gvidi. Mia parto estis gvidi nian Kunularon sur la longa vojo el Morio. Tra Lorieno ni venis — pri kio estus bone, ke vi ekkonu la veron antaŭ ol priparoli ĝin denove — kaj de tie laŭ la leŭgoj de la Granda Rivero ĝis la akvofaloj de Raŭroso. Tie Boromiron mortigis tiuj samaj orkoj, kiujn vi detruis.

— Ĉiuj viaj informoj estas veindaj! — ekkriis Eomero konsternite.

— Granda domaĝo estas tiu morto al Minaso Tirit, kaj al ni ĉiuj. Tiu estis meritplena viro! Ĉiuj laŭdis lin. Li venis malofte al Markio, ĉar lin ĉiam okupis la militoj ĉe la orientaj landlimoj, sed mi vidis lin. Pli simila al la rapidaj filoj de Eorlo ol al la severaj viroj de Gondoro li ŝajnis al mi, kaj verŝajne montriĝonta kiel grandioza estro de sia popolo en konvena tempo. Sed ni ricevis neniun sciigon el Gondoro pri tiu ĉi doloraĵo. Kiam li falis?

— Jam estas la kvara tago de kiam li estis mortigita, — respondis Aragorno, — kaj ekde la vespero de tiu tago ni vojaĝis el la ombro de Tol Brandiro.

— Ĉu piede? — ekkriis Eomero.

— Jes, precize kiaj vi vidas nin.

Vasta miro envenis la okulojn de Eomero.

— Paŝegulo estas nomo tro povra, filo de Aratorno, — li diris. — Flugpieda mi nomas vin. Tiun faraĵon de la tri amikoj devus oni pri-kanti en multaj haloj. Kvardek leŭgojn plus kvin vi tramezuris antaŭ fino de la kvara tago! Fortika estas la raso Elendila! Sed nun, mastro, kion vi volas, ke mi faru? Mi devas reiri haste al Teodeno. Mi parolis singarde antaŭ miaj homoj. Estas vere, ke ni ankoraŭ ne militas mal-kaŝe kontraŭ la Nigra Lando, kaj troviĝas kelkaj, proksimaj al la reĝa orelo, kiuj esprimas poltronajn konsilojn; sed milito venas. Ni ne for-lasos nian malnovan aliancon kun Gondoro, kaj dum ili batalos ni hel-pos ilin: tion diras mi kaj ĉiuj kiuj konsentas kun mi. Orient-markio estas mia komandejo, la respondeco de la Tria Marŝalo, kaj mi forigis tute niajn gregojn kaj paŝtistojn, retirinte ilin trans Entvaŝon kaj lasinte surloke nur gardistojn kaj rapidajn skoltojn.

— Do vi ne pagas tributon al Saŭrono? — diris Gimlio.

— Ni tion ne faras nek iam ajn faris, — diris Eomero kun ekfajro de l' okuloj, — kvankam venis al miaj oreloj, ke tiu mensogo estas disvastigita. Antaŭ kelkaj jaroj la mastro de l' Nigra Lando volis aĉeti de ni ĉevalojn je alta prezo, sed ni tion rifuzis, ĉar la bestojn li misutil-igas. Poste li sendis kaperantajn orkojn, kaj ili forkondukis tiom, kiom ili povis, elektante ĉiam ĉevalojn nigrajn: malmultaj el tiuj jam restas. Tiukiale nia malpaco kun la orkoj estas severa.

» Sed aktuale nin ĉefe koncernas Sarumano. Li pretendis mastr-econ de tiu ĉi tuta lando, kaj okazis milito inter ni dum multaj mona-toj. Li prenis orkojn por servi lin, kaj luprajdantojn, kaj misajn homojn, kaj li fermis kontraŭ nin la Breĉon, tiel ke ni probable estas atakotaj tiel oriente kiel okcidente.

» Estas malfacile trakti tian malamikon: li estas sorĉisto tiel ruza kiel kaŝiĝe lerta, ĉar li havas multajn aspektojn. Li iras tien-reen, oni diras, kiel maljunulo en kapuĉo kaj mantelo, tre simile al Gandolfo, kiel multaj nun memoras. Liaj spionoj trapasas ĉiujn retojn, kaj liaj birdoj misaŭguraj flugas libere sur la ĉielo. Mi ne scias, kiel ĉio finiĝos kaj mia koro dubemas; ĉar ŝajnas al mi, ke ne ĉiuj liaj amikoj loĝas en Isengardo. Sed se vi venos al la reĝa domo, vi vidos mem. Ĉu vi volas veni? Ĉu mi vane esperas, ke vi estas sendita al mi kiel helponto dum dubo kaj bezono?

— Mi venos, kiam mi povos, — diris Aragorno.

— Venu nun! — diris Eomero. — La Heredonto de Elendilo vere estus forto por la Filoj de Eorlo en tiu ĉi misa sezono. Okazas ĝuste nun batalo ĉe la Okcidentujo, kaj mi timas, ke tio finiĝos malbone por ni.

» Efektive, al tiu ĉi rajdado norden mi iris sen permeso de la reĝo, ĉar dum mia foresto lia domo estas lasita kun malmulte da gardado. Sed skoltoj avertis min antaŭ tri noktoj pri la ork-bando alvenanta el la Orienta Muro, kaj ili raportis, ke kelkaj inter ili portis la blankan insignon de Sarumano. Do suspektante tion, kion mi plej timas, nome ligon inter Ortanko kaj la Nigra Turego, mi forkondukis mian *eoredon*, virojn de mia propra sekvantaro; kaj ni ĝisvenis la orkojn je noktiĝo antaŭ du tagoj, proksime al la limoj de la Entarbaro. Tie ni ĉirkaŭis ilin, kaj ekbatalis hieraŭ je la tagiĝo. Dek kvin el miaj viroj mi perdis kaj dek du ĉevalojn, ve! Ĉar la orkoj estis pli multaj ol ni anticipis. Aliaj aliĝis al ili, veninte el la oriento el trans la Granda Rivero: iliaj spuroj estas klare videblaj iom norde de ĉi loko. Kaj ankaŭ aliaj venis el la arbaro. Grandaj orkoj, kiuj ankaŭ portis la Blankan Manon de Isengardo: tiu speco estas pli forta kaj pli dangeŝera ol ĉiuj aliaj.

» Malgraŭ tio ni detruis ilin. Sed ni tro longe forestas. Oni bezonas nin sude kaj okcidente. Ĉu vi ne volas veni? Troviĝas aldonaj ĉevaloj, kiel vi vidas. Estas farota laboro por la Glavo. Jes, kaj ni povus utiligi la hakilon de Gimlio kaj la pafarkon de Legolaso, se ili volos pardoni miajn hastajn vortojn pri la Damo de l' Arbaro. Mi nur parolis, kiel parolas ĉiuj homoj en mia lando, kaj mi volonte lernus pli bonan.

— Mi dankas vin pro viaj afablaj vortoj, — diris Aragorno, — kaj mia koro deziras akompani vin; sed mi ne povas forlasi miajn amikojn, dum restas espero.

— Espero ne restas, — diris Eomero. — Viajn amikojn vi ne trovos ĉe la nordaj limoj.

— Tamen miaj amikoj ne estas malantaŭe. Ni trovis klaran atestaĵon ne malproksime de la Orienta Muro, ke almenaŭ unu el ili ankoraŭ estis tie vivanta. Sed inter la muro kaj la montetoj ni trovis neniun alian postsignon de ili, kaj neniuj spuroj deviis tien aŭ alien, se mia lerto ankoraŭ ne forlasis min.

— Do kio okazis al ili laŭ via opinio?

— Mi ne scias. Eble ili estas murditaj kaj forbruligitaj inter la orkoj; sed vi diris, ke tio ne povas esti, kaj mi ne timas tion. Mi povas nur supozi, ke oni forportis ilin en la arbaron antaŭ la batalo, eble eĉ antaŭ ol vi ringis viajn malamikojn. Ĉu vi povas ĵuri, ke neniu eskapis tiamaniere el via reto?

— Mi pretus ĵuri, ke neniu orko eskapis post kiam ni ekvidis ilin, — diris Eomero. — Ni atingis la arbarorandon antaŭ ili, kaj se post tio iu alia vivanto trabeĉis nian ringon, tiu estis nenia orko kaj posedis ian elfan potencon.

— Niaj amikoj estas vestitaj precize kiel ni, — diris Aragorno; — kaj vi preterpasis nin en plena taglumo.

— Tion mi forgesis, — diris Eomero. — Estas malfacile certi pri io ajn inter tiom da mirindaĵoj. La mondo tute strangiĝis. Elfo kaj gnomoj kunule promenas en niaj ĉiutagaj kampoj; kaj oni parolas kun la Damo de l' Arbaro kaj tamen travivas; kaj revenas al milito la Glavo kiu estis rompita dum la longaj epokoj, antaŭ ol la patroj de niaj patroj enrajdis en Markion! Kiel juĝu homo kion fari en tia epoko?

— Kiel li juĝis ĉiam, — diris Aragorno. — Bono kaj miso ne ŝanĝiĝis depost la praepoko; kiel ili ankaŭ ne estas tiaj inter elfoj kaj gnomoj kaj aliaj inter homoj. Estas la devo de homo konstati ilin, tiom en la Ora Arbaro kiom en lia propra domo.

— Ja vere, — diris Eomero. — Sed vin mi ne pridubas, nek la faron kiun mia koro volas fari. Tamen mi ne rajtas libere fari ĉion laŭ mia volo. Kontraŭas nian leĝaron permesi, ke fremduloj vagu laŭvole en nia lando, ĝis la reĝo mem cedas al ili tiun rajton, kaj la ordono pli severas dum ĉi tagoj de danĝero. Mi petegis, ke vi revenu volonte kun mi, kaj tion vi ne volas. Mi malemas komenci batalon de cent kontraŭ tri.

— Mi ne opinias, ke via leĝaro estas kreita por tia hazardo, — diris Aragorno. — Kaj efektive mi ne estas fremdulo; ĉar mi estis en tiu ĉi lando pli frue, pli ol unufoje, kaj rajdis kun la armeo de rohananoj,

kvankam kun alia nomo kaj en alia aspekto. Vin mi ne vidis pli frue, ĉar vi estas juna, sed mi kunparolis kun Eomundo, via patro, kaj kun Teodeno filo de Tengelo. Neniam en antaŭa epoko iu ajn alta mastro de tiu ĉi lando devigis homon forlasi serĉon kia la mia. Almenaŭ mia devo estas klara: pluri. Vidu jam, filo de Eomundo, oni devas finfine elekti. Helpu nin, aŭ plej malbone lasu nin liberaj. Aŭ provu apliki vian leĝon. Se tion vi faros, troviĝos malpli multaj por reiri al via milito aŭ al via reĝo.

Eomero silentis momente, poste li parolis.

— Al ni ambaŭ necesas urĝo, — li diris. — Mia aro jukas foriri, kaj ĉiu horo malpliigas vian esperon. Jen mia elekto. Vi rajtas iri; kaj cetero mi pruntedonos al vi ĉevalojn. Nur tion ĉi mi petas: kiam via serĉo estos plenumita, aŭ pruviĝos vana, revenu kun la ĉevaloj trans Entvaŝon al Meduseldo, la alta domo en Edoraso, kie Teodeno nun sidas. Tiel vi pruvos al li, ke mi ne misjuĝis. Tiel mi metas min, kaj eble eĉ mian vivon, en la kuratorecon de via fidindeco. Ne neglektu.

— Mi ne neglektos, — diris Aragorno.

Vidiĝis granda miro kaj multaj ombraj kaj dubemaj gvatoj inter la viroj de Eomero, kiam tiu ordonis, ke la kromĉevaloj estu prunedonitaj al la fremduloj; sed nur Eotano aŭdacis paroli malkaŝe:

— Tio eble konvenas por tiu mastro de la raso el Gondoro, laŭ lia pretendo, sed kiu aŭdis pri ĉevalo de Markio donita al gnomo?

— Neniu, — diris Gimlio. — Kaj ne ĝenu vin: neniu iam aŭdos pri tio. Mi preferas marŝi ol sursidi la dorson de ajna besto tiom granda, donita ĉu sen, ĉu kun bedaŭro.

— Sed nun vi devos rajdi, aŭ vi malhelpos nin, — diris Aragorno.

— Venu, vi sidos malantaŭ mi, amiko Gimlio, — diris Legolaso. — Tiam ĉio estos en ordo, kaj al vi necesos nek pruntepreni ĉevalon, nek esti ĝenata per ĉevalo.

Oni kondukis al Aragorno grandan malhelgrizan ĉevalon, kaj li surseliĝis.

— Ĝi nomiĝas Hasufelo, — diris Eomero. — Ke ĝi portu vin taŭge kaj al fortuna pli prospere ol spertis Garulfo, ĝia antaŭa mastro.

Ĉevalo pli malgranda kaj malpli peza, sed agitiĝema kaj arda, estis kondukita al Legolaso. Arodo ĝi nomiĝis. Sed Legolaso petis, ke oni forprenu la selon kaj bridon. "Tion mi ne bezonas", — li diris kaj malpeze sursaltis, kaj je ĉies miro Arodo estis malsovaĝa kaj agopreta sub li, moviĝante tien kaj reen pro nuraj vortoj: tia estis la elfa metodo ĉe

ĉiuj bonaj bestoj. Gimlion oni suprenlevis malantaŭ lian amikon, al kiu li kroĉiĝis, apenaŭ pli senĝena ol Sam Vato en boato.

— Adiaŭ, kaj vi trovu kion vi serĉas! — kriis Eomero. — Revenu laŭeble baldaŭ, kaj niaj glavoj poste brilu kune!

— Mi venos, — diris Aragorno.

— Kaj ankaŭ mi venos, — diris Gimlio. — La afero de la Damo Galadriela daŭre kuŝas inter ni. Mi ankoraŭ devos instrui al vi parolojn ĝentilajn.

— Ni vidos, — diris Eomero. — Tiom da strangajtoj hazardis, ke lerni laŭdon al bela sinjorino sub la amaj frapoj de gnoma hakilo ne ŝajnos granda mirindaĵo. Adiaŭ!

Tion dirinte ili disiĝis. Tre rapidaj estis la ĉevaloj de Rohano. Kiam post kelka tempo Gimlio rigardis reen, la trupo de Eomero estis jam eta kaj malproksima. Aragorno ne rigardis reen: li rigardis la post-sigmojn dum la rapida antaŭeniĝo, klinante la kapon apud la kolo de Hasufelo. Post nelonge ili alvenis la bordon de Entvaŝo, kaj tie ili renkontis la aliajn spurojn, pri kiuj Eomero aludis, venantajn suben el la oriento de sur la montaro.

Aragorno elseliĝis kaj esploris la teron, poste saltis denove selen kaj forrajdis iom orienten, restante unuflanke kaj zorgante ne surrajdi la spurojn. Poste li denove elseliĝis kaj esploris la teron, piedirante jen antaŭen jen malantaŭen.

— Malmulto troveblas, — li diris reveninte. — La ĉefaj spuroj estas tute konfuzitaj pro l' trapaso de la rajdistoj, kiam ili revenis; ilia unua vojo certe kuŝis pli proksime al la rivero. Sed tiu ĉi vojo orienten estas freŝa kaj klara. Neniu spuro troviĝas tie de piedoj irantaj la kontraŭan direkton, reen al Anduino. Nun ni devos rajdi malpli rapide kaj certiĝi, ke neniuj spuroj devias ambaŭflanke. La orkoj ekde ĉi tie certe konstatis, ke ili estas ĉasataj; ili eble provis iel forigi siajn kaptitojn antaŭ ol oni alvenis ilin.

Dum ili rajdis antaŭen, la tago estis nuboplana. Malaltaj grizaj nuboj venis trans la Montaron. Nebuleto vualis la sunon. Ĉiam pli proksime superombris la arbvestitaj deklivoj de Fangorno, malrapide malheliĝantaj dum la suno iris okcidenten. Ili vidis neniujn spurojn dekstre kaj maldekstre, sed jen kaj jen ili pasis unuopajn orkojn, falhaltigitajn dum la forkuro, kun grizplumaj sagoj eniĝintaj dorse aŭ gorĝe.

Finfine, dum la posttagmezo estis forvelkanta, ili alvenis la randon de la arbarego, kaj en aperta maldensejo ili trovis la lokon de la granda bruligado: la cindroj ankoraŭ varmegis kaj fumis. Apude troviĝis amasego da kaskoj kaj maŝkirasoj, fenditaj ŝildoj kaj rompigitaj glavoj, pafarkoj kaj sagoj, kaj aliaj armaĵoj. Sur fosto en la mezo estis muntita granda goblena kapo: sur ties frakasita kasko plu videblis la blanka signo. Pli fore, apud la rivero, kie ĝi elfluis el la arbarorando, troviĝis tumulto. Ĝi estis nove kreita; la kruda tero estis kovrita de freŝe tranĉitaj herbgrunderoj: ĉirkaŭe estis starigitaj dek kvin lancoj.

Aragorno kaj ties kunuloj esploris larĝe ĉirkaŭ la batalkampoj, sed la lumo forvelkis kaj la vespero baldaŭ malheliĝis malklara kaj nebul-eca. Ĝis noktiĝo ili trovis neniun spuron de Gaja kaj Grinĉjo.

— Ni povas neniam pli, — diris Gimlio triste. — Ni frontis multajn enigmojn de kiam ni venis al Tol Brandiro, sed tiu ĉi estas plej malfacile solvebla. Mi konjektas, ke la bruligitaj ostoj de la hobitoj estas jam miksitaj kun tiuj de la orkoj. Tio estos peza informo por Frodo, se li ĝisvivos aŭdi ĝin; kaj peza ankaŭ por tiu maljuna hobito, kiu atendas en Rivendelo. Elrondo kontraŭis ilian vojaĝon.

— Sed Gandolfo ne, — diris Legolaso.

— Sed Gandolfo elektis mem vojaĝi, kaj li la unua perdiĝis, — respondis Gimlio. — Lia aŭgurado perfidis lin.

— La konsilioj de Gandolfo ne fondiĝis sur antaŭscio pri sekureco, por li aŭ por aliaj, — diris Aragorno. — Ekzistas aferoj prefere komencotaj ol rifuzotaj, eĉ se la finrezulto estas neklara. Sed mi ankoraŭ ne forlasos tiun ĉi lokon. Ĉiuokaze ni devas atendi ĉi tie la mateniĝon.

Iom ekster la batalkampoj ili bivakis sub larĝa arbo: tiu aspektis kiel kaŝtano, kaj tamen ĝi plu portis multajn larĝajn brunajn foliojn el antaŭa jaro, kvazaŭ sekaj manoj kun longaj disigitaj fingroj; tiuj klakis morne pro la nokta venteto.

Gimlio ekstremis. Ili kunportis nur po unu lankovrilon.

— Ni ĉendu fajron, — li diris. — Mi jam ne zorgas pri la danĝero. La orkoj venu tiel dense kiel someraj tineoj ĉirkaŭ kandelolo!

— Se tiuj malfeliĉaj hobitoj disvagas en la arbaro, tio eble logus ilin ĉi tien, — diris Legolaso.

— Kaj ĝi eble logus aliaĵojn, nek orkajn nek hobitajn, — diris Aragorno. — Ni proksimas al la montaj limregionoj de l' perfidulo Sarumano. Cetere ni troviĝas je la eĝo mem de Fangorno, kaj oni diras, ke estas danĝere tuŝi ties arbojn.

— Sed la rohananoj kreis grandan bruladon ĉi tie hieraŭ, — diris

Gimlio, — kaj ili faligis arbojn por la fajro, kiel videblas. Tamen ili pasigis poste la nokton ĉi tie sendomaĝe, kiam finiĝis ilia laboro.

— Ili estis multaj, — diris Aragorno, — kaj ilin ne ĝenas la kolero de Fangorno, ĉar ili malofte venas ĉi tien, kaj ili ne iras sub la arbojn. Sed niaj vojoj verŝajne kondukos nin en la arbaron mem. Do gardu vin! Tranĉu neniom da viva ligno!

— Ne necesas, — diris Gimlio. — La rajdistoj postlasis sufiĉe da splitoj kaj branĉoj, kaj morta ligno kuŝas abunde. — Li foriris por kolekti brulaĵon, kaj sin okupis per konstruo kaj ĉendo de fajro; sed Aragorno sidis silenta, dorse apogita per la granda arbo, profunde pensante; kaj Legolaso staris sola en la maldensejo, rigardante la profundan ombron de la arbaro, kliniĝante antaŭen, kiel aŭskultanto al voĉoj defore alvokantaj.

Kiam la gnomo bruligis malgrandan helan fajron, la tri kunuloj proksimiĝis al ĝi kaj sidiĝis kune, kovrante ĝian lumon per siaj kapuĉitaj figuroj. Legolaso suprenrigardis al la branĉoj de la arbo etendiĝantaj super ili.

— Vidu! — li diris. — La arbo estas kontenta pri la fajro!

Eble temis pri tio, ke la dancantaj ombroj trompis iliajn okulojn, sed certe al ĉiu el la kunuloj ŝajnis, ke la branĉoj kurbiĝas tien aŭ alien por alveni supre de la flamoj, dum la superaj branĉoj kliniĝas; la brunaj folioj nun elstaris rigide, kaj kunfrotiĝis kiel multaj malvarmaj sulketaj manoj spertantaj komforton pro la varmo.

Estis silento, ĉar subite la malhela kaj nekonata arbaro, tiel proksima, sentigis sin kiel granda minaca ĉeestaĵo plena de ia sekreta intenco. Post kelka tempo denove parolis Legolaso.

— Celeborno avertis, ke ni ne iru profunden en Fangornon, — li diris. — Ĉu vi scias kial, Aragorno? Kiaj estas la arbaraj fabeloj, pri kiuj Boromiro aŭdis?

— Mi aŭdis multajn rakontojn en Gondoro kaj aliloke, — diris Aragorno, — sed sen la vortoj de Celeborno mi taksus ilin nur fabeloj kreitaj de la homoj dum velko de vera scio. Mi pensis demandi vin pri la tuafera aŭtentikeco. Kaj se elfo de l' arbaro ne scias, kiel povu homo respondi?

— Vi pli vojaĝis ol mi, — diris Legolaso. — Mi aŭdis nenion pri ĝi en mia propra lando, krom nur kantoj kiuj rakontas kiel la onodroj, kiujn la homoj nomas entoj, tie loĝis antaŭ longe. Ĉar Fangorno estas malnova, malnova eĉ laŭ elfaj kriterioj.

— Jes, ĝi estas malnova, — diris Aragorno, — tiel malnova kiel la

arbaro apud la Dolmenejo, kaj ĝi estas multe pli granda. Elrondo diris, ke la du estas parencaj, la lastaj fortikaĵoj de la potencaj arbaroj de la pratempo, en kiuj vagis la unuenaskitoj, dum la homoj ankoraŭ dormis. Tamen Fangorno tenas ian propran sekreton. Kia ĝi estas, mi ne scias.

— Kaj mi ne volas scii, — diris Gimlio. — Nenio loĝanta en Fangorno estu ĝenata miakonte!

Ili lotumis pri la vaĉoj, kaj la loto de la unua vaĉo falis al Gimlio. La aliaj kuŝiĝis. Preskaŭ tuj dormo envolvis ilin.

— Gimlio! — diris Aragorno dormeme. — Memoru, ke estas danĝere tranĉi branĉon aŭ branĉeton de vivanta arbo en Fangorno. Sed ne vagu tro malproksimen serĉante mortan lignon. Prefere lasu, ke la fajro estingiĝu! Voku min laŭbezone!

Je tio li endormiĝis. Legolaso jam kuŝis senmova, la belaj manoj estis falditaj sur lia brusto, la okuloj nefermitaj, kunfandante vivan nokton kaj profundan sonĝon laŭ la elfa maniero. Gimlio sidis kurb- iĝinte apud la fajro, movante sian dikfingron mediteme laŭ la eĝo de sia hakilo. La arbo susuris. Mankis aliaj sonoj.

Subite Gimlio levis la kapon, kaj jen ĝuste rande de la fajrolumo staris kurb- iĝinta maljunulo, apogante sin per bastono kaj volvite en vasta mantelo; lia larĝgranda ĉapelo estis surtirita ĝis liaj okuloj. Gimlio saltstariĝis, momente tro konsternita por ekkrii, kvankam tuj fulmis en lia menso supozo ke alvenis al ili Sarumano. Aragorno kaj Legolaso, vekitaj per lia subita ekmovo, sidiĝis kaj rigardegis. La maljunulo nek parolis nek signis.

— Nu, oĉjo, kiel ni servu vin? — diris Aragorno, saltstariĝinte. — Venu varmiĝi, se vi fridas! — Li paŝis antaŭen, sed la maljunulo estis jam for. Neniu lia spuro troveblis proksime, kaj ili ne riskemis iri foren. La luno jam subiris, kaj la nokto tre mallumis.

Subite Legolaso ekkriis:

— La ĉevaloj! La ĉevaloj!

La ĉevaloj estis foririntaj. Ili eltrenis siajn ligaĵojn kaj malaperis. Dum kelka tempo la tri kunuloj staris silente kaj senmove, ĉagrenitaj pro tiu nova frapo de misfortuno. Ili estis ĉe la rando de Fangorno, kaj multegaj leŭgoj kuŝis inter ili kaj la viroj de Rohano, iliaj solaj amikoj en tiu ĉi vasta kaj danĝera lando. Dum ili senmovis, ŝajnis al ili, ke ili aŭdas, malproksime en la nokto, sonon de ĉevaloj henantaj kaj blek- antaj. Poste ĉio denove silentiĝis, krom la frida susuro de la vento.

— Nu, ili foriris, — diris Aragorno finfine. — Ni ne povas trovi ilin nek kapti ilin; do se ili ne revenos propravole, necesas ke ni malhavu ilin. Ni ekiris per la piedoj kaj tiujn ni ankoraŭ posedas.

— Piedoj! — diris Gimlio. — Sed ni ne povos manĝi ilin, same kiel marŝi per ili. — Li ĵetis iom da brulaĵo sur la fajron kaj ekkaŭris apude.

— Antaŭ nur kelkaj horoj vi ne volis sidi sur ĉevalo de Rohano, — ridis Legolaso. — Iam vi iĝos rajdemulo.

— Neverŝajnas, ke mi havos la okazon, — diris Gimlio.

— Se vi volas scii mian penson, — li rekomencis post kelka tempo, — mi opinias, ke tiu estis Sarumano. Kiu alia? Memoru la vortojn de Eomero: “Li iras tien-reen kiel maljunulo en kapuĉo kaj mantelo”. Per tiuj vortoj. Li foriris kun niaj ĉevaloj aŭ fortimigis ilin, kaj jen ni estas. Venos al ni pli da problemoj, atentu miajn vortojn!

— Mi atentis ilin, — diris Aragorno. — Sed mi rimarkis ankaŭ, ke tiu maljunulo surhavis ĉapelon anstataŭ kapuĉo. Tamen mi ne dubas, ke vi konjektas prave, kaj ĉi tie ni estas en danĝero, ĉu nokte ĉu tage. Sed dume nenio alia fareblas ol ripozi, dum tio eblas. Nun vaĉos mi dum iom da tempo, Gimlio. Mi bezonas pli mediton ol dormon.

La nokto pasis malrapide. Legolaso sekvis Aragornon, kaj Gimlio sekvis Legolason, kaj iliaj vaĉoj trenpasis. Sed okazis nenio. Ne reaperis la maljunulo, kaj la ĉevaloj ne revenis.

Ĉapitro 3

LA URUK-HAJOJ

Grinĉjo kuŝis en malhela maltrankvila sonĝo: ŝajnis, ke li aŭdas la propran voĉeton reeĥanta en nigraj tuneloj, vokantan: “Frodo, Frodo!” Sed anstataŭ Frodo centoj da hidaj orkaj vizaĝoj rikanis al li el la ombroj, centoj da hidaj brakoj kroĉiĝis al li ĉiuflanke. Kie estis Gaja?

Li vekigis. Malvarma aero blovis al lia vizaĝo. Li kuŝis surdorse. Vespero proksimiĝis, kaj la ĉielo supre malheliĝis. Li turnis sin kaj konstatis, ke la sonĝo estis apenaŭ pli malagrabla ol la vekigo. Liaj pojnoj, kruroj kaj maleoloj estis ŝnure ligitaj. Apude kuŝis Gaja, blankvizaĝa, kun malpura ĉifono volvita sur la frunto. Ĉie ĉirkaŭ ili sidis aŭ staris multnombra bando da orkoj.

Malrapide en la dolora kapo de Grinĉjo memoroj kunplektiĝis kaj disiĝis de l' sonĝ-ombroj. Kompreneble: li kaj Gaja estis forkurintaj en la arbaron. Kio influis ilin? Kial ili forkuris tiel, malatentante oldan Paŝegulon? Ili kuris grandan distancon kriante — li ne povis memori kiomdistance nek kiomtempe; kaj jen subite ili karambolis ĝuste kun grupo da orkoj: tiuj staris aŭskultante, kaj verŝajne ili ne vidis Gajan kaj Grinĉjon ĝis tiuj preskaŭ trafis en iliajn brakojn. Tiam ili kriegis, kaj dekoj da aliaj goblenoj saltis el la arboj. Gaja kaj li elingigis siajn glavojn, sed la orkoj ne volis batali, kaj nur provis kapti ilin, eĉ kiam Gaja jam fortranĉis plurajn brakojn kaj manojn. Brave, Gaja!

Poste Boromiro venis saltante inter la arboj. Li devigis ilin batali. Li mortigis multajn el ili, kaj la cetero fuĝis. Sed ili ne longe reiris, kiam ilin denove atakis minimume cent orkoj, kelkaj tre grandaj, kaj tiuj pafis hajlon da sagoj: ĉiam kontraŭ Boromiron. Boromiro blovis sian kornegon, ĝis la arbaro sonoris, kaj komence la orkoj estis maltrankvilaj kaj retiriĝis; sed kiam ne aŭdiĝis la respondo krom la eĥoj, ili atakis pli sovaĝe ol antaŭe. Grinĉjo ne memoris multon pli. Lia lasta memoro estis Boromiro sin apoganta al arbo, elplukanta sagon; poste subite mallumiĝis.

“Supozeble oni batis mian kapon, — li diris al si. — Mi scivolas, ĉu

Gaja estas grave vundita. Kio okazis al Boromiro? Kial la orkoj ne mortigis nin? Kie ni estas, kaj kien ni iras?"

Li ne povis respondi la demandojn. Li sentis sin maljuna kaj malsana. "Mi volas, ke Gandolfo neniam persvadus Elrondon permesin nian partoprenon, — li pensis. — Kion mi kontribuis? Nura ĝeno: pasaĝero, peco da pakaĵo. Kaj nun mi estas rabaĵo kaj mi estas nura peco da pakaĵo por la orkoj. Mi esperas, ke Paŝegulo aŭ iu venos postuli nin! Sed ĉu mi devus tion esperi? Ĉu tio ne misgvidus la planojn? Se nur mi povus liberiĝi!"

Li baraktis iomete, tute senutile. Unu el la orkoj apude sidantaj ekridis kaj diris ion per sia abomeninda lingvo al kunulo.

— Ripozu dum vi povas, stultuleto! — li poste diris al Grinĉjo per la Komuna Lingvo, kiun li preskaŭ tiom hidigis, kiom lia propra lingvo. — Ripozu dum vi povas! Ni trovos uzon por viaj kruroj postnelonge. Vi volos, ke vi neniom havus antaŭ ol ni alhejmigos vin.

— Se estus mia elekto, vi jam nun volus vin morta, — diris la alia. — Mi kvikigus vin, mizera rato. — Li kliniĝis super Grinĉjon, proksimigante al ties vizaĝo siajn flavajn dentaĉojn. En la mano li havis nigran tranĉilon kun longa noĉita klingo. — Kuŝu kviete, aŭ mi tiklos vin per tio ĉi, — li siblis. — Ne tiru al vi atenton, aŭ mi eble forgesos miajn ordonojn. Malbenon al la isengarduloj! *Ughúk u bagronk ŝa puŝdug Saruman-glob búbhoŝ skaj*: — li transiris al longa kolera parolado en la propra lingvo, kiu malrapide forfadis al murmurado kaj graŭlado.

Terurite Grinĉjo senmoviĝis, kvankam plifortiĝis doloro ĉe liaj pojnoj kaj maleoloj, kaj la subaj ŝtonoj boris lian dorson. Por forgesi pri si li aŭskultis silente ĉion, kion li povis aŭdi. Ĉirkaŭe aŭdiĝis multaj voĉoj, kaj kvankam la orka lingvo ĉiam sonis plena de malamo kaj kolero, ŝajnis evidente, ke io kverelsimila jam komenciĝis kaj pliardiĝis.

Grinĉjo trovis surprizite, ke multo el la paroloj estis komprenebla: multaj orkoj uzis la komunan lingvon. Evidente ĉeestis anoj el du aŭ tri malsamaj triboj, kaj ili ne komprenis la orkan lingvon unu de la aliaj. Okazis kolera debato pri la tuja farotaĵo: la irota vojo kaj kion fari pri la kaptitoj.

— Mankas tempo por mortigi ilin ĝuste, — diris unu. — Mankas ludotempo dum tiu ĉi vojaĝo.

— Tio ne eviteblas, — diris alia. — Sed kial ne mortigi ilin rapide,

mortigi ilin jam nun? Ili estas malbeninda ĝeno, kaj al ni urĝas. Proksimiĝas vespero, kaj ni devus ekhasti.

— Ordonoj, — diris tria voĉo per profunda graŭlo. — “Mortigu ĉiujn, sed NE la duonulojn: ili estas alportendaj VIVANTAJ laŭeble baldaŭ”. Jen miaj ordonoj.

— Por kio oni deziras ilin? — demandis pluraj voĉoj. — Kial vivantaj? Ĉu ili provizas bonan amuzon?

— Ne! Mi aŭdis, ke unu el ili posedas ion, ion necesan por la milito, iun elfan kompleton aŭ alian. Ĉiuokaze ili ĉiuj estos pridemanditaj.

— Ĉu nur tion vi scias? Kial ni ne priserĉu ilin kaj malkovru? Ni eble trovus ion de ni mem uzindan.

— Tio estas komento tre interesa, — rikanis voĉo, malpli laŭta ol la aliaj, sed pli malvirta. — Mi eble devos raporti tion. La kaptitoj estas NE priserĉotaj, nek prirabotaj: jen *miaj* ordonoj.

— Ankaŭ la miaj, — diris la profunda voĉo. — “Vivantaj kaj kiel kaptitaj; neniom da priŝtelado”. Jen miaj ordonoj.

— Ne niaj ordonoj! — diris unu el la pli fruaj voĉoj. — Ni venis ĉi longan vojaĝon el la Minejoj por mortigi, kaj venĝi niajn popolanojn. Mi volas mortigi kaj poste reiri norden.

— Do vi devas repensi la volon, — diris la graŭla voĉo. — Mi estas Ugluko. Mi estras. Mi reiras al Isengardo laŭ la plej mallonga vojo.

— Ĉu Sarumano estas la mastro aŭ la Granda Okulo? — diris la malvirta voĉo. — Ni devus reiri tuj al Lugburzo.

— Se ni povus transiri la Grandan Riveron, tio eblus, — diris alia voĉo. — Sed ni ne estas sufiĉe multaj por riski subeniron al la pontoj.

— Mi venis transen, — diris la malvirta voĉo. — Flugilhava nazgulo atendas nin norde sur la orienta bordo.

— Eble, eble! Poste vi forflugos kun niaj kaptitoj kaj ricevos la tutajn monkompenson kaj laŭdojn en Lugburzo, kaj lasos nin piediri laŭhazarde tra la Ĉeval-lando. Ne, ni devas resti kune. Ĉi lokoj estas danĝeraj: plenaj je fiaj ribelantoj kaj kaperistoj.

— Ja, ni devas resti kune, — graŭlis Ugluko. — Mi ne fidus al vi, etaj porkaĉoj. Mankas al vi medolo ekster la propraj stinkejoj. Sen ni vi ĉiuj estus forkurintaj. Ni estas batalemaj uruk-hajoj! Ni mortigis la grandan militestron. Ni kaptis la kaptitojn. Ni estas la servistoj de Sarumano la Saĝa, la Blanka Mano: tiu Mano, kiu provizas al ni por manĝi homkarnon. Ni venis el Isengardo kaj gvidis vin ĉi tien, kaj ni regvidos vin laŭ vojo de ni elektita. Mi estas Ugluko. Mi diris.

— Vi diris pli ol sufiĉe, Ugluko, — rikanis la malvirta voĉo. — Mi

scivolas kiel tio impresus ilin en Lugburzo. Eble ili konkludus, ke la ŝultroj de Ugluko bezonas malŝarĝiĝon je kapo ŝvelinta. Oni eble demandus, de kie venis liaj strangaj ideoj. Ĉu ili eble venis de Sarumano? Kiu *li* supozas sin, memstarigante kun siaj makulitaj blankaj insignoj? Ili eble konsentus kun mi, kun Griŝnaĥo, ilia fidata komisiito. Kaj mi, Griŝnaĥo, diras jenon: Sarumano estas stultulo, kaj stultulo fie perfidema. Sed la Granda Okulo gvatas lin. "Porkaĉoj", ĉu vere? Kiel plaĉas al vi nomiĝi "porkaĉoj" per la fekrastuloj de makulita sorĉisteto? Orkan karnon manĝas ili, mi garantias.

Multaj kriegoj en orka lingvo respondis, kaj la sonora siblego de elingigataj armiloj. Singarde Grinĉjo ĉirkaŭruliĝis, esperante vidi la okazontaĵon. Liaj gardintoj iris partopreni la lukton. En la krepusko li vidis grandan nigran orkon, verŝajne Uglukon, staranta fronte al Griŝnaĥo, mallonga kurbkrura kreaĵo, tre larĝa kaj havanta longajn brakojn, kiuj pendis preskaŭ ĝis la tero. Ĉirkaŭ ili estis multaj goblenoj pli malgrandaj. Grinĉjo supozis ilin tiuj el la nordo. Ili havis elingigitajn tranĉilojn kaj glavojn, sed hezitis ataki Uglukon.

Ugluko kriis, kaj nombro de aliaj orkoj, preskaŭ same grandaj kiel li, alkuris. Tiam subite, senaverte, Ugluko saltis antaŭen kaj per du rapidaj batoj fortranĉis la kapojn de du el siaj kontraŭuloj. Griŝnaĥo paŝis flanken kaj malaperis en la ombrojn.

La aliaj cedis, kaj unu paŝis malantaŭen kaj sakre stumblofalis pro la kuŝanta korpo de Gaja. Tamen tio verŝajne savis lian vivon, ĉar la kunuloj de Ugluko transsaltis lin kaj distranĉis alian per siaj larĝklingaj glavoj. Tiu estis la flavdentaĉa gardinto. Lia korpo falis rekte sur Grinĉjon ankoraŭ tenante la longan noĉklingan tranĉilon.

— Eningigu la armilojn! — kriis Ugluko. — Kaj neniom pli da idiotajaĵo! Ni iros rekte okcidenten de ĉi tie kaj suben laŭ la ŝtuparo. De tie rekte al la montetoj, poste laŭlonge de la rivero ĝis la arbaro. Kaj ni marŝos tage kaj nokte. Ĉu klare?

"Nu, — pensu Grinĉjo, — se nur tiu malbelulo bezonos iom da tempo por ekregi sian trupon, mi havas eblecon", — venis al li ekbrilo da espero. Eĝo de la nigra tranĉilo tranĉetis lian brakon, poste glisis ĝis lia pojno. Li konsciis pri flueto de sango sur sia mano, sed li ankaŭ sentis fridan tuŝon de ŝtalo sur sia haŭto.

La orkoj pretiĝis marŝi denove, sed iuj el la norduloj estis daŭre malemaj, kaj la isengardanoj mortigis ankoraŭ du antaŭ ol la ceteraj estis timigitaj. Okazis multe da sakrado kaj konfuziĝo. Provizore Grinĉjo estis negardata. Liaj kuroj estis firme ligitaj, kaj liaj manoj

kunligitaj pojne estis antaŭ li. Li povis movi ilin samtempe, kvankam la ligaĵo estis kruele strikta. Li flanken puŝis la mortintan orkon, poste apenaŭ riskante spiri li frotis la nodon de l' pojnligaĵo supren-suben laŭlonge de la tranĉila klingo. Tiu estis akra, kaj la mano de l' mortinto tenis ĝin rigida. La ŝnuro estis tranĉita! Rapide Grinĉjo tenis ĝin per siaj fingroj kaj nodis ĝin denove kiel malstrikta brakingon el du maŝoj kaj pasigis ĝin trans la manojn. Poste li kuŝis tre senmove.

— Levu tiujn kaptitojn! — kriis Ugluko. — Ne faru trukojn per ili! Se ili ne estos vivaj, kiam ni venos hejmen, mortos ankaŭ iu alia.

Orko kaptis Grinĉjon kvazaŭ sakon, metis sian kapon inter la litigitajn manojn kaj trenis ilin suben, ĝis la vizaĝo de Grinĉjo estis premegita al la orka nuko; poste la orko skue ekmarŝis. Alia simile traktis Gajan. La grifeca mano de la orko kroĉiĝis kiel fero al la brakoj de Grinĉjo; la ungoj pikegis lin. Li fermis siajn okulojn kaj reglisis en songojn turmentajn.

Subite li estis denove ĵetita al ŝtona planko. Estis frue en la nokto, sed la korna luno jam descendis okcidenten. Ili troviĝis rande de klifo, kiu ŝajnis elrigardi al maro da pala nebuleto. Aŭdiĝis en la proksimo sono de falanta akvo.

— Finfine la skoltoj revenis, — diris proksima orko.

— Nu, kion vi eltrovis? — graŭlis la voĉo de Ugluko.

— Nur unu rajdanton, kaj li fuĝis okcidenten. La vojo estas senobstakla nun.

— Nun, tre povas esti. Sed kiom longe? Idiotoj! Vi devis mortpafi lin. Li alarmos. La damnindaj ĉevalbredantoj aŭdos pri ni antaŭ la mateno. Jam ni devos vojaĝi duoble rapide.

Ombro kliniĝis super Grinĉjo. Tiu estis Ugluko.

— Sidiĝu! — diris la orko. — Miaj knaboj tediĝas portaĉi vin. Necesas, ke ni subengrimpu, kaj vi devos utiligi la krurojn. Estu kunlaborema nun. Nenia kriado, nenia provo eskapi. Ni scias kompensi trukojn laŭ maniero malagrabla, kvankam tio ne lezos vian valoron por la Mastro.

Li tranĉis la ŝnurojn ĉirkaŭ la kruroj kaj maleoloj de Grinĉjo, levis lin per lia hararo kaj starigis lin surpieden. Grinĉjo falis kaj Ugluko ree levstarigis lin per la haroj. Pluraj orkoj ridis. Ugluko premis flaknon inter liajn dentojn kaj verŝis en lian gorĝon iom da bruna likvaĵo: li sentis transflui lin varmegan sovaĝan ardon. Malaperis la doloroj en liaj kruroj kaj maleoloj. Li povis stari.

— Nun la alian! — diris Ugluko. Grinĉjo vidis, ke li iris al Gaja, kiu kuŝis proksime, kaj piedbatis lin. Gaja ĝemis. Kaptante lin malmilde Ugluko trenis lin al sidpozicio kaj deŝiris la bandaĝon de lia kapo. Poste li ŝmiris la vundon per ia malhela unĝento el ligna skatoleto. Gaja elpuŝis krion kaj energie baraktis.

La orkoj manklakis kaj kriaĉis.

— Ne akceptas sian kuracilon, — ili mokis. — Ne scias, kio estas bona al li. Aj! Poste ni ĝuos amuzaĵojn.

Sed tiumomente Ugluko ne okupiĝis pri amuzaĵoj. Necesis rapidi kaj pacigi la maleman sekvantaron. Li kuracis Gajan orkmaniere; kaj la rimedo efikis rapide. Kiam li trudis trinkaĵon el sia flakono en la gorgon de l' hobito, tranĉis la krurŝnurojn kaj trenlevis lin, Gaja starigis, aspekte pala sed seriozmiena, defia kaj ege vigla. La surfrunta vundo jam ne ĝenis lin, sed li havis brunan cikatron ĝis la vivofino.

— Saluton, Grinĉjo! — li diris. — Do ankaŭ vi partoprenas tiun etan ekspedicion, ĉu? Kie ni dormos-matenmanĝos?

— Atentu! — diris Ugluko. — Tio manku! Ligu la langojn. Neniom da interparolo. Malhelpoj estos raportitaj ĉe la celo, kaj Li scios, kiel rekompenci vin. Vi ja ricevos dormon-matenmanĝon: pli ol vi povos gluti.

La orka bando komencis malsupreniri laŭ streta ravino kondukanta ĝis la suba nebuleta ebenaĵo. Gaja kaj Grinĉjo, disigitaj de dek orkoj aŭ pli, subengrimpis kune. Ĉe la fundo ili surpaŝis herbon, kaj la koroj de la hobitoj plikuraĝiĝis.

— Jam rekte antaŭen! — kriis Ugluko. — Okcidenten kaj iomete norden. Sekvu Lugduŝon.

— Sed kion ni faros je tagiĝo? — diris iuj el la nordanoj.

— Daŭrigi la kuradon, — diris Ugluko. — Kion vi supozas? Ĉu sidi surherbe kaj atendi ĝis la blankhaŭtuloj aliĝos al la pikniko?

— Sed ni ne povas kuri en la sunlumo.

— Vi kuros kun mi malantaŭe, — diris Ugluko. — Kuros! Aŭ vi neniam plu revidos viajn amatajn loĝtruojn. Je la Blanka Mano! Kiom utilas sendi por vojaĝo montajn larvojn, nur duone trejnitaĵojn. Kuru, damninduloj! Kuru dum la nokto daŭras!

Tiam la tuta grupo komencis kuri per la longaj saltaj paŝegoj de orkoj. Ili observis nenan ordon, puŝante, ŝovante kaj sakrante; tamen ilia rapido estis tre granda. Ĉiun hobiton gardis triopo. Grinĉjo troviĝis tre malantaŭe en la spaliro. Li scivolis kiom longe li kapablos

progresi tiapaŝe: manĝaĵon li ne havis depost la mateno. Unu el liaj gardantoj havis vipon. Sed aktuale la orka likvoro ankoraŭ ardis en li. Ankaŭ lia cerbo estis vigla.

De tempo al tempo venis al lia menso vizio pri la entuziasma vizaĝo de Paŝegulo kliniĝanta al malhela postsignaro kaj kuranta, kuranta malantaŭe. Sed kion povus vidi eĉ disirulo krom konfuzitaj spuroj de orkaj piedoj? Liaj propraj spuretoj kaj tiuj de Gaja estis forigitaj per la tramplado de la ferplandaj ŝuoj antaŭ ili kaj malantaŭ ili kaj ĉirkaŭ ili.

Ili progresis nur proksimume unu mejlon for de la klifo, kiam la tereno deklivis suben al larĝa malprofunda konkavejo, kie la grundo molis kaj malsekis. Tie kuŝis nebuleto pale ekluma sub la lastaj radioj de la korna luno. La malhelaj figuroj de la orkoj antaŭe malklariĝis kaj poste estis englutitaj.

— Aj! Estu singardaj! — kriis Ugluko de malantaŭe.

Subita penso alsaltis al Grinĉjo en la menson, kaj li tuj ekagis. Li deviis dekstren kaj plonĝis el atingo de sia kroĉiĝema gardanto, celante kapantaŭen en la nebuleton; li alteriĝis sur la herbon diskuŝe.

— Haltu! — kriegis Ugluko.

Sekvis momenta malordo kaj konfuziĝo. Grinĉjo saltleviĝis kaj ekkuris. Sed la orkoj persekutis lin. Iuj subite abruptis rekte antaŭ li.

“Ne espereblas eskapo! — pensis Grinĉjo. — Sed espereblas, ke mi lasis kelkajn proprajn signojn netuŝitaj sur la malseka tero”. Li palpis ĉe la kolo per siaj du ligitaj manoj, kaj malkroĉis la broĉon de sia mantelo. Ĝuste kiam kaptis lin longaj brakoj kaj duraj krifoj li lasis ĝin fali. “Tie ĝi kuŝos supozeble ĝis la fino de tempo, — li pensis. — Mi ne scias kial mi faris tion. Se eskapis la aliaj, ili verŝajne iris ĉiuj kun Frodo”.

Vipo volviĝis ĉirkaŭ liaj kruroj kaj li subpremis krion.

— Sufiĉe! — kriis Ugluko alkurante. — Li ankoraŭ devos kuri longan vojon. Kurigu ilin ambaŭ! Uzu la vipon nur kiel memorigilon.

— Sed tio ne finiĝas, — li minacis, sin turninte al Grinĉjo. — Mi ne forgesos. Pago estas nur prokrastita. Ek al.

Nek Grinĉjo nek Gaja multe memoris pri la posta parto de l' vojaĝo. Misaj sonĝoj kaj misaj vekiĝoj kunfandiĝis en longa mizer-tunelo, kun espero ĉiam pli velkanta malantaŭe. Ili kuris, kuradis, klopodante atingi la rapidecon starigitan de l' orkoj, frapite de tempo al tempo per kruela vipŝnuro ruze manipulita. Kiam ili haltis aŭ stumblis, oni kaptis kaj trenis ilin kelkan distancon.

La varmo de la orka trinkaĵo jam malaperis. Grinĉjo denove sentis sin malvarma kaj vomema. Subite li falis vizaĝaltere. Duraj manoj kun ŝirantaj ungegoj alkroĉiĝis kaj levis lin. Li estis portata denove kvazaŭ sako, kaj mallumo ekestis: ĉu mallumo de alia nokto aŭ blind-eco de la okuloj, li ne povis scii.

Malklare li ekkonstatis pri voĉoj bruegantaj: ŝajne multaj orkoj postulis halton. Ugluko kriegis. Li sentis sin teren ĵetita, kaj li kuŝis ĝis nigraj songoj envolvis lin. Sed ne longe li eskapis el doloroj; baldaŭ la fera kroĉiĝo de senkompataj manoj trafis lin denove. Dum longa tempo li estis frapetita kaj skuita, kaj poste la mallumo malrapide cedis kaj li revenis al la vekiga mondo kaj konstatis, ke estas mate-
ne. Ordonoj estis kriataj, kaj li estis krude ĵetita sur la herbon.

Tie li kuŝis kelkan tempon luktante kontraŭ malespero. Lia kapo turniĝis, sed pro la ardo en la korpo li divenis, ke oni havigis al li plian glutaĵon. Orko kliniĝis super li kaj ĵetis al li iom da pano kaj strion da nekuirita sekigita karno. Li avida manĝis la malfreŝan grizan panon, sed ne la viandon. Li estis malsatega, sed ankoraŭ ne tiom malsatega, ke li manĝus viandon ĵetitan al li de orko, karnon de estaĵo kies natu-
ron li ne volis konjekti.

Li sidiĝis kaj ĉirkaŭrigardis. Gaja troviĝis proksime. Ili estis ĉe la bordo de rapidega mallarĝa rivero. Antaŭe baŭmis montoj: iu alta pinto ricevis la unuajn radiojn de la suno. Ombra makulo da arbar-ego kuŝis antaŭ ili sur la subaj deklivoj.

Okazis multe da kriado kaj debatado inter la orkoj; kverelo ŝajnis denove komenciĝonta inter la nordanoj kaj la isengardanoj. Iuj indikis retroen al la sudo kaj iuj indikis orienten.

— Nu, bone, — diris Ugluko. — Lasu ilin al mi do! Nenia mortig-ado, kiel mi diris al vi pli frue; sed se volas forĵeti ĉion, kion ni venis la tutan vojon akiri, forĵetu ĝin! Mi prizorgos tion, la batalemaj uruk-haĵoj faru la laboron kiel kutime. Se vi timas la blankhaŭtulojn, kuru! Kuru! Jen la arbarego, — li diris, indikante antaŭen. — Atingu ĝin! Tio estas la plej favora ebleco. Iru jam! Kaj rapide, antaŭ ol mi forbatos ankoraŭ kelkajn kapojn por iom saĝigi la ceterajn.

Okazis iom da sakrado kaj interpuŝiĝo kaj poste plimulto el la nord-anoj forŝiriĝis kaj forkuris, pli ol cento da ili, kurante malorde laŭ la riverbordo al la montoj. La hobitoj postrestis kun la isengardanoj: malhela minaca trupo, minimume okdeko da grandaj malpalaj oblikv-okulaj orkoj kun grandaj arkpafiloj kaj mallongaj larĝklingaj glavoj. Kelkaj el la pli grandaj kaj pli kuraĝaj nordanoj restis kun ili.

— Nun ni traktos pri Griŝnaĥo, — diris Ugluko; sed eĉ kelkaj el liaj propraj sekvantoj rigardis maltrankvile suden.

— Mi scias, — graŭlis Ugluko. — La damnindaj ĉevalknaboj kons-tatis pri ni. Pri tio tute kulpas vi, Snago. Oni devus fortranĉi al vi kaj al la aliaj skoltoj la orelojn. Sed ni estas batalistoj. Ni jam festmanĝos ĉevalkarnon, aŭ ion pli bonan.

Tiam Grinĉjo vidis, kial kelkaj truĉanoj indikis orienten. De tiu di-rekto nun venis raŭkaj krioj, kaj jen estis denove Griŝnaĥo, kaj dorse de li kvardeko da similuloj: longbrakaj kurbakruraj orkoj. Sur iliaj ŝil-
doj estis pentrita po ruĝa okulo. Ugluko antaŭen paŝis renkonte al ili:

— Do vi revenis? — li diris. — Repensis la aferon, ĉu?

— Mi revenis por certigi, ke la ordonoj estu plenumitaj kaj la kaptitoj estu sekuraj, — respondis Griŝnaĥo.

— Ĉu vere! Malŝparo de energio. Mi certigos, ke la ordonoj estu plenumitaj sub mia komando. Kaj por kio cetera vi revenis? Vi haste foriris. Ĉu vi ion postlasis?

— Mi postlasis stultulon, — grincvoĉis Griŝnaĥo. — Sed akompa-nis lin kelkaj bravuloj tro valoraj por perdi. Mi sciis, ke vi gvidos ilin en fatrason. Mi venis por helpi ilin.

— Bonege! — ridis Ugluko. — Sed krom se vi havas medolon por batali, vi elektis malĝustan vojon. Lugburzen estis prefere via celo. Venas la blankhaŭtuloj. Kio okazis al via trezora nazgulo? Ĉu oni mortpafis sub li alian rajdbeston? Vidu, se vi kunportus lin, tio eble estus utila — se tiuj nazguloj estas tiaj, kiaj oni pretendas.

— *Nazgulo, nazgulo*, — diris Griŝnaĥo, tremetante kaj lekante siajn lipojn, kvazaŭ tiu vorto posedus fetoran guston, kiun li gustu-mas senplezure. — Vi preparolas tion, kio estas profunda ekster atingo de viaj kotecaj songoj, Ugluko. *Nazguloj!* Ha! Tiaj, kiaj oni pretendas! Venos tago, kiam vi volos, ke tion vi ne diris. Simio! — li grincvoĉis atakeme. — Vi devus scii, ke ili estas la pupiloj de l' Granda Okulo. Sed ankoraŭ ne la flugilhavaj nazguloj: ankoraŭ ne, ankoraŭ ne. Li anko-raŭ ne volas permesi, ke ili montru sin vivaj trans la Granda Rivero, ne tro baldaŭ. Ili estas por la Milito — kaj aliaj celoj.

— Vi ŝajnas bone informita, — diris Ugluko. — Pli ol konvenas al vi, mi konjektas. Eble tiuj en Lugburzo interesiĝos pri la kielo kaj kialo. Sed dume la uruk-haĵoj el Isengardo rajtas kiel kutime fari la taskaĉojn. Ne staru tie bavante! Kunordigu vian kanajlaron! La aliaj porkaĉoj forkuras al la arbarego. Prefere vi sekvu. Vi ne reatingus vivaj la Grandan Riveron. Jam komencu! Tuj! Mi estos ĉekalkane.

La isengardanoj denove kaptis Gajan kaj Grinĉjon kaj pendigis ilin ĉedorse. Poste la trupo ekiris. Horon post horo ili kuradis, paŭzante de tempo al tempo por ĵeti la hobitojn al aliaj portantoj. Ĉu pro tio, ke ili estis pli rapidaj kaj pli fortikaj, ĉu pro iu alia plano de Griŝnaĥo, la isengardanoj iom post iom trapasis la orkojn el Mordoro, kaj la trupanoj de Griŝnaĥo kunamasiĝis malantaŭe. Baldaŭ ili pliproksimiĝis al la antaŭaj nordanoj. La arbarego komencis malforiĝi.

Grinĉjo estis kontuzita kaj gratita, lian doloran kapon rastis la malpuraĉa nuko kaj haroza orelo de la orko lin tenanta. Tuj antaŭe estis kurbigitaj dorsoj kaj fortikaj dikaj kruroj moviĝantaj supren-suben, supren-suben senripoze, kvazaŭ ili estus konstruitaj el dratoj kaj kornaĵoj, eltaktantaj la koŝmarajn sekundojn de senfina tempo.

Posttagmeze la trupo de Ugluko atingis la nordanojn. Tiuj ekvelkis sub la radioj de l' hela suno, kvankam vintra suno brilanta en pala friska ĉielo; iliaj kapoj estis malaltaj kaj iliaj langoj pendolis.

— Larvaĉoj! — mokis la isengardanoj. — Vi estas kuiritaj. La blankhaŭtuloj kaptos vin kaj manĝos vin. Ili venas.

Ekkrio de Griŝnaĥo montris, ke tio ne estis nura ŝerco. Ja rajdantoj rapidege estis ekviditaj: ankoraŭ en malproksimo sed malforiĝantaj al la orkoj, malforiĝantaj al ili, kiel tajdo surplateja al homoj vagantaj en movsablo.

La isengardanoj komencis kuri duoble rapide, kio mirigis Grinĉjon, terura akceliĝo tio ŝajnis je fino de vetkuro. Poste li vidis, ke la suno sinkas, descendante malantaŭ la Nebulecajn Montojn; ombroj etendiĝis tra la tereno. Ankaŭ la soldatoj el Mordoro levis siajn kapojn kaj ekkuris pli rapide. La arbarego estis malluma kaj proksima. Ili jam preterpasis kelkajn disajn arbojn. La tereno komencis deklivi supren, ĉiam pli krute; sed la orkoj ne haltis. Ugluko kaj Griŝnaĥo ambaŭ kriegis, spronante ilin al lasta peno.

“Ili tamen sukcesos. Ili eskapos”, — pensis Grinĉjo. Kaj poste li sukcesis tordi sian kolon por retrorigardi per unu okulo trans la ŝultron. Li vidis, ke rajdistoj fore oriente jam paralelas la orkojn galopante trans la ebenaĵon. La sunsubiro origis ties lancojn kaj kaskojn kaj ekbriletis sur iliaj fluaj haroj. Ili enbaris la orkojn malhelpante ties diskuron kaj pelante ilin laŭlonge de la rivero.

Li tre scivolis, kiaj personoj ili estas. Li jam bedaŭris, ke li ne lernis pli en Rivendelo nek pli ofte rigardis mapojn kaj tiajn aferojn; sed tiutempe la vojaĝplanoj ŝajnis troviĝi en manoj pli kompetentaj, kaj li

neniam antaŭvidus distranĉiĝon de Gandolfo aŭ Paŝegulo aŭ eĉ Frodo. Pri Rohano li memoris nur, ke la ĉevalo de Gandolfo, Ombrofakso, devenis de tiu lando. Tio ŝajnis esperiga ĝis certa grado.

“Sed kiel ili scios, ke ni ne estas orkoj? — li pensis. — Supozeble ili neniam aŭdis pri hobitoj ĉi-regione. Supozeble mi devus ĝoji, ke la fiaj orkoj verŝajne estas detruotaj, sed mi prefere saviĝu mem”. Plej probable li kaj Gaja estos mortigitaj kune kun siaj kaptintoj antaŭ ol la rohananoj eĉ sciigis pri ili.

Kelkaj rajdistoj ŝajnis esti pafarkistoj, lertaj pafadi desur kuranta ĉevalo. Rajdinte rapide ĝis celdistanco ili pafis sagojn kontraŭ la orkojn kiuj postrestis, kaj pluraj el tiuj falis; poste la rajdistoj forturniĝis el celdistanco de l' respondaj pafarkoj de la malamikoj, kiuj pafis malorde ne riskante halti. Tio okazis multfoje, kaj unufoje sagoj trafis inter la isengardanoj. Unu el ili, ĝuste antaŭ Grinĉjo, stumblofalis kaj ne plu leviĝis.

Noktiĝis sen tio, ke la rajdistoj proksimiĝis por batalo. Multaj orkoj jam falis, tamen restis almenaŭ ducent. En la frua mallumo la orkoj alvenis teraltaĵeton. La rando de l' arbarego tre proksimis, verŝajne ne pli ol tri okonojn da mejlo, sed ili ne kapablis pluiri. La rajdistoj ĉirkaŭis ilin. Grupeto malobeis la ordonon de Ugluko kaj kuris plu al la arbarego: nur tri revenis.

— Nu, jen ni estas, — ĉikanis Griŝnaĥo. — Bela estreco! Espereble la granda Ugluko elkondukos nin denove.

— Demetu tiujn duonulojn! — ordonis Ugluko malatentante Griŝnaĥon. — Vi, Lugduŝo, nomu du aliajn kaj gardostaru apud ili. Ili estas ne mortigotaj, krom se la fiaj blankhaŭtuloj trabreĉos. Ĉu komprenite? Dum mi vivas, mi volas ilin. Sed ili ne elkriu kaj ili ne estu elsavitaj. Ligu iliajn krurojn!

La lasta parto de tiu ordono estis senkompate plenumita. Sed Grinĉjo konstatis, ke la unuan fojon li proksimas al Gaja. La orkoj kreis grandan bruon, kriante kaj klakante per siaj armiloj, kaj la hobitoj sukcesis interflustri dum kelka tempo.

— Tion ĉi mi ne alte taksas, — diris Gaja. — Mi sentas min preskaŭ elĉerpita. Ŝajnas al mi, ke mi ne povus rampi pli multe, eĉ se mi estus libera.

— *Lembaso!* — flustris Grinĉjo. — *Lembaso.* Mi havas iom. Ĉu vi? Al mi ŝajnas, ke ili nenion prenis escepte de niaj glavoj.

— Jes, mi havis paketon en mia poŝo, — respondis Gaja, — sed ĝi

verŝajne eretiĝis. Ĉiuokaze mi ne kapablas enpoŝigi mian buŝon!

— Tio ne necesos. Mi... — sed tiumomente sovaĝa piedbato avertis Grinĉjon, ke la bruoj sordiniĝis, kaj la gardantoj atentis.

La nokto estis malvarma kaj senmova. Ĉie ĉirkaŭ la altaĵeto, sur kiu amasiĝis la orkoj, ekbrulis gardfajretoj ore ruĝaj en la mallumo, kompleta ringo da ili. Ili estis pafarke atingeblaj, sed la rajdistoj ne montris sin kontraŭ la lumoj, kaj la orkoj malŝparis multajn sagojn alpafante la fajrojn, ĝis Ugluko ĉesigis tion. La rajdistoj aŭdigis nenion sonon. Pli poste dum la nokto, kiam la luno aperis el la nebuleto, de tempo al tempo ili vidiĝis, ombrecaj figuroj foje briletantaj en la blanka lumoj, dum ili moviĝis en senĉesa patrolado.

— Ili atendas la sunon, damnu ilin! — graŭlis unu el la gardantoj. — Kial ni ne kuniĝas kaj traimpetas? Kion olda Ugluko supozas sin faranta, mi ŝatus scii.

— Verŝajne vi ŝatus, — grincis Ugluko, alpaŝante de poste. — Ĉu vi asertas, ke mi tute ne pensas, ha? Damnu vin! Vi samas la alian kanajlaron: la larvaĉojn kaj la simiojn de Lugburzo. Ne utilas impeti kun ili. Ili simple kvikus kaj forkurus, kaj troviĝas pli ol sufiĉe el tiuj fiaj ĉevalknaĵoj por balai nian trupon sur la ebenaĵo. Nur unu aferon kapablas tiuj larvaĉoj: ili vidas kiel gufoj en la mallumo. Sed tiuj blankhaŭtuloj havas pli kapablajn nokt-okulojn ol la plimultaj homoj, laŭ miaj informoj; kaj ne forgesu iliajn ĉevalojn! Tiuj povas vidi la nokt-venteton, aŭ tiel oni diras. Tamen unu aferon la bravuloj ne scias: Maŭhuro kaj ties knaĵoj estas en la arbarego kaj pli-malpli tuje prezentiĝos.

La vortoj de Ugluko sufiĉis verŝajne por trankviligi la isengardanojn; sed la ceteraj orkoj estis samtempe senkuraĝigitaj kaj ribelemaj. Ili postenigis kelkajn gardantojn, sed la plimulto kuŝis sur la tero ripozante en la agrabla mallumo. Efektive, iĝis denove tre mallume; ĉar la luno pasis okcidenten en densan nubaron, kaj Grinĉjo povis vidi nenion pli ol kelkpaŝe malproksimen. La fajroj havigis nenion da lumoj al la altaĵeto. Tamen la rajdistoj ne kontentis nur atendi ĝis la aŭroro kaj permesi, ke la malamikoj ripozu. Subita tumulto oriente de la altaĵeto montris, ke io misas. Ŝajnis ke iuj homoj rajdis proksimen, glisis desur la ĉevaloj, rampis al la rando de l' bivakejo kaj mortigis plurajn orkojn, kaj poste malaperis denove. Ugluko alkuris por malhelpi fuĝegon.

Grinĉjo kaj Gaja eksidis. Iliaj gardantoj isengardaj jam akompanis Uglukon. Sed se la hobitoj pensis eskapi, tiu plano baldaŭ ruiniĝis. Longa haroza brako kaptis ambaŭ ĉe la nuko kaj kuntrenis ilin. Ili

malklare konstatis inter si la kapegon kaj hidan vizaĝon de Griŝnaĥo; ties fetora spiro tuŝis iliajn vangojn. Li komencis palpi kaj esploraĉi ilin. Grinĉjo tremetis, kiam duraj fridaj fingroj palpserĉis laŭ lia dorso.

— Nu, miaj etuloj! — flustris Griŝnaĥo. — Ĉu ĝuas belan ripozon? Aŭ ne? Iom malagrabla lokite, eble: glavoj kaj vipoj unuflanke kaj timindaj lancoj aliflanke! Etuloj devus ne enmiksiĝi en aferojn por ili tro grandajn. — Liaj fingroj daŭre palpserĉis. Vidiĝis lumo kvazaŭ de pala tamen varmega fajro profunde en liaj okuloj.

Subite venis ekpenso en la menson de Grinĉjo, kvazaŭ rekte perita el la urĝa pensado de lia malamiko: “Griŝnaĥo scias pri la Ringo! Li serĉas ĝin, dum Ugluko estas okupata: li probable deziras ĝin por si”. Malvarma timo estis en la koro de Grinĉjo, tamen samtempe li priensis, kiel profiti el la deziro de Griŝnaĥo.

— Al mi ŝajnas, ke vi ne trovos ĝin tiamaniere, — li flustris. — Ĝi ne estas facile trovebla.

— *Trovos ĝin?* — diris Griŝnaĥo: liaj fingroj ĉesis rampi kaj kaptis la ŝultron de Grinĉjo. — *Trovos kion? Pri kio vi parolas, etulo?*

Momente Grinĉjo silentis. Poste en la mallumo li subite kreis sonon en la gorĝo:

— *Golum', golum'.* Pri nenio, mia trezorego, — li aldonis.

La hobitoj sentis tiki la fingrojn de Griŝnaĥo.

— Oh ho! — siblis la gobleno mallaŭte. — Tion li celas, ĉu? Oh ho! Ege eg-e danĝere, etuloj miaj.

— Eble, — diris Gaja, jam vigla kaj konscia pri la konjekto de Grinĉjo. — Eble, kaj ne nur al ni. Tamen vi pli bone scias gvidi la proprajn aferojn. Ĉu vi deziras ĝin aŭ ne? Kaj kion vi donus por ĝi?

— Ĉu mi deziras ĝin? Ĉu mi deziras ĝin? — diris Griŝnaĥo kvazaŭ perpleksa, sed liaj brakoj tremetis. — Kion mi donos por ĝi? Kion signifas tio?

— Signifas, — diris Grinĉjo, elektante zorge siajn vortojn, — ke senutilas palpi en la mallumo. Ni povus ŝpari al vi tempon kaj ĝenojn. Sed unue malligu niajn krurojn, aŭ ni faros nenion kaj diros nenion.

— Miaj karaj vundeblaj etaj stultuloj, — siblis Griŝnaĥo, — ĉion, kion vi havas kaj ĉion kion vi scias, oni eligos el vi ĝustatempe: ĉion! Vi volos, ke vi konu pli por rakonti satige al la Demandisto, ja vere: tre baldaŭ. Ni ne rapidigu la enketon. Ho ve ne! Kial, laŭ via opinio, ni tenas vin vivaj? Miaj karaj etuloj, bonvolu kredi, ke tio ne estas pro bonkoreco: tiun malvirton eĉ Ugluko ne havas.

— Tion mi facile kredas, — diris Gaja. — Sed vi ankoraŭ ne hejm-

igis vian predon. Kaj aferoj ŝajnas ne evolui laŭ viaj deziroj, kio ajn okazas. Se ni alvenos Isengardon, profitos ne la granda Griŝnaĥo: Sarumano prenos ĉion troveblan. Se vi volas ion por vi mem, nun estas la tempo marĉandi.

Griŝnaĥo komencis perdi sian prudenton. Precipe la nomo Sarumano ŝajnis kolerigi lin. La tempo pasis kaj la tumulto sordiniĝis. Ugluko aŭ la isengardanoj povus reveni ajnmomente.

— Ĉu vi ĝin havas — unu aŭ alia? — li grincvoĉis.

— *Golum', golum'!* — diris Grinĉjo.

— Malligu niajn krurojn! — diris Gaja.

Ili sentis la brakojn de l' orko tremi malmilde.

— Damnu vin, vi fiaj bestaĉoj! — li siblis. — Ĉu malligi viajn krurojn? Mi malligos ĉiun tendenon en viaj korpoj. Ĉu vi supozas, ke mi ne kapablas priserĉi vin ĝis la ostoj? Priserĉi vin! Mi distranĉos vin ambaŭ ĝis tremantaj ĉifonoj. Mi ne bezonas helpon de viaj kruroj por forigi vin — kaj havi vin por mi mem!

Subite li kaptis ilin. La forto de liaj longaj brakoj kaj ŝultroj estis timegiga. Li enŝovis ilin sub po unu akselon, kaj premegis ilin sovaĝe al siaj flankoj; granda sufoka manego klakfermis iliajn buŝojn. Poste li saltis antaŭen, kliniĝante suben. Rapide kaj silente li iris, ĝis li venis al la rando de la altaĵeto. Tie, elektinte breĉon inter la orkaj gardantoj, li pasis kiel misa ombro en la nokton, suben laŭ la deklivo kaj okcidenten al la rivero, kiu elfluis el la arbarego. Tiudirekte estis larĝa apertejo kun unusola fajro.

Irinte dekon da paŝoj li haltis, gvatante kaj aŭskultante. Nenio estis videbla aŭ aŭdebla. Li pluiris malrapide, klinita preskaŭ kunfalde. Poste li kaŭris kaj denove aŭskultis. Poste li stariĝis kvazaŭ riskonte subitan kuregon. Ĝuste tiumomente, malhela figuro de rajdanto aperis antaŭ li. Ĉevalo snufis kaj baŭmis. Viro ekkriis.

Griŝnaĥo ĵetiĝis teren, trenante la hobitojn sub sin; poste li elingiĝis sian glavon. Sendube li intencis mortigi la kaptitojn, prefere ol lasi ilin eskapi aŭ saviĝi; sed tio detruis lin. La glavo tintis mallaŭte kaj iom briletis pro la lumo de fajro fora maldekstre. Sago venis fajfe el la mal-lumo: ĝi estis lerte celita aŭ sorte gvidita, kaj ĝi trapikis lian dekstran manon. Li lasis fali la glavon kaj kriĉis. Aŭdiĝis rapidaj hufobatoj, kaj ĝuste kiam Griŝnaĥo saltleviĝis kaj ekkuris, li estis alrajdita kaj lin trapikis lanco. Li elpuŝis hidan treman kriegon kaj kuŝis senmova.

La hobitoj restis premitaj al la tero kiel lasis ilin Griŝnaĥo. Alia rajdisto venis senprokraste por helpi sian kamaradon. Ĉu pro speciala

vidpovo aŭ pro iu alia sentumo, la ĉevalo saltis leĝere trans ilin; sed ties rajdanto ne vidis ilin kuŝantajn, kovritajn de siaj elfaj manteloj, tro premitajn momente kaj tro timplenajn por moviĝi.

Finfine Gaja ekmoviĝis kaj flustris mallaŭte:

— Ĝis tio en ordo, sed kiel *ni* evitu trapikiĝon?

La respondo venis preskaŭ tuj. La krioj de Griŝnaĥo avertis la orkojn. Pro la krioj kaj kriĉoj venantaj de la altaĵeto, la hobitoj konjektis, ke ilia malapero estas rimarkita: Ugluko probable forhakis ankoraŭ kelkajn kapojn. Tiam subite aŭdiĝis respondaj krioj de orkaj voĉoj de dekstre, ekster la cirklo de gardfajroj, el direkto de l' arbarego kaj la montoj. Maŭhuro evidente venis kaj atakis la sieĝantojn. Aŭdiĝis galopantaj ĉevaloj. La rajdistoj ringe proksimiĝis al la altaĵeto, riskante la orksagojn por malhelpi eblan ekimpeton, dum trupo forrajdis por trakti la novajn venintojn. Subite Gaja kaj Grinĉjo konstatis, ke nemiĝinte ili jam troviĝas ekster la cirklo: nenio staris inter ili kaj eskapo.

— Nun, — diris Gaja, — se nur estus liberaj niaj kruroj kaj manoj, ni eble sukcesus forkuri. Sed mi ne povas tuŝi la nodojn kaj mordi ilin mi ne povas.

— Ne necesas provi, — diris Grinĉjo. — Mi intencis diri al vi, ke mi sukcesis liberigi miajn manojn. Jenaj maŝoj funkcias nur ŝajnige. Prefere vi manĝu unue iom da *lembaso*.

Li forigis la ŝnurojn de siaj pojnoj kaj elfosis paketon. La kukoj estis rompitaĵ sed bonstataj, ankoraŭ en la folivolvaĵoj. La hobitoj manĝis du-tri pecojn. Ties gusto revokis al ili memorojn pri belaj vizaĝoj kaj ridado kaj saniga nutraĵo dum kvietaj tagoj jam malproksimaj. Kelktempe ili maĉis penseme, sidante en la malhelo, senatente pri la krioj kaj sonoj de la apuda batalo. Grinĉjo la unua rekonsciis pri la aktuala.

— Necesas ekiri, — li diris. — Duonmomenton! — La glavo de Griŝnaĥo kuŝis proksime, sed ĝi estis tro peza kaj mallerta por li, do li rampis antaŭen kaj trovinte la kadavron de l' gobleno li elingigis longan akran tranĉilon. Per ĝi li rapide tratranĉis iliajn ligaĵojn.

— Jam temp' está! — li diris. — Varmiĝinte iomete ni eble povos ekstari denove kaj marŝi. Sed ĉiukaze ni preferu komenci rampe.

Ili rampis. La herbaĵo estis profunda kaj cedema kaj tio helpis ilin; sed ĝi ŝajnis longa lanta sperto. Ili larĝe evitis la gardofajron, kaj serpentumis antaŭen iom post iom, ĝis ili atingis randon de l' rivero ade gluglanta en la nigraj ombroj sub siaj profundaj bordoj. Tiam ili retrorigardis.

La sonoj forvelkis. Evidente Maŭhuro kaj ties “knaboj” estis mortigitaj aŭ forpeltitaj. La rajdantoj reiris al sia silenta minaca vigilado. Tio ne daŭros multe pli longe. Jam la nokto estis longe daŭrinta. Oriente, kie restis sennube, la ĉielo komencis paliĝi.

— Ni devas trovi kaŝejon, — diris Grinĉjo, — aŭ oni vidos nin. Tute ne konsolos nin, se tiuj rajdantoj rimarkos post nia morto, ke ni estis ne orkoj. — Li stariĝis kaj terenbatis la piedojn. — Tiuj ŝnuroj tranĉis min kvazaŭ dratoj; sed miaj piedoj komencas revarmiĝi. Mi jam povus marŝi ŝanceliĝe. Kiel statas vi, Gaja?

Gaja stariĝis.

— Jes, — li diris, — mi kapablas. *Lembasoj* vere kuraĝigas! Pli sana sento, cetere, ol la ardo de tiu orka likvaĵo. Mi scivolas el kio ĝi estis farita. Prefere ne scii, supozeble. Ni glutu iom da akvo por forlavi pensojn pri ĝi.

— Ne ĉi tie, la bordo tro abruptas, — diris Grinĉjo. — Antaŭen!

Ili turniĝis kaj marŝis unu apud la alia malrapide laŭlonge de la rivero. Malantaŭ ili la lumo en la oriento plifortiĝis. Marŝante ili komparis spertojn, babilante hobitmaniere leĝere pri la okazaĵoj post ilia kaptiĝo. Aŭskultante ne divenus pro iliaj vortoj, ke ili travivis kruelon kaj spertis mortminacan danĝeron irante senespere al turmento kaj morto; nek eĉ ke ĉi-momente, kiel ambaŭ bone sciis, la eblo estis malgranda, ke ili iam retrovos amikojn aŭ sekurecon.

— Ŝajnas, ke vi faris sufiĉe bone, mastro Tjuko, — diris Gaja. — Al vi estos dediĉita preskaŭ ĉapitro en la libro de olda Bilbo, se mi iam havos eblecon raporti al li. Bona laboro: precipe la diveno pri l' ludeto de tiu haroza kanajlo kaj via instigo al li. Sed mi scivolas, ĉu oni iam rimarkos viajn postsignojn kaj trovos tiun broĉon? Mi malŝatus perdi la mian, sed mi timas, ke la via estas por ĉiam mankonta.

» Mi devos laborigi miajn piedojn, se mi volos atingi vin. Efektive, kuzo Brandoboko nun devancas. Jen lia enirpunkto. Mi supozas, ke vi apenaŭ scias, kie ni troviĝas; sed mi pasigis la tempon en Rivendelo pli utile. Ni marŝas okcidenten laŭlonge de Entvaŝo. Antaŭ ni estas la finaĵo de l' Nebulecaj Montoj kaj Arbarego Fangorno.

Ĝuste kiam li parolis, baŭmis rekte antaŭe la malhela rando de l' arbarego. La nokto ŝajnis fuĝinta sub ĝiajn arbegojn, rampante for de l' venonta aŭroro.

— Gvidu antaŭen, mastro Brandoboko! — diris Grinĉjo. — Aŭ gvidu retro! Ni estas avertitaj pri Fangorno. Sed tia klerulo certe ne forgesis tion.

— Ja ne, — respondis Gaja, — sed la arbaro ŝajnas al mi preferinda ol returniĝo en la mezon de l' batalo.

Li engvidis sub la grandajn branĉojn de l' arbejoj. Preterdivene maljunaj ili ŝajnis. Grandaj treniĝaj likenbarboj pendis de ili, bloviĝante kaj balanciĝante pro la venteto. Tra la ombroj gvatis la hobitoj, retrorigardante laŭ la deklivo: etaj kaŝiĝemaj figuroj, kiuj en la malbrila lumo aspektis kiel elfaj infanoj en la tempoprofundo, mire gapantaj el la Sovaĝa Arbaro pro sia unua tagiĝo.

Fore trans la Granda Rivero kaj la Brunaj Terenoj, foraj je pluraj mejloj, venis la aŭroro, ruĝa kiel flamo. Laŭte sonoris la ĉaskornoj salute al ĝi. La rajdistoj el Rohano subite aktiviĝis. Korno revokis denove al korno.

Gaja kaj Grinĉjo aŭdis, klaran en la frida aero, henadon de batalĉevaloj kaj subitan kantadon de multaj homoj. La rando de l' suno estis leviĝinta, fajra arko, super la marĝenon de l' mondo. Tiam la rajdistoj kun kriego impetis el la oriento; la ruĝa lumo ekardis sur maŝkirasoj kaj lancoj. La orkoj ekkriis kaj pafis ĉiujn sagojn restintajn al ili. La hobitoj vidis falon de pluraj rajdantoj; sed ilia linio eltenis supren laŭ la altaĵeto kaj transen, kaj retroturniĝis kaj denove alimpetis. La plimultaj kaperuloj ankoraŭ vivaj disiĝadis kaj disfuĝis, persekutataj unuope ĝis la morto. Sed unu grupo, kunteniĝante en nigra kojno, rezolute impetis direkte al la arbarego. Rekte supren laŭ la deklivo ili elanis al la rigardantoj. Jam ili proksimiĝis, kaj ŝajnis certe, ke ili eskapos: ili jam trahakis tri rajdantojn, kiuj baris la vojon.

— Ni rigardis tro longe, — diris Gaja. — Jen Ugluko! Mi ne volas renkonti lin denove. — La hobitoj turniĝis kaj fuĝis profunden en la ombrojn de la arbaro.

Pro tio ili ne vidis la lastan defion, kiam Ugluko estis atingita kaj devigita stari reziste ĉe la rando mem de Fangorno. Tie lin finfine mortigis Eomero, la Tria Marŝalo de Markio, kiu deseliĝis kaj kontraŭbatalis lin per glavo kontraŭ glavo. Kaj tra la larĝaj kampoj la akr-okulaj rajdistoj mortige persekutis tiujn malmultajn orkojn, kiuj eskapis kaj ankoraŭ fortis sufiĉe por fuĝi.

Poste, amasiginte siajn falintajn kamaradojn kaj kantinte laŭde al ili, la rajdistoj bruligis fajregon kaj disĵetis la cindrojn de siaj malamikoj. Tiel finiĝis la rabinvado, kaj pri ĝi neniam venis informoj al Mordoro kaj Isengardo, sed la fumo de la bruligo leviĝis alte en la ĉielon kaj estis vidita de multaj atentemaj okuloj.

Ĉapitro 4

ARBOBARBO

Dume la hobitoj progresis tiel rapide, kiel permesis la malhela kaj implikita arbaro, laŭlonge de la fluanta rojo okcidenten kaj supren al la montdeklivoj, pli kaj pli funden en Fangornon. Iom post iom formortis ilia timo pri la orkoj, kaj ilia irado malstreĉiĝis. Stranga sento de sufokiĝo trafis ilin, kvazaŭ la aero estus tro maldensa aŭ tro nesufiĉa por spirado.

Finfine haltis Gaja.

— Ni ne povos daŭrigi tiel, — li anhelis. — Mi bezonas iom da aero.

— Ni trinku ĉiuokaze, — diris Grinĉjo. — Mi plensekiĝis. — Li surgrimpis grandan arbradikon kiu kurbiĝis en la rojon, kaj kliniĝante levis iom da akvo per siaj kavigitaj manoj. Ĝi estis klara kaj frida, kaj li glutis multfoje. Gaja sekvis lin. La akvo refreŝigis ilin kaj ŝajnis feliĉigi iliajn korojn; dum kelka tempo ili sidis kune ĉerande de la rojo trempante siajn dolorajn piedojn kaj krurojn kaj ĉirkaŭrigardante al la arboj, kiuj staris silente en la proksimo, vic-post-vice ĝis ili malaperis en grizan krepuskon ĉiudirekte.

— Supozeble vi ne jam perdigis al ni la vojon? — diris Grinĉjo apogante sin al granda arbotrunko. — Ni povos almenaŭ sekvi la fluejon de tiu ĉi rivereto, Entvaŝo, aŭ kiel vi nomas ĝin, kaj reeliri tie, kie ni eniris.

— Tion ni povus se niaj kruroj kapablus, — diris Gaja, — kaj se ni povus spiri senĝene.

— Jes, ĉi tie estas tre malhele kaj sufoke, — diris Grinĉjo. — Ĝi iel memorigas min pri la malnova ĉambro en la Granda Domo de Tjukoj malantaŭe inter la smialoj ĉe Tjukboro: grandega loko, kie dum generacioj la mebloj estis nek movitaj nek ŝanĝitaj. Oni diras, ke la Olda Tjukoj loĝadis en ĝi jaron post jaro, dum li kaj la ĉambro kune plioldiĝis kaj pli kadukiĝis — kaj ĝi estas neniam ŝanĝita depost lia morto, antaŭ jarcento. Kaj Olda Geronto estis mia prapraavo, kio distancigas tion. Sed tio neglektindas kompare kun la maljuneca sento de tiu ĉi arbaro. Vidu tiujn plorajn treniĝajn barbojn kaj hararojn da likeno! Kaj la plimultaj arboj ŝajnas duonkovritaj de ĉifonaj sekaj folioj

neniam falintaj. Malnete. Mi ne povas imagi kiel aspektus ĉi tie printempo, se ĝi iam venus, des malpli printempa purigado.

— Sed almenaŭ la suno devas engvati kelkfoje, — diris Gaja. — Ĝi tute ne aspektas aŭ sentiĝas kiel la priskribo pri la Mornarbaro de Bilbo. Tiu estis tute malluma kaj nigra kaj la hejmo de sombraj nigraĵoj. Tiu ĉi nur malhelas kaj estas ege arbeka. Oni tute ne povas imagi, ke *bestoj* loĝadus ĉi tie aŭ restus longe.

— Ne, ankaŭ ne hobitoj, — diris Grinĉjo. — Kaj ankaŭ ne plaĉas al mi la supozo, ke ni provu trairi ĝin. Nenio manĝebla tra cent mejloj, mi emas kredi. Kiel statas nia provianto?

— Malabunde, — diris Gaja. — Ni forkuris kun nenio krom du-tri pakajoj da *lembaso*, kaj ĉion alian ni postlasis. — Ili rigardis la restaĵon de la elfaj kukoj: sufiĉe da rompitaĵoj por ĉirkaŭ kvin magraj tagoj, jen ĉio. — Kaj nenia volvtuko aŭ lankovrilo, — diris Gaja. — Ni sentos nin malvarmaj ĉi-nokte, kien ajn ni iros.

— Nu, prefere ni nun decidu pri la vojo, — diris Grinĉjo. — La mateno certe ekoldiĝas.

Ĝuste tiam ili konsciiĝis pri flava lumo aperinta iom pli funde en la arbaro: strioj da sunlumo ŝajnis subite penetrantaj la arbaran supron.

— Atentu! — diris Gaja. — La suno verŝajne kovriĝis de nubo dum ni estis sub ĉi arboj, kaj nun reaparis; aŭ alternative ĝi supreniĝis sufiĉe alte por trarigardi suben iun breĉon. Ne estas malproksime — ni iru esplori!

Ili trovis tion pli malproksima ol ili supozis. La tereno ankoraŭ leviĝis apike, kaj fariĝis ĉiam pli ŝtonoza. La lumo plilarĝiĝis, dum ili pluiris kaj baldaŭ ili vidis antaŭ si rokmuron: flanko de monteto aŭ abrupta ekstremo de iu longa radiko elpuŝita de la distaj montoj. Neniu arbo kreskis sur ĝi, kaj la suno plentrafis ĝian ŝtonan frunton. La arbaj branĉeretoj ĉe ĝia subaĵo estis etenditaj rigide kaj senmove, kvazaŭ streĉante sin al la varmo. Tie ĉio antaŭe aspektis tiom mal-freŝa kaj griza, la arbaro jam ekbrilis je riĉaj brunoj kaj la glataj griznigroj de arboŝelo kiel polurita ledo. La arbotrunkoj ardis malmolverde kiel juna herbo: fruprintempo aŭ provizora vizio pri ĝi ĉirkaŭis ilin.

Surfrunte de la ŝtona muro troviĝis io ŝtuparsimila: eble natura kaj kreita per la vetero kaj fendiĝo de la rokoj, ĉar ĝi estis kruda kaj mal-ebena. Altsupre, preskaŭ samnivele kun la suproj de l' arboj, estis malgranda breto sub klifo. Nenio kreskis tie escepte de kelkete da herbo kaj loloj ĉe ĝia rando kaj unusola maljuna arbostumpo, al kiu restis

nur du kurbaj branĉoj: ĝi aspektis preskaŭ kiel figuro de tuberoza maljunulo staranta tie, palpebrumante en la matena lumo.

— Do supren! — diris Gaja ĝojplene. — Atendas spirebla aero kaj videbla tereno!

Ili grimpis kaj surkrablis la rokon. Se la ŝtuparo estis artefarita, ĝi celis piedojn pli grandajn kaj kruojn pli longajn ol la iliaj. Ili tro entuziasmis por miri pri la rimarkinda kuraciĝo de l' vundetoj kaj kontuzoj pro ilia kaptiteco kaj pri la reveno de ilia viglo. Ili venis finfine al la eĝo de la breto preskaŭ sube de l' maljuna arbotrunko. Tiam ili supren saltis kaj turniĝis prezentante siajn dorsojn al la deklivo, profunde spirante kaj rigardante orienten. Ili konstatis, ke ili penetris en la arbaron nur tri aŭ kvar mejlojn: la arbopintoj etendiĝis suben al la ebenajo. Tie apud la franĝo de l' arbaro altaj spiraloj da serpentuma nigra fumo leviĝis, ŝanceliĝante kaj flosante al ili.

— La vento ŝanĝas direkton, — diris Gaja. — Ĝi denove turniĝis orienten. Ĉi tie sentiĝas freŝe.

— Jes, — diris Grinĉjo, — mi timas, ke temas pri nura pasema ekbrilo kaj poste ĉio denove griziĝos. Kiel domaĝe! Tiu ĉi vila maljuna arbaro aspektis tiel malsame en la sunlumo. Mi preskaŭ sentis, ke mi ŝatas ĝin.

— Preskaŭ sentis, ke vi ŝatas la Arbaregon! Tre bone! Vi ekstreme ĝentilas, — diris nekonata voĉo. — Turnu vin kaj permesu, ke mi rigardu viajn vizaĝojn. Mi preskaŭ sentas, ke mi malŝatas vin ambaŭ, sed ni ne tro impetu. Turnu vin! — Granda nod-artika mano estis metita al ŝultro de ambaŭ, kaj ili estis ĉirkaŭturnitaj malsovaĝe tamen nerezisteble, poste du grandaj brakoj levis ilin supren.

Ili konstatis, ke ili rigardas vizaĝon eksterordinaran. Ĝi apartenis al granda homsimila, preskaŭ trolsimila, figuro alta almenaŭ dek kvar futojn, tre fortika kun alta kapo kaj preskaŭ nenioma kolo. Ĉu ĝi estis vestita en ŝtofo simila al verda kaj griza arboŝelo, aŭ ĉu tio estis ĝia felo, estis malfacile juĝebla. Ĉiuokaze la brakoj proksime al la trunko estis ne sulketitaj, sed kovritaj per bruna glata haŭto. La piedegoj havis po sep fingroj. La suban parton de la longa vizaĝo kovris abunda griza barbo, hirta, preskaŭ branĉeteska ĉeradike, maldensa kaj muska ĉefine. Sed tiumomente la hobitoj rimarkis malmulton krom la okuloj. Tiuj profundaj okuloj nun esploris ilin, lante kaj gravmiene, sed tre penetre. Ili estis brunaj, muaraj je verda lumo. En posta tempo Grinĉjo ofte provis priskribi sian unuan impreson pri ili.

“Oni sentis, ke post ili estas enorma puto plena da eonoj da memoro kaj longa malrapida senŝancela pensado; sed ilia surfaco ekbriletis je la estanteco: kiel sunlumo tremanta ĉe la eksteraj folioj de vasta arbo, aŭ sur la ondetiĝo de tre profunda lago. Mi ne scias, sed sentiĝis kvazaŭ io kreskinta en la tero — dormanta eble aŭ nur sentanta sin io inter radikopinto kaj foliopinto, inter profunda tero kaj ĉielo, subite vekigis kaj esploras onin per la sama malrapida zorgemo, kian ĝi dediĉis dum senfinaj jaroj al siaj propraj internaj aferoj”.

— *Hrum, hum*, — murmuris la voĉo, voĉo profunda kiel tre basa ligna blovinstrumento. — Vere tre strange! Ne hastu, jen mia devizo. Sed se mi vidus vin antaŭ ol aŭdi viajn voĉojn — ili plaĉis al mi: agrablaj etaj voĉoj, ili pensigis min pri io, kion mi ne povas memori — se mi vidus vin antaŭ ol aŭdi vin mi surtretus vin, supozante vin malgrandaj orkoj, kaj poste konstatus mian eraron. Tre strangaj vi estas efektive! Je radiko kaj branĉeto, tre strangaj!

Grinĉjo, kvankam ankoraŭ mirigita, ne plu sentis timon. Antaŭ tiuj okuloj li spertis kuriozan necertecon, sed ne timon.

— Mi petas, — li diris, — kiu vi estas? Kaj kio vi estas?

Stranga mieno aperis en tiuj maljunaj okuloj, speco de singardemo; la profundaj putoj kovriĝis.

— *Hrum, do*, — respondis la voĉo, — nu, mi estas ento, aŭ tiel oni nomas min. Jes, ento estas la vorto. Mi estas *la* ento, vi povus diri laŭ via parolmaniero. *Fangorno* estas mia nomo laŭ iuj, aliaj faras ĝin *Arbobarbo*. *Arbobarbo* konvenos.

— Ĉu *ento*? — diris Gaja. — Kio estas tio? Sed kiel vi nomas vin mem? Kio estas via reala nomo?

— Hu nu! — respondis *Arbobarbo*. — Hu! Rivele nebele! Ne tiom haste. Kaj estas *mi*, kiu starigas demandojn. Vi troviĝas en *mia* tereno. Kio estas *vi*, mi scivolos. Mi ne povas identigi vin. Vi ŝajnas ne aperi sur la malnovaj listoj, kiujn mi parkeris kiam juna. Sed tio estis antaŭ tre tre longe, kaj eble oni kompilis novajn listojn. Mi pripensu! Kiel tio elfalis?

Lernu la veron pri la Vivantoj!
Listu la kvaron, la liberulojn:
ege prapraaj, la elf-infanoj;
gnomoj-fosantoj, sombras la domoj;
entoj elteraj, monte maljunaj;
homoj mortemaj, mastroj ĉevalaj:

Hm, hm, hm.

*Konstrua kastoro, cervo saltema,
Urs' abelĉasa, apro ataka;
hundo malsatas, timas leporo...*

hm, hm.

*Aglo en alto, bov' en paŝtejo,
damao kornkrona; ek! akcipitro,
cigno plej blankas, fridas serpento...*

Hum, hm; hum, hm, kia ĝi estis? Rum tam, rum tam, rume tum tam.
Ĝi estis listo longa. Sed vi ĉiuokaze ŝajnas ne enlistiĝi!

— Ni ŝajnas ĉiam ellasitaj el la malnovaj listoj kaj rakontoj, —
diris Gaja. — Tamen ni ekzistas jam sufiĉe longe. Ni estas *hobitoj*.

— Kial ne verki novan version? — diris Grinĉjo:

Duonulaj hobitoj en truaj domoj.

Inkluzivu nin inter la kvaroj, apud la homoj (la granda popolo), kaj tio
trafas.

— Hm! Ne malbone, ne malbone, — diris Arbobarbo. — Tio
sufiĉus. Do vi loĝas en truoj, ĉu? Tio sonas tre juste kaj ĝuste. Tamen
kiu nomas vin *hobitoj*? Tio ne sonas al mi elfe. Elfoj kreis ĉiujn mal-
novajn vortojn, ili komencigis ĉion.

— Aliuloj ne nomas nin hobitoj; ni mem nomas nin tiel, — diris
Grinĉjo.

— Hum, hm! Atentu! Ne tiom haste! Vi nomas *vin mem* hobitoj,
ĉu? Sed vi ne devus sciigi tion al ĉiu nekonato. Vi rivelos la proprajn
realajn nomojn, se vi ne gardos vin.

— Ni ne gardas nin pri tio, — diris Gaja. — Efektive mi estas
Brandoboko, Gajadoko Brandoboko, kvankam kutime oni alinomas
min Gaja.

— Kaj mi estas Tjuko, Peregrino Tjuko, sed oni ĝenerale nomas
min Grinĉjo.

— Hm, sed vi *estas* popolo hasta, mi konstatas, — diris Arbo-
barbo. — Honoras min via konfido, sed vi devus ne esti tiom malkaŝaj
senrezerve. Ekzistas entoj kaj aliaj entoj, sciuj; aŭ estas entoj kaj aĵoj
aspektantaj kiel entoj, sed ne estas, oni povas diri. Mi nomos vin Gaja
kaj Grinĉjo, se vi permesas — agrablaj nomoj. Ĉar mi ne intencas sci-
igi al vi *mian* nomon, nu ĉiuokaze ankoraŭ ne. — Stranga duonsagaca

duonhumura mieno aperis kun verda ekflagro en liaj okuloj. — Ekzemple, tio postulus tre longan tempon: mia nomo plilongiĝas la tutan tempon, kaj mi tre tre longe vivis; do *mia* nomo similas rakonton. En mia lingvo realaj nomoj rakontas la historion de tiu al kiu ili apartenas, en la praenta, kiel oni povas diri. Tio estas lingvo aminda, sed okupas longan tempon diri ion per ĝi, ĉar ni ne diras en ĝi ion, krom se valoras okupi longan tempon per la dirado kaj por la aŭskultado.

» Sed nun, — la okuloj iĝis tre helaj kaj *estantecaj*, ŝajne pliet-iĝantaj kaj preskaŭ akriĝantaj, — kio okazas? Kiel vi rolas en la tuto? Mi povas vidi kaj aŭdi (kaj flari, kaj senti) de sur jena, de sur jena, de sur jena *a-lalla-lalla-rumba-kamanda-lind-or-burúmë*. Pardonu min: tio estas parto de mia nomo por ĝi; mi ne konas la vorton en la eksteraj lingvoj: vi scias, tio kion ni suras, kie mi staras kaj elrigardas en belaj matenoj kaj pensas pri la suno, kaj la herbo ekster la arbaro, kaj la ĉevaloj, kaj la nuboj, kaj la disvolviĝo de la mondo. Kio okazas? Kion faras Gandolfo? Kaj tiuj — *burárum*, — li eligis basan murmurigan sonon kiel misagordon ĉe orgenego, — tiuj orkoj, kaj juna Sarumano en Isengardo? Mi ŝatas informojn. Sed ne tro haste jam.

— Okazas sufiĉe multe, — diris Gaja, — kaj eĉ se ni klopodus hasti, necesus longa tempo por rakonti ĝin. Sed vi diris, ke ni ne hastu. Ĉu ni devas sciigi al vi ion ajn tiel baldaŭ? Ĉu vi taksus malĝentile, se ni demandus, kion vi intencas fari pri ni, kaj kiun flankon vi subtenas? Kaj ĉu vi konis Gandalfon?

— Jes, mi konas lin: la solan sorĉiston, kiu vere zorgas pri arboj, — diris Arbobarbo. — Ĉu vi konas?

— Jes, — diris Grinĉjo malĝoje, — ni konas. Li estis bonega amiko, kaj li estis nia gvidanto.

— Do mi povas respondi viajn aliajn demandojn, — diris Arbobarbo. — Mi ne intencas fari ion ajn *pri* vi: nome se per tio vi volas diri “fari ion *al* vi” sen via permeso. Ni eble faros kelkajn aferojn kune. Mi nenion scias pri *flankoj*. Mi sekvas propran vojon, sed eble via vojo koincidos dum kelka tempo kun la mia. Sed vi parolas pri Mastro Gandolfo, kvazaŭ li estus en historio finiĝinta.

— Jes, tion ni faras, — diris Grinĉjo malĝoje. — La historio verŝajne daŭras, sed bedaŭrinde Gandolfo elfalis el ĝi.

— Ha, atentu! — diris Arbobarbo. — Hu hm, nu ja. — Li paŭzis, longe rigardante la hobitojn. — Hu hm, ha, ja mi ne bone scias kion diri. Atentu!

— Se vi emas aŭdi pli, — diris Gaja, — ni rakontos. Sed tio daŭros kelkan tempon. Ĉu vi ne volas demeti nin? Ĉu ni ne povus sidi ĉi tie en la sunlumo dum ĝi daŭras? Vi verŝajne laciĝas alte tenante nin.

— Hm, *laciĝas*? Ne, mi ne laciĝas. Ne facile mi laciĝas. Kaj mi ne sidiĝas. Mi ne tre, hm, klineblas. Sed vidu, la suno *jam* foriras. Ni forlasu tiun ĉi — ĉu vi diris kiel vi nomas ĝin?

— Monteto? — sugestis Grinĉjo.

— Breto? Ŝtupo? — sugestis Gaja.

Arbobarbo penseme ripetis la vortojn.

— *Monteto*. Jes, jen ĝi. Sed tio estas hasta vorto por io, kio staris ĉi tie ekde kiam tiu ĉi mondparto estis formita. Ne gravas. Ni forlasu ĝin, ni iru.

— Kien ni iru? — demandis Gaja.

— Al mia hejmo, aŭ unu el miaj hejmoj, — respondis Arbobarbo.

— Ĉu ĝi malproksimas?

— Mi ne scias. Eble vi dirus ĝin malproksima. Sed kiom tio gravas?

— Nu, vidu, ni perdis ĉiujn niajn posedaĵojn, — diris Gaja. — Ni havas nur malmulte da nutraĵo.

— O! Hm! Ne necesas ĝeniĝi pri tio, — diris Arbobarbo. — Mi povas havigi al vi trinkaĵon, kiu tenos vin verda kaj kreskanta dum tre tre longa tempo. Kaj se ni decidus disiĝi, mi kapablos demeti vin ekster mia tereno ie ajn laŭ via elekto. Ni iru!

Tenante la hobitojn milde sed firme po unu sur siaj antaŭbrakoj, Arbobarbo levis unue unu piedegon kaj poste la alian, kaj movis ilin ĝis la rando de l' breto. La radiksimilaj piedfingroj kaptis la rokojn. Tiam zorge kaj gravmiene li paŝis suben de ŝtupo al ŝtupo kaj atingis la subaĵon de l' Arbarego.

Tuj li ekmarŝis tra la arboj per longaj konsciaj paŝoj, ĉiam pli profunden en la arbaron, neniam tre fore de la rivereto, suprenirante sendevie al la montaj deklivoj. Multaj arboj ŝajnis dormantaj, aŭ same nekonsciaj pri li kiel pri ajna alia estaĵo, kiu simple preterpasis; sed kelkaj ekstremis kaj kelkaj levis siajn branĉojn super lian kapon kiam li proksimiĝis. La tutan tempon, dum li marŝis, li parolis al si per longa senĉesa fluo de muzikecaj sonoj.

La hobitoj silentis dum kelka tempo. Ili sentis sin, iom strange, sekuraj kaj komfortaj, kaj ili havis multon pripensindan kaj mirindan. Fine Grinĉjo riskis paroli denove.

— Mi petas, Arbobarbo, — li diris, — ĉu mi rajtas starigi demandon? Kial Celeborno avertis nin kontraŭ via arbarego? Li diris, ke ni ne risku enplektiĝi en ĝi.

— Hmm, ĉu tion li diris? — murmuregis Arbobarbo. — Kaj mi eble dirus proksimume la samon, se vi irus inverse. Ne risku enplektiĝi en la arbarego *Laŭrelindorenano!* Tiel nomis ĝin siatempe la elfoj, sed nun ili mallongigas la nomon: *Lotlorieno* ili nomas ĝin. Eble ili pravas: eble ĝi velkas, ne kreskas. Lando de l' Valo de Kantanta Oro, tia ĝi estis iam. Nun ĝi estas la Songfloro. Ha do! Sed ĝi estas loko stranga kaj ne de ĉiu ajn enirinda. Surprizas min, ke vi sukcesis eliri, sed multe pli surprizas min, ke vi sukcesis eniri: tiel ne okazis al fremduloj jam de multaj jaroj. Ĝi estas lando stranga. Kaj strangas ankaŭ tiu ĉi. Personoj ĉi tie paneis. Jes, tiel, paneis. *Laŭrelindórenan lindelorendor malinornéliion ornemalin*, — li zumis al si. — Tie oni iom postlamentas la mondon, verŝajne. Nek tiu ĉi lando, nek io ajn ekster la Ora Arbaro estas tia, kia ĝi estis, kiam Celeborno junis. Tamen:

Taurililómĉa-tumbalemorna Tumbaletaurĉa Lómĉanor,

tion ili kutimis diri. Ŝanĝiĝis aferoj, sed tio ankoraŭ veras en iuj lokoj.

— Kion vi celas? — diris Grinĉjo. — Kio veras?

— La arboj kaj la entoj, — diris Arbobarbo. — Mi mem ne komprenas ĉion, kio okazas, do mi ne povas tion klarigi al vi. Iuj el ni ankoraŭ estas veraj entoj kaj sufiĉe viglaj niamaniere, sed multaj ekdormemas, iĝas arbecaj, oni povus diri. La plimultaj arboj estas nur arboj, kompreneble; sed multaj duone maldormas. Iuj estas vere maldormaj, kaj kelkaj, nu, ha, nu, ekiĝas *entaj*. Tio okazas la tutan tempon. Kiam tio okazas al arboj, rimarkeblas, ke iuj havas korojn *malbonajn*. Ne temas pri ilia ligno: tion mi ne volas diri. Vidu, mi konis kelkajn bonajn oldajn salikojn apud Entvaŝo, delonge forpasintajn, ve! Ili estis tute kavaj, efektive ili dispeciĝis, tamen tiel kvietaj kaj dolĉparolaj kiel juna folio. Kaj aliflanke troviĝas iuj arboj en la valoj kaj sub la montoj, tute fortikaj kaj interne komplete malbonaj. Tia afero ŝajnas vastiĝema. Pli frue estis kelkaj partoj de tiu ĉi tereno tre danĝeraj. Ankoraŭ restas kelkaj tre nigraj lokoj.

— Samkiel la Maljuna Arbaro en la fora nordo, ĉu vi volas diri? — demandis Gaja.

— Jes, jes, iom simila, sed multe pli malbona. Sendube ankoraŭ kuŝas en la fora nordo ia ombro de l' Granda Mallumo; kaj misaj memoroj herediĝas. Sed en tiu ĉi lando ekzistas kavaj valetoj ĉe kiuj

neniam estis forigita la Mallumo, kaj la arboj estas pli maljunaj ol mi. Tamen ni faras, kion ni povas. Ni forbaras fremdulojn kaj senprudentulojn; kaj ni trejnas kaj instruas, ni marŝas kaj forigas lolojn.

» Ni estas arbo-prizorgantoj, ni maljunaj entoj. Restas tro malmultaj el ni nuntempe. Ŝafoj eksimilas paŝtiston, kaj paŝtistoj ŝafojn, oni diras; sed malrapide, kaj neniu el ambaŭ longe vivas en la mondo. Okazas pli rapide kaj pli paralele ĉe arboj kaj entoj, kaj ili tramarŝas la epokojn kune. Ĉar entoj pli similas elfojn: malpli egoismaj ol la homoj kaj pli kapablaj trafi alies internon. Kaj tamen entoj pli similas la homojn, pli ŝanĝigemaj ol elfoj kaj pli rapide ekhavas la koloron de l' ekstero, oni povus diri. Aŭ pli bonas ol ambaŭ, ĉar ili estas pli fidindaj kaj pli longe atentis aferojn.

» Iuj el miaj parencoj jam aspektas tute kiel arboj kaj bezonas ion grandan por vekti ilin; kaj ili parolas nur flustre. Sed iuj el niaj arboj estas membre viglaj, kaj multaj povas paroli al mi. Elfoj komencigis tion, kompreneble, vekante arbojn kaj instruante al ili la parolkapablon kaj lernante ilian arblingvon. Ili ĉiam deziris alparoli ĉion, la pratempaj elfoj. Sed tiam venis la Granda Mallumo, kaj ili foriris trans la maron aŭ fuĝis en forajn valojn, kaj sin kaŝis kaj kreis kantojn pri tagoj neniam plu revenontaj. Neniam plu. Jes, jes, iam estis nur unusola arbaro de ĉi tie ĝis la Montoj de Ljuno, kaj tiu ĉi estis nur la orienta ekstremo.

» Tiuj estis la tagoj larĝaj! Estis tempo, kiam mi povis marŝi kaj kanti tra la tuta tago kaj aŭdi nenion krom la eĥon de mia propra voĉo en la kavaj montoj. La arbaro similis la arbaron de Lotlorieno, sed pli densis, pli fortis, pli junis. Kaj la odoro de l' aero! Mi kutimis pasigi semajnon nur spirante.

Arbobarbo eksilentis, daŭre marŝante kaj tamen apenaŭ bruante per siaj grandaj piedoj. Poste li komencis denove zumi, kaj transiris al murmura ĉantado. Iom post iom la hobitoj konstatis, ke li ĉantas al ili:

Inter salikaroj de Tasarinan mi promenis printempe.

Ha! l' aspekto kaj l' odoro printempaj en Nan-tasarion!

Kaj mi diris, ke tio bonas.

Mi vagis somere en ulmarbaroj de Ossiriand.

Ha! la lum' kaj muziko someraj apud Sep Riveroj de Ossir!

Kaj mi taksis plej bona tion.

Al fagoj de Neldored' mi venis aŭtune.

Ha! la oro kaj ruĝo, foliosopiro aŭtune en Taur-na-neldor!

Tio superis mian deziron.

*Al pinoj sur la altaĵo de Dorthonion mi grimpis en vintro.
Ha! la vento kaj blanko kaj nigraj vintraj branĉoj sur
Orod-na-Thôn!*

*Mia voĉo leviĝis kaj kantis en la ĉielo.
Kaj nun ĉi landoj kuŝas sub la ondaro,
kaj mi marŝas en Ambarono, en Tauremorno, en Aldalomo,
en la propra lando, tereno de Fangorno,
kie longas radikoj,
kaj la jaroj kuŝas pli dense ol la folioj
en Taŭremornalomo.*

Li ĉesis kaj marŝis antaŭen silente, kaj en la tuta arbaro ĝis povis atingi l' orelo aŭdiĝis neniu sono.

La tago velkis, kaj krepusko plektiĝis ĉirkaŭ la arbotrunkojn. Finfine la hobitoj vidis svage leviĝanta antaŭ ili apikan malhelan terenon: ili venis al la montosuboj kaj verdaj radikoj de alta Metedraso. Malsupren laŭ la deklivo la juna Entvaŝo, saltante de siaj fontoj alsupre, fluis brue de ŝtupo al ŝtupo renkonte al ili. Dekstre de la fluo troviĝis longa deklivo herbvestita, nun griza en la krepusko. Tie kreskis neniuj arboj, kaj ĝi estis aperta sub la ĉielo; steloj jam brilis lagece inter bordoj da nuboj.

Arbobarbo marŝis supren laŭ la deklivo, apenaŭ lantigante sian paŝadon. Subite la hobitoj ekvidis antaŭ si larĝan trairejon. Du grandaj arboj staris tie po unu ambaŭflanke kiel vivaj pordfostoj; sed mankis pordo krom iliaj transiraj kaj interplektitaj branĉaroj. Kiam la maljuna ento proksimiĝis, ili levis siajn branĉojn kaj ĉiuj folioj vibris kaj susuris. Ĉar ili estis arboj ĉiamverdaj, kaj iliaj folioj estis malhelaj kaj poluritaj kaj briletis en la krepusko. Trans ili estis larĝa ebena, kvazaŭ la planko de granda halo estus eltranĉita el la montflanko. Ambaŭflanke la muroj deklivis supren, ĝis ili altis kvindek futojn aŭ pli, kaj laŭlonge de ĉiu muro staris flanknavo da arboj, kiuj same plialtiĝis, kiam ili etendiĝis enen.

Ĉe la fora ekstremo la rokmuro apikis, sed ĉe la subo ĝi estis retrokavigita al malprofunda golfeto kun arka tegmento: la sola tegmento de la halo krom la arbobranĉoj, kiuj ĉe la ena ekstremo superombris la tutan teron lasante nur larĝan apertan padon en la mezo. Rojeto eskapis el la supraj fontoj, kaj lasinte la ĉeffluon falis tinte laŭ la apika mursupraĵo, verŝiĝante kiel arĝentaj gutoj kvazaŭ maldensa kurteno antaŭ la arka golfeto. La akvo denove kolektiĝis en ŝtona baseno en la

planko inter la arboj, kaj de tie ĝi elverŝiĝis kaj forfluis apud la aperta pado, elen por realiĝi al Entvaŝo por ties vojaĝo tra la arbarego.

— Hm! Jen ni estas! — diris Arbobarbo ĉesigante sian longan silenton. — Mi gvidis vin tra proksimume sepmil entpaŝoj, sed kioma estas tio laŭ vialanda mezursistemo, mi ne scias. Ĉiuokaze ni estas proksimaj al la radikoj de la Lasta Monto. Parto de l' nomo de tiu ĉi loko estas Putohalo, tradukite en vian lingvon. Ĝi plaĉas al mi. Hodiaŭ nokte ni ripozos ĉi tie.

Li demetis ilin sur la herbon inter la flanknavoj da arboj, kaj ili sekvis lin al la granda arko. La hobitoj nun rimarkis, ke dummarŝe li apenaŭ kurbigis siajn genuojn, sed liaj kruroj malfermiĝis grandpaŝe. Li metis unue siajn grandajn piedfingrojn (kaj tiuj ja estis grandaj kaj tre larĝaj) sur la teron antaŭ ol alian parton de la piedo.

Momente Arbobarbo staris sub la pluvo de l' falanta fontakvo kaj profunde enspiris; poste li ridis kaj trapasis. Staris tie granda ŝtona tablo, sed neniuj seĝoj. Fone de la haleto estis jam sufiĉe mallume. Arbobarbo levis du ujeĝojn kaj starigis tiujn sur la tablon. Ili ŝajnis akvoplenaj, sed li etendis siajn manojn super ili kaj tuj ili komencis lumiĝi, unu ore kaj la alia riĉverde; kaj kunfandiĝo de la du lumoj heligis la golfeton kvazaŭ somera suno trabrilus tegmenton da junaj folioj. Rerigardante, la hobitoj vidis, ke ankaŭ la arboj en la korto eklumas, unue malforte, sed daŭre plifortiĝante ĝis ĉiun folion randis lumo: iuj verdaj, iuj oraj, iuj ruĝaj kiel kupro, dum la arbotrunkoj similis pilastrojn mulditaj el fosforeska ŝtono.

— Nun, nu, nun ni povas paroli denove, — diris Arbobarbo. — Vi estas soifaj, mi supozas. Eble vi estas ankaŭ lacaj. Trinku jenon! — Li iris al la angulo, kaj ili ekvidis, ke tie staras pluraj altaj ŝtonaj vazoj kun pezaj kovriloj. Li formetis unu el la kovriloj kaj enmetis ĉerpil-egon kaj per ĝi plenigis tri bovlojn, unu grandan kaj du malgrandajn.

— Tiu ĉi estas enta domo, — li diris, — kaj mankas seĝoj, bedaŭrinde. Sed vi rajtas sidi sur la tablo. — Levinte la hobitojn li metis ilin sur la grandan ŝtonplaton, ses futojn super la tero, kaj tie ili sidis svingante siajn krurojn kaj glutante la trinkaĵon.

La trinkaĵo similis akvon, efektive tre similis la guston de la akvo, glutita el Entvaŝo apud la arbarorando, kaj tamen enestis ia parfumo aŭ spicaĵo, kiun ili ne povis priskribi: ĝi estis malforta, sed ĝi memoriĝis ilin pri laodoro de fora arbareto, kiun alportas de fore friska nokta venteto. La efiko de l' trinkaĵo komenciĝis ĉe la piedfingroj kaj leviĝis

senhalte tra ĉiuj membroj, provizante freŝecon kaj viglon, dum ĝi fluis supren ĝis la ekstremoj mem de la haroj. Efektive, la hobitoj sentis kvazaŭ la kapharoj vere hirtiĝus ondiĝante, bukliĝante kaj kreskante. Kiom koncernis Arbobarbon, li unue lavis siajn piedojn en la baseno post la arko kaj poste li unuglute eltrinkis sian bovlon per sola longa lanta gluto. Al la hobitoj ŝajnis, ke li neniam ĉesos.

Finfine li remetis la bovlon.

— Ha-ha, — li ĝemspiris. — Hm, hum, jam ni pli facile povos interparoli. Vi povos sidi sur la planko, kaj mi kuŝiĝos. Tio malhelpos, ke tiu trinkaĵo atingu mian kapon kaj endormigu min.

Dekstraflanke troviĝis litego kun malaltaj kruroj, alta ne pli ol du futojn, profunde kovrita de sekigita herbo kaj filikoj. Arbobarbo sin mallevis malrapide sur ĝin (kun nur plej eta indiko pri kurbiĝo en la mezo) ĝis li kuŝis plene etendite, kun la brakoj malantaŭ la kapo, rigardante la plafonon sur kiu flagris lumoj kvazaŭ ludado de folioj en la sunlumo. Gaja kaj Grinĉjo eksidis apud li sur kusenoj da herbo.

— Nun rakontu vian historion kaj ne rapidu! — diris Arbobarbo.

La hobitoj komencis rakonti al li la historion de siaj aventuroj de kiam ili forlasis Hobiturbon. Ili progresis ne tre klarorde, ĉar ili senĉese interrompis unu la alian, kaj Arbobarbo ofte haltigis parolanton kaj reiris al iu pli frua punkto, aŭ saltis antaŭen demandante pri postaj okazaĵoj. Ili tute nenion diris pri la Ringo kaj ne sciigis al li, kial ili ekvojaĝis, nek kien ili iras, kaj li ne petis kialojn.

Lin ege interesis ĉio: la nigraj rajdantoj, Elrondo kaj Rivendelo, la Malnova Arbaro kaj Tom Bombadiljo, la minejoj de Morio, Lotlorieno kaj Galadriela. Li devigis ilin ĉiam denove priskribi la Provincon kaj ties terenon. Tiupunkte li diris ion strangan:

— Vi neniam vidas iujn, hm, iujn entojn en tiu regiono, ĉu? — li demandis. — Nu, ne entojn, mi prefere devus diri *entedzinojn*.

— *Entedzinojn?* — diris Grinĉjo. — Ĉu ili entute similas vin?

— Jes, hm, nu ne: mi jam ne vere scias, — diris Arbobarbo penseme. — Sed ili ŝatus vian landon, do mi nur scivolis.

Arbobarbo tamen aparte interesiĝis pri ĉio koncerne Gandalfon; kaj plej interesiĝis pri la faroj de Sarumano. La hobitoj tre bedaŭris, ke ili sciis tiel malmulte pri ili: nur iom malprecizan raporton de Sam pri tio, kion Gandolfo diris al la Konsiliĝo. Sed ili almenaŭ sciis klare, ke Ugluko kaj ties trupo devenis de Isengardo kaj parolis pri Sarumano kiel pri sia mastro.

— Hm, hum! — diris Arbobarbo, kiam fine ilia historio serpentumis kaj alvagis ĝis la batalo inter la orkoj kaj la rajdistoj de Rohano. — Nu, nu! Jen amaso da novaĵoj tute sendube. Vi ne sciigis al mi ĉion, vere ne, nur proksimume. Sed mi ne dubas, ke vi faras tion, kion dezirus Gandolfo. Okazas io tre grava, tion mi povas kompreni, kaj kio ĝi estas, mi eble ekscios ĝustatempe, aŭ malĝustatempe. Je radiko kaj branĉeto, sed tio estas stranga afero: ekŝosas eta popolo, kiu ne estas sur la malnovaj listoj, kaj jen! reaperas la Naŭ forgesitaj Rajdantoj por persekuti ilin, kaj Gandolfo gvidas ilin dum longa vojaĝo, kaj Galadriela gastigas ilin en Karas Galadono, kaj orkoj persekutas ilin tra ĉiuj mejloj de Sovaĝlando: efektive ili ŝajnas trafitaĵoj de ŝtormego. Mi esperas, ke ili travivos ĝin!

— Kaj kio pri vi mem? — demandis Gaja.

— Hum, hm, mi ne ĝenis min pri la Grandaj Militoj, — diris Arbobarbo, — tiuj plejparte koncernas elfojn kaj homojn. Tio estas okupiĝo de sorĉistoj: sorĉistoj ĉiam zorgas pri la estonteco. Al mi ne plaĉas zorgi pri la estonteco. Mi ne tute troviĝas je ies *flanko*, ĉar neniu tute troviĝas je mia *flanko*, se vi min komprenas: neniu zorgas pri la arbaroj tiom, kiom mi prizorgas ilin, eĉ ne elfoj nuntempe. Tamen mi pli simpatias kun elfoj ol kun aliaj: ĝuste la elfoj kuracis nian mutecon antaŭlonge, kaj tio estis granda komplezo neniam forgesinda, kvankam niaj vojoj disiĝis intertempe. Kaj ekzistas kompreneble aferoj je kies flanko mi tute ne estas; mi tute kontraŭas ilin: tiuj *burárum*, — li denove eligis profundan murmuregon de abomeno, — tiuj orkoj kaj ties mastroj.

» Mi siatempe maltrankvilis, kiam la ombro kuŝis sur Mornarbaro, sed kiam ĝi translokiĝis al Mordoro, mi dum kelka tempo ne zorgis: Mordoro estas tre malproksime. Sed ŝajnas, ke la vento turniĝas el la oriento kaj eble proksimiĝas la ŝrumpado de ĉiuj arbaroj. Nenion povas fari maljuna ento por rezisti tiun ŝtormon: li devas aŭ travivi ĝin aŭ dissplitiĝi.

» Sed nun Sarumano! Sarumano estas najbaro: mi ne povas preteratenti lin. Ion mi devas fari, supozeble. Mi ofte scivolis lastatempe, kion fari pri Sarumano.

— Kiu estas Sarumano? — demandis Grinĉjo. — Ĉu vi scias ion pri lia historio?

— Sarumano estas sorĉisto, — respondis Arbobarbo. — Pli ol tion mi ne povas diri. Mi ne konas la historion de sorĉistoj. Ili unue aperis post kiam la grandaj ŝipoj venis el trans la maro; sed ĉu ili venis kun la

ŝipoj, mi neniam povis decidi. Sarumano kredeble estis alte taksata inter ili. Li ĉesis disvagadi kaj okupiĝi pri la aferoj de homoj kaj elfoj antaŭ iom da tempo — vi taksus tion antaŭ tre longa tempo; kaj li establiĝis en Angrenosto, aŭ Isengardo, kiel nomas ĝin la homoj el Rohano. Komence li estis tre kvieta, sed lia famo komencis kreski. Oni elektis lin ĉefo de la Blanka Konsilio, laŭdire; sed tio ne elturniĝis tre bone. Mi nun scivolas, ĉu eĉ tiam Sarumano ekturnis sin al misagado. Sed ĉiuokaze li tiam ne ĝenis siajn najbarojn. Mi kutimis paroli al li. Siatempe li ĉiam trapromenis miajn arbarojn. En tiuj tagoj li estis ĝentila, ĉiam petante mian permeson (almenaŭ kiam li renkontis min); kaj ĉiam aŭskultis entuziasme. Mi sciigis al li multajn aferojn kiujn li neniam malkovrus proprapene; sed li neniam repagis al mi per similaĵoj. Mi ne memoras, ke li iam sciigis al mi ion ajn. Kaj tia li ĉiam pli iĝis; lia vizaĝo, kiel mi ĝin memoras — ĉar jam delonge mi ne vidis ĝin — eksimilis fenestrojn sur ŝtona muro: fenestrojn kun ŝutroj interne.

» Mi opinias nun kompreni kiel li okupiĝas. Li komplotas fariĝi Potenco. Li havas menson el metalo kaj radoj; kaj li ne zorgas pri kreskaĵoj krom tiugrade, ke ili momente servas al li. Kaj jam estas klare, ke li estas nigra perfidulo. Li kunuliĝis kun naŭzuloj, kun la orkoj. Brm, hum! Eĉ pli malbone: li faris ion al ili, ion danĝeran. Ĉar tiuj isengardanoj pli similas misajn homojn. Estas trajto de misaĵoj venintaj dum la Granda Mallumo, ke ili ne toleras la sunlumon; sed la orkoj de Sarumano kapablas toleri ĝin malgraŭ tio, ke ili malamas ĝin. Mi scivolas, kion li faris? Ĉu ili estas homoj, kiujn li ruinigis, aŭ ĉu li kunfandis la rasojn orkan kaj homan? Tio estus nigra malvirtaĵo!

Arbobarbo grumblis momente, kvazaŭ li prononcus profundan subteran entan malbenon.

— Antaŭ kelka tempo mi komencis scivoli, kiel orkoj aŭdacis tiel senĝene trapasi miajn arbarojn, — li daŭrigis. — Nur lastatempe mi konjektis, ke kulpas Sarumano, kaj ke antaŭlonge li elspionis ĉiujn vojojn kaj malkovris miajn sekretojn. Li kaj lia fia popolo jam kreas ĥaoson. Tie ĉe la randoj ili faligas arbojn, bonajn arbojn. Iujn el la arboj ili nur detranĉas kaj lasas putri — jen orka misfaro; sed la plimultaj estas dishakitaj kaj forportitaj por nutri la fajrojn de Ortanko. Ĉiam leviĝas fumo el Isengardo nuntempe.

» Damnu lin je radiko kaj branĉo! Multaj el tiuj arboj estis miaj amikoj, kreitoj, kiujn mi konis ekde nukso kaj glano; multaj posedis proprajn voĉojn, kiuj jam perdiĝis por ĉiam. Kaj vidiĝas dezertoj kun

stumpoj kaj rubusoj, kie iam troviĝis kantantaj boskoj. Mi maldiligentis. Mi malatentis aferojn. Tio devas ĉesi!

Arbobarbo abrupte levis sin de sia lito, stariĝis kaj batis per sia mano la tablon. La lumuoj tremis kaj eligis du ŝprucojn da flamo. En liaj okuloj estis flagro kvazaŭ verda fajro, kaj lia barbo hirtiĝis rigida kiel granda balailo.

— Mi ĉesigos tion! — li muĝis. — Kaj vi akompanos min. Vi eble povos helpi min. Tiel vi helpos ankaŭ la proprajn amikojn; ĉar se Sarumano ne estos haltigita, Rohano kaj Gondoro havos malamikon tiel malantaŭe, kiel antaŭe. Niaj vojoj koincidas — al Isengardo!

— Ni akompanos vin, — diris Gaja. — Ni faros laŭ nia povo.

— Jes! — diris Grinĉjo. — Plaĉus al mi vidi pereigon de l' Blanka Mano. Plaĉus al mi ĉeesti, eĉ se mi ne multe utilis: mi neniam forgesos Uglukon kaj la transiron de Rohano.

— Bone! Bone! — diris Arbobarbo. — Sed mi parolis haste. Ni devas ne hasti. Mi iĝis tro varma. Mi devas friskigi min kaj pensi, ĉar pli facile oni krias "ĉesu!" ol ĉesas.

Li paŝis al la arko kaj staris kelkan tempon sub la falanta pluvo de l' fonto. Poste li ridis kaj skuis sin, kaj kie ajn la akveroj falis flagrete de li al la tero, ili ekbrilis kiel ruĝaj kaj verdaj flameraj. Li revenis kaj rekuŝiĝis sur la litan kaj silentis.

Post iom da tempo la hobitoj aŭdis lin denove murmuranta. Li ŝajnis kalkuli per siaj fingroj.

— Fangorno, Finglaso, Fladrifo, jes, jes, — li suspiris. — Problemo estas, ke tiel malmultaj el ni postrestas, — li diris, turniĝante al la hobitoj. — Restas nur tri el la unuaj entoj, kiuj promenis en la arbaroj antaŭ la Mallumo: nur mi mem, Fangorno, kaj Finglaso kaj Fladrifo — se doni al ili la elfajn nomojn; vi rajtas nomi ilin Folikluzo kaj Haŭtŝelo, se tio pli plaĉas al vi. Kaj el ni tri Folikluzo kaj Haŭtŝelo ne multe utilis por tiu ĉi afero. Folikluzo iĝis dormema, preskaŭ arbeca, oni povus diri: li jam kutimas stari izolite duondorme tra la tuta somero kun la densa herbo de la gresejoj ĉirkaŭ la genuoj. Kovrita de foliecaj haroj li estas. Antaŭe li vigliĝis en la vintro; sed lastatempe li tro dormemis por marŝi longdistance eĉ tiam. Haŭtŝelo loĝis sur la montdeklivoj okcidente de Isengardo. Tie okazis la plej seriozaj perturboj. Lin vundis orkoj, kaj multaj el lia popolo kaj liaj arbgregoj estas murditaj kaj detruitaj. Li supreniris sur la altaĵojn, inter la betuloj, kiujn li plej amas, kaj li rifuzas descendi. Tamen mi verŝajne

povus kunigi bravan grupon de niaj pli junaj personoj — se mi sukcesus komprenigi al ili la neceson; se mi sukcesus vigligi ilin: ni ne estas popolo hastema. Kiel domaĝe, ke ni estas tiel malmultaj!

— Kial ekzistas tiel malmultaj, dum vi vivis tiom longe en tiu ĉi lando? — demandis Grinĉjo. — Ĉu tre multaj mortis?

— Ho ne! — diris Arbobarbo. — Neniu mortis de interne, kiel oni eble dirus. Iuj falis pro la misaj hazardoj de la longaj jaroj, kompreneble; kaj pli multaj iĝis arbecaj. Sed ni neniam estis multaj, kaj ni ne plimultiĝis. Estis neniam da entidoj — neniam da infanoj, oni povus diri, jam de terure longa jarkalkulo. Vidu, ni perdis la entedzinojn.

— Kiom vere triste! — diris Grinĉjo. — Kiel okazis, ke ili ĉiuj mortis?

— Ili ne *mortis*! — diris Arbobarbo. — Mi ja ne diris *mortis*. Ni perdis ilin, mi diris. Ni perdis ilin, kaj ni ne povas trovi ilin. — Li ĝemspiris. — Mi supozis, ke la plimulto scias tion. Oni kantis kantojn pri la serĉado de la entoj por la entedzinoj inter elfoj kaj homoj de Mornarbaro ĝis Gondoro. Ne povas esti, ke tiuj estas tute forgesitaj.

— Bedaŭrinde la kantoj ne venis okcidenten trans la Montaron ĝis la Provinco, — diris Gaja. — Ĉu vi ne volos rakonti pli, aŭ kanti al ni unu el la kantoj?

— Jes, tion mi certe faros, — diris Arbobarbo, verŝajne kontenta pri la peto. — Sed mi ne povos rakonti ĝin ĝuste, nur resume; kaj poste ni devos ĉesigi nian interparolon: morgaŭ ni devos konsiliĝon kunvoki, kaj laboron fari, kaj eble komenci vojaĝon.

— Ĝi estas historio stranga kaj malĝoja, — li daŭrigis post paŭzo. — Kiam la mondo estis juna, kaj la arbaroj estis larĝaj kaj sovaĝaj, la entoj kaj la entedzinoj — kaj tiam estis entvirgulinaj: ha! la belo de Fimbretila, de Vergmembra la leĝerpieda, dum la epoko de nia juneco! — ili promenis kune, kaj ili loĝis kune. Sed niaj koroj ne kreskis sammaniere: la entoj donis sian amon al aĵoj, kiujn ili renkontis en la mondo, kaj entedzinoj direktis siajn pensojn al aliaj aferoj, ĉar la entoj amis la grandajn arbojn, sovaĝajn arbarojn, kaj la deklivojn de l' altaj montoj; kaj ili trinkis el la montaraj rojoj kaj manĝis nur tiajn fruktojn, kiajn la arboj lasis fali sur la padon; kaj ili lernis de la elfoj kaj interparolis kun la arboj. Sed la entedzinoj direktis siajn mensojn al la arboj pli malgrandaj kaj al la herbkampoj en la sunlumo trans la subo de l' arbaroj; kaj ili vidis la prunelojn en la densejoj kaj la sovaĝajn pomojn kaj la ĉerizojn florantajn en la printempo kaj la

verdajn plantaĵojn en la akvejoj somere kaj la semantajn herbojn en la aŭtunaj kampoj. Ili ne deziris interparoli kun tiuj aĵoj; sed ili volis, ke tiuj aŭskultu kaj obeu tion, kio estis al ili dirita. La entedzinoj ordonis, ke ili kresku laŭ ilia volo kaj elpuŝu foliojn kaj fruktojn laŭ ilia plaĉo; ĉar la entedzinoj deziris ordon, abundon kaj pacon (per kio ili intencis, ke la aĵoj restu tie, kie ili lokis ilin). Do la entedzinoj kreis ĝardenojn por enloĝado. Sed ni entoj daŭre vagadis, kaj nur de tempo al tempo ni venis al la ĝardenoj. Poste, kiam venis la Mallumo en la nordo, la entedzinoj transiris la Grandan Riveron kaj kreis novajn ĝardenojn kaj kultivis novajn kampojn, kaj ni vidis ilin malpli ofte. Post la forigo de la Mallumo la lando de la entedzinoj riĉe burĝonis, kaj iliaj kampoj estis plenaj de tritiko. Multaj homoj lernis la metiojn de la entedzinoj kaj ege honoris ilin; sed ni estis por ili nura legendo, sekreto en la kerno de l' arbaro. Tamen jen ni ankoraŭ ĉi tie, dum la ĝardenoj de la entedzinoj estas dezertigitaj: la homoj nun nomas tion la Brunaj Terenoj.

» Mi memoras, ke okazis antaŭ tre longe — en la epoko de la milito inter Saŭrono kaj la homoj de l' Maro — trafis min dezire denove vidi Fimbretilan. Tre bela ŝi ankoraŭ ŝajnis, kiam mi lastfoje vidis ŝin, kvankam malmulte simila al la iama entvirgulino. Ĉar la entedzinoj estis kurbaj kaj brunigitaj pro la laboro; la haroj sekigitaj de la suno ĝis koloro de matura tritiko kaj la vangoj kvazaŭ ruĝaj pomoj. Tamen iliaj okuloj estis daŭre la okuloj de nia popolo. Ni transiris Anduinon kaj venis en ilian landon; sed ni trovis ĝin dezerto: ĝi estis tute bruligita kaj elradikita, ĉar milito trapasis ĝin. Sed la entedzinoj ne estis tie. Longe ni vokis kaj longe ni serĉis; kaj ni demandis al ĉiuj renkontitoj, laŭ kiu vojo foriris la entedzinoj. Iuj diris, ke ili ne vidis ilin; kaj iuj diris, ke ili vidis ilin promenantaj okcidenten, kaj iuj diris orienten, kaj aliaj suden. Sed kien ajn ni iris, ni ne trovis ilin. Nia malĝojo estis tre profunda. Tamen vokis la sovaĝaj arbaroj kaj tien ni reiris. Ĉar dum tre multaj jaroj ni kutimis de tempo al tempo eliri kaj serĉi la entedzinojn, marŝante vaste kaj larĝe kaj vokante ilin laŭ iliaj belaj nomoj. Sed dum la tempopasado ni iris pli malofte kaj vagis malpli foren. Kaj nun la entedzinoj estas por ni nuraj memoraĵoj kaj niaj barboj estas longaj kaj grizaj. La elfoj verkis multajn kantojn pri la Serĉado de la entoj kaj kelkaj kantoj transiris sur la langojn de homoj. Sed ni ne verkis kantojn tiuteme, ĉar sufiĉis al ni ĉanti iliajn belajn nomojn, kiam ni pensis pri la entedzinoj. Ni kredas, ke ni eble renkontiĝos denove en venonta tempo, kaj eble ni trovos ie landon, kie ni

povos vivi kune kaj esti ambaŭ kontentaj. Sed estas aŭgurite, ke tio okazos nur kiam ni ambaŭ perdos ĉion, kion ni nun posedas. Kaj tre povas esti, ke tiu tempo finfine proksimiĝas. Ĉar se la praa Saŭrono detruis la ĝardenojn, ŝajnas probable, ke la hodiaŭa Malamiko velkigos ĉiujn arbarojn.

» Ekzistis elfa kanto, kiu priparolis tion, aŭ tiel mi komprenas ĝin. Ĝi kutime estis kantata ie-tie laŭlonge de la Granda Rivero. Tio neniam estis kanto enta, vidu: ĝi estus tre longa kanto en la enta lingvo! Sed ni konas ĝin parkere kaj zumas ĝin de tempo al tempo. Jen kiel ĝi sonas en via lingvo:

Ento: *Kiam printempo fagojn vekas, kaj en la branĉoj sukas,
kiam sovaĝa roĵo lumas, kaj fruntojn vent' viŝtukas
en temp' longpaŝa, profundspira, kaj akras mont-aero,
revenu al mi! Venu diri, ke belas mia tero!*

Entedzino: *Kiam printempas la kamparo, kaj oni semas grenon,
kiam majfloroj neĝobrile surkuŝas frukt-terenon,
kiam la suno kaj pluvetoj parfumas en l' aero,
mi restos kaj ne venos mi, ĉar belas mia tero.*

Ento: *Kiam surmondas la somero kaj en tagmez' orplonĝa
por arboj disvolviĝas subfolie sorĉo sonĝa
en verdaj haloj, kaj la vent' el okcidento fonas:
revenu al mi! Venu diri, ke mia ter' plej bonas!*

Entedzino: *Kiam somer' varmigas fruktojn, kaj bruniĝas beroj,
kaj blankas spikoj, oras pajlo, vendiĝas rikolteroj:
miel' kaj pomoj, kvankam vent' el okcidento fonas
mi sub la sun' ĉi tie restos, ĉar mia ter' plej bonas!*

Ento: *Kiam sovaĝa vintro venos, kiu l' arbaron tranĉas,
kaj falas arboj, kaj la tagon senstela nokt' formanĝas,
kiam el oriento ventas, tiam en pluv' seneje
mi serĉos vin kaj vokos vin kaj al vi venos ree!*

Entedzino: *Kiam kantfine en malhelo estos vintra veno,
kiam rompiĝis nuda branĉ' kaj pasis lum' kaj peno,
mi serĉos vin, atentos vin, ĝis ni kuniĝos ree
kaj kune iros laŭ la vojo tra la pluv' seneje.*

Ambaŭ: *Ni kune iros laŭ la vojo al la okcidento,
kaj malproksime trovos landon de la korkontento.*

Arbobarbo finis sian kanton.

— Tia ĝi estas, — li diris. — Ĝi estas elfa kompreneble: malpezkora, hastvorta, kaj baldaŭ finita. Mi supozas, ke ĝi estas sufiĉe bela. Sed la entoj povus diri pli siaflanke, se ili disponus la tempon! Sed nun mi intencas stariĝi kaj dormi iom. Kie vi staros?

— Ni kutimas kuŝiĝi por dormi, — diris Gaja. — Ni fartos bone, kie ni estas.

— Ĉu kuŝiĝi por dormi! — diris Arbobarbo. — Nu kompreneble tiel! Hm, hum: mi forgesis: kantado de tiu kanto memorigis min pri malnovaj epokoj; mi preskaŭ supozis ke mi alparolas junajn entidojn, fakte. Nu, vi povos kuŝi sur la lito. Mi iras stari sub la pluvo. Bonan nokton!

Gaja kaj Grinĉjo grimpis sur la liton kaj kurbe kuŝiĝis inter la molaj herboj kaj filikoj. Tie estis freŝe kaj dolĉarome kaj varme. La lumoj malfortiĝis kaj la ardo de l' arboj fadis; sed ekstere sub la arko ili vidis maljunan Arbobarbon staranta senmove kun la brakoj levitaj super la kapon. La helaj steloj rigardis desur la ĉielo kaj lumigis la falantan akvon verŝiĝantan sur liajn fingrojn kaj kapon kaj gutis, gutetis per centopaj arĝentaj akveroj al liaj piedoj. Aŭskultante la tintadon de l' akveroj la hobitoj endormiĝis.

Ili vekiĝis trovante friskan sunon, kiu brilis en la grandan korton kaj sur la fundon de la golfeto. Ĉifonoj de alta nuboj estis supre drivantaj laŭ forteta orienta vento. Arbobarbo estis nenie videbla; sed dum Gaja kaj Grinĉjo banis sin en la apudarka baseno, ili aŭdis lin zumi kaj kanti suprenvenante laŭ la pado inter la arboj.

— Hu, ho! Bonan matenon, Gaja kaj Grinĉjo! — li muĝis vidinte ilin. — Vi dormas longe. Mi jam iris plurcent paŝojn hodiaŭ. Nun ni trinkos iom kaj iros al Entmuteo.

Li verŝis por ili el ŝtona vazo du plenajn bovlojn, sed el malsama vazo. La gusto ne estis tia, kia ĝi estis la antaŭan vesperon: ĝi estis pli tereca kaj riĉa, pli nutra kaj manĝaĵsimila, por tiel diri. Dum la hobitoj trinkis sidante ĉe la litrando kaj mordetante pecetojn da elfa kuko (pli pro tio, ke ili sentis, ke manĝado estas necesa parto de la matenmanĝo, ol ĉar ili estis malsataj), Arbobarbo staris zumante en la enta aŭ la elfa aŭ iu fremda lingvo kaj rigardis la ĉielon.

— Kie estas Entmuteo? — Grinĉjo riskis demandi.

— Hu, he? Ĉu Entmuteo? — diris Arbobarbo sin turnante. — Ĝi estas ne loko, ĝi estas kunveno de entoj — kio ne okazas ofte

nuntempe. Sed mi sukcesis persvadi sufiĉe grandan aron promesi, ke ili venos. Ni renkontiĝos tie, kie ni ĉiam renkontiĝis: Derndinglo nomas ĝin la homoj. Ĝi estas fore suda de ĉi tie. Ni devas alveni antaŭ la tagmezo.

Postnelonge ili ekiris. Arbobarbo portis la hobitojn sur siaj brakoj kiel pasinttage. Ĉe la elirejo de la korto li turniĝis dekstren, transpaŝis la rojon, kaj paŝegis suden ĉesube de grandaj falintaj deklivoj, kie arboj maloftis. Supre de tiuj la hobitoj vidis densejojn betulajn kaj sorpujajn, kaj post tiuj malhelajn suprenirantajn pinarbarojn. Baldaŭ Arbobarbo sin turnis iomete for de la montetoj kaj plonĝis en densajn boskojn, kie la arboj estis pli grandaj, pli altaj kaj pli densaj ol la arboj, kiujn la hobitoj vidis iam antaŭe. Dum kelka tempo ili malforte sper-tis tiun senton de sufokiĝo, kiun ili rimarkis, kiam ili la unuan fojon eniris Fangornon, sed tio baldaŭ pasis. Arbobarbo ne parolis al ili. Li zumis al si profunde kaj penseme, sed Gaja kaj Grinĉjo aŭdis neniujn efektivajn vortojn: tio sonis kiel *bum, bum, rumbum, burar, bum bum, darar bum bum, darar bum*, kaj tiel plu kun konstanta ŝanĝiĝo de notoj kaj ritmo. De tempo al tempo ŝajnis al ili, ke ili aŭdas respon-don, ian zumon aŭ vibron de sono, kiu ŝajnis veni el la tero, aŭ el la branĉoj super iliaj kapoj, aŭ eble el la trunkoj de la arboj; sed Arbo-barbo nek haltis nek turnis sian kapon flanken.

Ili vojaĝis longe — Grinĉjo provis kalkuli la “ent-paŝojn”, sed malsukcesis, perdiĝinte ĉirkaŭ tri mil — kiam Arbobarbo komencis malrapidigi siajn paŝojn. Subite li haltis, demetis la hobitojn kaj levis siajn kavigitajn manojn al la buŝo tiel, ke ili formis kavan tubon; poste li blovis aŭ vokis tra ili. Granda *hum hom* elsonoris kvazaŭ profundgorĝa korno en la arbaro kaj ŝajnis reeĥi de la arboj. De malproksime venis el pluraj direktoj simila *hum hom*, kiu estis ne eĥo, sed respondo.

Arbobarbo sidigis Gajan kaj Grinĉjon sur siajn ŝultrojn kaj denove ekpaŝegis, de tempo al tempo eligante novan kornovokon, kaj ĉiufoje la respondoj estis pli laŭtaj kaj pli proksimaj. Tiamaniere ili finfine venis al io, kio aspektis kiel nepenetrebla muro de malhelaj ĉiam-verdaj arboj, kiajn la hobitoj neniam antaŭe vidis: tiuj branĉiĝis jam de la radikoj kaj estis dense vestitaj per malhelaj glaceaj folioj kvazaŭ sendornaj ileksoj, kaj ili havis multajn rigidajn rekte starantajn flor-pintojn kun grandaj brilaj olivkoloraj burĝonoj.

Turniĝinte maldekstren kaj laŭirinte tiun heĝegon Arbobarbo

venis post kelkaj paŝoj al mallarĝa enirejo. Tra ĝi pasis trivita pado kiu subite plonĝis laŭ longa apika deklivo. La hobitoj vidis, ke ili descendas al granda kavaĵo, ronda preskaŭ kiel bovlo, tre larĝa kaj profunda, kronita ĉe la rando per la alta malhela ĉiamverda heĝego. Interne ĝi estis glata kaj herbvestita, kaj malestis arboj krom tri tre altaj kaj belaj arĝent-betuloj, kiuj staris funde de la bovlo. Du aliaj padoj kondukis en la kavaĵon de l' okcidento kaj de la oriento.

Pluraj entoj estis jam alvenintaj. Pliaj venis sur la aliaj padoj kaj kelkaj jam sekvis Arbobarbon. Dum ili proksimiĝis, la hobitoj gvatis ilin. Ili atendis vidi nombron da kreitoj tiel similaj al Arbobarbo, kiel unu hobito similas alian (almenaŭ laŭ okulo de fremdulo); kaj ili tre surpriziĝis vidante nenion tian. La entoj tiom malsimilis unu alian, kiom arboj arbojn: iuj tiom malsimilaj inter si, kiom unu arbo malsimilas alian kun sama nomo, sed tute aliaj kreskiĝo kaj historio; kaj iuj tiom diferencaj, kiom unu arbospeco de alia, kiel betulo de fago, kverko de abio. Estis kelkaj entoj pli maljunaj, barbohavaĵoj kaj tuberozaj kiel arboj sanaj sed antikvaj (kvankam neniu el ili aspektis tiom antikva kiom Arbobarbo); kaj estis altaj fortaj entoj junmembraj kaj glathaŭtaj kiel vivzenitaj arbaranoj; sed mankis junaj entoj, mankis arbidoj. Entute ĉirkaŭ dudek kvar staris sur la larĝa herba fundo de la kavaĵo, kaj tiom multaj aliaj enmarŝadis.

Komence Gajan kaj Grinĉjon impresis ĉefe la varieco, kiun ili vidis: la multaj formoj kaj koloroj, la diferencoj de zonmezuro kaj alteco, la longeco de kruroj kaj brakoj, la nombro de fingroj sur la manoj kaj piedoj (iom inter tri ĝis naŭ). Kelkaj ŝajnis pli-malpli parencaj al Arbobarbo kaj memorigis al ili betulojn aŭ kverkojn. Sed estis alispecaj. Iuj revokis kaŝtananarbon: brunhaŭtaj entoj kun larĝaj disfingraj manoj kaj mallongaj dikaj kruroj. Iuj revokis fraksenon: altaj rektaj grizaj entoj kun multfingraj manoj kaj longaj kruroj; iuj abion (la plej altaj entoj), kaj aliaj betulon, sorpujon kaj tilion. Sed kiam la entoj ĉiuj ĉirkaŭstaris Arbobarbon, iomete klinante siajn kapojn, murmurante per siaj lantaj muzikaj voĉoj, kaj rigardante longe kaj atente la fremdulojn, tiam la hobitoj vidis, ke ili estas ĉiuj samspecaj kaj ĉiuj havas samajn okulojn, ne ĉiuj tiel oldaj aŭ profundaj kiel tiuj de Arbobarbo, sed ĉiuj kun tiu sama lanta sendevia pensema esprimo kaj la sama verda flagro.

Tuj kiam la tuta trupo kunvenis en larĝa cirklo ĉirkaŭ Arbobarbo, komenciĝis stranga kaj nekomprenebla konversacio. La entoj komencis murmuri malrapide: jen unu aliĝis, poste alia, ĝis ĉiuj kune ĉantis

laŭ longa ritmo leviĝanta kaj subiranta, jen pli laŭte unuflanke de la ringo, jen tie formortante kaj leviĝante al muĝego aliflanke. Kvankam li povis nek distingi nek kompreni la vortojn — li supozis, ke la lingvo estas la enta — Grinĉjo komence trovis la sonon tre agrable aŭskultinda; sed iom post iom lia atentemo ekvelkis. Post longa tempo (kaj la ĉantado ne donis signon pri ĉesemo) li konstatis sin scivolanta, ĉu pro tio ke la enta estas tia “malhasta” lingvo ili jam progresis post *Bonan matenon*; kaj se Arbobarbo volus nomumi ĉiujn, kiom da tagoj necesus por kanti ĉiujn nomojn. “Mi scivolas kiel oni diras entlingve *jes kaj ne*”, — li pensis. Li oscedis.

Arbobarbo tuj atentis lin.

— *Hm, ha, hej*, Grinĉjo mia! — li diris, kaj la ceteraj entoj ĉesigis sian ĉantadon. — Vi estas popolo hastema, tion mi forgesis; kaj ĉiuokaze estas laciĝe aŭskulti parolon, kiun vi ne komprenas. Vi rajtas nun alteriĝi. Mi sciigis al la Entmuteo viajn nomojn, kaj ili vidis vin, kaj ili konsentis, ke vi ne estas orkoj, kaj ke nova verso estu inkluzivita en la malnovaj listoj. Ni ankoraŭ ne progresis pli, sed tio estas rapida laboro en Entmuteo. Vi kaj Gaja rajtas ĉirkaŭpromeni en la kavaĵo, se vi volas. Troviĝas puto da bona akvo, se vi bezonas refreŝiĝon, tie fore ĉe la norda deklivo. Ankoraŭ parolotas kelkaj vortoj, antaŭ ol la Entmuteo vere komenciĝos. Mi venos vidi vin denove kaj rakontos, kiel progresas la aferoj.

Li demetis la hobitojn. Antaŭ ol formarŝi ili profunde riverencis. Tiu faro ŝajnis amuzi tre multe la entojn, se juĝi laŭ ties murmuroj kaj la flagrado de la okuloj; sed ili baldaŭ reiris al la propraj aferoj. Gaja kaj Grinĉjo supreniris la padon venantan el la okcidento kaj trarigardis la apertajon en la heĝego. Longaj arbokovritaj deklivoj leviĝis de la rando de l' kavaĵo, kaj malproksime super la abioj de l' plej fora firsto leviĝis akra kaj blanka pinto de alta monto. Sude maldekstre ili povis vidi la arbaron descendi al griza malproksimo. Tie fore estis pala verda briletaĵo, kiu laŭ konjektoj de Gaja estis ekvido de l' ebenaĵoj de Rohano.

— Mi scivolas, kie estas Isengardo? — diris Grinĉjo.

— Mi ne tute certas, kie ni estas, — diris Gaja; — sed tiu monto estas probable Metedraso, kaj, se mi bone memoras, la ringo de Isengardo kuŝas en forkejo aŭ profunda fendaĵo je la ekstremo de l' montaro. Ĝi estas probable sube post tiu ĉi granda firsto. Ŝajnas troviĝi ia fumo aŭ nebuleto tie, maldekstre de la pinto, ĉu vi ne opinias?

— Kia estas Isengardo? — diris Grinĉjo. — Mi scivolas, kion kapablas entoj fari pri ĝi ĉiuokaze.

— Ankaŭ mi, — diris Gaja. — Isengardo estas ia ringo el rokoj aŭ montoj, mi kredas, kun ebena loko interne kaj insulo aŭ pilastro el roko meze, nomita Ortanko. Sur ĝi Sarumano havas turegon. Troviĝas pordo, eble pli ol unu, en la ĉirkaŭa muro, kaj mi opinias, ke trafluas ĝin rivereto; ĝi venas el la montaro kaj fluadas plu tra la Breĉo de Rohano. Ĝi ne ŝajnas loko, kiun entoj kapablas trakti. Sed mi strange sentas pri ĉi entoj: ial mi ne kredas, ke ili estas tiel sendanĝeraj kaj, nu, ridindaj, kiel ili ŝajnas. Ili ŝajnas lantaj, kuriozaj kaj paciencaj, preskaŭ tristaj; kaj tamen mi kredas, ke ili *povus* agitiĝi. Se tio okazus, mi preferus ne esti inter la kontraŭuloj.

— Jes, — diris Grinĉjo. — Mi scias, kion vi celas diri. Eble temus pri diferenco inter maljuna bovino kuŝanta kaj penseme remaĉanta kaj taŭro impetiĝanta; kaj la ŝanĝiĝo povus okazi subite. Mi scivolas, ĉu Arbobarbo agitos ilin. Mi certas, ke li intencas provi. Sed al ili ne plaĉas agitiĝi. Arbobarbo mem agitiĝis hieraŭ vespere, kaj poste subpremis tion.

La hobitoj returniĝis. La voĉoj de la entoj daŭre leviĝis kaj subeniĝis en ilia konklavo. La suno jam supreniris sufiĉe alten por transrigardi la heĝegon: ĝi brilis sur la suproj de la betuloj kaj lumigis la nordan flankon de la kavaĵo per friska flava lumo. Tie ili vidis etan ekbrilan fonton. Ili marŝis laŭ la rando de l' bovlego sube de l' ĉiam-verdaĵoj — estis agrable senti denove malvarmetan herbon ĉirkaŭ la piedfingroj kaj ne rapidemi — kaj poste ili degrimpis al la sputanta akvo. Ili trinkis iomete puran malvarman akran gluton, kaj sidiĝis sur muskokovritan ŝtonon rigardante la sunlumerojn sur la herbo kaj la ombrojn de l' velantaj nuboj pasantaj sur la fundo de la kavaĵo. La murmurado de la entoj daŭradis. Tiu loko ŝajnis tre stranga kaj izolita, ekster ilia mondo kaj malproksime de ĉio okazinta al ili. Envolvis ilin granda sopiro pri la vizaĝoj kaj voĉoj de iliaj kunuloj, precipe pri Frodo kaj Sam, kaj pri Paŝegulo.

Finfine okazis paŭzo de la entaj voĉoj; kaj levante la kapojn ili vidis Arbobarbon venanta al ili kun alia ento ĉeflanke.

— Hm, hum, jen mi denove, — diris Arbobarbo. — Ĉu vi laciĝis aŭ spertas senpacienĉigon, hmm, ha? Nu bedaŭrinde vi devas ankoraŭ ne senpacienĉiĝi. Ni jam kompletigis la unuan stadion, sed mi ankoraŭ devas reklarigi aferojn al tiuj, kiuj loĝas malproksime de Isengardo, kaj al tiuj, kun kiuj mi ne povis kontaktiĝi antaŭ la Entmuteo, kaj

poste ni devos decidi kion fari. Tamen decido pri kion fari ne okupas la entojn tiel longe kiel rakonti la faktojn kaj okazaĵojn, laŭ kiuj ili devas decidiĝi. Sed ne havas sencon nei, ke ni restos ĉi tie iom longe: tre verŝajne du tagojn. Do mi venigis al vi kunulon. Li havas entan domon proksime. Bregalado estas lia elfa nomo. Li diras, ke li jam decidiĝis, kaj al li ne necesas resti ĉe la Entmuteo. Hm, hm, li estas plej simila inter ni al ento hastema. Vi sekve devus bone akordiĝi. Adiaŭ. — Arbobarbo turniĝis kaj forlasis ilin.

Bregalado staris kelkan tempon rigardante gravmiene la hobitojn; kaj ili rigardis lin, scivolante kiam li montros signojn de "hasteco". Li estis alta kaj ŝajnis esti unu el la pli junaj entoj; li havis sur la brakoj kaj kruroj haŭton glatan kaj briletan; liaj lipoj estis ruĝecaj, kaj lia hararo estis grizverda. Li povis kliniĝi kaj balanciĝi kiel svelta arbo pro la vento. Finfine li ekparolis, kaj lia voĉo, kvankam sonora, estis pli alta kaj pli klara ol tiu de Arbobarbo.

— Ha, hmm, miaj amikoj, ni iru promeni! — li diris. — Mi estas Bregalado, kio estas Rapidtrunko vialingve. Sed tio estas nur kromnomo, kompreneble. Oni tiel nomas min, de kiam mi diris *jes* al pliaĝulo, antaŭ ol li kompletigis sian demandon. Cetere, mi trinkas rapide kaj foriras, dum iuj ankoraŭ malsekigas siajn barbojn. Venu kun mi!

Li streĉis suben la du belformajn brakojn kaj donis po longfingran manon al la hobitoj. La tutan tagon ili kunpromenis en la arbaro, kantante kaj ridante; ĉar Rapidtrunko ofte ridis. Li ridis kiam aperis la suno de post nuboj, li ridis kiam ili alvenis rojon aŭ fonton: tiam li kliniĝis kaj malsekigis plaŭde siajn piedojn kaj kapon per akvo; li ridis kelkfoje pro ia bruo aŭ flustro inter arboj. Kiam ajn li vidis sorpujon li haltis kelkan tempon elstreĉinte siajn brakojn, kantis kaj balanciĝis dumkante.

Je noktiĝo li kondukis ilin al sia enta domo: nenio krom muskovrita ŝtono starigita sur gazoneroj sub verda teramaso. Sorpujoj kreskis cirkle ĉirkaŭ ĝi, kaj troviĝis akvo (kiel en ĉiuj entaj domoj), fonto bobelanta el la teramaso. Ili interparolis kelkan tempon, dum mallumo kovris la arbaron. Ne malproksime la voĉoj de la Entmuteo estis ankoraŭ aŭdeblaj; sed nun tiuj ŝajnis pli profundaj kaj malpli lakonaj, kaj de tempo al tempo iu granda voĉo leviĝis en alta kaj rapidiĝanta muzikeco dum la aliaj forvelkis. Sed apud ili Bregalado parolis milde en ilia propra lingvo, preskaŭ flustre; kaj ili sciigis, ke li estas popolano de Haŭtselo, kaj la tereno, en kiu ili loĝis, estis perfortita.

Tio ŝajnis al la hobitoj tute sufiĉe klarigi lian “rapidecon” almenaŭ rilate la orkojn.

— En mia hejmo estis sorpujoj, — diris Bregalado, mallaŭte kaj malĝoje, — sorpujoj, kiuj enradikiĝis kiam mi estis entido, antaŭ multaj multaj jaroj en la kvieto de la mondo. La plej maljunaj estis plantitaj de la entoj en provo komplezi la entedzinojn, sed tiuj rigardis ilin, ridetis kaj diris, ke ili scias, kie kreskas floraro pli blanka kaj fruktoj pli riĉaj. Tamen neniuj arboj el tiu raso, la popolo de la Rozo, tiom belas laŭ mi. Kaj tiuj arboj kreskis, kreskadis ĝis ĉies ombro similis verdan halon, kaj iliaj ruĝaj beroj en la aŭtuno estis ŝarĝo, belo kaj mirindaĵo. Birdoj kutimis veni tien multnombre. Mi ŝatas birdojn, eĉ kiam ili babilaĉas; kaj la sorpujoj disponas pli ol sufiĉe da beroj. Sed la birdoj iĝis neamikcaj kaj avidaj kaj ŝiris la arbojn, teren ĵetis la fruktojn kaj ne manĝis ilin. Poste venis orkoj kun hakiloj kaj fortranĉis miajn arbojn. Mi venis kaj vokis ilin laŭ iliaj longaj nomoj, sed ili ne vibris, ili nek aŭdis nek respondis: ili kuŝis mortintaj.

Ho Orofarna, Lasemista, Karnemirja!

Ho sorpoarbo, ĉe la hararo la floroj kiom blankis!

*Ho aorpoarb, mi vin vidis ĉarmi, kiam somer' ne mankis,
la ŝelo helis, folioj belis, tre mildis voĉa sono:*

kaj jen surkape kiom tre frape or-ruĝis via krono!

*Ho sorpoarboj, jam mortaj haroj sekas kaj grizas lame;
la kron' kaputas, la voĉo mutas, silenta porĉiame.*

Ho Orofarna, Lasemista, Karnemirja!

La hobitoj endormiĝis aŭdante la mallaŭtan kantadon de Bregalado, kiu ŝajnis lamenti multlingve pri la pereco de la arboj, kiujn li amis.

Ankaŭ la postan tagon ili pasigis en lia societo, sed ili ne vagis malproksime de lia “domo”. La pliparton de la tempo ili sidis silente sub ŝirmo de la teramaso, ĉar la vento pli malvarmis, kaj la nuboj estis pli densaj kaj pli grizaj; malmultis la sunlumo, kaj malproksime la voĉoj de la entoj ĉe la Entmuteo plu leviĝis kaj subeniĝis, foje laŭtaj kaj fortaj, foje malaltaj kaj malĝojaj, foje pli rapidaj, foje malrapidaj kaj solenaj kiel mortkanto. Venis la dua nokto, kaj daŭre la entoj konklavis sub hastaj nuboj kaj intermitaj steloj.

La tria tago aŭroris malbela kaj ventoplana. Je sunleviĝo la entaj voĉoj leviĝis bruege kaj poste fordampiĝis denove. Kun pasado de la mateno, la vento malfortiĝis, kaj la aero iĝis atendeme peza. La

hobitoj povis vidi, ke Bregalado aŭskultas atente, kvankam por ili en la kavaĵo de lia enta domo la sono de la Entmuteo mallaŭtis.

Venis la posttagmezo, kaj la suno, irante okcidenten al la montaro, elsendis longajn flavajn radiojn inter la fendetoj kaj truetoj de la nuboj. Subite ili konstatis, ke ĉio tre kvietas; staris la tuta arbaro en aŭskulta silento. Kompreneble, la entaj voĉoj ĉesis. Kion tio signifis? Bregalado estis staranta rekte kaj streĉite, rerigardante norden al Derndinglo.

Tiam aŭdiĝis krake kriego sonora: *ra-hum-ra!* La arboj vibris kaj kurbiĝis kvazaŭ ventobato trafus ilin. Sekvis alia paŭzo, kaj poste marŝmuziko komenciĝis kiel solenaj tamburoj, kaj super la ruliĝantaj taktoj kaj batoj ŝveliĝis voĉoj kantantaj alte kaj forte.

Ni venas kure kuntambure: ta-runda runda runda rure!

La entoj venis: ĉiam pli proksime kaj pli laŭte leviĝis ilia kanto:

Ni venas korne kaj tambure: ta runa-runu runa rure!

Bregalado levis la hobitojn kaj elpaŝis el sia domo.

Postnelonge ili vidis alproksimiĝi la marŝantan linion: la entoj swingiĝis antaŭen al ili grandpaŝe suben laŭ la deklivo. Arbobarbo antaŭis, kaj proksimume kvindek kunuloj sekvis lin po du egalpaŝe piede, batante la takton sur la koksoj per siaj manoj. Kiam ili alproksimiĝis, videblis la ekbriloj kaj flagroj en iliaj okuloj.

— Hum, hom! Jen ni venas kun eksplodo, jen ni venas finfine! — vokis Arbobarbo ekvidante Bregaladon kaj la hobitojn. — Venu, aliĝu al la Entmuteo! Ni ekiras. Ni ekiras al Isengardo!

— Al Isengardo! — la entoj kriis multvoĉe.

— Al Isengardo!

*Al Isengardo! malgraŭ gardo de l' ĉirkaŭaj ŝtonaj pordoj;
al Isengard' en forta ard' dum ŝtone nudas ĝiaj fortoj,
ni iras, iras al milito, disfaligi ĝin kun spito;
ĉar brulas trunk' kaj branĉoj brulas, forno muĝas — al milito!
Al land' agaca marŝ' minaca, ni tambure venas, venas;
al Isengard' minace venas!
Minace kaj milite venas!*

Tiel ili kantis marŝante suden.

Bregalado brilokule aliĝis apud Arbobarbo. La maljuna ento nun reprenis la hobitojn kaj surŝultrigis ilin, kaj tiel ili rajdis fiere antaŭ la kantanta trupo kun batantaj koroj kaj kapoj alte tenataj. Kvankam ili atendis, ke okazos io finfine, mirigis ilin la ŝanĝiĝo envolvinta la entojn. Tio ŝajnis nun tiel subita, kiel la elverŝiĝo de tajdo delonge barita de digo.

— La entoj finfine decidiĝis iom rapide, ĉu ne? — Grinĉjo riskis diri post kelka tempo, kiam la kantado momente ĉesis kaj aŭdiĝis nur la batado de manoj kaj piedoj.

— Ĉu rapide? — diris Arbobarbo. — Hum! Jes ja. Pli rapide ol mi atendis. Efektive mi ne vidis ilin tiel agititaj jam treege longe. Ni entoj ne ŝatas agitiĝi; kaj ni neniam agitiĝas, krom se estas al ni klare, ke niaj arboj kaj niaj vivoj troviĝas en granda danĝero. Tio ne okazis en la Arbarego depost la militoj inter Saŭrono kaj la Homoj de l' Maro. Estas la orka agado, la malrespondeca hakado — *rárum* — sen eĉ la malinda senkulpigo de fajronutrado, kiu kolerigis nin; kaj la perfido far la najbaro, kiu devus helpi nin. Sorĉistoj devus kompreni pli bone: ili ja komprenas pli bone. Ekzistas neniu malbeno en la elfa, la enta, aŭ en la lingvoj de homoj sufiĉe severa por tia perfido. Bas Sarumano!

— Ĉu vi efektive rompos la pordegon de Isengardo? — demandis Gaja.

— Ho, hm, nu, ni ja povus, vidu! Vi eble ne scias, kiom ni estas fortaj. Eble vi aŭdis pri troloj? Ili estas potence fortaj. Sed troloj estas nur surogatoj, kreitaj de la Malamiko en la Granda Mallumo, moke je la entoj, kiel orkoj estas surogataj elfoj. Ni estas pli fortaj ol troloj. Ni estas kreitaj el la ostoj de la tero. Ni povas disspliti ŝtonon samkiel arbradikoj, nur pli rapide, multe pli rapide, se niaj mensoj agitiĝis! Se ni ne estos dehakitaj aŭ fajre detruitaj aŭ sorĉitaj, ni povos disfendi Isengardon je splitoj kaj fende diserigi ĝiajn murojn.

— Sed Sarumano klopodos malhelpi vin, ĉu ne?

— Hm, ha, jes, tiel estas. Tion mi ne forgesis. Efektive mi longe pripensis tion. Sed, vidu, multaj entoj estas pli junaj ol mi, je multaj arbovivoj. Nun ili ĉiuj estas agititaj, kaj ilia menso direktiĝas al unu-sola afero: disrompo de Isengardo. Sed baldaŭ ili komencos pensi denove: ili trankviliĝos iom, kiam ni sorbos nian vesperan trinkaĵon. Kian soifon ni havos! Sed lasu ilin nun marŝi kaj kanti! Longa vojo estas irota kaj antaŭ ni estas tempo por pensado. Valoras, ke ni ekiris.

Arbobarbo marŝis plu, kantante kelkan tempon kun la aliaj. Sed post iom da tempo lia voĉo murmuriĝis kaj denove silentiĝis. Grinĉjo

povis vidi, ke lia maljuna frunto estas sulketita kaj nodoza. Finfine li rigardis supren, kaj Grinĉjo povis vidi en liaj okuloj esprimon malĝojan, malĝojan, sed ne malfeliĉan. En ili estis lumo, kvazaŭ la verda flamo sinkus pli profunden en la malhelajn putojn de lia pensado.

— Kompreneble, karaj amikoj, estas sufiĉe probable, — li malrapide diris, — ke ni iras al la propra finsorto: la lasta marŝado de la entoj. Sed se ni restus hejme kaj farus nenion, la finsorto ĉiuokaze trafus nin, pli aŭ malpli baldaŭ. Tiu penso delonge kreskis en niaj koroj; kaj tial ni marŝas nun. Tio ne estis hasta decido. Nun finfine la lasta marŝado de la entoj valoros kanton. Jes, — li suspiris, — ni eble helpas la ceterajn popolojn, antaŭ ol ni forpasos. Tamen mi ŝatus vidi realiĝon de la kantoj pri la entedzinoj. Mi kore ŝatus revidi Fimbretilan. Sed vidu, miaj amikoj, kantoj kiel arboj fruktas nur siatempe kaj siamaniere: kaj kelkfoje ili velkas maloportune.

La entoj paŝadis rapidpaŝe. Ili descendis en longan faldajon de la tero, kiu deklivis suden. Jam ili komencis supren grimpi, kaj supren, al la alta okcidenta firsto. La arboj maloftiĝis, kaj ili venis al disaj bosketoj da betuloj, kaj poste al nudaj deklivoj kie kreskis nur malmultaj magraj pinoj. La suno sinkis post la malhelan montodorson antaŭ ili. Grize krepuskiĝis.

Grinĉjo retrorigardis. La entoj estis plimultiĝintaj — aŭ kio okazis? Kie devus kuŝi la malklaraj nudaj deklivoj, kiujn ili trapasis, tie li pensis vidi boskojn da arboj. Sed tiuj moviĝis! Ĉu eblis, ke la arboj de Fangorno vekigis, kaj la arbaro leviĝas marŝante transmonton al la milito? Li viŝis siajn okulojn scivolante, ĉu dormo aŭ ombroj trompis lin; sed la grandaj grizaj formoj moviĝis senĉese antaŭen. Aŭdiĝis bruo kiel vento tra multaj branĉoj. La entoj jam proksimiĝis al la verto de la firsto, kaj kantado tute ĉesis. Noktiĝis, kaj sekvis silento: nenio aŭdeblis krom mallaŭta vibrado de la tero sub la piedoj de la entoj kaj susuro, ombro de flustro, kvazaŭ pro multaj drivantaj folioj. Fine ili ekstaris sur la supro kaj rigardis suben en malhelan puton: la grandan fendajon ĉe la montekstremo: Nan Kuruniro, la valo de Sarumano.

— Nokto envolvas Isengardon, — diris Arbobarbo.

Ĉapitro 5

LA BLANKA RAJDANTO

Frosta eĉ miaj ostoj, — diris Gimlio, frapante per siaj brakoj kaj batante teron per siaj piedoj. La tago finfine venis. Je tagiĝo la kunuloj matenmanĝis tiel kiel eblis; nun en la kreskanta lumo ili prestiĝis esplori denove la terenon por postsignoj de la hobitoj.

— Kaj ne forgesu pri tiu maljunulo! — diris Gimlio. — Mi estus pli kontenta, se mi vidus spuron de boto.

— Kial tio kontentigus vin? — diris Legolaso.

— Ĉar maljunulo kies piedoj postlasis spurojn eble ne estus alia ol li ŝajnas esti, — respondis la gnomo.

— Eble, — diris la elfo, — sed peza boto eble ne lasus ĉi tie spurojn: la herbo estas profunda kaj resaltema.

— Tio ne perpleksus disirulon, — diris Gimlio. — Kurbiĝinta herbero sufiĉas, por ke Aragorno interpretu ĝin. Sed mi ne atendas, ke li trovos spurojn. Tio estis misa fantomo de Sarumano, kion ni hieraŭ nokte vidis. Mi certas, eĉ en la matena lumo. Eĉ nun liaj okuloj rigardas nin de Fangorno, eble.

— Estas tre verŝajne, — diris Aragorno, — tamen mi ne estas certa. Mi pensas pri la ĉevaloj. Vi diris hieraŭ nokte, Gimlio, ke ili estis fortimigitaj. Sed al mi ŝajnis, ke ne. Ĉu vi aŭdis ilin, Legolaso? Ĉu laŭ via opinio ili sonis kiel bestoj teruritaj?

— Ne, — diris Legolaso. — Mi klare aŭdis ilin. Se ne efikus la mal-lumo kaj nia propra timo, mi konjektus, ke temas pri bestoj ardaĵoj pro ia subita ĝojo. Ili parolis laŭ maniero de ĉevaloj, renkontintaj amikon longe mankintan.

— Tion pensis mi, — diris Aragorno, — sed mi ne povos solvi la enigmon krom se ili revenos. Ek! La lumo rapide plifortiĝas. Unue mi rigardu kaj poste konjektu! Ni devas komenci ĉi tie, proksime al nia bivako, zorge serĉante la ĉirkaŭaĵon kaj progresante supren laŭ la deklivo al la arbaro. Trovi la hobitojn estas nia celo, kion ajn ni pensas pri nia nokta vizitinto. Se ili hazarde eskapis, ja ili nepre kaŝiĝis en la arboj aŭ ili estus vidataj. Se ni trovos nenion inter ĉi tie kaj la randoj

de l' arbarego, poste ni plenumos lastan serĉon sur la batalkampo kaj inter la cindroj. Sed tie troviĝas malmulte da espero: la rajdistoj de Rohano faris sian laboron tro diligente.

Dum kelka tempo la kunuloj rampis kaj palpis sur la tero. La arbo staris morne super ili, ties sekaj folioj jam pendantaj malrigide, klakis pro la malvarmega orienta vento. Aragorno malrapide formoviĝis. Li venis al la cindroj de la gardofajro apud la riverbordo, kaj poste komencis spuri la teron retro al la teramaseto, kie okazis la batalo. Subite li kliniĝis kaj proksimigis sian vizaĝon preskaŭ en la herbon. Poste, li alvokis la aliajn. Ili alkuris.

— Jen finfine ni trovas informon! — diris Aragorno. Li levis rompitan folion por ke ili vidu ĝin, grandan palan folion orkoloran, jam velkantan kaj brunigantan. — Jen folio de malorno el Lorieno, kaj jen sur ĝi nutraĵeretoj kaj ankoraŭ kelkaj pliaj nutraĵeretoj en la herbo. Kaj vidu! Apude kuŝas kelkaj pecoj de tranĉita ŝnureto!

— Kaj jen la tranĉilo, kiu tranĉis ilin! — diris Gimlio. Li kliniĝis kaj eltiris el herbotufo, en kiun premis ĝin ies peza piedo, mallongan segecan klingon. La tenilo, de kiu ĝi estis forrompita, kuŝis apude. — Ĝi estas orka armilo, — li diris, singardeme tenante ĝin kaj rigardante kun abomeno ĝian ĉizitan tenilon: oni formis ĝin kiel hidan kapon kun strabaj okuloj kaj rikanaĉa buŝo.

— Nu, jen la plej stranga enigmo, kiun ni ĝis nun trovis! — ekkriis Legolaso. — Ligita kaptito eskapas de la orkoj kaj ankaŭ de la ĉirkaŭaj rajdistoj. Li tiam haltas, dum ankoraŭ senŝirma, kaj tranĉas siajn ligaĵojn per orka tranĉilo. Sed kiel kaj kial? Ĉar se la kruroj estis ligitaj, kiel li marŝis? Kaj se liaj brakoj estis ligitaj, kiel li uzis la tranĉilon? Kaj se neniu el ambaŭ estis ligita, kial entute tranĉi la ŝnuretojn? Kontenta pri sia lerto li poste sidiĝis kaj manĝis kviete iom da vojpano! Tio en si mem sufiĉas por indiki, ke li estis hobito, sen la malorna folio. Post ĉio ĉi, supozeble, li flugiligis siajn brakojn kaj forbirdis ĉirpante en la arbojn. Devus esti facile trovi lin: necesos nur havi proprajn flugilojn!

— Okazis sorĉado ĉi tie, efektive, — diris Gimlio. — Kion faris tiu maljunulo? Kion vi diras, Aragorno, pri la interpreto de Legolaso? Ĉu vi povas superi ĝin?

— Eble jes, — diris Aragorno ridetante. — Troviĝas kelkaj aliaj signoj en la proksimo, kiujn vi ne pripensis. Mi konsentas, ke la kaptito estis hobito kaj certe havis liberajn krurojn aŭ manojn antaŭ ol veni

ĉi tien. Mi konjektas, ke temis pri la manoj, ĉar tiuokaze la enigmo pli-faciliĝas, kaj ankaŭ ĉar laŭ mia interpreto de la signoj li estis *portita* ĉi tien de orko. Sango elverŝiĝis tie for kelkajn paŝojn, ja orka sango. Ĉirkaŭ tiu ĉi loko estas profundaj spuroj de hufoj kaj indikoj, ke io peza estis fortrenita. La orkon mortigis rajdantoj, kaj poste la kadavro estis trenita al la fajro. Sed la hobito estis nevidita: li ne estis senŝirma, ĉar estis nokte, kaj li ankoraŭ havis sian elfan mantelon. Li estis elĉerpita kaj malsata, kaj ne estas mirinde, ke tranĉinte siajn ligaĵojn per la tranĉilo de sia falinta malamiko, li ripozis kaj manĝis iomete antaŭ ol forrampi. Sed estas konsole konstati, ke en la poŝo li havis iom da *lembaso*, eĉ se li forkuris sen havaĵo aŭ tornistro; tio, eble, estas tre hobitece. Mi diras *li*, kvankam mi esperas kaj konjektas, ke Gaja kaj Grinĉjo estis kune ĉi tie ambaŭ. Troviĝas tamen nenio, kio pruvas tion eksterdube.

— Kaj kiel laŭ via opinio okazis, ke unu aŭ alia el niaj amikoj hazarde havis liberan manon? — demandis Gimlio.

— Mi ne scias, kiel tio okazis, — respondis Aragorno. — Mi ankaŭ ne scias, kial orko forportis ilin. Certe ne por helpi ilian eskapon. Ne, prefere mi pensas, ke mi jam ekkomprenas ion, kio perpleksis min ekde la komenco. Kial, kiam Boromiro estis falinta, la orkoj kontentis pri kapto de Gaja kaj Grinĉjo? Ili ne serĉis la ceterajn, nek atakis nian bivakon; anstataŭe ili iris kiel eble plej rapide al Isengardo. Ĉu ili supozis, ke ili jam kaptis la Ringoportanton kaj ties fidelan kamaradon? Mi opinias, ke ne. Iliaj mastroj ne riskus doni tian klaran ordonon al orkoj, eĉ se ili sciis tion mem; ili ne parolus malkaŝe al ili pri la Ringo: tiuj ne estas fidindaj servantoj. Sed mi opinias, ke al la orkoj estis ordonite kapti *hobitojn* vivantajn je ĉia kosto. Oni klopodis formalaperi kun la altvaloraj kaptitoj antaŭ la batalo. Eble okazis perfido, sufiĉe probabla ĉe tia popolo; iu granda kaj aŭdaca orko eble provis eskapi sola kun la rabajo propracele. Jen, tia estas mia rakonto. Aliajn oni povus elpensi. Sed pri tio ĉi ni rajtas kalkuli ĉiuokaze: almenaŭ unu el niaj amikoj eskapis. Nia tasko estas trovi kaj helpi lin antaŭ ol ni reiros al Rohano. Ni devas ne esti fortimigitaj de Fangorno, ĉar neceso pelis lin en tiun malhelan lokon.

— Mi ne scias, kiu fortimigas min pli: Fangorno aŭ penso pri longa vojo tra Rohano perpiede, — diris Gimlio.

— Do, ni iru en la arbaregon, — diris Aragorno.

Post nelonge Aragorno trovis aliajn signojn. Ĉe unu loko proksime al la bordo de Entvaŝo li alvenis spurojn de hobitoj, tro malpezaj por konstati per ili multon. Poste denove sub trunko de granda arbo ĉe la rando mem de l' arbaro estis trovitaj pliaj indikoj. La tero estis nuda kaj seka kaj ne vidigis multon.

— Almenaŭ unu hobito staris ĉi tie kelkan tempon kaj retrorigardis; kaj poste li sin forturnis en la arbaron, — diris Aragorno.

— Do ankaŭ ni devas eniri, — diris Gimlio. — Sed al mi ne plaĉas la aspekto de tiu ĉi Fangorno; kaj oni avertis nin kontraŭ ĝi. Mi preferus, ke la ĉaso konduku al iu ajn alia loko!

— Laŭ mi, la arbaro ne sentiĝas misa, kion ajn diras la rakontoj, — diris Legolaso. Li staris rande de l' arbaro, kliniĝante antaŭen, kvazaŭ li aŭskultus, kaj rigardante larĝokule en la ombrojn. — Ne, ĝi ne estas malvirta; aŭ la malvirto en ĝi estas tre malproksima. Mi kaptas nur la plej mallaŭtajn eĥojn de malhelaj lokoj, kie la koroj de la arboj nigras. Ne troviĝas malico proksime al ni; sed troviĝas gardemo kaj kolero.

— Nu, ĝi ne havas motivon koleri pri mi, — diris Gimlio. — Mi neniel damaĝis ĝin.

— Tre feliĉe, — diris Legolaso. — Tamen ĝi suferis damaĝon. Io okazas interne, aŭ estas okazonta. Ĉu vi ne sentas la streĉitecon? Ĝi rabas al mi la spiron.

— La aero sentiĝas al mi sufokeca, — diris la gnomo. — La arbaro pli helas ol Mornarbaro, sed ĝi estas mucida kaj malneta.

— Ĝi estas maljuna, tre maljuna, — diris la elfo. — Tiel maljuna, ke mi preskaŭ sentas min denove juna, kion mi ne spertis de kiam mi ekvojaĝis kun vi, infanoj. Ĝi estas maljuna kaj memorplena. Mi povus esti feliĉa ĉi tie, se mi venus en tagoj pacaj.

— Mi volonte kredas tion, — snufis Gimlio. — Vi estas arbara elfo ĉiuokaze, kvankam ĉiaj elfoj estas stranguloj. Tamen vi konsolas min. Kien vi iros, tien iros ankaŭ mi. Sed tenu la pafarkon preta al la mano, kaj mi tenos mian hakilon malstrikta en la zono. Ne por uzo kontraŭ arboj, — li haste aldonis, rigardante supren al la arbo, sub kiu ili staris. — Mi ne volas renkonti tiun maljunulon senaverte sen preta argumento, jen ĉio. Ni iru!

Tion dirinte, la tri ĉasantoj plonĝis en la arbaron de Fangorno. Legolaso kaj Gimlio lasis la spuradon al Aragorno. Troviĝis malmulto videbla. La arbara subo estis seka kaj kovrita de folia drivaĵo; sed konjektante, ke la fuĝintoj preferus resti proksimaj al la akvo, li ofte reiris

al la bordoj de la rivereto. Tial okazis, ke li venis al la loko, kie Gaja kaj Grinĉjo trinkis kaj banis siajn piedojn. Tie, klare videblaj al ĉiuj, estis la piedsignoj de du hobitoj, unuj iom pli malgrandaj ol la aliaj.

— Bona novaĵo, — diris Aragorno. — Tamen la spuroj jam aĝas du tagojn. Kaj ŝajnas, ke de ĉi tie la hobitoj forlasis la akvobordon.

— Do kion ni faru nun? — diris Gimlio. — Ni ne povas serĉi ilin tra la tuta fortikaĵo Fangorno. Ni venis malbone ekipitaj. Se ni ne trovos ilin baldaŭ, ni neniom utilos al ili krom por sidiĝi kun ili kaj pruvi nian amikecon per kuna malsatado.

— Se vere nur tion ni povas fari, tion ni do devas fari, — diris Aragorno. — Ni iru pluen.

Ili fine venis al la apika abrupta ekstremaĵo de l' Monto de Arbo-barbo kaj suprenrigardis al la roka muro kun ties krudaj ŝtupoj kondukantaj ĝis la alta breto. Ekbriloj da sunlumo trapafis la rapidantajn nubojn, kaj la arbaro jam ŝajnis malpli griza kaj morna.

— Ni supreniru kaj ĉirkaŭrigardu! — diris Legolaso. — Mi ankorau spertas mankon de spiro. Mi ŝatus gustumi dum kelka tempo aeron pli liberan.

La kunuloj grimpis supren. Aragorno venis lasta, moviĝante malrapide: li rigardis tre atente la ŝtupojn.

— Mi preskaŭ certas, ke la hobitoj supreniris ĉi tie, — li diris. — Sed troviĝas aliaj signoj, signoj tre strangaj, kiujn mi ne komprenas. Mi scivolas, ĉu ni vidos ion de tiu ĉi breto, kio helpos nin diveni kiun vojon ili sekvis poste?

Li stariĝis kaj ĉirkaŭrigardis, sed li vidis nenion utilan. La breto frontis suden kaj orienten; sed nur oriente la videbleco apertis. Tie li vidis la arbosuprojn vice descendantajn al la ebenaĵo, kiun ili ĵus transiris.

— Ni vojaĝis laŭ pli longa vojo, — diris Legolaso. — Ni povus sendanĝere veni ĉi tien ĉiuj kune, se ni forlasus la Grandan Riveron je la dua aŭ tria tago kaj ekirus okcidenten. Malmultaj kapablas antaŭvidi, kien ilia vojo kondukos ilin, ĝis ili atingas ties finon.

— Sed ni ne volis veni al Fangorno, — diris Gimlio.

— Tamen ĉi tie ni estas — kaj bele enretigitaj, — diris Legolaso. — Vidu!

— Vidu kion? — diris Gimlio.

— Tie inter la arboj.

— Kie? Elfajn okulojn mi ne havas.

— Ĉit! Parolu malpli laŭte! Rigardu! — diris Legolaso

fiŝgromontrante. — Sube en la arbaro, retro laŭ la vojo, kiun ni ĵus trapasis. Estas li. Ĉu vi ne povas vidi lin irantan de arbo al arbo?

— Mi vidas, jam mi vidas! — siblis Gimlio. — Rigardu, Aragorno! Ĉu mi ne avertis vin? Jen la maljunulo. Vestita tute per malpuraj grizaj ĉifonoj: pro tio mi ne vidis lin komence.

Aragorno rigardis, kaj vidis kurban figuron, kiu moviĝis malrapide. Ĝi ne tre malproksimis. Ĝi aspektis kiel maljuna almozulo marŝanta lace, apoganta sin per kruda marŝbastono. Lia kapo estis klinita, kaj li ne rigardis al ili. Alilande ili salutis lin per afablaj vortoj, sed nun ili staris silentaj, ĉiu sentis strangan anticipon: alvenas io, kio posedas kaŝitan potencon — aŭ minacon.

Gimlio rigardis larĝokule dum iom da tempo, dum paŝon post paŝo la figuro proksimiĝis. Tiam subite, ne plu povante bridi sin, li ekkriis:

— Vian pafarkon, Legolaso! Streĉu ĝin! Pretiĝu! Estas Sarumano. Ne lasu lin paroli, aŭ trafi nin per sorĉaĵo! Pafu anticipe!

Legolaso prenis sian pafarkon kaj streĉis ĝin, malrapide kaj kvazaŭ rezistus alies volo. Li tenis sagon en la mano loze, sed ne metis ĝin al la kordo. Aragorno staris silenta, kun la vizaĝo atentema kaj koncentriĝa.

— Kial vi atendas? Kio estas al vi? — diris Gimlio per sibla flustro.

— Legolaso pravas, — diris Aragorno kviete. — Ni ne rajtas pafi maljunulon tiamaniere, nekonscian kaj ne alparolitan, kia ajn timo aŭ dubo envolvas nin. Rigardu kaj atendu!

Tiumomente la maljunulo rapidigis siajn paŝojn kaj venis laŭ surpriza rapideco ĝis la subo de la roka muro. Tie li subite rigardis supren, dum ili staris senmove rigardante suben. Aŭdiĝis neniu sono.

Lian vizaĝon ili ne povis vidi: li estis kapuĉita, kaj super la kapuĉo li portis larĝrandan ĉapelon, tiel, ke ĉiuj liaj trajtoj estis ombritaj, krom la pinto de lia nazo kaj lia griza barbo. Tamen al Aragorno ŝajnis, ke li ekvidas brileton de okuloj akraj kaj helaj el la ombro de la kapuĉita frunto.

Fine la maljunulo rompis la silenton:

— Ja feliĉe renkontite, miaj amikoj, — li diris mallaŭte. — Mi volas alparoli vin. Ĉu vi descendu aŭ mi algrimpu? — Ne atendente respondu li komencis grimpi.

— Nun! — kriis Gimlio. — Haltigu lin, Legolaso!

— Ĉu mi ne diris, ke mi volas alparoli vin? — diris la maljunulo. — Formetu tiun pafarkon, mastro elfo!

La pafarko kaj sago falis el la manoj de Legolaso, kaj liaj brakoj ekpendis loze ĉe liaj flankoj.

— Kaj vi, mastro gnomo, bonvolu forpreni la manon de via hakiltenilo ĝis mi venos supren! Tiujn argumentojn vi ne bezonos.

Gimlio abrupte tikis kaj poste staris senmova kiel ŝtono dum la maljunulo suprensaltis laŭ la ŝtuparo tiel lerte kiel kapro. La tuta laceco ŝajnis forlasinta lin. Kiam li surpaŝis la ŝtupon, okazis ekbrilo, tro mallonga por esti certa, subita ekaperero de blanko, kvazaŭ estus momente vidigita vestaĵo kaŝita sub la grizaj ĉifonoj. La enspiro de Gimlio aŭdiĝis kiel laŭta siblo en la silento.

— Bone renkontite, mi diras denove! — diris la maljunulo, proksimiĝante al ili. Kiam li foris kelkajn paŝojn, li stariĝis klinite al sia marŝbastono, kun la kapo puŝita antaŭen, rigardante ilin el sub la kapuĉo. — Kaj kion vi faras en tiu ĉi loko? Elfo, homo kaj gnomo, ĉiu vestita elfmaniere. Sendube malantaŭ tio estas aŭskultinda rakonto. Tiajn aferojn oni malofte vidas ĉi tie.

— Vi parolas, kiel iu, kiu bone konas Fangornon, — diris Aragorno. — Ĉu ne vere?

— Ne tre bone, — diris la maljunulo: — tio estas studaĵo multviva. Sed mi venas ĉi tien de tempo al tempo.

— Ĉu mi rajtas scii vian nomon kaj poste aŭdi tion, kion vi volas diri al ni? — diris Aragorno. — La mateno pasas, kaj ni havas komision, kiu ne prokrastiĝu.

— Koncerne tion, kion mi volis diri, mi jam diris ĝin: Kion vi faras kaj kiun historion vi povas rakonti pri vi? Koncerne mian nomon! — Li abrupte malparolis, ridante longe kaj mallaŭte. Pro la sono Aragorno sentis tratremon, strangan fridan ekvibron; kaj tamen nek timon, nek teruron li spertis: prefere ĝi similis subitan gluton de akra aero, aŭ la vangofrapon de malvarma pluvo, kiu vekas maltrankvilan dormanton.

— Mian nomon! — rediris la maljunulo. — Ĉu vi ne jam divenis ĝin? Vi aŭdis ĝin antaŭe, ŝajnas al mi. Jes, vi aŭdis ĝin antaŭe. Sed ekdo, kio pri via rakonto?

La tri kunuloj staris silentaj kaj tute ne respondis.

— Ekzistas kelkaj, kiuj ekdubis ĉu via komision taŭgas por la rakonto, — diris la maljunulo. — Feliĉe mi scias iom pri ĝi. Vi spuras la piedsignojn de du junaj hobitoj, mi kredas. Jes, hobitoj. Ne gapu, kvazaŭ vi ne aŭdus antaŭe tiun strangan nomon. Vi aŭdis kaj ankaŭ

mi aŭdis. Nu, ili grimpis ĉi tien antaŭhieraŭ; kaj ili renkontis iun, kiun ili ne atendis. Ĉu tio konsolas vin? Kaj nun vi ŝatus scii, kien oni kondukis ilin? Nu, nu, eble mi povas havigi al vi informon tiurilate. Sed kial ni staradas? Via komisio, vi komprenas, jam ne tiom urĝas, kiom vi supozis. Ni sidiĝu kaj estu malpli streĉitaj.

La maljunulo forturnis sin kaj aliris amaseton da falintaj ŝtonoj kaj rokoj sube de la malantaŭa klifo. Tuj, kvazaŭ sorĉo estus nuligita, la aliaj malstreĉiĝis kaj ekmoviĝis. La mano de Gimlio iris al la hakiltenilo. Aragorno elingigis sian glavon. Legolaso prenis sian pafarkon.

La maljunulo tute ne atentis, sed kliniĝis kaj sidigis sin sur malalta ebena ŝtono. Tiam lia griza mantelo disiĝis kaj ili vidis preterdube, ke li estas sube vestita tute blanke.

— Sarumano! — kriis Gimlio saltante al li hakil-en-mane. — Parolu! Diru al ni, kie vi kaŝis niajn amikojn! Kion vi faris pri ili? Parolu, aŭ mi fendos vian ĉapelon tiel, ke eĉ sorĉisto malfacile scios trakti tion!

La maljunulo estis tro agopreta. Li salte stariĝis kaj alsaltis la supron de granda roko. Tie li staris, subite altiĝinte, baŭmante super ili. Liaj kapuĉo kaj grizaj ĉifonoj estis forĵetitaj. Liaj blankaj vestaĵoj brilis. Li levis sian bastonon kaj la hakilo de Gimlio saltis el lia mano kaj falis sonore al la tero. La glavo de Aragorno, rigida en lia senmova mano, ekflamis per subita fajro. Legolaso elpuŝis laŭtan krion kaj pafis sagon alten en la aeron: ĝi malaperis en flama flagro.

— Mitrandiro! — li kriis. — Mitrandiro!

— Bone renkontite, mi rediras al vi, Legolaso! — diris la maljunulo.

Ili ĉiuj gapis al li. Liaj haroj estis blankaj kiel la neĝo en la sunlumo; kaj brile blanka estis lia robo; la okuloj sub liaj profundaj brovoj estis brilaj, pikantaj kiel la sunradioj; lia mano estis potenco-plena. Mirigite, ĝoje kaj timplene ili staris kaj trovis neniujn direblajn vortojn.

Fine Aragorno ekmoviĝis.

— Gandalfo! — li diris. — Super nia espero vi revenas al ni en nia bezono! Kio vualis mian vidpovon? Gandalfo!

Gimlio diris nenion, sed lante genuiĝis, ombrumante siajn okulojn.

— Gandalfo, — la maljunulo rediris, kvazaŭ revokante el malnova memoro vorton longe neuzitan. — Jes, tio estis la nomo. Mi estis Gandalfo.

Li paŝis de sur la roko kaj, preninte sian grizan mantelon, volvis sin per ĝi: ŝajnis kvazaŭ la suno brilus, sed nun denove estis kaŝita en nuboj.

— Jes, vi rajtas ankoraŭ nomi min Gandolfo, — li diris, kaj la voĉo estis la voĉo de ilia malnova amiko kaj gvidinto. — Stariĝu, mia bona Gimlio! Ne kulpas vi, kaj nenio malbona okazis al mi. Efektive, miaj amikoj, neniuj el vi havas armilon, kiu kapablus damaĝi min. Estu gajaj! Ni renkontiĝis denove. Ĉe alterniĝo de la tajdo. Venas la granda ŝtormo, sed la tajdo alterniĝis.

Li metis sian manon sur la kapon de Gimlio, kaj la gnomo rigardis supren kaj subite ekridis:

— Gandolfo! — li diris. — Sed vi estas tute blankvestita!

— Jes, nun mi estas blanka, — diris Gandolfo. — Efektive mi *estas* Sarumano, oni preskaŭ povus diri, Sarumano tia, kia li devintus esti. Sed ek jam, sciigu min pri vi! Mi trapasis fajron kaj profundan akvon de kiam ni disiĝis. Mi forgesis multon, kion mi supozis scii, kaj lernis multon, kion mi forgesis. Mi povas vidi multajn aferojn en la foro, sed multajn aferojn proksimajn mi ne povas vidi. Rakontu al mi pri vi!

— Kion vi deziras scii? — demandis Aragorno. — Ĉio okazinta post nia disiĝo sur la ponto estus rakonto longa. Ĉu vi ne volas unue sciigi nin pri la hobitoj? Ĉu vi trovis ilin, kaj ĉu ili estas sekuraj?

— Ne, mi ne trovis ilin, — diris Gandolfo. — Super la valoj de Emin Muilo estis mallumo, kaj mi ne sciis pri ilia kaptiteco ĝis informis min la aglo.

— La aglo! — diris Legolaso. — Mi vidis aglon alte kaj fore: la lasta fojo estis antaŭ tri tagoj super Emin Muilo.

— Jes, — diris Gandolfo, — tiu estis Gvajhiro la Ventmastro, kiu savis min el Ortanko. Mi sendis lin antaŭen por gvati la riveron kaj kolekti informojn. Li vidas akre, sed li ne povas vidi ĉion okazantan sub montoj kaj arboj. Iujn aferojn li ja vidis kaj iujn aliajn mi mem vidis. La Ringo jam pasis ekster mian helpivon aŭ la helpivon de iu ajn el la Kunularo, kiu ekvojaĝis el Rivendelo. Ĝi preskaŭ riveliĝis al la Malamiko, sed ĝi eskapis. Mi iom partoprenis tion: ĉar mi sidis en alta loko, kaj mi luktis kontraŭ la Malhelan Turegon, kaj la Ombro forpasis. Tiam mi estis lacega, vere lacega; kaj mi longe promenis malhele pensante.

— Sekve vi scias pri Frodo! — diris Gimlio. — Kiel iras liaj aferoj?

— Mi ne scias. Li estis savita el granda danĝero, sed multaj aliaj

ankoraŭ troviĝas antaŭ li. Li decidis iri sola al Mordoro kaj li ekvojaĝis: jen ĉio, kion mi scias.

— Ne sola, — diris Legolaso. — Ni opinias, ke Sam akompanis lin.

— Ĉu vere? — diris Gandolfo, kaj aperis ekbrilo en liaj okuloj kaj rideto sur lia vizaĝo. — Ĉu efektive? Tio estas novaĵo al mi, tamen ĝi ne surprizas min. Bone! Tre bone! Vi malpezigis mian koron. Vi devas rakonti al mi pli. Nun sidiĝu apud mi kaj rakontu al mi la historion de via vojaĝo.

La kunuloj sidiĝis surtere apud liaj piedoj kaj Aragorno komencis la rakonton. Dum longa tempo Gandolfo diris nenion, kaj li starigis neniujn demandojn. Liaj manoj estis disfingre metitaj sur liaj genuoj, kaj liaj okuloj estis fermitaj. Fine, kiam Aragorno parolis pri la morto de Boromiro kaj pri ties lasta vojaĝo sur la rivero, la maljunulo suspiris.

— Vi ne rakontis ĉion, kion vi scias aŭ divenas, amiko mia Aragorno, — li diris kviete. — Kompatinda Boromiro! Mi ne povis vidi, kio okazis al li. Ĝi estis malfacila peno por tia viro: batalanto kaj mastro de homoj. Galadriela informis min, ke li estis en danĝero. Sed li eskapis en la fino. Mi ĝojas. Ne vane la junaj hobitoj akompanis nin, se nur pro la destino de Boromiro. Sed tio ne estas ilia sola rolo. Ili estis gviditaj al Fangorno kaj ilia alveno similis tian faladon de ŝtonetoj, kia kaŭzas lavangon en montaro. Eĉ dum ni interparolas ĉi tie, mi aŭdas ties fruan murmuradon. Plej bone Sarumano ne estu for de la hejmo kiam rompiĝos la digo!

— Unu via trajto ne ŝanĝiĝis, kara amiko, — diris Aragorno: — vi daŭre parolas enigme.

— Kio? Ĉu enigme? — diris Gandolfo. — Ne! Ĉar mi laŭtparolis al mi mem. Kutimo de maljunuloj: ili elektas la plej saĝan ĉeestanton por alparolo; la longaj klarigoj necesaj al la junuloj estas lacigaj. — Li ridis, sed la sono jam ŝajnis varma kaj bonkora kiel ekbrilo da sunlumo.

— Mi ne plu estas juna, eĉ laŭ kalkulo de la homoj el la antikvaj domoj, — diris Aragorno. — Ĉu vi ne volas pli klare malfermi vian penson al mi?

— Kion do mi diru? — diris Gandolfo kaj iomete paŭzis pensante. — Jen mallonge kiel mi nun vidas la aferojn, se vi volas ricevi pecon kiel eble plej klaran de mia menso. La Malamiko kompreneble jam delonge scias, ke la Ringo ien vagas kaj ke ĝin portas hobito. Li scias la

nombron de nia Kunularo kiu ekvojaĝis el Rivendelo, kaj kiaj ni estas unuope. Sed li ankoraŭ ne perceptas klare nian celon. Li supozas, ke ni ĉiuj volis iri al Minaso Tirit; ĉar tion farus li mem sur nia loko. Kaj laŭ lia saĝo tio estus grava bato al lia potenco. Efektive, li forte timas, ne sciante kia potenculo povas subite aperi, utiligante la Ringon kaj atakante lin milite, celante subenĵeti kaj anstataŭi lin. Ke ni volus suben ĵeti lin kaj havi *neniun* sur lia loko, estas penso, kiu ne venas en lian kapon. Ke ni volus detrui la Ringon mem, ankoraŭ ne penetris lian plej malluman songon. En tio sendube vi konstatos nian bonan fortunon kaj nian esperon. Ĉar imaginte militon, li ekirigis militon, kredante, ke li devas ne malŝpari la tempon; ĉar tiu kiu batas la unua, se li batas sufiĉe forte, eble ne devos bati plu. Do la fortojn, kiujn li longe preparis, li nun funkciigas, pli frue ol li intencis. Saĝa stultulo. Ĉar se li uzus sian tutan potencon por gardi Mordoron, tiel ke neniu povu eniri, kaj direktus sian tutan ruzon al ĉasado de la Ringo, tiam efektive espero forvelkus: nek la Ringo nek ties portanto povus longe eviti lin. Sed nun liaj okuloj rigardas malproksimen anstataŭ hejmaproksimen; kaj plejparte li rigardas al Minaso Tirit. Jam tre baldaŭ lia forto atakos ĝin kvazaŭ ŝtormo.

» Ĉar li jam scias, ke la komisiitoj, kiujn li sendis embuski la Kunularon, denove malsukcesis. La Ringon ili ne trovis. Ili ankaŭ ne forportis ostaĝe iujn hobitojn. Se ili eĉ farus tiom malmulte, tio estus al ni peza bato, kaj eble mortiga. Sed ni ne mornigu niajn korojn, imagante testadon de ilia milda lojaleco en la malluma Turego. Ĉar la Malamiko malsukcesis — ĝis nun. Dank' al Sarumano.

— Ĉu Sarumano ne estas perfidulo? — demandis Gimlio.

— Li ja estas, — diris Gandolfo. — Duoble. Kaj ĉu tio ne estas stranga? Neniu suferita de ni lastatempe ŝajnis tiel grava kiel la perfido far Isengardo. Taksata eĉ kiel estro kaj komandanto, Sarumano iĝis ege forta. Li minacas la homojn el Rohano kaj fortirigas ilian helpon el Minaso Tirit, ĝuste kiam la ĉefa bato proksimiĝas el la oriento. Tamen nefidinda armilo ĉiam endanĝerigas la manon. Ankaŭ Sarumano emas akiri mem la Ringon por si, aŭ almenaŭ kapti iujn hobitojn por siaj malvirtaj celoj. Do inter ili, niaj malamikoj nur sukcesis venigi Gajan kaj Grinĉjon mirinde rapide al Fangorno, kien ili alie neniam venus!

» Cetere, ili plenigis sin per novaj duboj, kiuj perturbas iliajn planojn. Neniu informo pri la batalo atingos Mordoron, dank' al la rajdistoj el Rohano; sed la malhela Mastro scias, ke du hobitoj estis

kaptitaj en Emin Muilo kaj forportitaj al Isengardo kontraŭ la volo de liaj propraj servistoj. Li jam devas timi tiel Isengardon kiel Minason Tirit. Se falos Minaso Tirit, estos malbone al Sarumano.

— Estas domaĝe, ke niaj amikoj troviĝas inter la du, — diris Gimlio. — Se neniu tereno disigus Isengardon kaj Mordoron, ili ja povus interbatali, dum ni spektus kaj atendus.

— La venkinto travivus pli forta ol ambaŭ kaj libera je duboj, — diris Gandolfo. — Sed Isengardo ne povas batali kontraŭ Mordoro, krom se Sarumano pli frue akirus la Ringon. Tion li jam neniam faros. Li ankoraŭ ne scias pri sia danĝero. Ja multon li ne scias. Tiel avide li volis kapti sian predon, ke li ne povis resti hejme, kaj li elvenis por renkonti kaj spioni siajn komisiitojn. Sed li venis tro malfrue, iom escepte, kaj la batalo finiĝis kaj estis ekster lia helpivo antaŭ ol li atingis ĉi tiun terenon. Li ne longe restis ĉi tie. Mi enrigardis lian menson kaj vidis lian dubemon. Mankas al li natura klereco. Li opinias, ke la rohananoj mortigis kaj bruligis ĉiujn sur la bataalkampo; sed li ne scias, ĉu aŭ ne la orkoj alportis iujn kaptitojn. Kaj li ne scias pri la kverelo inter liaj servistoj kaj la orkoj de Mordoro, kiel li ankaŭ ne scias pri la Flugilhava Kuriero.

— Ĉu la Flugilhava Kuriero! — kriis Legolaso. — Tiun mi pafis per la pafarko de Galadriela super Sarn Gebiro, kaj mi faligis lin el la ĉielo. Li timplenigis nin. Kia nova teruraĵo estas tio ĉi?

— Tia, kian vi ne povas mortigi per sagoj, — diris Gandolfo. — Vi mortigis nur lian rajdbeston. Tio estis taŭga faro, sed la Rajdanto baldaŭ denove surseliĝis. Ĉar li estas nazgulo, unu el la naŭ, kiuj rajdas nun ĉevalojn flugilhavajn. Baldaŭ ilia teruro superombros la lastajn armeojn de niaj amikoj, forbarante la sunon. Sed al ili ankoraŭ ne estas permesate transiri la Riveron, kaj Sarumano ne konas tiun novan formon, en kiu la ringofantomoj estas vestitaj. Li pensadas ĉiam pri la Ringo. Ĉu ĝi ĉeestis dum la batalo? Ĉu ĝi estis trovita? Kiel se Teodeno, Mastro de Markio, trovis ĝin kaj eksciis pri ĝia potenco? Tio estas la danĝero, kiun li perceptas, kaj li refuĝis al Isengardo por duobligi kaj triobligi sian atakon kontraŭ Rohano. Kaj la tutan tempon ekzistas alia danĝero, tre proksima, kiun li ne perceptas okupate de siaj ardaĵ pensoj. Li forgesis pri Arbobarbo.

— Nun vi denove alparolas vin mem, — diris Aragorno ridetante. — Arbobarbo ne estas konata al mi. Kaj mi divenis parton de la duobla perfido de Sarumano; tamen mi ne vidas, kiel servas la alveno de la du hobitoj al Fangorno, krom kaŭzi al ni longan kaj senfruktan ĉasadon.

— Atendu momenton! — kriis Gimlio. — Alian aferon mi ŝatus scii unue. Ĉu tiu estis vi, Gandolfo, aŭ Sarumano, kiun ni vidis hieraŭ nokte?

— Tutcerte min vi ne vidis, — respondis Gandolfo, — sekve mi devas konjekti, ke vi vidis Sarumanon. Konstateble ni tiom similas unu la alian, ke oni devas pardoni vian deziron nekuraĉeble fendi mian ĉapelon.

— Bone, bone! — diris Gimlio. — Mi ĝojas, ke temis ne pri vi. Gandolfo ridis denove:

— Jes, mia bona gnomo, — li diris, — estas agrable ne erari ĉiupunkte. Tion mi ja scias mem tre bone! Sed kompreneble mi neniam kulpigis vin pro via bonvenigo de mi. Kiel povus fari tion mi, kiu tiel ofte konsilis al miaj amikoj, ke ili suspektu eĉ la proprajn manojn intertraktante kun la Malamiko. Benon al vi, Gimlio, filo de Gloino! Eble iutage vi vidos nin ambaŭ kune kaj juĝos inter ni!

— Sed la hobitoj! — Legolaso intermetis. — Ni longe vojaĝis serĉante ilin kaj ŝajnas, ke vi scias, kie ili estas. Kie ili nun estas?

— Kun Arbobarbo kaj la entoj, — diris Gandolfo.

— La entoj! — ekkriis Aragorno. — Do troviĝas vero en la malnovaj legendoj pri la loĝantoj en la arbarprofundoj kaj la gigantaj paŝtistoj de l' arboj, ĉu? Ĉu ankoraŭ troviĝas entoj en la mondo? Mi supozis ilin nur memoraĵo el la tagoj praaj, se entute ili iam estis pli ol legendo el Rohano.

— Legendo el Rohano! — kriis Legolaso. — Ne, ĉiu elfo en Sovaĝujo kantis kantojn pri la maljunaj onodroj kaj ties longa malĝojo. Tamen eĉ inter ni ili estas nur memoraĵo. Se mi renkontas tian ankoraŭ promenantan en tiu ĉi mondo, tiam mi efektive denove sentus min juna! Sed Arbobarbo: tio estas nur traduko de Fangorno en la Komunan Lingvon; tamen vi parolas pri persono. Kiu estas tiu ĉi Arbobarbo?

— Ha, nun vi postulas multon, — diris Gandolfo. — Tiu malmulto, kiun mi scias pri lia longa lanta historio, fariĝus rakonto, por kiu ni ne disponas tempon. Arbobarbo estas Fangorno, la gardisto de l' arbar-ego. Li estas la plej maljuna el la entoj, la plej maljuna vivanto, kiu ankoraŭ promenas sub la suno sur tiu ĉi Mez-Tero. Mi vere esperas, Legolaso, ke vi eble iam renkontos lin. Gaja kaj Grinĉjo estis bonŝancaj: ili renkontis lin ĉi tie, ĝuste kie ni sidas. Li venis ĉi tien antaŭ du tagoj kaj forportis ilin al sia loĝejo en la foro ĉe la radikaro de la montoj. Li ofte venas ĉi tien, precipe kiam lia menso estas

maltrankvila kaj ĝenas lin onidiroj el la ekstera mondo. Mi vidis lin antaŭ kvar tagoj paŝeganta inter la arboj, kaj mi opinias, ke li vidis min, ĉar li paŭzis; sed mi ne parolis, ĉar mi estis peza pro la pensoj kaj laca post mia lukto kontraŭ la Okulo de Mordoro; kaj ankaŭ li ne parolis, nek vokis mian nomon.

— Eble ankaŭ li supozis vin Sarumano, — diris Gimlio. — Sed vi parolas pri li kvazaŭ pri amiko. Mi supozis, ke Fangorno estas danĝera.

— Ĉu danĝera! — kriis Gandalfo. — Kaj ankaŭ mi, tre danĝera: pli danĝera ol iu ajn renkontota de vi, krom se vi estos vive trenata antaŭ la seĝon de la Malluma Mastro. Kaj Aragorno estas danĝera, kaj Legolaso estas danĝera. Vi estas ĉirkaŭita de danĝeroj, Gimlio filo de Gloino; ĉar vi mem estas danĝera viamaniere. Certe la arbarego Fangorno estas danĝeroplana — ne malpleje por tiuj, kiuj tro agopretas hakile; kaj Fangorno mem, ankaŭ li estas danĝeroplana; tamen malgraŭ tio li estas saĝa kaj bonfarema. Sed nun lia longa lanta kolero ekelverŝiĝas kaj plenigas la tutan arbaregon. La alveno de l' hobitoj kaj la informoj, kiujn ili alportis, igis ĝin elverŝiĝi: baldaŭ ĝi fluos inunde; sed ĝia tajdo estas direktita kontraŭ Sarumanon kaj la hakilojn de Isengardo. Io estas okazonta, kiu ne okazis de post la Praaj Tagoj: la entoj vekiĝos kaj trovos, ke ili estas fortaj.

— Kion ili faros? — demandis Legolaso mirigite.

— Mi ne scias, — diris Gandalfo. — Mi opinias, ke ili mem ne scias. Mi scivolas. — Li silentiĝis, kun la kapo penseme klinita.

La aliaj rigardis lin. Ekbrilo de sunlumo tra nuboj pasantaj trafis liajn manojn, kiuj nun kuŝis polmosupre sur lia sino: ili ŝajnis plenigitaj de lumo kiel tason plenigas akvo. Finfine li suprenrigardis rekte al la suno.

— La mateno foruziĝas, — li diris. — Baldaŭ ni devos ekiri.

— Ĉu ni iros trovi niajn amikojn kaj vidi Arbobarbon? — demandis Aragorno.

— Ne, — diris Gandalfo. — Ne tiun vojon vi devos iri. Mi parolis vortojn esperoplenajn. Sed nur esperoplenajn. Espero ne estas venko. Milito atencas nin kaj ĉiujn niajn amikojn, milito, en kiu nur uzado de la Ringo kapablas certigi nin pri venko. Tio plenigas min de granda malĝojo kaj granda timo: ĉar multo estas detruota kaj ĉio eble perdiĝos. Mi estas Gandalfo, Gandalfo la Blanka, sed Nigra eĉ pli potencas.

Li stariĝis kaj forrigardis orienten, mane ombrumante la okulojn, kvazaŭ li vidus aferojn malproksimajn, kiujn neniu el ili povis vidi. Poste li skuis sian kapon.

— Ne, — li diris mallaŭte, — tio progresis trans nian atingopovon. Almenaŭ pri tio ni ĝoju. Ne plu eblas tentiĝi al uzado de l' Ringo. Ni devas malsupreniri fronte al danĝero preskaŭ malesperiga, sed tiu lasta mortminaco estas forigita. — Li turniĝis. — Atentu, Aragorno, filo de Aratorno! Ne bedaŭru vian elekton en la valo de Emin Muilo, nek nomu tion vana persekutado. Vi elektis inter duboj la vojon, kiu ŝajnis ĝusta: la elekto estis prava kaj ĝi estas pravigita. Ĉar tiel ni renkontiĝis ĝustatempe, kaj alie eble ni renkontiĝus tro malfrue. Sed la serĉado por viaj kunuloj finiĝis. Via venonta vojaĝo estas signita per via donita promeso. Vi devos iri al Edoraso kaj aliri Teodenon en ties halo. Ĉar vi estas bezonata. La lumon de Andurilo oni jam devas malkovri en la batalo jam delonge atendita. Ekzistas milito en Rohano, kaj pli grava misaĵo: Teodeno statas malbone.

— Do mi ne plu revidos la gajajn junajn hobitojn, ĉu? — diris Legolaso.

— Tion mi ne diris, — diris Gandalfo. — Kiu scias? Pacienca. Iru kien vi devas iri, kaj esperu! Al Edoraso! Ankaŭ mi iras tien.

— Longa marŝo estas tio por viro, ĉu juna ĉu maljuna, — diris Aragorno. — Mi timas, ke la batalo finiĝos longe antaŭ ol mi venos tien.

— Ni vidos, ni vidos, — diris Gandalfo. — Ĉu vi venos nun kun mi?

— Jes, ni ekiros kune, — diris Aragorno. — Sed mi ne dubas, ke vi venos tien antaŭ mi, se vi volos. — Li stariĝis kaj longe rigardis Gandalfon. La aliaj silente rigardis ilin starantajn tie fronte unu al la alia. La griza figuro de la viro, Aragorno filo de Aratorno, estis alta kaj ŝtone severa, kun la mano sur la tenilo de la glavo; li aspektis kvazaŭ reĝo el la maraj nebuloj surpaŝus la bordojn de homoj malpli grandiozaj. Antaŭ li ĝibiĝis la maljunula figuro, blanka, nun brilanta pro ia lumo ĉendita interne, kurba, ŝargita de jaroj, sed posedanta potencon pli grandan ol la potenco de reĝoj.

— Ĉu mi ne prave diris, Gandalfo, — diris Aragorno finfine, — ke vi povus iri kien ajn vi volus pli rapide ol mi? Kaj ankaŭ tion ĉi mi diras: vi estas nia estro kaj nia standardo. La Malluma Mastro havas Naŭ. Sed ni havas Unu, pli potenca ol ili: la Blankan Rajdanton. Li trapasis la fajron kaj la abismon, kaj lin ili timos. Ni iros tien, kien li gvidos.

— Jes, kune ni sekvos vin, — diris Legolaso. — Sed unue, malŝarĝus mian koron, Gandolfo, aŭdi, kio okazis al vi en Morio. Ĉu vi ne volas rakonti al ni? Ĉu vi ne povas paŭzi eĉ por sciigi al viaj amikoj, kiel vi saviĝis?

— Mi jam paŭzis tro longe, — respondis Gandolfo. — Tempo urĝas. Sed se jaro estus disponebla, mi ne rakontus al vi la tuton.

— Do rakontu al ni, kion vi volas kaj la tempo permesas! — diris Gimlio. — Ek, Gandolfo, sciigu al ni, kion vi spertis kun la balrogo.

— Tiun ne nomu! — diris Gandolfo, kaj momente ŝajnis, ke dolornubo trapasis lian vizaĝon, kaj li sidis silenta, aspektante morte maljuna. — Longe mi falis, — li diris finfine, malrapide, kvazaŭ nur malfacile repensante. — Mi falis longe, kaj li falis kun mi. Lia fajro ĉirkaŭis min. Mi estis brulvundita. Tiam ni plonĝis en profundan akvon kaj ĉio estis senluma. Frida tio estis kiel la tajdo de morto: ĝi preskaŭ glaciigis mian koron.

— Profunda estas la abismo, kiun traarkas la Durina Ponto, kaj neniun iam sondis ĝin, — diris Gimlio.

— Tamen ĝi havas fundon, preter lumo kaj scio, — diris Gandolfo. — Tien mi finfine venis ĝis la plej fora ŝtona fundamento. Li daŭre akompanis min. Lia fajro estis estingita, sed jam li estis io ŝlima, pli forta ol strangola serpento. Ni luktis fore sub la viva tero, kie la tempon oni ne kalkulas. Ĉiam denove li ekkaptis min kaj ĉiam denove mi hakis lin, ĝis fine li fuĝis en la senlumajn tunelojn. Ilin ne konstruis la popolo de Durino, Gimlio filo de Gloino. Forege sub la plej profunda fosado de la gnomoj la mondon maĉas aĵoj sennomaj. Eĉ Saŭrono ne konas ilin. Ili estas pli aĝaj ol li. Nun mi promenis tie, sed mi alportos neniun raporton, kiu malheligu la tagan lumon. En tiu malespero mia sola espero estis mia malamiko, kaj mi persekutis lin kaptinte lian kalkanon. Tiel li gvidis min finfine ĝis la sekretaj vojoj de Ĥazard-Dumo: tro bone li konis ilin ĉiujn. Ĉiam supren ni jam iris, ĝis ni venis la Senfinan Ŝtuparon.

— Longe tiu estis perdita, — diris Gimlio. — Multaj diradis, ke neniam ĝi estis konstruita krom legende, sed aliaj diris, ke ĝi estis detruita.

— Ĝi estis konstruita, kaj ĝi ne estas detruita, — diris Gandolfo. — Ekde la plej funda kelego ĝis la plej alta pinto ĝi supreniris, ascendante laŭ seninterrompa spiralo de multmilaj ŝtupoj, ĝis ĝi eliris fine en la Durina Turo ĉizita el la viva roko de Zirak-Zigilo, pinaklo de Silvertino.

» Tie sur Celebdilo estis soleca fenestro en la neĝo, kaj antaŭ ĝi troviĝis malvasta spaco, kapturniga aglonesto super la nebuletoj de l' mondo. Tie la suno brilis arde, sed ĉio sube estis nubvolvita. Li elsaltis, kaj ĝuste kiam mi venis malantaŭe, li denove ekflamis. Ĉeestis neniu atestanto, alie eble en postepoko oni ankoraŭ kantus pri la Lukto sur la Pinto. — Subite Gandolfo ridis. — Sed kion oni dirus kante? Tiuj, kiuj rigardis de fore supozis, ke la monton kronas ŝtormado. Tondron ili aŭdis, kaj fulmo, ili diris, batis al Celebdilo kaj resaltis diserigita je fajrolangoj. Ĉu tio ne sufiĉas? Ĉirkaŭ ni leviĝis granda fumo, nebuleca kaj vapora. Glacio falis kvazaŭ pluvo. Mi deĵetis mian malamikon, kaj li falis el la alta loko kaj frakasis la montflankon, kie li trafis ĝin en sia ruiniĝo. Poste mallumo envolvis min kaj mi forvadis el pensado kaj tempo kaj mi suriris longe vojojn, pri kiuj mi ne rakontos.

» Nuda mi estis resendita — por mallonga tempo ĝis mia tasko estos finita. Kaj nuda mi kuŝis sur la montosupro. La turo malantaŭe estis polviĝinta, la fenestro malaperinta; la ruina ŝtuparo estis ŝtopita per bruligitaj kaj rompitaĵoj ŝtonoj. Mi estis sola, forgesita, sen eskapebleco sur la malmola korno de la mondo. Tie mi kuŝis gapante supren dum la steloj preterradis, kaj ĉiu tago estis tiel longa kiel vivepoko de la tero. Mallaŭte al miaj oreloj venis la akumulita murmurado de ĉiuj landoj: la ekestiĝo kaj la mortado, la kantoj kaj la ploroj, kaj la malrapida ĉiamdaŭra ĝemado de troŝarĝita ŝtono. Kaj fine Gvajhiro la Ventmastro denove trovis min, kaj li levis min kaj forportis min.

» — Mia ĉiama sorto estas ŝarĝi vin, amiko dumbezona, — mi diris.

» — Ŝarĝo vi foje estis, — li respondis, — sed nun ne tia. Malpeza kiel cigna plumo vi estas en mia krifo. La suno trabrilas vin. Efektive al mi ŝajnas, ke vi ne plu bezonas min: se mi lasus vin fali, vi nur flosus laŭ la vento.

» — Ne lasu min fali! — mi elpuŝis, ĉar mi sentis denove en mi vivon. — Portu min al Lotlorieno!

» — Tiel ja ordonis la Damo Galadriela, kiu sendis min serĉi vin, — li respondis.

» Tiel okazis, ke mi venis al Karas Galadono kaj konstatis, ke vi nur antaŭ nelonge foriris. Mi restis tie en la senaĝa tempo de tiu lando, kie la tagoj alportas kuracon, ne kadukiĝon. Kuracon mi trovis, kaj mi estis vestita per blanko. Konsilojn mi donis kaj konsilojn prenis. El tie laŭ strangaj vojoj mi venis, kaj mesaĝojn mi portas al iuj el vi. Al Aragorno mi laŭordone devas diri:

*Dunadanoj nun kie, Elesar', Elesaro?
Kial disvagis via parenkaro?
Nun la perditoj jam devas eltajdi,
kaj la Griza Korpuso el nordo alrajdi.
Sed mallumas la pado de via fatalo:
mortintoj spionas pri l' voj' al la maro.*

Al Legolaso ŝi sendis jenon:

*Legolas' Verdfolio, jam en la arbaro
vi vivis en ĝojo. Vin gardu de l' maro!
Se borde vi aŭdos la kriĉon de l' mevo,
prosperos ne plu en arbar' via revo.*

Gandolfo eksilentis kaj fermis siajn okulojn.

— Do neniun mesaĝon ŝi sendis al mi? — diris Gimlio kaj klinis sian kapon.

— Malklaraj estas ŝiaj vortoj, — diris Legolaso, — kaj malmulton ili signifas al la ricevintoj.

— Tio ne konsolas, — diris Gimlio.

— Kio do? — diris Legolaso. — Ĉu vi volas, ke ŝi parolu al vi malkaŝe pri via morto?

— Jes, se nenio alia dirindus.

— Kio estas tio? — diris Gandolfo, malfermante siajn okulojn. — Jes, mi opinias, ke mi kapablas diveni, kion signifas ŝiaj vortoj. Mi pardonpetas, Gimlio! Mi meditis denove pri la mesaĝoj. Sed efektive ŝi sendis al vi vortojn kaj nek malklarajn, nek malĝojajn.

» — Al Gimlio, filo de Gloino, — ŝi diris, — transdonu saluton de lia Damo. Portanto de miaj haroj, kien ajn vi iras, mia penso akompanas vin. Sed zorgu almeti vian hakilon al la arbo ĝusta!

— En feliĉa horo vi revenis al ni, Gandolfo, — kriis la gnomo, kapriolante dum li laŭte kantis en la stranga gnoma lingvo. — Ek, ek! — li kriis, svingante sian hakilon. — Ĉar la kapo de Gandolfo estas jam dankata, ni trovu kapon prave fendendan!

— Tia ne estos longe serĉata, — diris Gandolfo, stariĝante de sur la seĝo. — Venu! Ni jam eluzis la tutan tempon, permesatan al kunveno de disestintaj amikoj. Jam necesas rapidi.

Li volvis sin denove per sia malnova ĉifona mantelo, kaj gvidis ilin sur la vojon. Sekvante lin ili subeniris rapide de la alta breto kaj reiris tra la arbaro laŭ la bordo de Entvaŝo. Ili neniun plian vorton parolis

ĝis ili staris denove sur la herbo for de la rando de Fangorno. Iliaj ĉevaloj tute ne estis videblaj.

— Ili ne revenis, — diris Legolaso. — La marŝo estos laciga!

— Mi ne marŝos. La tempo urĝas, — diris Gandolfo. Poste, levante sian kapon li eligis longan fajfon. Tiel klara kaj penetra estis la noto, ke la aliaj staris mirigitaj, aŭdante tian sonon el tiuj maljunaj barabaj lipoj. Trifoje li fajfis; kaj tiam ŝajnis al ili, ke ili aŭdas mallaŭtan kaj foran henon de ĉevalo alportita de la ebenaĵo per la orienta vento. Ili atentis scivolante. Post nelonge aŭdiĝis sono de hufoj, komence apenaŭ pli ol tremeto de la tero perceptebla nur de Aragorno, dum li kuŝis sur la herbo, poste pli kaj pli laŭtiĝanta kaj klariĝanta ĝis rapida takto.

— Venas pli ol unu ĉevalo, — diris Aragorno.

— Certe, — diris Gandolfo. — Ni estas tro peza ŝarĝo por unu ĉevalo.

— Ili estas tri, — diris Legolaso, rigardante al la ebenaĵo. — Vidu kiel ili kuras! Jen Hasufelo, kaj jen apud ĝi mia amiko Arodo. Sed estas alia, kiu kuregas antaŭe: ĉevalo tre granda. Ties similulon mi neniam antaŭe vidis.

— Kaj neniam vidis denove, — diris Gandolfo. — Tiu estas Ombrofakso. Ĝi estas la ĉefa en la *Mearasoj*, princo de l' ĉevaloj, kaj eĉ Teodeno, reĝo de Rohano, neniam vidis pli grandiozan. Ĉu ĝi ne brilas kiel arĝento kaj kuras tiel flue, kiel rapida roĵo? Ĝi venis por mi: la ĉevalo de la Blanka Rajdanto. Ni iros kune al batalo.

Ĝuste dum parolis la maljuna sorĉisto, la granda ĉevalo paŝegis al ili supren laŭ la deklivo; ĝia felo brilis kaj ĝiaj kolharoj fluis pro la vento de ĝia rapideco. La du aliaj sekvis ne tre malantaŭe. Tuj kiam Ombrofakso vidis Gandalfon, ĝi bridis sian kuradon kaj henis laŭte; poste ĝi trotis milde antaŭen, klinis sian fieran kapon kaj frotis siajn grandajn naztruojn sur la nuko de la maljunulo.

Gandolfo karesis ĝin.

— Longas la vojo el Rivendelo, mia amiko, — li diris, — sed vi estas saĝa kaj rapida kaj venas laŭ la bezono. Malproksimen ni rajdu jam kune, kaj neniam denove disiĝu en tiu ĉi mondo!

Baldaŭ la aliaj ĉevaloj alvenis kaj staris kviete apude, kvazaŭ atendante ordonojn.

— Ni iros tuj al Meduseldo, la halo de via mastro Teodeno, — diris Gandolfo, alparolante ilin seriozmiene. Ili klinis siajn kapojn. — La tempo urĝas, do kun via permeso, miaj amikoj, ni ekrajdos. Mi

petagas, ke vi tiom rapidu, kiom vi povas. Hasufelo portos Aragornon kaj Arodo Legolason. Gimlio sidiĝos antaŭ mi, kaj laŭ sia konsento Ombrofikso portos nin ambaŭ. Ni atendos nun nur por iom trinki.

— Jam mi komprenas parton de la pasintnokta enigmo, — diris Legolaso leĝere sursaltante la dorson de Arodo. — Eble niaj ĉevaloj komence fuĝis pro timo, sed poste ili renkontis Ombrofiksojn, sian ĉefon, kaj salutis ĝin ĝoje. Ĉu vi sciis, ke ĝi estas proksime, Gandalfo?

— Jes, mi sciis. Mi turnis miajn pensojn al ĝi, ordonante ĝin rapidi; ĉar hieraŭ ĝi estis fora en la sudo de tiu ĉi lando. Rapide ĝi portu min reen!

Gandalfo parolis nun al Ombrofikso, kaj la ĉevalo ekiris sufiĉe rapide, sed ne pli rapide ol kapablis la aliaj. Post iomete da tempo ĝi subite sin turnis kaj elektinte lokon, kie la bordoj malpli altis, ĝi travadis la riveron kaj poste kondukis ilin rekte suden sur ebenan terenon, senarban kaj larĝan. La vento pasis grizonde tra la senfinaj mejloj da herbo. Vidiĝis nenia indiko pri vojo aŭ pado, sed Ombrofikso nek haltis nek hezitis.

— Ĝi direktiĝas nun rekte al la haloj de Teodeno sub deklivoj de la Blankaj Montoj, — diris Gandalfo. — Estos pli rapide tiel. La tero estas pli firma en la Orientujo, kie kuŝas la ĉefa vojo norden, trans la rivero, sed Ombrofikso konas la vojon tra ĉiu marĉejo kaj kavaĵo.

Dum multaj horoj ili plurajdis tra la herbejoj kaj riverterenoj. Ofte la herbo tiel altis, ke ĝi atingis ĝis super la genuoj de la rajdantoj, kaj iliaj ĉevaloj ŝajnis naĝi en grizverda maro. Ili alvenis multajn kaŝitajn lagetojn kaj larĝajn areojn de kareksoj balanciĝantaj super malsekaj kaj perfidemaj marĉoj; sed Ombrofikso trovis la vojon kaj la aliaj ĉevaloj sekvis ĝian falĉopaŝadon. Malrapide la suno sinkis el la ĉielo en la okcidenton. Rigardante trans la grandan ebenajon, la rajdantoj momente vidis ĝin kvazaŭ ruĝan fajron sinkantan en la herbon. Malalte ĉe rando de l' vidkapablo ŝultroj de la montoj glimis ruĝe ambaŭflanke. Fumo ŝajnis leviĝi kaj malheligi la sunan diskon ĝis koloro de sango, kvazaŭ ĝi ĉendus la herbon subirante sub la randon de la tero.

— Tie kuŝas la Breĉo de Rohano, — diris Gandalfo. — Ĝi estas nun preskaŭ rekte okcidente de ni. Tiudirekte kuŝas Isengardo.

— Mi vidas grandan fumon, — diris Legolaso. — Kio estas tio?

— Batalo kaj milito! — diris Gandalfo. — Rajdu plu!

Ĉapitro 6

LA REĜO DE L' ORA HALO

Ili daŭre rajdis tra sunsubiro, lanta krepusko kaj densiĝanta nokto. Kiam fine ili haltis kaj elseliĝis, eĉ Aragorno estis malsupla kaj lacega. Gandolfo permesis al ili nur kelkajn horojn da ripozo. Legolaso kaj Gimlio dormis, kaj Aragorno kuŝis plata, etendita surdorse; sed Gandolfo staris apogante sin per sia bastono, rigardante en la mallumon, orienten kaj okcidenten. Ĉio silentis, kaj malestis signo kaj sono de ajna vivantaĵo. La nokton striis longaj nuboj rapidantaj pro malvarmega vento, kiam ili denove leviĝis. Sub la frida lumo ili denove ekiris, rapidaj kiel la taga lumo.

Pasis horoj kaj senhalte ili plurajdis. Gimlio ekdormis kaj falus de la sidloko, se Gandolfo ne kaptus kaj skuus lin. Hasufelo kaj Arodo, lacaj sed fieraj, sekvis sian senlaca estron, grizan ombron apenaŭ videblan antaŭ ili. Pasis la mejloj. La kreskanta luno sinkis en la nuboplenan okcidenton.

Amara frido eniris la aeron. Malrapide en la oriento la mallumo fadis al malvarma grizo. Ruĝaj lumstrioj saltis super la nigraj muroj de Emin Muilo fore maldekstre. Tagiĝo venis klara kaj hela; vento transblovis ilian vojon, rapidanta tra la kurbiĝintaj herboj. Subite Ombrofakso haltis kaj henis. Gandolfo fingromontris antaŭen.

— Vidu! — li kriis, kaj ili levis siajn lacajn okulojn. Antaŭ ili staris la montoj de la sudo: blankpintaj kaj nigre striitaj. La herbejoj ruliĝis kontraŭ la montetojn kiuj ariĝis ĉe la subo kaj fluis en multajn valojn ankoraŭ malklarajn kaj malhelajn, netuŝitajn per la aŭrora lumo, serpentumantajn en la koron de l' grandaj montoj. Ĝuste antaŭ la vojaĝantoj la plej larĝa el tiuj valoj malfermiĝis kvazaŭ longa golfo inter la montetoj. Fore interne ili ekvidis kunfalintan mont-amason kun unusola alta pinto; ĉe l' enirejo de la valo sentinelis soleca altaĵo. Ĉirkaŭ ties subo fluis kiel arĝenta fadeno, la rivereto kiu eliris el la valo; sur ties supro ili ekvidis, ankoraŭ tre fore, brileton de la leviĝanta suno, ekbrilon de oro.

— Parolu, Legolaso! — diris Gandolfo. — Sciigu al ni, kion vi vidas tie antaŭ ni!

Legolaso rigardadis antaŭen, ombrumante siajn okulojn kontraŭ la ebenaj strioj de l' nove supreniĝinta suno.

— Mi vidas blankan rivereton, kiu malsupreniĝas de la neĝoj, — li diris. — Kie ĝi eliras el la ombreco de la valo, leviĝas verda monteto oriente. Ĉirkaŭas ĝin barilo kaj forta muro kaj dorna palisaro. Interne leviĝas tegmentoj de domoj; kaj meze, starigita sur verda teraso, troviĝas granda palaco de homoj. Kaj ŝajnas al miaj okuloj, ke ĝi estas ore tegmentita. Ties lumo brilas malproksimen tra la lando. Oraj estas ankaŭ la fostoj de ĝia pordego. Tie staras homoj en brila armaĵo; sed ĉio alia interne de la kortoj ankoraŭ dormas.

— Edoraso nomiĝas tiuj kortoj, — diris Gandolfo, — kaj Meduseldo estas tiu ora palaco. Tie loĝas Teodeno, filo de Tengelo, reĝo de Rohana Markio. Ni venas kun la tagleviĝo. Jam la vojo etendiĝas klare videbla antaŭ ni. Sed ni devos rajdi pli singarde; ĉar milito disvastiĝas, kaj la rohananoj — la ĉevalmastroj — ne dormas eĉ se tiel ŝajnas de fore. Elingigu neniun armilon, parolu neniun vorton orgojlan, mi konsilas al vi ĉiuj, ĝis ni alvenos antaŭ la seĝon de Teodeno.

La mateno estis hela kaj klara ĉirkaŭ ili, kaj kantis birdoj, kiam la vojaĝantoj venis al la rivereto. Tiu subenfluis rapide sur la ebenajon, kaj preter la montetosuboj turniĝis trans ilian vojon laŭ larĝa kurbiĝo, fluante orienten por aldoniĝi al Entvaŝo fore en ties karikŝtopitaj fluejoj. La tero estis verda: en la malsekaj herbejoj kaj laŭlonge de la herbkovritaj bordoj de la rivereto kreskis multaj salikoj. Jam en tiu ĉi suda lando ili ekruĝiĝis ĉe la fingropintoj, sentante alproksimiĝon de la printempo. Tra la rivereto estis pasejo inter malaltaj bordoj multe tramplita pro transiro de ĉevaloj. La vojaĝantoj transiris kaj alvenis larĝan sulkoplenan padon, kondukantan al la altejoj.

Sube de la murhava monteto la pado iris sub la ombron de multaj altaĵetoj altaj kaj verdaj. Sur ties okcidentaj flankoj la herbo estis blanka kvazaŭ pro driva neĝo: etaj floroj kreskis tie kvazaŭ sennombraj steloj inter la herberoj.

— Vidu! — diris Gandolfo. — Kiom belas la helaj okuloj en la herbo! Ĉiamgardo ili nomiĝas, *simbelmynë* en tiu ĉi lando de homoj, ĉar ili burĝonas en ĉiu jarsezono kaj kreskas kie mortintoj ripozas. Jen! Ni venis al la grandaj dolmenoj, kie la prauloj de Teodeno dormas.

— Sep tumultoj maldekstre kaj naŭ dekstre, — diris Aragorno. — Multaj longaj homvivoj pasis de kiam la ora halo estis konstruita.

— Kvincent-foje falis la ruĝaj folioj en Mornarbaro en mia hejmo post tiam, — diris Legolaso, — kaj nur mallonga tempo tio ŝajnas al ni.

— Sed al la rajdantoj de Rohano tio ŝajnas tiel antaŭlonga, — diris Aragorno, — ke la konstruo de tiu ĉi domo estas nur memoro en kanto, kaj la jaroj antaŭ ni estas perditaj en la nebulo de la tempo. Nun ili nomas tiun ĉi landon sia propra hejmo, kaj ilia lingvo estas disigita de ilia norda parenkaro. — Poste li ekĉantis en lanta lingvo nekonata al la elfo kaj la gnomo, tamen ili aŭskultis, ĉar enestis forta muzikeco.

— Mi supozas, ke tio estas la lingvo de la rohananoj, — diris Legolaso, — ĉar ĝi similas tiun ĉi landon mem; parte riĉa kaj ruliĝanta, kaj cetere malmola kaj severa kiel la montoj. Sed mi ne konjektas, kion ĝi signifas, krom ke ĝin ŝarĝas la malĝojo de mortemaj homoj.

— Tion ĝi signifas en la Komuna Lingvo, — diris Aragorno, — proksimume tiel mi kapablas traduki:

*Kie ĉeval' kaj rajdanto? Kie la korn' sonoranta?
Kie la kask' kaj armaĵo, kaj hela hararo soranta?
Kie la mano sur harpo, kaj ruĝa fajro brulanta?
Kie printemp' kaj rikolto, kaj alta gren' maturanta?
Kiel pluv' sur montet' ili pasis, kiel enherbeja vento;
tagoj postmonte en ombron sinkis al okcidento.
Kiu rikoltos la fumon de l' ligna brul' mortsvenanta,
aŭ vidos fluantan jararon de l' maro revenanta?*

Tiel parolis forgesita poeto antaŭlonge en Rohano, memorigante, kiel alta kaj bela estis Eorlo la Juna, kiu rajdis el la nordo; kaj sur la piedoj de lia ĉevalo Felarfofo, patro de la ĉevaloj, estis flugiloj. Tiel homoj ankoraŭ kantas en vespero.

Kun tiuj vortoj la vojaĝantoj preterpasis la silentajn tumultojn. Sekvante la serpentuman padon supren laŭ la verdaj ŝultroj de la montetoj, ili fine venis ĝis la larĝaj ventblovitaj muroj kaj la pordego de Edoraso.

Tie sidis multaj viroj en helaj maŝkiraso, kiuj tuj salte stariĝis kaj baris la vojon per lancoj.

— Haltu, fremduloj ĉi tie nekonataj! — ili kriis en la lingvo de Rajdmarkio, postulante la nomojn kaj celon de la nekonatoj. Miro vidiĝis en iliaj okuloj sed malmulte da amikemo, kaj ili rigardis sombre al Gandolfo.

— Mi bone komprenas vian parolon, — li respondis en la sama lingvo, — tamen tion kapablas malmultaj fremduloj. Kial do vi ne parolas en la Komuna Lingvo laŭ la kutimo de la Okcidento, se vi deziras respondon?

— La volo de reĝo Teodeno estas, ke neniu eniru lian pordegon krom tiuj, kiuj scipovas nian lingvon kaj estas niaj amikoj, — respondis unu el la gardistoj. — Neniu estas bonvenaj ĉi tie dum tagoj de milito krom niaj propraj homoj kaj tiuj, kiuj venas de Mundburgo en la lando Gondoro. Kiuj vi estas, venintaj senĝene trans la ebenaĵon tiel strange vestitaj, rajdante ĉevalojn tiel similajn al niaj propraj ĉevaloj? Longe ni gardis ĉi tie, kaj ni gvertis vin defore. Neniam ni vidis aliajn rajdantojn tiel strangajn, nek alian ĉevalon pli fieran ol tiu, kiu portas vin. Ĝi estas unu el la *Mearasoj*, krom se niajn okulojn envultas la sorĉo. Diru, ĉu vi ne estas sorĉisto, spiono de Sarumano, aŭ fantomoj liametaj? Parolu jam kaj rapide!

— Ni neniel estas fantomoj, — diris Aragorno, — nek trompas vin viaj okuloj. Ĉar efektive tiuj ĉi estas viaj propraj ĉevaloj, kiujn ni rajdas, kiel vi bone sciis antaŭ ol vi demandis laŭ mia opinio. Sed malofte ŝtelinto rajdas hejmen al la stalo. Jen estas Hasufelo kaj Arodo, kiujn Eomero, la Tria Marŝalo de Markio, pruntedonis al ni antaŭ nur du tagoj. Ni revenigas ilin nun ĝuste kiel ni promesis al li. Ĉu Eomero do ne jam revenis kaj avertis pri nia alveno?

Esprimo ĝenata aperis en la okuloj de la gardisto.

— Pri Eomero mi nenion havas por diri, — li respondis. — Se tio, kion vi diras al mi, estas vero, sendube Teodeno jam aŭdis pri ĝi. Eble via alveno estis ne tute neantaŭvidita. Antaŭ nur du noktoj Verm-lango venis al ni kaj diris, ke laŭ la volo de Teodeno neniu fremdulo trapasu jenan pordon.

— Vermlango? — diris Gandolfo, abrupte rigardante la gardiston. — Diru nenion pli! Mia komisiono celas ne Vermlangon, sed la Mastron mem de Markio. Mi hastas. Ĉu vi iros aŭ sendos iun por diri, ke ni venis? — Liaj okuloj ekbriletis sub liaj profundaj brovoj dum li turnis sian rigardon al la viro.

— Jes, mi iros, — tiu respondis malrapide. — Sed kiujn nomojn mi raportu? Kaj kion mi diru pri vi? Maljuna kaj laca vi ŝajnas nun, kaj tamen vi estas danĝera kaj severa interne, mi taksas.

— Bone vi vidas kaj parolas, — diris la sorĉisto. — Ĉar mi estas Gandolfo. Mi revenis. Kaj jen! Ankaŭ mi revenigas la ĉevalon. Jen estas Ombrofakso la Granda, kiun povas kvietigi neniu alia mano. Kaj

jen apud mi estas Aragorno, filo de Aratorno, heredinto de reĝoj, kaj ĝuste al Mundburgo li celas. Jen estas ankaŭ elfo Legolaso kaj gnomo Gimlio, niaj kamaradoj. Iru jam kaj diru al via mastro, ke ni estas ĉe lia pordo kaj volas alparoli lin, se li permesos al ni veni en lian halon.

— Strangajn nomojn vi donas efektive! Sed mi raportos ilin laŭ via ordono kaj ekkonos la volon de mia mastro, — diris la gardisto. — Atendu ĉi tie iomete kaj mi reportos al vi tian respondon, kia plaĉos al li. Ne tro esperu! Jen estas tagoj mallumaj. — Li rapide foriris, lasante la fremdulojn sub atenta prizorgo de siaj kamaradoj.

Post kelka tempo li revenis.

— Sekvu min! — li diris. — Teodeno permesas al vi eniri; sed ĉiun armilon portatan de vi, eĉ se nur bastonon, vi devos lasi ĉe la sojlo. La pordistoj retenos ilin.

Oni svinge malfermis la malhelan pordegon. La vojaĝantoj eniris, marŝante spalire malantaŭ sia gardanto. Ili trovis larĝan padon pavimitan per elhakitaj ŝtonoj, jen serpentumantan supren jen grimpan-tan laŭ mallongaj aroj da metie metitaj ŝtupoj. Multajn domojn konstruitajn el ligno kaj multajn sombrajn pordojn ili preterpasis. Apud la pado en ŝtona kanelo fluis roĝo da klara akvo brilanta kaj tintanta. Fine ili alvenis la verton de la deklivo. Tie staris alta podio super verda teraso, sube de kiu hela fonto elsputiĝis el ŝtono ĉizita laŭ formo de ĉevala kapo; sube estis larĝa baseno, el kiu verŝiĝis la akvo kaj plenigis la falantan rojon. Supren laŭ la verda teraso kondukis ŝtuparo ŝtona, alta kaj larĝa, kaj ambaŭflanke de la plej supra ŝtupo estis ŝtonhakitaj seĝoj. Tie sidis pliaj gardistoj kun elingigitaj glavoj sur siaj genuoj. Ties oraj hararoj estis plektitaj sur iliaj ŝultroj; la suno estis blazonita sur iliaj verdaj ŝildoj, iliaj longaj maŝkiraso estis hele poluritaj, kaj kiam ili stariĝis, ili ŝajnis pli altaj ol la mortemaj homoj.

— Jen antaŭ vi estas la pordo, — diris la gvidinto. — Mi devos nun reiri al mia ĉeporda deĵoro. Adiaŭ! Kaj la Mastro de Markio traktu vin favore!

Li returnis sin kaj rapide reiris laŭ la pado. La aliaj grimpis la longan ŝtuparon rigardate de la altaj pordistoj. Ili nun staris supre en silento kaj diris neniun vorton, ĝis Gandolfo elpaŝis sur la pavimitan terason supre de la ŝtuparo. Tiam subite per klaraj voĉoj ili prononcis ĝentilan saluton en la propra lingvo.

— Saluton, venintoj el la malproksimo! — ili diris kaj turnis la

tenilojn de siaj glavoj al la vojaĝantoj kiel signon de paco. Verdaj gemoj ekflagris en la sunlumo. Poste unu el la gardantoj paŝis antaŭen kaj parolis en la Komuna Lingvo.

— Mi estas la pordogardisto de Teodeno, — li diris. — Hamo mi nomiĝas. Nun mi devas ordoni, ke vi lasu viajn armilojn antaŭ ol eniri.

Legolaso enmanigis al li sian arĝenttenilan stileton, sian sagujon, kaj sian pafarkon.

— Konservu ilin zorge, — li diris, — ĉar ili devenas de la Ora Arbaro, kaj donis ilin al mi la Damo de Lotlorieno.

Miro aperis en la okuloj de la viro, kaj li rapide kuŝigis la armilojn apud la muron, kvazaŭ li timus tuŝi ilin.

— Neniu tuŝos ilin, mi promesas, — li diris.

Aragorno staris dum kelka tempo hezitante.

— Ne estas mia volo, — li diris, — flankenmeti mian glavon aŭ enmanigi Andurilon al ajna aliulo.

— Estas la volo de Teodeno, — diris Hamo.

— Ne estas al mi klare, ke la volo de Teodeno, filo de Tengelo, kvankam li estas mastro de Markio, devus superi la volon de Aragorno, filo de Aratorno, heredonto de Elendilo el Gondoro.

— Tiu ĉi domo estas de Teodeno, ne de Aragorno, eĉ se tiu estus reĝo de Gondoro en la sidejo de Denetoro, — diris Hamo, rapide paŝante antaŭ la pordon kaj barante la vojjon. Lia glavo jam estis en lia mano kun la pinto direktita al la fremduloj.

— Jen parolo superflua, — diris Gandalfo. — Ne necesas la postulo de Teodeno, sed senutilas rifuzi. Reĝo trudas sian volon en sia propra halo, ĉu fole ĉu saĝe.

— Vere, — diris Aragorno. — Kaj mi farus laŭ ordono de dommastro, eĉ se tio ĉi estus kabano de arbhakisto, se mi portus iun ajn glavon krom Andurilon.

— Kiel ajn ĝi nomiĝas, — diris Hamo, — ĉi tie vi demetos ĝin, se vi ne volas lukti sola kontraŭ la viroj de Edoraso.

— Ne sola! — diris Gimlio, fingrumante la klingon de sia hakilo kaj sombre rigardante supren al la gardisto, kvazaŭ tiu estus arbido, kiun Gimlio emus faligi. — Ne sola!

— Trankviliĝu! — diris Gandalfo. — Ĉi tie ni ĉiuj estas amikoj. Aŭ devus esti, ĉar la ridado de Mordoro estos nia sola rekompenco, se ni kverelos. Mia komisio urĝas. Jen almenaŭ glavo *mia*, bonulo Hamo. Gardu ĝin zorge. Glamdringo ĝi nomiĝas, ĉar la elfoj kreis ĝin antaŭlonge. Nun lasu min trapasi. Venu, Aragorno!

Malrapide Aragorno malbukis sian zonon kaj mem lokis sian glavon vertikale kontraŭ la muron.

— Ĉi tien mi lokas ĝin, — li diris, — sed mi ordonas al vi ne tuŝi ĝin, nek permesi ke iu alia almetu manon sur ĝin. En tiu ĉi elfa ingo loĝas la Glavo-Kiu-Estis-Rompita kaj estas refarita. Telĉaro unue kreis ĝin en la profundo de la tempo. Morto trafos iun ajn, kiu elingigas la glavon de Elendilo, krom la Elendila heredonto.

La gardisto retropaŝis kaj mire rigardis Aragornon.

— Ŝajnas, ke vi venis per la flugiloj de iu kanto el forgesitaj tagoj, — li diris. — Okazos, mastro, laŭ via ordono.

— Nu, — diris Gimlio, — se ĝi havos la societeton de Andurilo, mia hakilo povos sen honto resti ĉi tie, — kaj li kuŝigis ĝin sur la plankon. — Nu do, se ĉio estas laŭ via deziro, ni iru paroli kun via mastro.

La gardisto plu hezitis.

— Via bastono, — li diris al Gandalfo. — Pardonu min, sed ankaŭ ĝi devus esti lasita ĉe la pordo.

— Sensencaĵo! — diris Gandalfo. — Prudento estas inda, sed malĝentilo estas malinda. Mi maljunas. Se mi ne rajtas apogi min per mia bastono dumire, mi sidos ĉi tie ekstere, ĝis plaĉos al Teodeno ellamiri mem por interparoli kun mi.

Aragorno ridis:

— Ĉiu havas ion tro valoran por esti fidata al aliulo. Sed ĉu vi volos disigi maljunulon de ties marŝbastono? Vidu, ĉu vi ne permesos al ni eniri?

— Bastono en la manoj de sorĉisto eble estas pli ol maljunula apogilo, — diris Hamo. Li intense rigardis la fraksenan bastonon per kiu Gandalfo sin subtenis. — Tamen malgraŭ duboj viro brava fidos sian propran saĝon. Mi kredas, ke vi estas amikoj kaj personoj honorplenaj, kiuj malhavas celon malvirtan. Vi rajtas eniri.

Nun la gardistoj levis la pezajn bartrabojn de la pordo kaj svingis malrapide internen la grumblantajn pordoklapojn sur grandaj ĉarniroj. La vojaĝantoj eniris. La interno ŝajnis malhela kaj varma post la klara aero sur la deklivo. La halo estis longa kaj larĝa kaj plena je ombroj kaj duonlumoj; fortikaj pilastroj subtenis ĝian altan tegmenton. Sed kelkloke brilaj subradioj enfalis laŭ glimaj strioj el la orientaj fenestroj, altaj sub la profundaj tegmentorandoj. Tra luko sur la tegmento, super maldensaj buketoj da eliranta fumo la ĉielo montriĝis pala kaj blua. Kiam iliaj okuloj kutimiĝis, la vojaĝantoj konstatis, ke la

plankon pavimas ŝtonoj multkoloraj; disbranĉaj runoj kaj strangaj blazonoj interplektiĝis subpiede. Ili vidis nun, ke la pilastroj estas riĉe ĉizitaj, glimante pale je oro kaj duonvidataj koloroj. Multaj teksitaj tolaĵoj pendis sur la muroj, kaj trans ties larĝajn spacojn marŝis figuroj el antikvaj legendoj, iuj palaj pro jarpasado, iuj nigretiĝaj en la ombro. Sed sur unu figuron falis la sunlumo: junulo sur blanka ĉevalo. Li blovis grandan kornon, kaj liaj flavaj haroj disbloviĝis pro la vento. La ĉevala kapo estis levita, kaj ties naztruoj estis larĝaj kaj ruĝaj dum ĝi henis, flarante batalon fore. Ŝaŭma akvo, verda kaj blanka, fluis kaj kurbiĝis ĉirkaŭ ties genuoj.

— Vidu Eorlon la Junan! — diris Aragorno. — Tiel li elrajdis el la nordo al la batalo de la kampo de Celebranto.

Nun la kvar kunuloj antaŭeniris, preter la klara lignofajro brulanta sur la longa fajrejo meze de la halo. Poste ili haltis. Ĉe l' fora ekstremo de la domo, aliflanke de la fajrejo kaj frontante norden al la pordo, estis podio triŝtupa, kaj meze de la podio estis granda orumita trono. Sur ĝi sidis viro tiel kurbiĝinta, ke li ŝajnis preskaŭ nano; sed lia blanka hararo estis longa kaj densa kaj descendis grandplektaĵe el sub maldika ora cirklaĵo metita sur lia kapo. Centre sur lia frunto brilis unuopa blanka diamanto. Lia barbo kuŝis kvazaŭ neĝo sur liaj genuoj; sed liaj okuloj daŭre brulis je brila lumo, ekflagrante dum li rigardis la fremdulojn. Malantaŭ la trono staris virino blankvestita. Ĉe liaj piedoj sur la ŝtupoj sidis ŝrumpinta virfiguro kun pala saĝa vizaĝo kaj pezpalpebraj okuloj.

Okazis silento. La maljunulo ne moviĝis sur sia seĝo. Finfine Gandolfo ekparolis:

— Saluton, Teodeno, filo de Tengelo! Mi revenis. Ĉar jen! La ŝtormo venas, kaj nun ĉiuj amikoj devus kunveni por eviti, ke ĉiu unuope detruigu.

Malrapide la maljunulo stariĝis, peze apogante sin per mallonga nigra bastono kun tenilo el blanka ostoj; kaj nun la fremduloj vidis, ke malgraŭ sia kurbiĝo li ankoraŭ estas alta kaj dum juneco certe estis vere alta kaj fiera.

— Mi salutas vin, — li diris, — kaj eble vi atendas bonvenigon. Sed efektive via bonvenigo ĉi tie estas dubinda, Mastro Gandolfo. Vi ĉiam estas heroldo de mizero. Perturboj sekvas vin kvazaŭ korvoj, kaj ĉiam ju pli ofte des pli malbone. Mi ne misinformos vin: kiam mi aŭdis, ke Ombrofakso revenis senrajdiste, mi ĝojis pro l' reveno de la ĉevalo, sed eĉ pli pro la manko de l' rajdinto; kaj kiam Eomero alportis la

informon, ke vi finfine foriris al via lasta hejmo, mi ne funebris. Sed informoj el malproksimo malofte fidindas. Jen vi denove venis! Kaj akompanas vin pli fiaj malbonoj ol antaŭe, kiel antaŭsupozeble. Kial mi bonvenigu vin, Gandalfo Ŝtormkorvo? Klarigu al mi tion. — Li malrapide residigis sur sian seĝon.

— Vi parolas prave, mastro, — diris la palulo sidanta sur la ŝtupoj de la podio. — Ankoraŭ ne pasis kvin tagoj de kiam venis la amara sciigo, ke via filo Teodredo estas mortigita sur la okcidentaj terenoj: via dekstra mano, la Dua Marŝalo de Markio. Eomero estas malmulte fidinda. Malmultaj viroj restus por gardi viajn murojn se al li estus permesate regi. Kaj ĝuste nun ni ekscias el Gondoro, ke la Malluma Mastro ekmoviĝas en la oriento. Tia estas la horo en kiu elektas reveni jena vagulo. Kial efektive ni bonvenigu vin, Mastro Ŝtormkorvo? *Láthspell* mi nomas vin, Misheroldo; kaj misheroldo estas misa gasto, oni diras. — Li ridis senamuze, dum li levis momente siajn pezajn palpebrojn kaj rigardis malhelokule la fremdulojn.

— Oni taksas vin saĝa, mia amiko Vermlango, kaj sendube vi forte subtenas vian estron, — respondis Gandalfo per mola voĉo. — Tamen dumaniere oni povas veni kun malagrablaj novaĵoj. Oni povas veni kiel misfaranto; aŭ povas esti tia, kia ne enmiksiĝas, kaj venas nur por havigi helpon en tempo de krizo.

— Tio estas vera, — diris Vermlango, — sed ekzistas tria speco: ronĝantoj de ostoj, enmiksiĝemuloj en alies mizeron, karnomanĝaj birdoj kiuj dikiĝas pro la milito. Kian helpon vi iam ajn alportis, Ŝtormkorvo? Kaj kian helpon vi alportas nun? Nian helpon vi serĉis, kiam vi lastfoje estis ĉi tie. Tiam mia mastro ordonis, ke vi elektu iun ajn ĉevalon laŭ via plaĉo kaj foriru; kaj mirige al ĉiuj vi insolente forprenis Ombrofikson. Mia estro profunde malĝojis; sed al iuj ŝajnis, ke por rapidigi vin el la lando la prezo ne estis tro alta. Mi konjektas, ke tre verŝajne okazos ankoraŭfoje same: vi serĉos helpon prefere ol liveri ĝin. Ĉu vi kunportis virojn? Ĉu vi alportis ĉevalojn, glavojn, lancojn? Tion mi nomus helpo; tion ni bezonas nuntempe. Sed kiuj estas jenaj, kiuj sekvas vian voston? Tri ĉifonaj vaguloj grizvestitaj, kaj vi mem la plej almozul-aspekta el la kvar!

— La ĝentileco en via halo lastatempe iom reduktiĝis, Teodeno, filo de Tengelo, — diris Gandalfo. — Ĉu la mesaĝisto ĉe via pordo ne raportis la nomojn de miaj kunuloj? Malofte ricevis tri tiajn gastojn iu mastro de Rohano. Ili lasis ĉe via pordo armilojn, kiuj samvaloras kiel multaj mortemuloj, eĉ plej potencaj. Grizas iliaj vestaĵoj, ĉar vestis

ilin la elfoj, kaj tiel ili trapasis la ombron de grandaj danĝeroj ĝis via halo.

— Do estas vere, kiel raportis Eomero, ke vi ligiĝis kun la Sorĉistino de la Ora Arbaro, ĉu? — diris Vermlango. — Tio ne estas miriga: araneaĵoj da trompo ĉiam estis teksitaj en Dvimordeno.

Gimlio faris unu paŝon antaŭen, sed subite li sentis la manon de Gandalfo kroĉiĝi al lia ŝultro, kaj li haltis starante rigida kiel ŝtono:

*En Dvimorden', en Lorio
maloftis homa trapromeno,
malofte mortemuloj vidis
la lumon kies bril' egidis.
Galadriel'! Galadriela!
Tre klaras akve via ŝvelo;
la stel' en via mano blankas;
folioj, tero, ja senmankas
en Dvimorden', en Lorio
pli bele ol la homkompreno.*

Tiel Gandalfo mallaŭte kantis, kaj poste li subite ŝanĝiĝis. Flankenĵetinte sian ĉifonan mantelon li stariĝis kaj ne plu apogis sin per sia bastono; kaj li parolis per voĉo klara kaj malvarma.

— Saĝuloj parolas nur pri tio, kion ili konas, Grimo, filo de Galmodo. Malsprita vermo vi fariĝis. Sekve silentu kaj retenu vian forkan langon malantaŭ la dentoj. Mi trapasis fajron kaj morton ne por vortskermi per ruzaĵoj kun servisto ĝis la fulmo trafos.

Li levis sian bastonon. Aŭdiĝis tondrobato. La sunlumo estingiĝis ĉe la orientaj fenestroj; la tuta halo iĝis malluma kiel nokto. La fajro malardis je sordinita braĝo. Nur Gandalfo estis videbla, staranta blanka kaj alta antaŭ la nigrita fajrujo.

En la malhelo oni aŭdis la siblon de l' voĉo de Vermlango:

— Ĉu mi ne konsilis al vi, mastro, malpermesi lian bastonon? Tiu stultulo Hamo perfidis nin!

Vidiĝis flagro, kvazaŭ fulmo trabreĉus la tegmenton. Poste ĉio estis silenta. Vermlango dissterniĝis survizaĝe.

— Nun Teodeno, filo de Tengelo, ĉu vi aŭskultos min? — diris Gandalfo. — Ĉu vi petas helpon? — Li levis sian bastonon kaj indikis altan fenestron. Tie la mallumo ŝajnis heliĝi, kaj tra la fendo videblis, alte kaj fore, peco da brila ĉielo. — Ne ĉio estas malluma. Trovu

kuraĝon, Mastro de Markio; ĉar pli bonan helpon vi ne trovos. Nenian konsilon ni havas por malesperantoj. Tamen konsilon mi povus doni kaj vortojn mi povus diri al vi. Ĉu vi volas aŭdi ilin? Ili ne estas por ĉies oreloj. Mi ordonas, ke vi venu eksteren antaŭ vian pardon kaj rigardu ĉirkaŭen. Tro longe vi sidadis en ombroj kaj fidis al torditaj rakontoj kaj oblikvaj instigoj.

Malrapide Teodeno lasis sian tronon. Malforta lumo ekkreskis denove en la halo. La virino hastis al la flanko de la reĝo, kaptante lian brakon, kaj per hezitemaj paŝoj la maljunulo depodiigis kaj trapaŝis mutece la halon. Vermlango restis kuŝanta sur la planko. Ili alvenis la pardon kaj Gandolfo frapis:

— Malfermu! La Mastro de Markio elvenas!

La pordoklapoj malferme ruliĝis kaj enfajfis akra aero. Vento blovis ĉe la monteto.

— Sendu viajn gardistojn al la ŝtupara subo, — diris Gandolfo. — Kaj vi, damo, lasu lin por iom da tempo kun mi. Mi prizorgos lin.

— Iru, Eovina, fratina filino! — diris la maljuna reĝo. — La tempo de timo jam pasis.

La virino turniĝis kaj reiris malrapide en la domon. Trapasante la pardon ŝi retrorigardis. Serioza kaj pensema estis ŝia rigardo, dum ŝi rigardis la reĝon kun friska kompatato en la okuloj. Tre bela estis ŝia vizaĝo, kaj ŝiaj longaj haroj similis riveron el oro. Gracila kaj alta ŝi estis en sia blanka robo ĉirkaŭita de arĝento; sed forta ŝi ŝajnis kaj senceda kiel ŝtalo, filino de reĝoj. Tiel Aragorno la unuan fojon en plena taglumo vidis Eovinan, damon de Rohano, kaj taksis ŝin belega, belega kaj frida, kiel mateno de pala printempo, ankoraŭ ne viriniĝinta. Kaj ŝi nun subite konsciiĝis pri li: alta heredanto de reĝoj, saĝa pro multaj vintroj, grizmantela, kaŝanta potencon kiun ŝi tamen sentis. Dum momento ŝtone senmova ŝi staris, poste turniĝinte rapide ŝi estis for.

— Nun, mastro, — diris Gandolfo, — rigardu vian landon! Spiru denove la liberan aeron!

El la portiko supre de la alta teraso ili povis vidi post la rojo la verdajn kampojn de Rohano fadantaj al dista grizo. Kurtenoj da ventblovata pluvo suben oblikvis. La ĉielo supre kaj okcidente ankoraŭ malhelis pro tondro, kaj fora fulmo flagris inter la pintoj de kaŝitaj montetoj. Sed la vento jam blovis el la nordo, kaj la ŝtormo veninta el la oriento estis forpasanta, forruliĝanta suden al la maro. Subite tra ŝirtruo en la nuboj malantaŭ ili strio da sunlumo ponardis malsupren.

La falantaj pluvoj glimis arĝente, kaj malproksime la rivero ekbriletis kiel muara vitro.

— Ne estas tiel mallume ĉi tie, — diris Teodeno.

— Ne, — diris Gandolfo. — Kiel ankaŭ maljuneco ne ŝarĝas viajn ŝultrojn tiom peze, kiom deziras iuj, ke vi sentu. Forĵetu vian apogilon!

El la mano de l' reĝo la nigra bastono falis klake sur la ŝtonojn. Li rektigis sin, malrapide kiel homo rigida pro longa kurbiĝo al teda tasko. Jam alta kaj rekta li staris, kaj liaj okuloj bluis, dum li rigardis la malfermiĝintan ĉielon.

— Malhelaj estis miaj revoj lastatempe, — li diris, — sed mi sentas min kvazaŭ nove vekiginta. Mi jam volas, ke vi venintus pli frue, Gandolfo. Ĉar mi timas, ke vi venis tro malfrue, nur por spekti la lastajn tagojn de mia domo. Ne longe jam staros la alta halo, konstruita de Brego, filo de Eorlo. Fajro voros la altan sidejon. Kion fari?

— Multon, — diris Gandolfo. — Sed unue venigu Eomeron. Ĉu mi ne prave konjektas, ke vi enkarcerigis lin laŭ konsilo de Grimo, kiun ĉiuj krom vi nomas Vermlango?

— Vere, — diris Teodeno. — Li ribelis kontraŭ miaj ordonoj kaj mortminacis Grimon en mia halo.

— Oni povas ami vin kaj tamen ne ami Vermlangon aŭ ties konsilojn, — diris Gandolfo.

— Povas esti. Mi agos laŭ via peto. Voku Hamon al mi. Ĉar li pruviĝis nefidinda kiel pordgardisto, li fariĝu mesaĝisto. Kulpulo venigos al juĝado kulpulon, — diris Teodeno, kaj lia voĉo estis severa, tamen li rigardis Gandalfon kaj ridetis, kaj kiam li tion faris multaj zorgosulketoj forglatiĝis kaj ne revenis.

Kiam Hamo estis vokita kaj foriris, Gandolfo gvidis Teodenon al ŝtona seĝo kaj poste sidigis sin antaŭ la reĝo sur la plej supra ŝtupo. Aragorno kaj ties kunuloj staris proksime.

— Mankas tempo rakonti ĉion, kion vi devus aŭdi, — diris Gandolfo. — Tamen se mia espero ne estos trompita, venos okazo postnelonge kiam mi povos paroli pli abunde. Vidu! Vi eniris danĝeron pli grandan eĉ ol la ruzo de Vermlango kapablus teksti en viajn revojn. Sed jen! Vi ne plu revas. Vi vivas. Gondoro kaj Rohano ne staras solaj. La malamiko estas pli forta ol ni scias taksi, tamen ni havas esperon kiun li ne divenis.

Rapide nun Gandolfo paroladis. Lia voĉo estis mallaŭta kaj

kaŝema, kaj neniuj krom la reĝo aŭdis tion, kion li diris. Sed ĉiam dum li parolis, lumoj brilis pli hele en la okuloj de Teodeno, kaj fine li starigis de la seĝo ĝis sia plena kresko, kaj Gandolfo estis apud li, kaj kune ili elrigardis de tiu alta loko orienten.

— Vere, — diris Gandolfo, jam per la voĉo laŭta, akra kaj klara, — tiuvoje troviĝas nia espero, kie sidas nia plej granda timo. La sorto ankoraŭ pendas per fadeno. Tamen ankoraŭ restas espero, se nur ni povos stari nevenkitaj dum iomete da tempo.

Nun ankaŭ la aliaj turnis sian rigardon orienten. Trans la disigajn leŭgojn da tero, tre foren ili rigardis ĝis la rando de l' vidpovo, kaj espero kaj timo pluportis iliajn pensojn trans malhelajn montojn ĝis la Lando de la Ombro. Kie nun estis la Ringoportanto? Kiel maldika estis la fadeno, per kiu la sorto ankoraŭ pendis! Ŝajnis al Legolaso, streĉanta siajn forvidajn okulojn, ke li ekvidas ekbrilon de blanko: eble tre malproksime la sunlumo flagretas sur pinaklo de la Turego Garda. Kaj eĉ pli fore, senfine neatingebla kaj tamen aktuala minaco, estis eta flamlango.

Malrapide Teodeno residiĝis, kvazaŭ laceco ankoraŭ baraktus por regi lin kontraŭ la volo de Gandolfo. Li turniĝis kaj rigardis sian domegon.

— Ve! — li diris, — ĉar jenaj misaj tagoj estas miaj, kaj venas dum mia maljunaĝo anstataŭ tiu trankvilo, kiun mi meritas. Ve pri Boromiro la brava! La junaj pereas kaj la maljunaj restadas, velkantaj. — Li kroĉis siajn genuojn per siaj faltitaj manoj.

— Viaj fingroj pli bone memorus sian iaman potencon, se ili kroĉus glavtenilon, — diris Gandolfo.

Teodeno stariĝis kaj metis manon al sia flanko; sed neniuj glavo pendis ĉe lia zono. — Kien Grimo formetis ĝin? — li murmuris subvoĉe.

— Akceptu tiun ĉi, kara estro! — diris klara voĉo. — Ĝi estis ĉiam je via servo. — Du viroj estis malantaŭe, venintaj supren laŭ la ŝtuparo kaj nun staris je kelkaj paŝoj de la supro. Eomero estis tie. Neniuj kasko estis sur lia kapo, mankis maŝkiraso sur lia brusto, sed en la mano li tenis elingigitan glavon; kaj genuante li proponis la tenilon al sia mastro.

— Kiel okazas tio ĉi? — diris Teodeno severe. Li turnis sin al Eomero, kaj la viroj mire rigardis lin, starantan jam fiere kaj rekte. Kie estis la maljunulo, kiun ili lasis kaŭranta sur sia seĝo aŭ apoganta sin per la bastono?

— Jen mia faro, mastro, — diris Hamo tremante. — Mi komprenis, ke Eomero estis liberigota. Tiom da ĝojo plenigis mian koron, ke eble mi eraris. Tamen, ĉar li estis denove libera kaj estas Marŝalo de Markio, mi alportis lian glavon laŭ lia ordono.

— Por meti ĝin ĉe viajn piedojn, mia mastro, — diris Eomero.

Dum momenta silento Teodeno staris rigardante suben al Eomero, dum tiu plu genuis antaŭ li. Neniu el ambaŭ moviĝis.

— Ĉu vi ne volas akcepti la glavon? — diris Gandolfo.

Malrapide Teodeno etendis sian manon. Kiam liaj fingroj kroĉis la tenilon, ŝajnis al la rigardantoj, ke firmo kaj forto revenis al lia maldika brako. Subite li levis la klingon kaj svingis ĝin briletantan kaj fajfantan en la aero. Poste li eligis laŭtan krion. Lia voĉo sonoris klare, kiam li ĉantis en la lingvo de Rohano vokon al sinarmado:

Leviĝu, leviĝu, Teodenaj rajdantoj!

Bravo vekigis, morn' oriente.

Selu ĉevalojn, sonu la kornoj!

Ek, Eorlidoj!

La gardistoj, supozante sin alvokitaj, suprensaltis laŭ la ŝtuparo. Ili rigardis mirigite sian mastron, kaj poste samtempe elingigis siajn glavojn kaj kuŝigis ilin antaŭ liaj piedoj.

— Ordonu al ni! — ili diris.

— *Westu Théoden hál!* — kriis Eomero. — Ĝojigas nin vidi, ke vi reeniras vian proprajon. Neniam plu estos dirate, Gandolfo, ke vin akompanas nur malbono!

— Reprenu vian glavon, Eomero, fratina filo! — diris la reĝo. — Iru, Hamo, serĉi mian propran glavon! Grimo havas ĝin en sia prizorgo. Aligu ankaŭ lin al mi. Nu, Gandolfo, vi diris, ke vi havas konsilon transdonotan. Kion vi konsilas?

— Vi mem jam plenumis ĝin, — respondis Gandolfo. — Fidi al Eomero prefere ol al homo kurbmensa. Forĵeti bedaŭron kaj timon. Fari agon necesan. Ĉiu viro rajdkapabla estu tuj sendita okcidenten, kiel Eomero konsilis: ni devos unue pereigi la minacon de Sarumano dum restas tempo. Se ni malsukcesos, ni venkiĝos. Se ni sukcesos — tiam ni frontos la postan taskon. Dume via popolo postlasata, la virinoj, infanoj kaj gemaljunuloj, devus fuĝi al la rifuĝejoj, kiujn vi havas en la montaro. Ĉu tiuj ne estis pretigitaj ĝuste por tia misa tago, kia la jena? Ili kunprenu provianton, sed ne prokrastu nek ŝarĝu sin per trezoroj egaj aŭ etaj. Iliaj vivoj estas minacataj.

— Tiu konsilo nun ŝajnas al mi bona, — diris Teodeno. — Mia tuta popolo pretiĝu! Sed vi, miaj gastoj — vere vi diris, Gandolfo, ke la ĝentileco de mia halo reduktiĝis. Vi rajdis tra la nokto, kaj la mateno triviĝas. Vi havis nek dormon, nek nutraĵon. Gastodomo estos pretigita: tie vi dormos post manĝado.

— Ne, reĝo, — diris Aragorno. — Ankoraŭ ne ripozos la lacegaj. La viroj de Rohano devos elrajdi hodiaŭ, kaj ni rajdos kun ili: hakilo, glavo kaj pafarko. Ni kunportis ilin ne por apogi al via muro, Mastro de Markio. Kaj mi promesis al Eomero, ke lia kaj mia glavoj estos elingigitaj kune.

— Jam efektive venko espereblas! — diris Eomero.

— Espereblas, jes, — diris Gandolfo. — Sed Isengardo fortas. Kaj aliaj danĝeroj ĉiam proksimiĝas. Ne prokrastu, Teodeno, post nia foriro. Gvidu viajn homojn rapide al la sekurejo Dunharo en la montaro!

— Ne, Gandolfo! — diris la reĝo. — Vi subtaksas vian kuraclerton. Ne okazos tiele. Mi mem iros al la milito, por pereji se necese ĉe la batalfronto. Tiel mi dormos pli kontente.

— Tial eĉ malvenko de Rohano estos glora en la kantoj, — diris Aragorno. La apudstarantaj armitoj kunligis siajn armilojn, kriante:

— La Mastro de Rohano rajdos! Ek Eorlidoj!

— Sed via popolo devos ne esti samtempe sen armiloj kaj sen paŝtisto, — diris Gandolfo. — Kiu gvidos ilin kaj regos ilin anstataŭ vi?

— Mi pripensos tion antaŭ ol foriri, — respondis Teodeno. — Jen venas mia konsilisto.

Tiumomente Hamo revenis el la halo. Malantaŭ li, timvringate inter du viroj, venis Grimo la Vermlanga. Lia vizaĝo tre blankis. Liaj okuloj palpebrumis pro la sunlumo. Hamo genuis kaj etendis al Teodeno longan glavon en ingo ore agrafita kaj inkrustita je verdaj gemoj.

— Mastro, jen Herugrimo, via antikva glavo, — li diris. — Ĝi estas trovita en lia kesto. Malvolonte li transdonis la ŝlosilojn. Multaj aliaj aferoj enestas, kiujn perdis aliuloj.

— Vi mensogas, — diris Vermlango. — Tiun ĉi glavon transdonis al mia prizorgo via mastro.

— Kaj nun li repostulas ĝin de vi, — diris Teodeno. — Ĉu tio malplaĉas al vi?

— Certe ne, mastro, — diris Vermlango. — Mi zorgas pri vi kaj la viaj laŭ mia kapablo. Sed ne lacigu vin, nek trostreĉu vian forton.

Permesu al aliaj pritrakti tiujn ĉi ĝenajn gastojn. Via manĝaĵo estas surtabligota. Ĉu vi ne volas iri tien?

— Mi volas, — diris Teodeno. — Kaj manĝaĵo por miaj gastoj estu surtabligota apud mi. La armeo rajdos hodiaŭ. Elsendu la heroldojn! Ili kunvoku ĉiujn, kiuj loĝas ĉirkaŭe! Ĉiuj viroj kaj fortaj junuloj kapablaj porti armilojn, ĉiuj ĉevalposedantoj estu pretaj sursele ĉe la pordo antaŭ la dua horo post tagmezo!

— Kara mastro! — kriis Vermlango. — Ĝuste tion mi antaŭtimis. Tiu sorĉisto envultis vin. Ĉu neniu postrestos por defendi la Oran Palacon de viaj prapatroj kaj ĉiujn viajn trezorojn? Neniu por gardi la Mastron de Markio?

— Se tio estas envulto, — diris Teodeno, — ĝi ŝajnas al mi pli sana ol via frustrado. Via medicina arto postnelonge marŝigus min kvarpiede kvazaŭ besto. Ne, eĉ unu ne postrestos, eĉ ne Grimo. Ankaŭ Grimo rajdos. Iru! Vi ankoraŭ disponas tempon por senrustigi vian glavon.

— Kompatu min, mastro! — plorplendis Vermlango, peteme kuŝante sur la tero. — Kompatu tiun, kiu triviĝis servante vin. Ne sendu min for de via flanko! Almenaŭ mi apogos vin, kiam foriros ĉiuj aliaj. Ne forsendu vian fidelan Grimon!

— Vi havas mian kompaton, — diris Teodeno. — Kaj mi ne forsendas vin de mia flanko. Mi mem iros militi kun miaj viroj. Mi ordonas, ke vi akompanu min kaj pruvu vian fidindecon.

Vermlango rigardis po unu la vizaĝojn. En liaj okuloj vidiĝis mieno de persekutata besto serĉanta breĉon en ringo de malamikoj. Li lekis siajn lipojn per longa pala lango.

— Tian decidon oni eble atendus de reĝo el la domo de Eorlo, malgraŭ lia maljuneco, — li diris. — Sed tiuj, kiuj sincere amas lin, volus malŝarĝi liajn velkajn jarojn. Tamen mi konstatas, ke tro malfrue mi venis. Aliaj, kiujn la morto de mia mastro eble malpli dolorigus, jam persvadis lin. Sed mi ne povas malfari ties faron, aŭskultu min almenaŭ ĉi-rilate, mastro! Iu konanta vian menson kaj honoranta viajn ordonojn devus resti en Edoraso. Nomu fidindan kuratoron. Permesu, ke via konsilisto Grimo prizorgu ĉiujn aferojn ĝis via reveno; kaj mi preĝas, ke tion ni vidu, kvankam neniuj saĝulo taksos ĝin probable.

Eomero ridis:

— Kaj se tiu pledo ne liberigos vin de la milito, plej nobla Vermlango, — li diris, — kiu posteno malpli honora estus akceptebla de vi? Ĉu porti sakon da faruno supren en la montaron, se iu konfidus tion al vi?

— Ne, Eomero, vi ne plene komprenas la menson de mastro Vermlango, — diris Gandolfo, direktante sur lin sian pikan rigardon. — Li estas aŭdaca kaj ruza. Ankaŭ nun li ludas danĝeran ludon kaj gajnas poentojn. Horojn de mia valora tempo li jam malŝparis. Suben, serpento! — li subite diris per terura voĉo. — Suben sur la ventron! Kiom da tempo pasis, post kiam Sarumano vin aĉetis? Kio estis la prezo promesita? Kiam ĉiuj viroj estus mortaj, vi estus elektonta vian porcion de la trezoro kaj ricevonta la virinon, kiun vi deziras, ĉu? Tro longe vi rigardis ŝin el sub la palpebroj kaj hantis ŝiajn paŝojn.

Eomero kroĉis sian glavon.

— Tion mi jam sciis, — li murmuris. — Pro tio mi pli frue mortigus lin, malatentante la leĝon de la halo. Sed ekzistas aliaj kialoj. — Li paŝis antaŭen, sed Gandolfo haltigis lin mansigne.

— Eovina estas jam sufiĉe sekura, — li diris. — Sed vi, Vermlango, faris vian eblon por via vera mastro. Almenaŭ iom da kompenso vi meritas. Tamen Sarumano emas preteratenti siajn interkonsentojn. Mi konsilas, ke vi iru rapide kaj memorigu lin antaŭ ol li forgesos vian fidelan servon.

— Vi mensogas, — diris Vermlango.

— Tiu vorto aŭdiĝas tro ofte kaj tro facile ĉe viaj lipoj, — diris Gandolfo. — Mi ne mensogas. Vidu, Teodeno, jen estas serpento! Sendanĝere vi ne povos kunpreni ĝin, nek vi povos lasi ĝin malantaŭe. Mortigi ĝin estus juste. Sed ĝi ne estis ĉiam tia, kia ĝi nun estas. Iam ĝi estis homo kaj servis vin siamaniere. Donu al li ĉevalon kaj li iru tuj, kien ajn li elektos. Laŭ lia elekto vi juĝos lin.

— Ĉu vi aŭdas tion, Vermlango? — diris Teodeno. — Jen via elekto: rajdi kun mi al la milito, kaj ni vidu en batalo, ĉu vi estas lojala; aŭ iri tuj kien ajn vi deziras. Sed poste, se iam ni rerenkontiĝos, mi ne estos kompatema.

Malrapide Vermlango stariĝis. Li rigardis ilin per siaj duonfermitaj okuloj. Laste li trarigardis la vizaĝon de Teodeno kaj malfermis sian buŝon kvazaŭ parolonte. Sed subite li rektigis sin. Liaj manoj moviĝis. Liaj okuloj ekflagris. En ili estis tia malico, ke homoj forpaŝis de li. Li nudigis siajn dentojn; poste kun sibla spiro li kraĉis antaŭ la piedojn de la reĝo kaj, saltinte flanken, li fuĝis malsupren laŭ la ŝtuparo.

— Sekvu lin! — diris Teodeno. — Atentu, ke li al neniu malutilu, sed nek vundu, nek malhelpu lin. Donu al li ĉevalon, se li deziros.

— Kaj se iu konsentos porti lin, — diris Eomero.

Unu el la gardistoj kuris suben laŭ la ŝtuparo. Alia iris al la puto funde de la teraso kaj plenigis per akvo sian kaskon. Per ĝi li purigis la ŝtonojn, kiujn Vermlango fimakulis.

— Nu, miaj gastoj, venu! — diris Teodeno. — Venu akcepti tiun refreŝigaĵon, kiun permesas la neceso rapidi.

Ili reiris en la domegon. Jam ili aŭdis sube en la urbo kriadon de la heroldoj kaj blovadon de militaj kornoj. Ĉar la reĝo estis elrajdonta tiel baldaŭ, kiel povis armiĝi kaj kunveni la viroj de la urbo kaj proksimaj loĝantoj.

Ĉe la reĝa tablo sidis Eomero kaj la kvar gastoj, kaj ankaŭ tie servis la reĝon la damo Eovina. Ili manĝis kaj trinkis rapide. La aliaj silentis, dum Teodeno pridemandis Gandalfon pri Sarumano.

— Kiu povas diveni, kiam komenciĝis liaj perfidoj? — diris Gandalf. — Li ne ĉiam estis malbonema. Mi ne dubas, ke iam li estis amiko de Rohano; kaj eĉ kiam lia koro pli malardiĝis, li trovis vin ankoraŭ utila. Sed jam delonge li komplotis por ruinigi vin, portante maskon de amikeco, ĝis li estos preta. Dum tiuj jaroj la tasko de Vermlango facilis, kaj ĉio, kion vi faris, estis senprokraste konata en Isengardo; ĉar via lando estis malfermita kaj fremduloj venis-iris. Kaj ĉiam la flustrado de Vermlango estis en viaj oreloj venenante viajn pensojn, fridigante vian koron, malfortigante viajn membrojn, dum aliaj spektis kaj povis fari nenion, ĉar via volo estis sub lia kuratoreco.

» Sed kiam mi eskapis kaj avertis vin, tiam ŝiriĝis la masko antaŭ tiuj, kiuj kapablis vidi. Post tio Vermlango ludis danĝere, ĉiam klopdante prokrastigi vin, por malhelpi amasigon de via plena potenco. Li estis ruza: malakrigante la homan singardemon, aŭ prilaborante la homajn timojn, laŭ postuloj de la okazaĵo. Ĉu vi memoras, kiel avide li urĝis, ke neniŭ estu sendota por sencela ĉasado norden, ĉar la tuja danĝero estis en la okcidento? Li persvadis vin malpermesi al Eomero persekuti la kaperantajn orkojn. Se Eomero ne malobeus la voĉon de Vermlango parolantan per via buŝo, tiuj orkoj jam atingus Isengardon, alportinte grandan valoraĵon. Efektive, ne tiun valoraĵon, kiun Sarumano deziras antaŭ ĉio, sed almenaŭ du anojn de mia kunularo, partoprenantojn en sekreta espero pri kiu eĉ al vi, mastro, mi ne povas ankoraŭ paroli malkaŝe. Ĉu vi kuraĝas pensi pri tio, kion ili eble nun suferus, aŭ pri kio Sarumano eble nun lernus por detrui nin?

— Mi ŝuldas multon al Eomero, — diris Teodeno. — Fidela koro povas havi impulsan langon.

— Diru ankaŭ, — diris Gandolfo, — ke laŭ kurbaj okuloj la vero povas vidiĝi vizaĝon torditan.

— Efektive miaj okuloj estis preskaŭ blindaj, — diris Teodeno. — Pleje mi ŝuldas al vi, mia gasto. Denove vi venis ĝustatempe. Mi volas doni al vi donacon antaŭ ol ni iros, laŭ via propra elekto. Necesas nur nomi ion ajn, kio estas mia. Mi rezervas nur mian glavon.

— Ĉu mi venis ĝustatempe aŭ ne, estas ankoraŭ konstatota, — diris Gandolfo. — Sed rilate vian donacon, mastro, mi elektos tiun, kiu konvenas al mia bezono: rapida kaj fidinda. Donu al mi Ombro-fakson! Antaŭe ĝi estis nur pruntedonita, se tion oni rajtas nomi prunedono. Sed nun mi rajdos ĝin en grandan danĝeron, direktante arĝenton kontraŭ nigron: mi ne volus riski ion, kio ne estus mia. Kaj jam ekzistas ama ligo inter ni.

— Vi elektas bone, — diris Teodeno, — kaj mi donacas ĝin nun kun plezuro. Tamen ĝi estas granda donaco. Neniu ekzistas simila al Ombrofakso. En ĝi revenis unu el la potencaj rajdbestoj de la pratempo. Neniu tia revenos estonte. Kaj al vi, miaj ceteraj gastoj, mi proponos tiajn aĵojn, kiaj troveblas en mia armilejo. Glavojn vi ne bezonas, sed troviĝas kaskoj kaj maŝkirasoj lerte kreitaj, donacoj al miaj prapatroj el Gondoro. Elektu inter ili antaŭ ol ni iros, kaj ili servu vin bone!

Nun venis viroj portante militvestaĵojn el la reĝa provizo, kaj ili vestis Aragornon kaj Legolason per brilaj maŝkiraso. Ankaŭ kaskojn ili elektis kaj rondajn ŝildojn: iliaj bosoj estis kovritaj de oro kaj geminkrustitaj, verdaj, ruĝaj kaj blankaj. Gandolfo prenis neniun armaĵon; kaj Gimlio ne bezonis maŝkirason eĉ se estus trovebla unu konvena al lia statur, ĉar inter la provizoj de Edoraso troveblis neniun kiraso farita pli bone ol lia mallonga brustarmaĵo, forĝita sub la Monto en la Nordo. Sed li elektis ĉapon el fero kaj ledo, kiu bone alĝustigiĝis al lia ronda kapo; kaj ankaŭ malgrandan ŝildon li prenis. Ĝi surhavis la kurantan ĉevalon, blankan sur verdo, kiu estis la emblemo de la domo de Eorlo.

— Ĝi gardu vin bone! — diris Teodeno. — Ĝi estas farita por mi en la tempo de Tengelo, dum mi estis ankoraŭ knabo.

Gimlio riverencis.

— Mi fieras, Mastro de Rohano, porti vian insignon, — li diris. — Efektive, mi preferus porti ĉevalon ol esti ĉevale portata. Mi pli ŝatas miajn piedojn. Sed eble mi alvenos ĝustatempe tien, kie mi povos stari kaj batali.

— Povos esti tiel, — diris Teodeno.

Nun la reĝo stariĝis, kaj tuj Eovina venis antaŭen portante vinon.

— *Ferthu Théoden Hál!* — ŝi diris. — Ricevu nun tiun ĉi pokalon kaj trinku en feliĉa horo. Sanon al vi iranta kaj venonta!

Teodeno trinkis el la pokalo kaj poste ŝi proponis ĝin al la gastoj. Starante antaŭ Aragorno ŝi subite paŭzis kaj rigardis lin, kaj ŝiaj okuloj brilis. Li subenrigardis al ŝia bela vizaĝo kaj ridetis; sed kiam li prenis la pokalon, lia mano tuŝis la ŝian, kaj li sciis, ke ŝi tremetas pro la tuŝo.

— Saluton, Aragorno, filo de Aratorno! — ŝi diris.

— Saluton, Damo de Rohano! — li respondis, sed lia vizaĝo estis jam zorgoplena kaj li ne ridetis.

Kiam ĉiuj estis trinkintaj, la reĝo trairis la halon ĝis la pordo. Tie la gardistoj atendis lin kaj staris heroldoj, kaj ĉiuj princoj kaj ĉefoj estis kunvenintaj, kiuj restis en Edoraso aŭ loĝis proksime.

— Vidu! Mi eliras kaj ŝajnas probable, ke ĝi estos mia lasta elraĵdo, — diris Teodeno. — Infanon mi ne havas. Teodredo, mia filo, estas mortigita. Mi nomas Eomeron, filon de mia fratino, mia heredonto. Se neniuj el ambaŭ revenos, tiam elektu novan reĝon laŭplaĉe. Sed al iu mi nun devas konfidi mian popolon postlasotan, por regi ĝin sur mia loko. Kiu el vi konsentos resti?

Neniuj viro parolis.

— Ĉu neniun vi volas nomi? Al kiu fidas mia popolo?

— Al la domo de Eorlo, — respondis Hamo.

— Sed Eomeron mi ne povas malhavi, kaj li ankaŭ ne konsentos resti, — diris la reĝo. — Kaj li estas la lasta el tiu domo.

— Eomeron mi ne diris, — respondis Hamo. — Kaj li ne estas la lasta. Ekzistas Eovina, filino de Eomundo, lia fratino. Ŝi estas sentima kaj bravkora. Ĉiuj amas ŝin. Ŝi agu kiel mastro de la eorlidoj, dum ni estos for.

— Estu tiel, — diris Teodeno. — La heroldoj anoncu al la popolo, ke ilin gvidos damo Eovina!

Poste la reĝo sidiĝis sur seĝon antaŭ la pordo, kaj Eovina genuis antaŭ li kaj ricevis de li glavon kaj belforman brustarmaĵon.

— Adiaŭ, fratina filino! — li diris. — Malluma estas la horo, tamen eble ni revenos al la Ora Halo. Sed en Dunharo la popolo povos longe defendi sin, kaj se la batalo iros mise tien venos ĉiuj eskapintoj.

— Ne parolu tiel! — ŝi respondis. — Jaron mi suferos dum ĉiu tago, kiu pasos antaŭ via reveno. — Sed dumparole ŝiaj okuloj direktiĝis al Aragorno staranta proksime.

— La reĝo revenos, — li diris. — Ne timu! Ne okcidente, sed oriente atendas nin nia sorto.

La reĝo descendis laŭ la ŝtuparo kun Gandolfo apude. La aliaj sekvis. Aragorno rerigardis, kiam ili proksimiĝis al la pordo. Eovina staris sola antaŭ la pordo de la domo supre de la ŝtupoj; la glavo estis metita vertikale antaŭ ŝi kaj ŝiaj manoj estis metitaj al la tenilo. Ŝi estis jam kirase vestita kaj brilis kiel arĝento en la sunlumo.

Gimlio marŝis apud Legolaso kun hakilo sur sia ŝultro.

— Nu, finfine ni ekiras! — li diris. — Homoj bezonas multajn vortojn antaŭ la agoj. Mia hakilo senpacienas en miaj manoj. Tamen mi ne dubas, ke ĉi tiuj rohananoj estas durmanaj, kiam ili ekagas. Malgraŭ tio, jen ne estas tia milito, kia konvenas al mi. Kiel mi atingos la batalon? Mi volus marŝi kaj ne skuiĝi kiel sako antaŭ la selantaŭaĵo de Gandolfo.

— Sidloko pli sendanĝera ol multaj, mi supozas, — diris Legolaso. — Sed sendube Gandolfo volonte submetos vin surpieden, kiam komenciĝos la battoj; aŭ Ombrofaxo mem. Hakilo ne estas taŭga armilo por rajdanto.

— Kaj gnomo ne estas rajdisto. Ork-nukojn mi volas haki, ne razi la kapojn de homoj, — diris Gimlio, frapetante la tenilon de sia hakilo.

Ĉe la pordo ili renkontis grandan viramason, junajn kaj maljunajn, ĉiujn prete surselajn. Pli ol milo tie kunvenis. Iliaj lancoj estis kiel kreska arbareto. Laŭte kaj ĝoje ili kriis, kiam Teodeno venis. Iuj tenis preta la reĝan ĉevalon Neĝkolaĵo, kaj aliaj tenis la ĉevalojn de Aragorno kaj Legolaso. Gimlio staris ĝenate, malridante, sed Eomero venis al li kondukante sian ĉevalon.

— Saluton, Gimlio, filo de Gloino! — li kriis. — Mi ankoraŭ ne disponis tempon por lerni ĝentilajn parolojn sub via draŝo, kiel vi promesis. Sed ĉu ni ne flankenmetu nian kverelon? Mi almenaŭ ne parolos denove mise pri la Damo de la Arbaro.

— Mi forgesos mian koleron por kelka tempo, Eomero, filo de Eomundo, — diris Gimlio, — sed se iam vi hazarde vidos la Damon Galadriela propraokule, tiam vi devos agnoski ŝin la plej bela el la virinoj, aŭ nia amikeco ĉesos.

— Tiel estu! — diris Eomero. — Sed ĝis tiam pardonu min, kaj kiel signo de pardono rajdu kun mi, mi petas. Gandolfo estos ĉe la kapo kun la Mastro de Rohano; sed Fajrpiedo, mia ĉevalo, portos nin ambaŭ, se vi konsentas.

— Mi dankas vin tre varme, — diris Gimlio ege kontenta. — Mi ĝoje kuniros vin, se Legolaso, mia kamarado, rajtos rajdi apud ni.

— Estos tiel, — diris Eomero. — Legolaso maldekstre kaj Aragorno dekstre, kaj neniuj aŭdacoj kontraŭstari nin!

— Kie estas Ombro? — demandis Gandolfo.

— Kuranta sovaĝe sur la herbo, — ili respondis. — Ĝi permesas al neniuj homoj tuŝi sin. Jen ĝi iras, fore apud la vadejo, kiel ombro inter la salikoj.

Gandolfo fajfis kaj vokis laŭte la nomon de l' ĉevalo, kaj tiu en malproksimo flirtigis la kapon kaj henis, kaj, sin turninte, sage rapidis al la homamaso.

— Se la spiro de la okcidenta vento plenigus korpon videblan, ĝuste tia ĝi aspektus, — diris Eomero dum la ĉevalo alkuris ĝis ĝi ekstaris antaŭ la sorĉisto.

— La donaco ŝajnas jam donacita, — diris Teodeno. — Sed aŭskultu ĉiuj! Jen ĉi tie mi nomas mian gaston Gandalfon Grizmantelo, la plej saĝan el konsilistoj, la plej bonvenan el vagantoj, princo de Markio, ĉefo de la eorlidoj, dum vivas mia parenkaro; kaj mi donacas al li Ombro, nobelon inter ĉevaloj!

— Mi dankas vin, reĝo Teodeno, — diris Gandolfo. Poste li subite ŝovis malantaŭen sian grizan mantelon kaj flankenĵetis sian ĉapelon kaj saltis surseliĝe. Li vestis nek kaskon, nek maŝkirason. Liaj neĝecaj haroj flirtis libere en la vento; lia blanka robo brilis blindige en la sunlumo.

— Vidu la Blankan Rajdanton! — kriis Aragorno, kaj ĉiuj ripetis la vortojn.

— Nia Reĝo kaj la Blanka Rajdanto! — ili kriis. — Ek, eorlidoj!

La kornoj sonoritis. La ĉevaloj baŭmis kaj henis. Lancoj klakegis kontraŭ ŝildoj. Poste la reĝo levis sian manon, kaj kun impeto, kiel la subita ekblovo de forta vento, la lasta armeo de Rohano ekrajdis tondre al la okcidento.

Malproksiman sur la ebenaĵo vidis Eovina la ekbrilon de iliaj lancoj, dum ŝi staris senmove, sola antaŭ la pordoj de la silenta domo.

Ĉapitro 7

PROFUNDAĴO DE HELMO

La suno jam turniĝis okcidenten, kiam ili elrajdis el Edoraso, kaj ĝia lumo trafis iliajn okulojn, volvante ĉiujn sinsekvajn kampojn de Rohano en ora nebuleto. Ekzistis plandumita vojo nord-okcidenten laŭ la antaŭmontetoj de la Blankaj Montoj, kaj tiun ili laŭiris supren-suben en verda tereno, transirante etajn rapidajn rojojn per multaj travadejoj. Fore antaŭe kaj dekstre baŭmis la Nebulecaj Montoj; ĉiam pli malhelaj kaj pli altaj ili iĝis kun trapaso de la mejloj. La suno malrapide sinkis antaŭ ili. Vespero postsekvis.

La armeo plu rajdis. Neceso pelis ilin. Timante alveni tro malfrue, ili rajdis laŭpove rapide, malofte paŭzante. Rapidaj kaj eltenemaj estis la rajdbestoj de Rohano, sed restis multaj leŭgoj irendaj. Kvardek leŭgoj kaj pli estis la distanco, laŭ flugvojo de birdo, de Edoraso ĝis la Travadejoj de Iseno, kie ili esperis trovi la reĝajn soldatojn, kiuj baris la hordojn de Sarumano.

Nokto envolvis ilin. Fine ili haltis por bivaki. Ili jam rajdis kvin horojn kaj estis fore sur la okcidenta ebenaĵo, tamen pli ol la duono de la vojaĝo ankoraŭ kuŝis antaŭ ili. En granda cirklo sub la stelplena ĉielo kaj kreskanta luno ili starigis sian bivakon. Ili bruligis neniujn fajrojn, ĉar ili malcertis pri la okazaĵoj; sed ili postenigis ringon da surĉevalaj sentineloj, kaj skoltoj rajdis fore antaŭen, pasante kvazaŭ ombroj en la faldaĵoj de la tero. Pasis la malrapida nokto sen informoj aŭ alarmoj. Je l' aŭroro sonoris la kornoj, kaj en malpli ol unu horo ili denove ekvojaĝis.

Ankoraŭ ne estis nuboj superkape, sed pezo estis en la aero; estis varmege pli ol kutime tiusezone. La supreniranta suno estis vualita, kaj malantaŭ ĝi, sekvante ĝin lante supren sur la ĉielo, vidiĝis kreskanta mallumo mornanta ĉirkaŭ la suboj de la Nebulecaj Montoj, ombro kiu subenrampis malrapide el la Sorĉista Valo.

Gandolfo retrovenis ĝis kie Legolaso rajdis apud Eomero.

— Vi havas akran vidpovon de via brava parencaro, Legolaso, — li

diris, — kaj vi kapablas distingi paseron dis de fringo en leŭga malproksimo. Diru al mi, ĉu vi vidas ion tie fore en la direkto de Isengardo?

— Multaj leŭgoj kuŝas intere, — diris Legolaso, tien rigardante kaj ombrumante la okulojn per sia longa mano. — Mi vidas mallumon. En ĝi moviĝas figuroj, grandaj figuroj tre malproksime sur la riverbordo; sed kio ili estas, tion mi ne povas rekoni. Nek nebuleto nek nuboj venkas miajn okulojn: troviĝas ia vualanta ombro kiun iu potenco metas sur la landon, kaj ĝi progresas malrapide malfonten. Estas kvazaŭ krepusko sub senfinaj arboj fluus malsupren el la montoj.

— Kaj malantaŭ ni venas ŝtormo mem el Mordoro, — diris Gandolfo. — La nokto estos nigrega.

Dum ilia dua rajdotago progresis, la pezo en la aero pliiĝis. Posttagmeze la malhelaj nuboj komencis ĝisatingi ilin: sombra baldakeno kun grandaj ondantaj randoj makulitaj je blindiga lumo. La suno malsupreniris, sangruĝa en fuma nebuleto. La lancojn de la rajdistoj pintigis fajro, dum la lastaj lumstrioj ĉendis la apikajn fruntojn de la montovertoj de Trihirono: jam tre proksimaj ili staris sur la plej norda brako de la Blankaj Montoj, tri akr-angulaj kornoj rigardantaj al la sunsubiro. Per la lasta ardo ruĝa viroj en la antaŭo vidis nigran punkton, rajdiston rajdantan al ili. Ili haltis atendente lin.

Li venis, viro lacega kun fendita kasko kaj fendita ŝildo. Malrapide li elseliĝis kaj staris tie iom da tempo anhelante. Finfine li parolis.

— Ĉu ĉeestas Eomero? — li demandis. — Finfine vi venas, sed tro malfrue, kaj kun tro malgranda potenco. La aferoj iris malbone, de kiam falis Teodredo. Hieraŭ ni estis retropuŝitaj trans Isenon kun grandaj perdoj; multaj pereis dum la transiro. Poste dumnokte novaj fortoj venis trans la riveron kontraŭ nian bivakon. La tuta Isengardo certe estas malplenigita; kaj Sarumano armis la sovaĝajn montaranojn kaj paŝtistojn el Dunlando trans la riveroj, kaj ankaŭ tiujn li malligis kontraŭ nin. Ni estas venkitaj. La ŝildmuro estis breĉita. Erkenbrando el Ŭestfaldo forprenis la virojn, kiujn li povis kunigi, al sia fortikaĵo en la Profundaĵo de Helmo. La ceteraj estas dispelitaj. Kie estas Eomero? Sciigu lin, ke antaŭe estas nenia espero. Li devus reiri al Edoraso antaŭ ol la lupoj de Isengardo alvenos tien.

Teodeno estis sidinta silente, kaŝita al la viro malantaŭ siaj gardistoj; nun li urĝis antaŭen sian ĉevalon.

— Venu, staru antaŭ min, Keorlo! — li diris. — Mi estas ĉi tie. La lasta armeo de la eorlidoj elrajdis. Ĝi ne reiros sen batalo.

La vizaĝo de l' viro heliĝis pro ĝojo kaj miro. Li rektigis sin. Poste li genuis, proponante sian noĉitan glavon al la reĝo.

— Ordonu min, mastro! — li kriis. — Kaj pardonu min! Mi supozis...

— Vi supozis, ke mi restis en Meduseldo kurbigite kvazaŭ maljuna arbo sub vintra neĝo. Tiel estis, kiam vi elrajdis al milito. Sed okcidenta vento skuis la branĉojn, — diris Teodeno. — Donu al tiu ĉi viro freŝan ĉevalon! Ni rajdu por helpi Erkenbrandon!

Dum Teodeno parolis, Gandolfo rajdis iomete antaŭen, kaj tiel li sidis sola, rigardante norden al Isengardo kaj okcidenten al la subiranta suno. Nun li revenis.

— Rajdu, Teodeno! — li diris. — Rajdu al la Profundaĵo de Helmo! Ne iru al la Travadejoj de Iseno, kaj ne prokrastu sur la ebenaĵo! Mi devas lasi vin provizore. Ombro fakso devas nun porti min pro hasta komisiio. — Turninte sin al Aragorno, Eomero kaj la viroj de la reĝa domanaro, li kriis: — Gardu bone la Mastron de Markio ĝis mi revenos. Atendu min ĉe la Pordo de Helmo! Adiaŭ!

Li diris vorton al Ombro fakso, kaj kiel sago el pafarko la granda ĉevalo forsaltis. Ĝuste dum oni rigardis li estis for: flagro de arĝento en la sunsubiro, vento tra la herbaro, ombro kiu foriris kaj pasis el la vidkapablo. Neĝkolaĵo snufis kaj baŭmis, avida por sekvi; sed nur rapide fluganta birdo povus ĝin ĝisatingi.

— Kion signifas tio? — diris unu el la gardistoj al Hamo.

— Ke Gandolfo Grizmantelo devas hasti, — respondis Hamo. — Ĉiam li iras-venas neatendite.

— Vermlango, se tiu ĉeestus, ne trovus malfacile klarigi, — diris la alia.

— Sufiĉe vere, — diris Hamo, — sed miaflanke mi atendos ĝis mi vidos denove Gandalfon.

— Eble vi longe atendos, — diris la alia.

La armeo nun forturnis sin de la vojo al la Travadejoj de Iseno kaj direktis siajn paŝojn al la sudo. Noktiĝis, kaj daŭre ili rajdis. La montetoj proksimiĝis, sed la altaj pintoj de Trihirno jam malklaris kontraŭ la malheliĝanta ĉielo. Ankoraŭ plurajn mejlojn for, aliflanke de la

Ŭestfalda Valo, kuŝis verda kavaĵo, granda golfo en la montaro, el kiu malfermiĝis inter la montetoj interkrutejo. La tiulandaj homoj nomis ĝin la Profundaĵo de Helmo, laŭ heroo de l' antikvaj militoj kiu starigis tie sian rifuĝejon. Ĉiam pli apike kaj pli mallarĝe ĝi serpentumis enen el la nordo sub la ombro de Trihirno, ĝis la korvhantataj klifoj leviĝis kvazaŭ potencaj turegoj ambaŭflanke, forbarante la lumon.

Ĉe la Pordo de Helmo, antaŭ la enirejo de la Profundaĵo, estis roka kalkano elŝovita de la norda klifo. Tie sur la supraĵo staris altaj muroj da antikva ŝtono, kaj ene de ili estis altega turo. La homoj diris, ke en la prapasintaj tagoj de la Gondora gloro la transmaraj reĝoj konstruis tie la fortikaĵon per manoj de gigantoj. Kornburgo ĝi nomiĝis, ĉar kornono sonorigita sur la turo eĥis en la profundaĵo malantaŭe, kvazaŭ armeoj longe forgesitaj militirus el kavernoj sub la montetoj. Ankaŭ muron konstruis la prahomoj de Kornburgo ĝis la suda klifo, barantan la enirejon al la interkrutejo. Sub ĝi per larĝa subirejo elfluis la Profundaĵa Rojo. Ĉirkaŭ la subaĵojn de la Kornroko ĝi serpentumis kaj poste fluis en ravineto tra la mezo de larĝa verda ebenaĵo malabrupte deklivanta suben de la Pordo de Helmo ĝis la Ŝtonmuro de Helmo. De tie ĝi falis en la Profundan Kavaĵon kaj el tie al la Ŭestfalda Valo. Tie en Kornburgo ĉe la Pordo de Helmo nun loĝis Erkenbrando — mastro de Ŭestfaldo ĉe la limo de Markio. Dum la tagojn malheligis militminaco li, estante saĝa, riparis la muron kaj fortigis la fortikaĵon.

La rajdantoj estis ankoraŭ en la malalta valo antaŭ la enirejo de la Kavaĵo, kiam aŭdiĝis krioj kaj kornsonoro de iliaj skoltoj, kiuj estis antaŭe. El la mallumo fajfis saĝoj. Rapide skolto retrorajdis kaj raportis, ke lupaj rajdantoj estis en la valo, kaj ke hordo da orkoj kaj sovaĝuloj rapidadas suden el la Travadejoj de Iseno kaj ŝajnas celi al la Profundaĵo de Helmo.

— Ni trovis multajn niajn homojn kuŝantaj mortigitaj dum ili fuĝis tien, — diris la skolto. — Kaj ni renkontis dispelitajn kompaniojn irantaj tien-reen senestre. Kio okazis al Erkenbrando, neniuj ŝajne scias. Estas tre verŝajne, ke li estos ĝisatingita antaŭ ol li povos alveni la Pordon de Helmo, se li ankoraŭ ne pereis.

— Ĉu vidiĝis io rilate al Gandolfo? — demandis Teodeno.

— Jes, mastro. Multaj vidis maljunulon blankvestitan sur ĉevalo pasantan tien-reen tra la ebenaĵo kvazaŭ vento tra la herbaro. Iuj supozis lin Sarumano. Oni diras, ke antaŭ la noktiĝo li foriris direkte al Isengardo. Aliaj diras, ke ankaŭ Vermlango estis pli frue vidita irante norden kun bando da orkoj.

— Okazos malbone al Vermlango, se Gandolfo trovos lin, — diris Teodeno. — Tamen mankas al mi nun ambaŭ miaj konsilistoj, la malnova kaj la nova. Sed en tiu ĉi krizo ni ne povas pli bone elekti ol pluir, kiel diris Gandolfo, ĝis la Pordo de Helmo, ĉu aŭ ne Erkenbrando estas tie. Ĉu estas konate, kiom granda estas la hordo venanta el la nordo?

— Ĝi estas tre granda, — diris la skolto. — Fuĝanto nombras ĉiun malamikon duoble, tamen mi alparolis virojn bravkorajn, kaj mi ne dubas, ke la ĉefa fortaĵo de la malamikoj estas multoble pli granda ol ĉiuj, kiujn ni havas ĉi tie.

— Do ni agu rapide, — diris Eomero. — Ni trabreĉu tiujn malamikojn, kiuj jam troviĝas inter ni kaj la fortikaĵo. Ekzistas kavernoj en la Profundaĵo de Helmo, kie centoj povas kaŝi sin; kaj sekretaj pasejoj kondukas el tie sur la montetojn.

— Ne fidu al sekretaj pasejoj, — diris la reĝo. — Sarumano jam delonge spionesploris tiun ĉi landon. Tamen tiuloke nia defendo povos daŭri longe. Ni iru!

Aragorno kaj Legolaso nun iris kun Eomero en la antaŭo. Plu tra la malluma nokto ili rajdis, ĉiam pli malrapide, dum la mallumo profundigis kaj ilia vojo supreniris suden, pli kaj pli alten en la malklarajn faldaĵojn ĉirkaŭ la suboj de la montoj. Jen kaj jen ili trafis vagantajn bandojn da orkoj; sed tiuj fuĝis antaŭ ol la rajdistoj povis kapti aŭ mortigi ilin.

— Ne pasos tre longe, mi timas, — diris Eomero, — ĝis la alveno de la reĝa armeo estos konata al la estro de niaj malamikoj, ĉu Sarumano aŭ kiu ajn komandanto sendita de li.

La rumoro de milito kreskis malantaŭ ili. Nun ili povis aŭdi ŝvebantan tra la mallumo sonon de raŭka kantado. Ili plugrimpis foren en la Profundan Kavaĵon kiam ili reregardis. Tiam ili vidis torĉojn, senombrajn punktojn de fajra lumo sur la nigraj kampoj malantaŭe, disigitajn kvazaŭ ruĝaj floroj, aŭ serpentumantajn supren el la malaltejo laŭ longaj flagrantaj linioj. Ie-tie suprensaltis bruloj pli grandaj.

— Tio estas hordo granda kaj sekvas nin proksime, — diris Aragorno.

— Ili alportas fajron, — diris Teodeno, — kaj ili bruligas survoje fojnaĵojn, kabanojn kaj arbojn. Tiu ĉi valo estis fekunda kaj havis multajn domojn. Ve por mia popolo!

— Se nur la tago estus kaj ni povus rajdi kontraŭ ilin kiel ŝtormo el la montaro! — diris Aragorno. — Dolorigas min fuĝi antaŭ ili.

— Ne necesos fuĝi multe pluen, — diris Eomero. — Antaŭe ne malproksime jam kuŝas la Ŝtonmuro de Helmo, antikva fosaĵo kaj remparo strekitaj trans la kavaĵon, kvaronmejlon sub la Pordo de Helmo. Tie ni povos turniĝi kaj proponi batalon.

— Ne, ni estas tro malmultaj por defendi la Ŝtonmuron, — diris Teodeno. — Ĝi longas unu mejlon aŭ pli, kaj la breĉo en ĝi estas larĝa.

— Ĉe la breĉo devos stari nia ariergardo, se ni estos premitaj, — diris Eomero.

Nek steloj nek luno estis, kiam la rajdantoj alvenis la breĉon en la Ŝtonmuro, kie la rojo el supre elfluis kaj apud ĝi pado descendis de Kornburgo. La remparo baŭmis subite antaŭ ili, alta ombro post mal-luma puto. Kiam ili alrajdis, alvokis ilin sentinelo.

— La Mastro de Markio rajdas al la Pordo de Helmo, — Eomero respondis. — Mi, Eomero, filo de Eomundo, parolas.

— Jen feliĉa novaĵo pli ol niaj esperoj, — diris la sentinelo. — Rapidu! La malamiko proksime persekutas vin.

La armeo trairis la breĉon kaj haltis supre sur la dekliva herbaĵo. Ili nun sciigis ĝoje, ke Erkenbrando postlasis multajn virojn por defendi la Pordon de Helmo, kaj pli multaj poste eskapis tien.

— Eble ni havas milon kapablan batali surpiede, — diris Gamlingo, maljunulo, la estro de la Ŝtonmuraj defendantoj. — Sed plimulto el ili, kiel mi, spertis tro multajn vintrojn aŭ tro malmultajn kiel la jena filo de mia filo. Kia novaĵo pri Erkenbrando? Sciigo alvenis hieraŭ ke li retretas ĉi tien kun ĉiuj restantaj el la plej bonaj rajdistoj de Ŭestfaldo. Sed li ne venis.

— Mi timas, ke li jam ne venos, — diris Eomero. — Niaj skoltoj akiris neniom da informoj pri li, kaj la malamikoj plenigas la tutan valon malantaŭ ni.

— Mi volus ke li estu eskapinta, — diris Teodeno. — Li estas potenculo. En li revivis la braveco de Helmo la Martelmana. Sed ni ne povas atendi lin ĉi tie. Ni devos nun reloki nian tutan forton malantaŭ la murojn. Ĉu vi estas bone provizitaj? Ni kunportas malmulte da provizaĵo, ĉar ni elrajdis al aperta batalo, ne al sieĝo.

— Malantaŭ ni en la kavernoj de l' Profundaĵo estas tri kvaronoj el la popolo Ŭestfaldaj, maljunaj kaj junaj, infanoj kaj virinoj, — diris Gamlingo. — Sed ankaŭ granda kvanto da nutraĵo, kaj multaj bestoj kaj ties furaĝo, estas tie kunmetitaj.

— Estas bone, — diris Eomero. — Oni bruligas aŭ forrabas ĉion restintan en la valo.

— Se ili venos marĉandi pri niaj varoj ĉe la Pordo de Helmo, ili pagos altan prezon, — diris Gamlingo.

La reĝo kaj ties rajdistoj pluiris. Antaŭ la digvojo, kiu transiris la rojon, ili elseliĝis. En longa spaliro ili kondukis siajn ĉevalojn supren laŭ la taluso kaj eniris tra l' pordoj de Kornburgo. Tie oni bonvenigis ilin kun ĝojo kaj renoviĝinta espero; ĉar jam ĉeestis sufiĉaj viroj por postenigi kaj la burgon kaj la barilon.

Rapide Eomero starigis pretaj siajn virojn. La reĝo kaj ties domanaro estis en Kornburgo, kaj tie estis ankaŭ multaj Ŭestfaldaj viroj. Sed sur la Profundaĵa Muro kaj ties turo, kaj malantaŭ ĝi, Eomero starigis la pliparton de la batalontoj kiujn li disponis, ĉar tie la defendo ŝajnis pli dubinda, se la atako estus obstina kaj multnombra. La ĉevalojn oni kondukis foren tra la Profundaĵo kun tia gardo kia eblis.

La Profundaĵa Muro altis dudek futojn, kaj estis tiel dika ke kvar homoj povis marŝi flankon ĉe flanko sur ĝia supro, ŝirmitaj de parapeto trans kiun povis rigardi nur homoj tre altaj. Ie-tie estis fendaĵoj en la ŝtono tra kiuj povus pafi la homoj. Tiu ĉi remparo estis atingebla per ŝtuparo descendanta de pordo en la ekstera korto de Kornburgo; ankaŭ tri unuopaj ŝtuparoj kondukis supren sur la muron el la profundaĵo malantaŭe; sed antaŭe ĝi estis glata, kaj ĝiaj ŝtonegoj estis metitaj tiel lerte, ke ne troveblis piedapogo kie ili kuniĝis, kaj supre ili kliniĝis eksteren kiel klifo mar-fosita.

Gimlio staris apogite per la brustarmaĵo sur la muro. Legolaso sidis supre sur la parapeto, fingrumante sian pafarkon kaj rigardante en la sombron.

— Tio ĉi pli plaĉas al mi, — diris la gnomo, piedbatante la ŝtonojn. — Ĉiam mia koro soras kiam mi proksimiĝas al montoj. Ĉi tie estas bonkvalita roko. Tiu ĉi tereno havas ostojn fortikajn. Mi sentis ilin per miaj piedoj dum ni supreniris de la ŝtonmuro. Havigu al mi jaron kaj centon el mia parencaro kaj mi farus el tio ĉi lokon, kie armeoj rompiĝus kiel akvo.

— Tion mi ne dubas, — diris Legolaso. — Sed vi estas gnomo, kaj gnomoj estas stranguloj. Mi ne ŝatas tiun ĉi lokon, kaj mi ne ŝatos ĝin pli en la taga lumo. Sed vi konsolas min, Gimlio, kaj mi ĝojas ke vi staras apude kun viaj fortikaj kruroj kaj via dura hakilo. Mi volus ke estu

pli el via parenkaro inter ni. Sed eĉ pli mi donus por cent bonaj arkpafistoj el Mornarbaro. Ni bezonos ilin. La rohananoj havas bonajn arkpafistojn, sed ĉi tie estas tre malmultaj, tro malmultaj.

— Estas mallume por arkpafado, — diris Gimlio. — Efektive estas jam tempo dormi. Dormi! Mi tion bezonas, kiom mi neniam supozis gnomon dormema. Rajdado estas laciga tasko. Tamen mia hakilo senpacienca en mia mano. Havigu al mi vicon da orkaj nukoj kaj spacon por svingi kaj mia tuta laciĝo forfalos de mi!

Tempo pasis lante. Fore en la valo ankoraŭ brulis disaj fajroj. La armeo de Isengardo nun pluiris silente. Iliaj torĉoj estis videblaj serpentumante multspalire supren laŭ la kavaĵo.

Subite de la Ŝtonmuro eksplodis krioj kaj kriĉoj kaj la ferocaj bataloganoj de homoj. Flamantaj torĉoj aperis super la rando kaj rapide amasiĝis ĉe la breĉo. Poste ili disiris kaj malaperis. Homoj revenis galopante tra la kampo kaj supren laŭ la deklivo ĝis la pordo de Kornburgo. La ariero de l' ŭestfaldanoj estis enpelita.

— La malamiko ĉeestas! — ili kriis. — Ni pafis ĉiun sagon, kiun ni havis, kaj plenigis je orkoj la Fosaĵon. Sed tio ne longe haltigos ilin. Jam ili grimpas la remparon multloke, densaj kiel marŝantaj formikoj. Sed ni instruis al ili ne porti torĉojn.

Estis jam post la noktomezo. La ĉielo estis tute malluma kaj la senmovo de la peza aero antaŭsignis ŝtormon. Subite la nuboj estis bruligitaj per blindiga flagro. Forka fulmo frapis suben al la orientaj montetoj. Dum fiksrigarda momento la surmuraj gvatantoj vidis la tutan spacon inter si kaj la ŝtonmuro lumigita per blanka lumo: ĝi bolis kaj svarmis je nigraj figuroj, iuj stumpaj kaj larĝaj, iuj altaj kaj minacaj, kun altaj kaskoj kaj nigraj ŝildoj. Pliaj centoj kaj centoj verŝiĝis el trans la Ŝtonmuro kaj tra la breĉo. La malhela tajdo fluis al la muroj de klifo al klifo. Tondro ruliĝis en la valo. Pluvo plaŭdadis suben.

Sagoj densaj kiel la pluvoj venis fajfe trans la krenelaĵon kaj falis tinte kaj resalte sur la ŝtonojn. Iuj trafis sian celon. Komenciĝis atako kontraŭ la Profundaĵon de Helmo, sed neniuj sono aŭ defio aŭdiĝis interne; venis neniuj respondaj sagoj.

La atakantaj trupoj haltis, malhelpataj per la silenta minaco de rokoj kaj muro. Ĉiam denove fulmo traŝiris la mallumon. Poste la orkoj kriĉis, kirligante lancojn kaj glavojn kaj pafante amason da sagoj al iuj starantaj vidataj sur la krenelaĵo; kaj la viroj de Rohano

mirigite elrigardis, kiel ŝajnis al ili, al granda kampo de malhela greno perturbita de milita tempesto, kaj ĉiu grenero ekbrilis je pintigita lumo.

Latunaj kornoj sonoris. La malamikoj ondis antaŭen, iuj kontraŭ la Profundaĵan Muron, aliaj al la digvojo kaj la deklivo kondukantaj al la Kornburga pordego. Tie kolektiĝis la plej enormaj orkoj kaj la sovaĝuloj de la Dunlandaj altaĵoj. Momente tiuj hezitis kaj poste antaŭeniris. La fulmo flagris, kaj videblis blazonite sur ĉiuj kaskoj kaj ŝildoj la terura mano de Isengardo. Ili alvenis la pinton de la rokoj; ili impetis al la pordo.

Tiam finfine venis respondo: ilin renkontis ŝtormo da saĝoj kaj hajlo da ŝtonoj. Ili ŝanceliĝis, rompiĝis kaj retrofuĝis; kaj poste impetis denove, rompiĝis kaj reimpetis; kaj ĉiufoje, kiel flusanta maro, ili haltis ĉe loko pli alta. Denove sonoris trumpetoj, kaj alpremiĝo de muĝantaj dunlandanoj antaŭen saltis. Ili tenis siajn grandajn ŝildojn supre kiel tegmenton, dum en sia mezo ili portis du trunkojn de fortaj arboj. Malantaŭ ili amasiĝis orkaj pafistoj, sendantaj hajlon da ĵetlancoj kontraŭ la pafistoj sur la muroj. Ili atingis la pordegon. La arboj, ŝvingataj de fortaj brakoj, bategis la lignaĵon kun ŝira bruego. Se iu viro falis premegita de ŝtono impetanta de supre, du aliaj saltis por anstataŭi lin. Ĉiam denove la grandaj ramoj ŝvingiĝis kaj bategis.

Eomero kaj Aragorno staris kune sur la Profundaĵa Muro. Ili aŭdis la muĝadon de voĉoj kaj la batadon de la ramoj; kaj poste per subita flagro de lumo ili vidis la danĝeron al la pordego.

— Venu! — diris Aragorno. — Venas la horo kiam ni elingigu la glavojn kune!

Kurante kvazaŭ fajro, ili rapidis laŭlonge de la muro kaj supren laŭ la ŝtupoj kaj pasis en la eksteran korton sur la Roko. Kurante ili kunvenigis manplenen da bravaj glavbatalistoj. Troviĝis malgranda klap-pordo, kiu malfermiĝis en angulo de la burgomuro okcidente, kie la klifo etendiĝis renkonte. Ĉe tiu flanko ĉirkaŭiris mallarĝa pado al la granda pordo, inter la muro kaj la apika rando de la Roko. Eomero kaj Aragorno trasaltis la pordon kun siaj kunuloj proksime malantaŭe. La du glavoj fulme elingiĝis samtempe.

— Gutvineo! — kriis Eomero. — Gutvineo por Markio!

— Andurilo! — kriis Aragorno. — Andurilo por la Dunadanoj!

Deflanke ili impete ĵetis sin kontraŭ la sovaĝulojn. Andurilo leviĝis, descendis, ardante je blanka fajro. Krio ascendis el muro kaj turo:

— Andurilo! Andurilo ekmilitas. La Klingo Rompita brilas denove!

Konsternite la ramistoj lasis fali la arbojn kaj turniĝis por lukti; sed ilia ŝildmuro estis rompita kvazaŭ per fulmobato, kaj ili for-balaĝis, dehakitaj aŭ ĵetitaj trans la Rokon en la ŝtonozan rivereton sube. La orkaj arkpafistoj pafis sencele kaj poste fuĝis.

Momente Eomero kaj Aragorno haltis antaŭ la pordego. La tondro murmuris jam malproksime. La fulmo ankoraŭ flagris, fore inter la montoj en la sudo. Akra vento denove bloviĝis el la nordo. La nuboj estis ŝiritaj kaj drivantaj, kaj steloj elpalpebrumis; kaj super la montetoj apud la Kavaĵo ŝvebis luno okcidentema, flave briletanta en la ŝtorm-postlasaĵo.

— Ne tro frue ni alvenis, — diris Aragorno, rigardante la pordegon. Ties grandaj ĉarniroj kaj feraj bariloj estis torditaj kaj kurbigitaj; multaj lignaĵoj estis fenditaj.

— Tamen ni ne povas resti ĉi tie ekster la muroj por defendi ilin, — diris Eomero. — Vidu! — li indikis la digvojon. Jam granda amaso de orkoj kaj homoj ekkuniĝis aliflanke de l' rivereto. Sagoj fajfis kaj resaltetis sur la ŝtonoj ĉirkaŭ ili. — Venu! Ni devas reiri kaj vidi, kion ni povos fari por amasigi ŝtonojn kaj trabojn trans la pordo interne. Venu tuj!

Ili turniĝis kaj kuris. Tiumomente ĉirkaŭ dek du orkoj, kiuj kuŝis senmove inter la mortigitoj, salte stariĝis kaj venis silente kaj rapide malantaŭe. Du ĵetis sin teren ĉe l' kalkanoj de Eomero, faligis lin kaj tuj surkuŝis lin. Sed eta malhela figuro rimarkita de neniu saltis el la ombroj kaj eligis raŭkan krion: *“Baruk Khazâd! Khazâd ai-mênu!”* Svingiĝis hakilo kaj resvingiĝis. Du orkoj falis senkapigitaj. La ceteraj fuĝis.

Eomero barakte stariĝis, ĝuste kiam Aragorno rekuris por helpi lin.

La klappordo estis denove fermita, la fera pordego estis barita kaj ŝtonoj estis amasigitaj interne. Kiam ĉiuj estis sekuraj ene, Eomero sin turnis:

— Mi dankas vin, Gimlio, filo de Gloino! — li diris. — Mi ne sciis, ke vi partoprenis la eliratakon. Sed ofte gasto neinvitita pruvigas la plej valora ĉeestanto. Kiel okazis, ke vi venis tien?

— Mi sekvis vin por forskui la dormemon, — diris Gimlio; — sed mi rigardis la montaranojn kaj ili ŝajnis iom tro grandaj kompare al mi, do mi sidiĝis apud ŝtono por spekti vian glavludon.

— Ne estos facile por mi repagi la ŝuldon, — diris Eomero.

— Eble prezentiĝos multaj eblecoj antaŭ ol finiĝos la nokto, — ridis la gnomo. — Sed mi estas kontenta. Ĝis nun mi hakis nur lignon de kiam mi forlasis Morion.

— Du! — diris Gimlio, frapetante sian hakilon.

Li jam reokupis sian lokon sur la muro.

— Ĉu du? — diris Legolaso. — Mi faris pli bone, kvankam nun mi devas palpserĉi pafitajn sagojn; la miaj forsendiĝis. Tamen mi kalkulis, ke mia sumo estas minimume dudek. Sed tio estas nur kelkaj folioj en arbaro.

La ĉielo nun rapide klariĝadis kaj la sinkanta luno brilis hele. Sed la lumo alportis malmulte da espero al la rajdistoj de Markio. La malamikaro antaŭ ili ŝajnis plimultiĝinta anstataŭ male, kaj ankoraŭ aliaj impetis supren el la valo tra la breĉo. La eliratako sur la Roko gajnis nur mallongan prokraston. La atako kontraŭ la pordegon duobliĝis. Kontraŭ la Profundaĵan Muron la trupoj de Isengardo muĝis kvazaŭ maro. Orkoj kaj montaranoj svarmis ĉirkaŭ ties subo de unu flanko al alia. Ŝnuregoj kun kroĉhokoj estis ĵetitaj trans la parapeton pli rapide ol homoj povis tratranĉi ilin aŭ ilin reĵeti. Centoj da longaj eskaloj estis starigitaj. Multaj estis reĵetitaj ruiniĝe sed multaj aliaj anstataŭis ilin, kaj orkoj rapide grimpis kiel simioj en la malhelaj arbaroj de la sudo. Antaŭ la mura subaĵo la mortintoj kaj frakasitoj estis amasigitaj kiel ŝtonetoj en ŝtormo; ĉiam pli alten kreskis la hidaj amasoj, kaj daŭre avancis la malamikoj.

La rohananoj eklaciĝis. Ĉiuj sagoj estis pafitaj kaj ĉiuj lancoj estis ĵetitaj; iliaj glavoj estis noĉitaj, kaj iliaj ŝildoj estis fenditaj. Trifoje Aragorno kaj Eomero kuraĝiĝis ilin, kaj trifoje Andurilo flamis en furioza impeto kiu forpelis la malamikojn de la muro.

Tiam aŭdiĝis bruego en la Profundaĵo malantaŭe. Orkoj rampis kiel ratoj tra la subirejo per kiu la rojo elfluis. Tie ili kuniĝis en ombro de la klifoj ĝis la atako supre estis plej arda kaj preskaŭ ĉiuj defendantoj kuregis al la mura supraĵo. Tiam ili elsaltis. Jam kelkaj enpasis la makzelojn de la Profundaĵo kaj troviĝis inter la ĉevaloj, luktante kun la gardistoj.

Suben desur la muro saltis Gimlio kun feroca krio kiu eĥis inter la klifoj. "*Khazâd! Khazâd!*" — Li baldaŭ havis sufiĉe da laboro.

— Aj-oj! — li kriegis. — La orkoj estas malantaŭ la muro. Aj-oj! Venu, Legolaso! Sufiĉas por ni ambaŭ. *Khazâd ai-mênu!*

Gamlingo la Maljuna suben rigardis de Kornburgo, aŭdante la fortan voĉon de la gnomo malgraŭ la tuta tumulto.

— La orkoj en la Profundaĵo! — li kriis. — Helm! Helm! Ek Helmidoj! — li elpuŝis subensaltante laŭ la ŝtuparo de la Roko kun multaj viroj el Ŭestfaldo ĉedorse.

Ilia atako estis feroca kaj subita, kaj la orkoj cedis antaŭ ili. Post nelonge ili estis kunpremitaj en la ravinaj stretejoj, kaj ĉiuj estis mortigitaj aŭ pelitaj kriĉe en la abismon de la Profundaĵo por fali antaŭ la gardistoj de l' kaŝitaj kavernoj.

— Dudek unu! — kriis Gimlio. Li faris dumanan hakon kaj faligis la lastan orkon antaŭ siaj piedoj. — Nun mia kalkulo denove superas tiun de mastro Legolaso.

— Ni devas ŝtopi tiun ĉi ratotruon, — diris Gamlingo. — Onidire gnomoj estas lertuloj pri ŝtono. Aldonu vian helpon, mastro!

— Ŝtonojn ni ne formas per niaj hakiloj, nek per niaj fingrungoj, — diris Gimlio. — Sed mi kunlaboros laŭpove.

Ili kunrastis tiajn etajn rokojn kaj rompitaĵajn ŝtonojn, kiajn ili trovis ĉemane, kaj direktataj de Gimlio la Ŭestfaldanoj baris la internan ekstremaĵon de la subirejo ĝis nur mallarĝa trafluejo restis. Tiam la Profundaĵa Rojo, ŝveligita de la pluvo, kirlis kaj ĝeniĝis en sia ŝtopita pado, kaj disvastiĝis malrapide laŭ fridaj flakoj de klifo al klifo.

— Estos pli seke supre, — diris Gimlio. — Venu, Gamlingo, ni vidu kiel aferoj progresas sur la muro!

Li grimpis supren kaj trovis Legolason apud Aragorno kaj Eomero. La elfo akriĝis sian longan tranĉilon. Okazis provizora paŭzo en la atako, post kiam malsukcesis la klopodo eniri tra la subirejo.

— Dudek unu! — diris Gimlio.

— Bone! — diris Legolaso. — Sed mia kalkulo estas jam dudek kvar. Okazis ĉi tie tranĉila laboro.

Eomero kaj Aragorno lace apogis sin per siaj glavoj. Fore maldekstre la kunfrapiĝo kaj bruego de la batalo sur la Roko laŭtiĝis denove. Sed Kornburgo daŭre rezistis, kiel insulo en la maro. Ĝia pordo kuŝis ruinigite; sed trans la barilon el traboj kaj ŝtonoj interne neniu malamiko ĝis nun pasis.

Aragorno rigardis la palajn stelojn, kaj la lunon nun descendantan malantaŭ la okcidentajn montetojn, kiuj enfermis la valon.

— Tiu ĉi nokto longas kiel jaroj, — li diris. — Ĝiom longe prokrastiĝos la tago?

— Tagiĝo ne malproksimas, — diris Gamlingo, kiu jam grimpis ĝis apud li. — Sed tagiĝo ne helpos nin, mi timas.

— Tamen tagiĝo estas ĉiam espero de la homoj, — diris Aragorno.

— Sed jenaj kreaĵoj de Isengardo, ĉi duonorkoj kaj goblenoj breditaj per la filerto de Sarumano, ne ŝanceliĝos pro la suno, — diris Gamlingo. — Ankaŭ ne la sovaĝuloj el la montaro. Ĉu vi ne aŭdas iliajn voĉojn?

— Mi aŭdas, — diris Eomero; — sed por miaj oreloj tio estas nura kriĉado de birdoj kaj muĝado de bestoj.

— Tamen troviĝas multaj, kiuj krias en la Dunlanda lingvo, — diris Gamlingo. — Tiun lingvon mi konas. Ĝi estas antikva homa lingvo, kaj iam estis parolata en multaj okcidentaj valoj de Markio. Aŭdu! Ili malamegas nin kaj ĝojas, ĉar nia pereco ŝajnas al ili certa. “La reĝon, la reĝon! — ili krias. — Ni kaptos ilian reĝon. Morton al la Forgoj! Morton al la Pajlokapuloj! Morton al la rabistoj el la nordo!” Tiel ili foje nomas nin. Dum duonmilo da jaroj ili ne forgesas sian ofendon pro tio, ke la mastroj de Gondoro donis Markion al Eorlo la Juna kaj alianciĝis al li. Tiun pramalamon Sarumano flamigis. Ili estas popolo feroça kiam agitita. Ili ne cedos jam pro vesperkrepusko aŭ tagiĝo ĝis Teodeno estos kaptita aŭ ili mem estos mortigitaj.

— Malgraŭe, taglumo alportos esperon al mi, — diris Aragorno. — Ĉu ne estas dirite, ke neniu malamiko iam ajn kaptis Kornburgon, se homoj ĝin defendis?

— Tion diras la menestreloj, — diris Eomero.

— Do ni defendu ĝin kaj esperu! — diris Aragorno.

Ĝuste dum ili parolis, aŭdiĝis fanfaro de trumpetoj. Poste okazis frakaso kaj flagro da flamoj kaj fumo. La akvoj de la Profundaĵa Rojo elverŝiĝis siblante kaj ŝaŭmante: ili ne plu estis malhelpataj, gapa truo estis eksplode farita en la muro. Amaso da malhelaj figuroj enverŝiĝis.

— Demonaĵo de Sarumano! — kriis Aragorno. — Ili enrampis denove la subfluejon dum ni parolis kaj ili bruligis la fajron de Ortanko sub niaj piedoj. Elendilo, Elendilo! — li kriis saltante suben en la breĉon; sed ĝuste kiam li tion faris, centoj da eskaloj estis starigitaj al la krenelaro. Trans la muron kaj sub la muron la lasta atako venis balae kiel malhela ondo sur sablaltaĵon. La defendantoj estis forpuŝitaj. Iuj el la rajdantoj estis retropelitaj, pli kaj pli funden en la Profundaĵon, falante kaj luktante dum ili cedis paŝon post paŝo al la kavernoj. Aliaj hakis vojon reire al la citadelo.

Larĝa ŝtuparo supreniris de la Profundaĵo ĝis la Roko kaj la malantaŭa pordo de Kornburgo. Proksime al la subo staris Aragorno. En lia mano plu brilis Andurilo, kaj teruro pro la glavo dum kelka tempo prokrastigis la malamikojn, dum ĉiuj, kiuj povis alveni la ŝtuparon, pasis supren al la pordo. Malantaŭe sur la supraj ŝtupoj genuis Legolaso. Lia pafarko estis streĉita, sed restis al li nur unu trovita sago, kaj li nun elgvatis, preta pafi la unuan orkon kiu aŭdacus proksimiĝi al la ŝtuparo.

— Ĉiuj kiuj povas jam sekuras ene, Aragorno, — li vokis. — Retrovenu!

Aragorno sin turnis kaj rapidis supren laŭ la ŝtuparo, sed kurante li stumblis pro laceco. Tuj liaj malamikoj saltis antaŭen. Supren venis la orkoj, kriante, kun la longaj brakoj etenditaj por kapti lin. La plej antaŭa falis kun la lasta sago de Legolaso en sia gorĝo, sed la ceteraj transsaltis lin. Tiam granda rokego ĵetita de sur la ekstera muro supre subenkrakegis sur la ŝtuparon kaj reĵetis ilin en la Profundaĵon. Aragorno atingis la pordon, kaj rapide ĝi gonge fermiĝis malantaŭ li.

— La aferoj iras malbone, miaj amikoj, — li diris, viŝante la ŝviton de sia frunto per la brako.

— Sufiĉe malbone, — diris Legolaso, — sed ankoraŭ ne senespere, dum vi estas ĉe ni. Kie estas Gimlio?

— Mi ne scias, — diris Aragorno. — Mi lastfoje lin vidis batalanta surtere malantaŭ la muro, sed la malamikoj disbalais nin.

— Ve! Tio estas misa novaĵo, — diris Legolaso.

— Li estas brava kaj forta, — diris Aragorno. — Ni esperu, ke li eskapos al la kavernoj. Tie li estos sekura dum kelka tempo. Pli sekura ol ni. Tia rifuĝejo plaĉos al gnomo.

— Tio devas esti mia espero, — diris Legolaso. — Sed mi volus, ke li venu ĉi tien. Mi volus sciigi al Mastro Gimlio, ke mia kalkulo estas jam tridek naŭ.

— Se li sukcesos reatingi la kavernojn, li denove superos vian kalkulon, — ridis Aragorno. — Neniam mi vidis hakilon tiom svingitan.

— Mi devas iri por serĉi kelkajn sagojn, — diris Legolaso. — Se nur finiĝus tiu ĉi nokto tiel, ke mi havu pli bonan lumon por pafado.

Aragorno nun eniris la citadelon. Tie li sciigis konsternate, ke Eomero ne atingis Kornburgon.

— Ne, li ne venis al la Roko, — diris unu el la ŝestfaldanoj. — Mi lastfoje vidis lin kunvokanta ĉirkaŭ sin siajn virojn kaj luktanta ĉe la

enirejo al la Profundaĵo. Gamlingo estis kun li kaj la gnomo; sed mi ne sukcesis alveni ilin.

Aragorno plupaŝis tra la ena korto kaj supreniris ĝis alta ĉambro en la turego. Tie staris la reĝo, malhela kontraŭ mallarĝa fenestro, elrigardante al la valo.

— Kia novaĵo, Aragorno? — li diris.

— La Profundaĵa Muro estas kaptita, mastro, kaj la tuta defendantaro forbalaita; sed multaj eskapis ĉi tien al la Roko.

— Ĉu Eomero ĉeestas?

— Ne, mastro. Sed multaj el viaj viroj retiriĝis en la Profundaĵon; kaj iuj diras, ke inter ili estis Eomero. En la stretejoj ili povos eble forbari la malamikojn kaj aliri en la kavernojn. Kian esperon ili eble havos tiam, mi ne scias.

— Pli ol ni. Bona provizaĵo, laŭdire. Kaj la aero estas freŝa tie pro truoj per fendaĵoj en la roko forsupre. Neniu povas perforte eniri kontraŭ viroj obstinaj. Ili eble eltenos longe.

— Sed la orkoj alportis demonaĵojn el Ortanko, — diris Aragorno. — Ili havas eksplodigan fajron kaj per ĝi ili kaptis la Muron. Se ili ne sukcesos eniri la kavernojn, ili eble ensigelos tiujn interne. Sed nun ni devas turni nian tutan penson al nia propra defendo.

— Mi turmentiĝas en tiu ĉi karcero, — diris Teodeno. — Se mi povus celigi lancon, rajdante antaŭ miaj viroj sur la batalkampoj, eble mi sentus denove la batalĝojn kaj tiel pereus. Sed ĉi tie mi malmulte utilas.

— Almenaŭ ĉi tie vi estas gardata en la plej forta fortikaĵo de Markio, — diris Aragorno. — Pli da espero defendi vin ni havas en Kornburgo ol en Edorasoj, aŭ eĉ ĉe Dunharo en la montaro.

— Oni diras, ke Kornburgo neniam malvenkiĝis atakite, — diris Teodeno; — sed nun mia koro estas dubema. La mondo ŝanĝiĝas, kaj ĉio antaŭe forta jam pruviĝas malcerta. Kiel iu ajn turego kontraŭstaru tian multnombrojn kaj tian senbridan malamon? Se mi scius ke la forto de Isengardo tiel pligrandiĝis, mi eble ne estus tiel malzorge elrajdinta renkonte al ĝi, malgraŭ ĉiuj lertoj de Gandalfo. Lia konsilo jam ne ŝajnas tiom inda, kiom sub la matena suno.

— Ne prijuĝu la konsilon de Gandalfo ĝis ĉio finiĝos, mastro, — diris Aragorno.

— Finiĝos postnelonge, — diris la reĝo. — Sed mi ne pereos ĉi tie, kaptite kiel maljuna melo en kaptilo. Neĝkolaĵo kaj Hasufelo kaj la ĉevaloj de miaj gardistoj estas en la interna korto. Kiam venos la

aŭroro, mi ordonos ke oni sonorigu la kornon de Helmo, kaj mi elrajdos. Ĉu vi rajdos kun mi, filo de Aratorno? Eble mi trahakos vojon, aŭ alvenos tian morton kia meritos prikantadon — se restos poste iuj por kanti pri ni.

— Mi rajdos kun vi, — diris Aragorno.

Adiaŭinte li reiris ĝis la muroj kaj ĉirkaŭiris ties tutan periferion, kuraĝigante la homojn kaj helpante kie ajn la atako plej severis. Legolaso akompanis lin. Eksplozoj da fajro suprensaltis elsube, tremigante la ŝtonojn. Ŝnurhokojn oni ĵetis kaj eskalojn starigis. Ĉiam denove la orkoj atingis la supraĵon de la ekstera muro, kaj ĉiam denove la defendantoj malsuprenigis ilin.

Fine Aragorno ekstaris super la granda pordego ignorante la ĵetlancojn de l' malamikoj. Elrigardante li vidis paliĝon de la orienta ĉielo. Tiam li levis malplenan manon polmantaŭe kiel signon de interparolemo.

La orkoj kriegis kaj mokridis:

— Descendu! Descendu! Se vi emas paroli kun ni, descendu! Elvenigu vian reĝon! Ni estas batalantaj uruk-hajoj. Ni eligos lin el lia truo se li ne venos. Elvenigu vian reĝon sinkaŝan.

— La reĝo venas aŭ iras propravole, — diris Aragorno.

— Do kion vi celas ĉi tie? — ili respondis. — Kial vi elrigardas? Ĉu vi volas konstati la grandecon de nia armeo? Ni estas batalantaj uruk-hajoj.

— Mi elrigardis por vidi la aŭroron, — diris Aragorno.

— Kio pri la aŭroro? — ili mokridis. — Ni estas uruk-hajoj: ni ne ĉesigas bataladon pro nokto aŭ tago, pro bela vetero aŭ pro ŝtormo. Ni venas por mortigi, sub suno aŭ luno. Kio pri la aŭroro?

— Neniu scias, kion alportos nova tago, — diris Aragorno. — Iru for, antaŭ ol ĝi iĝos misa por vi.

— Descendu aŭ ni depafos vin de la muro, — ili kriis. — Tio ĉi neniel estas interparolo. Nenion vi havas por diri.

— Mi ankoraŭ havas jenon por diri, — respondis Aragorno. — Ĝis nun neniu malamiko breĉis Kornburgon. Foriru, aŭ eĉ unu el vi ne estos indulgita. Eĉ unu ne restos por reporti informojn al la nordo. Vian endanĝeriĝon vi ne rekonas.

Tiom fortaj estis la potenco kaj reĝeco rivelitaj en Aragorno dum li staris sola super la ruinigita pordego antaŭ la amaso de siaj malamikoj, ke multaj el la sovaĝuloj paŭzis kaj retrorigradis trans la ŝultron

al la valo, kaj iuj supren rigardis dubeme al la ĉielo. Sed la orkoj ridis laŭtvoĉe; kaj hajlo da ĵetlancoj kaj sagoj fajfis trans la muron, dum Aragorno saltis suben.

Okazis blekego kaj fajreksplodo. La arkaĵo de l' pordego, sur kiu li antaŭ momento staris, diseriĝis kaj falis en fumo kaj polvo. La bari-kado estis dispelita kvazaŭ per fulmosago. Aragorno kuris al la turego de l' reĝo.

Sed ĝuste kiam falis la pordego kaj la ĉirkaŭantaj ĝin orkoj kriegis prepare al sturmado, leviĝis murmuro malantaŭ ili kvazaŭ fora vento, kaj tio iĝis bruego de multaj voĉoj krientaj strangajn novaĵojn en la aŭroro. La orkoj sur la Roko, aŭdante la indikon pri konsterniĝo, hezitis kaj retrorigardis. Kaj tiam, subita kaj terura, el la turego supre sonoris la sono de la granda korno de Helmo.

Ĉiuj aŭdintaj tiun sonon tremis. Multaj orkoj alteriĝis survizaĝen kaj kovris per la ungegoj siajn orelojn. Denove el la Profundaĵo venis la eĥoj, skualon post skualo, kvazaŭ sur ĉiuj klifoj kaj montetoj starus potenca heroldo. Sed sur la muroj homoj suprenrigardis, mire aŭskultante; ĉar la eĥoj ne formortis. Ĉiam la kornskualoj alproksimiĝis inter la montetoj; jam pli proksimaj kaj pli laŭtaj ili respondis unu alian, blovante feroce kaj libere.

— Helmo! Helmo! — la rajdistoj kriis. — Helmo leviĝis kaj revenas al la milito. Helmo por reĝo Teodeno!

Kaj post tiu krio la reĝo venis. Lia ĉevalo estis neĝe blanka, ora estis lia ŝildo, kaj lia lanco estis longa. Dekstre de li estis Aragorno, heredanto de Elendilo, malantaŭ li rajdis la princoj de la Domo de Eorlo la Juna. Lumo saltis surĉielen. Foriris la nokto.

— Ek Eorlido!

Kun krio kaj granda bruo ili sturmis. Suben el la pordego ili rapidis, trans la digvojon ili galopis, kaj ili trafendis la Isengardajn amasojn kvazaŭ vento la herbon. Malantaŭ tiuj el la Profundaĵo venis la senkompataj krioj de homoj eliĝantaj el la kavernoj, elpelante la malamikojn. Elverŝiĝis ĉiuj homoj restintaj sur la Roko. Kaj ĉiam la sono de blovataj kornoj eĥis en la montetaro.

Plu ili rajdis, la reĝo kaj ties kunuloj. Estroj kaj fortuloj falis aŭ fuĝis antaŭ ili. Nek orko nek homo kontraŭstaris ilin. Ili dorsoj turniĝis al la glavoj kaj lancoj de la rajdistoj kaj iliaj vizaĝoj al la valo. Ili kriis kaj ululis, ĉar timo kaj mirego trafis ilin ĉe la sunleviĝo.

Do reĝo Teodeno elrajdis de la Pordo de Helmo kaj trafendis sian vojon al la granda Ŝtonmuro. Tie la grupo haltis. Lumo ekheliĝis ĉirkaŭ ili. Lumstrioj de la suno flagris super la orientaj montetoj kaj ekbrilis sur iliaj lancoj. Sed ili sidis silente sur siaj ĉevaloj kaj ili rigardadis suben al la Profundaĵa Kavaĵo.

La lando estis ŝanĝita. Kie antaŭe kuŝis la verda valetto kun herbaraj deklivoj randantaj la ĉiamaltiĝajn montetojn, nun baŭmis arbarego. Grandaj arboj nudaj kaj silentaj staris, vicon post vico, kun implikitaj branĉoj kaj prujnaj kapoj; iliaj torditaj radikoj estis subigitaj per la longa verda herbo. Mallumo estis sub ili. Inter la Ŝtonmuro kaj la rando de tiu sennoma arbaro kuŝis nur kvaronmejlo aperta. Tie jam kaŭris la fieraj amasoj de Sarumano, teruritaj pro la reĝo kaj teruritaj pro la arboj. Ili subenfluis de la Pordo de Helmo ĝis ĉie super la barilo ili malestis, sed sube de ĝi ili estis kunpremitaj kvazaŭ svarmantaj muŝoj. Vane ili rampis kaj grimpis ĉirkaŭ la flankojn de la kavejo, klopodante eskapi. Oriente tro apika kaj ŝtonoza estis la flanko de la valo; maldekstre, el la okcidento, ilia finsorto proksimiĝis.

Tie subite sur firsto aperis rajdanto blanke vestita, brilanta en la leviĝanta sunlumo. Trans la malaltaj montetoj aŭdiĝis la kornoj. Malantaŭ li, rapidante suben laŭ la longaj deklivoj, estis mil piedsoldatoj; en iliaj manoj estis glavoj. Inter ili paŝis viro alta kaj forta. Ties ŝildo estis ruĝa. Atinginte la randon de la valo li albuŝigis grandan nigran kornon kaj sonigis sonoratan blovon.

— Erkenbrando! — la rajdistoj kriis. — Erkenbrando!

— Vidu la Blankan Rajdanton! — kriis Aragorno. — Gandolfo revenis!

— Mitrandiro, Mitrandiro! — diris Legolaso. — Jen vera sorĉaĵo! Venu! Mi volas rigardi tiun arbaron antaŭ ol ŝanĝiĝos la envulto.

La amasoj de Isengardo blekis, balanciĝante tien kaj reen, turnante sin de timo al timo. Denove sonoris la korno el la turego. Suben tra la breĉo de la Ŝtonmuro sturmis la reĝa grupo. Suben de la monteto saltis Erkenbrando, mastro de Ŭestfaldo. Suben saltis Ombro fakso kvazaŭ cervo kiu kuras senstumble sur la montoj. La Blanka Rajdanto estis veninta, kaj teruro pro ties alveno plene frenezigis la malamikojn. La sovaĝuloj falis survizaĝen antaŭ li. La orkoj kirliĝis, kriĉis kaj forĵetis la glavojn kaj lancojn. Kvazaŭ nigra fumo pelata per fortiĝanta vento ili fuĝis. Ululante ili pasis en la atendantan ombron de la arboj; kaj el tiu ombro neniu el ili iam reaparis.

Ĉapitro 8

LA VOJO AL ISENGARDO

Tiel okazis ke en la lumo de bela mateno Reĝo Teodeno kaj Gandalfo la Blanka Rajdanto renkontiĝis denove sur la verda herbo apud la Profundaĵa Rojo. Tie estis ankaŭ Aragorno, filo de Aratorno, kaj Legolaso la elfo, kaj Erkenbrando el Ŭestfaldo, kaj la princoj de la Ora Domo. Ĉirkaŭ ili kuniĝis la rohananoj, la rajdistoj de Markio: miro venkis ilian ĝojon pro la venko kaj iliaj okuloj turniĝis al la arbaro.

Subite aŭdiĝis laŭta krio kaj descendis de la Ŝtonmuro tiuj, kiuj estis retropelitaj en la Profundaĵon. Venis Gamlingo la Maljuna kaj Eomero filo de Eomundo, kaj apud ili marŝis la gnomo Gimlio. Tiu havis neniun kaskon, kaj ĉirkaŭis lian kapon lina bandaĝo sango-makulita, sed lia voĉo laŭtis kaj fortis.

— Kvardek du, mastro Legolaso! — li kriis. — Ve! Mia hakilo estas noĉita: la kvardek-dua portis feran kolumon ĉe la gorgo. Kaj kiel ĉe vi?

— Vi superis per unu mian sumon, — respondis Legolaso. — Sed mi ne domaĝas al vi la ludon, ĉar mi tiom ĝojas revidi vin surkruran!

— Bonvenon, Eomero, fratina filo! — diris Teodeno. — Nun vidante vin sekura mi vere tre ĝojas.

— Saluton, Mastro de Markio! — diris Eomero. — La malluma nokto jam pasis, kaj la taglumo revenis. Sed tiu tago alportis novaĵojn strangajn. — Li turnis sin kaj rigardadis mire unue la arbaron kaj poste Gandalfon. — Ankoraŭfoje vi venis en la horo de bezono, ne-atendite, — li diris.

— Ĉu neatendite? — diris Gandalfo. — Mi diris, ke mi revenos kaj renkontos vin ĉi tie.

— Sed la horon vi ne difinis, nek antaŭdiris la kielon de via alveno. Helpon strangan vi kunvenigis. Vi estas sorĉiste potenca, Gandalfo la Blanka!

— Povas esti. Sed se jes, mi ankoraŭ ne montris tion. Mi nur havigis bonan konsilon en danĝera momento kaj utiligis la rapidecon de Ombrofakso. Pli multon faris via propra kuraĝo kaj la fortaj kruroj de la Ŭestfaldanoj tramarŝintaj la nokton.

Tiam ĉiuj rigardis Gandalfon eĉ pli funde mirantaj. Iuj ekrigardis sombre la arbaron, kaj pasigis siajn manojn trans la fruntojn kvazaŭ ili supozus, ke iliaj okuloj vidas malsame kiel liaj.

Gandolfo ridis longe kaj gaje:

— Ĉu la arboj? Nu, mi vidas tiel klare kiel vi la arbaron. Tio estas neniu faro mia. Tio estas afero ekster la kompetento de saĝuloj. Pli bona ol mia intenco kaj pli bona eĉ ol mia espero pruviĝis la evento.

— Do se ne via, kies la envulto? — demandis Teodeno. — Ne de Sarumano, tio estas evidenta. Ĉu ekzistas la saĝulo pli potenca pri kiu ni ankoraŭ ne sciiĝis?

— Ne temas pri envulto sed pri potenco multe pli malnova, — diris Gandolfo: — potenco, kiu trapromenis la teron antaŭ ol elfoj kantis aŭ marteloj sonoritis.

*Ol elmuldiĝis arb' aŭ fero,
sublune junis monta tero;
ol ringo aŭ dolor' maŝatis,
arbarojn prae ĝi paŝadis.*

— Kaj kio estas la solvo de via enigmo? — diris Teodeno.

— Se vi volas ekscii tion, vi devus akompani min al Isengardo, — respondis Gandolfo.

— Ĉu al Isengardo? — ili ekkriis.

— Jes, — diris Gandolfo. — Mi reiros al Isengardo, kaj kiuj volas, tiuj povos akompani min. Tie ni eble vidos strangajn aferojn.

— Sed ne troviĝas sufiĉaj viroj en Markio, eĉ se ili ĉiuj estus kunvokitaj kaj kuracitaj je l' vundoj kaj laceco, por ataki la fortikaĵon de Sarumano, — diris Teodeno.

— Tamen al Isengardo mi iros, — diris Gandolfo. — Ne longe mi restos tie. Mia vojo jam troviĝas orienten. Atendu min en Edoreso antaŭ la lunmalkresko!

— Ne! — diris Teodeno. — En la malluma horo antaŭ la tagiĝo mi dubis, sed ni jam ne disiĝos. Mi akompanos vin, se tion vi konsilas.

— Mi volas interparoli kun Sarumano kiel eble plej baldaŭ, — diris Gandolfo, — kaj pro tio ke li faris al vi grandan malutilon, estus inde se vi ĉeestus. Sed kiel baldaŭ kaj kiel rapide vi ekrajdos?

— Miaj viroj lacas pro la batalo, — diris la reĝo, — kaj ankaŭ mi estas laca. Ĉar mi longe rajdis kaj dormis malmulte. Ve! Mia maljuneco ne estas ŝajnigata nek rezultas de la flustroj de Vermlango. Ĝi estas malsano, kiun povas forigi neniu kuracisto, eĉ ne Gandolfo.

— Do ripozu nun ĉiuj, kiuj rajdos kun mi, — diris Gandolfo. — Mi ekvojaĝos sub ombro de la vespero. Tio estos konvena; ĉar mia konsilo estas, ke ekde nun niaj venoj kaj iroj estu laŭeble sekretaj. Sed ne ordonu, ke multaj akompanu vin, Teodeno. Ni iras por interparoli, ne por batali.

La reĝo elektis virojn, kiuj estis nevunditaj kaj posedis ĉevalojn rapidajn, kaj li forsendis ilin kun raporto pri la venko al ĉiu valo de Markio; kaj ili kunportis ankaŭ lian alvokon ordonantan, ke ĉiuj viroj, tiel junaj kiel maljunaj, venu haste al Edoraso. Tie la Mastro de Markio starigos kunvenon de ĉiuj kapablaj porti armilojn, je la dua tago post la plenluno. Por rajdi kun li al Isengardo la reĝo elektis Eomeron kaj dudek virojn el sia domanaro. Kun Gandolfo iros Aragorno, Legolaso kaj Gimlio. Malgraŭ sia vundo la gnomo ne konsentis postresti.

— Tio estis bato nur febla kaj la kasko flankenigis ĝin, — li diris. — Necesas pli ol tia orka grateto por deteni min.

— Mi prizorgos ĝin, dum vi ripozos, — diris Aragorno.

La reĝo nun reiris al Kornburgo kaj dormis tian trankvilan dormon, kian li dum multaj jaroj ne spertis, kaj ankaŭ la cetero de lia elektita grupo ripozis. Sed la aliaj, ĉiuj kiuj ne vundiĝis, komencis grandan taskon; ĉar multaj falis dum la batalo kaj kuŝis mortaj sur la batalkampo aŭ en la Profundaĵo.

Neniuj orkoj restis vivantaj; iliaj kadavroj ne estis kalkulitaj. Sed tre multaj el la montaranoj estis kapitulaciintaj; kaj tiuj timis kaj petegis indulgon.

La viroj de Markio forprenis ties armilojn kaj laborigis ilin.

— Helpu nun ripari la mison en kiu vi partoprenis, — diris Erkenbrando, — kaj poste vi ĵuros neniam plu transpasi armite la Travadejojn de Iseno, nek marŝi kun la malamikoj de l' homoj; kaj poste vi reiros liberaj al via lando. Ĉar vin trompis Sarumano. Multaj el vi ricevis la morton kiel rekompenco por via fido je li; sed se vi venkus, apenaŭ pli agrabla estus via salajro.

La viroj el Dunlando estis mirigitaj, ĉar Sarumano diris al ili, ke la rohananoj estas kruelaj kaj bruligas siajn kaptitojn vivantaj.

Meze de la kampo antaŭ Kornburgo du tumuloj estis kreitaj, kaj sub ili oni kuŝigis ĉiujn rajdistojn de Markio, kiuj falis en la defendo, tiujn el la Orientaj Valoj unuflanke kaj aliflanke tiujn el Ŭestfaldo. Sola en tombo sub ombro de Kornburgo kuŝis Hamo, estro de la reĝaj gvardianoj. Li mortis antaŭ la Pordego.

La orkojn oni staplis grandamase, for de la homaj teramasoj, ne malproksime de la arbarorando. Kaj la popolo mense ĝeniĝis; ĉar la amasoj da karnaĵo estis tro grandaj por enterigo aŭ bruligo. Malmulte da ligno ili havis por bruligi, kaj neniŭ aŭdacus ekhaki la strangajn arbojn, eĉ se Gandalfo ne avertus, ke ili domaĝu nek al arboŝelo nek al branĉoj pro la granda danĝero.

— Lasu kuŝi la orkojn, — diris Gandalfo. — Mateno eble alportos freŝan konsilon.

Posttagmeze la reĝa trupo pretiĝis foriri. La enteriga laboro nur komenciĝis; kaj Teodeno funebris pro la perdo de Hamo, lia kapitano, kaj ĵetis la unuan teron sur lian tombon.

— Grandan malutilon ja faris al mi Sarumano kaj al tiu ĉi tuta lando, — li diris, — kaj tion mi rememoros kiam ni renkontiĝos.

La suno jam proksimiĝis al la montetoj okcidente de la plataĵo, kiam finfine Teodeno kaj Gandalfo kaj iliaj kunuloj ekrajdis malsupren de la Ŝtonmuro. Malantaŭ ili staris kune granda homamaso, tiel el rajdistoj kiel el la popolo Ŭestfalda, maljunaj kaj junaj, virinoj kaj infanoj, kiuj venis el la kavernoj. Kanton pri venko ili kantis per klaraj voĉoj; kaj poste ili silentiĝis, scivolante kio okazos, ĉar iliaj okuloj direktiĝis al la arboj kaj tiujn ili timis.

La rajdistoj alvenis la arbaron kaj ili haltis; ĉevaloj kaj homoj ne volis eniri. La arboj estis grizaj kaj minacaj kaj ĉirkaŭis ilin ia ombro aŭ nebuleto. La ekstremoj de iliaj longaj disetenditaj branĉoj pendis suben kvazaŭ fingroj serĉemaj, iliaj radikoj elstaris sur la tero kvazaŭ membroj de strangaj monstroj, kaj malhelaj kavernoj apertis sub ili. Sed Gandalfo iris antaŭen, kondukante la kunularon, kaj kie la vojo el Kornburgo renkontis la arbojn, tie ili nun vidis malfermaĵon kiel arkan pordon sub fortegaj branĉoj; kaj tra ĝi pasis Gandalfo, kaj ili sekvis lin. Tiam mirigite ili konstatis, ke la vojo pluiras kaj apudas la Profundaĵa Rojo; kaj supre la ĉielo estis aperta kaj plena je ora lumo. Sed krepusko jam envolvis ambaŭflanke la grandajn flanknavojn de la arbaro, etendiĝantajn en nepenetreblajn ombrojn. Kaj tie oni aŭdis grincadon kaj ĝemadon de branĉoj, kaj forajn kriojn, kaj kole-ran murmuron de voĉoj senvortaj. Neniŭ orko aŭ alia vivantaĵo vid-eblis.

Legolaso kaj Gimlio nun rajdis kune sur unu ĉevalo; kaj ili restis proksime al Gandalfo, ĉar Gimlio timis la arbaron.

— Estas varmege ĉi tie, — diris Legolaso al Gandalfo. — Mi sentas

ĉirkaŭ mi koleregon. Ĉu vi ne sentas en viaj oreloj pulsadon de la aero?

- Jes, — diris Gandolfo.
- Kio okazis al la mizeraj orkoj? — demandis Legolaso.
- Tion, laŭ mia opinio, neniu iam scios, — diris Gandolfo.

Ili rajdis silente dum kelka tempo; sed Legolaso senĉese ekrigardis de flanko al flanko, kaj ofte haltus por aŭskulti la arbarajn sonojn, se tion permesus Gimlio.

— Jen estas la plej strangaj arboj, kiujn mi iam vidis, — li diris; — kaj mi vidis multajn kverkojn kreski de glanoj ĝis ruiniga maljuneco. Mi volas ke nun estu malhasto, ke mi povu promeni inter ili: ili havas voĉojn, kaj post kelka tempo mi eble ekkomprenus ilian pensadon.

— Ne, ne! — diris Gimlio. — Ni lasu ilin! Mi jam divenis ilian pensadon: malamegon al ĉio, kio marŝas dukrure; kaj ili parolas pri premado kaj strangolado.

— Ne al ĉio, kio marŝas dukrure, — diris Legolaso. — Pri tio mi opinias, ke vi malpravas. La orkojn ili malamegas. Ĉar ili ne indiĝenas ĉi tie kaj scias malmulton pri elfoj kaj homoj. Tre malproksimaj estas la valoj kie ili naskiĝis. El la profundaj valoj de Fangorno, Gimlio, de tie ili venis laŭ mia supozo.

— Sekve tio estas la plej danĝeroplena arbaro en Mez-Tero, — diris Gimlio. — Mi devus esti dankema pro la rolo ludita de ili, sed mi ne amas ilin. Vi eble taksas ilin mirindaj, sed pli grandan mirindaĵon mi vidis en tiu ĉi lando, pli belan ol iu ajn bosko aŭ arbara maldensejo iam ajn kreskintaj: mia koro estas ankoraŭ plena pro ĝi.

» Strangaj estas la moroj de la homoj, Legolaso! Ĉi tie oni havas unu el la mirindaĵoj de la Norda Mondo, kaj kion ili diras pri ĝi? Kavernoj, ili diras! Kavernoj! Truoj alfuĝindaj en milita tempo, en kiuj oni stoku furaĝon! Bona mia Legolaso, ĉu vi scias, ke la kavernoj en la Profundaĵo de Helmo estas vastaj kaj belaj? Okazus senfina pilgrimado de gnomoj, nur por rigardi ilin, se tiaj aferoj estus konataj. Jes, efektive, oni pagus per pura oro por mallonga ekrigardo!

— Kaj mi pagus per oro por esti forpermesata, — diris Legolaso, — kaj duoble tiom por esti liberigita, se mi hazarde envagus tien!

— Vi tion ne vidis, do mi pardonas vian ŝercon, — diris Gimlio. — Sed vi parolas stultulece. Ĉu vi taksas belaj tiujn halojn, en kiuj loĝas via reĝo sub la monteto en Mornarbaro, kies konstruadon kunhelpis antaŭ longe gnomoj? Ili estas nuraj domaĉoj kompare kun la

kavernoj, kiujn mi vidis ĉi tie: haloj nemezureblaj, plenigitaj de ĉiama muziko akva kiu tintas en laĝetojn, tiel bela kiel Ĥeled-Zaram en stela lumo.

» Kaj, Legolaso, kiam torĉoj estas ĉenditaj kaj homoj promenas sur la sablaj plankoj sub la eĥantaj kupoloj, ha! tiam, Legolaso, gemoj kaj kristaloj kaj vejnoj en valora erco ekbrilas en la poluritaj muroj; kaj lumo traardas tra falditaj marmoroj, konksimilaj, diafanaj kiel la vivaj manoj de reĝino Galadriela. Troviĝas kolonoj blankaj kaj safranaj kaj aŭrororuĝetaj, Legolaso, kanelitaj kaj torditaj je sonĝecaj formoj; ili abruptas supren de multkoloraj plankoj renkonte al la glimantaj pendaĵoj de la plafono: aloj, ŝnuroj, kurtenoj delikataj kiel glaciigintaj nuboj; lancoj, standardoj, pinakloj de pendigitaj palacoj! Senmovaj laĝoj spegulas ilin: glima mondo suprenrigardas el malhelaj laĝetoj kovritaj per klara vitro; tiaj urboj, kiajn la menso de Durino apenaŭ kapablas imagi dumdorme, plu etendiĝas tra avenuoj kaj pilastroj kortoj ĝis en nigrajn alkovojn, kien povas atingi neniom da lumo. Kaj tint! Falas arĝenta akvero, kaj la rondaj sulketoj en la vitro kurbigas kaj tremigas ĉiujn turojn kvazaŭ lolojn kaj koralojn en mara groto. Poste venas vespero: ili velkas kaj brilete estingiĝas; la torĉoj pluiras en alian ĉambron kaj alian revon. Ekzistas ĉambro post ĉambro, Legolaso; halo apertanta el halo, kupolo post kupolo, ŝtuparo post ŝtuparo; kaj daŭre la serpentumantaj padoj kondukadas en la kernon de la montego. Kavernoj! La Kavernoj de la Profundaĵo de Helmo! Feliĉa estis la hazardo, kiu pelis min tien! Plorigas min la forlaso.

— Do, mi deziras por vi jenan sorton por via konsolado, Gimlio, — diris la elfo, — ke vi eliru sendomaĝe el la milito kaj revenu por denove vidi ilin. Sed ne sciigu al via paren caro! Ŝajnas, ke restas malmulto kiun ili povas fari, laŭ via rakonto. Eble la homoj ĉi-landaj saĝe diras malmulton: unu familio da laboremaj gnomoj kun marteloj kaj ĉiziloj eble detruus pli ol ĝi kreus.

— Ne, vi ne komprenas, — diris Gimlio. — Neniu gnomo povus resti neemociita pro tia beleco. Neniu el la Durina raso minus tiujn kavernojn por ŝtonoj aŭ ercoj, eĉ ne se diamantoj kaj oro estus haveblaj tie. Ĉu vi detranĉas boskojn da florantaj arboj en la printempo por brulligno? Ni kulturis tiujn maldensejojn da floranta ŝtono, ne elhakus ilin. Per singarda lerto, frapeto post frapeto — rokereto kaj neniom pli, eble, dum tuta maltrankvila tago — tiel ni laborus, kaj kun paso de la jaroj ni aperigus novajn vojetojn kaj eksponus forajn ĉambrojn kiuj ankoraŭ mallumas, ekvideblaj nur kiel malplenaĵoj

post fendetoj sur la roko. Kaj lumoj, Legolaso! Ni kreus lumilojn, tiajn lampojn, kiaj iam brilis en Ĥazard-Dumo; kaj kiam ni volus, ni forpelus la nokton, kiu regas tie de kiam estis kreitaj la montoj; kaj kiam ni dezirus ripozi, ni permesus al la nokto reveni.

— Vi emocias min, Gimlio, — diris Legolaso. — Mi neniam antaŭe aŭdis vin tiel paroli. Vi preskaŭ igas min bedaŭri, ke tiujn kavernojn mi ne vidis. Ek! Ni interkonsentu — se ni ambaŭ revenos sendomaĝe el la danĝeroj nin atendantaj, ni vojaĝos dum kelka tempo kune. Vi vizitos kun mi Fangornon kaj poste mi akompanos vin por vidi la Profundaĵon de Helmo.

— Tiun revenvojon mi ne elektus, — diris Gimlio. — Sed mi tolerus Fangornon, se mi havus vian promeson reveni al la kavernoj kaj dividi kun mi ties mirindaĵojn.

— Vi havas mian promeson, — diris Legolaso. — Sed ve! Ni jam devos postlasi tiel la arbojn kiel la kavernojn dum kelka tempo. Vidu! Ni proksimiĝas al la fino de la arboj. Kiom longa vojo ĝis Isengardo, Gandalfo?

— Proksimume dek kvin leŭgoj, kiel flugas la korvoj de Sarumano, — diris Gandalfo: — kvin de la enirejo de Profundaĵa Platejo ĝis la Trapasejoj; kaj de tie dek pluaj ĝis la pordo de Isengardo. Sed ni ne rajdos la tutan vojon hodiaŭ nokte.

— Kaj kiam ni alvenos tien, kion ni vidos? — demandis Gimlio. — Vi eble scias, sed mi ne povas konjekti.

— Mi mem ne scias certe, — respondis la sorĉisto. — Mi estis tie hieraŭ je la noktiĝo, ŝed eble okazis multo depost tiam. Tamen mi opinias, ke vi ne taksos la vojaĝon vana — eĉ ne kvankam la briletaj Kavernoj de Aglarondo estas postlasitaj.

Finfine la trupo elpasis el la arbaro kaj konstatis, ke ili venis ĝis la fundo de la altaĵo, kie la vojo el Profundaĵo de Helmo disdubiĝis: unu-voje orienten al Edoraso, alivoje norden al la Travadejoj de Iseno. Kiam ili rajdis el sub la arborando Legolaso haltis kaj bedaŭre rerigardis. Tiam li eligis subitan ekkrion:

— Troviĝas okuloj! Okuloj elrigardas el la ombroj de la branĉoj! Mi neniam antaŭe vidis tiajn okulojn.

La aliaj, surprizitaj de lia krio, haltis kaj turniĝis; sed Legolaso komencis retrorajdi.

— Ne, ne! — kriis Gimlio. — Faru laŭplaĉe en via frenezeco, sed unue lasu min elseliĝi! Neniajn okulojn mi volas vidi!

— Restu, Legolaso Verdfolio! — diris Gandalfo. — Ne reiru en la arbaron. Ankoraŭ ne! Nun ne estas via tempo.

Ĝuste dum li parolis, venis antaŭen el inter la arboj tri strangaj figuroj. Tiel altaj kiel troloj ili estis, dek du futojn aŭ pli ilia alto; iliaj fortaj korpoj, fortikaj kiel junaj arboj, ŝajnis vestitaj per robo aŭ felo el dense alĝustigitaj grizo kaj bruno. Iliaj membroj estis longaj, kaj iliaj manoj estis multfingraj; iliaj haroj estis rigidaj kaj iliaj barboj estis muskece grizverdaj. Ili elrigardis per okuloj gravmienaj, sed ne la rajdistojn ili rigardis; iliaj okuloj turniĝis norden. Subite ili levis siajn longajn manojn al la buŝoj kaj eligis sonorajn kriojn, klarajn kiel notoj de korno, sed pli muzikaj kaj variaj. La krioj estis responditaj; kaj returniĝinte la rajdistoj vidis pliajn kreaĵojn samspecajn proksimiĝi, paŝantaj tra la herbo. Ili venis rapide el la nordo, paŝante simile al vadantaj ardeoj, sed ne samrapide; ĉar la longpaŝaj kruroj taktis pli rapide ol ardeaj flugiloj. La rajdistoj pro miro laŭte ekkriis, kaj kelkaj metis manon al siaj glavteniloj.

— Armilojn vi ne bezonas, — diris Gandalfo. — Tiuj estas nuraj paŝtistoj, efektive ili tute ne interesiĝas pri ni.

Ŝajnis esti tiel; ĉar dum li parolis, la altuloj sen ekrigardo al la rajdistoj enpaŝis la arbaron kaj malaperis.

— Paŝtistoj! — diris Teodeno. — Kie estas iliaj gregoj? Kio ili estas, Gandalfo? Ĉar estas klare, ke almenaŭ al vi ili ne estas nekonataj.

— Ili estas paŝtistoj de la arboj, — respondis Gandalfo. — Ĉu pasis tiom da tempo, de kiam vi aŭskultis rakontojn apudfajruje? Troviĝas en via lando infanoj, kiuj el torditaj rakontofadenoj sciis elpinĉi la respondon al via demando. Entojn vi ĵus vidis, ho reĝo, entojn el la Fangorna Arbarego, kiun vialingve oni nomas la Entarbaro. Ĉu vi supozis tiun nomon donita nur pro sencela fantazio? Ne, Teodeno, estas alie: por ili vi estas nur la pasema historio; ĉiuj jaroj de Eorlo la Juna ĝis Teodeno la Maljuna malmulte kalkuliĝas por ili; kaj ĉiuj faroj de via domo estas negrava afero.

La reĝo silentis.

— Entoj! — li diris finfine. — El la ombroj de legendo mi komencas iomete kompreni la mirindaĵon de l' arboj, ŝajnas al mi. Mi ĝisvivis tagojn strangajn. Jam longe ni paŝtigis niajn bestojn kaj kultivis niajn kampojn, konstruis niajn domojn, faris niajn laborilojn, aŭ forrajdis por helpi pri la militoj de Minaso Tirit. Kaj tion ni nomis la vivo de l' homoj, la moraro de la mondo. Nin malmulte koncernis tio, kio

ekzistis ekster la limoj de nia lando. Kantojn ni havas, kiuj pritraktas tiajn aferojn, sed tiujn ni forgesas, instruante ilin nur al infanoj laŭ malzorga kutimo. Kaj nun descendis la kantoj inter nin el strangaj lokoj kaj iras videblaj sub la suno.

— Vi devus ĝoji, reĝo Teodeno, — diris Gandolfo. — Ĉar ne nur la eta vivo de la homoj estas nun endanĝerigita, sed ankaŭ la vivo de tiuj kreaĵoj, kiujn vi supozis legenda afero. Vi ne malhavas aliancanojn, eĉ se tiujn vi ne konas.

— Tamen mi devus ankaŭ tristi, — diris Teodeno. — Ĉar kiel ajn rezultigos la milita fortune, ĉu ĝi eble ne tiel finiĝos, ke multo antaŭe bela kaj miriga, jam por ĉiam forpasos el Mez-Tero?

— Povas esti, — diris Gandolfo. — La malvirto de Saŭrono ne povas esti komplete rebonigita, nek farita kvazaŭ neniam estinta. Sed al tiaj tagoj ni estas kondamnitaj. Ni nun daŭrigu la komencitan vojaĝon!

La trupo tiam forturniĝis de la plataĵo kaj de la arbaro kaj sekvis la vojon direkte al la Travadejoj. Legolaso sekvis malvolonte. La suno estis for, jam sinkinta malantaŭ la randon de la mondo, sed kiam ili elrajdis el la ombro de la montetoj kaj rigardis okcidenten al Breĉo de Rohano la ĉielo ankoraŭ ruĝis, kaj sub la flosantaj nuboj estis brulanta lumo. Malhelaj kontraŭ ĝi fluge rondiris multaj nigraflugilaj birdoj. Iuj preterpasis supre kun mornaj krioj, reirante al siaj hejmoj inter la rokoj.

— La karnomanĝantoj okupiĝis en la batalkampo, — diris Eomero.

Ili nun rajdis malurĝe, kaj mallumo volvis ĉirkaŭ ili la ebenajon. La lanta luno supreniris, jam kreskinta al la pleno, kaj en ties frida arĝenta lumo la ŝvelaj herbejoj leviĝis kaj falis kvazaŭ larĝa griza maro. Ili rajdis proksimume kvar horojn ekde la voja disdubiĝo kiam ili proksimiĝis al la Travadejoj. Longaj deklivoj descendis rapide ĝis kie la rivero larĝiĝis en ŝtonozaj malprofundaĵoj inter altaj herbaj terasoj. Portatan per la vento ili aŭdis ululadon de lupoj. Iliaj koroj estis pezaj pro memoro pri la multaj homoj, kiuj batalpereis ĉi-loke.

La vojo subeniris inter supreniĝaj torfaroj, tranĉe penetrante la terasojn ĝis rando de l' rivero kaj denove supren aliflanke. Troviĝis tri vicoj da plataj paŝoŝtonoj tra la fluo, kaj inter ili vadejoj por ĉevaloj, kiuj kondukis de ambaŭ randoj ĝis meza insuleto. La rajdistoj rigardis suben al la transirejoj, kaj ŝajnis al ili strange; ĉar la Travadejoj ĉiam estis loko plena je rapido kaj babilo de transŝtona akvo; sed nun ili

estis silentaj. La fundoj de la rivereto estis preskaŭ sekaj, nuda dezert-ejo el rulŝtonetoj kaj griza sablo.

— Ĝi jam iĝis loko senĝoja, — diris Eomero. — Kia malsano trafis la riveron? Multajn belaĵojn detruis Sarumano: ĉu li ankaŭ voris la fontojn de Iseno?

— Ŝajnas, ke jes, — diris Gandolfo.

— Ve! — diris Teodeno. — Ĉu ni devas iri ĉi-voje, kie la karnomangantoj voras tiom da bravaj rajdistoj el Markio?

— Ĝi estas nia vojo, — diris Gandolfo. — Plorinda estas la perejo de viaj viroj; sed vi vidis almenaŭ ke la montaraj lupoj ne voras ilin. Per siaj amikoj, la orkoj, ili aranĝas sian feston: tia fakte estas la amikeco de ilia specio. Venu!

Ili descendis al la rivero, kaj kiam ili venis, la lupoj ĉesigis sian ululadon kaj forŝteliĝis. Timo trafis ilin, kiam ili vidis Gandalfon en la lunlumo kaj lian ĉevalon Ombrofakso brilanta kiel arĝento. La rajdistoj transpasis ĝis la insuleto, kaj ekbrilaj okuloj rigardis ilin pale el la ombroj de la bordoj.

— Vidu! — diris Gandolfo. — Ĉi tie laboris amikoj.

Kaj ili vidis, ke meze de la insuleto estis teramaso ĉirkaŭita per ŝtonoj kaj ĉirkaŭfermita per multaj lancoj.

— Ĉi tie kuŝas ĉiuj viroj de Markio, kiuj pereis apude, — diris Gandolfo.

— Ĉi tie ili ripozu! — diris Eomero. — Kaj kiam iliaj lancoj estos putrintaj kaj rustiĝintaj, ilia teramaso longe staru gardante la Travadejojn de Iseno!

— Ĉu tiu ĉi faro ankaŭ estas via, Gandolfo mia amiko? — demandis Teodeno. — Vi multon plenumis dum unu vespero kaj unu nokto!

— Per helpo de Ombrofakso... kaj de aliaj, — diris Gandolfo. — Mi rajdis fore kaj longe. Sed ĉi tie apud la teramaso mi volas diri jenon por via konsolo: multaj pereis dum la bataloj ĉe la Travadejoj, sed malpli ol onidiroj kalkulis. Pli multaj estis disigitaj ol mortigitaj; mi kunigis ĉiujn, kiujn mi sukcesis trovi. Iujn mi sendis kun Grimboldo el Ŭestfaldo aliĝe al Erkenbrando; iujn mi ordonis al tiu ĉi laboro kiun vi vidas, kaj tiuj jam reiris kape kun via marŝalo Elfhelmo al Edoraso. Ankaŭ multajn aliajn mi pli frue sendis tien por gardi vian domon. Mi sciis, ke Sarumano sendis kontraŭ vin sian tutan forton, kaj liaj servantoj deviis de ĉiuj ceteraj taskoj kaj iris al la Profundaĵo de Helmo; la landoj ŝajnis malplenaj de malamikoj; tamen mi timis, ke luprajdistoj kaj kaperistoj malgraŭ tio rajdos al Meduseldo, dum ĝi estas

nedefendata. Sed jam laŭ mia opinio ne necesas, ke vi timu! Vi trovos vian domon bonveniganta vian revenon.

— Kaj ĝoja mi estos revidante ĝin, — diris Teodeno, — kvankam jam mallonga estos mia restado tie, sendube.

Tiam la trupo adiaŭis la insuleton kaj la teramason, kaj transiris la riveron kaj supreniris la kontraŭan bordon. Poste ili rajdis plu, feliĉaj ke ili forlasis la mornajn Travadejojn. Post ilia foriro reaŭdiĝis la ululado de la lupoj.

Ekzistis antikva ĉefvojo kondukanta de Isengardo al la Travadejoj. Dum kelka tempo ĝi akompanis la riveron, kurbiĝante apud ĝi orienten kaj poste norden; sed finfine ĝi forturniĝis kaj kondukis rekte al la pordego de Isengardo; kaj tiu troviĝis sub la montoflanko okcidente de la valo, dek ses mejlojn aŭ pli de ĝia elirejo. Tiun vojon ili sekvis, sed ili ne rajdis sur ĝi; ĉar la apuda tero estis firma kaj ebena, kovrita multmejele de mallonga resalta herbo. Ili rajdis jam pli rapide, kaj je noktomezo la Travadejoj estis je preskaŭ kvin leŭgoj malantaŭe. Tiam ili haltis, kompletigante la tiunoktan vojaĝon, ĉar la reĝo estis laca. Ili atingis la subon de la Nebulecaj Montoj, kaj la longaj brakoj de Nan Kuruniro etendiĝis suben renkonte al ili. Senluma kuŝis la valetio antaŭ ili, ĉar la luno jam pasis okcidenten kaj ties lumon kaŝis la montetoj. Sed el la profunda ombro de la valo leviĝis larĝa spiralo el fumo kaj vapore; supreniĝante ĝi allogis la radiojn de l' sinkanta luno kaj disvastiĝis laŭ muaraj ondoj, nigraj kaj arĝentaj, sur la stelplena ĉielo.

— Kion vi opinias pri tio, Gandolfo? — demandis Aragorno. — Oni supozus, ke la tuta Sorĉista Valo brulas.

— Nuntempe ĉiam estas nebulaĵo super tiu valo, — diris Eomero: — sed mi neniam antaŭe vidis ion tian. Tiuj estas pli vaporoj ol fumoj. Sarumano pretigas ian demoniĝon por saluti nin. Eble li boligas la tutan akvon de Iseno kaj tial la rivero forsekiĝas.

— Eble tion li faras, — diris Gandolfo. — Morgaŭ ni ekscios, kion li ja faras. Nun ni ripozu iom, se ni povos.

Ili bivakis apud la fluejo de l' Isena rivero; ĝi estis ankoraŭ silenta kaj malplena. Kelkaj el ili dormis iomete. Sed malfrue en la nokto la sentineloj ekkriis, kaj ĉiuj vekiĝis. La luno estis for. Steloj brilis supre; sed super la tero rampis mallumo pli nigra ol la nokto. Ambaŭflanke de l' rivero ĝi ruliĝis al ili, irante norden.

— Restu kie vi estas! — diris Gandolfo. — Neniun armilon elingigu! Atendu! Kaj ĝi preterpasos vin.

Nebuleto ĉirkaŭvolvis ilin. Supre kelkaj steloj plu brilis malforte;

sed ambaŭflanke leviĝis muroj el nepenetrebla morno; ili estis en mallarĝa koridoro inter moviĝantaj ombroturoj. Voĉojn ili aŭdis, flustrojn, ĝemojn kaj senfinan siblan suspiradon; la tero skuiĝis sube. Ŝajnis al ili longe, dum ili sidis kaj timis; sed finfine la mallumo kaj la rumoro pasis, kaj malaperis inter la brakojn de la monto.

En la sudo ĉe Kornburgo noktomeze la homoj aŭdis grandan bruon, kaj neniu riskis eliri. Sed matene ili eliris kaj estis mirigitaj; ĉar la mortigitaj orkoj estis for, kaj ankaŭ la arboj. Malproksime sube en la valo de la Profundaĵo la herbo estis depremita kaj trample brunigita, kvazaŭ gigantaj paŝtistoj tie paŝtintus gregojn da bovoj; sed unu mejlon sube de la Ŝtonmuro, truego estis fosita en la tero, kaj sur ĝi ŝtonoj estis alte amasigitaj. La homoj kredis, ke la mortigitaj orkoj estis enterigitaj tie; sed ĉu tiuj kiuj fuĝis en la arbaron estis kun ili, neniu povis diri, ĉar neniu iam ajn metis piedon sur tiun ŝtonamason. La Morta Monteto oni poste nomis ĝin, kaj neniu herbo kreskis tie. Sed la strangaj arboj neniam plu estis viditaj en la Profunda Kavaĵo; ili reiris nokte kaj marŝis malproksimen ĝis la malhelaj montetoj de Fangorno. Tiel ili venĝis sin kontraŭ la orkoj.

La reĝo kaj lia trupo tiunokte ne plu dormis; sed neniun alian strangajon ili vidis kaj aŭdis, krom unu: la voĉo de l' apuda rivero subite vekiĝis. Okazis fluado de akvo rapidanta suben inter la ŝtonoj; kaj kiam tiu pasis, Iseno fluis kaj bobelis denove en sia fluejo, kiel ĝi kutimis.

Je tagiĝo ili pretigis sin pluri. La lumo venis griza kaj pala, kaj ili ne vidis la leviĝon de la suno. La aero supre estis peze nebula, kaj fumaĵo kuŝis sur la ĉirkaŭa tero. Ili iris malrapide, rajdante jam sur la ĉefvojo. Tiu estis larĝa kaj malmola, kaj bone prizorgita. Malklare tra la nebulo videblis la longa montobrako leviĝanta maldekstre. Ili pasis en Nan Kuruniron, la Sorĉistan Valon. Ĝi estis valo ĉirkaŭmurita, aperta nur al la sudo. Iam ĝi estis bela kaj verda, kaj tra ĝi fluis Iseno, jam profunda kaj forta antaŭ ol trovi la ebenaĵon; ĉar ĝin nutris multaj fontoj kaj rojetoj inter la pluvumitaj montetoj, kaj ĉie ĉirkaŭe kuŝis agrabla fekunda tereno.

Ne plu estis tiel. Sub la muroj de Isengardo ankoraŭ estis akreoj kultivataj de la Sarumanaj sklavo; sed la plejparto de la valo iĝis sovaĝejo el loloj kaj dornoj. Rubusoj etendiĝis sur la tero aŭ transgrimpinte sur veprejoj kreis hirtajn kavetojn kie loĝis bestetoj. Tie

kreskis neniuj arboj; sed inter la mucidaj herboj plu videblis la bruligitaj kaj hakitaj stumpoj de antikvaj boskoj. Tiu estis tereno trista, nun silenta krom la ŝtona bruo de hastaj akvoĵoj. Fumoj kaj vaporoj drivis morozanube kaj kaŭris en kavetoj. La rajdistoj ne parolis. Multaj dubemis en la koro, scivolante ĝis kia mizera fino kondukas la vojaĝo.

Post kiam ili rajdis kelkajn mejlojn, la vojo iĝis larĝa strato pavimita per grandaj plataj ŝtonoj kvadrataj kaj sperte almetitaj; neniuj herbero vidiĝis ĉe ajna junto. Profundaj defluiloj plenaj je malrapida akvo subeniris ambaŭflanke. Alta pilastro subite baŭmis antaŭ ili. Ĝi estis nigra, kaj sur ĝi estis metita ŝtonego ĉizita kaj pentrita laŭ formo de longa blanka mano. Ties fingro indikis norden. Ili sciis, ke jam ne malproksime devas stari la pordo de Isengardo, kaj iliaj koroj estis pezaj; sed iliaj okuloj ne povis trapiki la nebuletojn antaŭe.

Sub la montobrado en la Sorĉista Valo dum nekalkuleblaj jaroj situis tiu antikva loko kiun la homoj nomas Isengardo. Parte ĝin formis la kreado de la montoj, sed grandiozajn laboraĵojn pratempe faris tie la homoj de Okcidentio, kaj longe loĝadis tie Sarumano kaj ne maldiligentis.

Jen estas ĝia fasono, dum superregis Sarumano, de multaj taksata la ĉefo de sorĉistoj. Granda ringmuro el ŝtono kvazaŭ turecaj klifoj elstaris el la ŝirmo de la montflanko, de kiu ĝi etendiĝis kaj poste revenis. Nur unu enirejon oni faris en ĝi, grandan arkaĵon elfositan en la suda muro. Tie tra la nigra rokaĵo tunelo longa estis elhakita, fermita ambaŭflanke per fortikaj pordegoj el fero. Ili estis tiel konstruitaj kaj pendigitaj sur la grandaj ĉarniroj, ŝtalaj fostoj enbatitaj en la vivan ŝtonon, ke malbaritajn oni povis movi ilin per malforta puŝo per la brakoj, senbrue. Tiu, kiu enpaŝis kaj finfine eliĝis el la eĥoplana tunelo, vidis ebenaĵon, grandan cirklon, iomete kavigitan kvazaŭ vasta malprofunda kuvo: mejlon ĝi mezuris de rando al rando. Iam ĝi estis verda kaj plena je aleoj kaj boskoj da fekundaj arboj, akvumitaj per rojoj fluantaj de la montoj en lagon. Sed tie kreskis neniuj verdaĵoj dum la lastaj tagoj de Sarumano. La vojojn pavimis slaboj, malhelaj kaj duraj; kaj apud ili anstataŭ arboj sinsekvis longaj linioj de pilastroj, iuj marmoraj, iuj kupraj aŭ feraj, kunligitaj per pezaj ĉenoj.

Multaj domoj estis, ĉambroj, haloj kaj koridoroj, elhakitaj kaj tuneligitaj en la muroj internaflanke, tiel ke la tutan apertan cirklon alfrontis sennombraj fenestroj kaj malhelaj pordegoj. Miloj povis loĝi tie, laboristoj, servistoj, sklavoĵoj kaj militistoj kun granda stoko de

armiloj; lupojn oni manĝigis kaj enstaligis en profundaj bestejoj sube. Ankaŭ la ebenaĵo estis traborita kaj fosita. Ŝaktoj estis boritaj profunde en la teron; ties supraĵn ekstremojn kovris malaltaj teramasoj kaj ŝtonaj domoj, tiel ke en lunlumo la Ringo de Isengardo aspektis kiel tombejo de malmortaj mortintoj. Ĉar la tero tremis. La ŝaktoj descendis laŭ multaj deklivoj kaj spiralaj ŝtuparoj ĝis kavernoj en la suba subo; tie Sarumano havis trezorejojn, konservejojn, armilejojn, forĝejojn kaj fornegojn. Feraj radoj senĉese turniĝadis tie kaj marteloj batsonis obtuze. Dumnokte plumaroj da vaporo eliĝis tra la aperturoj, desube lumigitaj de lumo ruĝa, blua aŭ venene verda.

Al la centro ĉiuj vojoj direktiĝis inter siaj ĉenaroj. Tie staris turo mirinde formita. Ĝin konstruis la metiistoj en pratempo, kiuj glatigis la Ringon de Isengardo, kaj tamen ĝi ŝajnis aĵo ne farita per la lerto de la homoj, sed ŝirita el ostoj de la tero dum la antikva turmentado de la montetoj. Pinto kaj insulo el roko ĝi estis, nigra kaj glime dura: kvar fortikaj pilieroj el multflanka ŝtono estis velde unuigitaj, sed proksime al la supro ili malfermiĝis al gapaj kornoj, kies pinakloj akris kiel pintoj de lancoj, akreĝis kiel tranĉiloj. Inter tiuj estis mallarĝa spaco, kaj tie sur planko el polurita ŝtono, surskribita je strangaj signoj, oni povis stari je kvincent futoj super la ebenaĵo. Ĝi estis Ortanko, la citadelo de Sarumano, kies nomo havis (intence aŭ hazarde) duoblan signifon; ĉar en la elfa lingvo *ortank* signifas Monto Dentego, sed en la praa lingvo de Markio: Ruza Menso.

Loko forta kaj mirinda estis Isengardo, kaj longe ĝi estis bela; kaj tie iam loĝis gravaj mastroj, kuratoroj de Gondoro okcidente, kaj saĝuloj kiuj observis la stelojn. Sed Sarumano malrapide formis ĝin laŭ siaj ŝanceliĝaj celoj, kaj plibonigis ĝin laŭ sia supozo, estante trompita — ĉar ĉiuj artoj kaj subtilaj rimedoj, por kiuj li rezignis pri sia antaŭa saĝeco, kaj kiujn li trompote supozis propraj, nur venis el Mordoro; do tio kion li kreis estis nulaĵo, nur eta kopio, infana ludilo aŭ sklava flato, de tiu giganta fortekejo, armejo, karcero, forno de granda potenco Baraduro, la Malhela Turego, kiu permesis nenium rivalon kaj priridis flatadon, atendante propran momenton, sekura en sia fiero kaj sia nemezurebla forto.

Tio estis la fortekejo de Sarumano laŭ onidira raporto; ĉar en memoro de la vivantoj la homoj el Rohano ne eniris ĝian pordon, krom eble kelkaj, ekzemple Vermlango, kiuj venis sekrete kaj sciigis al neniu, kion ili vidis.

Nun Gandolfo rajdis al la granda pilastro de la Mano kaj preterpasis ĝin; kaj kiam li faris tion, la mirigitaj rajdistoj vidis, ke la Mano jam ne aspektas blanka. Ĝi estis makulita kvazaŭ de sekiĝinta sango; kaj pli proksimen rigardante ili konstatis, ke ĝiaj ungoj estas ruĝaj. Senatente Gandolfo plu rajdis en la nebuleton, kaj malvolonte ili sekvis lin. Nun ĉirkaŭ ili, kvazaŭ okazus subita inundo, kuŝis larĝaj flakoj apud la ŝoseo, plenigante la kavaĵojn, kaj rojetoj defluis inter la ŝtonoj.

Finfine Gandolfo haltis kaj fingrovokis ilin; kaj ili alvenis kaj vidis, ke post li foriĝis la nebuletoj kaj brilis pala sunlumo. Jam pasis la tagmeza horo. Ili jam atingis la pordegon de Isengardo.

Sed la pordego kuŝis ĵetegita kaj tordita sur la tero. Kaj ĉie ĉirkaŭe ŝtono, fendita kaj diserigita en formo de sennombraj akrangulaj pecoj, estis diserigita foren aŭ amasigita ruine. Ankoraŭ staris la granda arkaĵo, sed ĝi nun malfermiĝis al senplafona abismo: la tunelo estis vidigita, kaj en la klifsimilaj muroj ambaŭflanke estis elŝiritaj fendegoj kaj breĉoj; ties turoj estis polvigitaj. Se la Granda Maro kole-re leviĝus kaj ŝtorme falus sur la montetojn, tio ne kaŭzus pli grandan ruiniĝon.

La antaŭa ringo estis plena je vaporanta akvo: bobela kaldrono, en kiu ondiĝis kaj floris vrakaĵo el traboj kaj stangoj, kestoj kaj bareloj kaj rompitaĵaj varoj. Torditaj kaj kliniĝantaj pilastroj levis siajn rompitajn pintojn super la inundo, sed ĉiuj vojoj estis dronigitaj. Malproksime, ŝajne duonvualite per ondumanta nubo, baŭmis la insula roko. Ankoraŭ malhela kaj alta, nerompita per la ŝtormo, staris la turego Ortanko. Palaj akvoj plaŭdis ĉirkaŭ ĝia subo.

La reĝo kaj ties tuta trupo sidis silentaj sur siaj ĉevaloj, mirante, konstatante, ke la potenco de Sarumano estas renversita; sed la kielon ili ne povis konjekti. Kaj nun ili turnis la rigardon al la arkaĵo kaj la ruinigita pordego. Tie ili vidis apude grandan rubamason; kaj subite ili konsciiĝis pri du etaj figuroj senzorge kuŝantaj sur ĝi, grize vestitaj, apenaŭ videblaj inter la ŝtonoj. Apud ili estis boteloj kaj bovloj kaj pletoj demetitaj, kvazaŭ ili ĵus bone manĝis kaj nun ripozis post la laboro. Unu ŝajnis dormanta; la alia kun kruĉmetitaj kruroj kaj brakoj postmetitaj al la kapo apogis sian dorson per rompita roko kaj sendis el la buŝo longajn striojn kaj etajn ringojn da fumo maldense blua.

Momente Teodeno, Eomero kaj ĉiuj viroj mire rigardadis ilin. El la tuta ruiniĝo de Isengardo tio ŝajnis al ili la plej stranga vidaĵo. Sed

antaŭ ol la reĝo povis ekparoli, la eta fumspira figuro subite konsciĝis pri ili, dum ili sidis tie silente je rando de la nebuleto. Li salte stariĝis. Li aspektis junule aŭ junulsimile, kvankam laŭ staturu nemulte pli ol duonhome alta; lia kapo kun bruna bukla hararo estis nekovrita, sed li estis vestita per vojaĝmakulita mantelo samkolora kaj samfasona kiam portis la kunuloj de Gandalfo, kiam ili rajdis al Eodoraso. Li tre malalten riverencis, metante manon al sia brusto. Poste, ŝajnante ne rimarki la sorĉiston kaj ties amikojn, li turnis sin al Eomero kaj la reĝo.

— Bonvenon, mastroj, al Isengardo! — li diris. — Ni estas la pordogardistoj. Gajadoko, filo de Saradoko, estas mia nomo. Kaj mia kunulo, kiu ve! cedis al laceco, — tiam li piedpuŝis la alian, — estas Peregrino, filo de Paladino, el la domo de Tjuko. Malproksima en la nordo estas nia hejmo. Mastro Sarumano estas interne; se ĉi-momente li ne estus enfermita kun iu Vermlango, sendube li estus ĉi tie por bonvenigi tiel honorindajn gastojn.

— Sendube tiel! — ridis Gandalfo. — Kaj ĉu estis Sarumano kiu ordonis, ke vi gardu lian damaĝitan pordegon kaj atendu la alvenon de gastoj, kiam vian atenton vi povus forturni de pletoj kaj boteloj?

— Ne, bona sinjoro, tiun aferon li forgesis, — respondis Gaja seriozmiene. — Li estas multe okupita. Niaj ordonoj venis de Arbo-barbo, kiu transprenis prizorgon de Isengardo. Li ordonis, ke mi bonvenigu la Mastron de Rohano per konvenaj vortoj. Mi faris mian plejblon.

— Kaj kio pri viaj kunuloj? Kio pri Legolaso kaj mi? — kriis Gimlio, ne povante sin reteni pli longe. — Friponoj, vi lanpiedaj kaj lan-kapaj forvagintoj! Belan persekuton vi trudis al ni! Ducent leŭgojn tra marĉoj kaj arbaro, batalo kaj morto, por elsavi vin! Kaj jen ni trovas vin bankedantaj kaj pigrumantaj — kaj fumantaj! Fumantaj! Kie vi akiris la pipherbon, kanajloj? Je martel' kaj amboso! Mi estas tiel ŝirita pro kolerio kaj ĝojo, ke estos mirinde se mi ne krevos!

— Vi parolas ankaŭ mianome, Gimlio, — ridis Legolaso. — Tamen mi prefere sciĝus, kiel ili akiris la vinon.

— Unu aferon vi ne trovis dum via persekutado, kaj tio estas pli trafa spriteco, — diris Grinĉjo malfermante unu okulon. — Jen vi trovas nin sur venka batalejo inter la kaperaĵo de armeoj, kaj vi scivolas kiel ni akiris kelkajn merititajn konsolaĵojn!

— Ĉu merititajn? — diris Gimlio. — Tion mi ne kredas!

La rajdistoj ridis.

— Ne dubeblas, ke ni ĉeestas renkontiĝon de karaj amikoj, — diris Teodeno. — Do tiuj estas la perditoj el via kunularo, Gandolfo, ĉu? La sorto de la tagoj estas pleniĝi je mirindaĵoj. Mi jam vidis multajn, post kiam mi forlasis mian domon; kaj jen jam antaŭ miaj okuloj staras ankoraŭ unu el la popoloj legendaj. Ĉu tiuj ne estas la duonuloj, kiujn kelkaj inter ni nomas holbitoj?

— Hobitoj, mi petas, mastro, — diris Grinĉjo.

— Ĉu hobitoj? — diris Teodeno. — Via lingvo strange ŝanĝiĝis; sed la nomo sonas tiel ne maltaŭga. Hobitoj! Neniu raporto aŭdita de mi traktas juste la veron.

Gaja riverencis; kaj Grinĉjo stariĝis kaj profunde riverencis.

— Vi bonvolas, mastro; aŭ espreble mi rajtas tiel interpreti viajn vortojn, — li diris. — Kaj jen alia mirindaĵo! Mi vagis en multaj landoj post la forlaso de mia hejmo kaj mi neniam ĝis nun trovis popolon konantan iun ajn historion pri la hobitoj.

— Mia popolo antaŭ tre longe elvenis el la nordo, — diris Teodeno. — Sed mi ne trompos vin: ni konas neniujn rakontojn pri hobitoj. Inter ni estas dirate, ke nur tre malproksime, trans multaj montetoj kaj riveroj, estas duonula popolo loĝanta en truoj en sablodunoj. Sed mankas legendoj pri ties faroj, ĉar oni diras, ke ili faras malmulton, evitas vidiĝi al la homoj, ĉar ili kapablas malaperi palpebrum-rapide; kaj ili povas ŝanĝi siajn voĉojn por simili la ĉirpadon de birdoj. Sed ŝajnas, ke pli estas direbla.

— Vere tiel estas, mastro, — diris Gaja.

— Ekzemple, — diris Teodeno, — mi ne aŭdis, ke ili sputas fumon el siaj buŝoj.

— Ne surprize, — respondis Gaja, — ĉar tio estas arto kiun ni praktikas dum ne pli ol kelkaj generacioj. Estis Toboldo Kornblovulo el Longfundo en la Sud-kvarono, kiu la unua kultivis la malfalsan pip-herbon en siaj ĝardenoj ĉirkaŭ la jaro 1070 laŭ nia datumo. Kiel maljuna Toĉjo akiris la plantaĵon...

— Vi ne komprenas vian endanĝeriĝon, Teodeno, — interrompis Gandolfo. — Tiuj hobitoj pretas sidi rando de ruino kaj diskuti la plezurojn de la manĝotablo, aŭ la bagatelajn agojn de siaj patroj, avoj, praavoj kaj gekuzoj ĝis la naŭa grado, se vi kuraĝigas ilin per troa pacienco. Iu alia tempo estus pli konvena por la historio de fumado. Kie estas Arbobarbo, Gaja?

— Fore ĉe la norda flanko, laŭ mia supozo. Li iris trovi trinkon — da pura akvo. La pli multaj aliaj entoj estas kun li, ankoraŭ farante

sian laboron — jen tie. — Gaja gestis per sia mano al la vaporanta lago; kaj rigardante ili aŭdis foran murmuradon kaj klakadon, kvazaŭ lavango falus de la montflanko. Malproksime aŭdiĝis *hum-hum*, kvazaŭ de kornoj triumfe blovataj.

— Kaj ĉu do Ortanko estas sengarde lasita? — demandis Gandolfo.

— Estas la akvo, — diris Gaja. — Sed Rapidtrunko kaj kelkaj aliaj privaĉas ĝin. Ne ĉiuj ĉi fostoj kaj pilastroj sur la ebenaĵo estas starigitaj de Sarumano. Rapidtrunko, mi opinias, estas apud la roko proksime al la ŝtupara subo.

— Jes, alta griza ento troviĝas tie, — diris Legolaso, — sed liaj brakoj apudas la flankojn kaj li staras senmova kiel pordofosto.

— Estas post la tagmezo, — diris Gandolfo, — kaj ni, almenaŭ, ne manĝis post la frumateno. Tamen mi volas laŭeble baldaŭ interparoli kun Arbobarbo. Ĉu li ne lasis por mi mesaĝon, aŭ ĉu pletoj kaj boteloj forpelis ĝin el via menso?

— Mesaĝon li postlasis, — diris Gaja, — kaj mi intencis diri ĝin, sed malhelpis min multaj aliaj demandoj. Mi devis diri ke, se la Mastro de Markio kaj Gandolfo rajdos ĝis la norda muro, ili tie trovos Arbobarbon, kaj li bonvenigos ilin. Mi rajtas aldoni, ke ili trovos ankaŭ plej altkvalitan nutraĵon tie, ĉar ĝin trovis kaj elektis viaj humilaj servantoj. — Li riverencis.

Gandolfo ridis:

— Jam pli bone! Nu, Teodeno, ĉu vi rajdos kun mi por trovi Arbobarbon? Ni devas ĉirkaŭiri, sed ne estas malproksime. Kiam vi vidos Arbobarbon, vi lernos multon. Ĉar Arbobarbo estas Fangorno, la plej aĝa kaj ĉefa el la entoj, kaj interparole kun li vi aŭdos la parolon de la plej maljuna el ĉiuj vivantoj.

— Mi akompanos vin, — diris Teodeno. — Adiaŭ, miaj hobitoj! Ni renkontiĝu denove en mia domo! Tie vi sidos apud mi kaj rakontos al mi ĉion kion deziras viaj koroj: la farojn de viaj avoj ĝis la limoj de via kalkulo; kaj ni parolos ankaŭ pri Toboldo la Maljuna kaj ties plantaĵo-klero. Adiaŭ!

La hobitoj profunde riverencis.

— Do tiu estas la Reĝo de Rohano! — diris Grinĉjo subvoĉe. — Brava maljunulo! Tre ĝentila.

Ĉapitro 9

RUBO KAJ FORĴETAĴO

Gandolfo kaj la reĝa trupo forrajdis, turnante sin orienten por ĉirkaŭiri la ruinigitajn murojn de Isengardo. Sed Aragorno, Gimlio kaj Legolaso ne iris. Lasinte Arodon kaj Hasufelon vagi serĉante herbon, ili venis kaj sidigis apud la hobitoj.

— Nu, nu! Finiĝis la ĉasado kaj finfine ni rerenkontiĝas tie, kien neniu el ni iam supozis alveni, — diris Aragorno.

— Kaj nun kiam la gravuloj iris diskuti aferojn altnivelajn, — diris Legolaso, — la ĉasintoj povas eble ekscii la respondojn al siaj propraj rebusetoj. Ni spuris vin ĝis la arbaro, sed ekzistas ankoraŭ multaj aferoj pri kiuj mi ŝatus scii la veron.

— Kaj ekzistas ankaŭ multo, kion ni volas scii pri vi, — diris Gaja. — Kelkajn aferojn ni eksciis per Arbobarbo, la maljuna ento, sed tiom tute ne sufiĉas.

— Ĉio siatempe, — diris Legolaso. — Ni estis la ĉasantoj, kaj vi devus unue liveri historion pri vi mem.

— Aŭ due, — diris Gimlio. — Tio irus pli glate post manĝo. Mia kapo doloras min kaj estas post la tagmezo. Vi foririntoj povus reguligi la konton trovante por ni iom el la priparolita kaperaĵo. Manĝaĵo kaj trinkaĵo repagus iom el via ŝuldo al mi.

— Do vi ricevos ilin, — diris Grinĉjo. — Ĉu vi prenos ĝin ĉi tie, aŭ pli komforte en la restaĵo de l' gardistejo Sarumana — jen tie, sub la arkaĵo? Ni devus pikniki ĉi tie ekstere por gvati la vojon.

— Duongvati! — diris Gimlio. — Sed mi eniros neniun orkan domon, nek tuŝos orkan manĝaĵon aŭ ion ajn pripalpitan de ili.

— Tion ni ne postulus de vi, — diris Gaja. — Sufiĉas al ni orkoj por unu vivodaŭro. Sed multaj aliaj popoloj estis en Isengardo. Sarumano retenis sufiĉe da saĝo por ne fidi al siaj orkoj. Li havis homojn por gardi siajn pordojn; verŝajne iuj el la plej fidelaj servantoj. Ĉiukaze ili estis favoritaj kaj ricevis bonan provianton.

— Kaj pip-herbon? — demandis Gimlio.

— Ŝajnas al mi, ke ne, — Gaja ridis. — Sed tio estas alia historio, kiu povas atendi ĝis post la tagmanĝo.

— Nu, ni iru tagmanĝi do! — diris la gnomo.

La hobitoj gvidis antaŭen; kaj ili pasis sub la arkaĵo kaj alvenis larĝan pordon maldekstre, supre de ŝtuparo. Ĝi malfermiĝis rekte al granda ĉambro kun alia malpli granda pordo ĉe la fora ekstremo kaj kameno kaj fumtubo unuflanke. La ĉambro estis elhakita el la ŝtono; kaj certe ĝi iam estis malhela, ĉar ĝiaj fenestroj elrigardis nur en la tunelon. Sed lumo nun envenis tra la rompita tegmento. En la kamento brulis ligno.

— Mi bruligis iom da fajro, — diris Grinĉjo. — Ĝi plezurigis nin en la nebuloj. Malmultaj branĉofaskoj haveblis, kaj la pliparto de la trovitaj lignaĵoj estis malseka. Sed en la fumtubo estas forta trablovo; ĝi ŝajnis serpentumi supren tra la roko kaj feliĉe ĝi ne estas ŝtopita. Fajro utilas. Mi faros por vi iom da rostita pano. La pano aĝas tri aŭ kvar tagojn, bedaŭrinde.

Aragorno kaj liaj kunuloj sidiĝis ĉe la tablo kaj la hobitoj malaperis tra la interna pordo.

— Varĉambro tie kaj feliĉe super la inundo, — diris Grinĉjo kiam ili revenis ŝarĝitaj je pletoj, bovloj, tasoj, tranĉiloj kaj ĉiaspeca nutraĵo.

— Kaj ne necesas grimaci pri la provianto, Mastro Gimlio, — diris Gaja. — Tio ĉi ne estas orka fatraso, sed homnutraĵo, laŭ esprimo de Arbobarbo. Ĉu vi preferas vinon aŭ bieron? Barelo troviĝas tie interne — tre akceptinda. Kaj tio ĉi estas unuagrada porkaĵo salita. Aŭ mi povas tranĉi por vi kelkajn pecojn da lardo kaj tiujn rosti se vi volas. Mi bedaŭras, ke mankas verdaĵo: la liveroj estis iom interrompitaj lastatempe! Mi ne povas proponi ion poste krom butero kaj mielo por via pano. Ĉu vi kontentas?

— Vere jes, — diris Gimlio. — La ŝuldo estas multe reduktita.

La triopo baldaŭ okupiĝis pri sia manĝaĵo; kaj la du hobitoj senĝene ekmanĝis la duan fojon.

— Ni devas imiti la gastojn, — ili diris.

— Vi tre ĝentilas hodiaŭ matene, — ridis Legolaso. — Sed eble, se ni ne alvenus, vi jam imitus denove unu la alian.

— Eble; kaj kial ne? — diris Grinĉjo. — Ni manĝis fiaĵon ĉe la orkoj kaj sufiĉe malmulte dum tagoj antaŭe. Ŝajnas longa tempo de kiam ni povis satmanĝi kontentige.

— Ŝajnas ke tio ne malutilis al vi, — diris Aragorno. — Efektive vi aspektas impone bonsanaj.

— Jes, tio estas fakto, — diris Gimlio rigardante atente ilin trans la randon de sia kruĉo. — Vidu, via hararo estas duoble pli densa kaj bukla ol ĉe nia disiĝo; kaj mi ĵurus ke vi ambaŭ iom kreskis, se tio eblas al hobitoj viaaĝaj. Tiu Arbobarbo ĉiuokaze ne lasis vin malsataj.

— Tion li ne faris, — diris Gaja. — Sed entoj nur trinkas, kaj trink-aĵo ne sufiĉas por kontentigi. La pocioj de Arbobarbo eble nutras, sed oni sentas neceson pri io solida. Kaj eĉ *lembaso* ne malindas alternativaĵojn.

— Vi trinkis la akvon de la entoj, ĉu? — diris Legolaso. — Ha, supozeble la okuloj de Gimlio ne trompas lin. Strangaj kantoj estis kantitaj pri la pocioj de Fangorno.

— Multaj strangaj historioj estas rakontitaj pri tiu lando, — diris Aragorno. — Mi neniam eniris tien. Ek, rakontu pli pri ĝi kaj pri la entoj!

— Entoj, — diris Grinĉjo, — entoj estas — nu ekzemple, entoj ĉiuj malsimilas inter si. Sed pri la okuloj, vidu, iliaj okuloj estas tre strangaj. — Li provis kelkajn malcertajn vortojn kiuj forvelkis al silento. — Nu bone, — li daŭrigis, — vi jam vidis kelkajn demalproksime — almenaŭ ili vidis vin kaj raportis, ke vi proksimiĝas — kaj multajn aliajn supozeble vi vidis antaŭ ol foriri de ĉi tie. Vi devos formi proprajn konceptojn.

— Nu, nu! — diris Gimlio. — Vi komencas rakonti ĉe la mezo. Mi ŝatus historion laŭordan, komence de tiu stranga tago, kiam nia kunuleco interrompiĝis.

— Tion vi ricevos, se disponiĝos sufiĉe da tempo, — diris Gaja. — Sed unue — se vi finmanĝis — plenŝtopu kaj fajrigu viajn pipojn. Kaj tiam dum kelka tempo ni povos ŝajnigi, ke ni ĉiuj reiris sekuraj al Brio aŭ Rivendelo. — Li aperigis etan ledan sakon tabakoplenan. — Ni havas amason da ĝi, — li diris; — kaj vi povos ĉiuj paki tiom, kiom vi volos, kiam ni ekvojaĝos. Ni plenumis iom da elakva savado hodiaŭ matene, Grinĉjo kaj mi. Multaj aferoj disfloras. Ĝuste Grinĉjo trovis du bareletojn, supozeble elflosintajn el iu kelo aŭ varejo. Kiam ni malfermis ilin, ni trovis ilin plenigitaj je tio ĉi: tiel bonkvalita pip-herbo kiel oni dezirus, kaj tute ne difektita.

Gimlio prenis iom kaj frotis ĝin inter la manplatoj kaj snufis ĝin.

— Ĝi sentiĝas bona kaj ĝi odoras bona, — li diris.

— Ĝi ja estas bona! — diris Gaja. — Kara Gimlio, ĝi estas

Longfunda Folio! Vidiĝis la Kornblovulaj varmarkoj sur la bareletoj, kiel eble plej klare. Kiel ĝi alvenis ĉi tien, mi ne povas imagi. Por persona uzo de Sarumano, mi supozas. Mi ne sciis, ke ĝi eksportiĝas tiel foren. Sed ĉu ĝi uzindas nun?

— Nepre, — diris Gimlio, — se kune mi disponus pipon. Ve, mi perdis la mian en Morio aŭ pli frue. Ĉu ne troviĝas pipo inter ĉiuj viaj kaperaĵoj?

— Bedaŭrinde ne, — diris Gaja. — Eĉ unu mi ne trovis, ankaŭ ne ĉi tie en la gardistejo. Sarumano rezervis al si tiun ĉi frandaĵon, verŝajne. Kaj laŭ mia opinio ne utilas frapi la pordon de Ortanko por peti de li pipon! Ni devos dividi la pipojn, kiel konvenas al bonaj amikoj en okazo de neceso.

— Duonmomenton! — diris Grinĉjo. Metinte manon en la bruston de sia jako li eltiris etan malmolan saketon sur ŝnuro. — Mi portas unu-du trezorojn apud mia haŭto, tiel valorajn kiel Ringoj al mi. Jen unu: mia malnova ligna pipo. Kaj jen alia: pipo neuzita. Mi longe kunportis ĝin, kvankam la kialon mi ne scias. Mi vere neniam atendis pip-herbon dum la vojaĝo post elĉerpiĝo de mia stoko. Sed nun ĝi finfine utilas. — Li levis etan pipon kun larĝa platigita brulingo, kaj transdonis ĝin al Gimlio. — Ĉu tio nuligas la ŝuldon inter ni? — li diris.

— Ĉu nuligas? — ekkriis Gimlio. — Plej nobla hobito, tio profunde enŝuldigas min al vi.

— Nu, mi iras denove en la plenan aeron por vidi, kion faras la vento kaj la ĉielo! — diris Legolaso.

— Mi akompanos vin, — diris Aragorno.

Ili eliris kaj sidiĝis sur la amasigitajn ŝtonetojn antaŭ la pordejo. Ili povis jam vidi malproksimen en la valon; la nebuletoj leviĝis kaj flosis laŭ venteto.

— Nun ni ripozu ĉi tie dum kelka tempo! — diris Aragorno. — Mi sidos rande de la ruino kaj parolos, kiel Gandolfo diras, dum li forestas okupate. — Li volvis sin per sia griza mantelo, kaŝante sian maŝkirason, kaj etendis siajn longajn krurojn. Poste li kliniĝis malantaŭen kaj blovis el siaj lipoj maldensan fumostrion.

— Vidu! — diris Grinĉjo. — Revenis Paŝegulo la disirulo!

— Li neniam forestis, — diris Aragorno. — Mi estas Paŝegulo kaj ankaŭ dunadano, kaj mi apartenas tiel al Gondoro kiel al la nordo.

Dum kelka tempo ili fumis silente, kaj la suno brilis al ili, oblikvan-
te en la valon el inter blankaj nuboj alte en la okcidento. Legolaso

kuŝis senmova, rigardante al la suno kaj ĉielo per la okuloj senŝancelaj kaj kantante mallaŭte al si. Fine li rektiĝis.

— Ek jam! — li diris. — Pasas la tempo, kaj la nebuletoj forbloviĝas, aŭ farus tion, se vi stranguloj ne volvus vin per fumo. Kio pri la historio?

— Nu, mia historio komenciĝas per vekiĝo en mallumo por konstati min tute ĉirkaŭligita en la orka bivako, — diris Grinĉjo. — Mi pripensu, kio estas hodiaŭ?

— La kvina de marto laŭ la Provinca kalkulo, — diris Aragorno. Grinĉjo iom kalkulis per la fingroj.

— Antaŭ nur naŭ tagoj! — li diris¹. — Ŝajne pasis jaro post nia kaptiĝo. Nu, kvankam la duono similis koŝmaron, mi kalkulas ke sekvis tri tre teruraj tagoj. Gaja korektos min, se mi forgesos ion gravan: mi ne detaligos: la vipoj kaj la putraĵo kaj la fetoro kaj ĉio tia; ne tolereblas memori tion. — Dirinte tion li plonĝis en rakonton pri la lasta lukto de Boromiro kaj la orka marŝado de Emin Muilo ĝis la Arbarego. La aliaj kapjesis kiam la diversaj punktoj kompariĝis al iliaj supozoj.

— Jen kelkaj trezoroj, kiujn vi faligis, — diris Aragorno. — Ĝojigos vin rehavi ilin. — Li malligis sian zonon el sub la mantelo kaj elprenis la du eningigitajn tranĉilojn.

— Nu! — diris Gaja. — Mi neniam atendis revidi tiujn! Mi cikatrigo kelkajn orkojn per la mia; sed Ugluko forprenis ilin de ni. Kiel li furioze rigardis nin! Komence mi pensis, ke li trapikos min, sed li forĵetis la aĵojn kvazaŭ ili brulumus lin.

— Kaj jen ankaŭ via broĉo, Grinĉjo, — diris Aragorno. — Mi tenis ĝin sekura, ĉar ĝi estas io tre valora.

— Mi scias, — diris Grinĉjo. — Estis malfacile rezigni pri ĝi, sed kion alian mi povis fari?

— Nenion alian, — respondis Aragorno. — Tiu kiu ne kapablas forĵeti trezoron, kiam necesas, estas katenita. Vi agis ĝuste.

— Tranĉo de la manradikaj ligiloj, tio estis lerta faro! — diris Gimlio. — Bonŝanco servis vin tiam; sed vi kaptis la okazon ambaŭmane, oni povus diri.

— Kaj starigis al ni belan problemon, — diris Legolaso. — Mi sciivolis, ĉu vi kreskigis flugilojn!

— Bedaŭrinde ne, — diris Grinĉjo. — Sed vi ne sciis pri Griŝnaĥo. — Li ekstremegis kaj diris nenion pli, lasante al Gaja rakonton pri tiuj

¹ Ĉiu monato laŭ la Provinc-datumo estis 30-taga.

lastaj teruraj momentoj: la palpantaj manoj, la varmega spiro kaj la terura forto de la harozaj brakoj de Griŝnaĥo.

— Ĉio ĉi pri la orkoj de Mordoro, aŭ Lugburzo laŭ ilia terminaro, maltrankviligas min, — diris Aragorno. — La Malluma Mastro jam sciis tro multe kaj ankaŭ liaj servistoj; kaj evidente Griŝnaĥo sendis trans la riveron ian mesaĝon post la kverelo. La Ruĝa Okulo nepre rigardas al Isengardo. Sed ĉiuokaze Sarumano estas en forka vergo propramane eltranĉita.

— Jes, kiu ajn partio venkos, lia antaŭvido malfavoras, — diris Gaja. — La aferoj komencis malfavori lin ekde la momento kiam liaj orkoj enpaŝis Rohanon.

— Ni ekvidis la maljunan kanajlon, aŭ tiel aludas Gandolfo, — diris Gimlio. — Rande de l' Arbarego.

— Kiam okazis tio? — demandis Grinĉjo.

— Antaŭ kvin noktoj, — diris Aragorno.

— Ni kalkulu, — diris Gaja: — antaŭ kvin noktoj — nun ni alvenas parton de la historio, pri kiu vi scias nenion. Ni renkontis Arbobarbon tiumatene post la batalo; kaj tiunokte ni estis en Putohalo, unu el liaj entaj domoj. La postan matenon ni iris al Entmuteo, tio estas renkontiĝo de entoj, kaj afero la plej stranga, kiun mi vidis dumvive. Ĝi daŭris tiun tutan tagon kaj la postan; kaj ni pasigis la nokton ĉe ento nomita Rapidtrunkto. Kaj frue en la posttagmezo de la dua tago la entoj subite eksplodis. Estis mirige. La arbarego sentiĝis streĉa kvaŭ prepariĝus en ĝi tondroŝtormo; poste ĝi senaverte eksplodis. Mi volas ke vi aŭdu ties kanton dum la marŝo.

— Se Sarumano aŭdus ĝin, li jam troviĝus cent mejlojn for, eĉ se li devus utiligi la proprajn krurojn, — diris Grinĉjo.

*Se Isengardo fortas, duras, ŝtone frida, oste dura,
ni militiras por ke pordon breĉu nia rompo truda!*

Ĝi estis multe pli. Al granda parto de la kanto mankis vortoj kaj similis muzikon de kornoj kaj tamburoj. Ĝi estis tre ekscita. Sed mi supozis ĝin nur marŝmuziko kaj ne pli, nura kanto, ĝis ni alvenis la celon. Mi jam scias pli bone.

» Ni subiris trans la lastan firston en Nan Kuruniron post la nokt-iĝo, — Gaja daŭrigis. — Ĝuste tiam mi sentis unue, ke la arbarego mem moviĝas post ni. Mi supozis, ke mi spertas entan sonĝon, sed ankaŭ Grinĉjo rimarkis tion. Ni ambaŭ timiĝis; sed ni ne eltrovis pli pri tio ĝis poste.

» Tio estis la huornoj, aŭ tiel nomas ilin la entoj en la “kurta lingvaĵo”. Arbobarbo ne volas diri multon pri ili, sed mi opinias, ke ili estas entoj, kiuj preskaŭ arbiĝis, almenaŭ aspekte. Ili staras ie-tie en la arbaro aŭ sub ties randoj, silente, senĉese rigardante super la arboj; sed profunde en la valoj plej malhelaj troviĝas plurcentoj da ili, ŝajnas al mi.

» En ili estas granda potenco, kaj ili ŝajnas kapablaj volvi sin en ombroj; estas malfacile vidi ilin moviĝi. Sed ili moviĝas. Ili kapablas moviĝi tre rapide, se ili koleras. Oni staras senmove rigardante eble la veteron aŭ aŭskultante la sibladon de la vento, kaj poste vi subite konstatas, ke vi estas en la mezo de arbaro kun grandaj palpantaj arboj ĉie ĉirkaŭe. Ili havas ankoraŭ voĉojn kaj povas interparoli kun la entoj — pro tio oni nomas ilin huornoj, diras Arbobarbo — sed ili fariĝis strangaj kaj sovaĝaj. Danĝeraj. Mi teruriĝus renkontante ilin, se ne ĉeestus veraj entoj por prizorgi ilin.

» Nu, en la frua nokto ni ŝteliris suben laŭ longa ravino el la supra ekstremo de l' Sorĉista Valo kun la entoj kaj ties susuraj hŭornoj malantaŭe. Ni ne povis vidi ilin kompreneble, sed la tuta aero plenumis de grincado. Estis tre mallume en la nokto nubokovrita. Ili moviĝis rapidege tuj kiam ili forlasis la montetojn kaj faris bruon kiel forta vento. La luno ne aperis tra la nuboj, kaj ne longe post la nokto-mezo troviĝis alta arbaro ĉie ĉirkaŭ la norda flanko de Isengardo. Mankis indikoj pri malamikoj kaj ajna defio. Vidiĝis lumo glimanta tra alta fenestro en la turo, jen ĉio.

» Arbobarbo kaj kelkaj aliaj entoj ŝteliris antaŭen, ĉirkaŭire ĝis viddistanco de l' grandega pordego. Grinĉjo kaj mi akompanis lin. Ni sidis sur la ŝultroj de Arbobarbo, kaj mi povis senti en li treman streĉitecon. Sed eĉ kiam ili agitiĝas, entoj povas agi tre singarde kaj pacience. Ili staris senmovaj kiel ĉizitaj ŝtonoj, spirante kaj aŭskultante.

» Tiam subite okazis grandega tumulto. Trumpetoj blekis kaj la muroj de Isengardo eĥis. Ni supozis nin rimarkitaj kaj ke komenciĝos batalo. Sed tute ne. La tuta popolo de Sarumano formarsiis. Mi ne scias multon pri tiu ĉi milito, nek pri la rajdistoj el Rohano, sed ŝajnas ke Sarumano intencis detruai la reĝon kaj ties tutan armeon unufrape. Li malplenigis Isengardon. Mi vidis la malamikojn foriri: senfinaj vicoj da marŝantaj orkoj; kaj trupoj da ili rajdantaj sur lupegoj. Kaj estis ankaŭ batalionoj da homoj. Multaj el ili portis torĉojn, kaj per la flagrado mi povis vidi la vizaĝojn. La plimultaj estis ordinaruloj,

sufiĉe altaj kaj malblondharaj, severaj sed ne aparte malvirtaspektaj. Sed troviĝis iuj aliaj kiuj estis hidaj: home altaj sed kun goblenaj vizaĝoj, flavpalaj, rikanaj, strabaj. Ĉu vi scias, ili tuj memorigis min pri tiu sudano en Brio; nur ke li ne estis tiel evidente orksimila kiel la plimulto el ĉi tie.

— Ankaŭ mi pensis pri li, — diris Aragorno. — Ni devis trakti multajn el tiuj duonorkoj ĉe la Profundaĵo de Helmo. Ŝajnas jam klare, ke tiu sudano estis spiono de Sarumano; sed mi ne scias, ĉu li agis kune kun la Nigraj Rajdantoj, aŭ nur por Sarumano. Estas malfacile ĉe tiuj malvirtuloj scii, kiam ili kunlaboras, kaj kiam ili trompas unu la alian.

— Nu, da ĉiuj specoj kune estis minimume dek mil, — diris Gaja. — Ili bezonis horon por trapasi la pordegon. Iuj foriris laŭ la ĉefvojo al la Travadejoj, kaj iuj turniĝis orienten. Ponto estas konstruita tie, proksimume unu mejlon for, kie la rivero fluas en kanelo tre profunda. Vi povus nun vidi ĝin se vi stariĝus. Ili ĉiuj kantis raŭkvoĉe kaj ridis, kaŭzante hidan bruon. Al mi ŝajnis, ke la estonteco por Rohano estas tre sombra. Sed Arbobarbo ne moviĝis. Li diris: “Mia afero ĉi-nokte koncernas Isengardon, rokojn kaj ŝtonojn”.

» Sed, kvankam mi ne povis vidi kio okazas en la mallumo, mi opinias, ke huornoj komencis moviĝi suden tuj kiam la pordego refermiĝis. Ilin koncernis la orkoj, ŝajnas al mi. Matene ili troviĝis en la fora valo; aŭ ĉiuokaze estis tie ombro tra kiu oni ne povis vidi.

» Tuj post kiam Sarumano forsendis sian armeon, venis nia vico. Arbobarbo demetis nin, aliris la pordegon kaj komencis frapadi ĝin, alvokante Sarumanon. Malestis respondo, krom sagoj kaj ŝtonoj de la muroj. Sed sagoj estas senutilaj kontraŭ entoj. Ili doloras, kompreneble, kaj furiozigas ilin: kiel pikaj muŝoj. Sed ento povas esti tiel komplete sagopikita kiel pinglokuseneto kaj ne vundiĝi grave. Ekzemple, oni ne povas veneni ilin; kaj ilia haŭto ŝajnas tre dika kaj pli fortika ol arboŝelo. Necesas tre peza hakilbato por grave vundi ilin. Ili ne ŝatas hakilojn. Sed necesas tre multaj hakistoj kontraŭ unuopa ento: homo kiu unufoje hakas al ento neniam havas okazon bati duan fojon. Entpugna bato ĉifas feron kvazaŭ maldikan ladon.

» Kiam en Arbobarbo jam estis kelkaj sagoj, li komencis ardiĝi, fariĝi pozitive “hasta”, kiel li dirus tion. Li eligis laŭtegan *hum-hom*, kaj dekduo da aliaj entoj alpaŝis. Ento kolera teruras. Ties man- kaj piedfingroj simple kroĉiĝas al roko, kaj ili disŝiras ĝin kvazaŭ pankruston. Tio similis rigardi centjaran laboron de grandaj arboradikoj enpakitan en kelkajn momentojn.

» Ili ŝovis, trenis, ŝiris, skuis kaj martelis; kaj *pum-frap*, *krak-klak*, post kvin minutoj ili simple lasis tiun pordegon kuŝanta ruinigite; kaj kelkaj jam komencis mordi en la murojn kvazaŭ kunikloj en sablejo. Mi ne scias, kiel Sarumano interpretis la okazaĵon; sed ĉiuokaze li ne sciis, kiel trakti ĝin. Lia sorĉivo eble velkis lastatempe, kompreneble; sed ĉiuokaze ŝajnas al mi, ke li havas malmulte da medolo, ne multe da ordinara kuraĝo, kiam sola en malfacila situacio sen amaso da sklavoj kaj maŝinoj kaj tiaĵoj, se vi komprenas min. Tre malsimile al maljuna Gandalfo. Mi scivolos, ĉu lia famo ne ĉiam devenis grandparte de lia lerto enloĝiĝi en Isengardo.

— Ne, — diris Aragorno. — Iam li estis tiel grandioza kiel lia famo. Lia klero estis profunda, li pensis subtile, kaj liaj manoj estis mirinde lertaj; kaj li povis regi la mensojn de aliuloj. Saĝulojn li sciis persvadi, kaj pli malgravajn homojn li sciis timigi. Tiun kapablon li certe retenas. Ne troviĝas multaj en Mez-Tero kiujn mi taksus sekuraj se ili unuope devus interparoli kun li, eĉ nun kiam li spertis malvenkon. Gandalfo, Elrondo kaj Galadriela, eble, nun kiam lia malvirto estas malkaŝita, sed tre malmultaj aliaj.

— La entoj estas sekuraj, — diris Grinĉjo. — Ŝajnas ke li iam persvadis ilin, sed neniam plu. Kaj ĉiuokaze li ilin ne komprenis; kaj li kulpis grandan eraron, ke li neglektis ilin en sia kalkulado. Li ne havis planon kontraŭ ili, kaj mankis tempo por plani, kiam ili jam eklaboris. Tuj post komenciĝo de nia atako ĉiuj restantaj ratoj en Isengardo ekfuĝis tra ĉiu truo farita de la entoj. La entoj permesis al la homoj foriri, post kiam ili priesploris ilin, nur dudek-tridek el ili ĉe tiu ĉi ekstremo. Laŭ mia opinio ne multaj el la orka popolo, ĉu grandaj ĉu malgrandaj, eskapis. Ne de la huornoj: arbaro da ili ĝis tiam ĉirkaŭis Isengardon, krom tiuj, kiuj subeniris en la valon.

» Kiam la entoj rubigis grandan parton de la sudaj muroj, kaj la restaĵo de lia popolo fuĝis kaj dizertis, Sarumano forkuris panike. Ŝajnas ke li estis ĉe la pordo, kiam ni alvenis: atendeble li venis por spekti la formarŝon de sia grandioza armeo. Kiam la entoj trarompis, li haste foriris. Ili ne tuj rimarkis lin. Sed la nokto apertiĝis kaj vidiĝis forta stelolumo, tute sufiĉe por ke la entoj vidu, kaj subite puŝis krimon Rapidtrunko: “La arbomortiginto! La arbomortiginto!” Rapidtrunko estas kreaĵo milda, sed li malamas Sarumanon tiom pli feroce pro tio, ke lia popolo kruele suferis pro la orkaj hakiloj. Li saltis de la interna pordo laŭ la pado, kaj li povas moviĝi kiel vento kiam li estas agitita. Pala figuro videblis forrapidanta en kaj el la pilastraj ombroj, kaj ĝi

preskaŭ alvenis la ŝtuparon al la turpordo. Sed estis preskaŭ-preskaŭe. Tiel arde postkuris lin Rapidtrunko, ke li nur dupaŝe evitis kaptiĝon kaj strangoliĝon antaŭ ol li englitis tra la pordo.

» Ne longe post kiam Sarumano denove sekuris en Ortanko li funkciigis iom el sia amata maŝinaro. Ĝis tiam troviĝis multaj entoj interne de Isengardo: iuj sekvis Rapidtrunkon, kaj aliaj eksplode eniĝis el la nordo kaj oriento; ili disvagis kaj kaŭzis multe da malutilo. Subite elleviĝis fajroj kaj haladzaj fumoj: la lukoj kaj ŝaktoj tra la tuta ebenaĵo komencis sputi kaj rukti. Pluraj entoj ekbrulis kaj vezikiĝis. Unu el ili, ŝajne lia nomo estis Fagosto, ento tre alta kaj bela, estis trafita de ŝpruco da ia likva fajro kaj brulis kvazaŭ torĉo: terura vidaĵo.

» Tio frenezigis ilin. Mi antaŭe supozis ilin vere agititaj; sed mi malpravus. Mi vidis finfine la realaĵon. Estis miregige. Ili blekis, bumis kaj trumpetis, ĝis ŝtonoj komencis fendiĝi kaj fali pro ties nura bruo. Gaja kaj mi kuŝis surtere kaj ŝtopis la orelojn per niaj manteloj. Ĉiam denove ĉirkaŭ la rokon de Ortanko la entoj paŝegis kaj ŝtormis kvazaŭ hurlanta tempesto, rompante pilastrojn, ĵetegante rokegojn en ŝaktojn, suprenpelante grandegajn ŝtonblokojn en la aeron kvazaŭ foliojn. La turego troviĝis meze de kirlovento. Mi vidis ferajn fostojn kaj blokojn da masonaĵo raketi plurcent futojn en la aeron kaj bategi la fenestrojn de Ortanko. Sed Arbobarbo restis prudenta. Feliĉe li estis neniom bruligita. Li deziris, ke lia popolo ne malutilu al si pro sia furiozo, kaj li deziris, ke Sarumano ne eskapu tra iu truo dum la konfuzeco. Multaj entoj ĵetadis sin kontraŭ la Ortankorokon; sed tiu venke kontraŭstaris. Ĝi estas tre glata kaj malmola. Eble troviĝas en ĝi ia sorĉaĵo, pli malnova kaj pli forta ol tiu de Sarumano. Ĉiuokaze ili ne povis kroĉiĝi al ĝi, nek fendi ĝin; kaj ili sin kontuzis kaj vundis kontraŭ ĝi.

» Do Arbobarbo eliris en la ringon kaj kriegis. Lia fortega voĉo aŭdiĝis malgraŭ la granda bruo. Ekestis mortsilento subite. Dum ĝi ni aŭdis kriĉan ridadon el alta fenestro de la turego. Tio strange efikis al la entoj. Ili antaŭe bole eruptis; nun ili iĝis fridaj, glacie severaj kaj kvietaj. Ili forlasis la ebenaĵon kaj ĉirkaŭstaris Arbobarbon tute senmove. Li alparolis ilin dum kelka tempo sialingve; mi opinias, ke li sciigis al ili planon antaŭlonge elpensitan en lia maljuna kapo. Poste ili simple formalaperis silente tra la griza lumo. Tiam la tago jam aŭroris.

» Ili starigis vaĉon pri la turego, ŝajnas al mi, sed la vaĉantoj estis tiel kaŝitaj en ombroj kaj restis tiel senmovaj, ke mi ne povis vidi ilin. La ceteraj foriris norden. La tutan tagon ili estis okupataj, nevideble.

Tio estis tago morna; kaj ni ĉirkaŭvadis iom, kvankam ni evitis vid-eblon de la fenestroj de Ortanko tiom kiom ni povis: ili alrigardis nin tiel minace. Signifan parton de la tempo ni pasigis serĉante ion manĝeblan. Kaj ni ankaŭ sidis kaj interparolis, scivolante kio okazas forsude en Rohano, kaj kio okazis al la restaĵo de nia Kunularo. De tempo al tempo ni aŭdis en malproksimo la klakadon kaj faladon de ŝtonoj kaj obtuzan batbruon eĥantan inter la montetoj.

» Posttagmeze ni promenis ĉirkaŭ la cirklo, kaj iris rigardi la okazantaĵojn. Troviĝis granda ombreca arbaro da huornoj ĉe l' eniro de la valo kaj alia ĉirkaŭ la norda muro. Ni ne kuraĝis eniri. Sed aŭdiĝis interne rompa ŝira laborbruo. Entoj kaj huornoj fosadis grandajn putojn kaj tranĉeojn kaj kreis grandajn lagetojn kaj baraĵojn, kunigante ĉiujn akvojn de Iseno kaj ĉiu alia fonto kaj rojo, kiun ili trovis. Ni lasis ilin laborantaj.

» Je krepusko Arbobarbo revenis al la pordego. Li zumis kaj muĝis subvoĉe, kaj ŝajnis kontenta. Li staris etendante siajn brakegojn kaj kruregojn kaj spiris profunde. Mi demandis, ĉu li estas laca.

» — Ĉu laca? — li diris, — laca? Nu ne, ne laca, sed nefleksiĝema. Mi bezonas ampleksan trinkaĵon el Entvaŝo. Ni multe laboris; ni plenumis pli da ŝtonfendado kaj termaĉado hodiaŭ ol ni plenumis dum multaj longaj jaroj antaŭe. Sed ĝi preskaŭ kompletiĝis. Kiam noktiĝos, ne restadu proksime al tiu ĉi pordego aŭ en la malnova tunelo! Akvo eble trafluos, kaj tio estos dum kelka tempo akvo malpurega, ĝis la tuta fiaĵo de Sarumano estos forlavita. Poste Iseno povos flui denove pura. — Li komencis deŝiri iom pli da muro, laŭ malurĝa maniero, simple por sin distri.

» Ni ĝuste ekscivolis, kie estos sendanĝere kuŝi kaj iom dormi, kiam okazis la plej mirinda el ĉiuj okazaĵoj. Aŭdiĝis sono de rajdanto proksimiĝanta rapide sur la vojo. Gaja kaj mi kuŝis kviete, kaj Arbobarbo sin kaŝis en la ombroj sub la arkaĵo. Subite alpaŝegis granda ĉevalo, kvazaŭ ekflagro de arĝento. Ekmallumiĝis, sed mi povis vidi klare la vizaĝon de l' rajdanto: ĝi ŝajnis brila, kaj ĉiuj liaj vestaĵoj estis blankaj. Mi simple sidiĝis rekta, gapante kun la malfermita buŝo. Mi provis voki kaj ne sukcesis.

» Tio ne necesis. Li haltis ĝuste apud ni kaj subenrigardis. "Gand-also!" — mi diris fine, sed mia voĉo nur flustris. Ĉu li diris: "Saluton, Grinĉjo! Jen agrabla surprizo!?" Ne, fakte! Li diris: "Stariĝu, idiota Tjuko! Kie, je l' kukolo, en tiu ĉi tuta ruinaĵo troviĝas Arbobarbo? Mi bezonas lin. Ek!"

» Arbobarbo aŭdis lian voĉon kaj tuj venis el la ombroj; kaj okazis stranga renkontiĝo. Mi surpriziĝis, ĉar neniu el ambaŭ ŝajnis entute surprizita. Gandolfo evidente atendis trovi Arbobarbon tie; kaj Arbobarbo preskaŭ ŝajnis ŝvebumanta apud la pordego ĝuste por renkonti lin. Tamen ni rakontis al la maljuna ento ĉion pri Morio. Sed poste mi memoris strangan rigardon, kiun li ĵetis al ni tiutempe. Supozeble li jam vidis Gandalfon aŭ ricevis novaĵon pri li, sed ne volis tro rapide diri ion. “Ne hastu” — estas lia devizo; sed neniu, eĉ ne elfoj, povas multon diri pri la irado de Gandolfo, kiam li ne ĉeestas.

» — Hum! Gandolfo! — diris Arbobarbo. — Mi ĝojas, ke vi venis. Lignon kaj akvon, trunkon kaj rokon, tion mi scias pritrakti, sed ĉi tie sorĉisto estas traktenda.

» — Arbobarbo, — diris Gandolfo. — Necesas al mi via helpo. Vi plenumis multon, sed mi bezonas pli. Ĉirkaŭ dek mil orkojn mi devas pritrakti.

» Poste tiuj du foriris kaj interkonsiliĝis en iu angulo. Verŝajne ŝajnis al Arbobarbo tre haste, ĉar Gandolfo ege urĝiĝis kaj jam paroladis rapidege, antaŭ ol ili pasis for de aŭskultebleco. Ili forestis nur dum kelkaj minutoj, eble dum kvaronhoro. Poste Gandolfo revenis al ni, kaj li ŝajnis malŝarĝita, preskaŭ gaja. Tiam li efektive diris, ke li ĝojas revidi nin.

» — Sed Gandolfo, — mi ekkriis, — kie vi estadis? Kaj ĉu vi vidis la aliajn?

» — Kie ajn mi estis, mi jam revenis, — li respondis laŭ la malfalsa Gandalfa maniero. — Jes, mi vidis kelkajn el la aliaj. Sed sciigoj devas prokrastiĝi. Tiu ĉi estas nokto danĝeroplana, kaj mi devas rajdi rapide. Sed la aŭroro eble pli helos; kaj se jes ni renkontiĝos denove. Gardu vin, kaj restu for de Ortanko! Adiaŭ!

» Arbobarbo estis tre pensema post la foriro de Gandolfo. Li evidente eksciis multon dum mallonga tempo kaj tion analizis. Li rigardis nin kaj diris: “Hm, nu, mi konstatas, ke vi ne estas tiel hasta popolo kiel mi supozis. Vi diris multe malpli ol vi povis kaj ne pli ol vi devis. Hm, jen amaso da novaĵo sendube! Nu, jam devas Arbobarbo okupiĝi denove”.

» Antaŭ lia foriro ni sukcesis ellogi el li iomete pli da novaĵo; kaj tio tute ne ĝojigis nin. Sed intertempe ni pensis pli pri via triopo ol pri Frodo kaj Sam aŭ pri kompatinda Boromiro. Ĉar ni komprenis, ke granda batalo okazas, aŭ baldaŭ okazos, kaj ke vi partoprenas kaj eble neniam travivos ĝin.

» — Huornoj helpos, — diris Arbobarbo. Poste li foriris kaj ni ne revidis lin ĝis hodiaŭ matene.

» Estis profunde en la nokto. Ni kuŝis sur ŝtonamaso kaj nenion povis vidi post ĝi. Nebuleto aŭ ombroj estingis ĉion kvazaŭ granda lankovrilo ĉirkaŭ ni. La aero ŝajnis varmega kaj peza; kaj ĝi estis plena de susuroj, grincoj, kaj murmurado kvazaŭ de pasantaj voĉoj. Mi opinias, ke centoj da huornoj certe preterpasis por helpi dum la batalo. Poste aŭdiĝis granda muĝo de tondro en la fora sudo, kaj vidiĝis fulmoflagroj malproksime trans Rohano. De tempo al tempo ni povis vidi montopintojn en multmejla malproksimo elpiki subite, nigre-blanke, kaj poste malaperi. Kaj malantaŭ ni aŭdiĝis tondrosimilaj bruoj en montoj, sed alispecaj. De tempo al tempo la tuta valo eĥadis.

» Verŝajne estis ĉirkaŭ noktomezo, kiam la entoj rompis la barilojn kaj verŝis la tutan kolektitan akvon tra breĉo en la norda muro, suben en Isengardon. La huorn-mallumo jam pasis, kaj la tondro jam forruliĝis. La luno sinkis malantaŭ la okcidentajn montojn.

» Isengardo komencis pleniĝi je nigraj rampantaj rojoj kaj lagetoj. Ili ekbrilis en la lasta lumo de la luno disvastiĝante sur la ebenaĵo. De tempo al tempo la akvoj trovis vojon malsupren en iun ŝakton aŭ sputotruon. Grandaj blankaj vaporoj siblis supren. Fumo leviĝis ondege. Okazis eksplodoj kaj fajroblovaĵoj. Unu granda vaporovolv-aĵo kirligiĝis supren, tordiĝante ĉiam denove ĉirkaŭ Ortankon, ĝis ĝi aspektis kvazaŭ alta nubomonteto sube arda kaj supre lunlumigita. Kaj ankoraŭ pli da akvo enverŝiĝis, ĝis fine Isengardo aspektis kiel granda plata pato tute vaporanta kaj bobelanta.

— Ni vidis nubon el fumo kaj vaporo el la sudo hieraŭ nokte, kiam ni alvenis la elirejon de Nan Kuruniro, — diris Aragorno. — Ni timis, ke Sarumano preparas ian novan demonaĵon por ni.

— Ne li! — diris Grinĉjo. — Li probable sufokiĝis kaj ne plu ridis. Ĝis la mateno, hieraŭa mateno, la akvo jam subensinkis en ĉiujn truojn kaj estiĝis densa nebulo. Ni ŝirmiĝis en la gardistejo; kaj ni spertis iom da timo. La lago komencis transbordiĝi kaj elverŝiĝi tra la malnova tunelo, kaj la akvo rapide leviĝis laŭ la ŝtuparo. Ni pensis, ke ni estas kaptotaj kiel orkoj en truo; sed ni trovis rondiran ŝtuparon fine de l' varĉambro kiu kondukis nin ĝis la supro de l' arkaĵo. La eliro estis stringa, ĉar la koridoroj estis rompita kaj duone baritaj per falintaj ŝtonoj apud la supro. Tie ni sidis alte super la inundo kaj spektis la

droniĝon de Isengardo. La entoj daŭre enverŝis pli da akvo, ĝis ĉiuj fajroj estis estingitaj kaj ĉiuj kavernoj plenigitaj. La nebuloj malrapide kuniĝis kaj vaporis supren je ombrelego nuba: ĝi verŝajne altis unu mejlon. Vespere aperis ĉielarkego super la orientaj montetoj; kaj poste la sunsubiron kovris densa pluvetaĉo sur la montflankoj. Ĉio tre kvietiĝis. Kelkaj lupoj morne ululis en malproksimo. La entoj haltigis la enfluan dum la nokto, kaj resendis Isenon al ties antaŭa flupado. Kaj tiel finiĝis ĉio.

» Ekde tiam la akvo denove sinkadis. Devas esti ellasejoj ie el la subaj kavernoj laŭ mia opinio. Se Sarumano elgvatas el iu sia fenestro, tio devas aspekti malneta morna konfuzaĵo. Ni sentis nin tre solecaj. Eĉ ne videbla ento alparolebla en la tuta ruinaĵo; kaj mankis informoj. Ni pasigis la nokton tie super la arkaĵo, kaj tie estis fride kaj malsekete kaj ni ne dormis. Ni sentis ĉiumomente, ke povos okazi io ajn. Sarumano estas daŭre en sia turego. Aŭdiĝis dum la nokto bruo, kvazaŭ vento alvenanta tra la valo. Mi opinias, ke la foririntaj entoj kaj huornoj tiam revenis; sed kien ili nun iris, tion mi ne scias. Estis mateno nebuleta malseketa, kiam ni subengrimpis kaj denove ĉirkaŭrigardis, kaj neniu vidiĝis. Kaj tio pli-malpli kompletigas la rakonton. Jam ŝajnas preskaŭ trankvile post la tuta tumulto. Kaj iel pli sekure, post la reveno de Gandolfo. Mi dormemas!

Ĉiuj silentis dum kelka tempo. Gimlio reŝtopis sian pipon.

— Pri unu afero mi scivolas, — li diris dum li fajrigis ĝin per siaj siliko kaj tindro: — Vermlango. Vi diris al Teodeno, ke li estas ĉe Sarumano. Kiel li atingis tien?

— Ho jes, pri li mi forgesis, — diris Grinĉjo. — Li ne atingis ĉi tien ĝis hodiaŭ matene. Ni ĝuste ekbruligis la fajron kaj iom manĝis, kiam reaperis Arbobarbo. Ni aŭdis lin zumi kaj voki niajn nomojn ekstere.

» — Mi venis nur por konstati, kiel vi fartas, knaboj, — li diris, — kaj por sciigi al vi kelkajn novaĵojn. Huornoj revenis. Ĉio enordas; jes, vere tre enordas! — li ridis kaj manfrapis siajn femurojn. — Ne plu orkoj en Isengardo, ne plu hakiloj! Kaj venos kelkaj personoj el la sudo antaŭ ol la tago maljuniĝos; iuj kiujn vi eble ĝojos vidi.

» Apenaŭ li diris tion, jam ni aŭdis sonon de hufbatoj sur la vojo. Ni elkuris antaŭ la pordegon, kaj mi staris fikse rigardante, duonaten-dante vidi Paŝegulon kaj Gandalfon rajdantajn antaŭ armeo. Sed el la nebulo elrajdis homo sur maljuna lacega ĉevalo; kaj li mem aspektis ia stranga tordita kreaĵo. Venis neniu alia. Kiam li elvenis el la nebulo

kaj subite vidis antaŭ si la tutan ruinon kaj rompaĵon, li sidis gapante kaj lia vizaĝo iĝis preskaŭ verda. Li estis tiel konfuzita, ke komence li ŝajne ne rimarkis nin. Kiam li ekvidis nin, li elpuŝis krion, kaj provis turni sian ĉevalon kaj forrajdi. Sed Arbobarbo faris tri paŝojn, etendis longan brakon kaj levis lin de la selo. Lia ĉevalo forkuris terurite, kaj li kaŭris sur la tero. Li diris, ke li estas Grimo, amiko kaj konsilanto de la reĝo, kaj estis sendita kun gravaj mesaĝoj de Teodeno al Sarumano.

» — Neniu alia aŭdacus rajdi tra la neŝirmita lando tiom plena je fiaj orkoj, — li diris, — do oni sendis min. Kaj mi spertis vojaĝon danĝeroplanan kaj mi estas malsata kaj laca. Mi fuĝis tre norden for de mia vojo, persekutate de lupoj.

» Mi rimarkis la strabajn rigardojn, kiujn li direktis al Arbobarbo, kaj mi diris al mi: “mensogulo”. Arbobarbo rigardis lin laŭ sia longa lanta maniero dum kelkaj minutoj, ĝis la mizerulo tordiĝis sur la planko. Poste li diris finfine: “Ha, hm, mi atendis vin, mastro Vermlango. — Pro tiu nomo la viro eksaltetis. — Gandolfo pli frue alvenis ĉi tien. Do mi scias pri vi tiom, kiom mi bezonas, kaj mi scias kion fari pri vi. Metu ĉiujn ratojn en unu kaptilon, diris Gandolfo; kaj tion mi faros. Nun mi estas la mastro de Isengardo, sed Sarumano estas enŝlosita en sia turego; kaj vi povos iri tien kaj transdoni al li ĉiujn mesaĝojn kiujn vi kapablas elpensi”.

» — Permesu iri, permesu iri! — diris Vermlango. — Mi konas la vojon.

» — Ke vi konis la vojon, tion mi ne dubas, — diris Arbobarbo. — Sed ŝanĝiĝis iomete la aferoj ĉi tie. Iru vidi!

» Li permesis al Vermlango iri, kaj tiu lamiris tra la arkaĵo, dum ni lin sekvis, ĝis li venis internen de la ringo kaj povis vidi la inundon kuŝantan inter li kaj Ortanko. Tiam li sin turnis al ni.

» — Permesu, ke mi foriru! — li plorplendis. — Permesu, ke mi foriru! Miaj mesaĝoj jam senutilas.

» — Ili ja, — diris Arbobarbo. — Sed vi havas nur du elektebl-ecojn: resti kun mi ĝis venos Gandolfo kaj via mastro, aŭ transiri la akvon. Kiun vi elektas?

» La viro tremetis pro mencio pri sia mastro, kaj enakvigis piedon, sed li retropaŝis. “Mi ne scias naĝi”, — li diris.

» — La akvo ne profundas, — diris Arbobarbo. — Ĝi ja malpuras, sed tio ne malutilos al vi, mastro Vermlango. Eniru jam!

» Tiam la mizerulo forplaŭdis en la inundon. Tiu leviĝis preskaŭ ĝis lia kolo antaŭ ol li tro malproksimis pro ke mi vidu lin. Mi laste

vidis lin kroĉiganta al iu malnova barelo aŭ peco da ligno. Sed Arbobarbo vade sekvis lin kaj gvatis lian progreson.

» — Nu, li eniris, — li diris reveninte. — Mi vidis lin rampi laŭ la ŝtupoj supren kvazaŭ tramalseka rato. Ankoraŭ restas iu en la turego: mano etendiĝis kaj entrenis lin. Do tie li troviĝas, kaj mi esperas, ke la bonvenigo plaĉos al li. Nun mi devas iri purigi min de la ŝlimo. Mi estos fore ĉe la norda flanko, se iu deziros alparoli min. Ĉi tie ne troviĝas pura akvo taŭga por enta trinkaĵo aŭ sinbanado. Do junuloj, mi petas vin du gvati ĉe la pordo atende la venontojn. Ili inkluzivos la Mastron de l' Kampoj Rohanaj, atentu! Vi devos bonvenigi lin tiel taŭge kiel vi scipovas: lia sekvantaro travivis grandan batalon kontraŭ la orkoj. Eble vi scias la ĝustan homan vortformon por tia reĝo pli bone ol entoj. Dum mia vivo estis multaj reĝoj en la verdaj kampoj, kaj mi neniam lernis ties parolon aŭ ties nomojn. Ili deziros homnutraĵon kaj pri tio vi ĉion scias laŭ mia supozo. Do trovu tion, kio taŭgas kiel reĝa mangaĵo, se vi povos. — Kaj tie finiĝis la historio. Tamen mi ŝatus scii, kiu estas tiu Vermlango. Ĉu li vere estis konsilanto de la reĝo?

— Tio li estis, — diris Aragorno; — kaj ankaŭ spiono kaj servisto de Sarumano en Rohano. La sorto ne traktis lin pli favore ol li meritis. Ekvidi la ruinon de ĉio, kion li supozis tiel fortika kaj admirinda, estis verŝajne puno sufiĉa. Sed mi timas, ke atendas lin io eĉ pli malbona.

— Jes, mi ne supozas, ke Arbobarbo sendis lin al Ortanko pro bonkoreco, — diris Gaja. — Li ŝajnis iom severe ĝojigita de la afero, kaj private ridis, kiam li iris sin bani kaj trinki. Post tio ni estis tre okupataj, esplorante la rubojn kaj ĉirkaŭpalpe serĉante. Ni trovis du tri konservejojn en diversaj apudaj lokoj, super la nivelo de l' inundo. Sed Arbobarbo alsendis kelkajn entojn, kaj ili forportis sufiĉe multajn varojn.

» — Ni bezonas homnutraĵon por dudek kvin, — la entoj diris, do vi konstatas, ke iu zorge nombris vian aron antaŭ via alveno. Evidente via triopo laŭ la intenco devis akompani la gravulojn. Sed tie vi ne fartus pli bone. Ni retenis tiom bonkvalitajn, kiom ni sendis, mi promesas al vi. Eĉ pli bone, ni sendis neniom da trinkaĵo.

» — Kio pri trinkaĵoj? — mi diris al la entoj.

» — Troviĝas isena akvo, — ili diris, — kaj tio sufiĉas al entoj kaj homoj. — Sed espereble la entoj disponis tempon por brasi siajn pociojn el la montetaj fontoj, kaj ni vidis bukliĝi la barbon de Gandalfo, kiam li revenos. Post foriro de la entoj ni sentis nin lacaj kaj

malsataj. Sed ni ne grumblis — niaj laboroj estis taŭge kompensitaj. Pro nia serĉado por homnutraĵo Grinĉjo malkovris la plej valoran el ĉiuj forĵetaĵoj, tiujn barelojn de Kornblovulo. “Pip-herbo plibonas postmanĝe”, — diris Grinĉjo; tiel okazis la situacio.

— Mi jam perfekte komprenas ĉion, — diris Gimlio.

— Ĉion kun unu escepto, — diris Aragorno: — folioj el Sud-kvarono en Isengardo. Ju pli mi pripensas tion, des pli stranga mi trovas ĝin. Mi neniam antaŭe estis en Isengardo, sed mi vojaĝis en tiu ĉi lando, kaj mi bone konas la vakajn landojn kuŝantajn inter Rohano kaj la Provinco. Nek varoj nek personoj trapasis tiun regionon dum multaj longaj jaroj, ne malkaŝe. Sarumano sekrete traktis kun iu en la Provinco, konjekteble. Vermlangoj estas troveblaj en aliaj domoj krom tiu de la reĝo. Ĉu sur la bareloj estis dato?

— Jes, — diris Grinĉjo. — Tio estis rikoltaĵo de la jaro 1417, nome la pasinta jaro; ne, la jaro antaŭpasinta kompreneble jam: bona jaro.

— Aĥ do, jam finiĝis kia ajn misaĵo okazinta, espereble; aŭ ĉiuokaze ĝi estas aktuale ekster nia atingo, — diris Aragorno. — Tamen mi opinias, ke mi mencios tion al Gandolfo, eĉ se ĝi ŝajnas bagatelo inter liaj gravaj aferoj.

— Mi scivolas, kion li faras, — diris Gaja. — La posttagmezo progresas. Ni iru ĉirkaŭesplori! Vi povas jam eniri Isengardon ĉiuokaze, Paŝegulo, se tion vi volas. Sed ĝi estas vidaĵo ne tre gaja.

Ĉapitro 10

LA VOĈO DE SARUMANO

Ili trapasis la ruinigitan tunelon kaj staris sur ŝtonamaseto rigardante la malhelan rokon de Ortanko kaj ties multajn fenestrojn, ankoraŭ minacan en la dezerto ĉirkaŭanta ĝin. La akvo jam preskaŭ tute foriĝis. Ie-tie restis mornaj flakoj kovritaj de skorio kaj rompitaj; sed la plejparto de la larĝa cirklo estis denove nuda, sovaĝejo de ŝlimo kaj faligita rokaĵo, variolmarkita de nigrigitaj truoj kaj trapunktitaj de stangoj kaj pilastroj ebriecaj kliniĝantaj ien kaj tien. Rande de l' frakasita bovlo kuŝis grandaj deklivoj kaj amasiĝoj kiel ruĝstonetoj alpuŝitaj de ŝtormego; kaj malantaŭ ili la verda implikita valo etendiĝis en la longan ravinon inter la malhelaj brakoj de l' montaro. Trans la dezertejo ili vidis rajdantojn, kiuj serĉis vojon; tiuj venis de la norda flanko, kaj ili jam proksimiĝis al Ortanko.

— Jen Gandolfo, Teodeno kaj ties homoj! — diris Legolaso. — Ni iru renkonti ilin!

— Marŝu singarde! — diris Gaja. — Troviĝas lozaj slaboj, kiuj eble kliniĝos kaj subenĵetos vin en puton, se vi ne zorgemos.

Ili laŭiris la restaĵon de la vojo de la pordoj ĝis Ortanko, marŝante malrapide, ĉar la slaboj estis fendetitaj kaj ŝlimaj. La rajdantoj, vidante ilian proksimiĝon, haltis en ombro de la rokego kaj atendis ilin. Gandolfo rajdis antaŭen por renkonti ilin.

— Nu, Arbobarbo kaj mi havis kelkajn interesajn diskutojn kaj pretigis iujn planojn, — li diris; — kaj ni ĉiuj ĝuis iom da tre necesa ripozo. Nun ni jam devas pluiri. Mi esperas, ke vi, kunuloj, ankaŭ ĉiuj ripozis kaj freŝigis vin?

— Ni tion faris, — diris Gaja. — Sed niaj diskutoj komenciĝis kaj finiĝis en fumo. Tamen ni sentas nin malpli mishumoraj pri Sarumano ol pli frue.

— Ĉu vere? — diris Gandolfo. — Nu, tion ne sentas mi. Nun plenumendas lasta tasko de mi antaŭ ol mi foriros: mi devas adiaŭe viziti Sarumanon. Dangere, kaj verŝajne senutile; sed estas farende. Kiu el

vi volas, tiu rajtas akompani min — sed gardu vin! Kaj ne ŝercu! Por tio la tempo ne oportunas.

— Mi venos, — diris Gimlio. — Mi volas vidi lin kaj sciigi, ĉu li aspektas kiel vi.

— Kaj kiel vi tion ekscios, mastro Gnomo? — demandis Gandolfo. — Sarumano kapablas aspekti kiel mi antaŭ viaj okuloj, se tio konvenus al lia celo rilate vin. Kaj ĉu vi estas jam sufiĉe saĝa por konstati ĉiujn liajn strasaĵojn? Nu, ni vidos, eble. Li eble hezitos montri sin antaŭ tiom da malsimilaj okuloj samtempe. Sed mi ordonis, ke ĉiuj entoj ekstervidigu sin, do eble ni persvados lin elveni.

— Kio minacas? — demandis Grinĉjo. — Ĉu li pafos kontraŭ nin aŭ verŝos fajron tra la fenestroj; aŭ ĉu li kapablas envulti nin de malproksime?

— Tiu lasta plej probablas, se vi alrajdos lian pordon kun la koro leĝera, — diris Gandolfo. — Sed ne antaŭvideblas tio, kion li kapablos, aŭ eble elektos provi. Sovaĝbesto barita ne alireblas senriske. Kaj Sarumano posedas potencon, kiun vi ne divenas. Gardu vin de lia voĉo!

Ili venis al la subo de Ortanko. Ĝi estis nigra, kaj la rokaĵo ekbrilis, kvazaŭ ĝi estus malseka. La multaj ŝtonfacoj havis akrajn eĝojn, kvazaŭ ili estus nove ĉizitaj. Kelkaj strekoj kaj pluraj floksimilaj splitaĵoj proksimaj al la bazo estis la solaj postsignoj pri la furiozo de la entoj.

Orientflanke, inter angulo de du pilieroj, troviĝis pordego alte super la tero; kaj super ĝi estis ŝutrokovrita fenestro kun balkono frontita per ferstangoj. Supren ĝis la sojlo de l' pordo kondukis dudek sep larĝaj ŝtupoj, hakitaj laŭ iu nekonata metiarto el la sama nigra ŝtono. Tio estis la unika enirejo al la turego; sed multaj altaj fenestroj estis eltranĉitaj kun profundaj embrazuroj en la altaj baŭmantaj muroj: tre alte ili gvatis kvazaŭ etaj okuloj sur la apikaj facoj de la kornoj.

Ĉe la subo de l' ŝtuparo Gandolfo kaj la reĝo elseliĝis.

— Mi supreniros, — diris Gandolfo. — Mi jam estis en Ortanko kaj mi konas la danĝeron.

— Ankaŭ mi supreniros, — diris la reĝo. — Mi estas maljuna kaj ne plu timas ajnan danĝeron. Mi deziras alparoli tiun malamikon, kiu tiom mistraktis min. Eomero akompanos min kaj certigos, ke miaj maljunaj piedoj ne stumblu.

— Laŭ via plaĉo, — diris Gandolfo. — Aragorno akompanos min.

La aliaj atendu min sube de la ŝtuparo. Ili aŭdos kaj vidos sufiĉe, se io aŭdindos aŭ vidindos.

— Ne! — diris Gimlio. — Legolaso kaj mi deziras vidi de pli proksime. Nur ni reprezentas ĉi tie niajn popolojn. Ankaŭ ni venos malantaŭe.

— Do venu! — diris Gandolfo kaj supreniris la ŝtuparon, kaj Teodeno iris kune.

La rajdistoj de Rohano sidis maltrankvile sur siaj ĉevaloj ambaŭflanke de l' ŝtuparo kaj morne rigardis la turegon, timante anticipe pri la sorto de sia mastro. Gaja kaj Grinĉjo sidis sur la ŝtupo plej mal-supra, sentante sin tute negravaj kaj malsekuraj.

— Duona kota mejlo de ĉi tie ĝis la pordo! — murmuris Grinĉjo. — Se nur mi povus forŝteliĝi nerimarkite al la gardistejo! Kial ni alvenis? Oni ne volas nin.

Gandolfo staris antaŭ la pordo de Ortanko kaj batis ĝin per sia bastono. Ĝi resonoris kavece.

— Sarumano, Sarumano! — Gandolfo kriis per laŭte ordona voĉo. — Elvenu Sarumano!

Dum kelka tempo mankis respondo. Finfine malbariĝis la fenestro super la pordo, sed neniuj figuro estis videbla ĉe ties malhela truo.

— Kiu estas? — diris voĉo. — Kion vi volas?

Teodeno tremis.

— Tiun voĉon mi konas, — li diris, — kaj mi malbenas la tagon, kiam mi la unuan fojon aŭskultis ĝin.

— Iru alvoki Sarumanon, tial ke vi iĝis ties lakeo, Grimo Verm-lango! — diris Gandolfo. — Kaj ne malŝparu nian tempon!

La fenestro fermiĝis. Ili atendis. Subite ekparolis alia voĉo, malalta kaj melodia, ties sono mem envulta. Kiuj aŭskultis malsingarde tiun voĉon, tiuj malofte povis raporti la vortojn aŭskultitajn; kaj se jes, ili miris, ĉar malmulte da potenco restis en ili. Pleje oni memoris nur, ke estis agrable aŭskulti la parolantan voĉon, ĉio dirita ŝajnis saĝa kaj racia, kaj vekiĝis onia deziro laŭ tuja konsentemo ŝajni mem saĝaj. Kiam parolis aliaj, tiuj ŝajnis kontraste akraj kaj krudaj; kaj se oni kontraŭdiris la voĉon, kolero ĉendiĝis en la koroj de la envultitoj. Ĉe iuj la envulto daŭris nur dum parolis al ili la voĉo, kaj kiam ĝi alparolis aliulon, ili ridetis, kiel ridetas homoj, kiuj travidas trukon de ĵonglisto, dum aliaj gapas pro ĝi. Ĉe multaj la nura sono de la voĉo sufiĉis por sorĉi ilin; sed ĉe tiuj, kiujn ĝi venkis, la sorĉo daŭris kiam ili estis malproksimaj, kaj ĉiam ili aŭdis la flustradon kaj instigadon de tiu

mallaŭta voĉo. Sed neniuj estis netuŝitaj; neniuj rifuzis sen streĉo de menso kaj volo ties pledojn kaj ordonojn, dum la mastro regis ĝin.

— Nu? — ĝi nun diris mildademande. — Kial necesas al vi perturbi mian ripozon? Ĉu vi tute ne lasos min trankvila dumtage aŭ nokte? — Ĝia tono estis kvazaŭ de bonfarema koro ĝenita de vundoj nemerititaj.

Ili suprenrigardis surprizite, ĉar ili aŭdis neniun sonon de lia alveno; kaj ili ekvidis figuron, kiu staris ĉe la barilo kaj rigardis al ili: maljunulo volvita en mantelego kies koloro estis malfacile konstatebla, ĉar ĝi ŝanĝiĝis se ili movis siajn okulojn aŭ se li ekmoviĝis. Lia vizaĝo estis longa, kun alta frunto, li havis okulojn profundajn kaj ombracajn, malfacile sondeblajn, kvankam ties nuna esprimo estis serioza, bonkora kaj iom laca. Liaj haroj kaj barbo estis blankaj, sed eroj nigraj ankoraŭ montriĝis ĉirkaŭ liaj lipoj kaj oreloj.

— Similas, kaj tamen malsimilas, — murmuris Gimlio.

— Tamen vidu, — diris la mallaŭta voĉo. — Almenaŭ du el vi mi konas laŭnome. Gandalfon mi tro bone konas por multe esperi, ke ĉi tie li serĉas helpon aŭ konsilon. Sed vi, Teodeno, Mastro de lando Rohano, estas distingita per viaj nobelaj blazonoj, kaj eĉ pli per la honorinda aspekto de la domo Eorla. Ho, inda filo de Tengelo la Trioble Fama! Kial vi ne venis pli frue, kaj kiel amiko? Multe mi deziris vidi vin, plej potenca reĝon en la okcidento, kaj precipe dum la lastaj jaroj por savi vin de la nesaĝaj kaj misaj konsiloj vin afliktintaj! Ĉu jam tro malfrue? Malgraŭ la vundoj al mi kaŭzintaj, kiujn la homoj de Rohano, ve! partoprenis, mi tamen volas savi vin kaj vin protekti de la ruino, kiu neeviteble proksimiĝas, se vi plu rajdos laŭ la vojo, kiun vi entreprenis. Efektive jam nur mi kapablas helpi vin.

Teodeno malfermis sian buŝon, kvazaŭ ekparolonte, sed nenion li diris. Li supren rigardis al la vizaĝo de Sarumano kies malhelaj sole-naj okuloj turniĝis suben al li, poste al Gandolfo, kaj li ŝajnis heziti. Gandolfo donis nenian signon, sed staris ŝtone silenta kvazaŭ iu, kiu atendas pacience alvokon ankoraŭ ne okazintan. La rajdistoj komence ekmoviĝis, aprobe murmurante pri la vortoj de Sarumano; kaj poste ili silentis kiel homoj sorĉitaj. Al ili ŝajnis, ke Gandolfo neniam alparolis tiel konvene kaj inde ilian mastron. Krudaj kaj orgojlaj nun ŝajnis liaj traktadoj kun Teodeno. Kaj sur iliajn korojn rampis ombro, timo pri iu granda danĝero: finiĝo de Markio en mallumo, al kiu pelas ilin Gandolfo, dum Sarumano staras apud pordo eskapa, tenante ĝin duonaperta tiel ke lumradio trapasas. Estiĝis peza silento.

Estis la gnomo Gimlio, kiu subite interrompis:

— La vortoj de tiu sorĉisto staras kap-al-piede, — li graŭlis, prementante la tenilon de sia hakilo. — En la lingvo de Ortanko helpo signifas ruinon, kaj savado signifas mortigadon, tio estas evidenta. Sed ni venis ĉi tien ne por peti almozon.

— Silentu! — diris Sarumano, kaj dum momenteto lia voĉo estis malpli miela, kaj lumo ekflagris en liaj okuloj kaj malaperis. — Mi ankoraŭ ne volas alparoli vin, Gimlio, filo de Gloino. Malproksima estas via hejmo kaj malmulte koncernas vin la problemoj de tiu ĉi lando. Sed ne laŭ propra intenco vi enmiksiĝis en ili, kaj sekve mi ne kulpigos tiun rolon, kiun vi ludis — brave, mi tute ne dubas. Sed mi petas vin, permesu, ke mi unue interparolu kun la Reĝo de Rohano, mia najbaro, mia iama amiko.

» Kion vi volas diri, Reĝo Teodeno? Ĉu vi volas akcepti pacon kun mi kaj la tutan helpon, kiun miaj konoj, bazitaj sur longaj jaroj, kapablas alporti? Ĉu ni kune konsiliĝu kontraŭ misaj tagoj, kaj riparu niajn ofendojn tiel bonkore, ke niaj posedaĵoj ekfloru eĉ pli bele ol antaŭe?

Ankoraŭ ne respondis Teodeno. Ĉu li luktis kontraŭ kolero aŭ dubo, povis diri neniun. Eomero parolis.

— Mastro, aŭdu min! — li diris. — Nun ni spertas la danĝeron, pri kiu ni estis avertitaj. Ĉu ni elrajdis al venko nur por fine stari konsternitaj pro maljuna mensogulo kun mielo sur la forka lango? Tiel parolus kaptota lupo al la dogoj, se ĝi kapablus. Kian helpon li povas havigi al vi, verdire? Nur eskapi el sia plago li deziras. Sed ĉu vi interparolu kun tiu ĉi peristo de perfido kaj murdo? Rememoru Teodredon ĉe la Travadejoj kaj la tombon de Hamo en la Profundaĵo de Helmo!

— Se paroli pri langoj venenaj, kion ni diru pri la via, juna serpento? — diris Sarumano, kaj ekflagro de lia kolero estis jam klare videbla. — Sed vidu, Eomero, filo de Eomundo! — li denove daŭrigis per sia mallauĝta voĉo. — Al ĉiu ties rolo. Via rolo estas armita braveco, kaj tiel vi akiras grandan honoron. Mortigu tiujn, kiujn via mastro nomas malamikoj, kaj estu kontenta. Ne intermiksiĝu en politikon, kiun vi ne komprenas. Sed eble, se vi iĝos reĝo, vi konstatos, ke tiu devas tre zorge elekti siajn amikojn. La amikecon de Sarumano kaj la potencon de Ortanko oni ne povas facilanime ĵeti flanken, negrave kiaj plendmotivoj eble kuŝas malantaŭe. Vi venkis en batalo, ne en milito — kaj nur per helpo, pri kiu vi ne povas kalkuli alian fojon. Vi eble trovos la Ombron de l' Arbaro poste ĉe via propra pordo: ĝi estas kaprica kaj sensenca kaj ne amas la homaron.

» Sed, mastro de Rohano, ĉu oni nomu min murdinto pro tio, ke kuraĝuloj mortis dumbatale? Se vi ekmilitos, senbezone ĉar tion mi ne deziras, homoj estos mortigitaj. Sed se mi estas pro tio murdisto, tiuokaze la tuta domanaro de Eorlo estas murdmakulita: ĉar tiu ofte militis, kaj atakis multajn defiintojn. Tamen kun iuj ili poste paciĝis, ne malpli valore tial ke ĝi estis politika. Mi diras, Reĝo Teodeno: ĉu ni paciĝu kaj amikiĝu, vi kaj mi? Tion ni rajtas ordoni.

— Ni havos pacon, — diris Teodeno finfine, malklare kaj pene. Pluraj rajdistoj ĝoje ekkriis. Teodeno levis sian manon. — Jes, ni havos pacon, — li diris jam klarvoĉe, — ni havos pacon, kiam vi kaj ĉiuj viaj faraĵoj estos pereintaj, kiel ankaŭ la faraĵoj de via malhela mastro, al kiu vi volas liveri nin. Vi estas mensogulo, Sarumano, kaj koruptanto de la homaj koroj. Vi etendas al mi vian manon kaj mi perceptas nur fingron el la krifaro de Mordoro. Kruela kaj malvarma! Eĉ se via milito kontraŭ min estus justa — kia ĝi ne estis, ĉar eĉ se vi estus dekoble pli saĝa, vi ne rajtus regi min kaj la miajn por via propra profito, kiel vi deziris — eĉ tiam, kion vi dirus pri viaj torĉoj en Ŭestfaldo kaj la infanoj morte kuŝantaj tie? Kaj oni dishakis la korpon de Hamo antaŭ la pordego de Kornburgo post kiam li estis mortinta. Kiam vi, pendos de pendumilo ĉe via fenestro por distri la proprajn korvojn, mi havos pacon kun vi kaj kun Ortanko. Tiom pri la domanaro de Eorlo. Malpli granda filo de grandaj prapatroj mi estas, sed al mi ne necesas leki viajn fingrojn. Turnu vin aliterenen. Sed mi timas, ke via voĉo perdis sian ĉarmon.

La rajdistoj gapis supren al Teodeno kvazaŭ homoj abrupte elrevigitaj. Malglata kiel la voĉo de maljuna korako sonis en iliaj oreloj la voĉo de ilia mastro post la muziko de Sarumano. Sed Sarumano dum kelka tempo estis tordita de kolero. Li apogis sin trans la barilon, kvazaŭ li volus bati la reĝon per sia bastono. Al iuj subite ŝajnis, ke ili vidas serpenton streĉantan sin por frapmordi.

— Pendumiloj kaj korvoj! — li siblis, kaj ili ekstremis pro la hida ŝanĝiĝo. — Kadukulo! Kio estas la domaro de Eorlo, se ne pajlotegmenta stokejo, kie banditoj drinkas en la stinkaĉo kaj iliaj bubaĉoj rampaĉas sur la planko inter la hundoj? Tro longe ili mem eskapis pendumilon. Sed venas la maŝnodo, malrapide tirota, strikta kaj dura en la fino. Pendumiĝu, se vi volas! — Nun lia voĉo ŝanĝiĝis, dum li malrapide reregis sin. — Mi ne scias, kial mi paciencis paroli al vi. Ĉar vin mi ne bezonas, ankaŭ ne vian etan bandon da galopuloj tiel rapide fuĝantaj kiel antaŭenirantaj, ĉevalmastro Teodeno. Antaŭlonge mi

proponis al vi staton, kiun vi ne meritas, nek spiritas. Mi jam denove proponis al vi tion, tiel ke tiuj, kiujn vi trompis, povu klare vidi la elekton inter la vojoj. Vi havigis al mi fanfaronojn kaj insultojn. Estu tiel. Reiru al viaj kabanjoj.

» Sed vi, Gandolfo! Almenaŭ pri vi mi malĝojas, simpatiante vian honton. Kiel povas esti, ke vi toleras tian societon? Ĉar vi estas fiera, Gandolfo, kaj ne senkiale, ĉar vi havas menson noblan kaj okulojn, kiuj rigardas tiel profunden kiel foren. Eĉ nun vi ne atentis miajn konsilojn, ĉu?

Gandolfo ekmoviĝis kaj rigardis supren.

— Ĉu vi volas diri ion, kion vi ne diris dum nia pli frua renkontiĝo? — li demandis. — Aŭ eble vi volas maldiri ion?

— Ĉu maldiri? — Sarumano paŭzis kaj meditis, kvazaŭ konfuzite. — Ĉu maldiri? Mi klopodis konsili vin viaprofite, sed vi apenaŭ aŭskultis. Vi estas fiera kaj ne ŝatas konsilojn, ĉar vi ja havas stokon da propra saĝo. Sed tiukaze vi eraris, laŭ mia opinio, intence miskonprenante miajn celojn. Mi timas, ke pro mia entuziasmo persvadi vin, mi perdis paciencon. Kaj vere mi tion bedaŭras. Ĉar mi sentis al vi nenian malbonvolon; kaj eĉ nun mi neniel sentas tion, malgraŭ tio, ke vi revenas al mi en societo de perfortuloj kaj malkleruloj. Kial senti tion? Ĉu ni ne estas ambaŭ membroj de grava kaj antikva ordeno, tre elstara en Mez-Tero? Nia amikeco same profitus al ni ambaŭ. Multon ni povus ankoraŭ atingi kune por kuraci la malordaĵojn de la mondo. Ni komprenu unu la alian kaj forigu el la pensoj jenajn malpli gravajn personojn. Ili atendu niajn decidojn! Por la komuna bono mi pretas rebonigi la pasintecon kaj akcepti vin. Ĉu vi ne volas interkonsiliĝi kun mi? Ĉu vi ne venu supren?

Tiom granda estis la potenco, uzita de Sarumano dum tiu ĉi lasta provo, ke neniu staranto en aŭdodistanco estis neemociita. Sed nun la envulto estis tute alia. Oni aŭdis admonon de bonkora reĝo al erarinta sed multe amata ministro. Sed oni estis forfermitaj, aŭskultante de malantaŭ pordo vortojn ne direktitajn al ili: misedukitaj infanoj aŭ stultaj servistoj subaŭskultantaj la malfacile kompreneblajn interparolojn de siaj superuloj, kaj scivolantaj kiel tiuj efikos al ilia sorto. El pli alta modlilo estis tiuj du: respektindaj kaj saĝaj. Neeviteble ili kreus aliancon. Gandolfo certe supreniros en la turegon por diskuti aferojn profundajn kaj eksterkomprenajn en la altaj ĉambroj de Ortanko. La pordo estos fermita, kaj oni lasos ilin ekstere, forsenditajn por atendi taskojn aŭ punojn. Eĉ en la menso de Teodeno

formiĝis tiu penso kiel ombro de dubo: “Li perfidos nin; li iros — ni estos perditaj”.

Tiam Gandolfo ridis. Malaperis la fantazio kvazaŭ fumblovaĵo.

— Sarumano, Sarumano! — diris Gandolfo ankoraŭ ridante. — Sarumano, vi maltrafis vian vivovoĵon. Vi devus esti reĝa pajaco perlaboranta vian panon, kaj ankaŭ vipobatojn, per mokimitado de liaj konsilistoj. Ha nu! — li paŭzis, regante sian amuziĝon. — Ĉu kompreni unu la alian? Mi timas, ke mi estas ekster via komprenivo. Sed vin, Sarumano, mi eĉ tro bone nun komprenas. Mi, pli klare ol vi supozas, memoras viajn argumentojn kaj viajn farojn. Kiam mi lastfoje vizitis vin, vi estis provoso de Mordoro, kaj tien mi estis sendota. Vidu, tiu gasto kiu eskapis de la tegmento, pensos dufoje antaŭ ol reeniri tra la pordo. Ne, al mi ŝajnas, ke mi ne supreniru. Sed aŭskultu, Sarumano, la lastan fojon! Ĉu vi ne volas veni ĉi tien? Isengardo pruviĝis malpli fortika ol kredis ĝin viaj espero kaj fantazio. Eble tiel estos pri aliaj aferoj, kiujn vi ankoraŭ fidas. Ĉu ne estus bone forlasi ĝin por kelka tempo? Turniĝi al novaj aferoj, eble? Pensu bone, Sarumano! Ĉu vi ne volas veni suben?

Ombro trapasis la vizaĝon de Sarumano; poste ĝi morte blankiĝis. Antaŭ ol li povis tion kaŝi, oni vidis malantaŭ la angormasko menson duboplenan, malŝatantan resti kaj timantan forlasi sian rifuĝejon. Dum sekundo li hezitis, kaj neniu spiris. Poste li parolis, kaj lia voĉo estis kriĉa kaj malvarma, fiero kaj malamego ekregis lin.

— Ĉu mi venu suben? — li mokis. — Ĉu homo senarmila descendas por paroli kun rabistoj en plena aero? Mi povas aŭdi vin sufiĉe bone de ĉi tie. Stultulo mi ne estas, kaj mi ne fidas vin, Gandolfo! Tiuj ne staras malkaŝe sur mia ŝtuparo, sed mi scias, kie embuskas la sovaĝaj arbardemonoj sub via komando.

— Perfiduloj ĉiam malfidemas, — respondis Gandolfo lace. — Sed pri via haŭto ne necesas al vi timi. Mi ne deziras mortigi aŭ difekti vin, kiel vi sciis, se vi vere komprenus min. Kaj mi kapablas protekti vin. Mi proponas al vi lastan ŝancon. Vi rajtos forlasi Ortankon libere, se vi tion elektos.

— Tio sonas bele, — rikanis Sarumano. — Tute laŭ la maniero de Gandolfo la Griza: tiel degna kaj treege bonkora. Mi ne dubas, ke vi trovus Ortankon ampleksa kaj mian foriron oportuna. Sed kial mi volu foriri? Kaj kion signifas ĉe vi “libera”? Ekzistas kondiĉoj, mi supozas.

— Kialojn por foriro vi povas vidi tra viaj fenestroj, — respondis

Gandolfo. — Aliaj venos al vi en la kapon. Viaj servistoj estas detruitaj kaj dispelitaj; viajn najbarojn vi igis malamikaj; kaj vi trompis vian novan mastron, aŭ provis tion fari. Kiam lia okulo turniĝos ĉi tien, ĝi estos ruĝa okulo de kolero. Sed kiam mi diras “libera”, mi celas diri “libera”: libera el ĉenoj aŭ ordonoj: iru kien vi volas, Sarumano, eĉ al Mordoro, se tion vi deziras. Sed unue vi cedos al mi la ŝlosilon de Ortanko kaj vian bastonon. Ili estos garantiaĵoj por via konduto, redonotaj pli poste, se vi meritos ilin.

La vizaĝo de Sarumano griziĝis, tordiĝis pro kolerego, kaj ruĝa lumo ĉendiĝis en liaj okuloj. Li ridis sovaĝe.

— Pli poste! — li kriis, kaj lia voĉo altiĝis kriĉe. — Pli poste! Jes, kiam vi havos ankaŭ la ŝlosilojn de Baraduro mem, mi supozas; kaj la kronojn de sep reĝoj, kaj la bastonojn de la Kvin Sorĉistoj, kaj aĉetos por vi paron da botoj multe pli grandaj ol tiuj, kiujn vi portas nun. Jen plano modesta. Apenaŭ plano, por kiu necesas mia helpo! Mi havas aliajn farotaĵojn. Ne estu stultulo. Se vi volas trakti kun mi dum vi havas okazon, foriru kaj revenu malebria! Kaj lasu malantaŭe tiujn gorĝotranĉulojn kaj bagatelajn ĉifonulojn, kiuj pendas ĉe via vosto! Bonan tagon! — li sin turnis kaj forlasis la balkonon.

— Revenu, Sarumano! — diris Gandolfo per komanda voĉo. Mirigante la aliajn, Sarumano returniĝis, kaj kvazaŭ trenite kontraŭvole li revenis malrapide al la fera barilo, sin apogante al ĝi, anhelante. Lia vizaĝo estis sulka kaj ŝrumpinta. Lia mano grifece krampis la pezan nigran bastonon. — Mi ne permesis al vi foriri, — diris Gandolfo severe. — Mi ne finparolis. Vi iĝis stultulo, Sarumano, kaj tamen kompatinda. Vi ankoraŭ povis forturniĝi de malsaĝaĵo kaj misagado kaj servi. Sed vi elektis resti kaj maĉi la finaĵojn de viaj malnovaj komplotoj. Do restu! Sed mi avertas vin, ke ne facile vi denove eltiriĝos. Krom se la malhelaj manoj de la oriento elstreĉiĝos por preni vin. Sarumano! — li vokis, kaj lia voĉo kreskis potence kaj aŭtoritate. — Vidu, mi ne estas Gandolfo la Griza, kiun vi perfidis. Mi estas Gandolfo la Blanka, kiu revenis el la morto. Vi ne plu havas koloron, kaj mi forĵetas vin el la ordeno kaj el la Konsilio.

Li levis sian manon, kaj parolis malrapide per klara malvarma voĉo:

— Sarumano, via bastono estas rompita.

Aŭdiĝis krako, kaj la bastono displitiĝis en la mano de Sarumano, kaj ĝia kapaĵo falis suben al la piedoj de Gandolfo.

— Iru! — diris Gandolfo. Kriante, Sarumano retrofalas kaj rampis

for. Tiumomente peza brilaĵo subenĵetiĝis desupre. Ĝi resaltis de la fera barilo, ĝuste kiam Sarumano lasis ĝin, kaj proksime pasante la kapon de Gandolfo, ĝi frapis la ŝtupon, sur kiu li staris. La barilo sonoris kaj rompiĝis. La ŝtupo fendiĝis kaj splitiĝis brilsparke. Sed la bulo estis nedifektita: ĝi ruliĝis plu laŭ la ŝtuparo, globo kristala, malhela, sed ardanta je fajra kerno. Dum ĝi forsaltis al flako, Grinĉjo postkuris kaj levis ĝin.

— Murdema kanajlo! — kriis Eomero. Sed Gandolfo estis sen-emocia.

— Ne, tion ĵetis ne Sarumano, — li diris; — eĉ ne laŭ lia ordono, ŝajnas al mi. Ĝi venis el fenestro tre supra. Disiĝa pafado de mastro Vermlango, mi konjektas, sed maltrafe celita.

— Eble la celo maltrafis, ĉar li ne povis decidi, kiun li pli malamas, vin aŭ Sarumanon, — diris Aragorno.

— Eble estas tiel, — diris Gandolfo. — Malmulte da komforto havos tiuj du per sia kunuleco: ili maĉos vorte unu la alian. Sed la puno estas justa. Se iam Vermlango forlasos Ortankon viva, tio estos pli ol li meritis. Hej, junulo, tion prenos mi! Mi ne petis, ke vi prenu ĝin, — li kriis, abrupte sin turnante kaj vidante Grinĉjon suprenveni laŭ la ŝtuparo, malrapide, kvazaŭ li portus grandan pezaĵon. Li descendis renkonten kaj haste prenis la malhelan globon de la hobito, volvante ĝin per la faldaĵoj de sia mantelo. — Mi prizorgos tion ĉi, — li diris. — Ĝi ne estas io, kion Sarumano elektus forĵeti.

— Sed eble li havos aliajn objektojn por ĵeti, — diris Gimlio. — Se jam finiĝis la debato, ni almenaŭ reiru el la ĵetdistanco!

— Ĝi finiĝis, — diris Gandolfo. — Ni iru.

Ili turnis la dorsojn al la pordo de Ortanko kaj descendis. La rajdistoj ĝoje vivuis la reĝon kaj salutis Gandalfon. La sorĉo de Sarumano estis rompita; ili vidis lin veni vokite, kaj forrampi forsendite.

— Nu, dirite-farite, — diris Gandolfo. — Nun mi devas trovi Arboarbon kaj sciigi al li, kiel progresis la aferoj.

— Certe li jam divenis? — diris Gaja. — Ĉu estis verŝajne, ke ili finiĝu alimaniere?

— Ne tre verŝajne, — respondis Gandolfo, — kvankam ili venis al ekvilibro harpeza. Sed mi havis motivojn por provi, iujn indulgemajn, aliajn malpli. Unue al Sarumano estis montrite, ke la potenco de lia voĉo velkas. Li ne povas esti samtempe tirano kaj konsilanto. Kiam komploto maturiĝas, ĝi ne plu restas sekreta. Tamen li enfalis en

kaptilon, kaj provis trakti unuope siajn viktimojn, dum aliaj aŭskultis. Poste mi donis al li lastan ŝancon tute justan: rezigni tiel pri Mordoro kiel pri siaj privataj planoj kaj kompensi per helpo al ni, kiam ni tion bezonis. Li konas niajn bezonojn, neniu pli bone. Multe li povus servi nin. Sed li elektis tion malakcepti kaj reteni la potencon de Ortanko. Li ne volas servi, nur komandi li volas. Li vivas nun terurite de Mordoro kaj tamen li ankoraŭ revas travivi la ŝtormon. Malfeliĉa stultulo! Li estos vorita, se la potenco de la oriento etendos siajn brakojn al Isengardo. Mi ne povas detrui Ortankon de ekstere, sed kiu scias, kion Saŭrono povas fari?

— Sed se Saŭrono ne venkos? Kion vi faros al li? — demandis Grinĉjo.

— Mi? Nenion! — diris Gandolfo. — Nenion mi faros al li. Mi ne deziras mastrecon. Kio okazos al li? Mi ne scias. Mi funebras, ĉar tiom da estinta bono nun putras en la turego. Tamen por ni la aferoj progresis ne malbone. Strangaj estas la turniĝoj de la sorto! Ofte ja difektas sin malamego! Mi opinias, ke eĉ se ni enirus ni povus trovi en Ortanko malmultajn trezorojn pli valorajn ol tio, kion Vermlango ĵetis al ni.

Akra kriĉo, subite haltigita, aŭdiĝis tra aperta tre alta fenestro.

— Ŝajnas, ke ankaŭ Sarumano same opinias, — diris Gandolfo. — Ni lasu ilin!

Nun ili reiris al la pordegoruino. Apenaŭ ili trapasis sub la arkaĵo, el inter la ombroj de l' amasigitaj ŝtonoj, kie ili staris, elpaŝis Arbobarbo kaj dekduo da aliaj entoj. Aragorno, Gimlio kaj Legolaso mire gapis al ili.

— Jen tri el miaj kunuloj, Arbobarbo, — diris Gandolfo. — Mi parolis pri ili, sed vi ankoraŭ ne vidis ilin. — Li nomis ilin unuope.

La maljuna ento rigardis ilin longe kaj esplore, kaj alparolis ilin laŭvice. Laste li turnis sin al Legolaso:

— Do, vi venis la longan vojon de Mornarbaro, bona elfo? Tre granda arbarego ĝi iam estis!

— Kaj plu estas, — diris Legolaso. — Sed ne tiom granda, ke ni ĝiaj loĝantoj tediĝas vidante novajn arbojn. Mi tre ŝatus vojaĝi en la Fan-gorna Arbaro. Mi apenaŭ pasis ties randon, kaj mi ne volis retroiri.

La okuloj de Arbobarbo ekglimis plezure.

— Mi esperas, ke via deziro realiĝos antaŭ ol la montoj multe pliaĝiĝos, — li diris.

— Mi venos, se tion permesos la sorto, — diris Legolaso. — Mi interkonsentis kun mia amiko, ke se ĉio iros bone, ni vizitos kune Fangornon — laŭ via permeso.

— Iu ajn elfo, kiu akompanos vin, estos bonvena, — diris Arbobarbo.

— La menciita amiko estas ne elfo, — diris Legolaso. — Temas pri Gimlio, filo ne Gloino, jene. — Gimlio profunde riverencis, kaj hakilo glitis el lia zono kaj klakis surtere.

— Hum, hm! Ha nu, — diris Arbobarbo, rigardante lin malhelokule. — Gnome kaj hakilportanto! Hum! Mi bonvolas al elfoj; sed vi petas multon. Jen stranga amikeco.

— Stranga ĝi eble ŝajnas, — diris Legolaso, — sed dum Gimlio vivos, mi ne venos sola al Fangorno. Lia hakilo ne celas arbojn, sed orkajn nukojn, ho Fangorno, mastro de l' Fangorna Arbaro. Kvardek du li hakis en la batalo.

— Hu! Vidu! — diris Arbobarbo. — Jen rakonto pli agrabla! Nu, nu, la aferoj progresu laŭvole; kaj ne necesas hasti renkonte al ili. Sed jam ni devas provizore disiĝi. La tago proksimiĝas al la fino, tamen Gandolfo diras, ke vi devas foriri antaŭ la noktiĝo, kaj la Mastro de Markio forte deziras la propran hejmon.

— Jes, ni devas iri, kaj jam nun, — diris Gandolfo. — Mi timas, ke mi devas forpreni de vi viajn pordgardistojn. Sed vi sufiĉe bone travivos sen ili.

— Eble jes, — diris Arbobarbo. — Sed ili mankos al mi. Ni tiel rapide amikiĝis, ke ŝajnas al mi, ke mi iĝas hastema — retroirante al la juneco, eble. Sed vidu, ili estas la unua novaĵo sub la suno kaj luno, kiun mi rimarkis dum longa, longa tempo. Mi ne forgesos ilin. Mi inkluzivis iliajn nomojn en la Longan Liston. Entoj tion memoros:

*Entoj elteraj, monte maljunaj,
vaste vagantaj, akvotrinkemaj;
ĉasule malsataj, infanoj-hobitoj,
rida popolo, etaj estuloj,*

ili daŭre amikos tiom longe, kiom renoviĝos la folioj. Fartu bone! Sed se vi aŭdos novaĵojn tie en via agrabla lando, en la Provinco, sendu al mi informon! Vi scias, kion mi celas: informo aŭ ekvido de la entedzinoj. Venu mem, se tio eblos!

— Ni tion faros! — diris Gaja kaj Grinĉjo kune, kaj ili forturniĝis

rapide. Arbobarbo rigardis ilin kaj silentis kelkan tempon, skuante penseme sian kapon. Poste li sin turnis al Gandalfo.

— Do, Sarumano ne volis foriri, ĉu? — li diris. — Tion mi supozis. Lia koro tiel putras, kiel koro de nigra huorno. Tamen, se mi estus venkita kaj se estus detruitaj ĉiuj miaj arboj, mi ne elvenus, dum restus al mi unusola malhela kaŝtruo.

— Ne, — diris Gandalfo. — Sed vi ne komplotis kovri la tutan mondon per viaj arboj kaj sufoki ĉiujn aliajn vivantaĵojn. Sed jen vi havas, Sarumano restas por dorloti sian malamegon kaj teksti denove tiajn araneaĵojn, kiajn li povas. Li havas la ŝlosilon de Ortanko. Sed nepre oni ne permesu, ke li eskapu.

— Efektive, ne! Entoj tion aranĝos, — diris Arbobarbo. — Sarumano ne metos sian plandon for de la roko, sen mia permeso. Entoj lin priatentos.

— Bone! — diris Gandalfo. — Tion mi esperis. Nun mi povos iri kaj reveni al aliaj aferoj kun unu zorgo malpli. Sed vi devas esti singardaj. La akvoj jam malinundis. Ne sufiĉos nur postenigi sentinelojn ĉirkaŭ la turego, mi timas. Sendube estis elfositaj profundaj pasejoj sub Ortanko, kaj Sarumano esperas iri kaj reveni nerimarkite, post nelonge. Se vi entreprenos la taskon, mi petas vin enverŝi denove la akvojn kaj daŭrigi ĝis Isengardo estos stagna lago, aŭ vi eltrovos la elirejojn. Kiam ĉiuj subteraj lokoj estos dronintaj kaj la elirejoj blokitaj, tiam Sarumano devos resti supraetaĝe kaj trarigardi la fenestrojn.

— Fidu la entojn! — diris Arbobarbo. — Mi traserĉos la valon de kapo ĝis piedoj kaj rigardos sub ĉiun ŝtoneton. Arboj revenos por loĝi ĉi tie, arboj maljunaj, arboj sovaĝaj. Mi nomos ĝin Gardarbaro. Eĉ sciuro ne eniros tien sen mia scio. Fidu la entojn. Ĝis pasos sepoble tiom da jaroj, dum kiuj li turmentis nin, ni ne laciĝos pri la gardo.

Ĉapitro 11

LA PALANTIRO

La suno estis sinkanta malantaŭ la longan okcidentan branĉon de la montoj, kiam Gandolfo kaj liaj kunuloj, kaj la reĝo kun liaj rajdistoj, ekiris denove el Isengardo. Gandolfo sidigis Gajan malantaŭ si, kaj Aragorno Grinĉjon. Du reĝaj soldatoj antaŭeniris rajdante rapide kaj baldaŭ forpasis el la vido malsupre en la valon. La ceteraj sekvis facilpaŝe.

Entoj en solena vico staris statuece ĉe la pordego kun la longaj brakoj suprenlevitaj, sed ili eligis neniun sonon. Gaja kaj Grinĉjo retro-rigardis, kiam ili jam trairis iom la serpentumitan vojon. Sunlumo ankoraŭ brilis sur la ĉielo, sed longaj ombroj etendiĝis super Isengardo: grizaj ruinoj jam falantaj en mallumon. Tie staris Arbobarbo sola nun, kiel malproksima stumpo de maljuna arbo: la hobitoj pensis pri la unua renkontiĝo, sur la sunumita breto ĉeborde de Fangorno.

Ili alvenis la pilastron de la Blanka Mano. La pilastro plu staris, sed la gravurita mano estis deĵetita kaj diserige frakasita. Ĝuste en la mezo de la vojo kuŝis la longa montrofinĝro, blanka en la krepusko, ĝia ruĝa ungo estis nigre malheliĝanta.

— La entoj priatentas ĉiujn detalojn! — diris Gandolfo.

Ili rajdis plu, kaj la vespero fondiĝis en la valo.

— Ĉu ni rajdos tre longe hodiaŭ vespere, Gandolfo? — demandis Gaja post iom da tempo. — Mi ne scias, kiel vi sentas vin kun bagatela ĉifonulo pendanta malantaŭ vi; sed la ĉifonulo laciĝis kaj volonte ĉesos pendi kaj kuŝiĝos.

— Do tion vi aŭdis, ĉu? — diris Gandolfo. — Ne lasu, ke tio estigu rankoron! Estu dankema, ke vortoj pli longaj ne estis celitaj al vi. Li neniam antaŭe renkontis hobiton kaj ne sciis kiel vin alparoli. Sed li atentis vin. Se tio malkuspos vian fieron, mi povas diri, ke ĉi-momente vi kaj Grinĉjo pli okupas liajn pensojn ol ĉiuj ni aliaj. Kiuj vi estas; kiel vi venis tien, kaj kial; ĉu vi estis kaptitaj kaj, se jes, kiel vi eskapis kiam pereis ĉiuj orkoj — ĝuste tiaj problemetoj ĝenas la

grandan menson de Sarumano. Rikano de li, Gajadoko, estas kompimento, se vi sentas vin honorita pro lia interesiĝo.

— Dankon! Sed pli honore estas pendu ĉe via vosto, Gandalfo. Ekzemple, en tiu situacio oni havas eblecon duan fojon starigi demandon. Ĉu ni rajdos longe ĉi-nokte?

Gandalfo ridis.

— Hobito plej nedampebla! Ĉiuj sorĉistoj devus zorgi pri unu-du hobitoj, kiuj instruu al ili la signifon de la vortoj kaj korektu ilin. Mi petas vian pardonon. Sed mi dediĉis penson eĉ al tiaj simplaj aferoj. Ni rajdos dum kelkaj horoj, malhaste, ĝis ni alvenos la finon de la valo. Morgaŭ ni devus rajdi pli rapide. Kiam ni venis, ni intencis iri rekte de Isengardo al la reĝa domo en Edoraso tra la ebenaĵo, rajdo kelktaga. Sed ni pripensis kaj ŝanĝis la planon. Kurieroj iris antaŭen al la Profundaĵo de Helmo, por averti, ke la reĝo revenos morgaŭ. De tie li rajdos kun multaj soldatoj al Dunharo laŭ vojetoj sur la montetoj. Ekde nun ne pli ol du aŭ tri samtempe rajtas iri malkaŝite tra la ebenaĵo, ĉu tage ĉu nokte, kiam tio estas evitebla.

— Aŭ neniom aŭ duobla porcio, jen via maniero! — diris Gaja. — Mi timas, ke mi rigardas ne pli malproksimen ol ĝis la hodiaŭa kuŝejo. Kie kaj kio estas la Profundaĵo de Helmo kaj ĉio cetera? Mi scias nenion pri tiu ĉi tereno.

— Do prefere lernu iom, se vi volas kompreni la okazaĵojn. Sed ne ĝuste nun, kaj ne per mi: premas min tro multaj pripensendaĵoj.

— En ordo, mi demandos al Paŝegulo apud la bivaka fajro: li estas malpli kaŝema. Sed pro kio tiu ĉi sekureco? Mi kredis, ke la batalon ni gajnis!

— Jes, ni venkis, sed nur en la unua batalo, kaj tio per si mem pli grandigas nian danĝeron. Ekzistis ia ligiteco inter Isengardo kaj Mordoro, kiun mi ĝis nun ne sondis. Kiel ili interŝanĝis informojn, mi ne tute certas; sed tion ili faris. La Okulo de Baraduro certe rigardas senpacience al la Sorĉista Valo, ŝajnas al mi, kaj al Rohano. Ju malpli ĝi vidas, des pli bone.

La vojo pasiĝis malrapide, serpentumante tra la valo. Jen pli fore, jen pli proksime, Iseno fluis sur sia ŝtonoza fundo. Nokto malsupreniris de la montaro. Ĉiuj nebuletoj jam malaperis. Blovis vento malvarma. La luno, jam kreske rondiĝanta, plenigis la orientan ĉielon per pala malvarma brileto. La ŝultroj de l' montoj dekstre deklivis al la nudaj montetoj. Grize antaŭ ili apertiĝis la larĝa ebenaĵo.

Finfine ili haltis. Poste ili deflankiĝis postlasinte la ĉefvojon kaj denove iris laŭ la dolĉa supra herbaro. Irinte okcidenten post ĉirkaŭ unu mejlo ili alvenis valon. Tiu apertiĝis suden, retrokliniĝante al la deklivo de ronda Dol Barano, la lasta monto de la nordaj montaroj, verdsuba, kronita de eriko. La valflankoj hirtis je la pasintjara filiko, meze de kiu la strikte volvitaj printempofrondoj ekpuŝiĝis tra la dolĉaroma tero. Dornarbustoj kreskis dense sur la malaltaj teramasoj, kaj sub tiuj ili bivakis, proksimume du horojn antaŭ la mezo de la nokto. Ili ĉendis fajron en kavaĵo, inter la radikoj de diskreska krataĝo, arbece alta, tordita pro maljuneco sed ĉiumembre sana. Burĝonoj ŝveliĝis sur ĉiu branĉeta ekstremo.

Sentineloj estis postenigitaj, po du ĉiun vaĉperiodon. La aliaj, vespermanĝinte, volvis sin per manteloj kaj dormis. La hobitoj kuŝis en angulo senakompane sur amaso de malnova filiko. Gaja estis dormema, sed Grinĉjo nun ŝajnis strange senripoza. La filikoj krakis kaj sibilis dum li tordiĝis kaj turniĝis.

— Kio estas al vi? — demandis Gaja. — Ĉu vi surkuŝas formik-
ejon?

— Ne, — diris Grinĉjo, — sed mi ne estas komforta. Mi scivolas, kiom da tempo pasis de kiam mi lastfoje dormis en lito?

— Kalkulu per fingro! — oscedis Gaja. — Sed vi certe scias, de kiam ni forlasis Lorienon.

— Ah, tiom! — diris Grinĉjo. — Mi aludis realan liton en dormo-
ĉambro.

— Nu, do Rivendelo, — diris Gaja. — Sed mi povus dormi kie ajn hodiaŭ.

— Vi bonŝancis, Gaja, — diris Grinĉjo mallaŭte, post paŭzo. — Vi rajdis kun Gandolfo.

— Nu, do kio?

— Ĉu vi informiĝis aŭ ekkonis ion pere de li?

— Jes, sufiĉe multe. Pli ol kutime. Sed vi aŭdis ĉion aŭ la plejparton; vi estis tute proksime, kaj ni ne interŝanĝis sekretojn. Sed vi rajtos iri kun li morgaŭ, se vi opinias plimulte melki lin — kaj se li konsentos havi vin.

— Ĉu vere? Bone! Sed li estas tiel nekomunikema, ĉu ne? Tute ne ŝanĝiĝis.

— Ho, male! — diris Gaja, iomete vigliĝante kaj ekscivolante pri tio, kio ĝenas lian kunulon. — Li pligrandiĝis, aŭ io. Li kapablas esti kiel bonkora tiel timiga pli ol antaŭe, ŝajnas al mi. Li ŝanĝiĝis; sed mi

ankoraŭ ne havis okazon konstati ĝis kioma grado. Sed pensu pri la lasta parto de tiu afero kun Sarumano! Memoru, ke Sarumano iam estis superulo de Gandolfo; estro de l' Konsilio, kio ajn tiu estas precize. Li estis Sarumano la Blanka. Gandolfo estas nun la Blanka. Sarumano venis laŭordone, kaj lia bastono estis forprenita; kaj poste estis ordonite, ke li iru, kaj li iris.

— Nu, se Gandolfo entute ŝanĝiĝis, nun li estas pli ol antaŭe nekomunikema, jen ĉio, — Grinĉjo argumentis. — Ekzemple, tiu vitra globo. Ĝi ŝajnis tre plaĉi al li. Ion li scias aŭ konjektas pri ĝi. Sed ĉu li sciigis tion al ni? Eĉ ne unuvorte. Tamen levis ĝin mi, kaj mi malhelpis, ke ĝi ruliĝu en flakon. “Hej, junulo, tion prenos mi”, — jen ĉio. Mi scivolas, kio ĝi estas? Ĝi sentiĝis tre peza. — La voĉo de Grinĉjo tre mallaŭtiĝis, kvazaŭ li parolus al si.

— Hej, — diris Gaja. — Do ĝuste tio ĝenas vin, ĉu? Nu, knabo Grinĉjo, ne forgesu la sentencon de Gildoro, kiun Sam kutimis citi: “Ne enmiksiĝu en sorĉistajn aferojn, ĉar ili estas subtilaj kaj ekkoleriĝemaj”.

— Sed nia tuta vivo jam dum monatoj estis unu longa enmiksiĝo en la aferojn de sorĉistoj, — diris Grinĉjo. — Mi ŝatus iom da informoj kune kun la danĝero. Mi ŝatus rigardi tiun globon.

— Endormiĝu! — diris Gaja. — Vi sufiĉe informiĝos pli aŭ malpli baldaŭ. Kara mia Grinĉjo, neniuj Tjuko iam ajn superis Brandobokon rilate scivolemon, sed ĉu la tempo konvenas, mi demandas?

— En ordo! Kiel domaĝas, ke mi diras al vi, ke mi ŝatus rigardi tiun ŝtonon? Mi scias, ke mi ne povas havi ĝin, dum maljuna Gandolfo kovas ĝin kiel ovon kokino. Sed ne multe helpas ricevi de vi ne pli ol iu *vi-ne-povas-havi-ĝin-do-endormiĝu!*

— Nu, kion alian mi povus diri? — diris Gaja. — Mi bedaŭras, Grinĉjo, sed vi vere devas atendi la matenon. Mi estos tiom scivola, kiom vi volos post la matenmanĝo, kaj mi helpos laŭ mia kapablo pri iom da sorĉisto-kaĵolado. Sed mi ne plu povas maldormi. Se mi ankoraŭ pli oscedos, mi splitiĝos interorele. Bonan nokton!

Grinĉjo ne respondis. Nun li kuŝis senmove, sed dormo daŭre forestis; kaj lin ne kuraĝigis la sono de Gaja spiranta mallaŭte, ekdorminta kelkajn minutojn post la nokta saluto. Penso pri la malhela globo ŝajnis plifortiĝi, dum ĉio kvietiĝis. Grinĉjo sentis denove ties pezon en siaj manoj, kaj ree vidis la misterajn ruĝajn profundojn, en kiujn li momente rigardis. Li tordiĝis kaj turniĝis kaj klopodis pensi pri io alia.

Finfine li ne plu kapablis toleri tion. Li stariĝis kaj ĉirkaŭrigardis. Estis malvarme, kaj li volvis sin per sia mantelo. La luno brilis frida kaj blanka, rekte en la valon, kaj la ombroj de la arbustoj nigris. Ĉie ĉirkaŭe kuŝis dormaj figuroj. La du sentineloj ne videblis: ili surpris sur la montflanko, eble, aŭ kaŝiĝis en la filiko. Pelite de ia impulso, kiun li ne komprenis, Grinĉjo paŝis singarde ĝis la kuŝejo de Gandalfo. Li subenrigardis al li. La sorĉisto ŝajnis dormanta, sed kun palpebroj ne plene fermitaj: vidiĝis okulbrileto sub liaj longaj okulharoj. Grinĉjo haste retropaŝis. Sed Gandalfo donis neniun indikon; kaj antaŭentrenite ankoraŭfoje, duone kontraŭvole, la hobito ree alrampis de malantaŭ la kapo de la sorĉisto. Tiu estis volvita per lankovrilo kun la mantelo supre sternita; kaj proksime apud li, inter la dekstra flanko kaj la fleksita brako, estis elstaraĵo, io ronda volvita per malhela tuko; lia mano ŝajnis ĵus forglitinta de ĝi al la tero.

Apenaŭ spirante, Grinĉjo rampis pli proksimen, futon post futo. Fine li surgenuiĝis. Poste li etendis kaŝe la manojn kaj malrapide levis la globon; ĝi ŝajnis ne tiel peza kiel li antaŭvidis. “Nur ia fasko da diversaĵoj eble, finfine”, — li pensis kun stranga sento de malŝarĝiĝo; sed li ne remetis la globon. Li staris momente, tenante ĝin. Tiam venis en lian menson ideo. Li foriris piedpinte, trovis grandan ŝtonon, kaj revenis.

Li rapide forprenis la tukon, volvis en ĝin la ŝtonon kaj surgenuiĝe remetis ĝin apud la manon de la sorĉisto. Poste li finfine rigardis tion, kion li malkovris. Jen ĝi: glata kristala globo, nun malhela kaj morta, kuŝanta nude antaŭ liaj genuoj. Grinĉjo levis ĝin, haste kovris ĝin per la propra mantelo, kaj duone turniĝis por reiri al sia lito. Tiumomente Gandalfo turniĝis dumdorme kaj murmuris kelkajn vortojn: ili ŝajnis en fremda lingvo; lia mano elpalpis kaj ektenis la volvitan ŝtonon, poste li suspiris kaj ne plu moviĝis.

— Idiota stultulo! — Grinĉjo murmuris al si. — Vi estas tremponta vin en teruran malagrablaĵon. Tuj remetu ĝin! — Sed li nun konstatis, ke tremas liaj genuoj, kaj li ne aŭdacas sufiĉe proksimiĝi al la sorĉisto por atingi la pakaĵon. “Mi jam ne povos remeti ĝin sen veki lin, — li pensis, — almenaŭ ĝis mi estos pli trankvila. Do egale se mi unue ekrigardos ĝin. Tamen ne ĉi tie!” Li forŝteliĝis kaj eksidis sur verda teramaseto ne malproksime de sia lito. La luno enrigardis trans la randon de la valo.

Grinĉjo sidis kun la genuoj alfleksitaj kaj la globo inter ili. Li kurb- iĝis proksime al ĝi, aspektante kiel avida infano antaŭ bovlo da

manĝaĵo en angulo for de la aliuloj. Li flankentiris sian mantelon kaj rigardis al ĝi. La aero ĉirkaŭ li ŝajnis senmova kaj streĉita. Komence la globo estis malhela, kun lunlumo glimanta sur ĝia surfaco. Poste vidiĝis malforta ardo kaj ekmoviĝo en la kerno, kaj ĝi fiksas liajn okulojn tiel ke li jam ne povis forrigardi. Baldaŭ la tuta interno ŝajnis fajranta; la globo ekgiris, aŭ la lumoj internaj estis turniĝantaj. Subite la lumoj estingiĝis. Li eligis spirospasmon kaj baraktis; sed li restis kurbiĝinta, pretenante per ambaŭ manoj la globon. Pli kaj pli proksimen li kurbiĝis, kaj poste rigidiĝis; dum kelka tempo liaj lipoj moviĝis sensone. Poste kun strangolita krio li falis dorsen kaj kuŝis senmova.

La krio estis trapika. La sentineloj alsaltis de sur la deklivoj. La tuta bivako baldaŭ vigliĝis.

— Do jen la ŝtelinto! — diris Gandolfo. Li haste ĵetkovris per sia mantelo la globon kie ĝi kuŝis. — Sed vi, Grinĉjo! Jen tre bedaŭrinda elturniĝo de l' aferoj! — Li surgenuiĝis apud la korpo de Grinĉjo: la hobito kuŝis surdorse rigida kun senvidaj okuloj, gapantaj al la ĉielo. — Démonaĵo! Kian malbonon li faris al si mem kaj al ni ĉiuj? — La vizaĝo de l' sorĉisto iĝis malloza kaj marasma.

Li kaptis la manon de Grinĉjo kaj kurbiĝis al lia vizaĝo, aŭskultante ĉu li spiras; poste li metis siajn manojn sur lian frunton. La hobito tremegis. Liaj okuloj fermiĝis. Li ekkriis kaj sidiĝis, gapante mirigite al ĉiuj ĉirkaŭaj vizaĝoj, palaj en la lunlumo.

— Ĝi ne estas por vi, Sarumano! — li kriis per alta sentona voĉo, retiriĝante disde Gandolfo. — Mi tuj sendos por ĝi. Ĉu vi komprenas? Diru ĝuste tion! — Poste li baraktis por stariĝi kaj fuĝi, sed Gandolfo retenis lin milde kaj firme.

— Peregrino Tjuko! — li diris. — Revenu!

La hobito malstreĉiĝis kaj retrofalis, tenegante la manon de l' sorĉisto.

— Gandolfo! — li kriis. — Gandolfo! Pardonu min!

— Ĉu pardonu vin? — demandis la sorĉisto. — Unue diru al mi, kion vi faris.

— Mi, mi prenis la globon kaj rigardis ĝin, — balbutis Grinĉjo, — kaj mi vidis aferojn, kiuj timigis min. Kaj mi deziris foriri, sed tion mi ne povis. Kaj poste li venis kaj starigis al mi demandojn; kaj li min rigardis, kaj jen ĉio, kion mi memoras.

— Tio ne sufiĉas, — diris Gandolfo severe. — Kion vi vidis, kaj kion vi diris?

Grinĉjo fermis siajn okulojn kaj tremis, sed diris nenion. Ĉiuj rigardis lin silente, krom Gaja, kiu sin forturnis. Sed la vizaĝo de Gandalfo plu severis.

— Parolu! — li diris.

Per mallaŭta hezita voĉo Grinĉjo rekomencis, kaj liaj vortoj malrapide iĝis pli klaraj kaj pli fortaj.

— Mi vidis malhelan ĉielon, altajn remparojn kaj etajn stelojn. Tio ŝajnis tre malproksima kaj antaŭ tre longe, tamen dura kaj klara. Poste la steloj spasme estingiĝis; ilin forbaris aĵoj flugilhavaj. Vere tre grandaj, ŝajnas al mi; sed en la vitraĵo ili similis gigantajn vespertojn, girantaj ĉirkaŭ la turego. Mi pensis, ke ili estas naŭ. Unu el ili ekflugis kontraŭ min, pli kaj pli grandigante. Tiu havis teruran... ne, ne! Tion mi ne povas diri. Mi klopodis fuĝi, ĉar mi pensis, ke ĝi elflugos; sed kiam ĝi kovris la tutan globon, ĝi malaperis. Poste venis *li*. Li ne parolis tiel, ke mi povu aŭdi vortojn. Li nur rigardis, kaj mi komprenis.

» — Do, vi revenis? Kial vi neglektis raporti dum tiom da tempo?

» Mi ne respondis. Li diris: “Kiu vi estas?” Mi ankaŭ tiam ne respondis, sed tio terure doloris al mi; kaj li insistis, do mi diris: “Hobito”.

» Poste li subite ŝajnis ekvidi min, kaj li priridis min. Estis kruele. Estis kvazaŭ pikiĝi per tranĉiloj. Mi baraktis. Sed li diris: “Atendu momenton! Baldaŭ ni renkontiĝos denove. Diru al Sarumano, ke tiu ĉi frandaĵo ne estos lia. Mi tuj sendos por ĝi. Ĉu vi komprenas? Diru ĝuste tion!”

» Poste li rikanis al mi. Mi sentis ke mi dispeciĝas. Ne, ne! Nenion plu mi povas diri. Mi nenion alian memoras.

— Rigardu min! — diris Gandalfo.

Grinĉjo rigardis al li rekte en la okulojn. La sorĉisto kroĉis momente lian rigardon en silento. Tiam lia vizaĝo iĝis pli milda, kaj spureto de rideto aperis. Li metis sian manon malpreme sur la kapon de Grinĉjo.

— En ordo! — li diris. — Diru nenion pli! Vi ne difektiĝis. En viaj okuloj mankas mensogemo laŭ mia antaŭtimo. Sed ne longe li parolis al vi. Stultulo, sed honesta stultulo vi restas, Peregrino Tjuko. Uloj pli saĝaj farus eventuale pli maltrafe en tia krizo. Sed atentu jenon! Vin savis, kaj ankaŭ ĉiujn viajn amikojn, favora sorto, kiel oni ĝin nomas. Vi ne povas kalkuli pri tio duafoje. Se li demandus al vi ĝuste tie kaj tiam, preskaŭ certe vi dirus ĉion el viaj scioj, pereigante nin ĉiujn. Sed li tro avidis. Li ne volis nur informojn: li volis *vin* rapide, tiel ke li

povu trakti vin malrapide en la Malhela Turego. Ne tremegu! Se vi enmiksiĝis en la aferojn de sorĉistoj, vi devas esti preta pripensi tiajn aferojn. Sed ek! Mi pardonas vin. Estu konsolita! La aferoj ne elfalis tiel malbone, kiel eblis.

Li levis Grinĉjon milde kaj reportis lin al lia lito. Gaja sekvis, kaj sidiĝis apude.

— Kuŝu tie kaj ripozu, se vi povas, Grinĉjo! — diris Gandolfo. — Fidu min. Se vi denove sentos juki viajn manplatojn, sciigu min! Tiaj aferoj estas kuraceblaj. Sed ĉiuokaze, kara hobito, ne metu denove pecon da roko sub mian kubuton! Nun mi lasos vin du kune dum kelka tempo.

Tion dirinte Gandolfo reiris al la aliaj, kiuj plu staradis apud la ortanka ŝtono en ĝena meditado.

— Danĝero venis nokte, kiam malplej atendita, — li diris. — Ni apenaŭ eskapis!

— Kiel fartas la hobito Grinĉjo? — demandis Aragorno.

— Al mi ŝajnas, ke ĉio jam estos en ordo, — respondis Gandolfo. — Ne longe li estis tenata, kaj hobitoj posedas mirindan kapablon refortiĝi. La memoro, aŭ ties hororo, verŝajne velkos rapide. Eble tro rapide. Ĉu vi, Aragorno, prenu la ortankan ŝtonon por gardi? Ĝi estas tasko danĝera.

— Ja danĝera, sed ne al ĉiuj, — diris Aragorno. — Ekzistas iu, kiu rajtas pretendi ĝin. Ĉar tiu certe estas la *palantiro* de Ortanko el la trezorejo de Elendilo, tien metita de la reĝoj de Gondoro. Jam proksimiĝis mia horo. Mi prenos ĝin.

Gandolfo rigardis Aragornon kaj poste, surprizante la aliajn, levis la kovritan ŝtonon kaj riverencis ĝin prezentante.

— Ricevu ĝin, mastro! — li diris, — kiel garantiaĵon pri aliaj aferoj redonotaj. Sed se mi rajtas konsili al vi pri uzado de via propraĵo, ne uzu ĝin — ankoraŭ! Estu singarda!

— Ĉu mi agis haste aŭ malsingarde, atendante kaj prepariĝante dum tiom da longaj jaroj? — demandis Aragorno.

— Neniam ĝis nun. Do ne stumblu ĉe la vojfino, — respondis Gandolfo. — Sed almenaŭ tenu sekreta tiun ĉi aĵon. Vi kaj ĉiuj aliaj, kiuj staras ĉi tie! Antaŭ ĉio la hobito Peregrino ne sciu kie ĝi estas lokita. La mishumoro eble trafos lin denove. Ĉar ve! li mantuŝis kaj enrigardis ĝin, kio devis neniam okazi. Li devis ne tuŝi ĝin en Isengardo, kaj tie mi devis pli rapidi. Sed mia menso direktiĝis al Sarumano, kaj mi divenis la naturon de la ŝtono tro malfrue. Nur nun mi certiĝis pri ĝi.

— Jes, ne povas esti dubo, — diris Aragorno. — Finfine ni konas la ligan inter Isengardo kaj Mordoro, kaj kiel tiu funkciis. Multo estas klarigita.

— Strangajn potencojn havas niaj malamikoj, kaj strangajn malfortaĵojn! — diris Teodeno. — Sed delonge estas dirite: “ofte miso difektas mison”.

— Tio multfoje estis spertita, — diris Gandalfo. — Sed ĉi-foje ni estis strange bonŝancaj. Eble min savis de granda eraro tiu ĉi hobito. Mi pripensis, ĉu mi mem esploru tiun ŝtonon por eltrovi ties utilojn. Se mi farus tion, mi mem estus rivelita al li. Mi ne pretas por tia defio, se entute mi iam pretos. Sed eĉ se mi trovus la forton por min eligi, estus katastrofo, se li vidus min jam nun, ĝis venos la horo, kiam sekreteco ne plu helpos.

— Jam venis tiu horo laŭ mia opinio, — diris Aragorno.

— Ne ankoraŭ, — diris Gandalfo. — Restas mallonga periodo de dubo, kiun ni devas utiligi. Klare la Malamiko supozis, ke la ŝtono estas en Ortanko. Kial ne? Kaj ke sekve la hobito estas kaptito tie, devigita enrigardi la vitron, turmentate de Sarumano. Tiu malhela menso certe jam pleniĝis de la voĉo kaj vizaĝo de la hobito bonanticipe: eble necesos sufiĉe da tempo antaŭ ol li konstatos sian eraron. Ni devas kapti tiun tempon. Ni tro malhastis. Ni devas formoviĝi. La ĉirkaŭaĵo de Isengardo ne plu estas loko por restado. Mi tuj rajdos antaŭen kun Peregrino Tjuko. Estos por li pli bone ol kuŝi en la mal-lumo, dum aliaj dormas.

— Mi retenos Eomeron kaj dek rajdistojn, — diris la reĝo. — Ili rajdos kun mi matene. La ceteraj povos akompani Aragornon kaj rajdi tiel frue, kiel plaĉos al ili.

— Laŭ via plaĉo, — diris Gandalfo. — Sed hastu kiel eble plej rapide al la ŝirmo de la montetoj, al la Profundaĵo de Helmo!

Tiumomente kovris ilin ombro. La hela lunlumo ŝajnis abrupte forigita. Kelkaj rajdistoj ekkriis kaj kaŭris, tenante la brakojn super la kapoj, kvazaŭ por flankenturni baton de supre: blinda timego kaj morteca malvarmo inundis ilin. Kaŭrante ili rigardis supren. Grandega flugila figuro trapasis la lunon kvazaŭ nigra nubo. Ĝi giris kaj iris norden, flugante pli rapide ol ajna vento de Mez-Tero. Antaŭ ĝi la steloj velkis. Ĝi estis jam for.

Ili stariĝis rigidaj kiel ŝtonoj. Gandalfo rigardadis supren, kun la brakoj etenditaj suben malloze, la manoj pugnigitaj.

— Nazgulo! — li kriis. — Kuriero de Mordoro. La ŝtormo venas. La nazguloj jam trapasis la Grandan Riveron! Rajdu, rajdu! Ne atendu la tagiĝon! La rapiduloj ne atendu la lantulojn! Rajdu!

Li forsaltis, vokante Ombrofakson dum li kuris. Aragorno sekvis lin. Veninte al Grinĉjo, Gandalfo levis lin en brakojn.

— Vi akompanos min ĉi-foje, — li diris. — Ombrofakso montros al vi, kiel ĝi scias galopi. — Poste li kuris al sia dormloko. Ombrofakso jam staris tie. Ĵetinte la etan sakon, kiu estis lia sola pakaĵo, sur la ŝultrojn, la sorĉisto sursaltis la dorson de la ĉevalo. Aragorno levis Grinĉjon kaj metis lin en la brakumon de Gandalfo, volvitane per mantelo kaj lankovrilo.

— Adiaŭ! Sekvu rapide! — kriis Gandalfo. — Ek, Ombrofakso!

La granda ĉevalo suprenĵetis la kapon. Ĝia flua vosto tikegis en la lunlumo. Poste ĝi saltis antaŭen, repuŝante la teron, kaj foriris kvazaŭ la norda vento el la montaro.

— Jen bela ripozplena nokto! — diris Gaja al Aragorno. — Iuj ĝuas bonŝancon mirindan. Tiu ne volis dormi, kaj li deziris rajdi kun Gandalfo. Kaj jen li iras! Anstataŭ esti ŝtonigita mem por eterne stari ĉi tie kiel avertilo.

— Se vi la unua levus la ortankan ŝtonon, sed ne li, kiel estus nun? — diris Aragorno. — Vi eble farus pli malbone. Kiu scias? Sed nun vi ŝancas akompani min, mi timas. Senprokraste. Iru pretiĝi kaj kunportu ĉion postlasitan de Grinĉjo. Rapide!

Trans la ebenaĵon rapidegis Ombrofakso, bezonante nek urĝon nek gvidon. Pasis malpli ol unu horo, kaj ili alvenis la Trapasejojn de Iseno kaj transiris ilin. La Monto de la Rajdistoj kaj ties fridaj lancoj kuŝis grizaj malantaŭ ili.

Grinĉjo plifortiĝis. Li sentis sin varma, sed la vento sur lia vizaĝo estis akra kaj freŝiga. Li estis kun Gandalfo. La hororo de la ŝtono kaj de la hida ombro antaŭ la luno velkis, aferoj postlasitaj en la montaj nebuletoj aŭ en pasema sonĝo. Li profunde enspiris.

— Mi ne scias, ke vi rajdas sensele, Gandalfo, — li diris. — Nek selon nek bridon vi havas!

— Mi ne rajdas elfe krom sur Ombrofakso, — diris Gandalfo. — Sed Ombrofakso rifuzas jungaĵon. Oni ne rajdas Ombrofakson: ĝi volonte portas vin, aŭ ne portas. Se ĝi volas, tio sufiĉas. Tiam estas ĝia tasko certigi, ke vi restas sur ĝia dorso, krom se vi elsaltas en la aeron.

— Kiel rapide ĝi iras? — demandis Grinĉjo. — Rapide laŭ la trablovo, sed tre senperturbe. Kaj kiom malpezaj estas ĝiaj hufobatoj!

— Ĝi kuras nun tiel rapide, kiel kapablas la ĉevalo plej rapida galopi, — respondis Gandolfo, — sed tio ne estas rapida laŭ ĝia kriterio. La tereno iom supreniras ĉi tie, kaj estas pli malglata ol estis aliflanke de l' rivero. Sed vidu, kiel la Blankaj Montoj proksimiĝas sub la steloj! Jen estas la Trihiraĵaj montopintoj kvazaŭ nigraj lancoj. Postnelonge ni alvenos la disiĝajn vojojn kaj atingos la Profundan Kavaĵon, kie okazis la batalo antaŭ du noktoj.

Grinĉjo denove silentis kelkan tempon. Li aŭdis Gandalfon kanti al si, murmurantan mallongajn rimfragmentojn en multaj lingvoj, dum pasis sub ili la mejloj. Finfine la sorĉisto komencis kanton, kies vortojn la hobito komprenis: kelkaj versoj venis klare al liaj oreloj malgraŭ la siblado de la vento:

*Altaj ŝipoj, altaj reĝoj,
tri-trioblo kvanta,
kion portis el la lando
trans la mar' fluanta?
Sep stelojn, sep ŝtonojn,
kaj unu arbon blankan.*

— Kion vi recitas, Gandolfo? — demandis Grinĉjo.

— Mi nur ripetis mense kelkajn el la Sciorimoj, — respondis la sorĉisto. — Hobitoj supozeble forgesis ilin, eĉ tiujn, kiujn ili neniam konis.

— Ne, ne tute, — diris Grinĉjo. — Kaj ni havas multajn proprajn, kiuj eble ne interesus vin. Sed mi neniam aŭdis tiun ĉi. Pri kio temas: la sep steloj kaj sep ŝtonoj?

— Pri la *palantiroj* de la antikvaj reĝoj, — diris Gandolfo.

— Kaj kio ili estas?

— La nomo signifas *tio, kio rigardas malproksimen*. La ortanka ŝtono estis unu el ili.

— Do ĝin ne kreis, ne kreis... — Grinĉjo hezitis, — la Malamiko, ĉu?

— Ne, — diris Gandolfo. — Ankaŭ ne Sarumano. Ĝi superas lian arton kaj ankaŭ tiun de Saŭrono. La *palantiroj* devenas el ekster Okcidentio, el Eldamaro. Noldoroj kreis ilin. Mem Feanoro eble ellaboris ilin antaŭ tiom longe, ke la tempo ne estas mezurebla per jaroj. Sed ekzistas nenio, kion ne povas Saŭrono misuzi. Ve al Sarumano!

Tio pereigis lin, kiel mi nun perceptas. Danĝeraj al ni ĉiuj estas la verkoj de arto pli profunda ol ni mem posedas. Tamen estas li, kiu devas akcepti la kulpigon. Stultulo! kiu tenis ĝin sekreta por sia propra profito. Neniun vorton li iam ajn diris pri ĝi al iu ajn el la Konsilio. Ne estis konate al ni, ke iu el la *palantiroj* eskapis el la ruinoj de Gondoro. Ekster la Konsilio oni eĉ ne memoris inter elfoj aŭ homoj, ke tiaj aĵoj iam ekzistis, krom nur en la Sciorimoj, konservitaj inter la popolo de Aragorno.

— Kiel ilin utiligis la antikvaj homoj? — demandis Grinĉjo, ĝoja kaj mirigata, ĉar li ricevas respondojn al tiom da demandoj, kaj scivolanta, kiom longe tio daŭros.

— Por vidi malproksimen, kaj por pense komunikiĝi unu kun alia. Tiel ili longe konservis kaj unuigis la regnon Gondoro. Ili starigis ŝtonojn en Minaso Anor kaj en Minaso Itil, kaj en Ortanko en la cirklo de Isengardo. La ĉefo kaj mastro de tiuj estis sub la Kupolo de Steloj en Osgiliado antaŭ ties ruiniĝo. La aliaj estis tre fore. Malmultaj nun scias kie, ĉar neniu rimo tion diras. Sed en la domo de Elrondo oni rakontas, ke ili estis en Anuminaso, Amono Sul, kaj la ŝtono de Elendilo estis sur la Turmontetoj, kiuj frontas al Mitlondo en la Ljuna Golfo, kie kuŝas la grizaj ŝipoj.

» Ĉiu *palantiro* parolis al ĉiuj aliaj, sed en Osgiliado oni povis tririgardi ĉiujn samtempe. Nun evidentiĝis, ke ĉar Ortanko kontraŭstaris la ŝtormojn de la tempo, sekve nur la *palantiro* de tiu turego restis. Sed sola ĝi povis nenion fari krom vidigi etajn bildojn pri aferoj malproksimaj kaj tagoj antaŭlongaj. Tio sendube estis tre utila al Sarumano, sed ŝajnas, ke li ne estis kontenta. Pli kaj pli malproksimen li rigardis ĝis lia rigardo trafis Baraduron. Tiam li estis kroĉita.

» Kiu scias, kie nun kuŝas ĉiuj aliaj ŝtonoj, frakasitaj, subterigitaj aŭ profunde dronigitaj? Sed almenaŭ unu Saŭrono verŝajne havigis al si kaj regis por siaj celoj. Mi konjektas ke tiu estas la Itila ŝtono, ĉar li antaŭlonge kaptis Minason Itil kaj igis ĝin loko misa: Minaso Morgul ĝi fariĝis.

» Estas jam facile diveni, kiel rapide la vaganta okulo de Sarumano estis kroĉita kaj retenita; kaj kiel ekde tiam li estas persvadita de fore, kaj timigita kiam persvado ne sufiĉis. La mordinto mordita, akcipitro sub krifo de aglo, araneo en ŝtala araneaĵo! Kiom longe, mi scivolas, li estas devigita veni ofte al sia vitraĵo por inspektado kaj instruado, kaj la ortanka ŝtono tiel kliniĝis al Baraduro, ke se iu, krom fortega volo, nun enrigardas ĝin, ĝi portas ties menson kaj

vidkapablon tien rapide? Kaj kiel ĝi tiras al si! Ĉu mi ne spertis tion? Eĉ nun mia koro deziras provi per ĝi mian volforton por konstati, ĉu mi povus forkapti ĝin de li kaj turni ĝin laŭ mia volo: por rigardi trans la larĝajn marojn da akvo kaj da tempo al Tiriono la Bela, kaj percepti la neimageblajn manojn kaj menson de Feanoro kaj ties laborantoj, dum floris la Blanka kaj la Ora Arboj!

Gandolfo suspiris kaj silentiĝis.

— Mi domaĝas, ke mi ne sciis anticipi ĉion ĉi, — diris Grinĉjo. — Mi tute ne konceptis tion, kion mi faris.

— Ho jes, vi konceptis, — diris Gandolfo. — Vi sciis, ke vi agas mise kaj stulte; kaj tion vi diris al vi, kvankam vi ne aŭskultis. Mi ne sciigis al vi pli frue ĉion ĉi, ĉar nur per meditado pri la okazintaĵoj mi fine ekkomprenis, ĝuste dum ni rajdis kune. Sed se mi parolus pli frue, tio ne malpliigus vian deziron, nek igus ĝin pli rezistema. Male! Ne, instruas plej trafe la mano bruligita. Post tio la konsilo pri fajro iras rekte ĝis la koro.

— Vere, — diris Grinĉjo. — Se ĉiuj sep ŝtonoj estus dismetitaj nun antaŭ mi, mi fermus miajn okulojn kaj enpoŝigus miajn manojn.

— Bone! — diris Gandolfo. — Tion mi esperis.

— Sed mi ŝatus scii... — Grinĉjo komencis.

— Indulgon! — kriis Gandolfo. — Se liverado de informoj estu la kuracilo de via scivolemo, mi pasigos la ceteron de miaj tagoj respondante al vi. Kion pli vi volas scii?

— La nomojn de ĉiuj steloj kaj de ĉio vivanta, kaj la tutan historion de Mez-Tero kaj Super-Ĉielo kaj la Disigantaj Maroj, — ridis Grinĉjo. — Kompreneble! Kion malpli? Sed mi ne hastemas ĉi-nokte. Ĉi-momente mi scivolis nur pri la nigra ombro. Mi aŭdis vin krei: “Kuriero de Mordoro”. Kio estis tio? Kion ĝi povus fari ĉe Isengardo?

— Tiu estis Nigra Rajdanto flugilhava, nazgulo. Ĝi povus forkapti vin al la Malhela Turego.

— Sed ĝi ne venis pro mi, ĉu? — hezitis Grinĉjo. — Mi volas scii, ĝi ne sciis, ke mi...

— Kompreneble ne, — diris Gandolfo. — Temas pri ducent leŭgoj aŭ pli en rekta flugo de Baraduro ĝis Ortanko, kaj eĉ nazgulo bezonas kelkajn horojn por flugi de unu al la alia. Sed Sarumano certe enrigardis la ŝtonon post la orka invado, kaj pli el liaj sekretaj pensoj, mi ne dubas, estas legita, ol li intencis. Kuriero estas sendita por konstati, kion li faras. Kaj post tio, kio okazis hodiaŭ nokte, venos alia, ŝajnas al mi, kaj rapide. Do Sarumanon atingos la fina premo de la ŝraŭbtenilo,

en kiun li metis sian manon. Li ne havas kaptiton sendeblan. Li ne havas ŝtonon per kiu vidi, kaj ne povas respondi al la alvoko. Saŭrono nur kredos, ke li forkaŝas la kaptiton kaj rifuzas utiligi la ŝtonon. Ne helpas Sarumanon sciigi la veron al la kuriero. Kvankam Isengardo estas ruinigita, tamen li plu restas sekura en Ortanko. Do ĉu li volas aŭ ne, li ŝajnos ribelulo. Tamen li rifuzis nin ĝuste por eviti tion! Kion li faros en tia problemo, mi ne scias. Li ankoraŭ kapablas, miaopinie, dum en Ortanko, rezisti la naŭ Rajdantojn. Li eble provos tion fari. Li eble provos kapti la nazgulon aŭ almenaŭ mortigi la aĵon, sur kiu li nun rajdas en la aero. Tiuokaze Rohano gardu siajn ĉevalojn! Sed mi ne scias, kiel tio elfalos, ĉu bone aŭ malbone por ni. Povos esti ke la projektoj de la Malamiko estos konfuzitaj, aŭ malhelpataj de lia kole-ro kontraŭ Sarumano. Povos esti, ke li ekscios, ke mi estis tie kaj staris sur la ŝtuparo de Ortanko kun hobitoj ĉevoste. Aŭ li ekscios, ke la heredanto de Elendilo estas viva kaj staris apud mi. Se Vermlangon ne trompis la rohanaj armoj, li rekonos Aragornon kaj la titolon, kiun tiu pretendas. Tion mi plej timas. Kaj sekve ni fuĝas ne for el danĝero, sed en danĝeron pli grandan. Ĉiu paŝo de Ombrofakso proksimigas vin al la Lando de Ombro, Peregrino Tjuko.

Grinĉjo nenion respondis, sed kaptis sian mantelon, kvazaŭ trafus lin subita frostoj. Griza tereno pasis sub ili.

— Vidu jam! — diris Gandalfo. — La ŭestfaldaj valoj malfermiĝas antaŭ ni. Ĉi tie ni revenas al la vojo orienten. Tiu malhela ombro estas la enirejo de la Profundaĵo de Helmo. Tiuvoje kuŝas Aglarondo kaj la Ekbrilaj Kavernoj. Pri ili ne demandu min. Demandu Gimlion, se vi renkontiĝos denove, kaj la unuan fojon vi eble ricevos respondon pli longan ol vi deziras. Vi ne vidis mem la kavernojn ĉi-vojaĝe. Baldaŭ ili longe malantaŭos.

— Mi pensis, ke vi intencas halti ĉe la Profundaĵo de Helmo! — diris Grinĉjo. — Kien vi do iros?

— Al Minaso Tirit, antaŭ ol la militŝtormoj ĉirkaŭos ĝin.

— Ho! Kaj kiom malproksima estas tio?

— Leŭgoj post leŭgoj, — respondis Gandalfo. — Trioble pli malproksime ol la loĝejoj de reĝo Teodeno, kaj tiuj situas pli ol cent mejlojn oriente de ĉi tie, laŭ la flugvojo de la kurieroj de Mordoro. Ombrofakso devos kuri laŭ vojo pli longa. Kiu pruviĝos pli rapida?

» Ni rajdos nun ĝis tagiĝo, kaj tio estos nur post kelkaj horoj. Tiam eĉ Ombrofakso devos ripozi, en iu kavaĵo sur la montetoj: ĉe Edoraso, mi esperas. Dormu, se vi povas! Vi eble vidis la unuan


ekbrilon de aŭroro sur la ora tegmento de la domo de Eorlo. Kaj du tagojn poste vi vidos la purpuran ombron de Monto Mindoluino kaj la murojn de la turego de Denetoro, blankaj en la mateno.

» Jam ek, Ombrofakso! Kuru, bravkora, kuru tiel, kiel vi neniam antaŭe kuris! Nun ni alvenas la terenon, kie vi naskiĝis, kaj ĉiun ŝtonon vi konas. Kuru jam! En rapideco estas espero!

Ombrofakso suprenĵetegis la kapon kaj henis laŭte, kvazaŭ trumpeto vokus ĝin al batalo. Poste ĝi saltis antaŭen. Flagoj bloviĝis de liaj piedoj; nokto ĝin preterhastis.

Dum li malrapide endormiĝis, Grinĉjo spertis strangan senton: li kaj Gandolfo estis ŝtone senmovaj, sidantaj sur statuo de kuranta ĉevalo, dum la mondo forruliĝis sub liaj piedoj kun forta bruo de vento.

BRUNAJ TERENOJ



1. Tol Brandiro
2. Norda Itilio
3. Kairo Andros
4. Mindoluino
5. Osgiliado
6. Minaso Morgul
7. Cirito Ungol
8. Isenbuŝo
9. Linhiro

↓
al Harado

Ĉapitro 1

MALSOVAĜIGO DE SMEAGOLO

Nu, mastro, ni sidas en kaĉo nemiskompreneble, — diris Sam Vato. Li staris deprimate kun kuntiritaj ŝultroj apud Frodo kaj rigardadis per la sulkigitaj okuloj en la krepuskon.

Estis la tria vespero post kiam ili fuĝis el la Kunularo, laŭ ilia proksimuma kalkulo: ili preskaŭ ne sciis precize, dum kiom da horoj ili grimpis kaj penis inter la dezertaj deklivoj kaj ŝtonoj de Emin Muilo, jen retroirante ĉar vojo antaŭen ne troveblis, jen konstatante, ke ili vagis cirkle reen al kie ili estis antaŭ horoj. Tamen entute ili ĉiam progresis orienten, restante laŭeble proksime al la ekstera rando de tiu stranga tordita nodaĵo da montetoj. Sed ĉiam ili trovis ties eksterajn facojn apikaj, altaj kaj nepaseblaj, brovumantaj super la suba ebenaĵo; trans ties malordaj flankoj kuŝis grizaj putrantaj marĉoj, kie nenio moviĝis kaj eĉ birdo ne estis videbla.

La hobitoj nun staris rande de alta klifo, nuda kaj dezerta, kies subaĵon volvis nebuleto; kaj malantaŭ ili leviĝis la krenelaj altejoj kronitaj per drivaj nuboj. Frosta vento blovis el la oriento. Nokto profundigis sur la senformaj terenoj antaŭ ili; ties malsaneca verdo velkis al malvigla bruno. Tre malproksime dekstre Anduino, kiu dum la tago sporade ekbrilis dum ekaperoj de la suno, jam estis kaŝita en ombro. Sed iliaj okuloj ne direktiĝis trans la riveron, reen al Gondoro, al iliaj amikoj, al la homaj landoj. Suden kaj orienten ili rigardadis, kie rande de l' proksimiĝanta nokto pendis malhela linio kvazaŭ foraj montoj da senmova fumo. De tempo al tempo eta ruĝa ekardo flagris fore supren sur la rando de la tero kaj la ĉielo.

— Kia kaĉo! — diris Sam. — Tio estas la sola loko, el ĉiuj pri kiuj ni aŭdis, kiun ni ne volas vidi de pli proksime; kaj tio estas la sola loko, kiun ni klopodas alveni! Kaj ĝuste tien ni ne povas alveni, neniel. Ni sekvis tute malĝustan vojon, ŝajne. Ni ne povas descendi; kaj se ni tamen sukcesus, ni trovus tiun tutan terenon fetora marĉo, mi garantias. Fu! Ĉu vi flaras ĝin? — Li snufis la venton.

— Jes, mi flaras ĝin, — diris Frodo, sed li ne moviĝis, kaj liaj okuloj fikse rigardis, forgvatante al la malhela linio kaj la flagra flamo. — Mordoro! — li murmuris subvoĉe. — Se nepras tien iri, prefere veni tien rapide kaj fari finon! — Li tremegis. La vento estis frosta kaj tamen peza je odoro de frida putriĝo. Finfine li diris: — Nu, ni ne povas resti ĉi tie la tutan nokton, senkonsidere pri la kaĉo. Ni devas trovi lokon pli ŝirmatan por bivaki; kaj eble alia tago montros al ni vojon.

— Aŭ alia kaj alia kaj alia, — murmuris Sam. — Aŭ eble neniu tago. Ni venis laŭ malĝusta vojo.

— Mi scivolas, — diris Frodo. — Mia sorto estas, ŝajnas al mi, iri ĝis tiu jena Ombro, do la vojo estos trovita. Sed ĉu montros ĝin al mi bono aŭ miso? Nia sola eta espero troviĝis en rapideco. Prokrasto donas avantaĝon al la Malamiko, kaj jen mi estas: malhelpata. Ĉu nin gvidas la volo de la Malhela Turego? Ĉiuj niaj elektoj pruviĝis mis-sortaj. Mi devis forlasi la Kunularon multe pli frue, kaj proksimiĝi el la nordo, oriente de l' rivero kaj de Emin Muilo, kaj tiel trans la malmolon de Ebenajo Batala ĝis la pasejoj de Mordoro. Sed nun ne eblas, ke vi kaj mi solaj trovu vojon returne, kaj la orkoj spionvagadas sur la orienta bordo. Ĉiu tago pasanta estas valora tago perdita. Mi estas laca, Sam. Mi ne scias, kio estas farebla. Kiom da manĝaĵo restas al ni?

— Nur tiu, kiel ĝi nomiĝas, *lembaso*, sinjoro Frodo. Sufiĉa kvanto. Sed ĝi estas pli bona ol nenio, tre longe manĝebla. Tion mi ne supozis tamen, kiam mi la unuan fojon puŝis en ĝi denton, ke iam estontece mi ekdeziros alternativon. Sed nun mi ja: pecon da ordinara pano, kaj kruĉon — vere, duonkruĉon — da biero, tion mi volonte glutus. Mi trenis miajn kuirilojn la tutan vojon ekde nia lasta bivakaro, kaj kiom tio profitis? Nenio por krei fajron, unuavice, kaj nenio por kuiri, eĉ ne herbo!

Ili forturniĝis kaj descendis en ŝtonozan kavaĵon. La subiranta suno estis kaptita en nuboj, kaj nokto venis rapide. Ili dormis tiel bone kiel eblis en la malvarmo, laŭvice, en angulo inter grandaj seg-randaj pinakloj el vetertrivita roko; almenaŭ ili estis ŝirmataj kontraŭ la orienta vento.

— Ĉu vi denove vidis ilin, sinjoro Frodo? — demandis Sam, dum ili sidis rigidaj kaj frostaj, maĉante oblatojn da *lembaso* en la malvarma grizo de la frua mateno.

— Ne, — diris Frodo. — Mi aŭdis nenion kaj vidis nenion jam dum du noktoj.

— Ankaŭ mi ne, — diris Sam. — Grrr! Tiuj okuloj ja nervozigis min! Sed eble ni finfine forskuis lin, tiun mizeran kaŝiranton. Golumo! Mi havigos al li *golumon* en la gorĝo, se mi iam intermanigos lian kolon.

— Mi esperas, ke tio neniam necesos, — diris Frodo. — Mi ne scias, kiel li sekvis nin; sed povas esti ke li reperdis nin, kiel vi diras. En tiu ĉi seka dezerta lando ne povas esti, ke ni lasas multajn spurojn, ankaŭ ne multan odoron, eĉ por lia snufa nazo.

— Mi esperas, ke tia estas la afero, — diris Sam. — Mi volas, ke ni liberiĝu de li porĉiame!

— Ankaŭ mi, — diris Frodo, — sed ne li estas mia ĉefa ĝeno. Mi volas, ke ni liberiĝu de jenaj montetoj! Mi malamegas ilin. Mi sentas min nuda oriente, malhelpate ĉi tie kun nenio krom la mortaj plataĵoj inter mi kaj la jena Ombro. En ĝi estas Okulo. Ek al! Nepras, ke ni iel malsupreniru hodiaŭ.

Sed tiu tago pasadis, kaj kiam posttagmezo velke proksimiĝis al vespero, ili ankoraŭ grimpis laŭlonge de la firsto kaj trovis nenian elirvojon.

Kelkfoje en la silento de tiu dezerto ili ŝajne aŭdis mallaŭtajn bruetojn malantaŭe, ŝtoneton falantan, aŭ imagitan paŝon de frapantaj piedoj sur la rokaĵo. Sed se ili haltis kaj staris aŭskultante, ili nenion plu aŭdis, nenion krom la vento susuranta trans la randojn de la ŝtonoj; tamen eĉ tio memorigis al ili spiron mallaŭte siblantan inter akraj dentoj.

Dum tiu tuta tago la ekstera rando de Emin Muilo kurbiĝis iom-post-iom norden, dum ili penis antaŭen. Sur ĝia ekstremaĵo jam etendiĝis larĝa malorda plataĵo el striita kaj vetermodifita rokaĵo, kiun interrompis de tempo al tempo tranĉeosimilaj ravinetoj, kiuj deklivis apike suben al profundaj fendaĵoj sur la klifosurfaco. Por trovi vojon tra tiuj fendaĵoj, kiuj estiĝis ĉiam pli profundaj kaj pli oftaj, Frodo kaj Sam estis pelitaj maldekstren, tre fore de la rando, kaj ili ne rimarkis, ke dum pluraj mejloj ili iradas malrapide sed seninterrompe suben: la supraĵo de la klifo sinkadis al la nivelo de la suba tereno.

Finfine ili estis haltigitaj. La firsto pli abrupte kurbiĝis norden kaj estis traŝanĉita de ravino pli profunda. Aliflanke ĝi denove baŭmis supren, tra multaj klaftoj unusalte: granda griza klifo minacis antaŭ

ili, tranĉita apike suben kvazaŭ de tranĉila bato. Ili ne plu povis iri antaŭen kaj devis turniĝi okcidenten aŭ orienten. Sed okcidenten nur kondukis ilin al pli da peno kaj prokrasto, reen al la kerno de la montaro; orienten kondukis ilin al la ekstera kruteĝaĵo.

— Nenio alia eblas ol suben grimpi laŭ tiu ĉi ravineto, Sam, — diris Frodo. — Ni vidu ĝis kio ĝi kondukas!

— Ĝis malagrabla falebleco, mi vetas, — diris Sam.

La fendaĵo estis pli longa kaj pli profunda ol ĝi aspektis. Iom longe sube ili trovis plurajn torditajn kaj stumpajn arbojn, la unuajn kiujn ili jam de kelkaj tagoj vidis: plejparte torditajn betulojn, kun jen kaj jen abioj. Multaj estis mortintaj kaj skeletaj, ĝiskerne morditaj de la orientaj ventoj. Iam en epoko pli milda certe estis atentinda densejo en la ravino, sed nun post eble kvindek paŝoj la arboj ĉesis, kvankam malnovaj rompitaĵoj stumpoj displuiĝis preskaŭ ĝis la rando de la klifo. La subo de la fendegaĵo, kiu kuŝis laŭlonge de rokfendeta ekstremaĵo, estis raspa pro rompitaĵoj kaj deklivis apike suben. Kiam ili finfine alvenis ĝian finon, Frodo kaŭris kaj kliniĝis antaŭen.

— Vidu! — li diris. — Ni certe malsupreniris longe, aŭ la klifo sinkis. Ĝi estas multe malpli alta ĉi tie ol antaŭe, kaj ĝi aspektas ankaŭ pli facila.

Sam surgenuiĝis apude kaj malvolonte rigardis trans la randon. Poste li ekrigardis supren al la baŭmanta klifego je ilia maldekstro.

— Ĉu pli facila? — li gruntis. — Nu, supozeble ĉiam pli facilas iri suben ol supren. Kiu ne scias flugi, tiu povas salti!

— Ĝi estus ankoraŭ longa salto, — diris Frodo. — Proksimume, nu... — li stariĝis momente, mezurante ĝin per la okuloj — ... proksimume dek ok klaftojn, mi supozas. Ne pli.

— Kaj tio sufiĉas! — diris Sam. — Aĥ! Kiom mi malŝatas suben rigardi de sur altaĵo! Sed rigardado pli preferindas ol grimrado.

— Malgraŭ tio, — diris Frodo, — mi opinias, ke eblas grimpi suben ĉi tie; kaj mi opinias, ke ni devos provi. Vidu, la rokaĵo tre malsimilas tion, kio ĝi estis antaŭ kelkaj mejloj. Ĝi glitis kaj fendiĝis.

La ekstera surfaco ja ne plu estis tiel apika kaj iomete deklivis antaŭen. Ĝi aspektis kiel granda remparo aŭ marmuro, kies fundamento moviĝis, tiel ke ĝiaj tavoloj estis tute torditaj kaj malordigitaj, lasante grandajn fendojn kaj longajn oblikvajn randojn, kiuj kelkloke larĝis kiel ŝtupoj.

— Kaj se temas pri descendo, ni prefere provu tuj. Mallumiĝas frue. Ŝajnas al mi, ke venos ŝtormo.

La fumecka malklaro de la montoj oriente perdiĝis en nigro pli profunda, kiu jam etendiĝis per longaj brakoj okcidenten. Fora murmuro de tondro portiĝis sur la kreskanta venteto. Frodo snufis la aeron kaj rigardis dubeme al la ĉielo. Li zonis sian mantelon, striktigis la zonon kaj ĝustigis surdorse sian malpezan tornistran; poste li ekpaŝis al la rando.

— Mi intencas provi tion, — li diris.

— Tre bone! — diris Sam morne. — Sed mi iros la unua.

— Ĉu vi? — diris Frodo. — Kio igis vin ŝanĝi vian opinion pri grim-pado?

— Mian opinion mi ne ŝanĝis. Sed estas sagace meti pli malalten tiun, kiu pli probable forglitos. Mi ne volas fali sur vin kaj forbati vin — ne sagace estus mortigi du per unu falo.

Antaŭ ol Frodo povis malhelpi lin, li sidiĝis, svingis la krurojn trans la randon, kaj turnis sin, serĉante per palpetado piedapogon. Dubinde, ĉu li iam faris neekscitite ion pli kuraĝan, aŭ pli malsaĝan.

— Ne, ne! Sam, olda azeno! — diris Frodo. — Vi certe mortigos vin, transirante tiel, ne rigardante eĉ por vidi kien celi. Revenu! — Li kaptis Samon sub la akseloj kaj denove tiris lin supren. — Nun atendu iom kaj paciencu! — li diris. Poste li kuŝiĝis sur la teron, kliniĝante antaŭen kaj rigardante suben; sed la lumo ŝajnis rapide velkanta, kvankam la suno ankoraŭ ne subiris. — Al mi ŝajnas, ke tion ni povus kapabli. Ĉiuokaze mi povus; kaj ankaŭ vi povus, se vi malpanikiĝus kaj zorge sekvus min.

— Mi ne scias, kiel vi povas tiom certi, — diris Sam. — Ha! Per tiu ĉi lumo vi ne povas vidi ĝis la fundo. Kio se vi alvenos lokon, kie nenien metebblas la manoj aŭ piedoj?

— Mi regrimpu supozeble, — diris Frodo.

— Facile direbla, — kontraŭdiris Sam. — Prefere atendi la matedon kaj pli da lumo.

— Ne! Ne, se tion mi povas, — diris Frodo kun subita stranga emfazego. — Mi domaĝas ĉiun horon, ĉiun minuton. Mi subeniros provi. Ne sekvu ĝis mi revenos aŭ alkrios!

Kroĉante sin al la ŝtona rando de la klifo per siaj fingroj, li malabrupte subenigis sin ĝis, kiam liaj brakoj estis preskaŭ plene elstreĉitaj, liaj piedfingroj trovis breteton.

— Unu paŝon sube! — li diris. — Kaj tiu ĉi breteto plilarĝiĝas dekstre. Mi povus stari tie senkroĉe. Mi... — liaj vortoj fortranĉiĝis.

La hasta mallumo, jam ege ekrapidanta, alkuris el la oriento kaj englutis la ĉielon. Aŭdiĝis supre seka fenda tondrobruo. Brula fulmo subenbatiĝis en la montetaron. Poste venis frapo de sovaĝa vento, kaj kun ĝi, enmiksiĝante en ties blekego, venis alta akra kriĉo. La hobitoj aŭdis ĝuste tian krion fore en Mariŝo, dum ili fuĝis el Hobiturbo, kaj eĉ tie en la arbaroj de la Provinco ĝi frostigis ilian sangon. Ĉi tie ekstere en la dezerto ĝia teruro estis multe pli forta: ĝi trapikis ilin per fridaj klingoj de hororo kaj malespero, haltigante la koron kaj la spiron. Sam falis vizaĝaltere. Senintence Frodo malkroĉiĝis kaj metis la manojn al sia kapo kaj la oreloj. Li ŝanceliĝis, glitis kaj glisis suben kun vekrio.

Sam aŭdis lin kaj pene rampis ĝis la rando.

— Mastro, mastro! — li vokis. — Mastro!

Neniun respondon li aŭdis. Li konstatis, ke li tremas ĉiumembre, sed li koncentrigis sian spiron kaj denove kriis:

— Mastro!

La vento ŝajnis retroblovi la voĉon en lian gorĝon, sed kiam ĝi pasis, blekante tra la ravineto kaj foren tra la montetoj, mallauĉta responda krio atingis liajn orelojn:

— En ordo, en ordo! Mi estas ĉi tie. Sed vidi mi ne povas.

Frodo vokis feblavoĉe. Li ja ne estis tre malproksima. Li glisis, sed ne falis kaj trafis abrupte per la piedoj breteton pli larĝan ne multajn paŝojn sube. Feliĉe la rokfaco tiuloke kliniĝis sufiĉe malantaŭen, kaj la vento premis lin al la klifo, tiel ke li ne falis antaŭen. Li iom ekregis sin, apogante sian vizaĝon al la malvarma ŝtono, sentante bategadon de sia koro. Sed aŭ la mallumo definitiviĝis, aŭ liaj okuloj ĉesis vidi. Ĉio ĉirkaŭ li estis nigra. Li scivolis, ĉu li blindiĝis. Li profunde enspiris.

— Revenu! revenu! — li aŭdis la voĉon de Sam el la nigro supre.

— Mi ne povas, — li diris. — Mi ne povas vidi. Mi ne povas trovi kroĉejon. Mi ankoraŭ ne povas moviĝi.

— Kion mi faru, sinjoro Frodo? Kion mi faru? — kriis Sam, alkliniĝante vere danĝere. Kial lia mastro ne povas vidi? Estis malhele, certe, sed ne komplete mallume. Li povis vidi Frodon sube, grizan forlasitan figuron dispuŝitan al la klifo. Sed li estis tro fore atingebla de ajna helpa mano.

Aŭdiĝis alia tondrobruo, kaj poste venis la pluvo. Kiel blindiga kovrilo hajlomiksita ĝi peliĝis kontraŭ la klifon, frostige malvarma.

— Mi venos malsupren al vi, — kriis Sam, kvankam kiel li esperis tiamaniere helpi li ne sciis diri.

— Ne, ne! Atendu! — Frodo revokis, jam pli malfeble. — Mi saniĝos baldaŭ. Mi jam sentas min pli bone. Atendu! Vi nenion povas fari sen ŝnuro.

— Ŝnuro! — kriis Sam, parolante agitite al si pro ekscitiĝo kaj malŝarĝiĝo. — Nu, ĉu mi ne meritus esti pendumita ŝnurofine kiel averto al ŝtipokapuloj! Vi estas nenia alia ol klapomankulo, Sam Vato: tion diris al mi sufiĉe ofte la Avulo, ĉar tio estis vorto ŝatata de li. Ŝnuro!

— Ĉesu babilaĉi! — kriis Frodo, jam sufiĉe refortiĝinta por sperti tiel amuziĝon kiel senpaciencon. — Lasu pri via Avulo! Ĉu vi provas informi vin, ke iom da ŝnuro vi havas en la poŝo? Se jes, diru tion!

— Jes, sinjoro Frodo, en mia tornistro, ĉu ne. Mi portis ĝin tra centoj da mejloj, kaj tion mi komplete forgesis!

— Do ekagu kaj malsuprenigu ties finon!

Rapide Sam formetis sian tornistran kaj palpserĉis en ĝi. Jen efektive ĉe la fundo estis volvaĵo de la silke griza ŝnuro farita de la popolo de Lorieno. Li ĵetis finon al sia mastro. La mallumo ŝajnis leviĝi for de l' okuloj de Frodo, aŭ eble revenis lia vidpovo. Li povis vidi la grizan linion subenpendanta, kaj al li ŝajnis, ke ĝi havas silkan rebrilon. Jam havante punkton en la mallumo al kiu li direktu sian rigardon, li sentis sin malpli kapturita. Klinante antaŭen sian pezon, li ligis la finon ĉirkaŭ sian talion kaj poste li kaptis ambaŭmane la ŝnuron.

Sam retropaŝis kaj krampis siajn piedojn per stumpo unu-du paŝojn for de la rando. Duone trenite, duone grimpante, Frodo supreniris kaj ĵetis sin teren.

Tondro graŭlis kaj muĝis en malproksimo, sed la pluvo daŭre falis abunde. La hobitoj rampis retro al la ravino, sed tie ili ne trovis multe da ŝirmo. Rojetoj da akvo komencis flui suben; baldaŭ tiuj iĝis inundo, kiu plaŭdis kaj nebuletis sur la ŝtonoj, kaj elsputiĝis trans la klifon kvazaŭ defluiloj sur vasta tegmento.

— Mi duondronus tie sube, aŭ tute forviŝiĝus, — diris Frodo. — Kiel bonŝance, ke vi havis tiun ŝnuron!

— Pli bonŝance se mi pensus pri ĝi pli frue, — diris Sam. — Eble vi memoras, ke ili metis tiujn ŝnurojn en la boatojn, kiam ni ekvojaĝis: en la elfa lando. Tio ekplaĉis al mi, kaj mi kaŝis volvaĵon en mia tornistro. Antaŭ jaroj, tio ŝajnas. “Eble tio helpos je multaj bezonoj”, — li diris: Haldiri, aŭ iu el tiu popolo. Kaj li diris prave.

— Domaĝe, ke mi ne pensis kunporti alian pecon, — diris Frodo; — sed mi forlasis la Kunularon tiel haste kaj konfuzite. Se ni nur

posedus sufiĉon, ni povus utiligi ĝin por malsupreniri. Kiel longas via ŝnuro, mi scivolas?

Sam elmetis ĝin malrapide, mezurante ĝin per la brakoj:

— Kvin, dek, dudek, tridek ulnoj, pli malpli, — li diris.

— Kiu supozus tion! — Frodo ekkriis.

— Ha, kiu? — diris Sam. — Elfoj estas mirindaj personoj. Ĝi aspektas iom maldika, sed ĝi estas fortika; kaj mola kiel lakto en la mano. Ankaŭ enpakiĝas dense kaj ekstreme malpezas. Mirinda popolo, efektive.

— Tridek ulnoj! — diris Frodo pripensante. — Mi opinias, ke sufiĉos. Se la ŝtormo forpasos antaŭ la noktiĝo, mi provos ĝin.

— La pluvo jam preskaŭ ĉesis, — diris Sam, — sed ne entreprenu denove ion riskan en la krepusko, sinjoro Frodo! Kaj mi ankoraŭ ne retranskiviligiĝis post tiu kriĉo en la vento, eĉ se vi ja. Kiel Nigra Rajdanto ĝi sonis — sed supre en la aero, se ili scias flugi. Al mi ŝajnas, ke preferi ni ripozu en tiu fendaĵo ĝis forpasos la nokto.

— Kaj al mi ŝajnas, ke mi rifuzas pasigi unu momenton pli ol necesas, haltigite sur tiu ĉi breto dum la okuloj de la Malluma Lando rigardas trans la marĉojn, — diris Frodo.

Tion dirinte, li stariĝis kaj aliris ree la fundon de la ravineto. Li elrigardis. Klara ĉielo disvolviĝis denove en la oriento. La periferioj de la ŝtormo leviĝis ĉifonaj kaj malsekaj, kaj la ĉefa turbulo jam pasis por etendi siajn flugilegojn super Emin Muilo, sur kiu la malhela pensado de Saŭrono meditis kelkan tempon. De tie ĝi turniĝis, batante la valon de Anduino per hajlo kaj fulmo, kaj ĵetante sian ombron sur Minason Tirit kun minaco pri milito. Poste, minacante inter la montoj kaj proksimigante siajn grandajn pintkolonojn, ĝi plu ruliĝis lante tra Gondoro kaj la periferioj de Rohano ĝis en malproksimo la rajdistoj sur la ebenaĵo vidis ĝiajn nigrajn kolonojn moviĝantaj malantaŭ la sunon dum ili rajdadis okcidenten. Sed tie ĉi super la dezerto kaj la fetoraj marĉoj la profunde blua vespera ĉielo malfermiĝis ankoraŭfoje, kaj kelkaj palaj steloj aperis kvazaŭ blankaj truetoj sur la baldakeno super la falĉilforma luno.

— Estas bele kapabli denove vidi, — diris Frodo, profunde spirante. — Ĉu vi scias, ke mi dum kelka tempo supozis, ke mi perdis mian vidpovon? Pro la fulmo aŭ io pli malbona. Mi povis vidi nenion, tute nenion, ĝis descendis la griza ŝnuro. Ĝi ŝajnis iel briletadi.

— Ĝi efektive aspektas arĝentece en la malhelo, — diris Sam. — Mi neniam rimarkis tion pli frue, kvankam laŭ mia memoro mi

neniam eligis ĝin de kiam mi ĝin kaŝis. Sed se vi firme emas grimpi, sinjoro Frodo, kiel vi intencas utiligi ĝin? Tridek ulnoj, aŭ ni diru ĉirkaŭ dek ok klaftoj: tio ne estas pli ol via konjekto pri la alteco de la klifo.

Frodo iom meditis.

— Ligu ĝin sekure al tiu stumpo, Sam! — li diris. — Poste, mi opinias, ke vi ĉi-foje realigos vian deziron kaj iros la unua. Mi mallevos vin, kaj ne necesos al vi fari pli ol uzi viajn piedojn kaj manojn por forigi vin de la roko. Kvankam, se vi metos vian pezon sur kelkajn el la bretetoj kaj ripozigos min, tio helpos. Kiam vi estos sube, mi sekvos. Mi nun sentas min sufiĉe refortiĝinta.

— En ordo, — diris Sam base. — Se devas esti, ni faru ĝin tuj! — Li levis la ŝnuron kaj ligis ĝin sekure al la stumpo plej proksima al la rando; poste la alian finon li ligis ĉirkaŭ la propra talio. Malvolonte li turnis sin kaj pretiĝis transiri la randon duafoje.

Tamen ne rezultis eĉ duone tiel malbone, kiel li atendis. La ŝnuro ŝajnis havigi al li memfidon, kvankam li pli ol unufoje fermis siajn okulojn, kiam li rigardis suben inter la piedoj. Troviĝis unu loko maloportuna, kie mankis breteto kaj la klifo estis vertikala kaj eĉ retroklinita iomete; tie li glitis kaj elsvingiĝis sur la arĝenta fadenego. Sed Frodo mallevis lin malrapide kaj zorgeme, kaj finfine ĉio finiĝis. Lia ĉefa timo estis, ke la ŝnurlongo elĉerpiĝos dum li ankoraŭ altas, sed restis pli kontentiga longo en la manoj de Frodo, kiam Sam atingis la fundon kaj alvokis:

— Mi alvenis!

Lia voĉo klare ascendis de sube, sed Frodo ne povis vidi lin; lia griza elfa mantelo mergiĝis kun la krepusko.

Frodo okupis iom pli da tempo sekvante lin. La ŝnuro ĉirkaŭis lian talion kaj estis sekure ligita supre, kaj li mallongigis ĝin tiel ke ĝi haltigus lin antaŭ ol li atingus la fundon; li tamen ne volis riski pri falo, kaj li ne tute dividis la fidon de Sam pri tiu svelta griza fadenego. Malgraŭ tio li trafis du lokojn, kie li devis tute sin doni al ĝi: glataj surfacoj, kie mankis teneblo eĉ por liaj fortaj hobitaj fingroj kaj la bretetoj estis diste apartaj. Sed finfine ankaŭ li surfundiĝis.

— Nu, — li kriis. — Ni sukcesis! Ni eskapis de Emin Muilo! Kaj kio nun, mi scivolas? Eble ni baldaŭ sopiros ree fidindan ĉiokam sub la piedoj.

Sed Sam ne respondis. Li rigardis supren laŭ la klifo.

— Klapomankuloj! — li diris. — Napokapoj! Mia bela ŝnuro! Jen ĝi estas ligita al stumpo, kaj ni ĉe la fundo. Ĝuste bela ŝtupareto por tiu ŝlima Golumo, kiun ni postlasas. Ne forgesu starigi vojindikilon por informi, kien ni iris! Mi taksis tion iom tro facila.

— Se vi kapablas elpensi metodon kaj por uzi la ŝnuron kaj por tamen kunporti ĝin, tiam vi rajtas transigi al mi la klapomankulon aŭ ajnan alian nomon, direktitan al vi de la Avulo, — diris Frodo. — Suprengrimpu kaj malligu ĝin kaj subenigu vin, se tion vi deziras!

Sam gratis sian kapon.

— Ne, mi ne imagas kiel, pardonpete, — li diris. — Sed al mi ne plaĉas postlasi ĝin, jen fakto. — Li karesis la ŝnuron kaj skuis ĝin milde. — Malagrablas disiĝi de io ajn kunportita el la elfa lando. Eble kreis ĝin Galadriela, cetere. Galadriela, — li murmuris, morne kapjesante. Li suprenrigardis kaj tiris lastfoje la ŝnuron kvazaŭ adiaŭe.

Komplete surprizante ambaŭ hobitojn, ĝi malligiĝis. Sam renvers-iĝis, kaj la longaj grizaj volvaĵoj glisis silente suben sur lin. Frodo ridis:

— Kiu ligis la ŝnuron? Bone, ke ĝi eltenis tiom longe! Konsterne, ke mi konfidis al via nodo mian tutan pezon.

Sam ne ridis.

— Mi eble ne tre kompetentas pri grimrado, sinjoro Frodo, — li diris ofendite, — sed mi iom kompetentas pri ŝnuroj kaj pri nodoj. Tio estas familia afero, oni povas diri. Vidu, mia avo, kaj post li mia onklo Andio, kiu estis la plejaĝa frato de la Avulo, posedis dum multaj jaroj ŝnurfarejon apud Tajkampo. Kaj mi tiel sekure kroĉis la stumpon, kiel povus iu ajn, ĉu en ĉu ekster la Provinco.

— Do devas esti, ke la ŝnuro rompiĝis — frotite per la rokando atendeble.

— Mi vetas, ke ne! — diris Sam eĉ pli ofendite. Li kliniĝis kaj esploris la finojn. — Ĝi ne frotiĝis. Eĉ neniu plektero!

— Do, mi timas, ke devas temi pri la nodo, — diris Frodo.

Sam skuis sian kapon kaj ne respondis. Li pasigis penseme la ŝnuron tra siaj fingroj.

— Kredu kion vi volas, sinjoro Frodo, — li diris finfine, — sed mi opinias, ke la ŝnuro malligiĝis propravole, kiam mi ĝin alvokis. — Li volvis ĝin ameme kaj stivis ĝin en la tornistron.

— Ĝi certe venis, — diris Frodo, — kaj jen la ĉefaĵo. Sed nun ni devas pripensi nian sekvan paŝon. Nokto baldaŭ alvenos. Kiel belaj estas la steloj kaj la luno!

— Ili ja feliĉigas la koron, ĉu ne? — diris Sam, suprenrigardante.
— Elfecaj ili estas, iel. Kaj la luno kreskas. Ni ne vidis ĝin jam de du-tri noktoj dum tiu ĉi nuboplena vetero. Ĝi komencas havigi notindan lumon.

— Jes, — diris Frodo, — sed ĝi ne estos plena dum ankoraŭ pluraj tagoj. Mi opinias, ke ni ne provu la marĉojn en lumo de duona luno.

Sub la unuaj noktombroj ili komencis la postan stadion de sia vojaĝo. Post iom da tempo Sam turnis sin kaj retrorigardis al la trapa-sita vojo. La elirejo de l' ravineto estis nigra noĉo en la malhela klifo.

— Mi ĝojas, ke ni havas la ŝnuron, — li diris. — Ni ĉiuokaze starigis etan problemon por tiu vojrabisto. Li provu sur tiuj bretetoj siajn frapajn fipiedojn!

Ili paŝis zorgeme for de la klifosubo, en dezerto de rokoj kaj malglataj ŝtonoj, malsekaj kaj glitigaj pro la peza pluvo. La tereno ankoraŭ abrupte fordeklivis. Ili ne tre longe iris, kiam ili malkovris grandan fendaĵon subite oscedantan nigre antaŭ iliaj piedoj. Ĝi ne estis larĝa, sed ĝi tro larĝis por transsalto en la malhela lumo. Al ili ŝajnis, ke ili aŭdas glugladon de akvo en ĝia profundo. Maldekstre ĝi forkurbiĝis norden, retro al la montetoj, kaj tiel baris al ili la vojon tiudirekte, almenaŭ en la periodo de mallumo.

— Prefere ni serĉu vojon suden laŭ la linio de la klifo, ŝajnas al mi, — diris Sam. — Ni eble trovos tie niĉon aŭ eĉ kavernon aŭ simile.

— Supozeble jes, — diris Frodo. — Mi estas laca, kaj mi opinias, ke mi ne kapablas longe plu grimpaĉi inter ŝtonoj hodiaŭ nokte, kvankam mi domaĝas la prokraston. Mi volas, ke estu klara pado antaŭ ni: tiuokaze mi daŭrigus ĝis miaj kruroj kolapsus.

Ili ne progresis pli facile ĉe la malebena subo de Emin Muilo. Sam ankaŭ ne trovis niĉon aŭ kavaĵon por ŝirmi sin: nur nudajn ŝtonozajn deklivojn albrovumatajn de la klifo, kiu jam denove leviĝis pli alte kaj pli apike, dum ili retroiris. Finfine, elĉerpite, ili simple ĵetis sin surteren malantaŭ rokego kuŝanta ne malproksime de la subo de la krutegaĵo. Tie dum kelka tempo ili sidis mizere kunpremite en la malvarma ŝtoneca nokto, dum dormo ektrafis ilin spite al ĉio, kion ili povis fari por rifuzi ĝin. La luno nun ŝvebis alta kaj klara. Ties maldensa blanka lumo lumigis la facojn de la rokoj kaj inundis la fridajn malridajn murojn de la klifo, igante la tutan baŭman mallumon frosta pala grizo trastrekita de nigraj ombroj.

— Nu, — diris Frodo, stariĝante kaj ĉirkaŭvolvante sin pli strikte per sia mantelo. — Dormu iomete, Sam, kaj prenu mian lankovrilon. Mi marŝos sentinele dum kelka tempo. — Subite li rigidiĝis, kliniĝinte kaptis la brakon de Sam kaj flustris: — Kio estas tio? Rigardu tien ĉe la klifo!

Sam rigardis kaj akre enspiris tra la dentoj.

— Ssss! — li diris. — Jen kio ĝi estas. Estas tiu Golumo! Serpentoj kaj vipuroj! Kaj imagu, ke mi supozis perpleksi lin per nia grimpeto! Rigardu lin! Kvazaŭ fia rampa araneo sur muro.

Suben laŭ la surfaco de krutegaĵo, kiu aspektis apika kaj preskaŭ glata en la pala lunlumo, eta nigra figuro moviĝis kun disetenditaj membroj. Eble ĝiaj molaj kroĉiĝemaj manoj trovadis fendetojn kaj elstaraĵojn, kiujn neniuj hobito povus vidi aŭ utiligi, sed ĝi aspektis kvazaŭ ĝi simple subenrampus per gluecaj kusenetoj, kvazaŭ ia granda ŝteliranto insektspeca. Kaj ĝi descendis kaposuben, kvazaŭ ĝi elflurus la vojon. De tempo al tempo ĝi levis malrapide la kapon, komplete returnante ĝin sur la longa maldikega kolo, kaj la hobitoj ekvidis du palajn brilantajn lumetojn, la okulojn kiuj palpebrumis momente al la luno kaj poste rapide rekovriĝis palpebre.

— Ĉu vi opinias, ke li vidas nin? — demandis Sam.

— Mi ne scias, — diris Frodo kviete, — sed mi kredas, ke ne. Nur malfacile eĉ amikaj okuloj vidas ĉi elfajn mantelojn: mi ne povas vidi vin en ombro eĉ je kelkaj paŝoj. Kaj mi aŭdis, ke li ŝatas nek sunon, nek lunon.

— Do kial li malsupreniĝas ĝuste ĉi tie? — demandis Sam.

— Kviete, Sam! — diris Frodo. — Li flaras nin, eble. Kaj li aŭdas tiel akre kiel la elfoj, laŭdire. Mi opinias, ke li jam aŭdis ion: niajn voĉojn verŝajne. Ni multe kriadis tie malantaŭe; kaj ni paroladis multe tro laŭte ĝis antaŭ minuto.

— Nu, mi tediĝis de li, — diris Sam. — Li alvenis unu fojon tro laŭ mi, kaj mi iros diri ion al li, se mi povos. Supozeble ni jam ne povus eskapi de li ĉiuokaze. — Tirinte la grizan kapuĉon strikte antaŭ la vizaĝon, Sam ŝteliris direkte al la klifo.

— Atentu! — flustris Frodo, sekvante. — Ne alarmu lin! Li estas multe pli danĝera ol li aspektas.

La nigra rampa figuro estis jam trikvarone malsupriĝinta, kaj restis eble pli aŭ malpli kvindek futojn super la klifosubo. Kaŭrante ŝtone senmove en la ombro de la rokego, la hobitoj gvatis lin. Li ŝajne

alvenis malfacilan lokon aŭ estis ial ĝenita. Ili aŭdis lin snufi, kaj de tempo al tempo aŭdiĝis akra spirsiblo, kiu sonis sakre. Li levis sian kapon, kaj ili pensis aŭdi lin kraĉi. Poste li denove ekiris. Nun ili aŭdis lian grincantan kaj fajfantan voĉon.

— Aĥ, sss! Ssingarde, trezoro mia! Pli hasste, malpli rapide. Ni ne risSKU kolbaton, ĉu, trezoro? Ne, trezoro — *golum*? — Li denove levis sian kapon, palpebrumis al la luno kaj rapide fermis la okulojn. — Ni malamass ĝin, — li siblis. — Aĉa, aĉa tremema lumo ĝi estass, sss, ĝi dolorigass al ni la okulojn.

Li jam estis pli malsupre kaj la sibloj iĝis pli fortaj kaj klaraj.

— Kie ĝi esstass, kie ĝi esstass: mia Trezoro, mia Trezoro? Ĝi esstass nia, ĝi esstass, kaj ni volass ĝin. La ŝŝtelintoj, la ŝŝtelintoj, la fiaj ŝŝtelisstetoj. Kie ili troviĝass kun mia Trezoro? Malbena trafu ilin! Ni malamegas ilin.

— Ne sonas, ke li scias, ke ni ĉeestas, ĉu? — flustris Sam. — Kaj kio estas lia Trezoro? Ĉu li aludas la ...

— Ĉit! — spiris Frodo. — Nun li alproksimiĝas, sufiĉe proksimas por aŭdi flustron.

Efektive Golumo jam denove paŭzis, kaj lia kapego sur la magra kolo pendolis de flanko al flanko kvazaŭ li aŭskultus. Liaj palaj okuloj estis duone malfermitaj. Sam regis sin, kvankam liaj fingroj tikis. Liaj okuloj, plenaj de kolero kaj naŭzo, fiksiĝis al la kreitaĉo dum tiu denove ekmoviĝis, ankoraŭ flustrante kaj siblante al si.

Finfine li estis je ne pli ol dekduon da futoj super la tero, rekte super iliaj kapoj. De tiu punkto estis seninterrompa falo, ĉar la klifo estis iom subtranĉita, kaj eĉ Golumo ne povis trovi ajnan tenejon. Li ŝajne klopodis torde turni sin, por ke la kruroj iru antaŭe, kiam subite kun alta fajfa kriĉo li falis. Tion farante li kurbigis ĉirkaŭ sin la krurojn kaj brakojn, kiel araneo kies grimpfadeno disiĝis.

Sam eliris el sia kaŝejo fulmrapide kaj transiris la spacon inter li kaj la klifosubo per du saltoj. Antaŭ ol Golumo povis stariĝi, Sam estis sur li. Sed li trovis Golumon pli malfacila ol li antaŭvidis, eĉ tiel trafitan, subite, nesingardan post falo. Antaŭ ol Sam povis alkroĉiĝi, longaj brakoj kaj kruroj ĉirkaŭis lin senmovigante liajn brakojn, kaj obstina tenego, mola sed terure forta, kunpremis lin kvazaŭ malrapide striktiĝantaj ŝnuretoj; humidaĉaj fingroj palpserĉis lian kolon. Poste akraj dentoj enmordis lian ŝultron. Li povis nenion alian ol bati sian duran rondan kapon kontraŭ la vizaĝon de la kreitaĵo. Golumo siblis kaj kraĉis, sed li ne malkroĉiĝis.

La afero irus pli malbone por Sam, se li estus sola. Sed Frodo salt-stariĝis kaj elingigis Pikilon. Per la maldekstra mano li retrotiris la kapon de Golumo per ties maldensa malrigida hararo, streĉante lian longan kolon kaj devigante liajn palajn venenecajn okulojn gapi al la ĉielo.

— Lasu, Golumo, — li diris. — Jen Pikilo. Vi vidis ĝin iam antaŭe. Lasu, aŭ ĉi-foje vi spertos ĝin! Mi tranĉos al vi la gorĝon.

Golumo kolapsis kaj loziĝis kiel malseka ŝnureto. Sam stariĝis, fin-grumante sian ŝultron. Liaj okuloj subbrulis kolere, sed li ne povis venĝi sin: lia mizera malamiko kuŝis lakeante plorete sur la ŝtonoj.

— Ne dolorigu nin! Ne lasu, ke ili dolorigu min, trezoro! Ili ne turmentoss nin, ĉu, afablaj etaj hobitoj? Ni ne intencis ion malbonan, sed ili sursaltis nin kiel katoj sur povrajn musojn, tion ili faris, trezoro. Kaj ni estas tiel solecaj, *golum'*. Ni traktos ilin afable, tre afable, se ili afablos al ni, ĉu ne, jes, jess.

— Nu, kion fari pri ĝi? — diris Sam. — Ligi ĝin, tiel ke ĝi ne plu povu ŝtele sekvi nin, laŭ mia opinio.

— Sed tio mortigus nin, mortigus nin, — ploretis Golumo. — Kru-elaj etaj hobitoj. Ŝnurumi nin en la fridaj malmolaj terenoj kaj forlasi nin, *golum', golum'*. — Plorsingultoj baŭmis en lia gluglanta gorĝo.

— Ne, — diris Frodo. — Se mortigi lin, ni devus mortigi lin tuje. Sed tion ni ne povas fari, ne dum la aferoj estas tiaj. Kompatindulaĉo. Li faris al ni neniom da malutilo.

— Ho, ĉu ne! — diris Sam, frotante sian ŝultron. — Ĉiuokaze li intencis fari, kaj li intencas fari, mi garantias. Sufoki nin dumdorme, jen lia plano.

— Sendube, — diris Frodo. — Sed tio, kion li intencas fari, estas alia afero. — Li paŭzis kelkan tempon meditante. Golumo kuŝis senmove, sed ĉesis plorkrii. Sam staris rigardante lin minace.

Tiam ŝajnis al Frodo, ke li aŭdas, tute klare sed malproksime, voĉojn el la pasinteco:

Kiel domaĝe, ke Bilbo ne trapikis tiun fian kreaĵon, kiam li havis okazon!

Domaĝe? Kompato retenis lian manon. Domaĝo, kaj kompato: ne trapiki senbezone.

Mi sentas al Golumo neniom da kompato. Li meritas morton.

Jes, meritas. Supozeble vi pravas. Multaj vivantoj meritas morton. Kaj iuj mortantoj meritas la vivon. Ĉu tion vi povas aranĝi? Do ne tro entuziasme prijuĝu mortkondamnon. Ĉar eĉ la tre saĝaj ne antaŭvidas ĉiujn celojn.

— En ordo, — li respondis voĉe, mallevante la glavon. — Tamen mi timas. Kaj malgraŭ tio, kiel vi vidas, mi ne tuŝos la kreaĵon. Ĉar vidante lin, mi efektive kompatas lin.

Sam mire rigardis sian mastron, kiu ŝajnis paroli al neĉeestanto. Golumo levis sian kapon.

— Jess, mizeraj ni estas, trezoro, — li plorplendis. — Mizero, mizero! Hobitoj ne mortigos nin, afablaj hobitoj.

— Ne, ni tion ne faros, — diris Frodo. — Sed ni ankaŭ ne permesos, ke vi foriru. Vi plenas je miso kaj malbonfaro, Golumo. Vi devos akompani nin, finfine, dum ni observas vin. Sed vi devos helpi nin, se vi povos. Mano manon lavas.

— Jess, jes ja, — diris Golumo sidiĝante. — Afablaj hobitoj! Ni iros kun ili. Trovos por ili sendanĝerajn padojn en la mallumo, jes ni faros. Kaj kien ili iras en jenaj malvarmaj duraj terenoj, ni scivolos, jes ni scivolos? — Li suprenrigardis al ili, kaj malforta lumo de ruzo kaj avido flagris momente en liaj palaj palpebrumantaj okuloj.

Sam malridis al li kaj suĉis siajn dentojn; sed li ŝajne perceptis ion strangan pri la humoro de sia mastro, kaj ke la afero jam ne argumenteblas. Tamen mirigis lin la respondo de Frodo.

Frodo rigardis rekte en la okulojn de Golumo, kiuj retiriĝis kaj tordiĝe forturnis sin.

— Tion vi scias, aŭ vi sufiĉe trafe divenas, Smeagolo, — li diris kviete kaj severe. — Ni iras al Mordoro, kompreneble. Kaj vi konas la vojon tien, mi opinias.

— Aĥ! sss! — diris Golumo, kovrante la orelojn per la manoj, kvazaŭ tia honesteco kaj la malkaŝa prononcado de la nomoj doloris al li. — Ni divenis, jes, ni divenis, — li flustris; — kaj ni ne deziris, ke ili iru tien ĉu? Ne, trezoro, ne la afablaj hobitoj. Cindroj, cindroj, kaj polvo, kaj soifo estas tie; kaj ŝaktoj, ŝaktoj, ŝaktoj, kaj orkoj, miloj da orkoj. Afablaj hobitoj devas ne iri — sss — al tiuj lokoj.

— Do vi estis tie? — Frodo insistis. — Kaj vi estas retrenata tien, ĉu ne?

— Jess. Jess. Ne! — kriĉis Golumo. — Unufoje, tio estis senintenca, ĉu ne, trezoro? Jess, senintenca. Sed ni ne reiros, ne, ne! — Tiam subite ŝanĝiĝis lia voĉo kaj lingvaĵo, kaj li plorsingultis gorĝe, kaj parolis sende al ili. — Lasu min trankvila, *golum*! Vi dolorigas min. Ho, miaj povraj manoj, *golum*! Mi, ni, mi ne volas reveni. Mi ne povas trovi ĝin. Mi estas laca. Mi, ni ne povas trovi ĝin, *golum*,

golum', ne, nenie. Ili ĉiam maldormas. Gnomoj, homoj, kaj elfoj, teruraj elfoj kun brilaj okuloj. Mi ne povas trovi ĝin. Aĥ! — Li stariĝis kaj pugnigis sian longan manon je osteca senkarna nodo, skuante ĝin al la oriento. — Ni ne faros! — li kriis. — Ne por vi. — Poste li ree kolapsis. — *Golum', golum'*, — li plorkriis vizaĝaltere. — Ne rigardu nin! Foriru! Endormiĝu!

— Li nek foriros, nek endormiĝos pro via ordono, Smeagolo, — diris Frodo. — Sed se vi vere volas liberiĝi de li denove, vi devas do helpi min. Kaj tio, mi timas, implicas ke vi trovi por ni padon al li. Sed ne necesos, ke vi iru la tutan vojon, ne post la pordegon de lia lando.

Golumo ree eksidis kaj rigardis lin el sub la palpebroj.

— Li troviĝas tiudirekte, — li gakis. — Ĉiam tiudirekte. Orkoj kondukos vin la tutan vojon. Facile troveblas orkoj oriente de l' rivero. Ne postulu de Smeagolo. Povra, povra Smeagolo, li foriris antaŭlonge. Oni forprenis lian Trezoron, kaj li perdiĝis.

— Eble ni retrovos lin, se vi akompanos nin, — diris Frodo.

— Ne, ne, neniam! Li perdis sian Trezoron, — diris Golumo.

— Stariĝu! — diris Frodo.

Golumo stariĝis kaj retropaŝis kontraŭ la klifon.

— Nun! — diris Frodo. — Ĉu vi pli facile trovas padon tage aŭ nokte? Ni estas lacaj, sed se vi elektos la nokton, ni ekiros hodiaŭ nokte.

— La lumegoj dolorigas al ni la okulojn, ili ja, — Golumo plendacis. — Ne sub la Blanka Vizaĝo, ankoraŭ ne. Ĝi iros malantaŭ la montaron baldaŭ, jess. Unue ripozu iom, afablaj hobitoj!

— Do sidigu, — diris Frodo, — kaj ne movigu!

La hobitoj sidigis sin apud li, po unu ambaŭflanke, apogante la dorson al la ŝtonmuro, ripozigante siajn krurojn. Ne necesis vorta interkonsento: ili sciis, ke ili devas ne ekdormi eĉ momente. Malrapide preterpasis la luno. Ombroj descendis de la montetoj, kaj ĉio mal lumiĝis antaŭ ili. La steloj densiĝis kaj helis en la ĉielo. Neniu ekmoviĝis. Golumo sidis kun la kruroj kurbigitaj, genuoj submentone, plataj manoj kaj piedoj dismetitaj sur la tero, la okuloj fermitaj; sed li ŝajnis streĉita, kvazaŭ pensante aŭ aŭskultante.

Frodo rigardis al Sam. Iliaj okuloj renkontiĝis kaj ili komprenis. Ili malstreĉiĝis, klinante malantaŭen siajn kapojn, kaj fermante siajn okulojn aŭ ŝajnigis tion. Baldaŭ la sono de ilia mallaŭta spirado aŭdiĝis. La manoj de Golumo tikis iomete. Apenaŭ rimarkeble lia

kapo moviĝis maldekstren kaj dekstren, kaj jen unu okulo, poste la alia, malfermiĝis mallarĝe. La hobitoj neniun indikon faris.

Subite, kun konsternaj viglo kaj rapideco, rekte de la tero per salto, kvazaŭ lokusta aŭ rana, Golumo saltegis antaŭen en la mallumon. Sed ĝuste tion atendis Frodo kaj Sam. Sam trafis lin antaŭ ol tiu faris du paŝojn post la salto. Frodo veninte malantaŭe kaptis lian kruron kaj ĵetis lin teren.

— Via ŝnuro eble pruviĝos denove utila, Sam, — li diris.

Sam prenis la ŝnuron.

— Kaj kien vi celis en la duraj malvarmaj terenoj, sinjoro Golumo? — li graŭlis. — Ni scivolas, jes, ni scivolas. Por trovi iujn orkojn-amikojn, mi garantias. Vi, aĉa perfidema kreaĵo. Devus ĉi ŝnuro ĉirkaŭi vian kolon, en strikta nodo cetere.

Golumo kuŝis kviete kaj entreprenis neniujn pluajn trukojn. Li ne respondis al Sam, sed direktis al li rigardon rapidan kaj venenan.

— Ni bezonas nur ion por reteni lin, — diris Frodo. — Ni volas, ke li marŝu, do ne utilas ligi liajn krurojn, nek la brakojn, li ŝajnas utiligi ilin preskaŭ same ofte. Ligu unu finon al lia maleolo, kaj tenu firme la alian finon.

Li staris apud Golumo, dum Sam ligis la nodon. La sekvo surprizis ilin ambaŭ. Golumo komencis kriĉi per maldensa ŝira sono, tre hororige aŭskultata. Li tordiĝis kaj provis proksimigi sian buŝon al sia maleolo kaj mordi la ŝnuron. Li daŭre kriĉadis.

Finfine Frodo konvinkiĝis, ke li vere sentas doloron; sed tio ne povis esti pro la nodo. Li esploris ĝin kaj konstatis, ke ĝi ne tro striktas, fakte striktas apenaŭ sufiĉe. Sam estis pli milda ol liaj vortoj.

— Kio estas al vi? — li diris. — Se vi insistas forkuri, vi devas esti ligita; sed ni ne volas dolorigi al vi.

— Ĝi dolorigas, ĝi dolorigas, — siblis Golumo. — Ĝi glaciigas, ĝi mordas! Elfoj tordis ĝin, ili estu malbenataj! Aĉaj kruelaj hobitoj! Jen kial ni provis eskapi, kompreneble tial, trezoro. Ni divenis, ke ili estas hobitoj kruelaj. Ili vizitas elfojn, atakemajn elfojn kun helaj okuloj. Forprenu ĝin. Ĝi dolorigas nin.

— Ne, mi ne forprenos ĝin, — diris Frodo, — krom se, — li momente paŭzis pensante, — krom se eblas promeso dirota de vi, kiun mi povas fidi.

— Ni ĵuros fari tion, kion li volas, jes, jess, — diris Golumo, ankoraŭ tordiĝante kaj palpserĉante sian maleolon. — Ĝi dolorigas nin.

— Ĉu ĵuros? — diris Frodo.

— Smeagolo, — diris Golumo subite kaj klare, larĝe malfermante siajn okulojn kaj rigardante Frodon kun stranga lumo. — Smeagolo ĵuros sur la Trezoro.

Frodo rektiĝis, kaj Sam denove estis surprizita de liaj vortoj kaj lia severa voĉo.

— Sur la Trezoro, ĉu? Kiel vi aŭdacas? Pensu!

Unu Ringo en mallumon ilin guidas kaj katenas.

Ĉu vi dediĉus vian promeson al tio, Smeagolo? Ĝi devigos vin. Sed ĝi estas eĉ pli perfidema ol vi. Ĝi eble tordos viajn vortojn. Gardu vin!

Golumo kaŭris.

— Sur la Trezoro, sur la Trezoro! — li ripetis.

— Kaj kion vi ĵuros? — demandis Frodo.

— Esti tre, tre bonkondata, — diris Golumo. Poste rampinte ĝis la piedoj de Frodo li riverencegis antaŭ li, frustrante raŭke; tremego trapasis lin, kvazaŭ la vortoj skuus eĉ liajn ostojn pro timo. — Smeagolo ĵuros neniam, neniam permesi, ke Li havu ĝin. Neniam! Smeagolo savos ĝin. Sed li devas ĵuri sur la Trezoro.

— Ne! Ne sur ĝi, — diris Frodo, rigardante al li kun severa kompto. — Vi volas nur vidi ĝin kaj tuŝi ĝin, se vi povos, kvankam vi scias, ke tio frenezigus vin. Ne sur ĝi. Ĵuru laŭ ĝi, se vi volas. Ĉar vi scias, kie ĝi estas. Jes, vi scias, Smeagolo. Ĝi estas antaŭ vi.

Momente ŝajnis al Sam, ke lia mastro estas kreskinta kaj Golumo ŝrumpis: alta severa princo, kiu kaŝis sian helecon en griza nubo, kaj ĉe liaj piedoj eta plorkria hundo. Tamen tiuj du estis iel parencaj kaj ne fremdaj. Ili povis atingi la menson unu de la alia. Golumo levis sin kaj komencis palpkaresi Frodon, ĝentilumante antaŭ liaj genuoj.

— Suben! suben! — diris Frodo. — Jam diru la promeson!

— Ni promesas, jes mi promesas! — diris Golumo. — Mi servos la mastron de la Trezoro. Bona mastro, bona Smeagolo, *golum', golum'!* — Subite li ekploris kaj denove mordis sian maleolon.

— Forprenu la ŝnuron, Sam! — diris Frodo.

Malvolonte Sam obeis. Tuj Golumo stariĝis kaj komencis kaprioli kiel batita hundaĉo kies mastro karesis ĝin. De tiu momento okazis en li ŝanĝiĝo, kiu daŭris kelkan tempon. Li parolis malpli sible kaj plorvoĉe, kaj li alparolis rekte siajn kunulojn, ne sian trezoran memon. Li kaŭris kaj retiriĝis se ili proksimiĝis al li, aŭ subite ekmoviĝis, kaj li evitis tuŝi iliajn elfajn mantelojn; sed li estis amikeca, kaj efektive kompatinde avida plaĉi al ili. Li ridgakis kaj kapriolis, se oni spritis,

aŭ eĉ se Frodo alparolis lin afable, kaj ploris se Frodo admonis lin. Sam diris al li malmulton entute. Li pli profunde ol antaŭe suspektis lin, kaj se tio eblas, ŝatis malpli la novan Golumon, la Smeagolon, ol la malnovan.

— Nu, Golumo, aŭ kiel ajn ni devas nomi vin, — li diris, — ek al Foriris la luno, kaj la nokto forpasas. Prefere ni ekiru.

— Jes, jes, — konsentis Golumo, ĉirkaŭdancante. — Ni ekiru! Troviĝas nur unu transira vojo inter la norda kaj suda ekstremoj. Mi trovis ĝin, mi ja. Orkoj ne uzas ĝin, orkoj ne konas ĝin. Orkoj ne transiras la marĉojn, ili ĉirkaŭiras multmejle. Tre bonŝance vi venis ĉi-direkten. Tre bonŝance vi trovis Smeagolon, jes. Sekvu Smeagolon!

Li foriris kelkajn paŝojn kaj retrorigardis scivoleme, kiel hundo invitanta ilin al promeno.

— Atendu iom, Golumo! — kriis Sam. — Jam ne tro malproksimiĝu antaŭe! Mi estos ĉe via vosto, kaj mi tenas preta la ŝnuron.

— Ne, ne! — diris Golumo. — Smeagolo promesis.

En profunda nokto sub malmolaj klaraj steloj ili ekvojaĝis. Golumo kondukis ilin ree norden dum iom da tempo laŭ la vojo jam trapasita; poste li oblikvis dekstren for de la kruta rando de Emin Muilo, suben laŭ la malglataj ŝtonozaj deklivoj al la vastaj subaj marĉejoj. Ili fadis rapide kaj mallaŭte en la mallumon. Tra ĉiuj leŭgoj da dezertejo antaŭ la pordego de Mordoro estis nigra silento.

Ĉapitro 2

LA TRAPASO DE L' MARĈEJO

Golumo moviĝis rapide, kun la kapo kaj kolo antaŭenŝovitaj, ofte guzante tiel la manojn kiel la piedojn. Frodo kaj Sam nur malfacile egalpaŝis kun li; sed ŝajnis, ke li ne plu pensis pri eskapo, kaj kiam ili iom postrestis, li turniĝis kaj atendis ilin. Post iom da tempo li kondukis ilin ĝis la rando de la mallarĝa ravineto, kien ili trafis pli frue; sed ili jam pli malproksimis de la montetaro.

— Jen ĝi! — li kriis. — Troviĝas vojo al la interno, jes. Nun ni sekvos ĝin, elen, jene foren tiudirekte. — Li fingromontris suden kaj orienten al la marĉejo. Tiesodoro alvenis iliajn naztruojn, peza kaj fetora eĉ en la friska nokta aero.

Golumo serĉis tien-reen sur la rando, kaj fine li alvokis ilin.

— Ĉi tie! Ni povos malsupreniri ĉi tie. Smeagolo unu fojon iris ĉi-voje, mi iris ĉi-voje min kaŝante de orkoj.

Li iris la unua, kaj sekvante lin la hobitoj subengrimpis en la mornon. Ne estis malfacile, ĉar la fendo tie estis profunda nur proksimume dek kvin futojn kaj ĉirkaŭ dek du de flanko al flanko. Ĉe la fundo estis fluanta akvo: tio estis fakte la kurejo de unu el la multaj riveretoj, kiuj fluetis suben el la montetoj por nutri la stagnajn lagetojn kaj marĉojn pretere. Golumo turnis sin dekstren, pli-malpli suden, kaj plaŭdis antaŭen kun la piedoj en la malprofunda ŝtonoza fluo. Li ŝajnis ege ĝojigita spertante la akvon, kaj klukridis al si, foje eĉ grakante specon de kanto.

*La land' fridportas,
la manojn mordas,
piedojn maĉas.*

*La rokaj boskoj
simile al ostoj
senkarnaĉas.*

*Sed flak' rivere
malsekas tenere,*

piedojn plaĉas!
Kaj nun ni volas...

— Ha! Ha! Kion ni volas? — li diris, flankenstrabante al la hobitoj.
 — Ni diros al vi, — li grakis. — Li tion divenis antaŭlonge, Baginzo divenis tion. — Ekbrilo aperis en liaj okuloj, kaj Sam, rimarkante tiun ekbrilon en la mallumo, taksis ĝin ege malagrable.

Sen spir' sed alarma;
morte malvarma;
neniam soifas, ĉiam trinkas;
maŝvestite neniam tintas.
Sur tero dronas,
insulon rekonas
esti ja monto;
pensas ke fonto
estas aera.
Glata kaj bela!
Renkonti, plezure!
Kapti bongustan
fiŝon langustan
volas ni nure!

Tiuj vortoj nur igis pli urĝa en la pensoj de Sam problemon, kiu ĝenis lin ekde la momento, kiam li komprenis, ke lia mastro intencas utiligi Golumon kiel gvidanton: problemo pri nutraĵo. Ne venis al li en la kapon, ke eble ankaŭ lia mastro pripensis tion, sed li supozis, ke Golumo tion faris. Efektive, kiel Golumo nutris sin dum sia tuta sol-eca vojaĝado? “Ne tre bone, — pensis Sam. — Li aspektas sufiĉe malsatega. Li ne tro delikatas por provi la guston de hobito se mankas fiŝoj, mi vetas — supoze se li trafus nin senatentaj. Nu, tion li ne faros: ne Samon Vato inter aliaj”.

Dum longa tempo ili stumblis antaŭen en la malhela serpentuma ravineto, aŭ tiel ŝajnis al la lacaj piedoj de Frodo kaj Sam. La ravineto turniĝis orienten, kaj dum la pluiro ĝi plilarĝiĝis kaj iom post iom malprofundiĝis. Finfine la ĉielo paliĝis de la unua matena grizo. Golumo ĝis tiam vidigis neniun laciĝon, sed nun li suprenrigardis kaj haltis.

— La tago proksimas, — li flustris, kvazaŭ Tago estus io, kio eble subaŝskultus lin kaj alsaltus lin. — Smeagolo restos ĉi tie: mi restos ĉi tie, kaj la Flava Vizaĝo ne vidos min.

— Mi ĝojus vidi la sunon, — diris Frodo, — sed ni restos ĉi tie: ni estas tro lacaj por iri pluen nuntempe.

— Vi ne saĝas ĝojante pri la Flava Vizaĝo, — diris Golumo. — Ĝi vidigas vin. Afablaj sagacaj hobitoj restu kun Smeagolo. Orkoj kaj fajoj estas en la najbaraĵo. Ili povas vidi longdistancen. Restu kaj kaŝu vin kun mi!

La triopo sidiĝis por ripozi sube de la rokflanko de la ravineto. Tiu ne multe pli altis nun ol altkreska homo, kaj ĉe la subo estis larĝaj plataj bretoj el seka ŝtonaĵo; la akvo fluis en kanaletoj aliflanke. Frodo kaj Sam sidis sur unu el la platoj, ripozigitaj siajn dorsojn. Golumo padelis kaj skrabis en la fluo.

— Ni devas manĝi iomete da nutraĵo, — diris Frodo. — Ĉu vi malsatas, Smeagolo? Ni havas tre malmulton dividotan, sed ni disponigos al vi tiom, kiom ni povos.

Pro la vorto *malsatas* verdecia lumo ekardis en la palaj okuloj de Golumo, kaj ili ŝajnis eĉ pli elstari ol antaŭe sur lia magra malsaneca vizaĝo. Momente li reprenis sian antaŭan Goluman manieron.

— Ni malssategass, jes malssategass, trezoro, — li diris. — Kion ili manĝas? Ĉu ili havas agrablajn fiŝojn? — Lia lango elpendis inter la akraj flavaj dentoj kaj lekis la senkolorajn lipojn.

— Ne, fiŝojn ni ne havas, — diris Frodo. — Ni havas nur ĉi tion, — li vidigis oblaton da *lembaso*, — kaj akvon, se la akvo ĉi tie estas trinkinda.

— Jess, jess, akvo bela, — diris Golumo. — Trinku ĝin, trinku ĝin, dum ni ankoraŭ povas! Sed kion ili havas, trezoro? Ĉu ĝi maĉblas? Ĉu ĝi bongustas?

Frodo derompis pecon da oblato kaj donis ĝin al li sur ĝia folivolv-aĵo. Golumo snufis la folion kaj lia vizaĝo ŝanĝiĝis: spasma da naŭzo aperis sur ĝi kaj sugesto pri lia malnova malico.

— Smeagolo flaras ĝin! — li diris. — Folioj el la elfa lando, pu! Ili fetoras. Li grimpis tiujn arbojn, kaj li ne povis forlavi la odoron de siaj manoj, miaj belaj manoj. — Faligante la folion, li prenis anguleton de la *lembaso* kaj mordetis ĝin. Li kraĉis, kaj tusado skuis lin.

— Ah! Ne! — li balbutis. — Vi provas sufoki la kompatindan Smeagolon. Polvon kaj cindron li ne povas manĝi. Li devas malsati. Sed al Smeagolo ne gravas. Afablaj hobitoj! Smeagolo ja promesis. Li malsatos. Nutraĵon de hobitoj li ne povas manĝi. Li malsatos. Kompatinda maldika Smeagolo!

— Mi bedaŭras, — diris Frodo, — sed mi ne povas helpi vin, mi

timas. Mi opinias, ke tiu ĉi nutraĵo bonefikus al vi, se vi provus. Sed eble vi eĉ ne povas provi, almenaŭ ne ankoraŭ.

La hobitoj silente maĉis sian *lembason*. Sam opiniis, ke ĝi multe pli bongustas iel, ol ĝi bongustis jam de kelka tempo: la konduto de Golumo igis lin denove atenti ĝian guston. Sed li ne sentis sin komforta. Golumo rigardis ĉiun pecon de mano al buŝo, kiel hundo atenda apud seĝo de tagmanĝanto. Nur kiam ili finmanĝis kaj pretiĝis ripozi, tiam li verŝajne konvinkiĝis, ke ili havas neniujn kaŝitajn frandaĵojn, kiujn li povus dividi. Tiam li iris sidi sola for kelkajn paŝojn kaj iomete plorĝemis.

— Vidu! — Sam flustris al Frodo, ne tro mallaŭte; li vere ne zorgis, ĉu aŭ ne Golumo aŭdas lin. — Ni devas iom dormi; sed ne ambaŭ samtempe dum proksimas tiu kanajlo, kun aŭ sen promeso. Ĉu Smeagolo aŭ Golumo, li ne ŝanĝos siajn kutimojn rapide, mi garantias. Ekdormu vi, sinjoro Frodo, kaj mi vekos vin, kiam mi ne plu povos teni apertaj la palpebrojn. Laŭvice, kiel antaŭe, dum li estas neligita.

— Eble vi pravas, Sam, — diris Frodo malkaŝe. — Ja estas en li ŝanĝiĝo, sed kia ŝanĝiĝo kaj kiel profunda, tion mi ankoraŭ ne certas. Serioze tamen, mi ne opinias necese timi nuntempe. Tamen vaĉu, se vi volas. Havigu al mi ĉirkaŭ du horojn, ne pli, kaj poste veku min.

Tiel laca estis Frodo, ke lia kapo kliniĝis antaŭen sur la bruston kaj li ekdormis, preskaŭ tuj post kiam li elparolis tiujn vortojn. Golumo ŝajnis ne plu sperti timon. Li kurbiĝis kaj baldaŭ endormiĝis, tute senĝene. Baldaŭ la spiro sibilis mallaŭte tra la kunpremitaj dentoj, sed li kuŝis ŝtone senmova. Post kelka tempo, timante ke li ekdormos, se li sidos aŭskultante la spiradon de siaj du kunuloj, Sam stariĝis kaj malabrupte fingropuŝis Golumon. Ties manoj malpugniĝis kaj tikis, sed neniun alian moviĝon li faris. Sam kliniĝis kaj diris *fîŝŝo* apud lia orelo, sed venis neniun respondo, eĉ ne interrompeto en la spirado de Golumo.

Sam gratis la kapon.

— Vere devas esti, ke li dormas, — li murmuris. — Kaj se mi similus Golumon, li neniam plu revekiĝus. — Li bridis la penson pri sia glavo kaj la ŝnuro, kiuj ekestis en lia menso, kaj iris sidiĝi apud sia mastro.

Kiam li vekiĝis, la ĉielo estis malheleta, ne pli hela sed malpli hela ol kiam ili matenmanĝis. Sam salte stariĝis. Ne malpleje pro la propra

sento de viglo kaj malsato, li subite komprenis, ke li fordormis la taglumon, naŭ horojn minimume. Frodo ankoraŭ dormadis nun kuŝante etendite sur la flanko. Golumo ne estis videbla. Diversaj admonaj nomoj por si venis al la menso de Sam, ĉerpitaj el la vortprovizo de la Avulo; poste plu venis al li en la kapon, ke lia mastro pravis: provizore estis nenio kontraŭgardenda. Ili estis ĉiuokaze ambaŭ vivaj kaj nesufokitaj.

— Kompatindulaĉo! — li diris duone sinriproĉe. — Jam mi sciolas, kien li iris?

— Ne malproksimen, ne malproksimen! — diris voĉo desupre. Li rigardis supren kaj vidis la figuron kun la grandaj kapo kaj oreloj fone de la vespera ĉielo.

— Hej, kion vi faras? — kriis Sam, la suspektoj revenis tuj kiam li ekvidis tiun figuron.

— Smeagolo malsatas, — diris Golumo. — Revenos baldaŭ.

— Revenu nun! — kriis Sam. — Hej! Revenu! — Sed Golumo jam malaperis.

Frodo vekigis pro la krio de Sam kaj sidiĝis, frotante siajn okulojn.

— Saluton! — li diris. — Ĉu io misas? Kioma horo estas?

— Mi ne scias, — diris Sam. — Post la sunsubiro, ŝajnas al mi. Kaj li foriris. Diris, ke li malsatas.

— Ne zorgu! — diris Frodo. — Nenio farebla. Sed li revenos, vi vidos. La promeso efikos dum ankoraŭ iom da tempo. Kaj li ĉiuokaze ne forlasos sian Trezoron.

Frodo bagateligis tion, kiam li eksciis, ke ili profunde dormis dum horoj kun Golumo, kaj cetere Golumo tre malsata kaj neligita apude.

— Ne pensu pri iuj el la fortaj vortoj de via Avulo, — li diris. — Vi estis elĉerpita, kaj ĉio rezultis bone: ni ambaŭ estas jam ripozintaj. Kaj antaŭ ni estas malfacila vojo, la plej malfacila vojo el ĉiuj.

— Pri la nutraĵo, — diris Sam. — Kiom longe okupos nin tiu ĉi tasko? Kaj kiam ĝi estos finita, kion ni tiam faros? Tiu ĉi vojpano mirinde tenas onin surpieda, kvankam ĝi ne inde kontentigas la internajon, kiel oni povus diri: ne laŭ mia sento ĉiuokaze, sen malrespekto al tiuj, kiuj faris ĝin. Sed oni devas ion manĝi ĉiutage, kaj ĝi ne kreskas. Mi kalkulas, ke ni havas sufiĉon por, ni diru, proksimume tri semajnoj, kaj tiom kun strikta zono kaj delikataj dentoj, sciuj. Ni iom libere traktis ĝin ĝis nun.

— Mi ne scias, kiom longe ni bezonos por... Por fini, — diris Frodo. — Ni estis aĉe malhelpataj en la montetaro. Sed Samsaĝo Vato,

mia kara hobito, efektive, mia plej kara hobito Sam, amiko el amikoj, al mi ŝajnas, ke ne necesas al ni pripensi, kio fariĝos poste. *Fini la taskon*, laŭ via esprimo... Kia espero ekzistas, ke ni iam kapablos? Kaj se jes, kiu scias, kio rezultos el tio? Se la Unu eniros la Fajron, kaj ni ĉeestos? Mi demandas al vi, Sam, ĉu verŝajnas, ke ni iam denove bezonos panon? Mi opinias, ke ne. Se ni povos varti niajn krurojn ĝis atingi Monton de Sorto, jen ĉio kion ni povas fari. Pli ol mi kapablas, mi komencas senti.

Sam kapjesis silente. Li kaptis la manon de sia mastro kaj kliniĝis al ĝi. Li ne kisis ĝin, kvankam liaj larmoj falis sur ĝin. Poste li sin forturnis, viŝis per maniko sian nazon, stariĝis kaj ĉirkaŭstamfis, klopodante fajfi, kaj dirante inter klopodoj:

— Kie estas tiu kreitaĉo?

Post fakte ne tre longe revenis Golumo; sed li venis tiom kviete, ke ili ne aŭdis lin ĝis li staris antaŭ ili. Liajn fingrojn kaj vizaĝon makulis nigra koto. Li ankoraŭ maĉis kaj bavis. Kion li maĉas, ili preferis ne demandi kaj ne emis pripensi.

“Vermojn aŭ blatojn aŭ ion ŝiman el truoj, — pensis Sam. — Brr! La fikreito, la kompatindulaĉo!”

Golumo diris nenion al ili, ĝis li trinkis profunde kaj sin lavis en la rojo. Poste li proksimiĝis al ili, lekante siajn lipojn.

— Jam pli bone, — li diris. — Ĉu ni ripozis? Pretas ekiri? Afablaj hobitoj, ili dormas bele. Fidas nun Smeagolon? Tre, tre bone.

La sekva stadio de la vojaĝo sufiĉe similis la antaŭan. Dum ili pluiris, la ravineto ĉiam pli malprofundiĝis kaj la deklivo de ĝia fundo iĝis pli malabrupta. Ĝia subo estis malpli ŝtonoza kaj pli grundeca, kaj iom post iom ĝiaj flankoj iĝis nuraj randoj. Ĝi komencis serpentumi kaj vagadi. Tiu nokto proksimiĝis al sia fino, sed nuboj jam kovris lunon kaj stelojn, kaj ili konstatis la alvenon de la tago nur pro la malrapida dissterniĝo de maldensa griza lumo.

En frosta horo ili alvenis la ekstremon de la akvofluo. La bordoj iĝis muskokovritaj teramasetoj. Trans la lasta breto de putra ŝtono la rojo gargaris kaj subenfalis al bruna marĉo kaj perdiĝis. Sekaj kanoj siblis kaj klakis, kvankam neniu vento sentebilis.

Ambaŭflanke kaj antaŭe nun kuŝis marĉoj kaj kotoj, etendiĝantaj suden kaj orienten en la malhelan duonlumon. Nebuletoj volviĝis kaj fumis el mallumaj kaj naŭzegaj flakoj. Ties fetoro ŝvebis sufoke en la

senmova aero. Fore, jam preskaŭ rekte sude, la montaj muroj de Mordoro baŭmis, kvazaŭ nigra barilo el krudaj nuboj ŝvebantaj super danĝera nebulkovrita maro.

La hobitoj nun tute dependis de Golumo. Ili ne sciis, kaj en tiu nebula lumo ne povis diveni, ke ili estis fakte nur ĝuste interne de la nordaj bordoj de la marĉejo, kies ĉefa etendaĵo kuŝis sude de ili. Ili povus, se ili konus la terenon, kun iom da prokrasto iom reiri laŭ siaj paŝoj, kaj poste turniĝinte orienten ĉirkaŭiri per malmolaj vojoj al la dezerta ebenaĵo Dagorlado: la kampo de l' antikva batalo antaŭ la Pordego de Mordoro. Tamen tia vojo ne proponus multan esperon. Sur tiu ŝtonoza ebenaĵo mankis sinkaŝaj eblecoj, kaj tra ĝi kondukis la ĉefvojoj de la orkoj kaj aliaj soldatoj de la Malamiko. Eĉ la manteloj de Lorieno ne kaŝus ilin tie.

— Kiel ni direktas nian vojon nun, Smeagolo? — demandis Frodo.

— Ĉu necesas trairi ĉi fetorajn marĉejojn?

— Ne necesas, tute ne necesas, — diris Golumo. — Ne, se la hobitoj volas atingi la malhelajn montojn kaj renkonti Lin tre rapide. Retro iom, kaj iom ĉirkaŭe, — lia maldika brako gestis norden kaj orienten, — kaj vi alvenos durajn malvarmajn vojojn ĝis la pordego de Lia lando. Multaj el Liaj personoj estos tie atentante pri gastoj, tre kontentaj konduki ilin senprokraste al Li, ho jes. Lia Okulo gvtas tiun vojon la tutan tempon. Ĝi kaptis Smeagolon tie, antaŭ longe. Sed Smeagolo post tio uzis siajn okulojn, jes, jes: mi uzis la okulojn, piedojn kaj nazon de tiam. Mi konas aliajn vojojn. Pli malfacilajn, ne tiom rapidajn, sed pli bonajn, se ni deziras, ke Li ne vidu. Sekvu Smeagolon! Li povas konduki vin tra la marĉoj, tra la nebuletoj, agrablaj densaj nebuletoj. Sekvu Smeagolon tre zorge, kaj vi povos iri tre longe, sufiĉe longe, antaŭ ol Li kaptos vin, jes eble.

Jam tagiĝis, venis mateno senventa kaj malafabla, kaj la marĉaj fetoroj kuŝis en pezaj amasiĝoj. Neniom da suno penetris la malaltan nuboplenan ĉielon, kaj Golumo ŝajnis avida daŭrigi tuj la vojaĝon. Do post mallonga ripozeto ili ekiris denove kaj baldaŭ perdiĝis en ombreca silenta mondo, forbarita de observo al la ĉirkaŭaj terenoj, ĉu de la montetoj kiujn ili forlasis, ĉu de la montoj celataj. Ili iris laŭ malrapida spaliro: Golumo, Sam, Frodo.

Frodo ŝajnis el la tri la plej laca, kaj kvankam ili iris malrapide, li ofte postrestis. La hobitoj baldaŭ konstatis, ke tio kio aspektis kiel unu vasta marĉejo estas fakte senfina reto da lagetoj kaj molaj kotejoj,

kaj serpentumaj duonbaritaj fluoj. Inter ili lertaj okuloj kaj piedoj povis trovi vagan vojon. Golumo certe posedis tian lerton kaj bezonis ĝin tute. Lia kapo sur la longa kolo senĉese turniĝis tien kaj reen, dum li snufis kaj murmuris al si la tutan tempon. Foje li levis alte sian manon kaj haltigis ilin, dum li antaŭeniris iom, kurbiĝinte, esplorante la teron per fingroj aŭ piedfingroj, aŭ nur aŭskultante per unu orelo premita al la tero.

Estis tede kaj lacige. Malvarma malseketa vintro ankoraŭ regis en tiu forlasita lando. La sola verdaĵo estis la ŝaŭma tavolo de palaj loloj sur la mallumaj grasaj supraĵoj de la malafablaj akvoj. Mortintaj herboj kaj putraj kanoj aperis en la nebuleto kiel ĉifaj ombroj de someroj longe forgesitaj.

Dum la tago pasadis, la lumo iomete plifortiĝis, kaj la nebuletoj foriĝis, iĝante pli maldensaj kaj pli travideblaj. Fore super la putraĵoj kaj vaporoj de la mondo la suno jam ŝvebis alta kaj ora en serena lando kun fundoj el blindiga ŝaŭmo, sed nur okazan sunfantomon ili povis vidi tie sube, malklaran, palan, kiu havigis neniom da koloro kaj neniom da varmo. Sed eĉ pro tiu ĉi memorigo pri ĝia ĉeesto Golumo faltigis la frunton kaj kuntiriĝis. Li haltigis la vojaĝon, kaj ili ripozis, kaŭrante kvazaŭ persekutataj bestetoj, rande de granda bruna kanaro. Profunde kvietis, nur supraĵe tuŝite per la malforta tremeto de malplenaj semoplumoj, kaj rompitaĵoj herberoj tremantaj en etaj aermoviĝoj kiujn ili ne povis senti.

— Eĉ ne birdo! — diris Sam funebre.

— Ne, neniom da birdoj, — diris Golumo. — Agrablaj birdoj! — Li lekis siajn dentojn. — Neniom da birdoj ĉi tie. Estas serpentsoj, vermsoj, aĵoj en la laĝetoj. Multaj aĵoj, multe da aĵoj malagrablaj. Neniom da birdoj, — li finis malĝoje. Sam rigardis lin malŝate.

Tiel pasis la tria tago de ilia vojaĝo kun Golumo. Antaŭ ol la vesperaj ombroj longiĝis en landoj pli feliĉaj, ili pluiris, ĉiam pluiris kun nur mallongaj haltoj. Ili haltis ne tiom por ripozi, kiom por helpi Golumon, ĉar nun eĉ li devis antaŭeniri ekstreme singarde, kaj li kelkfoje dum tempeto ne sciis precize kien iri. Ili jam atingis la mezon mem de la Mortaj Marĉoj, kaj estis mallume.

Ili marŝis malrapide, kliniĝinte, proksimspalire, atente rigardante ĉiun moviĝon de Golumo. La marĉejo iĝis pli malseka, etendiĝante al largaj stagnaj lagoj, inter kiuj ĉiam pli kaj pli malfacilis trovi la lokojn pli firmajn, kie piedoj povis paŝi ne sinkante en gargaran koton. La

vojaĝantoj estis malpezaj, alie eble neniu el ili iam sukcesus trovi tra-vojon.

Baldaŭ iĝis tute senlume: la aero ŝajnis nigra kaj peza spiraĵo. Kiam aperis lumoj, Sam frotis siajn okulojn. Al li ŝajnis, ke lia kapo difekt-iĝas. Li unue ekvidis per angulo de sia maldekstra okulo strieton da pala ekbrilo, kiu forvelkis; sed aliaj aperis baldaŭ poste: iuj kiel mal-klara hela fumo, iuj kiel nebulecaj flamoj flagrantaj malrapide super nevideblaj kandeloj; tie kaj tie ili tordiĝis kiel fantomecaj toloj mal-volvitaj de kaŝitaj manoj. Sed neniu el ambaŭ kunuloj diris vorton.

Finfine Sam ne plu povis toleri tion.

— Kio estas ĉio ĉi, Golumo? — li demandis flustre. — Tiuj lumoj? Ili ĉie ĉirkaŭas nin nun. Ĉu ni estas enfermitaj? Kiuj ili estas?

Golumo rigardis supren. Malhela akvo estis antaŭ li, kaj li rampis surtere, tien kaj reen, dubema pri la vojo.

— Jes, ili tute ĉirkaŭas nin, — li flustris. — La trukaj lumoj. Kandeloj de kadavroj, jes, jes. Ne atentu ilin! Ne rigardu! Ne sekvu ilin! Kie estas la mastro?

Sam retrorigardis kaj konstatis, ke Frodo denove postrestas. Li ne povis vidi lin. Li reiris kelkajn paŝojn en la mallumon, ne aŭdacante iri tre foren, aŭ voki pli laŭte ol per raŭka flustro. Subite li stumblis kontraŭ Frodo, kiu staris enpenŝiĝinte, rigardante la palajn lumojn. Liaj manoj pendis rigide apud la flankoj; akvo kaj ŝlimo degutis de ili.

— Venu, sinjoro Frodo! — diris Sam. — Ne rigardu ilin! Golumo avertis pri ili. Ni proksime sekvu lin kaj eliru el tiu ĉi malbeninda lando laŭeble rapide, se ni povos!

— Bone, — diris Frodo, kvazaŭ vekigante el revo. — Mi venas. Antaŭen!

Rapidante denove antaŭen, Sam stumblis, trafante per la piedo ian malnovan radikon aŭ teramaseton. Li falis kaj pezis sur la manojn, kiuj sinkis profunde en la gluecan koton, tiel ke lia vizaĝo proksimiĝis al la supraĵo de la malluma lago. Aŭdiĝis malforta siblo, leviĝis naŭzaodoro, la lumoj flagris, dancis kaj kirliĝis. Momente la akvo sub li aspektis kiel ia fenestro, kovrita de malpura vitro, tra kiu li rigardas. Ŝirtrenante siajn manojn el la marĉo, li retrosaltis kriante:

— Troviĝas mortintoj, mortaj vizaĝoj en la akvo, — li diris terur-ite. — Mortaj vizaĝoj!

Golumo ridis.

— La Mortaj Marĉoj, jes, jes: tiel ili nomiĝas, — li gakis. — Vi devas ne enrigardi, kiam la kandeloj brulas.

— Kiuj ili estas? Kio ili estas? — demandis Sam tremegante, turnante sin al Frodo, kiu nun estis malantaŭ li.

— Mi ne scias, — diris Frodo per dormema voĉo. — Sed ankaŭ mi vidis ilin. En la lagetoj, kiam la kandeloj brulas. Ili kuŝas en ĉiuj lagetoj, vizaĝoj palaj, profunde-profunde sub la malhela akvo. Mi vidis ilin: malafablajn kaj misajn vizaĝojn, kaj noblajn tristajn vizaĝojn. Multaj vizaĝoj fieraj kaj belaj, kaj loloj en iliaj arĝentaj hararoj. Sed ĉiuj hidaj, ĉiuj putraj, ĉiuj mortaj. Kruela lumo trafas ilin. — Frodo kaŝis siajn okulojn per la manoj. — Mi ne scias, kiuj ili estas; sed mi kredis vidi tie homojn, elfojn kaj orkojn apude.

— Jes, jes, — diris Golumo. — Ĉiuj mortaj, ĉiuj putraj. Elfoj, kaj homoj, kaj orkoj. La Mortaj Marĉoj. Okazis granda batalo antaŭlonge, jes, tiel oni diris al Smeagolo, kiam li estis juna, kiam mi estis juna, antaŭ ol venis la Trezoro. Ĉi tie estis granda batalo. Altaj homoj kun longaj glavoj, kaj teruraj elfoj, kaj orkoj kriĉantaj. Ili batalis sur la ebenaĵo dum tagoj kaj monatoj ĉe la Nigra Pordego. Sed la marĉoj plivastiĝis post tiam, englutis la tombojn; ĉiam rampante, rampante.

— Sed tio okazis antaŭ epoko kaj pli, — diris Sam. — La mortintoj ne povas esti efektive tie! Ĉu ĝi estas ia demoniĝo kovita en la Malhela Lando?

— Kiu scias? Smeagolo ne scias, — respondis Golumo. — Oni ne povas atingi ilin, oni ne povas tuŝi ilin. Ni provis unufoje, jes, trezoro. Mi provis unufoje; sed oni ne povas atingi ilin. Nur formoj videblaj, eble, ne tuŝeblaj. Ne, trezoro! Ĉiuj mortaj.

Sam rigardis lin malŝate kaj tremis denove, pensante, ke li divenas, kial Smeagolo provis tuŝi ilin.

— Nu, mi ne volas vidi ilin, — li diris. — Neniam denove! Ĉu ni ne povas pluiri kaj eskapi?

— Jes, jes, — diris Golumo. — Sed malrapide, tre malrapide. Tre singarde! Aŭ la hobitoj subeniros aliĝe al la mortintoj kaj fajrigos kandeletojn. Sekvu Smeagolon! Ne rigardu la lumojn!

Li forrampis dekstren, serĉante vojon ĉirkaŭ la lagon. Ili sekvis proksime, kliniĝinte, ofte uzante la manojn samkiel li. “Tri trezoraj Golumetoj en spaliro ni estos, se tio ĉi multe pli longe daŭros”, — pensis Sam.

Fine ili alvenis la ekstremon de l' nigra lago, kaj ili transiris ĝin, kaŭre, danĝere, rampante aŭ saltante de unu nefidinda insula amaseto al alia. Ofte ili baraktis, paŝante aŭ falante manojn-antaŭe en

akvojn naŭzajn kiel kloako, ĝis ili estis ŝlimkovritaj kaj makulitaj preskaŭ ĝiskole kaj fetoris en la naztruoj unu de la alia.

Estis malfrunokte, kiam ili finfine atingis teron pli firman denove. Golumo siblis kaj flustris al si, sed ŝajnis, ke li estas kontenta: laŭ ia mistera maniero, per ia kunfandita sento de palpado, flarado kaj nekutima memoro pri formoj en la mallumo li ŝajnis scii precize, kie li ree estis, kaj certi pri la vojo antaŭe.

— Nun antaŭen ni iras! — li diris. — Afablaj hobitoj! Bravaj hobitoj! Tre tre lacaj, kompreneble, tiaj ni estas, mia trezoro, ĉiuj el ni. Sed ni devas konduki la mastron for de l' misaj lumoj, jes, jes, ni devas.

Post tiuj vortoj li ekiris denove, preskaŭ trote, laŭ direkto, kiu aspektis longa aleo inter altaj kanoj, kaj ili stumble sekvis lin laŭeble rapide. Sed post iom da tempo li haltis subite kaj snufis dubeme la aeron, siblante kvazaŭ li estus ĝenata aŭ malkontenta denove.

— Kio estas? — graŭlis Sam, miskomprenante la signojn. — Kial necesas snufi? La fetoro preskaŭ faligas min eĉ nazotene. Vi fetoras, kaj la mastro fetoras; la tuta loko fetoras.

— Jes, jes, kaj Sam fetoras! — respondis Golumo. — Kompatinda Smeagolo flaras tion, sed bona Smeagolo ĝin toleras. Helpas la afa-blan mastron. Sed tio ne gravas. La aero moviĝas, ŝanĝiĝo proksimiĝas. Smeagolo scivolas; li ne estas feliĉa.

Li pluiris, sed lia maltrankvilo pliiĝis, kaj de tempo al tempo li star-iĝis plenstreĉe, trudante sian kolon orienten kaj suden. Dum iom da tempo la hobitoj povis nek aŭdi nek senti tion, kio ĉagrenis lin. Poste subite haltis ĉiuj tri, rigidiĝante kaj aŭskultante. Al Frodo kaj Sam ŝajnis, ke ili aŭdas, tre malproksime, longan lamentan krion, altan, maldensan kaj kruelan. Ili tremegis. Sammomente la ekmoviĝo de la aero perceptiĝis al ili, kaj iĝis tre froste. Dum ili staris streĉe aŭskultante, ili aŭdis bruon kvazaŭ venton venantan defore. La nebulecaj lumoj ektemis, malbrilis kaj estingiĝis.

Golumo rifuzis moviĝi. Li staris tremante kaj balbutante al si, ĝis abrupte la vento atingis ilin, siblante kaj murmuregante tra la marĉejo. La nokto iĝis malpli nigra, sufiĉe lumeta por ke ili vidu, aŭ duonvidu, senformajn nebuldrivaĵojn kurbiĝantaj kaj tordiĝantaj dum la nebulo transruliĝis ilin kaj preterpasis ilin. Rigardante supren ili vidis la nubojn apartiĝi kaj diseriĝi, kaj poste en la alta sudo la luno estingiĝis flagre, rajdante en la fluga zosteron.

Momente tiu vidaĵo feliĉigis la korojn de la hobitoj; sed Golumo kaŭris, murmurante malbenojn al la Blanka Vizaĝo. Poste Frodo kaj Sam gapante al la ĉielo, profunde enspirante la aeron pli freŝan, vidis ĝian alvenon: nubeto fluganta el la malbenindaj montoj; nigra ombro elsendita el Mordoro; grandega figuro flugilhava kaj minaca. Ĝi peliĝis antaŭ la luno, kaj kun timiga krio foriris okcidenten, pro sia minaca rapido postlasante la venton.

Ili falis antaŭen, tordiĝante senatente sur la malvarma tero. Sed la teruombro giris kaj revenis, jam pasante pli malalte, rekte super ili, viŝante la marĉfetonon per siaj abomenaj flugiloj. Kaj poste ĝi estis for, reflugante al Mordoro je rapideco de la Saŭrona kolero; kaj malantaŭ ĝi la vento formiĝis, lasante la Mortajn Marĉojn dezertaj kaj mornaj. La nudan dezerton, ĝis videblo de la okuloj, eĉ ĝis la fora minaco de la montoj, makuletis la intermita lunlumo.

Frodo kaj Sam stariĝis, frotante siajn okulojn, kvazaŭ infanoj vekitaj el misa sonĝo por retrovi la konatan nokton ankoraŭ kovranta la mondon. Sed Golumo kuŝis sur la tero kvazaŭ senkonsciigite. Ili mal-facile rekonsciigis lin, kaj dum kelka tempo li rifuzis levi la vizaĝon, sed kaŭris antaŭen sur la kubutoj, kovrante la malantaŭon de sia kapo per la grandaj plataj manoj.

— Fantomoj! — li ululis. — Fantomoj flugilhavaj! La Trezoro estas ilia mastro. Ili vidas ĉion, ĉion. Nenio kapablas kaŝiĝi antaŭ ili. Malbenatu la Blanka Vizaĝo! Kaj ili rakontas al Li ĉion. Li vidas, Li scias. Aĥ, *golum', golum', golum'!* — Ne ĝis subeniris la luno, fore okcidente post Tol Brandiro, li konsentis stariĝi aŭ moviĝi.

Ekde tiam al Sam ŝajnis, ke ili konstatas denove ŝanĝiĝon en Golumo. Li estis pli flatema kaj amikecon serĉanta; sed Sam ekvidis kelkfoje iujn strangajn esprimojn en liaj okuloj, precipe kiam li rigardis Frodon; kaj li reiris pli kaj pli al sia malnova parolmaniero. Kaj Sam spertis alian kreskantan ĝenon. Frodo ŝajnis laca, lacega preskaŭ elĉerpiĝe. Li diris nenion, fakte li malmulte parolis entute; kaj li ne plendis, sed li marŝis kiel ŝarĝportanto, kies ŝarĝo ĉiam pli peziĝas; kaj li treniĝis, pli kaj pli malrapide, tiel ke Sam ofte devis peti, ke Golumo atendu kaj ne postlasu ilian mastron.

Efektive je ĉiu paŝo al la pordo de Mordoro Frodo sentis la Ringon sur ties ĉeneto ĉirkaŭ la kolo iĝi pli kaj pli peza. Li jam komencis senti ĝin kiel realan pezaĵon, kiu tiris lin teren. Sed lin multe pli ĝenis la Okulo: tiel li nomis ĝin al si. Pli ol trenado de la Ringo, ĝi igis lin kaŭri

kaj kurbîgi dum la marŝado. La Okulo: tiu terura kreskanta sento pri malamika volo, kiu luktis per granda potenco penetri ĉiujn ombrojn de nubo, tero kaj karno por vidi vin: trapingli vin sub ĝia kruela rigardo, nuda, neforigebla. Tiom maldikaj, tiom rompeble maldikaj iĝis la vualoj, kiuj daŭre ĝin forbaris. Frodo sciis precize, kie estas nun la aktualaj loĝejo kaj kerno de tiu volo: tiel certe kiel oni povas konstati la direkton de la suno per fermitaj okuloj. Li frontis ĝin, kaj ĝia potenco batis lian frunton.

Golumo probable sentis ion similan. Sed kio okazas en lia mizera koro inter premado de la Okulo kaj avido al la Ringo, kiu tiom proksimis, kaj lia sinceda promeso farita duone pro timo pri frida fero, la hobitoj ne povis diveni. Frodo tion neniom pripensis. La menso de Sam okupiĝis ĉefe pri la mastro, apenaŭ rimarkante la malhelan nubon, kiu sentiĝis en la propra koro. Li metis Frodon nun antaŭ sin, kaj zorge rigardis ĉiun lian ekmovon, apogante lin, se li stumblis, kaj provante kuraĝigi lin per mallertaj vortoj.

Kiam la tago fine venis, la hobitoj surpriziĝis, vidante kiom pli proksimaj jam estis la misaŭguraj montoj. La aero estis jam pli klara kaj pli frida, kaj kvankam ankoraŭ foraj, la muroj de Mordoro ne plu estis nubeca minaco rande de l' vidatingo, sed kiel severaj nigraj turegoj ili brovumis tra malĝoja dezerto. La marĉoj finiĝis, formortante je mortaj torfejoj kaj larĝaj ebenaĵoj da seka fendetita koto. La tereno antaŭe leviĝis en longaj malabruptaj deklivoj, malfekundaj kaj senkompataj, al la dezerto kuŝanta antaŭ la Pordego de Saŭrono.

Dum la griza lumo daŭris, ili kaŭris vermece sub nigra ŝtonego, kuntirigante pro la ebleco ke la flugilhava teruraĵo preterpasos kaj spionos ilin per siaj kruelaj okuloj. La restaĵo de tiu vojaĝo estis ombro de kreskanta timo, en kiu la memoro povis trovi nenion apogeblan. Dum du pliaj noktoj ili luktis antaŭen tra la velka senvoja tereno. La aero, kiel ŝajnis al ili, raspiĝis kaj pleniĝis je amara fetoro, kiu haltigis ilian spiron kaj malsekigis iliajn buŝojn.

Finfine, en la kvina mateno de kiam ili ekiris kun Golumo, ili ankoraŭfoje haltis. Antaŭ ili malhelaj en la tagiĝo la grandaj montoj etendiĝis al tegmentoj el fumo kaj nubo. El ties subaĵoj estis etenditaj grandegaj murapogiloj kaj malglataj rokoj, kiuj jam estis for apenaŭ dekduon da mejloj. Frodo ĉirkaŭrigardis terurite. Kvankam estis abomenindaj la Mortaj Marĉoj kaj la aridaj terenoj de Nomenlando, multe pli naŭziga estis la tereno, kiun la rampa tago nun malrapide vidigis

al liaj timantaj okuloj. Eĉ al la Lago de Mortaj Vizaĝoj venis ia marasma fantomo de verda printempo; sed ĉi tien nek printempo nek somero iam ajn revenus. Ĉi tie vivis nenio, eĉ ne la lepraj kreskaĵoj, kiuj nutras sin per putraĵo. La anhelaj lagetoj estis sufokitaj per cindro kaj rampa koto, morbe blankaj kaj grizaj, kvazaŭ la montoj vomus la malpuraĵon de siaj intestoj al la ĉirkaŭaj terenoj. Altaj amasiĝoj el polvigita premita rokaĵo, grandaj konusoj el grundo fajrdetruiita kaj venenmakulita, staris en senfinaj vicoj kvazaŭ obscena tombejo, malrapide vidigita en la nevolonta lumo.

Ili venis jam al la senvivejo kuŝanta antaŭ Mordoro: eterna monumento al la malhela laboro de ĝiaj sklavoj, kiu restos kiam ĉiuj ties celoj nuliĝos; tereno malsanktigita, malsana ekster ĉia kuracado — krom se la Granda Maro elvenus kaj forlavus ĝin en forgesitecon.

— Mi sentas naŭzon, — diris Sam. Frodo ne parolis.

Dum iom da tempo ili staris tie, kiel homoj rande de dormo en kiu embuskas koŝmaro, forbarante ĝin, kvankam ili sciis ke nur tra la ombroj ili povos atingi la matenon. La lumo vastiĝis kaj malmoliĝis. La anhelaj kavoj kaj venenaj teramasoj iĝis hide klaraj. La suno jam supreniris, promenante inter nuboj kaj longaj strioj da fumo, sed eĉ la sunlumo estis malsanktigita. La hobitoj neniun bonvenigon havis por tiu lumo; ĝi ŝajnis malamika, vidigante ilin senrimedaj — etaj pepantaj fantomoj vagantaj inter la cindramasoj de la Malhela Mastro.

Tro lacegaj por pluiri, ili serĉis iun lokon, kie ili povus ripozi. Dum iom da tempo ili sidis senparole sub la ombro de skori-amaso; sed venenaj fumoj likiĝis el ĝi, trafante iliajn gorĝojn kaj sufokante ilin. Golumo la unua stariĝis. Sputante kaj sakrante li leviĝis, kaj sen vorto aŭ ekrigardo al la hobitoj li forrampis kvarpiede. Frodo kaj Sam rampe sekvis lin, ĝis ili venis al larĝa preskaŭ ronda kavo, altflanka okcidente. Tiu estis malvarma kaj morta kun fia flako el oleeca multkolora ŝimo surfunde. En tiu malica truo ili kaŭris, esperante eskapi en ĝia ombro la atenton de l' Okulo.

Tiu tago treniĝis malrapide. Ĝenis ilin forta soifo, sed ili glutis nur kelkajn gutojn el siaj akvujoj, lastfoje plenigitaj en la ravineto, kiu nun, kiam ili retrorigardis pense, ŝajnis loko paca kaj bela. La hobitoj laŭvice sentinelis. Komence, malgraŭ la lacego, neniu el la du kapablis dormi; sed dum la malproksima suno lante descendis al malrapide moviĝanta nubaro, Sam ekdormetis. Estis la vico de Frodo sentinelis. Li retroklinis sin al la deklivo de la kavo, sed tio ne faciligis la senton

de ŝarĝiteco kiu pezis sur lin. Li suprenrigardis al la fumstriita ĉielo kaj vidis strangajn fantomojn, malhelajn rajdistajn formojn kaj vizaĝojn el la pasinteco. Li ne plu konsciis pri la tempo, ŝvebante inter dormo kaj maldormo, ĝis forgeseco inundis lin.

Subite Sam vekigis pensante, ke li aŭdas alvokon de la mastro. Estis vespere. Frodo ne povis alvoki, ĉar li endormigis kaj glitis suben preskaŭ ĝis la fundo. Golumo apudis lin. Momente Sam supozis, ke tiu provas veki Frodon; poste li konstatis, ke tiel ne estas. Golumo parolis al si. Smeagolo debatis kun iu alia penso, kiu uzis la saman voĉon sed igis ĝin pepi kaj sibli. Alternis en liaj okuloj dumparole lumo pala kaj lumo verda.

— Smeagolo promesis, — diris la unua penso.

— Jes, jes, trezoro mia, — venis la respondo, — ni promesis: por savi nian Trezoron, ne por ke Li havu ĝin. Neniam. Sed ĝi aliras Lin, jes, ĉiupaŝe pli proksimen. Kion faros pri ĝi la hobito, ni scivolas, jes ni scivolas.

— Mi ne scias. Mi ne povas malhelpi tion. La mastro havas ĝin. Smeagolo promesis helpi la mastron.

— Jes, jes, helpi la mastron de la Trezoro. Sed se ni estus mastro, ni povus helpi nin mem, jes, kaj ankoraŭ plu plenumi la promesojn.

— Sed Smeagolo diris, ke li tre, tre bonkondutos. Afabla hobito! Li forprenis la kruelan ŝnuron de la kuro de Smeagolo. Li alparolas min afable.

— Tre, tre bonkondutos, ĉu, trezoro mia? Ni bonkondutu, bonkondutu kiel fiŝoj, dolĉulo, sed al ni mem. Ne dolore al la afabla hobito, kompreneble, ne, ne.

— Sed la Trezoro regas la promeson, — la voĉo de Smeagolo kontraŭdiris.

— Do prenu ĝin, — diris la alia, — kaj ni regu ĝin mem! Tiam ni estos la mastro, *golum*! Devigu la alian hobiton, la malagrablan, suspekteman hobiton, devigu lin rampi, jess, *golum*!

— Sed ne la afablan hobiton?

— Ho ne, ne dum tio ne plaĉos al ni. Tamen li estas Baginzo, trezoro mia, jes, Baginzo. Ŝtelis ĝin iu Baginzo. Li trovis ĝin kaj li diris nenion, nenion. Ni malamas Baginzojn.

— Ne, ne tiun ĉi Baginzon.

— Jes, ĉiujn Baginzojn. Ĉiujn, kiuj retenas la Trezoron. Ĝin ni devas havi!

— Sed Li vidos, Li scios. Li forprenos ĝin de ni!

— Li vidas. Li scias. Li aŭdis nin stulte promesi, kontraŭe al Liaj ordonoj, jes. Necesas preni ĝin. La Fantomoj serĉadas. Necesas preni ĝin.

— Ne por Li!

— Ne, dolĉulo. Vidu, trezoro mia: se ni havus ĝin, tiam ni povus eskapi, eĉ de Li, ĉu ne? Eble ni tre fortiĝus, iĝus pli fortaj ol la fantomoj. Ĉu mastro Smeagolo? Ĉu Golumo la Granda? *La Golumo!* Manĝi fiŝojn ĉiutage, trifoje tage, freŝajn el la maro. Plej kara Golumo! Devas havi ĝin. Ni deziras ĝin, ni deziras ĝin, ni deziras ĝin!

— Sed ili estas duopo. Ili tro rapide vekigōs kaj mortigos nin, — plorkriis Smeagolo lasteksplode. — Ne nun. Ankoraŭ ne.

— Ni deziras ĝin! Sed, — sekvis longa paŭzo, kvazaŭ nova penso vekigōs. — Ankoraŭ ne, ĉu? Eble ne. Ŝi eble helpos. Ŝi eble, jes.

— Ne, ne! Ne tiamaniere! — plorĝemis Smeagolo.

— Jes! Ni deziras ĝin! Ni deziras ĝin!

Ĉiufoje kiam parolis la dua penso, la longa mano de Golumo etendiĝis malrapide, palpante al Frodo, kaj poste estis abrupte retirata, kiam Smeagolo denove ekparolis. Fine ambaŭ brakoj, kun longaj fingroj fleksitaj kaj tikantaj, grifece iris al lia kolo.

Sam estis kuŝanta senmove, fascinita de tiu debato, sed rigardante ĉiun moviĝon de Golumo el sub la duonfermitaj palpebroj. Laŭ lia simpla menso normala malsato, la deziro manĝi hobitojn, ĝis tiam ŝajnis la ĉefa danĝero en Golumo. Li nun konstatis, ke estas ne tiel: Golumo spertis la teruran alvokon de la Ringo. La Malhela Mastro estis *Li*, kompreneble; sed Sam scivolis, kiu estas *Ŝi*. Unu el la naŭzaj amikoj, kiujn la fiaĵeto trovis dum sia vagado, li supozis. Poste li forĝesis pri tiu punkto, ĉar la aferoj jam sufiĉe klare progresis kaj iĝis danĝeraj. Forta pezeco plenigis liajn membrojn, sed li pene vigligis sin kaj sidiĝis. Io avertis, ke li estu singarda kaj ne sciigu, ke li subaŭskultis la debaton. Li eligis laŭtan suspiron kaj larĝe oscedis.

— Kioma horo estas? — li diris dormeme.

Golumo eligis longan siblon inter la dentoj. Li stariĝis momente, streĉita kaj minaca; kaj poste kolapsis, falante antaŭen al kvar piedoj kaj suprengrimante la deklivon de la kavo.

— Afablaj hobitoj! Afabla Sam! — li diris. — Dormemuloj, jes, dormemuloj! Lasis bonan Smeagolon sentinel! Sed estas vespere. Krepusko alrampas. Jam tempo ekiri.

“Jam pli ol tempo! — pensis Sam. — Kaj jam tempo disiĝi, cetere”. Tamen venis al li ekscivolo ĉu ne fakte Golumo estas nun tiel danĝera kiam liberigita kiel retenita.

— Malbenatu li! Mi volas, ke li sufokiĝu! — li murmuris. Li stumblis suben laŭ la deklivo de l' kavo kaj vekis sian mastron.

Sufiĉe strange, Frodo sin sentis freŝigita. Li sonĝadis. Jam pasis la malluma ombro, kaj bela vizio vizitis lin en tiu malsaneca lando. Nenio el ĝi restis en lia memoro, tamen pro ĝi li sentis ĝojon kaj kormalpezon. Lia ŝarĝo malpli pezis sur lin. Golumo bonvenigis lin kun hundeca ĝojo. Tiu gakis kaj babilis, krakigante siajn longajn fingrojn, kaj frapetante la genuojn de Frodo. Frodo ridetis al li.

— Vidu! — li diris. — Vi gvidis nin bele kaj fidele. Jen la lasta stadio. Venigu nin al la Pordego, kaj poste mi ne petos vin pluiri. Venigu nin al la Pordĝo, kaj vi rajtos iri kien ajn vi deziros, nur ne al niaj malamikoj.

— Al la Pordego, ĉu? — Golumo pepis, ŝajne surprizita kaj timigita. — Al la Pordego, la mastro diras! Jes, tion li diras. Kaj bona Smeagolo faras tion, kion li petas, ho jes. Sed kiam ni pli proksimiĝos, ni vidos eble, ni vidos tiam. Tute ne aspektos agrable. Ho ne! Ho ne!

— Ekiru vi! — diris Sam. — Ni trapasu tion!

En la kreskanta krepusko ili rampgrimpis el la kavo kaj malrapide ekvojis tra la morta tereno. Ne longe ili iris ĝis ili spertis refoje la timon, kiu inundis ilin, kiam la flugilhava figuro trarapidis super la marĉoj. Ili haltis, kaŭrante sur la fetora tero, sed ili nenion vidis en la morna vespera ĉielo supre, kaj baldaŭ la minaco pasis, altege super la kapoj, irante eble pro ia rapida komisiono el Baraduro. Post iom da tempo Golumo leviĝis kaj ree rampis antaŭen, murmurante kaj skuiĝante.

Proksimume unu horon post la noktomezo la timo inundis ilin jam la trian fojon, sed nun ĝi ŝajnis pli fora, kvazaŭ ĝi trapasus super la nubaro, terure rapidegante okcidenten. Tamen Golumo estis senhelpe terurita kaj konvinkiĝis, ke ili estas persekutataj, ke ilia proksimiĝo estas konata.

— Trifoje! — li plorkriis. — Trifoje estas minaco. Oni sentas nin ĉi tie, oni sentas la Trezoron. La Trezoro estas ilia mastro. Ni ne povas pluiri ĉi-voje, ne. Senutile, senutile!

Petegado kaj afablaj vortoj ne plu efikis. Nur kiam Frodo ordonis lin kolere kaj metis sian manon al la glavtenilo, Golumo konsentis

denove leviĝi. Li leviĝis graŭlante, kaj iris antaŭ ili kvazaŭ vipita hundaĉo.

Do ili stumblis plu dum la laca fino de la nokto, kaj ĝis la alveno de alia timoplena tago ili marŝis silente kun klinitaj kapoj, vidante nenion, kaj aŭdante nenion krom la venton siblantan en iliaj oreloj.

Ĉapitro 3

LA NIGRA PORDEGO ESTAS FERMITA

La postan tagon antaŭ la tagiĝo ilia vojaĝo al Mordoro finiĝis. La marĉoj kaj la dezerto troviĝis malantaŭe. Antaŭ ili, malhelante antaŭ palaĉa ĉielo, la grandaj montoj levis siajn minacajn kapojn.

Okcidente de Mordoro etendiĝis la morna linio de Efelo Duad, la Ombraj Montoj, kaj norde la malebenaj pintoj kaj sterilaj firstoj de Eredo Litui, cindre grizaj. Sed proksimiĝante unu al alia, ĉar ili ja estis nur partoj de unu granda muro ĉirkaŭ la melankoliaj ebenaĵoj de Litlado kaj de Gorgoroto, kun meze la maldolĉa enlanda maro Nurneno, ili elpuŝis longajn brakojn norden; kaj inter tiuj brakoj estis profunda interkrutejo. Tiu estis Ĉirito Gorgor, la Hantata Trapasejo, la eniro al la lando de l' Malamiko. Altaj klifoj malserenis ambaŭflanke, kaj ĉe la enirejo estis du apikaj montetoj, nigr-ostaj kaj nudaj. Sur ili staris la Dentoj de Mordoro, du turegoj fortikaj kaj altaj. Dum epoko longe pasinta ilin konstruis la gondoranoj en siaj fiero kaj potenco, post la pereigo de Saŭrono kaj ties forfuĝo, por eviti ke li revenu al sia antaŭa regno. Sed la fortiko de Gondoro velkis, kaj homoj dormis, kaj dum multaj jaroj la turegoj staris malplenaj. Poste Saŭrono revenis. Nun la sentinelaj turegoj, kiuj kadukiĝis, estis riparitaj, kaj plenigitaj je armiloj, kaj garnizonitaj de senĉesa atentemo. Ŝtonvizaĝaj ili estis, kun malhelaj fenestroj-truoj vaĉantaj norden, orienten kaj okcidenten, kaj ĉiu fenestro estis plenigita de okuloj sendormaj.

Trans la enirejon de l' pasejo, de klifo al klifo, la Malhela Mastro konstruigis ŝtonan remparon. En ĝi estis unu pordego el fero, kaj sur ĝia krenelaro paŝis senĉese sentineloj. Sub la montetoj ambaŭflanke estis enborita cento da kavernoj kaj truoj; tie embuskis bandego da orkoj pretaj eliri je signalo kvazaŭ nigraj formikoj batalontaj. Neniu povis trapasi la Dentojn de Mordoro ne spertinte ties mordon, krom se ili estis alvokitaj de Saŭrono aŭ konis la sekretajn pasvortojn, kiuj malfermis Moranonon, la Nigran Pordegon de lia lando.

La du hobitoj rigardis senespere la turegojn kaj la muron. Eĉ de malproksime ili povis vidi en la malforta lumo la moviĝon de

sentineloj sur la muro kaj la patrolojn antaŭ la pordego. Ili nun kuŝis rigardante trans la randon de rokeca kavo sub la etendiĝa ombro de la plej norda murapogilo de Efelo Duad. Flugante tra l' peza aero en rekta linio korvo, eble, transflugus nur cent klaftojn de ilia kaŝloko ĝis la alta pinto de la pli proksima turego. Maldensa fumo kirliĝis super ĝi, kvazaŭ fajro arduŝis en la monteto sube.

Tagiĝis, kaj la pale ruĝa suno palpebrumis tra la senvivaj firstoj de Eredo Litui. Tiam subite aŭdiĝis bleko de latungorĝaj trumpetoj: el la gardoturoj ili bruis, kaj fore el kaŝitaj sekurejoj kaj antaŭpostenoj sur la montoj venis respondaj signaloj; kaj pli fore, granddistancaj sed profundaj kaj minacantaj reĥis en la kava tereno malantaŭe la potencaj kornoj kaj tamburoj de Baraduro. Ankoraŭ unu terura tago de timo kaj penado estis veninta al Mordoro; kaj la noktaj sentineloj estis vokitaj al siaj kelaj ĉeloj kaj profundaj haloj, kaj la tagaj sentine-
loj, fiokulaj kaj kruelaj, marŝadis al siaj postenoj. Ŝtalo ekbrilis malforte sur la krenelaro.

— Nu, jen ni alvenis! — diris Sam. — Jen la Pordego, kaj ŝajnas al mi, ke tie estas la proksimuma limo ĉiama de nia vojaĝo. Al kukolo, sed la Avulo volus diri unu-du aferojn, se li vidus min nun! Ofte li diris, ke mi trafos misan finon, se mi ne paŝos singarde, tion li diris. Sed mi jam ne supozas iam revidi la maljunan bonulon. Li malhavos okazon diri: “Mi ja avertis vin, Sam”. Des pli domaĝe. Li rajtus admoni min ĝis elĉerpiĝus lia spiro, se nur mi povus revidi lian maljunan vizaĝon. Sed mi devus unue energie lavi min, aŭ li ne rekonus min. Supozeble senutilas demandi: “Kiun vojon ni sekvu?” Ni ne povas pluiri, krom se ni emus peti transporton de la orkoj.

— Ne, ne! — diris Golumo. — Senutile. Ni ne povas pluiri. Smeagolo diris tion. Li diris: ni iros al la Pordego, kaj poste ni vidos. Kaj ni ja vidas. Ho jes, mia trezoro, ni ja vidas. Smeagolo sciis, ke la hobitoj ne povus iri tiun vojon. Ho jes, Smeagolo sciis.

— Do, kial, je la plago, vi kondukis nin ĉi tien? — demandis Sam, ne sentante sin en humoro esti justa aŭ racia.

— La mastro diris tion. La mastro diris: Konduku nin al la Pordego. Do, bona Smeagolo tion faris. La mastro diris tion, saĝa mastro.

— Tion mi faris, — diris Frodo. Lia vizaĝo estis serioza kaj rigida, sed rezoluta. Li estis malpuraĉa, marasma, kaj kuntirita pro lacego, sed li ne plu kaŭris, kaj liaj okuloj estis klaraj. — Mi diris tion, ĉar mi

intencas eniri Mordoron, kaj alian vojon mi ne konas. Tial mi iros ĉi-voje. Mi ne petas iun ajn akompani min.

— Ne, ne, mastro! — ululis Golumo, manfrapetante lin kaj ŝajne tre malĝojigita. — Senutilas tiumaniere! Senutilas! Ne donu al Li la Trezoron. Li formanĝos nin ĉiujn, se Li akiros ĝin, formanĝos la tutan mondon. Retenu ĝin, afabla mastro, kaj traktu bonkore Smeagolon. Ne lasu, ke Li havu ĝin. Aŭ foriru, iru al agrablaj lokoj, kaj redonu ĝin al la eta Smeagolo. Jes, jes, mastro: redonu ĝin, ĉu ne? Smeagolo tenos ĝin sekura; li faros multe da bono, precipe al la afablaj hobitoj. La hobitoj iru hejmen. Ne iru al la Pordego!

— Al mi estis ordonite iri al la lando Mordoro, kaj sekve mi iros, — diris Frodo. — Se ekzistas nur unu maniero, mi devas iri tiumaniere. Kio sekvos, devos sekvi.

Sam diris nenion. La esprimo sur la vizaĝo de Frodo sufiĉis al li; li sciis, ke liaj vortoj senutilos. Kaj finfine li neniam ekde la komenco vere esperis pri la afero; sed estante bonhumora hobito li ja ne bezonis esperon, dum malespero estis prokrastita. Nun ili alvenis la amaran finon. Sed li subtenis sian mastron tra la tuta vojo; ĉefe por tio li venis, kaj li daŭre subtenos lin. Lia mastro ne eniros sola Mordoron. Sam akompanos lin, kaj ĉiuokaze ili liberiĝos de Golumo.

Tamen Golumo ankoraŭ ne intencis liberigi ilin. Li genuis antaŭ la piedoj de Frodo, tordante siajn manojn kaj kvikante.

— Ne tiun vojon, mastro! — li petegis. — Ekzistas alia vojo. Ho jes, vere ekzistas. Alia vojo, pli senluma, pli malfacile trovebla, pli sekreta. Sed Smeagolo konas ĝin. Lasu ke Smeagolo montru ĝin al vi!

— Ĉu alia vojo? — diris Frodo dubeme, subengrimpante al Golumo per la esploraj okuloj.

— Jess! Jess, efektive! Ekzistis alia vojo. Smeagolo trovis ĝin. Ni iru vidi, ĉu ĝi plu troviĝas!

— Pri tio vi ne diris pli frue.

— Ne. La mastro ne demandis. La mastro ne diris, kion li intencas fari. Li ne sciigis al kompatinda Smeagolo. Li diris: Smeagolo, konduku min al la Pordego, kaj tiam adiaŭ! Smeagolo rajtas forkuri kaj konduki bone. Sed nun li diras: Mi celas eniri Mordoron ĉi-voje. Do, Smeagolo tre timas. Li ne volas perdi sian afablan mastron. Kaj li promesis, la mastro devigis lin promesi, savi la Trezoron. Sed la mastro portos ĝin al Li, rekte al la Nigra Mano, se la mastro iros ĉi-voje. Do, Smeagolo devas savi ilin ambaŭ, kaj li pensas pri alia

vojo, kiu estis pli frue. Afabla mastro. La bonkonduta Smeagolo ĉiam helpas.

Sam sulkigis la frunton. Se li kapablus bori truojn en Golumo per siaj okuloj, li farus tion. Lia menso estis duboplena. Laŭaspekte Golumo vere malfeliĉis kaj ege volis helpi Frodon. Sed Sam, memorante la subaŭskultitan debaton nur malfacile povis kredi, ke la longe submergita Smeagolo estis venkinta: tiu voĉo ĉiuokaze ne ricevis la lastan vorton en la debato. Sam supozis, ke la Smeagola kaj la Goluma duonoj (aŭ kiel li mense nomis ilin: Putorulo kaj Fetorulo) faris militpaŭzon kaj portempan aliancon. Neniu el ambaŭ deziris, ke la Malamiko akiru la Ringon; ambaŭ volis defendi Frodon de kaptiĝo kaj laŭeble longe observadi lin — almenaŭ tiel longe, kiel Fetorulo havus eblecon preni sian “Trezoron”. Ke fakte estis alia vojo en Mordoron, Sam pridubis.

“Estas tre bone, ke neniu el la du duonoj scias, kion intencas fari la mastro, — li pensis. — Se li sciis, ke sinjoro Frodo klopodas meti finon al lia Trezoro por ĉiam, sufiĉe rapide ekestus problemoj, mi vetas. Ĉiuokaze, la olda Fetorulo tiom timas la Malamikon — kaj li estas ordonata iel de tiu, aŭ ordonita — ke li transdonus nin prefere ol rimarkiĝi helpante nin; kaj prefere ol lasi ke lia Trezoro fandiĝu, eble. Almenaŭ tiel mi konceptas. Kaj mi esperas, ke la mastro pripensas zorge la aferon. Li tre saĝas, sed li estas molkora, jen kia li estas. Ne eblas al ajna Vato diveni, kion li faros tujsekve”.

Frodo ne tuj respondis al Golumo. Dum tiuj duboj trapasis la malrapidan sed sagacan menson de Sam, li staris elrigardante al la malhela klifo de Cirito Gorgor. La kavo, en kiu ili rifuĝis, estis elfosita sur flanko de malalta monteto kaj troviĝis iom alte super la ebenaĵa nivelo. Longa tranĉeeca valo etendiĝis inter ĝi kaj la eksteraj murapogiloj de la monta muro. En la matenlumo la vojoj, kiuj konverĝis al la Pordego de Mordoro, estis nun klare videblaj, palaj kaj polvokovritaj; unu reserpentumis norden; alia mallarĝumis orienten en la nebuletojn kroĉiĝantajn al la suboj de Eredo Litui; kaj alia abrupte kurbiĝanta pasis proksime sub la okcidenta vaĉturo, kaj poste laŭiris la valon sube de la montflanko, kie kuŝis la hobitoj, je ne multaj futoj sub ili. Baldaŭ ĝi turniĝis, flankumante la montoŝultrojn kaj foriris suden en la profundajn ombrojn, kiuj komplete mantelis la okcidentajn flankojn de Efelo Duad; preter ilia vidkapablo ĝi plu daŭris en la malvastan terenon inter la montoj kaj la Granda Rivero.

Rigardante, Frodo konsciĝis, ke okazas grandaj ekvigliĝo kaj moviĝado sur la ebenaĵo. Estis kvazaŭ tutaj armeoj ekmarŝus, kvankam grandparte ilin kaŝis la vaporoj kaj fumoj drivantaj de la marĉejoj kaj dezertoj pli fore. Sed jen kaj jen li ekvidis brileton de lancoj kaj kaskoj; kaj sur la ebenaĵoj apudvojaj estis videblaj en multaj rotoj rajdistoj. Li memoris sian vizion deforan sur Amono Hen, antaŭ tiel malmulte da tagoj, kvankam tio jam ŝajnis antaŭ multaj jaroj. Tiam li sciis, ke la espero dum unu neprudenta momento ekflagrinta en lia koro estis vana. La trumpetoj blekis ne defie, sed salute. Tio ne estis atako kontraŭ la Malhela Mastro fare de gondoraj viroj, leviĝintaj kiel venĝaj fantomoj el la tomboj de braveco jam delonge forpasinta. Tiuj estis viroj alirasaj el la vasta oriento, kunvenantaj laŭ la alvoko de sia Komandanto; armeoj, kiuj bivakis nokte antaŭ lia Pordego kaj nun almarŝis por pligrandigi lian kreskantan potencon. Kvazaŭ subite konsciigite plene pri la danĝero de ilia situacio, solaj, en la plifortiĝanta taglumo, tiel proksime al tiu granda minaco, Frodo abrupte tiris sian grizan kapuĉon pli strikte sur la kapon, kaj paŝis suben en la fendejon. Tiam li turnis sin al Golumo.

— Smeagolo, — li diris, — mi fidis vin ankoraŭfoje. Efektive ŝajnas, ke mi devas fari tion, kaj ke mia sorto estas ricevi helpon de vi, kie mi malpleje atendas ĝin, kaj via sorto estas helpi min, kiun vi longe persekutis malicintence. Ĝis nun vi meritas bonon ĉe mi kaj plenumis vian promeson vere. Mi diras vere kaj sincere, — li aldonis, ekrigardinte al Sam, — ĉar jam dufoje ni estis sub via potenco, kaj vi faris al ni neniun malutilon. Vi ankaŭ ne provis forpreni de mi tion, kion vi iam serĉadis. Ke la tria fojo pruvigu la plej bona! Sed mi avertas vin, Smeagolo, ke vi estas minacata.

— Jes, jes, mastro! — diris Golumo. — Terure minacata! La ostoj de Smeagolo tremas, kiam li pensas pri tio, sed li ne forkuras. Li devas helpi la afablan mastron.

— Mi aludis ne la minacon, kiun ni ĉiuj partoprenas, — diris Frodo. — Mi aludas minacon nur por vi. Vi ĵuris promeson je tio, kion vi nomas la Trezoro. Memoru tion! Ĝi devigos vian plenumon; sed ĝi serĉos rimedon tordi vin je via propra malavantaĝo. Jam vi estas tordata. Vi ĵus vidigis vin al mi, stulte. “Redonu ĝin al Smeagolo”, — vi diris. Neniam plu diru tion! Ne permesu, ke tiu penso kresku en vi! Vi neniam rericivos ĝin. Sed la deziro por ĝi eble perfidos vin al sorto amara. Vi neniam rericivos ĝin. En ekstrema neceso, Smeagolo, mi surmetos la Trezoron; kaj la Trezoro sklavigis vin antaŭ longe. Se mi,

surmetinte ĝin, ordonus al vi, vi obeus, eĉ se temus, ke vi saltu desur krutegaĵo aŭ jetiĝu en fajron. Kaj tia estus mia ordono. Do, gardu vin, Smeagolo!

Sam rigardis sian mastron kun aprobo, sed ankaŭ kun surprizo: sur ties vizaĝo estis esprimo kaj en lia voĉo tono, kiujn li neniam antaŭe konis. Ĉiam li pensis, ke la bonkoreco de kara sinjoro Frodo estas tiel altnivela, ke ĝi devas implici sufiĉan kvanton da blindeco. Komprenoble li ankaŭ kredis neakordigeble, ke sinjoro Frodo estas la plej saĝa en la mondo (eble escepte de maljuna sinjoro Bilbo kaj de Gandolfo). Golumo propramaniere, kaj multe pli pardoninde, ĉar li konis lin multe malpli longe, eble eraris simile, misprenante bonkorecon kaj blindecon. Ĉiuokaze tiu parolado konfuzis kaj teruris lin. Li kaŭris submetiĝe sur la tero kaj povis prononci neniujn klarajn vortojn krom “afabla mastro”.

Frodo atendis pacience kelkan tempon, poste li denove parolis malpli severe.

— Ek jam, Golumo aŭ Smeagolo, se vi volas, rakontu al mi pri tiu alia vojo, kaj montru al mi, se vi povas, kia espero estas en ĝi sufiĉa por pravigi mian devion de mia evidenta pado. Mi hastas.

Sed Golumo estis en kompatinda stato, kaj la minaco de Frodo tute senmedoligis lin. Ne facile estis eligi el li iun klaran mesaĝon, inter la murmuroj kaj kvikoj, kaj la oftaj interrompoj, dum kiuj li rampis sur la tero kaj petegis, ke ili ambaŭ afablu al “povra eta Smeagolo”. Post iom da tempo li iomete plitrankviliĝis, kaj Frodo komprenis, pecon post peco, ke se vojaĝanto sekvas la vojon, kiu turniĝas okcidente de Efelo Duad, li venas iam al vojkrucio en cirklo de malhelaj arboj. La dekstra vojo iras al Osgiliado kaj la pontoj de Anduino; la meza vojo daŭre iras suden.

— Plu, plu, plu, — diris Golumo. — Ni neniam iris tiun vojon, sed oni diras, ke ĝi etendiĝas cent leŭgojn, ĝis oni povas vidi la Grandan Akvon, kiu neniam senmovas. Tie troviĝas multe da fiŝoj, kaj grandaj birdoj manĝas fiŝojn: afablaj birdoj; sed ni neniam iris tien, ho ve! Ni neniam havis okazon. Kaj pli fore estas aliaj landoj, oni diras, sed la Flava Vizaĝo tie tre varmegas, kaj malofte estas nuboj, kaj la homoj atakemas kaj havas nigrajn vizaĝojn. Ni ne volas vidi tiun landon.

— Ne! — diris Frodo. — Sed ne deviu de via vojo. Kio pri la tria direkto?

— Ho jes, ho jes, ekzistas la tria vojo, — diris Golumo. — Tiu estas la vojo maldekstren. Tuj ĝi komencas supreniri, supren,

retroserpentume kaj regrimpante al la altaj ombroj. Kiam ĝi ĉirkaŭiras la nigran rokon, vi vidos ĝin, subite vi vidos ĝin super vi, kaj vi deziros kaŝiĝi.

— Vidos ĝin, vidos ĝin? Kion oni vidos?

— La malnovan fortikaĵon, tre malnovan, nun tre teruran. Ni kutimis aŭdi rakontojn el la sudo, kiam Smeagolo estis juna, antaŭlonge. Ho jes, ni kutimis rakonti multajn historiojn vespere, sidante sur la bordoj de la Granda Rivero, en la salikejoj, kiam ankaŭ la Rivero pli junis, *golum', golum'*. — Li komencis plori kaj murmuri. La hobitoj pacience atendis. Golumo daŭrigis. — Rakontoj el la sudo pri la altaj homoj kun brilaj okuloj, kaj la domoj similaj al montetoj da ŝtono, kaj la arĝenta krono de ilia reĝo kaj ties Blanka Arbo. Mirindaj rakontoj. Ili konstruis tre altajn turegojn, kaj unu el ili estis arĝent-blanka, kaj en ĝi estis ŝtono lunsimila, kaj ĉirkaŭ ĝi estis grandaj blankaj muroj. Ho jes, estis multaj rakontoj pri la Turego de la Luno.

— Certe ĝi estis Minaso Itil, kiun konstruis Isilduro, filo de Elen-dilo, — diris Frodo. — Ĝuste Isilduro fortranĉis la fingron de la Malamiko.

— Jes, Li havas nur kvar sur la Nigra Mano, sed tiuj sufiĉas, — diris Golumo tremegante. — Kaj Li malamis la urbon de Isilduro.

— Kion li ne malamas? — diris Frodo. — Sed kiel koncernas nin la Turego de la Luno?

— Nu, mastro, tie ĝi estis kaj tie ĝi estas: la alta turego kaj la blankaj domoj kaj la muro; sed nun ne agrablaj, ne belaj. Li venkis ĝin antaŭlonge. Nun ĝi estas loko tre terura. Vojaĝantoj ekstremas vidante ĝin, ili kaŝe forrampas, ili evitas ĝian ombron. Sed la mastro devos iri tiun vojon. Tiu estas la sola alia vojo. Ĉar tie malpli altas la montoj, kaj la malnova vojo daŭre supreniras, ĝis ĝi alvenas malhelan trapasejon ĉe la supro, kaj poste ĝi ree iras suben, suben al Gorgoroto. — Lia voĉo iĝis flustro kaj li tremegis.

— Sed kiamaniere tio helpas nin? — demandis Sam. — Certe la Malamiko scias ĉion pri siaj propraj montoj, kaj tiu vojo estos gardata same atente kiel ĉi tiu? La turego ne malplenas, ĉu?

— Ho ne, ne malplenas! — flustris Golumo. — Ĝi ŝajnas malplena, sed ĝi ne estas, ho ne! Tre timigaj estaĵoj loĝas tie. Orkoj, jes ĉiam orkoj; sed estaĵoj pli malbonaj, pli malbonaj, ankaŭ loĝas tie. La vojo supreniras ĝuste sub la ombro de l' muroj kaj pasas la pordon. Nenio moviĝas sur la vojo, sen ke ili scias. La estaĵoj interne scias: la Silentaj Vaĉantoj.

— Do estas via konsilo, — diris Sam, — ke ni iru alian longan vojon suden, trovonte nin en simila kaĉo aŭ pli malbona, kiam ni venos tien, se entute ni alvenos, ĉu?

— Ne, vere ne, — diris Golumo. — La hobitoj devas vidi, devas klopodi kompreni. Li ne atendas atakon tiudirekte. Lia Okulo estas ĉie ĉirkaŭe, sed ĝi atentis iujn lokojn pli ol aliajn. Li ne povas vidi ĉion samtempe, ankoraŭ ne. Vidu, Li jam venkis la tutan terenon okcidente de la Ombraj Montoj ĝis la Rivero, kaj Li nun posedas ĉiujn pontojn. Li pensas, ke neniuj povas alveni la Lunturegon ne batalinte ĉe la pontoj aŭ akirinte multajn boatojn, kiujn ili ne povas kaŝi, kaj Li scios pri tio.

— Vi ŝajnas scii multon pri Liaj faroj kaj pensoj, — diris Sam. — Ĉu vi alparolis Lin lastatempe? Aŭ nur pasigis la tempon kun orkoj?

— Hobito ne afabla, ne sagaca, — diris Golumo, direktante al Sam koleran rigardon kaj turnante sin al Frodo. — Smeagolo alparolis orkojn, jes kompreneble, antaŭ ol renkonti la mastron, kaj multajn aliajn: li longe marŝadis. Kaj tion, kion li diras nun, tion diris multaj personoj. Ĝuste ĉi tie en la nordo troviĝas la plej granda danĝero por Li, kaj por ni. Li elvenos tra la Nigra Pordego iun tagon, iun tagon baldaŭ. Tio estas la sola vojo, laŭ kiu povas veni grandaj armeoj. Sed fore okcidente Li ne timas, kaj tie estas la Silentaj Vaĉantoj.

— Ĝuste tiel! — diris Sam, ne forturnite. — Kaj do ni devas almarŝi kaj frapi ĉe ilia pordo kaj demandi, ĉu ni sekvas la ĝustan vojon al Mordoro? Aŭ ĉu ili tro silentas por respondi? Ne estas sagace. Same efikus fari tion ĉi tie kaj ŝpari al ni longan plandadon.

— Ne ŝercu pri tio, — siblis Golumo. — Ne estas ridige, ho ne! Ne amuze. Ne estas sagace provi entute eniri Mordoron. Sed se la mastro diras: “Mi devas iri”, aŭ: “Mi intencas iri”, li sekve devas provi iamaniere. Sed li devas ne iri al la terura urbo, ho ne, kompreneble ne. Ĝuste pri tio Smeagolo helpas, afabla Smeagolo, kvankam neniuj sciigas al li, pri kio temas. Smeagolo ree helpas. Li trovis ĝin. Li konas ĝin.

— Kion vi trovis? — demandis Frodo.

Golumo kaŭris kaj denove lia voĉo flustriĝis.

— Padeton kondukantan supren en la montaron, kaj poste ŝtuparon, mallarĝan ŝtuparon, ho jes, tre longan kaj mallarĝan. Kaj poste pliajn ŝtupojn. Kaj poste... — lia voĉo eĉ pli mallaŭtiĝis, — tunelon, malluman tunelon; kaj fine etan fendejon, kaj padon alte super la ĉefa trapasejo. Tiuvoje Smeagolo sukcesis eliri el la mallumo. Sed tio estis antaŭ jaroj. La pado eble jam malaperis; sed eble ne, eble ne.

— Tiuj vortoj tute ne plaças al mi, — diris Sam. — Ili sonas tro facile, almenaŭ laŭ la rakonto. Se tiu pado ankoraŭ ekzistas, ankaŭ ĝi estos gardata. Ĉu ĝi estis gardata, Golumo? — Dirante tion li ekvidis, aŭ pensis ekvidi, verdan ekbrilon en l' okulo de Golumo. Golumo murmuris, sed ne respondis.

— Ĉu ĝi estas gardata? — demandis Frodo severe. — Kaj ĉu vi *eskapis* el la mallumo, Smeagolo? Ĉu ne prefere, ke oni permesis al vi foriri, pro komisio? Tion efektive supozis Aragorno, kiu trovis vin apud la Mortaj Marĉoj antaŭ jaroj.

— Estas mensogo! — siblis Golumo, kaj venis malica lumo al liaj okuloj pro la nomo Aragorno. — Li mensogis pri mi, jes li mensogis. Mi ja eskapis, per miaj propraj povraj rimedoj. Fakte oni diris, ke mi serĉu la Trezoron, kaj mi serĉis, serĉadis, ja kompreneble. Sed ne por la Nigrulo. La Trezoro estas nia, estis mia, mi diras al vi. Mi ja eskapis.

Frodo havis strangan certecon, ke pri tiu ĉi afero Golumo ĉi-foje ne tiom malproksimas de la vero, kiom oni povus suspekti; ke li iel trovis vojon el Mordoro kaj almenaŭ kredis, ke tio ŝuldiĝis al la propra ruzeemo. Ekzemple, li rimarkis, ke Golumo uzis "mi", kaj tio ŝajnis kutime signo, kiu malofte aperis, ke iuj restaĵoj de malnovaj vero kaj sincero momente superis. Frodo ne forgesis pri la ruzajoj de la Malamiko. La "eskapo" povis esti permesita aŭ aranĝita, kaj bone konata en la Malhela Turego. Kaj ĉiukaze Golumo evidente multon rezervis.

— Mi demandas denove, — li diris: — ĉu tiu sekreta vojo ne estas gardata?

Sed la nomo Aragorno igis Golumon malbonhumora. Li alprenis mienon sinkompatan de mensogulo suspektata, kiam escepte li diris la veron aŭ parton el ĝi. Li ne respondis.

— Ĉu ĝi estas gardata? — Frodo ripetis.

— Jes, jes, eble. Mankas sendanĝeraj lokoj en tiu ĉi lando, — diris Golumo paŭteme. — Mankas sendanĝeraj lokoj. Sed la mastro devas provi tion aŭ reiri hejmen. Mankas alia vojo.

Ili ne povis persvadi lin diri pli. La nomo de la danĝera loko kaj la alta pasejo li ne sciis, aŭ ne volis diri. Ĝia nomo estis Cirito Ungol, tre misfama nomo. Aragorno eble sciigus al ili tiun nomon kaj ĝian signifon; Gandolfo avertus ilin. Sed ili estis solaj, kaj Aragorno estis tre fora, kaj Gandolfo staris meze de l' ruino de Isengardo kaj luktis kun Sarumano, malhelpite de perfidoj. Tamen ĝuste kiam li diris siajn lastajn vortojn al Sarumano, kaj la *palantiro* falis fajre sur la ŝtuparon

de Ortanko, liaj pensoj ĉiam direktiĝis al Frodo kaj Samsaĝo, tra la longaj leŭgoj lia menso serĉis ilin espere kaj komplate.

Eble Frodo sentis tion senscie, kiel okazis sur Amono Hen, malgraŭ tio, ke li kredis Gandalfon forpasinta, forpasinta por ĉiam en la ombro de Morio tre malproksime. Li sidis sur la tero dum longa tempo, silenta, kun la klinita kapo, klopodante rememori ĉion, kion Gandolfo diris al li. Sed por la aktuala elekto li memoris neniun konsilon. Efektive, la gvido de Gandolfo estis forprenita de ili tro frue, tro frue, dum la Malhela Lando estis ankoraŭ tre malproksima. Kiel ili enirus ĝin finfine, tion Gandolfo ne diris. Eble li ne povis diri. En la fortikaĵoj de l' Malamiko en la nordo, en Dol Gulduron, li iam riskis. Sed en Mordoron, al la Fajromonto kaj al Baraduro, de kiam la Malhela Mastro repotenciĝis, ĉu li iam vojaĝis tien? Al Frodo ŝajnis, ke ne. Kaj jen li, eta duonulo de l' Provinco, simpla hobito el la kamparo, de kiu oni atendis, ke li trovi vojon tie, kien ne povis, aŭ ne aŭdacis iri, la granduloj. Tio estis sorto malica. Sed li akceptis ĝin en sia propra gastoĉambro dum malproksima printempo de alia jaro, jam tiel fora, ke ĝi similis ĉapitron en romano pri la juneco de l' mondo, kiam ankoraŭ floris la Arboj Arĝenta kaj Ora. Tiu ĉi estas misa elekto. Kiun vojon li elektu? Kaj se ambaŭ kondukus al teruro kaj morto, kiom valoras elekto?

La tago progresis. Profunda silento inundis la etan grizan kavon en kiu ili kuŝis, tiom proksime al la lando de timo: silento kvazaŭ ĝi estus densa vualo, kiu forbaris ilin de la tuta ĉirkaŭa mondo. Supre estis kupolo de pala ĉielo striita per momentaj fumoĵoj, sed tio ŝajnis alta kaj tre malproksima, kvazaŭ vidata tra grandaj profundaĵoj de aero peza je meditema pensado.

Eĉ aglo ŝvebanta antaŭ la suno ne vidus de tie la sidantajn hobitojn sub pezo de la sorto, silentajn, ne moviĝantajn, volvitajn per siaj grizaj manteloj. Ĝi eble paŭzus momente por atenti Golumon, etan figuron diskuŝantan sur la tero kvazaŭ skeleto de malsatmortinta homido, kies ĉifona vestaĵo ankoraŭ kroĉiĝas al ĝi, kies longaj brakoj kaj kruroj, preskaŭ oste blankas kaj oste maldikas: sen groŝvaloro da karno.

La kapo de Frodo estis klinita al la genuoj, sed Sam kliniĝis surdorsen, kun la manoj malantaŭ la kapo, rigardante el sia kapuĉo al la malplena ĉielo. Almenaŭ dum longa tempo ĝi estis malplena. Tiam post kelka tempo Sam pensis vidi malhelan birdosimilan formon giri

en la cirklo de lia vidkampo, poste ŝvebi kaj forgiri. Sekvis du aliaj, kaj poste la kvara. Ili estis laŭvide tre malgrandaj, tamen iel li sciis, ke ili estas enormaj, kun larĝa etendiĝo de flugiloj, flugantaj tre alte. Li kovris siajn okulojn kaj kliniĝis antaŭen, kaŭre. Lin plenigis la sama averta timo, kian li spertis en ĉeesto de la Nigraj Rajdantoj: la senrimeda teruro, kiu alvenis kun la krio en la vento kaj la ombro sur la luno, kvankam nun ĝi ne estis tiom prema aŭ pela. La minaco estis pli forega, sed ĝi estis minaco. Ankaŭ Frodo sentis ĝin. Lia pensado estis interrompita. Li ekmoviĝis kaj tremeris, sed li ne rigardis supren. Golumo kuntiriĝis kvazaŭ atakota araneo. La flugantaj figuroj giradis kaj rapide zomis suben, hastante reen al Mordoro.

Sam enspiris profunde.

— La Rajdantoj denove aktivis, supre en la aero, — li diris per raŭka flustro. — Mi vidis ilin. Ĉu vi opinias, ke ili povis vidi nin? Ili estis tre altaj. Kaj se ili estas la Nigraj Rajdantoj, samaj kiel antaŭe, do ili ne povis vidi multon en taglumo, ĉu?

— Ne, eble ne, — diris Frodo. — Sed iliaj ĉevaloj povis vidi. Kaj tiuj flugilhavaj estaĵoj, sur kiuj ili nun rajdas, probable vidas pli ol ajnaj aliaj kreitaĵoj. Ili similas grandajn karnomangajn birdojn. Ili serĉas ion: la Malamiko vaĉas, timeble.

La timosento pasis, sed la volvanta silento estis frakasita. Jam de kelka tempo ili estis forbaritaj de la mondo, kvazaŭ sur nevidebla insulo; jam ili estis denove nudigitaj, revenis la danĝero. Sed Frodo ankoraŭ ne alparolis Golumon, nek difinis sian elekton. Liaj okuloj estis fermitaj, kvazaŭ li songus aŭ rigardus internen al siaj koro kaj memoro. Finfine li ekmoviĝis kaj stariĝis, kaj ŝajnis, ke li estas parolonta kaj decidonta. Sed li diris:

— Aŭskultu! Kio estas tio?

Ilin inundis nova timo. Ili aŭdis kantadon kaj raŭkan kriadon. Unue tio ŝajnis tre malproksima, sed ĝi proksimiĝis: ĝi estis venanta al ili. Saltis en iliajn mensojn, ke la Nigraj Flugantoj rimarkis ilin kaj sendis armitajn soldatojn por kapti ilin: neniu rapido ŝajnis troa por tiuj teruraj servistoj de Saŭrono. Ili kaŭris aŭskultante. La voĉoj kaj la tintado de armiloj kaj kirasoj tre proksimis. Frodo kaj Sam elingigis siajn glavetojn. Fuĝo estis neebla.

Golumo leviĝis malrapide kaj rampis insektece al la rando de la kavo. Tre singarde li levis sin colon post colo, ĝis li povis rigardi transen inter du rompitaĵoj ŝtonpintoj. Li restis tie senmove dum kelka

tempo, neniom bruante. Baldaŭ la voĉoj komencis denove forpasi, kaj poste ili malrapide forvelkis. En la foro sonis trumpeto sur la remparo de Moranono. Golumo kviete retroiris kaj glitis suben en la kavon.

— Pliaj homoj iras al Mordoro, — li diris malaltvoĉe. — Malhelaj vizaĝoj. Tiajn homojn ni ne vidis antaŭe, ne, Smeagolo ne vidis. Ili estas batalemaj. Ili havas nigrajn okulojn kaj longajn nigrajn harojn, kaj orajn ringojn en la oreloj; jes, multe da bela oro. Kaj iuj havas sur la vangoj ruĝan farbon, kaj ruĝajn mantelojn; kaj iliaj standardoj estas ruĝaj, kaj la pintoj de iliaj lancoj; kaj ili havas rondajn ŝildojn, flavajn kaj nigrajn kun grandaj pikiloj. Ne afablaj, tre kruelaj misfaraj homoj ili aspektas. Preskaŭ same malbonaj kiel orkoj, kaj multe pli grandaj. Smeagolo opinias, ke ili venas el la sudo depost la fino de la Granda Rivero: ili alvenis laŭ la suda vojo. Ili preterpasis al la Nigra Pordego, sed eble sekvas aliaj. Ĉiam pli da personoj venas al Mordoro. Iun tagon tie enestos ĉiuj popoloj.

— Ĉu estis olifontoj? — demandis Sam, forgesante sian timon pro sia avido ricevi novaĵojn el fremdaj lokoj.

— Ne, neniuj olifontoj. Kio estas olifontoj? — demandis Golumo.

Sam stariĝis, metis la manojn malantaŭ la dorson (tion li ĉiam faris “deklamante poezion”), kaj komencis:

*Muse grizforma,
dome enorma,
nazo serpenta,
teron skuanta,
dum kampojn mi plandas;
arbojn ĝi fendas.
Kun kornoj en buŝo
en sudo la puŝo,
ventumas orelegoj.
Dum multaj jardekoj
vagade mi muĝas,
neniam mi kuŝas,
eĉ ne la mortonto.
Jen mi, Olifonto,
el ĉiuj plej granda,
maljuna, altranda.
Se vidi sukcesus,
vi min ne forgesus.
Se vi min ne vidus,*

*pri mi vi mokridos;
Olifonto jen mi jam,
mensogas neniam.*

— Tio, — diris Sam, fininte la deklamon, — tio estas rimaĵo, kiun ni havas en la Provinco. Sensencaĵo, eble, kaj eble ne. Sed ni havas ankaŭ niajn historiojn kaj novaĵojn el la sudo, vi scias. En la malnova tempo hobitoj kutimis de tempo al tempo vojaĝi. Tio ne signifas, ke multaj iam revenis, aŭ ke ĉion, kion ili diris, oni kredis: “novaĵoj el Brio” kaj ne “certa kiel Provincaj informoj”, laŭ la sentencoj. Sed mi aŭdis rakontojn pri la granduloj fore en la sunaj landoj. Svertingoj, ni nomas ilin en niaj rakontoj; kaj ili rajdas sur olifontoj, laŭdire, kiam ili batalas. Ili surdorsigas al la olifontoj domojn kaj turojn, ĉu ne, kaj la olifontoj ĵetas rokojn kaj arbojn unu kontraŭ alian. Do kiam vi diris “viroj el la sudo, tute en ruĝo kaj oro”, mi diris “Ĉu estis olifontoj?” Ĉar se jes, mi intencus ŝtele rigardi, kun aŭ sen la risiko. Sed jam mi supozas, ke neniam mi vidos olifonton. Eble tiaj bestoj ne ekzistas. — Li ĝemspiris.

— Ne, neniuj olifontoj, — diris Golumo denove. — Smeagolo ne aŭdis pri ili. Li ne deziras vidi ilin. Li ne deziras, ke ili ekzistu. Smeagolo deziras foriri de ĉi tie kaj kaŝiĝi ie pli sekure. Smeagolo deziras, ke la mastro iru. Afabla mastro, ĉu li ne akompanu Smeagolon?

Frodo stariĝis. Li ridis meze de la zorgoj, kiam Sam ripetis la malnovan apudfajran rimaĵon pri olifonto, kaj tiu rido liberigis lin de hezitado.

— Mi ŝatus, ke ni havu mil olifontojn kun Gandolfo sur blanka olifonto ĉekape, — li diris. — Tiam ni trarompus vojon en tiun ĉi misan landon, eble. Sed tio mankas; temas nur pri niaj propraj lacaj kruroj, jen ĉio. Nu, Smeagolo, la tria turniĝo eble montriĝos la plej bona. Mi akompanos vin.

— Bona mastro, saĝa mastro, afabla mastro! — kriis Golumo ĝojigite, frapetante la genuojn de Frodo. — Bona mastro! Do ripozu nun, afablaj hobitoj, sub ombro de la ŝtonoj, proksime sub la ŝtonoj! Ripozu kaj restu kvietaj, ĝis la Flava Vizaĝo foriros. Tiam ni povos iri rapide. Molaj kaj rapidaj kiel ombroj ni devos esti!

Ĉapitro 4

PRI SPICHERBOJ KAJ STUFITA KUNIKLO

Dum la malmultaj restantaj horoj de taglumo ili ripozis, movante sin en la ombron dum la suno moviĝis, ĝis fine la ombro de l' okcidenta rando de ilia valo longiĝis, kaj la valon tute plenigis mallumo. Tiam ili manĝis iomete, kaj trinkis ŝpareme. Golumo manĝis nenion, sed li kontente akceptis akvon.

— Jam baldaŭ estos pli, — li diris, lekante siajn lipojn. — Bona akvo subenfluas en rojoj al la Granda Rivero, agrabla akvo en la terejoj, al kiuj ni iras. Ankaŭ manĝaĵon Smeagolo akiros tie, eble. Li tre malsatas, jes, *golum!* — Li metis siajn du platajn manegojn al la ŝrumpinta ventro, kaj pala verda lumo ekaperis en liaj okuloj.

Profundis la krepusko, kiam ili ekvojaĝis, rampante trans la okcidentan randon de l' valo kaj fadante fantomece en la malglatan teron vojrande. La luno havis tri noktojn antaŭ la pleno, sed ĝi ne superiris la montojn ĝis preskaŭ noktomezo, kaj la frua nokto tre malhelis. Unu ruĝa lumo ardis alte en la Turegoj de l' Dentoj, sed krom tio neniu signo videblis aŭ aŭdeblis pri la sendorma vaĉado sur Moranono.

Tra multaj mejloj tiu ruĝa okulo ŝajnis rigardadi ilin fuĝantajjn, stumblantajn tra dezerta ŝtonoza tereno. Ili ne riskis laŭiri la vojon, sed ili restigis ĝin maldekstre, sekvante ĝian linion laŭeble precize je iometa distanco. Fine, kiam la nokto malnoviĝis, kaj ili estis jam lacaj, ĉar ili permesis al si nur unu mallongan ripozon, tiu okulo reduktiĝis al fajra punkteto kaj poste malaperis: ili jam ĉirkaŭiris la malhelan nordan ŝultron de la suba montetaro kaj celis suden.

Kun la koroj strange malpezigitaj ili nun ripozis denove, sed ne longe. Ili ne iris sufiĉe rapide por kontentigi Golumon. Laŭ lia kalkulo temis pri preskaŭ tridek leŭgoj de Moranono ĝis la krucvojo super Osgiliado, kaj li esperis trairi tiun distancon per kvar noktoj. Do baldaŭ ili denove baraktis antaŭen, ĝis la aŭroro komencis disvastiĝi malrapide en la vasta griza soleco. Tiam ili jam marŝis preskaŭ ok leŭgojn, kaj la hobitoj ne povis pluiri, eĉ se tion ili riskemus.

La kreskanta lumo rivelis al ili terenon jam malpli dezertan kaj ruinigitan. La montoj daŭre baŭmis minace je la maldekstro, sed proksime ili povis vidi la sudan vojon, nun celantan for de la nigraj radikoj de la montetoj kaj deklivantan okcidenten. Trans la vojo estis deklivoj kovritaj de sombraj arboj kvazaŭ malhelaj nuboj, sed ĉie ĉirkaŭe kuŝis malorda erikejo plena je kalunoj, genistoj, kornusoj kaj aliaj arbustoj, kiujn ili ne konis. Ili vidis ie-tie aretojn de altaj pinoj. La koroj de la hobitoj iomete rekuraĝiĝis malgraŭ la laceco: la aero estis freŝa kaj bonodora, kaj memorigis ilin pri la altejoj de la fora Norda Kvarono. Ŝajnis bone malŝarĝiĝi, promeni sur tereno nur kelk-jare regita de la Malhela Mastro kaj ankoraŭ ne tute ruiniĝinta. Sed sian endanĝerigon ili ne forgesis, ankaŭ ne la Nigran Pordegon, kiu ankoraŭ tro proksimis, kvankam ĝi estis kaŝita malantaŭ la mornaj montetoj. Ili ĉirkaŭrigardis serĉante kaŝlokon, kie ili povus ŝirmi sin de fiaj okuloj dum la cetero de la lumo.

La tago pasis maltrankvile. Ili kuŝis profunde en la erikoj kaj kalkulis la lantajn horojn, dum kiuj malmulto ŝajnis ŝanĝiĝi; ĉar ili estis ankoraŭ sub la ombroj de Efelo Duad, kaj la suno estis vualita. Frodo kelkfoje dormis profunde kaj trankvile, ĉu fidante Golumon, ĉu tro elĉerpita por zorgi pri li; sed Sam trovis malfacile fari pli ol dormeti, eĉ kiam Golumo evidente dormadis snufetante kaj tikante pro siaj sekretaj sonĝoj. Eble malsato pli ol malfido tenis lin maldorma: li komencis sopiri bonan hejmecon manĝaĵon, "ion varman el la poto".

Tuj kiam la tero paliĝis je senforma grizo sub venonta nokto ili rekomencis la vojaĝon. Sufiĉe baldaŭ Golumo kondukis ilin suben sur la sudan vojon; kaj post tio ili progresis pli rapide, kvankam la danĝero estis pli granda. Iliaj oreloj streĉe aŭskultis por aŭdi hufojn aŭ piedojn sur la vojo antaŭe aŭ sekvantajn malantaŭe; sed la nokto pasis, kaj ili aŭdis neniun sonon de marŝanto aŭ rajdanto.

La vojo estis konstruita en tempo longe pasinta, kaj tra eble tridek mejloj sub Moranono, ĝi estis nove riparita, sed ju pli ĝi iris suden, des pli la sovaĝejo trudiĝis al ĝi. La metieco de homoj antikvaj ankoraŭ videblis en ĝia rekta sensancela direktiĝo kaj ebena celado: de tempo al tempo ĝi tratranĉis al si vojon tra montflankaj deklivoj, aŭ transsaltis rojon per larĝa belforma arkaĵo el longviva masonaĵo; sed finfine malaperis ĉiuj indikoj pri ŝtonlaboro, krom ie-tie rompiĝinta pilastro gvatanta el la vojflankaj arbustoj, aŭ malnovaj pavimŝtonoj ankoraŭ kaŝiĝantaj inter loloj kaj musko. Erikaj, arboj kaj filikoj

malordis suben kaj pendis super la flankoj aŭ etendiĝis dise super la vojo. Ĝi reduktiĝis finfine al kampara ĉarvojeteto malmulte uzita; sed ĝi ne serpentumis: ĝi daŭrigis sian propran certan direktiĝon kaj gvidis ilin laŭ la vojo plej rapida.

Do ili pasis en la nordan parton de tiu tereno, kiun la homoj iam nomis Itilio, bela regiono de grim paj arbaroj kaj rapide subenfluantaj riveretoj. La nokto iĝis favora sub steloj kaj ronda luno, kaj al la hobitoj ŝajnis, ke la bonodoro de la aero plifortiĝas, dum ili antaŭeniras; kaj laŭ la blovado kaj murmurado de Golumo ŝajnis, ke ankaŭ li rimarkis tion kaj ne ŝatis ĝin. Je l' unuaj indikoj pri la tagiĝo ili denove haltis. Ili alvenis la finon de longa valo, profunda kaj en la mezo krut-flanka, per kiu la vojo trafendis la ŝtonan firston. Tie ili grimpis la okcidentan randaĵon kaj ĉirkaŭrigardis.

La tago komenciĝis sur la ĉielo, kaj ili vidis, ke la montoj estas jam multe pli malproksimaj, forirantaj orienten laŭ longa kurbiĝo kiu perdiĝis en la foro. Kiam ili turniĝis okcidenten, antaŭ ili malabruptaj deklivoj subeniĝis en malklarajn nebuletojn tre sube. Ĉie ĉirkaŭ ili estis malgrandaj boskoj da rezinaj arboj, abioj, cedroj, cipresoj kaj aliaj specoj nekonataj en la Provinco, inter kiuj estis larĝaj maldensejoj; kaj ĉie estis abundo da dolĉodoraj spicherboj kaj arbustoj. La longa vojaĝo el Rivendelo kondukis ilin tre suden de ilia propra lando, sed ĝis nun en tiu pli ŝirmata regiono la hobitoj ne sentis la klimatan ŝanĝiĝon. Ĉi tie la printempo jam estis ĉirkaŭ ili; frondoj trapikis muskon kaj humon, larikoj estis verd fingraj, etaj floroj malfermiĝis sur la herbo, birdoj kantadis. Itilio, la ĝardeno de Gondoro, jam ruin-iĝinta, daŭre retenis malordan driadan belecon.

Sude kaj okcidente ĝi alrigardis la varmajn subajn valetojn de Anduino, ŝirmatajn oriente de Efelo Duad kaj tamen ne sub la montombro, protektatajn norde de Emin Muilo, malfermitajn al la sudaj blovetoj kaj la humidaj ventoj de la fora Maro. Kreskis tie multaj arboj, antaŭlonge plantitaj, falantaj en nevirtitan maljunaĝon inter konfuziĝo da senzorgaj posteuloj; kaj boskoj kaj densejoj estis el tamariko kaj fortodoraj terebintarboj, el olivarboj kaj el laŭroj; kaj troviĝis juniperoj kaj mirtoj kaj timianoj kreskantaj arbuste, aŭ per siaj lignecaj rampaj tigoj mantelis en profundaj tapetoj la kaŝitajn ŝtonojn; salvioj diversspecaj elmetis florojn blujajn, ruĝajn aŭ pale verdajn; kaj majoranoj kaj novŝosantaj petroseloj, kaj multaj plantaĵoj, kies formoj kaj odoroj ne troviĝis en la ĝardenklero de Sam. La

grotetoj kaj rokmuroj estis jam stelumitaj de saksifragoj kaj sedoj. Primoloj kaj anemonoj maldormis en la avelegejoj; kaj asfodeloj kaj multaj lilifloroj pendolis siajn duonapertajn kapojn en la herbo: profunda verda herbo apud la lagetoj, kie haltis falintaj fluoj en friskaj kavoj dum la vojaĝo suben al Anduino.

La vojaĝantoj turnis la dorsojn al la vojo kaj iris suben laŭ la deklivo. Dum ili marŝis, puŝante sin tra arbustoj kaj herbejoj, leviĝis ĉirkaŭ ili dolĉaj bonodoroj. Golumo tuis kaj duonvomis; sed la hobitoj profunde enspiris, kaj subite Sam ekridis pro kora malŝarĝiĝo, ne pro ŝercemo. Ili laŭiris rojon, kiu rapide subeniris antaŭ ili. Baldaŭ ĝi gvidis ilin al eta klara lago en malprofunda valetto: ĝi kuŝis en la rompita ruinaĵoj de antikva ŝtonbaseno, kies ĉizitan randon preskaŭ tute kovris muskoj kaj rozarbedoj; ĉirkaŭ ĝi staris iridfolioj en vicoj, kaj folioj nimfeaj flosis sur ĝia milde ondeta supraĵo; sed ĝi estis profunda kaj freŝa, kaj daŭre elverŝiĝis sensone laŭ ŝtona beko ĉe la fora ekstremo.

Tie ili sin lavis kaj trinkis ĝissate ĉe la enflua trueto. Poste ili serĉis ripozejon, ankaŭ sinkaŝejon; ĉar tiu tereno, ankoraŭ belaspekta, tamen estis nun teritorio de la Malamiko. Ili ne tre malproksimis de la vojo, tamen eĉ en tia mallonga spaco ili vidis cikatrojn de malnovaj militoj kaj pli novajn vundojn kaŭzitaĵojn de la orkoj kaj aliaj fiaj servistoj de la Malhela Mastro: ŝakto de nekovritaj rubo kaj malpuraĵo; arboj malzorge dehakitaj kaj postlasitaj al morto, kun misaj runoj aŭ la fideŝtina signo de l' Okulo eltranĉitaj per krudaj strioj sur iliaj ŝeloj.

Sam skrablanta sub la elirejo de la lago, flarante kaj tuŝante la nekonatajn plantaĵojn kaj arbojn, momente forgesinte pri Mordoro, ricevis memorigon pri ĝia ĉiam ĉeesta danĝero. Li hazarde trovis cirklon ankoraŭ brulmakulitan, kaj meze de ĝi li trovis amason da karbumitaj frakasitaj ostoj kaj kranioj. La rapida kreskivo de la sovaĝejo je rozarbedoj kaj eglanterioj kaj pendantaj klematidoj jam tiris vualon sur tiun lokon de terura festado kaj mortigado; sed ĝi ne estis antikva. Li retrorigardis al siaj kunuloj, sed li diris nenion: la ostojn prefere lasu en trankvilo kaj nepalpmitaj kaj dispelitaj de Golumo.

— Ni trovu lokon por tratagi, — li diris. — Ne pli sube. Pli alte, laŭ mi.

Iom retro super la lago ili trovis profundan brunan kampeton da pasintjaraj filikoj. Malantaŭ ĝi estis densejo da malhelfoliaj laŭroj kreskantaj supren laŭ kruta teramaso kronita de maljunaj cedroj. Ili

decidis resti tie kaj pasigi la tagon, kiu jam aŭguris helon kaj varmon. Tago taŭga por promenado survoje tra la boskoj kaj valetoj de Itilio; sed kvankam orkoj distancigas sin de sunlumo, tamen tie troviĝis tro multaj lokoj, kie ili povus kaŝiĝi kaj vaĉi; kaj aliaj fiokuloj viglis tie: Saŭrono havis multajn servistojn. Golumo ĉiuokaze rifuzis moviĝi sub la Flava Vizaĝo. Baldaŭ tiu rigardos super la malhelaj firstoj de Efelo Duad, kaj li svenetos kaj kaŭros pro la lumo kaj varmeĝo.

Sam dum la marŝado serioze pripensis nutraĵon. Ĉar la malespero de l' netrairebla Pordego estis malantaŭe, li ne sentis tian emon kian la mastro malatenti la vivrimedojn post la misiofino; kaj ĉiuokaze ŝajnis al li pli saĝe ŝpari la vojpanon de la elfoj ĝis malpli favora estonteco. Jam pasis ses tagoj aŭ pli, de kiam li kalkulis, ke ili havas stokon sufiĉan por nuraj tri semajnoj.

“Se ni atingos la fajron dum tioma tempo, estos bonŝance laŭ la nuna progreso! — li pensis. — Kaj ni eble volos reiri. Ni eble!”

Cetere, fine de longa noktmarŝado, kaj post baniĝo kaj trinkado, li estis eĉ pli ol kutime malsata. Vespermanĝon, aŭ matenmanĝon, en la malnova kuirejo ĉe Bagŝuta Vico, ĝuste tion li vere sopiris. La ideo trafis lin, kaj li sin turnis al Golumo. Golumo estis ŝtele ekrapanta kvarpiede tra la filikoj.

— Hej! Golumo! — diris Sam. — Kien vi iras? Ĉu por ĉasi? Nu, vidu, olda nazulo, al vi ne plaĉas nia manĝaĵo, kaj mi mem ne domaĝus variecon. Via nova devizo estas *ĉiam helpopreta*. Ĉu vi povas trovi ion taŭgan al malsata hobito?

— Jes, eble, jes, — diris Golumo. — Smeagolo ĉiam helpas, se oni petas — se oni petas afable.

— Bone! — diris Sam. — Do mi petas. Kaj se tio ne sufiĉe afablas, mi petegas.

Golumo malaperis. Li forestis iom longete, kaj Frodo post kelkaj mordoj da *lombaso* sin aranĝis profunde en la bruna filikaro kaj endormiĝis. Sam rigardis lin. La frua taglumo ĵus subenrampis en la subarbajn ombrojn, sed li vidis tre klare la vizaĝon de l' mastro kaj ties manojn, kuŝantajn ripoze sur la tero apude. Li subite rememoris Frodon, kiam tiu kuŝis dormanta en la domo de Elrondo post lia terura vundiĝo. Tiam dumgarde Sam rimarkis, ke kelkfoje lumo ŝajnas malforte brili interne; sed nun la lumo estis eĉ pli evidenta kaj forta. La vizaĝo de Frodo estis trankvila, la signoj de timo kaj zorgado forlasis ĝin; sed ĝi aspektis maljuna, maljuna kaj bela, kvazaŭ ĉizado de

jaroj formigaj estus nun rivelita per multaj fajnaj linioj antaŭe kaŝitaj, kvankam la identeco de la vizaĝo ne ŝanĝiĝis. Tio ne signifas, ke ĝuste tiel Sam Vato formulis sian penson. Li skuis sian kapon, kvazaŭ trovante vortojn senutilaj, kaj murmuris:

— Mi amas lin. Tia li estas, kaj kelkfoje ĝi trabilas iel. Sed mi amas lin, ĉu aŭ ne.

Golumo revenis kviete kaj transrigardis la ŝultron de Sam. Rigardinte Frodon, li fermis siajn okulojn kaj forrampis sensone. Sam alvenis lin post momento kaj trovis lin manĝanta ion kaj murmuranta al si. Apud li sur la tero kuŝis du malgrandaj kunikloj, kiujn li komencis avide okulumi.

— Smeagolo ĉiam helpas, — li diris. — Li alportis kuniklojn, agrablajn kuniklojn. Sed la mastro endormiĝis, kaj eble Sam volas endormiĝi. Jam ne volas kuniklojn. Smeagolo klopodas helpi, sed li ne povas ion kapti dumminute.

Sam tamen tute ne malŝatis kuniklaĵon, kaj tion diris. Almenaŭ ne kuniklaĵon kuiritan. Ĉiuj hobitoj, kompreneble, scias kuiri, ĉar ili eklernas tiun arton antaŭ la abocon (kiun multaj neniam atingas); sed Sam estis kuiranto tre kapabla, eĉ laŭ takso de hobitoj, kaj li faris multon el la bivaka kuirado dum la vojaĝoj, kiam prezentiĝis okazo. Li kunportis espereme kelkajn ilojn en sia tornistro: etan tindrujon, du malprofundajn kaseroletojn, el kiuj la malpli granda adaptiĝis en la pli granda; ene de ili estis metitaj ligna kulero, mallonga dupikila forko kaj kelkaj pikstangetoj; kaj kaŝita funde de la tornistro en plata ligna skatolo valorajo malkreskanta: iom da salo. Sed li bezonis fajron, kaj krome kelkajn aliajn aferojn. Li pripensis iomete, dum li eligis sian tranĉilon, purigis kaj akrisis ĝin, kaj komencis prepari la kuniklojn. Li ne intencis eĉ pormomente lasi dormantan Frodon sola.

— Ek, Golumo, — li diris. — Mi havas por vi ankoraŭ alian taskon. Iru pleniĝi ĉi tiujn kaserolojn per akvo kaj reportu ilin!

— Smeagolo alportos akvon, jes, — diris Golumo. — Sed kial la hobito deziras tiom da akvo? Li jam trinkis, li sin lavis.

— Ne zorgu pri tio, — diris Sam. — Se vi ne povas diveni, vi sufiĉe baldaŭ konstatos. Kaj ju pli baldaŭ vi alportos la akvon, des pli baldaŭ vi konstatos. Ne difektu iun mian kaserolon, aŭ mi faros el vi haket-aĵon.

Dum Golumo forestis, Sam rigardis denove Frodon. Tiu plu dormis kviete, sed Sam nun estis plej trafata de la magreco de liaj vizaĝoj kaj manoj.

— Tro maldika kaj malloza li estas, — li murmuris. — Ne taŭge por hobito. Se mi sukcesos kuiri ĉi kunikletojn, mi vere vekos lin.

Sam kunrastis amaseton da filikoj plej sekaj, kaj poste skrablis supren sur la dekliveto kolektante aron da branĉetoj kaj lignaj rompi-taĵoj; falinta branĉo de cedro ĉe la supro havigis al li bonan stokon. Li eltranĉis kelkajn herbkvadratojn sube de l' dekliveto tuj ekster la filik-ejo, kaj faris malgrandan truon kaj metis tien la brulaĵon. Estante lerta pri siliko kaj tindro, li baldaŭ ĉendis fajreton. Ĝi kreis preskaŭ neniom da fumo sed dissendis aroman odoron. Li ĝuste kliniĝis super sia fajro, ŝirmante ĝin kaj aldonante lignon pli pezan, kiam Golumo revenis, zorge portante la kaserolojn kaj grumblante al si.

Li demetis la kaserolojn kaj subite ekvidis, kion faras Sam. Li eligis malfortan siblan kriĉon kaj ŝajnis samtempe tima kaj kolera.

— Aĥ! Sss... Ne! Ne! Stultaj hobitoj, stultaj, jes stultaj! Ili ne faru tion!

— Ne faru kion? — demandis Sam surprizite.

— Ne faru la aĉajn ruĝajn langojn, — siblis Golumo. — Fajro, fajro! Estas danĝera, jes danĝera. Ĝi brulas, ĝi mortigas. Kaj ĝi alvokos malamikojn, jes certe.

— Mi opinias, ke ne, — diris Sam. — Neniu kialo por tio, se oni ne surmetos malsekaĵon kaj kreos subbrulaĵon. Sed se jes, do jes. Mi intencas riski tion, ĉiuokaze. Mi intencas stufi ĉi kunikletojn.

— Ĉu stufi la kunikletojn? — kvikis Golumo konsternite. — Fuŝi belan viandon, kiun Smeagolo restigis al vi, kompatinda malsata Smeagolo! Pro kio? Pro kio, stulta hobito? Ili estas junaj, ili estas molaj, ili estas agrablaj. Manĝu ilin, manĝu ilin! — Li ungis la pli proksiman kuniklon, jam senhaŭtigitan kaj kuŝantan apud la fajro.

— Trankviliĝu! — diris Sam. — Ĉiu laŭ propra moro. Nia pano vomigas vin, kaj nekuirita kunikleto vomigas min. Se vi donis al mi kunikleton, tiu kunikleto estas mia, vidu, por kuiri, se tion mi emas. Kaj mi emas. Ne necesas, ke vi rigardu min. Iru kapti alian kaj manĝu laŭvole. Ie private kaj for de mia vidkampo. Tiam vi ne vidos la fajron, kaj mi ne vidos vin, kaj ni ambaŭ pli feliĉos. Mi certigos, ke la fajro ne fumu, se tio iel feliĉigos vin.

Golumo foriris grumblante kaj rampis en la filikejon. Sam okupiĝis pri siaj kaseroloj.

— Kion la hobito bezonas kun kunikleto, — li diris al si, — tio estas kelkaj spicherboj kaj radikaĵoj, precipe terpomoj, por ne paroli pri pano. Spicherbojn ni povas akiri, verŝajne.

— Golumo! — li vokis mallaŭte. — Tria fojo pagas la tuton. Mi deziras kelkajn spicherbojn. — La kapo de Golumo elrigardis el la filikejo, sed li aspektis nek helpema nek amikeca. — Kelkaj laŭraj folioj, iom da timiano kaj salvio sufiĉos, antaŭ la akvo ekbolos, — diris Sam.

— Ne! — diris Golumo. — Smeagolo ne estas kontenta. Kaj al Smeagolo ne plaĉas odoraĉaj folioj. Li ne manĝas herbojn aŭ radiokojn, ne trezoro, ne ĝis li malsategas aŭ tre malsanas, kompatinda Smeagolo.

— Smeagolo trafos en vere varmegan akvon, kiam bolos tiu ĉi akvo, se li ne faros laŭpete, — graŭlis Sam. — Sam enmetos tien lian kapon, jes trezoro. Kaj mi devigus lin serĉi ankaŭ napojn kaj karotojn, kaj ankaŭ terpomojn, se temus pri la ĝusta sezono. Mi vetas, ke tie ĉi sovaĝe diskreskas ĉiaj bonaĵoj. Mi donus multon por manpleno da terpomoj.

— Smeagolo ne iros, ho ne trezoro, ne ĉi-foje, — siblis Golumo. — Li timas, kaj li tre lacas, kaj tiu ĉi hobito ne afablas, tute ne afablas. Smeagolo ne elfosos radikojn, karotojn kaj... terpomojn. Kio estas terpomoj, trezoro, he, kio estas terpomoj?

— Ter-po-moj, — diris Sam. — Frandaĵo de la Avulo, kaj elstare bona balasto por malplena stomako. Sed vi trovos neniom, do ne necesas serĉi. Sed estu bona Smeagolo kaj alportu al mi spicherbojn, kaj mi taksos vin pli alte. Krom tio, se vi komencos novan vivmanieron kaj daŭrigos ĝin, mi kuiros por vi kelkajn terpomojn iam. Mi kuiros ja: frititaj fiŝo kaj terpomfingroj pretigitaj de S. Vato. Tion vi ne povus rifuzi.

— Jes, jes, ni povus. Difekti agrablan fiŝon per brulumado. Donu al mi fiŝon *jam nun*, kaj tenu mem fiajn terpomfingrojn!

— Ho, vi estas senesperiga, — diris Sam. — Endormiĝu!

Fine li devis mem trovi la bezonataĵojn; sed ne necesis al li iri foren, ne el videblo de la loko, kie kuŝis lia mastro ankoraŭ dormanta. Dum kelka tempo Sam sidis meditante kaj prizorgante la fajron ĝis la akvo bolis. La taglumo plifortiĝis kaj la aero iĝis varma; la roso forvelkis desur herboj kaj folioj. Baldaŭ la kunikloj distranĉitaj kuŝis boletante en siaj kaseroloj kun la faskigitaj spicherboj. Sam preskaŭ endormiĝis dum la tempopaso. Li lasis ilin stufiĝi dum preskaŭ unu horo, provante ilin de tempo al tempo per sia forko, kaj gustumante la buljonon.

Kiam li opiniis ĉion preta, li forigis la kaserolojn de la fajro kaj

rampis ĝis Frodo. Frodo duonmalfermis siajn okulojn, kiam Sam superrombris lin, kaj tiam li vekigis el sia sonĝado: alia nekaptebla sonĝo paca.

— Saluton, Sam, — li diris. — Ĉu ne ripozas? Ĉu io misas? Kioma horo estas?

— Ĉirkaŭ du horoj post la tagiĝo, — diris Sam, — kaj preskaŭ duono post la oka laŭ la Provincaj horloĝoj, eble. Sed nenio misas. Kvankam ĉion mi ne nomus senmakula: neniuj legomoj, neniuj cepoj, neniuj terpomoj. Mi havas por vi iom da stufajo kaj iom da supo, sinjoro Frodo. Bonfaros al vi. Vi devos elsuĉi ĝin el via tasego; aŭ rekte el la kaserolo, kiam ĝi estos pli malvarmeta. Mi ne kunportis bovlojn, nek ion konvenan.

Frodo oscedis kaj streĉis sin.

— Vi devis ripozi, Sam, — li diris. — Kaj ĉendo de fajro estas danĝera ĉi tie. Sed mi ja sentas malsaton. Hmmm! Ĉu mi flaras ĝin de ĉi tie? Kion vi stufis?

— Donacon de Smeagolo, — diris Sam: — duon da kunikloj; kvankam mi opinias, ke Golumo jam domaĝas ilin. Sed nenio estas por akompani ilin krom kelkaj spicherboj.

Sam kaj lia mastro sidis interne de la filikejo kaj manĝis sian stufajon el la kaseroloj, dividante la malnovajn forkon kaj kuleron. Ili permesis al si po duonpecon da elfa vojpano. Tio ŝajnis festo.

— Fajfl! Golumo! — Sam vokis kaj fajfis mallaŭte. — Venu! Dume tempo restas por intencoŝanĝo. Restas iom, se vi volas provi stufitan kuniklon. — Ne venis respondo. — Nu bone, supozeble li foriris por trovi ion por si. Ni finmanĝos ĝin.

— Kaj poste vi devos iom dormi, — diris Frodo.

— Ne ekdormu, dum mi dormos, sinjoro Frodo. Mi ne tre certas pri li. Ankoraŭ restas en li sufiĉe da Fetorulo — la fia Golumo, se vi min komprenas — kaj ĝi refortiĝas. Tamen mi opinias, ke unue li provus strangoli min. Ni ne interkonsentas, kaj li ne estas kontenta pri Sam, ho ne trezoro, tute ne kontenta.

Ili finmanĝis, kaj Sam foriris por lavi sian manĝilaron. Stariĝante por reiri, li retrorigardis laŭ la deklivo. Tiumomente li vidis la sunon leviĝi el la fumo, aŭ nebuleto, aŭ malhela ombro, aŭ kio ajn ĝi estis, kiu kuŝis ĉiam oriente, kaj ĝi etendis siajn radiojn orajn suben sur la arbojn kaj maldensejojn ĉirkaŭ li. Tiam li rimarkis maldensan

spiralon de grizblua fumo, klare videblan kiam ĝin trafis la sunlumo, leviĝanta el densejo supre. Ŝokite li konstatis, ke tio estas la fumo de lia eta kuirfajro, kiun li neglektis estingi.

— Tio ne taŭgas! Mi neniam supozis, ke ĝi tiel montriĝos! — li murmuris kaj komencis retrorapidi. Subite li haltis kaj aŭskultis. Ĉu li aŭdis fajfon aŭ ne? Aŭ ĉu tio estis pepo de iu stranga birdo? Se ĝi estis fajfo, ĝi ne aŭdiĝis el la direkto de Frodo. Jen ĝi denove el alia loko! Sam komencis kuri laŭeble rapide supren laŭ la deklivo.

Li trovis ke malgranda branĉeto, forbrulante ĝis sia ekstera ekstremo, ĉendis iom da filikoj rande de la fajro, kaj la ekbrulantaj filikoj ardigis la herbkvadratojn. Haste li plande estingis la restaĵon de la fajro, dispuŝis la cindrojn kaj surmetis la kvadratojn al la truo. Poste li rerampis al Frodo.

— Ĉu vi aŭdis fajfon kaj ion, kio sonis kiel respondo? — li demandis. — Antaŭ kelkaj minutoj. Mi esperas, ke tio estis nur birdo, sed ĝi ne sonis tute tia, sed pli kiel imitata birdopepo, ŝajnis al mi. Kaj bedaŭrinde mia fajreto fumis. Nu, se mi allogis problemojn, mi neniam pardonos min. Kaj eble ankaŭ ne havos eblecon!

— Ĉit! — flustris Frodo. — Mi opinias, ke mi aŭdis voĉojn.

La du hobitoj rimenis siajn tornistrojn, surdorsigis ilin fuĝoprete, kaj poste rampis pli profunden en la filikejon. Tie ili kaŭris aŭskultante.

Ne dubebliis pri la voĉoj. Tiuj parolis mallaŭte kaj kaŝiĝeme, sed ili estis proksimaj kaj pliproksimiĝantaj. Tute subite unu el ili klare parolis tre apude.

— Jen! De ĉi tie venis la fumo! Ĝi estos tre apude. En la filikejo sendube. Ni havos ĝin kvazaŭ kuniklon en kaptilo. Tiam ni ekscios, kio ĝi estas.

— Jes, kaj kion ĝi scias! — diris la dua voĉo.

Tuj kvar viroj venis paŝante tra la filikoj de malsamaj direktoj. Ĉar fuĝo kaj kaŝiĝo jam ne estis eblaj, Frodo kaj Sam salte stariĝis, metante la dorson al la dorso kaj eligante siajn glavetojn.

Se ilin mirigis tio, kion ili vidis, iliaj kaptintoj estis eĉ pli mirigitaj. Kvar altaj viroj staris tie. Du havis en la manoj lancojn kun larĝaj helaj pintoj. Du havis pafarkegojn, preskaŭ same longajn kiel ili mem, kaj grandajn sagujojn da longaj verdplumaj sagoj. Ĉiuj havis ĉeflanke glavojn kaj estis vestitaj per diversaj verdoj kaj brunoj, kvazaŭ por marŝi pli nevidate en la maldensejoj de Itilio. Verdaj gantoj kovris iliajn manojn, kaj iliaj vizaĝoj estis kapuĉitaj kaj maskitaj verde, escepte de

la okuloj, kiuj estis tre akrapidaj kaj helaj. Tuj Frodo pensis pri Boromiro, ĉar tiuj viroj similis lin stature, sintene kaj laŭ la parolmaniero.

— Ni ne trovis tion, kion ni serĉis, — diris unu. — Sed kion ni ja trovis?

— Ne orkojn, — diris alia, lasante la tenilon de la glavo, kiun li kaptis kiam ili vidis ekbrili Pikilon en la mano de Frodo.

— Ĉu elfojn? — diris la tria dubeme.

— Ne! Ne elfojn, — diris la kvara, la plej alta, kaj ŝajne la ĉefa inter ili. — Elfoj ne promenas nuntempe en Itilio. Kaj elfoj estas mirinde belaj, aŭ tiel oni diras.

— Kio signifas, ke ni ne estas belaj, mi komprenas, — diris Sam. — Koran dankon. Kaj kiam vi findiskutos, eble vi diros, kiuj *vi* estas, kaj kial vi ne volas permesi al la du lacaj vojaĝantoj ripozi.

La alta verdulo ridis senĝoje.

— Mi estas Faramiro, militestro de Gondoro, — li diris. — Sed en tiu ĉi lando ne estas vojaĝantoj: nur servistoj de la Malhela Turego aŭ de la Blanka.

— Sed ni estas neniuj el ambaŭ, — diris Frodo. — Ni estas vojaĝantoj, kion ajn volas diri militestro Faramiro.

— Do rapidu deklari vin kaj vian komision, — diris Faramiro. — Nin atendas taskoj, kaj ĉi tie ne estas loko por rebusado aŭ traktado. Ek! Kie estas la tria el via kunularo?

— Ĉu la tria?

— Jes, la kaŝiĝemulo, kiun ni vidis kun nazo en la laĝeto tie sube. Li aspektis malfavore. Spiona speco de orko, mi konjektas, aŭ ties servanto. Sed li evitis nin per iu vulpa truko.

— Mi ne scias, kie li estas, — diris Frodo. — Li estas nur hazarda kunulo renkontita survoje, kaj mi ne respondecas pri li. Se vi trovos lin, indulgu lin. Konduku lin aŭ sendu lin al ni. Li estas nur vagulaĉo, sed li troviĝas sub mia prizorgo dum iom da tempo. Sed koncerne nin, ni estas hobitoj el la Provinco, fore nord-okcidente, post multaj rive-roj. Frodo, filo de Drogo, estas mia nomo, kaj kun mi estas Samsaĝo, filo de Hamfasto, honorinda hobito, kiu servas min. Ni venis tra longaj vojoj: el Rivendelo, aŭ Imladriso, kiel iuj nomas ĝin. — Tiam Faramiro ektikis kaj pliatentis. — Sep kunulojn ni havis. Unun ni perdis en Morio, la aliajn ni postlasis en Part Galeno super Raŭroso: du el miaj parencoj, ankaŭ estis tie gnomo, elfo kaj du homoj. Tiuj estis Aragorno kaj Boromiro, kiu diris ke li devenas de Minaso Tirit, urbo en la sudo.

— Boromiro! — ĉiuj kvar viroj ekkriis.

— Ĉu Boromiro, filo de Mastro Denetoro? — demandis Faramiro, kaj stranga severa esprimo aperis sur lia vizaĝo. — Vi akompanis lin? Tio estas grava novaĵo, se ĝi estas vera. Sciuj fremduletoj, ke Boromiro, filo de Denetoro, estis la Supera Gardisto de l' Blanka Turego, kaj nia ĉefkomandanto: li dolorige mankas al ni. Kiuj vi estas do, kaj kiel vi rilatis al li? Rapidu, ĉar la suno supreniras!

— Ĉu al vi estas konataj la enigmaj vortoj, kiujn Boromiro kunportis al Rivendelo? — Frodo respondis.

Serĉu la Glavon Rompitan:

ĝi loĝas en Imladriso...

— Tiuj vortoj estas konataj efektive, — diris Faramiro konsternite. — Estas ioma atestaĵo pri via vereco, ke ankaŭ vi konas ilin.

— Aragorno, kiun ni nomis, estas la portanto de la Glavo Rompita, — diris Frodo. — Kaj ni estas la duonuloj, pri kiuj menciis la rimaĵo.

— Mi vidas tion, — diris Faramiro penseme. — Aŭ mi vidas, ke tiel povas esti. Kaj kio estas la Plago de Isilduro?

— Tio estas kaŝita, — respondis Frodo. — Sendube ĝi estos klarigita siatempe.

— Ni devas ekscii pli multe pri tio, — diris Faramiro, — kaj ekscii, kio kondukas tiom orienten sub la ombro de jena... — li fingromontris kaj diris neniun nomon. — Sed ne nun. Ni havas taskon. Vi estas en danĝero, kaj hodiaŭ vi ne irus longe laŭ kampoj aŭ vojoj. Estos proksimaj fortaj manbatoj antaŭ ol la tago plenmaturiĝos. Poste morto aŭ rapida fuĝo reen al Anduino. Mi lasos du por gardi vin, por via kaj mia bonfarto. Saĝulo ne fidus je hazarda renkonto survoje en tiu ĉi lando. Se mi revenos, mi plu interparolos kun vi.

— Adiaŭ! — diris Frodo, malalte riverencante. — Pensu, kion vi volas, sed mi estas amiko de ĉiuj malamikoj de Unu Malamiko. Ni povus akompani vin, se ni duonuloj povus esperi servi vin, virojn tiel bravajn kaj fortajn, kiaj vi ŝajnas, kaj se mia komisiono permesus tion. La lumo prilumu viajn glavojn!

— La duonuloj estas ĝentilaj personoj, kio ajn alia ili estas, — diris Faramiro. — Adiaŭ!

La hobitoj sidiĝis denove, sed ili nenion diris unu al la alia pri siaj pensoj kaj duboj. Proksime, ĝuste sub la makuliga ombro de l'

malhelaj laŭroj, du viroj restis garde. Ili demetis siajn maskojn de tempo al tempo por freŝigi sin, dum pliintensiĝis la taga varmo, kaj Frodo vidis, ke ili estas viroj bonaspektaj, palhaŭtaj, malhelharaj, kun grizaj okuloj kaj vizaĝoj tristaj kaj fieraj. Ili interparolis per malaŭtaj voĉoj, uzante unue la Komunan Lingvon, sed laŭ la pasinteca maniero, kaj poste ŝanĝante al la propra lingvo. Mirigite Frodo aŭskultante rimarkis, ke ili parolas la elfan lingvon, aŭ lingvon malmulte diferenca; kaj li rigardis ilin kun miro, ĉar li komprenis, ke ili certe estas dunadanoj el la sudo, homoj de la nasklinio de la Mastroj de Okcidentio.

Post iom da tempo li alparolis ilin; sed ili respondis malvolonte kaj singlarde. Ili nomis sin Mablungo kaj Damrodo, soldatoj de Gondoro, kaj ili estis disiruloj el Itilio, ĉar ili estis posteuloj de popolo iam vivinta en Itilio, antaŭ ol tiu estis konkerita. El tiaj viroj Mastro Denetoro elektis siajn atakpatrolojn por sekrete transiri Anduinon (kiel kaj kie ili rifuzis diri) kaj incitadi la orkojn kaj aliajn malamikojn, kiuj divagis inter Efelo Duad kaj la Rivero.

— Estas preskaŭ dek leŭgoj de ĉi tie ĝis la orienta bordo de Anduino, — diris Mablungo, — kaj malofte ni venas tiom malproksimen. Sed ĉi-vojaĝe ni havas novan komision: ni venas por embuski la virojn el Harado. Ili malbenatu!

— Jes, malbenatu la sudanoj! — diris Damrodo. — Laŭdire estis traktoj pratempe inter Gondoro kaj la reĝlandoj de l' haradanoj en la Fora Sudo, kvankam amikeco neniam estis. En tiu tempo niaj limoj troviĝis fore sude post la elfluejoj de Anduino, kaj Umbaro, la plej proksima el iliaj regnoj, rekonis nian superecon. Sed tio estis antaŭlongege. Dum multaj vivlongoj neniu iris tien-reen inter ni. Nur lastatempe ni informiĝis, ke la Malamiko estis inter ili, kaj ili transiris aŭ reiris al Li — ili ĉiam pretis al Lia volo — kion faris ankaŭ multaj en la oriento. Mi ne dubas, ke la tagoj de Gondoro estas nombritaj, kaj la muroj de Minaso Tirit estas kondamnitaj, tiom grandaj estas Liaj fortoj kaj malico.

— Tamen ni ne volas sidi senfare kaj permesi, ke Li faru ĉion laŭ Sia volo, — diris Mablungo. — Tiaj malbenindaj sudanoj nun almarŝas laŭ la pravojoj por plifortigi la armeojn de la Malhela Turego. Jes, ĝuste laŭ la vojoj, kiujn konstruis la metilerto de Gondoro. Kaj ili iras ĉiam pli malzorge, ni informiĝas, supozante la potencon de sia nova mastro sufiĉe forta, ke la nura ombro de Liaj montetoj protektos ilin. Ni venas por instrui al ili alian lecionon. Granda amaso el ili

marŝanta norden estis raportita al ni antaŭ kelkaj tagoj. Unu el iliaj regimentoj laŭ nia kalkulo atendeble preterpasos iam antaŭ la tagmezo: sur la supra vojo, kie ĝi trapasas la fenditan vojon. La vojo eble pasas, sed ne pasos ili! Ne dum Faramiro estras. Li nun gvidas nin dum ĉiuj danĝeraj aventuroj. Sed lia vivo estas protektata, aŭ la sorto ŝirmas lin por iu alia celo.

Ilia parolado velkis al aŭskulta silento. Ĉio ŝajnis senmova kaj atenta. Sam, kaŭranta rande de la filikejo, elgatis. Per siaj akraj hobiaj okuloj li vidis, ke multaj pliaj viroj ĉeestas. Li povis vidi ilin ŝtelirantaj laŭ la deklivoj, unuope aŭ en longaj spaliroj, ĉiam sekvante la ombron de bosko aŭ densejo, aŭ rampantaj, apenaŭ videblaj en sia bruna kaj verda vesto, tra herbo kaj filikejoj. Ĉiuj estis kapuĉitaj kaj maskitaj, kun gantoj sur la manoj, kaj estis armitaj simile al Faramiro kaj ties kunuloj. Post nelonge ili ĉiuj jam pasis kaj malaperis. La suno supreniris ĝis ĝi proksimiĝis al la sudo. La ombroj kuntiriĝis.

“Mi scivolas, kie estas tiu damninda Golumo? — pensis Sam, rampante reen en la pli densan ombron. — Sufiĉe eblas, ke oni trapikos lin kiel orkon aŭ lin rostos la Flava Vizaĝo. Sed mi opinias, ke li zorgos pri si”. Li kuŝiĝis apud Frodo kaj komencis dormeti.

Li vekigis pensante, ke li aŭdis trumpetan klarionon. Li sidiĝis. Estis jam plena tagmezo. La gardantoj staris atentaj kaj streĉitaj en ombro de la arboj. Subite la trumpetoj sonoris pli laŭte kaj nemiskompreneble supre, trans la supraĵon de l' deklivo. Al Sam ŝajnis, ke li aŭdas ankaŭ kriojn kaj sovaĝan bruadon, sed tiu sono estis mallaŭta, kvazaŭ ĝi venus el iu fora kaverno. Baldaŭ poste la bruo de luktado erupciis pli proksime, ĝuste super ilia kaŝejo. Li povis aŭdi klare la sonoran gratiĝon de ŝtalo sur ŝtalo, tintegon de glavo kontraŭ fera ĉapo, obtuzan baton de klingo kontraŭ ŝildo; homoj kriadis kaj kriĉadis, kaj unu klara voĉo vokis: “Gondoro! Gondoro!”

— Tio sonas kiel cent forĝistoj forĝantaj samtempe, — diris Sam al Frodo. — Nun ili tiom proksimas, kiom mi deziras.

Sed la bruego pliproksimiĝis.

— Ili venas! — kriis Damrodo. — Vidu! Iuj sudanoj elrompiĝis el la kaptilo kaj fuĝas de la vojo. Jen ili iras! Niaj viroj persekutas ilin, kaj Faramiro antaŭas.

Sam, deziregante vidi ankoraŭ pli, iris aliĝe al la gardantoj. Li grimpis iom sur unu el la plej grandaj laŭroj. Momente li ekvidis

brunhaŭtajn virojn ruĝvestitajn subenkurantajn laŭ la deklivo iom fore, dum verdvestitaj batalantoj saltis post ilin, hakante ilin falige dum ili fuĝis. Sagoj densis en la aero. Tiam subite rekte trans la randon de ilia ŝirma rokmuro falis viro, suben krakegante tra la sveltaj arboj, preskaŭ sur ilin. Li estis haltigita en la filikejo for kelkajn futojn, vizaĝmalsupre, kun verdaj sagoplumoj fiksitaj sur lia kolo sub ora kolumo. Liaj skarlataj vestoj estis ĉifonaj, lia brustarmaĵo el imbrikitaj bronzaĵoj estis fendita kaj hakita, liaj nigraj harplektoj ore pasamentitaj estis sangotrempitaj. Lia bruna mano plu kroĉis tenilon de rompita glavo.

La unuan fojon Sam vidis batalon inter homoj, kaj ĝi ne tre plaĉis al li. Li estis kontenta, ke li ne povis vidi la vizaĝon de l' mortinto. Li scivolis, kiel nomiĝis tiu viro, kaj de kie li venis; kaj ĉu li fakte malicis kore, aŭ mensogoj kaj minacoj gvidis lin dum la longa marŝado de lia hejmo, kaj se li vere ne preferus resti hejme en paco — tiu pensekflagro rapide estis forpelita el lia menso. Ĉar ĝuste kiam Mablungo antaŭenpaŝis al la falinta korpo, aŭdiĝis nova bruo. Grandaj kriado kaj voĉado. Inter ĝi Sam aŭdis akran blekadon aŭ trumpetadon. Kaj poste egan skuadon aŭ batadon, kvazaŭ grandaj virŝafoj piedfrapas la teron.

— Gardu! Gardu! — kriis Damrodo al sia kunulo. — La Valaroj flanketurnu ĝin! Mumako! Mumako!

Mirigite kaj terurite, daŭre ĝojigote, Sam vidis enorman figuron trafrakasi el la arboj kaj veni kuregante laŭ la deklivo. Granda kiel domo, multe pli granda ol domo ĝi aspektis al li, grizvestita moviĝanta monteto. Timo kaj miro, eble, pligrandigis ĝin en la vido de l' hobito, sed la mumako el Harado efektive estis granda besto, kaj ties similaĵoj ne plu iras en Mez-Tero: ĝiaj parencoj, kiuj ankoraŭ vivas nun, estas nur memoraĵoj pri ĝiaj mezuro kaj majesteco. Ĝi daŭre venis rekte al la rigardantoj kaj nur lastmomente turniĝis flanken, pasante je distanco de nur kelkaj paŝoj, skuante la teron sub la piedoj: arbosimilaj kruregoj, enormaj velsimilaj oreloj disetenditaj, longa rostro suprenturnita kvazaŭ serpentego ekpikonta, ruĝaj okuletoj koleraj. Ĝiaj suprenturnitaj kornsimilaj dentegoj estis orstrie ornamitaj kaj gutis sangon. Ĝiaj garnaĵoj skarlataj kaj oraj ondadis ĉirkaŭ ĝi sovaĝe ĉifonaj. La ruinaĵo de io, kio ŝajnis vera militoturo, kuŝis sur ĝia ondanta dorso, frakasita dum la furioza trapaso de l' arbaro; kaj alte sur ĝia kolo plu senespere kroĉiĝis figureto de potenca batalanto, giganto inter la svertingoj.

Plu tondrokuris la bestego, albatigante blinde kolera tra lagetoj kaj densejoj. Sagoj saltis kaj krakis sendamaĝe sur la triobla haŭto de ĝiaj flankoj. Ambaŭpartiaj viroj fuĝis antaŭ ĝi, sed ĝi atingis multajn kaj premegis teren. Baldaŭ ĝi ne plu videblis, ankoraŭ fore trumpetante kaj piedbatante. Kio fariĝis al ĝi, tion Sam aŭdis neniam: ĉu ĝi eskapis por vagi kelkan tempon en la sovaĝejo ĝis pereo malproksime de la hejmo, aŭ ĝi estis kaptita en iu profunda ŝakto; ĉu ĝi plu kuregis ĝis ĝi plonĝis en la Grandan Riveron kaj estis englutita.

Sam spiris profunde.

— Olifonto! — li diris. — Do ekzistas olifontoj, kaj mi vidis olifonton. Kia vivo! Sed neniu hejme kredos min. Nu, se tio finiĝis, mi iom ekdormos.

— Dormu, dum vi povas, — diris Mablungo. — Sed la estro revenos, se li estas nevundita, kaj kiam li venos, ni foriros rapide. Oni persekutos nin tuj, kiam la novaĵoj pri nia faro atingos la Malamikon, kaj tio okazos baldaŭ.

— Iru kviete, kiam vi devos! — diris Sam. — Ne necesas perturbi mian dormon. Mi marŝis la tutan nokton.

— Al mi ŝajnas, ke la estro ne lasos vin ĉi tie, mastro Samsaĝo, — ridis Mablungo. — Sed vi vidos.

Ĉapitro 5

LA FENESTRO AL LA OKCIDENTO

Ŝajnis al Sam, ke li dormetis nur kelkajn minutojn, kiam li vekigis kaj konstatis, ke estas malfrue posttagmeze kaj Faramiro revenis. Lin akompanis multaj viroj; efektive ĉiuj travivintoj de la atako estis nun kuniĝintaj sur apuda deklivo, sume du aŭ tri centoj. Ili sidis en larĝa duoncirklo, inter kies brakoj Faramiro sidis sur la tero, dum Frodo staris antaŭ li. Tio aspektis strange simila al prijuĝo de kaptito.

Sam elŝteliĝis el la filikoj, sed neniu atentis lin, kaj li lokis sin ĉe ekstremo de la homvicoj, kie li povis vidi kaj aŭdi ĉion okazantan. Li rigardis kaj aŭskultis atente, preta kuri helpe al la mastro laŭbezone. Li povis vidi la vizaĝon de Faramiro, kiu nun estis senmaska: ĝi estis severa kaj komandeca, kaj akra sagaco postkuŝis lian penetran rigardon. Dubo estis en la grizaj okuloj, kiuj senŝancele rigardis Frodon.

Sam baldaŭ konstatis, ke la militestro ne estas kontenta pri la rakonto de Frodo pri si plurpunkte: kia estis lia rolo en la Kunularo ekirinta el Rivendelo; kial li disiĝis de Boromiro; kaj kien li aktuale iras. Precipe ofte li revenis al la Plago de Isilduro. Klare li komprenis, ke Frodo kaŝas de li ion tre gravan.

— Sed ĝuste pro alveno de duonulo devus vekigi la Plago de Isilduro, aŭ tiel oni devas interpreti la vortojn, — li insistis. — Se do vi estas la nomita duonulo, sendube vi alportis tiun aĵon, kio ajn ĝi estas, al la Konsilio, pri kiu vi parolas, kaj tie Boromiro vidis ĝin. Ĉu tion vi neas?

Frodo nenion respondis.

— Do! — daŭrigis Faramiro. — Mi do volas ekscii de vi pli pri tio, ĉar kio koncernas Boromiron, min koncernas. Orka sago mortigis Isilduron, laŭ la malnovaj rakontoj. Sed orkaj sagoj multnombros, kaj Boromiro de Gondoro ne taksus ekvidon de tia sago signo de misfortuno. Ĉu tiun aĵon vi gardis? Ĝi estas kaŝita, vi diras, sed ĉu ne tiel ĉar vi elektas kaŝi ĝin?

— Ne, ne ĉar mi elektas, — respondis Frodo. — Ĝi ne estas mia posedaĵo. Ĝi ne estas posedaĵo de iu ajn mortulo, ĉu grava, ĉu

malgrava; kvankam se iu ajn rajtus pretendi ĝin, tiu estus Aragorno, filo de Aratorno, kiun mi nomis, la estro de nia Kunularo de Morio ĝis Raŭroso.

— Kial li, sed ne Boromiro, princo de tiu urbo, kiun fondis la filoj de Elendilo?

— Ĉar Aragorno estas posteulo laŭ rekta linio, de patro al patro, de Elendilo, filo de Isilduro mem. Kaj tiu glavo, kiun li portas, estas la glavo de Elendilo.

Mira murmuro trakuris la tutan ringon de homoj. Iuj kriis voĉe:

— La glavo de Elendilo! La glavo de Elendilo venas al Minaso Tirit! Grava novaĵo!

Sed la vizaĝo de Faramiro ne ŝanĝis la esprimon.

— Povas esti, — li diris. — Sed tiel granda pretendo devas esti pruvita, kaj postulataj estos klaraj pruvoj, se tiu Aragorno iam venos al Minaso Tirit. Li ne estis alveninta, nek iu ajn el via Kunularo, kiam mi ekvojaĝis antaŭ ses tagoj.

— Boromiro estis kontenta pri tiu pretendo, — diris Frodo. — Efektive, se Boromiro ĉeestus, li respondus ĉiujn viajn demandojn. Kaj tial ke li estis ĉe Raŭroso antaŭ multaj tagoj kaj tiam intencis iri rekte al via urbo, se vi reiros, vi eble baldaŭ ricevos tie la respondojn. Mia rolo en la Kunularo estis konata al li, samkiel al ĉiuj aliaj, ĉar ĝi estis difinita al mi de Elrondo el Imladriso mem antaŭ la tuta Konsilio. Pro tiu komisio mi venis al tiu ĉi lando, sed mi ne rajtas malkaŝi ĝin al iu ajn ekster la Kunularo. Tamen tiuj, kiuj pretendas kontraŭstari la Malamikon, agus plej bone ne malhelpante ĝin.

La tono de Frodo estis fiera, kion ajn li sentis, kaj Sam aprobis ĝin; sed ĝi ne mildigis Faramiron.

— Do! — li diris. — Vi diras, ke mi pritraktu proprajn aferojn, kaj reiru al mia hejmo kaj lasu vin trankvila. Boromiro rakontos ĉion, kiam li venos. Kiam li venos, vi diras! Ĉu vi estis amiko de Boromiro?

Antaŭ Frodo klare aperis memoro pri la atako de Boromiro kontraŭ li, kaj momente li hezitis. La okuloj de Faramiro rigardantaj lin malmoliĝis.

— Boromiro estis kuraĝa ano de nia Kunularo, — diris Frodo fine. — Jes, mi estis lia amiko, miaflanke.

Faramiro amare ridetis:

— Sekve vi funebris, eksciinte, ke Boromiro mortis?

— Mi certe funebris, — diris Frodo. Poste, rimarkinte la esprimon de la okuloj de Faramiro, li stumblis. — Ĉu mortis? Ĉu vi diras,

ke li fakte mortis, kaj ke vi sciis tion? Ĉu vi provis trompi min per vortoj, ludante pri mi? Aŭ ĉu vi nun provas trompi min per mensogo?

— Mi ne volus trompi eĉ orkon per mensogo, — diris Faramiro.

— Kiel do li mortis, kaj kiel vi scias pri tio? Ja vi diris, ke neniu el la Kunularo atingis la urbon antaŭ ol vi lasis ĝin.

— Rilate la manieron de lia morto, mi esperis, ke lia amiko-kunulo sciigos al mi, kiel tio okazis.

— Sed li estis viva kaj forta, kiam ni disiĝis. Kaj li daŭre vivas laŭ tio, kion mi scias. Kvankam vere estas en la mondo multaj danĝeroj.

— Ja multaj, — diris Faramiro, — kaj perfido ne la malpleja.

Sam fariĝis ĉiam pli senpacienca kaj kolera pro tiu konversacio. Tiuj lastaj vortoj estis pli ol li kapablis toleri, kaj trarompiginte en la cirklon li alpaŝis la flankon de sia mastro.

— Pardonpete, sinjoro Frodo, sed tio ĉi jam sufiĉe longe daŭris. Li ne rajtas alparoli vin tiel. Post ĉio, kion vi travivis, tiom por la profito de tiu kaj ĉiuj jenaj grandaj viroj, kiom por iu ajn alia. Do vidu, militestro! — Li starigis sin solide antaŭ Faramiro, kun la manoj surkokse, kaj mieno kvazaŭ alparolante junan hobiton, kiu respondis impertinente, demandite pri vizitoj al la fruktoĝardeno. Aŭdiĝis iom da murmurado, sed ankaŭ rikanis kelkaj el la spektantoj: vidi ilian estron sidanta sur la tero inter kvar okuloj kun juna hobito diskurra kaj kole-re kupa, estis unika sperto. — Vidu do! Al kio vi celas? Ni atingu la celon antaŭ ol ĉiuj orkoj de Mordoro atakos nin! Se vi pensas, ke mia mastro murdis tiun Boromiron kaj poste forkuris, mankas al vi sagaco; sed diru tion, kaj finu la aferon! Kaj poste sciigu al ni, kion vi intencas fari pri tio. Sed estas domaĝe, ke personoj kiuj preparolas bataladon kontraŭ la Malamiko ne pretas lasi, ke aliaj kontribuu sian moneron senmalhelpo. Li estus ege kontenta, se Li povus vidi vin nun. Li supozus, ke Li akiris novan amikon.

— Paciencon! — diris Faramiro senkolere. — Ne parolu anstataŭ via mastro, kies saĝo pli grandas ol la via. Kaj mi bezonas neniun por instrui al mi pri nia danĝero. Malgraŭ tio, mi utiligas mallongan tempon por juĝi juste en afero malfacila. Se mi estus tiel hastema kiel vi, mi eble mortigus vin antaŭlonge, ĉar al mi estas ordonite mortigi ĉiujn, kiujn mi trovas en tiu ĉi lando sen permeso de la Mastro de Gondoro. Sed mi mortigas nek homon nek beston nenecese, kaj ne ĝoje eĉ kiam tio necesas. Mi ankaŭ ne parolas vane. Do estu konsolita. Sidu apud via mastro kaj silentu!

Sam peze sidiĝis ruĝvizaĝe. Faramiro ree turnis sin al Frodo.

— Vi demandis, kiel mi scias, ke la filo de Denetoro estas mortinta. Mortosciigoj havas multajn flugilojn. *Nokto ofte portas novaĝojn al proksimaj parencoj*, oni diras. Boromiro estis mia frato. — Ombro de tristo trapasis lian vizaĝon. — Ĉu vi memoras ion pri speciala marko, kiun princo Boromiro kunportis inter siaj havaĵoj?

Frodo pensis momente, timante plian trukon, kaj scivolante kiel finiĝos tiu ĉi debato. Apenaŭ li savis la Ringon el la fiera kroĉo de Boromiro, kaj li ne sciis, kiel li nun fartos inter tiom da militpretaj kaj fortaj viroj. Tamen li sentis en sia koro, ke Faramiro, kvankam aspekte li multe similis sian fraton, estis viro malpli sinrigarda, tiel pli severa kiel pli saĝa.

— Mi memoras, ke Boromiro portis kornon, — li diris finfine.

— Vi memoras bone, kaj kiel iu kiu vere vidis lin, — diris Faramiro. — Do eble vi povas vidi ĝin mense: granda korno de granda uro de l' oriento, damaskenita je arĝento kaj surskribita per antikvaj literoj. Tiun kornon portis dum multaj generacioj la plejaĝa filo de nia domo; kaj oni diras, ke se ĝi estos blovata en okazo de neceso ie ajn inter la pratempaj limoj de Gondoro, ĝia voĉo ne estos ignorata.

» Kvin tagojn antaŭ ol mi ekiris ĉi-aventure, mi aŭdis blovadon de tiu korno: el la nordo, ŝajne, sed mallaŭte, kvazaŭ ĝi estus nur eĥo en la menso. Antaŭsciigo pri misfarto mi supozis ĝin, mia patro kaj mi, ĉar neniun sciigon ni aŭdis pri Boromiro post lia foriro, kaj neniun gardanto de niaj limoj vidis lin pasi. Kaj je la tria posta nokto alia kaj pli stranga afero okazis al mi.

» Mi sidis nokte apud Anduino en la griza mallumo sub la juna pala luno, rigardante la ĉiam-moviĝantan fluon; kaj la malgajaj kanoj susuris. Tiel ni ĉiam vaĉas la bordojn proksime al Osgiliado, kiun niaj malamikoj nun parte okupas kaj eliras el ĝi por ataki niajn terenojn. Sed tiunokte dormis la tuta mondo je la noktmeza horo. Tiam mi vidis, aŭ ŝajnis ke mi vidas, boaton flosantan sur la akvo, trembrile grizan, malgrandan boaton fremdforman kun alta pruo, kaj neniun enestis por remi aŭ stiri ĝin.

» Imponiĝo inundis min, ĉar ĉirkaŭis ĝin pala lumo. Sed mi leviĝis kaj iris al la riverbordo, kaj komencis elpaŝi en la fluon, ĉar mi estis logita al ĝi. Tiam la boato turniĝis al mi kaj ĉesigis sian iradon, kaj preterfloris malrapide en atingo de mia mano, tamen mi ne aŭdacis tuŝi ĝin. Ĝi iris profunde, kvazaŭ ĝi estus peze ŝarĝita, kaj ŝajnis al mi, kiam ĝi pasis sub mia rigardo, ke ĝi estis preskaŭ

plenigita de klara akvo, de kiu venis la lumo, kaj en la akvo kuŝis dormanta batalinto.

» Kompita glavo estis sur lia genuo. Mi vidis sur li multajn vundojn. Tiu estis Boromiro, mia frato, mortinta. Mi rekonis lian armaĵon, lian glavon, lian amatan vizaĝon. Nur unu aĵo mankis: lia korno. Nur unu aĵon mi ne konis: belan zonon, kvazaŭ el interplektitaj oraj folioj ĉirkaŭ lia talio. *Boromiro!* — mi kriis. — *Kie estas via korno? Kien vi iras? Ho Boromiro!* Sed li estis jam for. La boato turniĝis en la fluon kaj pasis trembrile en la nokton. Songeca tio estis, kaj tamen ne songo, ĉar ne okazis vekiĝo. Kaj mi ne dubas, ke li estas mortinta kaj forpasis laŭ la Rivero al la Maro.

— Ve! — diris Frodo. — Tiu ja estis Boromiro, kia mi konis lin. Ĉar la oran zonon al li donis en Lotlorieno la Damo Galadriela. Estis ĝuste ŝi, kiu vestis nin tiel, kiel vi vidas nin, en elfa grizo. Tiu ĉi broĉo estas de la sama metilerto. — Li tuŝis la verdan-arĝentan folion, kiu bukis lian mantelon sub lia gorĝo.

Faramiro rigardis ĝin atente.

— Ĝi estas bela, — li diris. — Jes, ĝi estas verko sammetia. Sekve vi trapasis la landon Lorieno? Laŭrelindorinano ĝi nomiĝis pratempe, sed jam delonge ĝi kuŝas ekster la kono de la homoj, — li aldonis mal-laŭte, taksante Frodon kun nova miro en la okuloj. — Multon, kio estis stranga pri vi, mi jam komencis kompreni. Ĉu vi ne rakontu al mi pli? Ĉar amare estas pensi, ke mortis Boromiro en vidodistanco de sia hejmlando.

— Mi ne povas diri pli ol mi jam diris, — respondis Frodo. — Tamen via historio plenigas min je misaŭguroj. Vizio estis tio, kion vi vidis, mi opinias, kaj nenio plia, iu ombro de misfortuno okazinta aŭ okazonta. Krom se ĝi estas vere iu mensoga truko de la Malamiko. Mi vidis vizaĝojn de belaj pratempaj batalintoj en dormo sub la laĝetoj de la Mortaj Marĉoj, aŭ ŝajne tiaj pro liaj fiaj artoj.

— Ne, ne estis tiel, — diris Faramiro. — Ĉar liaj faroj plenigas la koron je abomeno, sed mian koron plenigis funebro kaj kompatato.

— Tamen kiel povus okazi en vero tio? — demandis Frodo. — Ĉar neniun boato estus portebla trans la ŝtonajn montojn el Tol Brandiro; kaj Boromiro intencis hejmeniri trans Entvaŝo kaj la kampoj de Rohano. Kaj tamen kiel povus ajna boato surraĵdi la ŝaŭmon de la akvofalegoj kaj ne vrakiĝi en la bolantaj laĝetoj, kvankam ŝarĝita de akvo?

— Mi ne scias, — diris Faramiro. — Sed de kie venis la boato?

— De Lorieno, — diris Frodo. — En tri tiaj boatoj ni remis laŭ Anduino ĝis la akvfaloj. Ankaŭ ili estis elfa laboraĵo.

— Vi trapasis la Kaŝitan Landon, — diris Faramiro, — sed ŝajnas, ke vi malmulte komprenis ties potencon. Se homoj intertraktas kun la Mastrino de Magio kiu loĝas en la Ora Arbaro, tiam ili atendu strangajn aferojn. Ĉar estas danĝere por mortema homo formarŝi el la mondo de tiu ĉi suno, kaj malmultaj pratempe venis el tie neŝanĝite, oni diras.

— *Boromiro, ho Boromiro!* — li kriis. — *Kion ŝi diris al vi, la Damo kiu ne mortas? Kion ŝi vidis? Kio vekigis en via koro tiam? Kial vi entute iris al Laŭrelindorinano, kaj ne venis laŭ propra vojo, sur la ĉevaloj de Rohano rajdante hejmen en la mateno?*

Poste sin returninte al Frodo, li parolis denove per la kvieta voĉo:

— Mi konjektas, ke vi povus iel respondi al tiuj demandoj, Frodo, filo de Drogo. Sed ne ĉi tie kaj ne nun, eble. Sed por ke vi ne plu taksu vizio mian rakonton, mi sciigu al vi tion ĉi. Almenaŭ la korno de Boromiro revenis reale, kaj ne nur ŝajne. La korno venis, sed ĝi estis fendita en du partoj, kvazaŭ per hakilo aŭ glavo. La partoj unuope albordigis: unu estis trovita inter la kanoj, kie kuŝis gardistoj el Gondoro, norde sub la enfluo de Entvaŝo; la alian trovis girantan sur la fluo iu, kiu havis komision surakvan. Strangaj hazardoj, sed murdo sin anoncas, kiel oni diras. Kaj nun la korno de l' pliaĝa filo kuŝas duere sur la sino de Denetoro, kiu sidas sur sia alta seĝo, atendante informojn. Kaj vi povas nenion sciigi al mi pri la fendo de la korno, ĉu?

— Ne, mi ne scias pri tio, — diris Frodo. — Sed tiu tago, kiam vi aŭdis ĝian blovadon, se via kalkulo pravas, estis la tago, en kiu ni disiĝis, kiam mi kaj mia servisto forlasis la Kunularon. Kaj nun via rakonto plenigas min je antaŭtimo. Ĉar se Boromiro estis tiam en danĝero kaj estis mortigita, mi nepre devas timi, ke pereis ankaŭ miaj kunuloj. Kaj tiuj estis miaj parencoj kaj miaj amikoj. Ĉu vi ne volas flankenmeti vian dubon pri mi kaj permesi, ke mi foriru? Mi estas laca, dolorplena kaj timanta. Sed mi havas taskon farendan aŭ provendan, antaŭ ol ankaŭ mi estos mortigita. Kaj tiom pli necesas hasto, se ni, du duonuloj, estas la sola restaĵo de nia Kunularo. Reiru, Faramiro, brava militestro de Gondoro, kaj defendu vian urbon, dum vi povas, kaj lasu min iri tien, kien min kondukas mia sorto.

— Por mi estas neniom da konsolo en nia interparolo, — diris Faramiro, — sed vi verŝajne ĉerpas el ĝi pli da timo ol necese. Krom se la popolanoj de Lorieno venis al li, kiu vestis Boromiron konvene al

funebraĵo? Ne orkoj aŭ servistoj de la Sennoma. Iuj el via Kunularo, mi konjektas, plu vivas. Sed kio ajn okazis ĉe la Norda Limo, mi ne plu pridubas vin, Frodo. Se malfacilaj spertoj ebligas al mi prijuĝi la vortojn kaj vizaĝojn de la homoj, mi do rajtas konjekti pri duonuloj! Kvankam, — li ridetis, — estas io stranga pri vi, Frodo, ia elfeca sinteno eble. Sed dependas pli de niaj interparoloj, ol mi unue supozis. Mi devus nun rekonduki vin al Minaso Tirit por tie pravigi vin ĉe Denetoro, kaj mia vivo juste estos en risko, se mi nun elektos agmanieron, kiu montriĝos misa por mia urbo. Do mi ne decidus rapide, kion fari. Tamen ni devos ekiri de ĉi tie sen plia prokrasto.

Li salte stariĝis kaj donis kelkajn ordonojn. Tuj la viroj ĉirkaŭantaj diseriĝis en malgrandajn grupojn kaj foriris laŭ tiu aŭ alia vojo, malaperante rapide en la ombrojn de la rokoj kaj arboj. Baldaŭ nur Mablungo kaj Damrodo restis.

— Nun vi, Frodo kaj Samsaĝo, akompanos min kaj miajn gardistojn, — diris Faramiro. — Vi ne povas iri laŭ la vojo suden, se tion vi intencis. Ĝi estos malsekura dum pluraj tagoj, kaj ĉiam pli atente vaĉata post tiu interbatiĝo ol ĝi estis ĝis nun. Kaj vi ne povos, ŝajnas al mi, iri hodiaŭ grandan distancon ĉiuokaze, ĉar vi estas lacegaj. Ankaŭ ni estas lacaj. Ni iros nun al sekreta loko, kiun ni posedas, iom malpli ol dek mejlojn de ĉi tie. La orkoj kaj spionoj de la Malamiko ankoraŭ ne trovis ĝin, kaj se ili trovus, ni povos defendi ĝin longe eĉ kontraŭ multaj. Tie ni povos kaŝiĝi kaj ripozi iom da tempo, kaj vi kune kun ni. Matene mi decidus, kion mi plej bone faru, kaj ankaŭ vi.

Neion povis fari Frodo krom konsenti kun tiu propono aŭ ordono. Tio ŝajnis ĉiuokaze saĝa faro provizora, ĉar la atako de la viroj el Gondoro igis la vojaĝon en Itilio pli danĝera ol antaŭe.

Tuj ili ekiris: Mablungo kaj Damrodo iom antaŭe, kaj Faramiro, Frodo kaj Sam poste. Flankpasante la proksiman bordon de la lageto, en kiu lavis sin la hobitoj, ili transiris la fluon, grimpis longan deklivon kaj eniris verdombrajn arbarojn, kiuj etendiĝis ĉiam suben kaj okcidenten. Dum ili marŝis, tiel rapide kiel kapablas la hobitoj, ili interparolis per sordinitaj voĉoj.

— Mi interrompis nian kunparolon, — diris Faramiro. — Ne nur ĉar la tempo urĝas, kiel mastro Samsaĝo memorigis al mi, sed ankaŭ ĉar ni proksimiĝis al aferoj, prefere ne diskutotaj aperte antaŭ multaj homoj. Pro tiu kialo mi turnis min prefere al la afero de mia frato kaj ignoris la *Plagon de Isilduro*. Vi ne traktis min tute malkaŝe, Frodo.

— Mi ne mensogis, kaj rakontis tiom da vero kiom mi povis.

— Mi ne kulpigas vin, — diris Faramiro. — Vi parolis lerte en malfacila situacio, kaj ŝajnas al mi, ke saĝe. Sed mi eksciis aŭ konjektis pri vi pli ol diris viaj vortoj. Vi ne estis amikeca al Boromiro, aŭ vi ne disiĝis amike. Vi kaj mastro Samsaĝo supozeble havas ian plendmotivon. Nu, mi amis lin kore, kaj volonte venĝus lian morton, tamen mi bone konis lin. La *Plago de Isilduro*... mi konjektas, ke la *Plago de Isilduro* kuŝis inter vi kaj estis kaŭzo de disputoj en via Kunularo. Evidente ĝi estas potenca heredaĵo, kaj tiaj aĵoj ne kreas pacon inter aliancanoj, se oni povas lerni el antikvaj historioj. Ĉu mi ne trafas proksime al la celcentro?

— Proksime, — diris Frodo, — sed ne en la oron. Ne okazis disputoj en nia Kunularo, kvankam ekzistis dubo: dubo pri la vojo irota el la Emin Muilo. Sed kiel ajn estas, antikvaj historioj ankaŭ instruas al ni pri la danĝero de malprudentaj vortoj pri tiaj aĵoj kiaj... heredaĵoj.

— Ha, okazis do tiel, kiel mi supozis: via problemo fontis nur el Boromiro. Li deziris tiun aĵon porti al Minaso Tirit. Ve! estas kurba sorto, kiu sigelas la lipojn de tiu, kiu laste vidis lin, kaj forbaras al mi tion, kion mi sopiras scii: kio estis en lia koro kaj pensoj dum la lastaj horoj. Ĉu li eraris aŭ ne, sed mi estas certa, ke li mortis bone, plenumante ian bonan faron. Lia vizaĝo estis eĉ pli bela ol dum la vivo.

» Sed, Frodo, mi komence premis forte vin pri la *Plago de Isilduro*. Pardonu min! Tio estas malsaĝa je tia horo kaj en tia loko. Al mi mankis tempo por pripensi. Ni travivis duran batalon, kaj estis pli ol sufiĉo por plenigi mian menson. Sed eĉ dum mi parolis al vi, mi pli-proksimiĝis al la celpunkto, kaj tial intence pafis flanken. Ĉar necesas scii, ke multo estas konservita el la pratempa klero, kiu ne estas disvastigita, inter la Regantoj de la urbo. Ni en mia domo ne devenis de la Elendila linio, kvankam en ni estas la sango de Numenoro. Ĉar ni retrokalkulas nian linion al Mardilo, la bona vokto kiu regis anstataŭ la reĝo, kiam tiu foriris al milito. Kaj tiu reĝo estis Earnuro, la lasta en la linio de Anariono, kaj seninfana, kaj li neniam revenis. Kaj la voktoj regis la urbon de post tiam, kvankam tio estis antaŭ multaj homaj generacioj.

» Kaj jenon mi memoras pri Boromiro knabaĝa, kiam ni kune lernis la rakonton pri niaj antaŭuloj kaj la historion de nia urbo, ke ĉiam malplaĉis al li, ke lia patro ne estas reĝo. “Kiom da jarcentoj necesas por reĝigi reganton, se la reĝo ne revenas?” — li demandis. “Malmultaj jaroj, eble, en aliaj lokoj malpli reĝecaj, — mia patro respondis. —

En Gondoro dek mil jaroj ne sufiĉus". Ve! povra Boromiro. Ĉu tio ne konigas al vi ion pri li?

— Jes, — diris Frodo. — Tamen ĉiam li traktis Aragornon honorige.

— Mi tion ne dubas, — diris Faramiro. — Se li estis kontenta pri la pretendo de Aragorno, kiel vi diras, li certe ege respektis lin. Sed ankoraŭ ne venis la krizpunkto. Ili ankoraŭ ne atingis Minason Tirit aŭ rivaliĝis en ties militoj. Sed mi devias. Ni en la domo de Denetoro konas multan antikvan kleron pro longa tradicio, kaj krome tie en niaj trezorejoj estas konservitaj multaj aĵoj: libroj kaj tabuloj skribitaj sur velkaj pergamenoj, jes, kaj sur ŝtonoj, kaj sur folioj de arĝento kaj de oro, laŭ diversaj literaroj. Iujn neniun nun scias legi; kaj koncerne la ceterajn, malmultaj iam malŝlosas ilin. Mi scias iom legi en ili, ĉar mi estas instruita. Ĝuste tiuj kronikoj venigis al ni la Grizan Pilgrimanton. Mi la unuan fojon vidis lin, kiam mi estis infano; kaj li venis du- aŭ tri-foje post tiam.

— La Griza Pilgrimanto, ĉu? — diris Frodo. — Ĉu li havis nomon?

— Mitrandiro ni nomis lin laŭ la elfa maniero, kaj li estis kontenta. Li diris: *Multaj estas miaj nomoj en multaj landoj. Mitrandiro inter la elfoj; Tarkuno laŭ la gnomoj; Olorino mi estis dum mia juneco forgesita en la okcidento, en la sudo Inkanuso, en la nordo Gandalfo; al la oriento mi ne iras.*

— Gandalfo! — diris Frodo. — Mi pensis, ke tiu estas li. Gandalfo la Griza, la plej kara el la konsilistoj. Estro de nia Kunularo. Li pereis en Morio.

— Mitrandiro pereis, ĉu? — diris Faramiro. — La misa sorto verŝajne persekutis vian Kunularon. Estas vere malfacile kredi, ke iu tiel saĝega kaj potenca — ĉar multajn mirindaĵojn li faris inter ni — povis pereji, kaj tiom da klero estu forprenita el la mondo. Ĉu vi certas pri tio, kaj ke li ne simple forlasis vin kaj iris, kien li volis?

— Ve! jes. Mi vidis lin fali en la abismon.

— Mi konstatas, ke en tio estas ia granda historio timiga, — diris Faramiro, — kiun vi eble rakontos al mi vespere. Mitrandiro estis, mi jam supozas, pli ol klermastro: granda movanto de la faroj en nia tempo. Se li estus konsultebla inter ni pri la duraj vortoj de mia sonĝo, li povus klarigi ilin al ni sen la neceso de kuriero. Tamen eble li tion ne farus, kaj la vojaĝo de Boromiro estis antaŭdestinita. Mitrandiro neniam parolis al ni pri la okazontaĵoj, kaj li ankaŭ ne malkaŝis siajn celojn. Li ricevis permeson de Denetoro, la kielon mi ne scias, rigardi

la sekretojn de nia trezorejo, kaj mi iom lernis de li, kiam li konsentis instrui (kio okazis malofte). Ĉiam li volis serĉi kaj kutimis pridemandi nin antaŭ ĉio pri la Granda Batalo okazinta sur Dagorlado je la komenciĝo de Gondoro, kiam Li, kiun ni ne nomas, estis venkita. Kaj li avidis rakontojn pri Isilduro, kvankam pri tiu ni povis malpli multe rakonti, ĉar nenio certa iam estis konata inter ni pri ties morto.

La voĉo de Faramiro flustrigis.

— Sed almenaŭ tion mi eksciis, aŭ divenis, kaj ĉiam poste tenis sekreta en mia koro, ke Isilduro prenis ion el la mano de l' Sennomulo antaŭ ol foriri de Gondoro, neniam plu vidota inter la mortemuloj. Tion mi supozis la respondo al la demandoj de Mitrandiro. Sed ĝi ŝajnis tiam afero, kiu koncernis nur la esplorantojn pri antikvaj scioj. Ankaŭ kiam la perpleksaj vortoj estis debatataj inter ni, mi ne taksis la *Plagon de Isilduro* kiel la saman aferon. Ĉar Isilduro estis embuskita kaj lin mortigis orkaj sagoj, laŭ la sola legendo, kiun ni konis, kaj Mitrandiro neniam sciigis al mi ion plian.

» Kio tiu aĵo vere estas, mi ankoraŭ ne povas diveni, sed heredaĵo potenca kaj danĝera ĝi devas esti. Fia armilo eble, inventita de la Malhela Mastro. Se ĝi estis io avantaĝa en batalo, mi volonte kredas, ke Boromiro, tiu sentima fierulo, ofte malprudenta, ĉiam deziranta venkon por Minaso Tirit (kaj la propran gloron inkluzive), eble dezirus tian aĵon kaj estus logita de ĝi. Ve, ke li entute iris tiucele! Mi devis esti elektita de mia patro kaj la pliaĝuloj, sed li proponis sin, ĉar li estis la pli aĝa kaj pli fortika (ambaŭ estas veraj), kaj li rifuzis cedi.

» Sed jam ne timu! Mi ne prenis tian aĵon, se ĝi kuŝus apud la vojo. Ne, eĉ se Minaso Tirit estus ruiniĝanta, kaj sole mi kapablus savi ĝin, uzante la armilon de la Malhela Mastro por ĝia bono kaj mia gloro. Ne, mi ne volas tian triumfon, Frodo, filo de Drogo.

— Ankaŭ la Konsilio ne volis, — diris Frodo. — Ankaŭ ne mi. Mi neniel partoprenus tiajn aferojn.

— Koncerne min, — diris Faramiro, — mi volus vidi la Blankan Arbon floranta denove en la korto de la reĝoj, kaj la revenon de l' Arĝenta Krono, kaj Minason Tirit en paco: ree Minaso Anor kiel en la pratempo, plena je lumo, alta kaj bela, bela kiel reĝino inter aliaj reĝinoj, ne mastrino de multaj sklavo, eĉ ne bonkora mastrino de volontaj sklavo. Milito devas esti, dum ni defendas niajn vivojn kontraŭ la detruisto, kiu volas vori ĉion; sed mi ne amas la helan glavon pro ties akreco, nek la sagon pro ties rapideco, nek la batalanton pro lia gloro. Nur tion mi amas, kion ili defendas: la urbon de la homoj el

Numenoro; kaj mi volas, ke ĝi estu amata pro sia memoro, sia antikveco, sia belo, kaj sia nuna saĝo. Ne timata, krom kiel homoj eble timas la dignon de homo maljuna kaj saĝa. Do, ne timu min! Mi ne postulas, ke vi sciigu al mi pli. Mi eĉ ne demandas, ĉu mi jam parolas pli celtrafe. Sed se vi fidus al mi, eble mi povos konsili vin rilate vian nunan serĉon, kio ajn ĝi estas, jes, kaj eĉ helpi vin.

Frodo nenion respondis. Li preskaŭ cedis al la deziro por helpo kaj konsilo, rakonti al tiu serioza junulo, kies vortoj ŝajnis tiom saĝaj kaj justaj, ĉion en sia menso. Sed io baris tion al li. Lia koro estis peza pro timo kaj malĝojo: se li kaj Sam estis efektive, kiel ŝajnis probable, la sola restaĵo el la Naŭ Marŝantoj, tiam li estis la sola disponanto de l' sekreto de ilia misio. Prefere senmerita malfido ol vortoj malprudentaj. Kaj la memoro pri Boromiro, pri la terura ŝanĝiĝo, kiun kaŭzis al li la logo de la Ringo, estis ĉiam ĉeesta en lia menso, kiam li rigardis Faramiron kaj aŭskultis ties voĉon: diferencaj ili estis, kaj tamen tre parencaj.

Ili marŝis silente antaŭen dum kelka tempo, pasante kiel grizaj kaj verdaj ombroj sub la maljunaj arboj, la piedoj kaŭzantaj neniun sonon; supre kantis multaj birdoj, kaj la suno ekbrilis sur la polurita plafono el malhelaj folioj en la ĉiamverda arbaro de Itilio.

Sam ne partoprenis la konversacion, kvankam li aŭskultis ĝin; kaj samtempe li atentis per siaj akraj hobitaj oreloj ĉiujn mallaŭtajn arbarajn bruojn ĉirkaŭ ili. Unu aferon li rimarkis, ke dum la tuta parolado la nomo de Golumo eĉ unufoje ne estis menciita. Li estis kontenta, kvankam li sentis tro optimisma la esperon, ke li neniam plu aŭdos ĝin. Li baldaŭ konstatis ankaŭ, ke, kvankam ili marŝis solaj, multaj homoj estas proksime: ne nur Damrodo kaj Mablungo flirtantaj en kaj el la ombroj antaŭe, sed ankaŭ aliaj ambaŭflanke, ĉiuj irantaj rapide kaj sekrete al iu destinita loko.

Unufoje, subite retrorigardante, kvazaŭ iu juko atentigus lin, ke li estas rigardata deposte, al li ŝajnis, ke li ekvidas etan malhelan figuron kaŝiĝantan malantaŭ arbotrunko. Li malfermis sian buŝon parolonte kaj refermis ĝin. "Mi ne certas, — li diris al si, — kaj kial mi memorigu ilin pri la maljuna kanajlo, se ili elektis forgesi lin? Mi ŝatus mem forgesi!"

Do, ili pluiris, ĝis la arbaro maldensiĝis, kaj la tereno komencis subeniri pli krute. Tiam ili denove flanketurniĝis, dekstren, kaj

baldaŭ alvenis rivereton en mallarĝa kanjoneto: tiu estis la sama rojo, kiu likiĝis el la ronda lageto tre supre, jam iĝinta rapida torento, saltanta malsupren trans multajn ŝtonojn sur profunde fendita bedo, superkreskita de ileksoj kaj etaj buksoj. Okcidente ili povis vidi, sub ili en lumnebleto, ebenaĵojn kaj larĝajn herbejojn, kaj la larĝajn akvojn de Anduino ekbrilantaj malproksime sub la okcidentiĝa suno.

— Ĉi tie, ho ve! mi devas trakti vin malĝentile, — diris Faramiro. — Mi esperas, ke vi pardonos tion al iu, kiu ĝis nun ĝentile esprimis siajn ordonojn kaj nek mortigis, nek ligis vin. Sed estas ordonite, ke neniu fremdulo, eĉ ne iu el Rohano, kiu batalas apud ni, vidu la padon nun irotan per okuloj nekovritaj. Ni devas blindumi vin.

— Laŭ via volo, — diris Frodo. — Eĉ la elfoj tion faras laŭnecese, kaj blindumite ni transiris la limon de la bela Lotlorieno. La gnomo Gimlio malvolonte akceptis tion, sed la hobitoj ĝin toleris.

— Al loko ne tiom bela mi kondukos vin, — diris Faramiro. — Sed mi ĝojas, ke vi akceptos tion volonte kaj ne perforte.

Li mallaŭte vokis, kaj tuj Mablungo kaj Damrodo paŝis el inter la arboj kaj revenis al li.

— Blindumu tiujn gastojn, — diris Faramiro. — Firme, sed ne tiel, ke ili sentu malkomforton. Ne ligu iliajn manojn. Ili promesos ne provi ekvidi. Mi povas fidi, ke ili propravole fermu siajn okulojn, sed la okuloj nepre palpebrumas, se la piedoj stumblas. Konduku ilin tiel, ke ili ne hezitu.

Per verdaj skarpoj la du gardistoj kovris la okulojn de la hobitoj, kaj subentiris la kapuĉojn preskaŭ ĝis iliaj buŝoj; poste ili rapide prenis mane po unu kaj daŭrigis sian vojon. Ĉion, kion Frodo kaj Sam sciis pri tiu lasta vojmejlo, ili lernis per nura konjektado. Post iom da tempo ili konstatis, ke ili marŝas laŭ pado, kiu descendas apike; baldaŭ ĝi tiel mallarĝiĝis, ke ili iris spalire, frotante ŝtonan muron ambaŭflanke; iliaj gardantoj stiris ilin deposte per manoj kroĉante firme iliajn ŝultrojn. De tempo al tempo ili alvenis lokojn malebenajn kaj estis suprenlevitaj kelkan tempon kaj poste restarigitaj. Ĉiam la bruo de la fluanta akvo aŭdiĝis dekstre, kaj ĝi pli kaj pli proksimiĝis kaj laŭtiĝis. Finfine oni haltigis ilin. Rapide Mablungo kaj Damrodo girigis ilin plurfoje, kaj ili perdis sian direktosenton. Ili iomete grimpis supren: sentiĝis malvarmo, kaj bruo de la rojo estis mallaŭta. Poste ili estis levitaj kaj subenportitaj, suben laŭ multaj ŝtupoj, kaj ĉirkaŭ angulon. Subite ili aŭdis denove la akvon, jam laŭtan, rapidan kaj plaŭdan. Ĝi ŝajnis ĉie ĉirkaŭe, kaj ili sentis fajnajn gutojn sur la

manoj kaj vangoj. Finfine oni starigis ilin denove. Momente ili staris tiel, duone timantaj, blindumite, ne sciante, kie ili estas; kaj neniu parolis.

Tiam aŭdiĝis la voĉo de Faramiro proksime post ili.

— Ili vidu! — li diris. La skarpoj estis forigitaj kaj suprenŝovitaj la kapuĉoj, kaj ili palpebrumis kaj spasme spiris.

Ili staris sur malseka planko el polurita ŝtono, la sojlo tiel-dire de krude hakita rokporo malhele aperta malantaŭ ili. Sed antaŭe maldensa akvovualo estis pendigita, tiel proksime, ke Frodo povus ŝovi en ĝin etenditan brakon. Ĝi frontis okcidenten. La ebenaj radioj de l' subiranta suno malantaŭe trafis ĝin, kaj ties ruĝa lumo frakasigis je multaj flagraj radioj el ĉiamvaria koloro. Estis kvazaŭ ili starus antaŭ fenestro de elfa turo, kurtenita de treditaj juveloj el arĝento kaj oro, kaj rubenoj, safiroj kaj ametistoj, ĉiuj ĉenditaj per ĉionkonsuma fajro.

— Almenaŭ ni venis bonŝance je la ĝusta horo por kompensi vian paciencon, — diris Faramiro. — Tio estas la Fenestro de l' Sunsubiro, Heneto Anun, la plej bela el la akvofaloj de Itilio, lando de multaj fontanoj. Malmultaj fremduloj vidis ĝin. Sed ne troviĝas reĝeca halo malantaŭe por egali ĝin. Eniru jam kaj vidu!

Ĝuste dum li parolis, la suno sinkis, kaj la fajro forvelkis en la fluanta akvo. Ili turnis sin kaj eniris sub la malalta timiga arkaĵo. Tuj ili trovis sin en roka ĉambro, larĝa kaj kruda, kun malebena kliniĝa plafono. Kelkaj torĉoj estis fajrigitaj kaj ĵetis malfortan lumon al la briletantaj muroj. Multaj viroj jam ĉeestis. Aliaj ankoraŭ envenis po du kaj tri tra malhela mallarĝa pordo je unu flanko. Kiam iliaj okuloj kutimiĝis al la ombreco la hobitoj vidis ke la kaverno estas pli granda ol ili supozis kaj estas plenigita de granda kvanto da armiloj kaj nutraĵoj.

— Nu, jen nia rifuĝejo, — diris Faramiro. — Ne grandkomforta loko, sed ĉi tie vi povos pasigi trankvile la nokton. Almenaŭ ĝi estas seka, kaj troviĝas manĝaĵo, kvankam ne fajro. Iam la akvo subenfluis tra tiu ĉi kaverno kaj eksteren pere de l' arkaĵo, sed ĝia direkto estis ŝanĝita pli alte en la kanjoneto, de pratempaj laboristoj, kaj la rojo estis sendita suben en falo duoble alta super la rokoj supre. Ĉiuj enirejoj al tiu ĉi groto estis poste sigelitaj kontraŭ eniro de akvo aŭ io alia, krom nur unu. Ekzistas nun nur du elirejoj: tiu pasejo, laŭ kiu vi venis blindumite kaj la fenestrokurteno en profundan basenon plenan de tranĉilecaj ŝtonoj. Jam ripozu iom, ĝis la vespera manĝo estos preta.

La hobitojn oni kondukis al angulo, kaj ili ricevis malaltan liton, sur kiu ili kuŝu laŭplaĉe. Dume homoj okupiĝis tra la kaverno, kviete kaj kun orda rapideco. Malpezaj tabloj apogitaj al la muroj estis metitaj sur stablojn kaj ŝarĝitaj je manĝilaro. Ĝi estis plejparte ordinara kaj senornama, sed fortike kaj faklerte farita: rondaj pladoj, bovloj kaj ujoj el glazura bruna argilo aŭ tornita buksligno, glata kaj pura. Ie-tie estis taso aŭ pelvo el polurita bronzo; kaj kaliko el senornama arĝento estis metita antaŭ la sidloko de la militestro meze de la plej interna tablo.

Faramiro ĉirkaŭiris inter la homoj, pridemandante ĉiun, kiam tiu venis, per voĉo mallaŭta. Iuj revenis el persekutado de la sudanoj; aliaj, postlasitaj kiel skoltoj proksime al la vojo, venis laste. Ĉiuj sudanoj estis prinotitaj, krom nur la granda mumako: kio okazis al ĝi, neniuj povis diri. De la malamikoj neniuj moviĝo estis rimarkebla; neniuj orka spiono moviĝis.

— Vi vidis kaj aŭdis nenion, Anbornon, ĉu? — Faramiro demandis al la plej lasta veninto.

— Nu, ne, estro, — diris tiu. — Almenaŭ neniun orkon. Sed mi vidis, aŭ supozis vidi, ion iomete strangan. Ekkrepuskiĝis profunde, kiam okuloj pligrandigas pli ol devus esti. Do eble tio estis nenio pli ol sciuro. — Je tio Sam ekatentis. — Tamen se jes, ĝi estis sciuro nigra, kaj voston mi ne vidis. Ĝi similis ombrojn sur la tero, kaj ĝi saltis malantaŭ arbotrunkon, kiam mi proksimiĝis, kaj suprengrimpis tiel rapide kiel iu ajn sciuro. Vi ne volas, ke ni mortigu sovaĝajn bestojn sencele, kaj tiu ne ŝajnis alia, do mi sagon ne ekspedis prove. Estis ĉiuokaze tro mallume por certa pafado, kaj la kreaĵo malaperis en la senlumon de la folioj fulmrapide. Sed mi restis kelkan tempon, ĉar tio ŝajnis stranga, kaj poste mi rerapidis. Ŝajnas al mi, ke mi aŭdis tiun aĵon sibli al mi, kiam mi forturniĝis. Sciurego, eble. Eble sub la ombro de la Sennomulo iuj bestoj el Mornarbaro vagas ĉi tien al nia arbaro. Tie la sciuroj estas nigraj, onidire.

— Eble, — diris Faramiro. — Sed tio estas misaŭguro, se tiel estas. Ni ne deziras la fuĝintojn el Mornarbaro en Itilio.

Sam opiniis, ke li haste ekrigardis la hobitojn dumparole, sed Sam diris nenion. Dum iom da tempo li kaj Frodo dorsapogiĝis kaj rigardis la torĉlumon kaj la homojn irantajn tien-reen parolantajn per sordinitaj voĉoj. Tiam subite Frodo endormiĝis.

Sam luktis kontraŭ sin, argumentante tiel kaj aliel. “Li eble enordas, — li pensis, — tamen aliflanke eble ne. Belaj paroloj eble kaŝas fian koron. — Li oscedis. — Mi povus tradormi tutan semajnon, kaj tio

bonfarus al mi. Kaj kion mi povas fari, eĉ se mi maldormas, nur mi sola, kaj inter tiuj grandaj homoj? Nenion, Sam Vato; sed vi devas maldormi ĉiuokaze". Kaj iel li sukcesis je tio. La lumo forvelkis de la kaverna pordo, kaj la griza vualo de falanta akvo malheliĝis kaj perdiĝis en kreskanta ombro. Ĉiam la sono de la akvo daŭris, neniam ŝanĝante sian tonon, matene, vespere aŭ nokte. Ĝi murmuris kaj flustris pri dormo. Sam frotis la okulojn per la fingrartikoj.

Nun pliaj torĉoj estis fajrigitaj. Bareleto da vino estis truita. Konservaj bareloj estis malfermataj. Viroj alportis akvon el la akvofalo. Iuj lavis siajn manojn en pelvoj. Larĝa kupra pelvo kaj blanka tuko estis portitaj al Faramiro, kaj li sin lavis.

— Veku niajn gastojn, — li diris, — kaj portu al ili akvon. Estas la manĝohoro.

Frodo sidiĝis, oscedis kaj streĉis sin. Sam, ne kutimiĝinte al servado, rigardis iom surprizite la altulon, kiu riverencis, tenante antaŭ li pelvon da akvo.

— Metu ĝin teren, mastro, mi petas! — li diris. — Pli facile por mi kaj por vi. — Poste, mirige kaj amuze por la homoj, li plonĝigis sian kapon en la malvarman akvon kaj plaŭdigis ĝin sur siajn nukon kaj orelojn.

— Ĉu en via lando oni kutime lavas la kapon antaŭ la vespermanĝo? — demandis la viro, kiu servis al la hobitoj.

— Ne, antaŭ la matenmanĝo, — diris Sam. — Sed se mankas dormo, malvarma akvo sur la nuko efikas kiel pluvo sur velka laktuko. Jen! Jam mi povos maldormi sufiĉe longe por manĝi iomete.

Oni kondukis ilin poste al sidlokoj apud Faramiro: bareloj felokovritaj kaj sufiĉe pli altaj ol la benkoj por la homoj por konveni al ili. Antaŭ ol ekmanĝi Faramiro kaj ĉiuj liaj viroj turnis sin fronte al la okcidento dum momenta silento. Faramiro signalis al Frodo kaj Sam, ke ankaŭ ili faru same.

— Tion ni ĉiam faras, — li diris residiĝinte: — ni rigardas al Numenoro estinta, kaj transe al Elfhejmo estanta, kaj al tio, kio estas trans Elfhejmo kaj ĉiam estos. Ĉu vi havas similan kutimon antaŭmanĝan?

— Ne, — diris Frodo, sentante sin strange kampaneca kaj neinstruita. — Sed se ni estas gastoj, ni riverencas al la gastiganto, kaj manĝinte ni stariĝas kaj dankas lin.

— Tion ankaŭ ni faras, — diris Faramiro.

Post tiom longa vojaĝado kaj bivakado, kaj tagoj pasigitaj en la soleca sovaĝejo, la vespera manĝo ŝajnis al la hobitoj festo: trinki palan flavan vinon, friskan kaj bonodoran, manĝi buterpanojn kaj salitajn viandojn, kaj sekigitajn fruktojn, kaj bonan ruĝan fromaĝon, per la puraj manoj kaj puraj tranĉiloj kaj teleroj. Nek Frodo, nek Sam rifuzis ion ajn proponitan, ankaŭ ne la duan porcion, nek efektive la trian. La vino trafluis iliajn vejnojn kaj lacajn membrojn, kaj ili estis ĝojaj kaj facilanimaj, kiaj ili ne estis de kiam ili forlasis la landon Lorieno.

Kiam ĉio estis finita, Faramiro kondukis ilin al alkovo funde de la kaverno, parte ekranita per kurtenoj; kaj seĝon kaj du taburetojn oni alportis tien. Eta argila lampo lumis en niĉo.

— Vi eble baldaŭ deziros dormi, — li diris, — kaj precipe la bona Samsaĝo, kiu ne volis fermi la okulojn antaŭmanĝe: ĉu pro timo, ke li malakrigos la eĝon de nobla malsato, aŭ pro timo pri mi, mi ne scias. Sed ne estas bone, tro baldaŭ ekdormi postmanĝe, precipe sekve de fastado. Ni interparolu iomete. Dum via vojaĝo el Rivendelo certe okazis multaj aferoj rakontindaj. Kaj ankaŭ vi eble volas ekscii iom pri ni kaj la lando, en kiu vi nun estas. Rakontu al mi pri mia frato Boromiro kaj pri maljuna Mitrandiro, kaj pri la bravaj personoj en Lotlorieno.

Frodo jam ne sentis dormemon kaj volonte pretis paroli. Sed malgraŭ tio, ke la manĝaĵoj kaj vino malstreĉis lin, li ne tute perdis sian prudenton. Sam estis ridetanta kaj murmuranta al si, sed kiam Frodo ekparolis, li estis komence kontenta aŭskulti, nur de tempo al tempo riskante eligi konsentan krieton.

Frodo rakontis multajn historiojn, tamen ĉiam li forturnis la temon for de la celo de la Kunularo kaj de la Ringo, prefere insistante pri la kuraĝa rolo de Boromiro en ĉiuj aventuroj: kun la lupoj en la sovaĝejo, en la neĝo sub Karadraso kaj en ŝaktoj de Morio, kie Gandolfo pereis. Faramiro plej emociiĝis pri la historio de la surponta batalo.

— Certe ĝenis Boromiron forkuri de la orkoj, — li diris, — aŭ eĉ de la terura estaĵo nomita de vi, la Balrogo, malgraŭ tio, ke li laste foriris.

— Li estis la lasta, — diris Frodo, — sed Aragorno devis gvidi nin. Nur li konis la vojon post la pereo de Gandolfo. Sed se ni malplivaloruloj ne estus prizorgendaj, al mi ŝajnas, ke nek li nek Boromiro fuĝus.

— Eble estus pli bone, se Boromiro pereus tie kun Mitrandiro, —

diris Faramiro, — kaj ne plirus ĝis la sorto, kiu atendis lin super la akvofaloj de Raŭroso.

— Eble. Sed nun rakontu al mi pri viaj propraj travivaĵoj, — diris Frodo ankoraŭfoje fortunante la temon. — Ĉar mi volas ekscii pli pri Minaso Itil kaj Osgiliado, kaj Minaso Tirit la longedaŭra. Kion vi esperas pri tiu urbo en via longa milito?

— Kion ni esperas? Jam delonge ni ne havas esperon. La glavo de Elendilo, se ĝi fakte revenos, eble reardigos ĝin, sed mi ne kredas, ke tio faros pli ol prokrasti la plagan tagon, krom se venos ankaŭ alia neantaŭvidita helpo de elfoj aŭ homoj. Ĉar la Malamiko plimultiĝas, kaj ni malmultiĝas. Ni estas popolo velkanta, aŭtuno senprintempa.

» La homoj de Numenoro ekloĝis tre vaste sur la bordoj kaj apudmaraj regionoj de la Grandaj Landoj, sed plejparte ili kutimiĝis al misfaroj kaj stultaĵoj. Multaj enamiĝis al la Mallumo kaj la nigraj artoj; iuj transdonis sin tute al mallaboremo kaj lukso, kaj iuj batalis inter si, ĝis ili estis venkitaj pro sia malforto de la sovaĝuloj.

» Oni ne diras, ke oni iam praktikis la misajn artojn en Gondoro, nek ke la Sennomulo iam estis tie nomita honore; kaj la malnovaj saĝo kaj belo kunportitaj el la okcidento restis longe en la regno de l' filoj de Elendilo la Bela, kaj ili ankoraŭ restas tie. Tamen malgraŭ tio estis Gondoro, kiu kaŭzis la propran putriĝon, iom post iom kadukiĝante kaj pensante, ke la Malamiko dormas, kiu estis nur elpelita, ne detruita.

» Morto ĉiam ĉeestis, ĉar la numenoroj daŭre, kiel en la malnova regno kaj tial ili perdis ĝin, sopiris senfinan vivon senŝanĝan. Reĝoj konstruis tombojn pli majestajn ol domoj de la vivantoj, kaj taksis malnovajn nomojn en la analoj de siaj generacioj pli karaj ol la nomojn de filoj. Seninfanaj princoj sidis en antikvaj haloj meditante pri heraldiko; en sekretaj ĉambroj kadukuloj kreis fortajn eliksirojn, aŭ en altaj malvarmaj turoj starigis demandojn al la steloj. Kaj la lasta reĝo en la linio de Anariono malhavis heredonton.

» Sed la regantoj estis pli saĝaj kaj pli bonŝancaj. Pli saĝaj, ĉar ili varbis la forton de nia popolo inter la fortikuloj de l' marbordo kaj inter la harditaj montaranoj de Eredo Nimrajs. Kaj ili interkonsentis militpaŭzon kun la fieraj popoloj de la nordo, kiuj ofte atakis nin, homoj feroce kuraĝaj, sed niaj parencoj el malproksimo, malkiel la sovaĝaj orientanoj aŭ la kruelaj haradanoj.

» Tial okazis dum la tagoj de Ciriono la Dek-dua Reganto (kaj mia patro estas la dudek-sesa), ke ili rajdis helpe al ni kaj sur la granda

Kampo de Celebranto ili detruis niajn malamikojn, kiuj kaptis niajn nordajn provincojn. Tiuj estis la rohananoj, kiel ni nomas ilin, mastroj de l' ĉevaloj, kaj ni cedis al ili la kampojn de Kalenardhono, kiuj de tiam nomiĝas Rohano; ĉar tiu provinco estis delonge malmulte loĝata. Kaj ili fariĝis niaj aliancantoj, kaj ĉiam pruviĝis lojalaj al ni, helpante nin laŭbezone, kaj gardante niajn nordajn limregionojn kaj la Breĉon de Rohano.

» Pri niaj klero kaj kutimoj ili lernis tiom, kiom ili volis, kaj iliaj estroj parolas nian lingvon laŭbezone; tamen plejparte ili sekvas la kutimojn de siaj propraj prapatroj kaj la proprajn memorojn, kaj inter si ili parolas la propran nordan lingvon. Kaj ni amas ilin: altaj viroj kaj belaj virinoj, ambaŭ same kuraĝaj, orhararaj, helokulaj kaj fortaj; ili memorigas nin pri la juneco de la homoj, kiaj ili estis dum la Praaj Tagoj. Efektive, estas dirite de niaj kleruloj, ke ili ekde la pr tempo havas kun ni parencecon: ili devenas de tiuj samaj Tri Domoj de Homoj, kiel la numenanoj en la komenco; eble ne de Hadoro la Orharara, tiu elf-amiko, tamen de tiuj el ties filoj kaj popolo, kiuj ne iris transmaren al la okcidento, rifuzinte la alvokon.

» Ja tiel ni taksas la homojn en nia klero, nomante ilin la Altaj, aŭ Homoj de l' Okcidento, kiuj estis numenanoj; kaj la Mezaj Popoloj, Homoj de l' Krepusko, kiuj estas la rohananoj kaj ties parenco kiuj daŭre loĝas en la nordo; kaj la Sovaĝuloj, la Homoj de l' Mallumo.

» Tamen nun, kvankam la rohananoj kelkrilate plisimiliĝis al ni, pli spertaj pri la artoj kaj mildeco, ankaŭ ni plisimiliĝis al ili, kaj ni apenaŭ rajtas plu pretendi la titolon Alta. Ni fariĝis Meza Popolo, de la Krepusko, sed memorante aliajn aferojn. Samkiel la rohananoj ni amas jam militon kaj kuraĝon kiel en si mem bonajn, tiel sporton kiel celon; kaj kvankam ni ankoraŭ opinias, ke batalisto devas havi aliajn kapablojn kaj konojn ol la nuran lerton pri armiloj kaj mortigado, ni estimas batalistojn malgraŭ tio pli alte ol la alimetiajn homojn. Tia estas la postulo de nia epoko. Tia estis eĉ mia frato Boromiro: viro bravega, kaj pro tio oni taksis lin la plej elstara viro de Gondoro. Kaj efektive tre valora li estis: neniu heredonto de Minaso Tirit dum longaj jaroj estis tiel hardita en laboro, tiel antaŭenira en batalo, aŭ blovis pli potencan noton per la Granda Korno.

Faramiro suspiris kaj dum iom da tempo silentiĝis.

— Pri la elfoj vi ne diras multon en viaj rakontoj, sinjoro, — diris Sam, subite ekkuraĝiĝante. Li rimarkis, ke Faramiro ŝajnis aludi

elfojn kun respekto, kaj tio eĉ pli ol lia ĝentileco, kaj liaj manĝaĵo kaj vinoj, gajnis la respekton de Sam kaj kvietigis liajn suspektojn.

— Efektive ne, mastro Samsaĝo, — diris Faramiro, — ĉar mi ne estas instruita pri elfa klero. Sed tiel vi tuŝis alian punkton, rilate al kiu ni ŝanĝiĝis, dekliniĝante de Numenoro al Mez-Tero. Ĉar kiel vi eble scias, se Mitrandiro estis via kunulo kaj vi parolis kun Elrondo, la edajnoj, la patroj de la numenoranoj, batalis apud la elfoj dum la unuaj militoj, kaj estis rekompencitaj per donaco de la regno meze en la maro, videbla de Elfhejmo. Sed en Mez-Tero, homoj kaj elfoj iĝis misrilataj pro la artoj de la Malamiko dum la mallumaj tagoj, kaj pro la malrapidaj ŝanĝiĝoj tempaj, dum kiuj ĉiu speco marŝadis plu laŭ siaj disiĝintaj vojoj. Homoj nun timas kaj pridubas la elfojn, kaj tamen scias malmulton pri ili. Kaj ni el Gondoro similiĝas al aliaj homoj, al la homoj el Rohano; ĉar eĉ ili, kiuj estas malamikoj de la Malluma Mastro, evitas la elfojn kaj parolas timplene pri la Ora Arbaro. Tamen inter ni ankoraŭ estas iuj, kiuj traktas kun la elfoj kiam eblas, kaj de tempo al tempo iras sekrete al Lorieno, malofte revenonte. Mi ne. Ĉar mi taksas nun danĝera tion, ke mortema homo intence serĉu la Pliaĝan Popolon. Tamen mi envias al vi, ke vi interparolis kun la Blanka Damo.

— La Damo de Lorieno! Galadriela! — ekkriis Sam. — Vi devus vidi ŝin, sinjoro, vere vi devus. Mi estas nur hobito, kaj kultivado estas hejme mia tasko, sinjoro, se vi komprenas min, kaj mi ne tre lertas pri poezio — ne pri verkado: ia komika rimaĵo, eble, de tempo al tempo, vi scias, ne poezio reala — do mi ne povas diri al vi, kion mi volas esprimi. Tio devus esti kantata. Por tio necesus Paŝegulo, alinome Aragorno, aŭ maljuna sinjoro Bilbo. Sed mi ŝatus verki kanton pri ŝi. Bela ŝi estas, sinjoro! Ĉarmega! Jen kiel granda arbo floranta, jen kiel blanka asfodelo, eta kaj svelta, ĉu ne. Diamante dura, lunlume mola. Sunlume varma, malvarma kiel frosto inter la steloj. Fiera kaj fora kiel neĝa monto, kaj tiel gaja kiel ajna junulino iam vidita de mi kun lekantetoj en la hararo dum printempo. Sed tio estas amaso da sen-sencaĵoj, kaj tute maltrafas la celon.

— Do ŝi devas esti vere elstare bela, — diris Faramiro. — Danĝere bela.

— Mi ne scias pri *danĝere*, — diris Sam. — Ŝajnas al mi, ke oni komprenas en Lorieno la propran danĝeron, kaj trovas ĝin tie, ĉar ili ĝin kunportis. Sed eble vi rajtus nomi ŝin danĝera, ĉar ŝi tiom fortas en si mem. Vi, vi povus frenezece disbati vin kontraŭ ŝin, kiel ŝipo

kontraŭ rokon; aŭ droni, kiel hobito en rivero. Sed nek roko nek rivero kulpus. Nu, Boro... — Li silentiĝis kaj lia vizaĝo ruĝiĝis.

— Jes? Nu, *Boromiro*, vi volis diri? — diris Faramiro. — Kion vi volas diri? Ĉu ke li kunprenis sian danĝeron?

— Jes, sinjoro, pardonpete, kaj brava viro estis via frato, se mi rajtas diri. Sed la tutan tempon vi spuris la predon. Nu, mi rigardis Boromiron kaj aŭskultis lin, la tutan vojon de Rivendelo — prizorgante mian mastron, kiel vi povas kompreni, kaj ne celante damaĝi al Boromiro — kaj mi opinias, ke en Lorieno li vidis la unuan fojon klare, kion mi pli frue divenis: kion li deziris. Ekde la momento kiam li unuafoje vidis ĝin, li deziris la Ringon de l' Malamiko!

— Sam! — kriis Frodo konsternite. Li profundiĝis kelkan tempon en propraj pensoj, kaj subite rekonsciiĝis, tro malfrue.

— Savu min! — diris Sam, blankiĝante kaj poste skarlatiĝante. — Jen mi denove! “Kiam ajn vi malfermas vian buŝon, vi faras fuŝon¹”, la Avulo kutimis diri al mi, kaj prave. Ho ve, ho ve! Nu, vidu, sinjoro! — li turniĝis fronte al Faramiro kun ĉiom da kuraĝo, kiom li povis trovi. — Ne profitu de mia mastro pro tio, ke lia servanto estas tut-simple stultulo. Vi parolis tre bele la tutan tempon, malprudentigis min parolante pri elfoj kaj tiel plu. Sed *belaj faroj beligas*, ni diras. Jen okazo por montri vian kvaliton.

— Tiel ŝajnas, — diris Faramiro, malrapide kaj mallaŭte, kun stranga rideto. — Do jen la respondo al ĉiuj enigmoj! La Unu Ringo, kiu supozite lasis la mondon pere. Kaj Boromiro provis kapti ĝin perforte, ĉu? Kaj vi eskapis, ĉu? kaj kuris la tutan vojon... al mi! Kaj ĉi tie en la sovaĝejo mi havas vin: du duonuloj, kaj amaso da viroj vokeblaj de mi, kaj la Ringo el Ringoj. Bela turniĝo de l' fortuna! Okazo, ke Faramiro, militestro de Gondoro, montru sian kvaliton! Ha! — li rektiĝis, tre alta kaj severa, la grizaj okuloj ekbrilis.

Frodo kaj Sam salte forlasis siajn taburetojn kaj starigis sin dorse al la muro palpserĉante siajn glavtenilojn. Estiĝis silento. Ĉiuj homoj en la kaverno ĉesis paroli kaj alrigardis ilin mire. Sed Faramiro residiĝis sur sian seĝon kaj komencis mallaŭte ridi, kaj poste subite rese-riozigiĝis.

— Ve pri Boromiro! Tro malfacila elprovo! Kiom vi plifortigis mian funebbron, vi, du fremdaj vaguloj el fora lando, portantaj la danĝeron al homoj! Sed vi malpli kompetente juĝas homojn ol mi

¹ Traduko de Edmundo Grimley Evans.

hobitojn. Ni, homoj el Gondoro, estas verparolantoj. Ni malofte fanfaronas kaj poste plenumas aŭ mortas klopodante. *Mi ne prenus tiun ĉi aĵon, se ĝi kuŝus apud la vojo*, mi diris. Eĉ se mi estus tia homo, kiu dezirus tiun aĵon, kaj kvankam mi ne sciiis precize, kio ĝi estas, kiam mi parolis, mi taksus tiujn vortojn voto kaj konformiĝus al ili. Sed tia homo mi ne estas. Aŭ mi estas sufiĉe saĝa por scii, ke ekzistas certaj danĝeroj, de kiuj oni devas fuĝi. Sidiĝu trankvile! Kaj estu konsolita, Samsaĝo. Se ŝajnas, ke vi stumblis, pensu ke tio estis antaŭdestinita. Via koro estas tiel sagaca kiel fidela, kaj vidis pli klare ol viaj okuloj. Ĉar eĉ se ŝajnas strange, estis senriske deklari tion al mi. Tio eble eĉ helpas la mastron, kiun vi amas. La afero elturniĝos liaprofite, se tion mi kapablos aranĝi. Do konsoliĝu. Sed neniam denove nomu tiun aĵon voĉe. Unufoje sufiĉas.

La hobitoj reiris al siaj sidlokoj kaj sidis tre kviete. La homoj returniĝis al siaj trinkaĵoj kaj sia interparolado, perceptante ke ilia estro dividis iun ŝercon kun la etaj gastoj, kaj tio finiĝis.

— Nu, Frodo, finfine ni komprenas unu la alian, — diris Faramiro. — Se vi ŝarĝis vin per tiu ĉi afero, nevolonte, laŭ peto de aliuloj, vi ricevas de mi kompaton kaj honoron. Kaj mi miras pri vi: vi tenis ĝin kaŝita kaj ne uzis ĝin. Vi estas popolo nova, kaj mondo nova al mi. Ĉu ĉiuj viaj parencoj estas similaj? Via lando devas esti regno de paco kaj kontento, kaj devas esti tie kultivistoj alte estimataj.

— Ne ĉio bonstatas tie, — diris Frodo, — sed certe kultivistoj estas estimataj.

— Sed personoj tie devas laciĝi, eĉ en siaj ĝardenoj, kio okazas al ĉio sub la suno de tiu ĉi mondo. Kaj vi estas malproksimaj de l' hejmo kaj lacaj pro vojaĝo. Ne plu hodiaŭ vespere. Dormu ambaŭ pace, se vi povos. Ne timu! Mi ne volas vidi ĝin, nek tuŝi ĝin, nek scii pli pri ĝi ol mi jam scias (kio estas sufiĉe), por ke la danĝero ne embusku min kaj mi malpli sukcesu en la ekzameno ol Frodo, filo de Drogo. Iru nun ripozi, sed unue diru al mi, se vi volas, kien vi deziras iri, kaj kion fari. Ĉar mi devas vaĉi, kaj atendi, kaj pensadi. La tempo pasas. Matene ĉiu el ni devos iri rapide laŭ la vojoj destinitaj por ni.

Frodo pli frue sentis sin tremadi kiam la unua ŝoko de timo forpasis. Nun granda laco inundis lin kvazaŭ nubo. Ne plu li povis hipokriti kaj rezisti.

— Mi estis trovonta vojon en Mordoron, — li diris feble. — Mi estis ironta al Gorgoroto. Mi devas trovi la Monton de Fajro kaj enĵeti

la aĵon en la Fendaĵon de l' Destino. Gandolfo diris tion. Mi ne opinias, ke mi iam alvenos tien.

Faramiro fiksrigardis lin momente en seriozmiena miro. Tiam subite li brakumis lin, dum li pendolis, kaj levante lin malabrupte portis lin al la lito kaj kuŝigis lin tien, kaj kovris lin varmige. Tuj li profunde endormiĝis.

Alian liton oni metis apude por lia servisto. Sam hezitis momente, poste kun profunda riverenco diris:

— Bonan nokton, moŝta militestro. La okazon vi utiligis, sinjoro.

— Ĉu vere? — diris Faramiro.

— Jes, sinjoro, kaj montris vian kvaliton: la plej altan.

Faramiro ridetis.

— Servisto impertinenta, mastro Samsaĝo. Tamen ne: laŭdo fare de laŭdindulo superas ĉiujn rekompencojn. Tamen en tio ĉi estas nenio laŭdinda. Nenio min logis aŭ tentis fari ion alian ol la faritaĵon.

— Aĥ bone, sinjoro, — diris Sam, — vi diras, ke mia mastro havas mienon elfecan; kaj tio estas bona kaj vera. Sed tion ĉi mi povas diri: ankaŭ vi havas mienon, sinjoro, kiu memorigas min pri, pri... nu, Gandolfo, pri sorĉistoj.

— Eble, — diris Faramiro. — Eble vi rimarkas de malproksime la mienon de Numenoro. Bonan nokton!

Ĉapitro 6

LA MALPERMESITA LAGETO

Frodo vekigante trovis Faramiron kliniĝanta al li. Dum sekundo lin kaptis malnovaj timoj kaj li sidiĝis kaj forkaŭris.

— Nenio estas por timi, — diris Faramiro.

— Ĉu jam matene? — demandis Frodo oscedante.

— Ankoraŭ ne, sed la nokto preskaŭ finiĝis kaj la plena luno subeniras. Ĉu vi volas veni por vidi ĝin? Cetere estas afero, pri kiu mi deziras vian konsilon. Mi bedaŭras veki vin el dormo, sed ĉu vi volas veni?

— Mi venos, — diris Frodo, stariĝante kaj iom tremetante, kiam li forlasis la varman lantukon kaj felojn. Ŝajnis malvarme en la senfajra kaverno. La bruo de l' akvo laŭtis en la kvieto. Li surmetis sian mantelon kaj sekvis Faramiron.

Sam, vekiginte subite pro ia gardema instinkto, vidis unue la malplenan liton de sia mastro kaj salte leviĝis. Poste li vidis du malhelajn figurojn de Frodo kaj iu homo, kadrita de l' arkaĵo, kiun jam plenigis pala blanka lumo. Li rapide sekvis ilin, preter vicoj de homoj dormantaj sur matracoj laŭlonge de la muro.

Kiam li pasis la kavernan enirejon, li vidis, ke la Kurteno nun estis blindiga vualo el silko, perloj kaj arĝentaj fadenoj: degelantaj lunlumaj glacieroj. Sed li ne paŭzis por admiri ĝin, kaj turniĝante flanken li sekvis sian mastron tra la mallarĝa pordo en la muro de l' kaverno.

Ili trairis unue nigran koridoron, poste supren laŭ multaj malsekaj ŝtupoj, kaj tiel alvenis etan platan interetaĝon, tranĉitan en la ŝtono kaj lumigitan de la pala ĉielo, ekbrilanta alte supre tra longa profunda ŝakto. De tie kondukis du ŝtuparoj: unu pluiranta, ŝajne, supren al la alta bordo de la fluo; la alia devianta maldekstren. Tiun ili laŭiris. Ĝi serpentumis supren kvazaŭ turŝtuparo.

Fine ili elvenis el la ŝtona mallumo kaj ĉirkaŭrigardis. Ili troviĝis sur larĝa plata roko sen barilo aŭ palisaro. Dekstre, oriente, falis la torento, plaŭdante trans multajn terasojn, kaj poste, verŝiĝante mal-supren laŭ kruta fluejo, ĝi plenigis glate hakitan kanelon per malhela

akvopotenco ŝaŭmflokita, kaj kirligante kaj hastante preskaŭ ĉe iliaj piedoj ĝi plonĝis vertikale trans la randon, kiu gapis maldekstre. Tie proksime al la rando, staris homo silenta, fiksrigardante malsupren.

Frodo sin turnis por rigardi la glatajn fluojn de la akvo, dum ili kurbiĝis kaj plonĝis. Poste li levis la okulojn kaj rigardis foren. La mondo estis kvieta kaj malvarma, kvazaŭ tagiĝo proksimiĝus. Fore en la okcidento la plenluno sinkis, randa kaj blanka. Palaj nebuletoj tremetadis en la valego sube: larĝa golfo de arĝenta fumo, sub kiu ruliĝis la friskaj noktaj akvoj de Anduino. Nigra mallumo baŭmis pretere, en kiu ekbrilis jen kaj jen malvarmaj, akraj, forestaj, blankaj kiel dentoj de fantomoj, la montpintoj de Eredo Nimrajs, la Blankaj Montoj de la regno Gondoro, kronitaj je ĉiamdaŭra neĝo.

Dum kelka tempo Frodo staris tie sur la alta ŝtonplato, kaj trakuris lin tremego kiam li scivolis, ĉu ie en la vasto de l' noktterenoj promenas aŭ dormas liaj iamaj kunuloj, aŭ ili kuŝas mortaj, volvite en nebulo. Kial oni kondukis lin ĉi tien el forgesplena dormo?

Sam avidis respondon al tiu sama demando kaj ne povis bridi murmuron, sole al la orelo de la mastro, dum li pensis:

— Bela perspektivo sendube, sinjoro Frodo, sed tuŝas malvarme la koron, por ne paroli pri la ostoj! Kio okazas?

Faramiro aŭdis kaj respondis.

— Lunsubiĝo super Gondoro. Bela luno *Ithil*, forirante el Mez-Tero, ekrigardas la blankajn buklojn de malnova Mindoluino. Tio valoras kelkajn frostotremetojn. Sed mi venigis vin ne por vidi tion, kvankam viavice, Samsaĝo, mi vin ne venigis, kaj vi nur pagas la prezon de via vaĉemo. Tion rebonigos gluto da vino. Venu, rigardu jam!

Li alpaŝis la silentan sentinelon ĉe la malhela eĝo, kaj Frodo sekvis. Sam ne antaŭeniris. Li jam sentis sin sufiĉe nesekura sur tiu alta malseka plataĵo. Faramiro kaj Frodo rigardis malsupren. Fore sube ili vidis la blankan akvon enverŝiĝi en ŝaŭmantan pelvegion, kaj poste kirligi malhele ĉirkaŭ profunda ovala baseno en la rokoj, ĝis ĝi denove trovis elirejon tra mallarĝa truo kaj forfluis, fumante kaj babile, al pli trankvilaj kaj pli ebenaj etendaĵoj. La lunlumo ankoraŭ deklivis suben al la falfinaĵo kaj ekbrilis sur la ondetoj en la baseno. Baldaŭ Frodo konsciiĝis pri eta malhela io sur la pli proksima bordo, sed ĝuste kiam li alrigardis ĝin, ĝi enplonĝis kaj malaperis tuj preter la bolado kaj bobelado de l' akvofalo, fendante la nigran akvon tiel nete kiel sago aŭ ŝtonego.

Faramiro turniĝis al la apuda homo.

— Nu, kio laŭ via opinio estas tio, Anborno? Ĉu sciuro aŭ alciono? Ĉu estas nigraj alcionoj en la noktaj lagetoj de Mornarbaro?

— Birdo ĝi ne estas, kiel ajn, — respondis Anborno. — Ĝi havas kvar membrojn kaj plonĝas homsimile; belan majstrecon de la metio ĝi vidigas, cetere. Kion ĝi celas? Ĉu serĉas vojon supren malantaŭ la Kurteno al nia kaŝejo? Ŝajnas, ke finfine ni estas malkaŝitaj. Mi havas mian pafarkon, kaj mi postenigis aliajn arkpafistojn, preskaŭ tiel celtrafajn kiel mi, sur ambaŭ bordoj. Por pafi mi atendas nur vian ordonon, estro.

— Ĉu ni pafu? — demandis Faramiro, rapide sin turnante al Frodo.

Frodo momente ne respondis.

— Ne! — li diris poste. — Ne! Mi petas, ke vi ne pafu!

Se aŭdacus Sam, li dirus “jes”, pli rapide kaj pli laŭte. Li ne povis vidi, sed li divenis sufiĉe bone laŭ iliaj vortoj, kion ili rigardas.

— Vi scias do, kio estas tiu estaĵo, ĉu? — diris Faramiro. — Mi petas, nun kiam vi vidis, diru al mi, kial ĝi estu indulgita. Dum ĉiuj niaj interparoloj vi eĉ unufoje ne priparolis vian malrespektindan kunulon, kaj mi rezignis provizore. Oni povis atendi ĝis li estos kaptita kaj kondukita antaŭ min. Mi sendis miajn plej bonajn ĉasistojn por serĉi lin, sed li evitis ilin, kaj ili ne ekvidis lin ĝis nun, krom jen Anborno, unufoje en la krepusko hieraŭ. Sed nun li pli mise trudiĝis ol dum kunikloĉasado en la suprejo: li aŭdacis veni al Heneto Anun, kaj lia vivo estas perdita. Mi miras pri tiu kreaĵo: tiel sekreta kaj ruza, li tamen venis sin amuzi en la lageto antaŭ mia fenestro mem. Ĉu li supozas, ke la homoj dormas sensentinele la tutan nokton? Kial do?

— Ekzistas du respondoj, ŝajnas al mi, — diris Frodo. — Unue, li scias malmulton pri la homoj, kaj kvankam li estas ruza, via rifuĝejo estas tiel kaŝita, ke eble li ne scias, ke tie kaŝiĝas homoj. Aliflanke, mi opinias, ke lin logas deziro superpotenca, pli forta ol lia singardemo.

— Li estas logata, vi diras? — diris Faramiro mallaŭte. — Ĉu eble li, ĉu do li scias pri via ŝarĝo?

— Efektive jes. Li mem portis ĝin dum multaj jaroj.

— Portis ĝin *li*? — diris Faramiro, spasme spirante pro miro. — Tiu ĉi afero volvas sin ĉiam en novaj enigmoj. Do li persekutas ĝin, ĉu?

— Eble. Ĝi estas trezorego por li. Sed ne pri tio mi parolis.

— Do kion serĉas la kreaĵo?

— Fiŝojn, — diris Frodo. — Vidu!

Ili rigardadis suben al la malhela lageto. Nigra kapeto aperis ĉe la malproksima ekstremo de la baseno, tuj ekster la profunda ombro de la rokoj. Vidiĝis momenta arĝenta ekbrilo kaj kirliĝo de ondetoj. Ĝi naĝis al la bordo, kaj tiam mirinde vigle figuro ransimila grimpis el la akvo sur la bordon. Tuj ĝi sidiĝis kaj komencis maĉi la etan arĝentaĵon, kiu ekbrilis turnate: la lastaj radioj de la luno nun trafis malantaŭ la ŝtonmuro ĉe la lageta ekstremo.

— Fiŝojn! — Faramiro ridis mallaŭte. — Tio estas malpli danĝera malsato. Aŭ eble ne: fiŝoj el la lageto de Heneto Anun eble kostos al li ĉion, kion li havas por doni.

— Nun li estas antaŭ mia sagopinto, — diris Anborna. — Ĉu mi pafu aŭ ne, estro? Por seninvita alveno al tiu ĉi loko nia leĝo postulas morton.

— Atendu, Anborna, — diris Faramiro. — Tiu ĉi estas afero pli malfacila ol ĝi ŝajnas. Kion vi volas nun diri, Frodo? Kial mi indulgu?

— La kreaĵo estas mizera kaj malsata, — diris Frodo, — kaj ne konscias sian danĝeron. Kaj Gandolfo, via Mitrandiro, ordonus pro tiu kialo kaj aliaj, ke vi ne mortigu lin. Li malpermesis, ke la elfoj tion faru. Mi ne scias klare kial, kaj pri tio, kion mi konjektas, mi ne povas paroli malkaŝe ĉi tie ekstere. Sed tiu kreaĵo estas iel ligita al mia komisio. Ĝis vi trovis kaj kondukis nin, li estis mia gvidanto.

— Ĉu via gvidanto! La afero iĝas ĉiam pli stranga. Por vi mi farus multon, Frodo, sed tion ĉi mi ne povas cedi: lasi tiun ruzan vagulon iri libere kaj propravole de ĉi tie, por aliĝi al vi poste se tio plaĉos al li, aŭ kaptiĝi de orkoj kaj deklari ĉion, kion li scias, minacate de doloro. Li devas esti mortigita aŭ kaptita. Mortigita, se li ne estos kaptita tre rapide. Sed kiel oni povas kapti tiun glitemulon multmisforman, krom per plumohava stangeto.

— Permesu, ke mi subeniru kviete al li, — diris Frodo. — Vi rajtos teni streĉitaj viajn pafarkojn kaj pafi almenaŭ min, se mi malsukcesos. Mi ne forkuros.

— Iru do kaj rapidu! — diris Faramiro. — Se li travivos, li devos esti via fidela servisto dum la restaĵo de siaj malfeliĉaj tagoj. Konduku Frodon suben al la bordo, Anborna, kaj iru singarde. Tiu kreaĵo posedas nazon kaj orelojn. Vian pafarkon donu al mi.

Anborna gruntis kaj gvidis suben laŭ la serpentuma ŝtuparo ĝis la interetaĝo, kaj poste supren laŭ la alia ŝtuparo, ĝis fine ili alvenis mal-larĝan aperturon kovritan per densaj arbustoj. Silente trapasinte, Frodo trovis sin supre de la suda bordo super la lageto. Jam estis

mallume, kaj la akvofalo estis pala kaj griza, spegulante nur la daŭrantan lunlumon de l' okcidenta ĉielo. Li ne povis vidi Golumon. Li iom pluiris kaj Anborna alvenis mallaŭte post li.

— Antaŭen! — li spiris en la orelon de Frodo. — Atentu vian dekstron. Se vi falos en la lageton, neniu krom via fiŝkaptanta amiko povos helpi vin. Kaj ne forgesu, ke pafarkistoj estas en proksimo, kvankam vi eble ne vidas ilin.

Frodo ŝteliris antaŭen, uzante siajn manojn golumece por palpi la vojon kaj stabiligi sin. La rokoj estis plejparte ebenaj kaj glataj, sed glitfaligaj. Li haltis aŭskultante. Komence li aŭdis neniun sonon krom la senĉesa hastado de la akvofalo malantaŭe. Tamen baldaŭ li aŭdis, ne malproksime antaŭe, siblan murmuradon.

— Fiŝoj, agrablaj fiŝoj. Blanka Vizaĝo malaperis, mia trezoro, finfine, jes. Nun ni povos manĝi fiŝojn trankvile. Ne, ne trankvile, trezoro. Ĉar perdita estas la trezoro, jes, perdita. Fiaj hobitoj, aĉaj hobitoj. Foriris forlasinte nin, *golum*; kaj la trezoro estas foririnta. Nur kompatinda Smeagolo tute sola. Neniu trezoro. Aĉaj homoj, ili prenos ĝin, ŝtelos mian trezoron. Ŝtelistoj. Ni malamas ilin. Fiŝoj, agrablaj fiŝoj. Fortigas nin. L' okulojn briligas, la fingrojn firmigas, jess. Sufoku ilin, trezoro. Sufoku ĉiujn, jes, se ni havos okazojn. Agrablaj fiŝoj. Agrablaj fiŝoj!

Tiel daŭris plu, preskaŭ tiel senĉese kiel la akvofalo, interrompita nur de mallaŭta bruo de bavado kaj gargarado. Frodo ekstremis, aŭskultante kompate kaj abomene. Li volis, ke ĝi silentiĝu, kaj ke li neniam plu devos aŭdi denove tiun voĉon. Anborna ne tre foris post li. Li povus rerampi kaj peti lin pafigi la ĉasistojn. Ili povus verŝajne sufiĉe proksimiĝi, dum Golumo glutegas kaj malsingardas. Unusola rekta trafo, kaj Frodo por ĉiam liberiĝus de tiu mizera voĉo. Sed ne, Golumo jam havis rajton pri li. Servisto havas rajton ĉe la mastro pro servado, eĉ servado pro timo. Ili pereus en la Mortaj Marĉoj sen Golumo. Frodo sciis ankaŭ, iel, ke tion Gandolfo ne volus.

— Smeagolo! — li diris mallaŭte.

— Fiŝoj, agrablaj fiŝoj, — diris la voĉo.

— Smeagolo! — li diris, iom pli laŭte.

La voĉo silentiĝis.

— Smeagolo, la mastro venis serĉi vin. La mastro ĉeestas. Venu, Smeagolo! — Aŭdiĝis neniu respondo krom mallaŭta siblo, kvazaŭ de ensuĉata spiro.

— Venu, Smeagolo! — diris Frodo. — Ni troviĝas en danĝero.

Homoj mortigos vin, se ili trovos vin ĉi tie. Venu rapide, se vi volas eviti morton. Venu al la mastro!

— Ne! — diris la voĉo. — Ne afabla mastro. Lasis kompatindan Smeagolon kaj iras kun novaj amikoj. Mastro atendu. Smeagolo ankoraŭ ne finmanĝis.

— Mankas tempo, — diris Frodo. — Kunportu la fiŝon. Venu!

— Ne! Devas finmanĝi la fiŝon.

— Smeagolo! — diris Frodo urĝe. — La trezoro koleros. Mi prenos la trezoron, kaj mi diros: igu lin engluti la oston kaj sufokiĝi. Neniam plu gustumos fiŝon. Venu, la trezoro atendas!

Aŭdiĝis akra siblo. Baldaŭ el la mallumo venis Golumo rampanta kvarpiede, kvazaŭ erarinta hundo vokita apuden. En la buŝo li havis fiŝon duonmanĝitan kaj alian en la mano. Li venis proksimen al Frodo, preskaŭ naz-al-naze, kaj prisnufis lin. Liaj palaj okuloj brilis. Poste li prenis el la buŝo la fiŝon kaj starigis.

— Afabla mastro! — li flustris. — Afabla hobito, revenis al kompatinda Smeagolo. Bona Smeagolo venas. Jam ni iru, iru rapide, jes. Tra la arbaro, dum la Vizagoj malhelas. Jes, venu, ni iru!

— Jes, ni iros baldaŭ, — diris Frodo. — Sed ne tuj. Mi iros kun vi laŭ mia promeso. Mi ree promesas. Sed ne nun. Vi ankoraŭ ne sendanĝeras. Mi savos vin, sed vi devas fidi al mi.

— Ni devas fidi al la mastro, ĉu? — diris Golumo dubeme. — Kial? Kial ne iri tuj? Kie estas la alia, la kolera malĝentila hobito? Kie li estas?

— Tie supre, — diris Frodo, indikante la akvofalon. — Sen li ni ne foriros. Ni devas reiri al li. — Lia koro malĝojiĝis. Tio tro similis trompon. Li ne vere timis, ke Faramiro permesos mortigi Golumon, sed li probable igos lin kaptito kaj ligos lin; kaj certe tio, kion faris Frodo, ŝajnos perfido al la kompatinda perfidemulo. Estos verŝajne neeble komprenigi aŭ kredigi al li, ke Frodo savis lian vivon laŭ la sola ebla maniero. Kion alian li povus fari por esti lojala, tiel plene kiel eblas, al ambaŭ partioj. — Venu! — li diris. — Aŭ la trezoro koleros. Nun ni reiros, supren laŭ la fluo. Iru, iru, vi iru antaŭe!

Golumo antaŭen rampis apud la rando dum kelka tempeto, snufante kaj suspekteme. Baldaŭ li haltis kaj levis la kapon.

— Iu ĉeestas! Ne hobito. — Subite li retroturniĝis. Verda lumo flagris en liaj ŝvelaj okuloj. — Masstro, masstro! — li siblis. — Misa! Trompa! Falsa! — Li kraĉis kaj etendis siajn longajn brakojn kun blankaj klakantaj fingroj.

Tiumomente la granda nigra figuro de Anborno baŭmis post li kaj falis sur lin. Granda forta mano kaptis lian nukon kaj fikstennis lin. Li ĉirkaŭtordiĝis fulme, tute malseka kaj ŝlima, tordiĝante angilece, mordante kaj gratante kvazaŭ kato. Sed du pliaj homoj venis el la ombroj.

— Senmoviĝu! — diris unu. — Aŭ ni trapikos vin multplingle kiel erinaco. Senmoviĝu!

Golumo malrigidiĝis kaj komencis krii kaj plori. Ili ligis lin, ne tre malsovaĝe.

— Malkrude, malkrude! — diris Frodo. — Li ne havas forton por egali vin. Ne dolorigu lin, se vi povas tion eviti. Li pli kvietos tiakondiĉe. Smeagolo! Ili ne dolorigos vin. Mi akompanos vin, kaj neniu difekto trafos vin. Krom se ankaŭ min oni mortigos. Fidu la mastron.

Golumo turniĝis kaj kraĉis al li. La homoj levis lin, kovris liajn okulojn per kapuĉo kaj forportis lin.

Frodo sekvis ilin, sentante sin tre malfeliĉa. Ili trairis la aperturon malantaŭ la arbustoj, kaj reen, malsupren laŭ la ŝtuparoj kaj koridoroj, en la kavernon. Du-tri torĉoj estis fajrigitaj. Viroj ekmoviĝis, Sam estis tie, kaj li direktis strangan rigardon al la malrigida bulaĵo, kiun portis la homoj.

— Ĉu kaptis lin? — li diris al Frodo.

— Jes. Nu ne, mi ne kaptis lin. Li venis al mi, ĉar komence li fidis min, mi timas. Mi ne volis lin ligita tiamaniere. Mi esperas, ke estos en ordo; sed mi malamas la tutan aferon.

— Ankaŭ mi, — diris Sam. — Kaj nenio estos iam en ordo, kie troviĝas tiu peco da mizero.

Venis homo kaj fingrovokis la hobitojn kaj kondukis ilin al la alkovo en la fundo de l' kaverno. Faramiro sidis tie sur sia seĝo, kaj la lampo estis relumigita en la niĉo super lia kapo. Li mansignis, ke ili sidiĝu sur la taburetoj apud li.

— Alportu vinon por la gastoj, — li diris. — Kaj konduku al mi la kaptiton.

La vino estis alportita, kaj poste Anborno venis portante Golumon. Li forigis la kovrilon de l' kapo de Golumo kaj starigis lin surpiede, starante malantaŭ li por subteni lin. Golumo palpebrumis, kaŝante la malicon en siaj okuloj per ties pezaj palaj palpebroj. Kiel tre mizera kreaĵo li aspektis, gutanta kaj humidaĉa, odorante je fiŝoj (li ankoraŭ tenis fiŝon en la mano); liaj maldensaj bukloj pendis kvazaŭ fetoraj fihferoj sur la osteca brovo, lia mano mukis.

— Malligu nin! Malligu nin! — li diris. — La ŝnuro dolorigas nin, jes, dolorigas, jes dolorigas nin, kaj ni faris nenion.

— Ĉu nenion? — diris Faramiro, rigardante la mizerulon kun akra gvatemo, sed sen vizaĝesprimo, ĉu kolera, ĉu kompata, ĉu miranta. — Ĉu nenion? Ĉu vi neniam faris ion meritantan ligadon aŭ pli severan punon? Tamen ne mi tion devas prijuĝi, feliĉe. Sed hodiaŭ nokte vi venis tien, kie alveno meritas morton. La fiŝoj en tiu lageto estas aĉetataj multekoste.

Golumo lasis fali el la mano la fiŝon.

— Ne volas fiŝon, — li diris.

— La prezo ne rilatas al la fiŝo. Nur alveni ĉi tien kaj rigardi la lageton meritas mortpunon. Mi indulgis vin ĝis nun pro la peto de tiu ĉi Frodo, kiu diras, ke almenaŭ de li vi meritas iom da danko. Sed ankaŭ min vi devas kontentigi. Kiel vi nomiĝas? De kie vi venis? kaj kien vi iros? Kio estas via afero?

— Ni estas perditaj, perditaj, — diris Golumo. — Neniu nomo, neniu afero, neniu Trezoro, nenio. Nur malpleno. Nur malsato; jes, ni malsatas. Kelkaj fiŝetoj, aĉaj ostecaj fiŝetoj, por kompatindulo, kaj oni diras morton. Tiom saĝaj ili estas, tiom justaj, tiom justegaj.

— Ne tre saĝaj, — diris Faramiro. — Sed justaj: jes eble, tiel justaj kiel permesas nia malgranda saĝo. Malligu lin, Frodo!

Faramiro prenis el sia zono tranĉileton kaj transdonis ĝin al Frodo. Golumo, miskompreninte la geston, kriĉis kaj falis.

— Nun, Smeagolo! — diris Frodo. — Vi devas fidi al mi. Mi ne forlasos vin. Respondu verece, se vi kapablas. Tio kaŭzos al vi bonon, ne malbonon. — Li tranĉis la ŝnurojn sur la manradikoj kaj maleoloj de Golumo kaj restarigis lin.

— Venu ĉi tien! — diris Faramiro. — Rigardu min! Ĉu vi konas la nomon de tiu ĉi loko? Ĉu vi estis ĉi tie antaŭe?

Malrapide Golumo levis siajn okulojn kaj malvolonte rigardis tiujn de Faramiro. La tuta lumo forlasis ilin, kaj ili rigardis morne kaj pale dum momento la klarajn senŝancelajn okulojn de la gondorano. Sekvis senmova silento. Tiam Golumo mallevis sian kapon kaj ŝrumpis suben, ĝis li kaŭris sur la planko, tremante.

— Ni ne scias, kaj ni ne deziras scii, — li plorkriis. — Neniam venis ĉi tien, neniam denove venos.

— En via menso estas ŝlositaj pordoj kaj fermitaj fenestroj, kaj malantaŭ ili mallumaj ĉambroj, — diris Faramiro. — Sed pri tio ĉi mi juĝas, ke vi diras veron. Tio bone servas vin. Kian ĵuron vi ĵuros, ke vi

neniam revenos; kaj neniam gvidos iun ajn vivanton ĉi tien per vortoj aŭ signoj?

— La mastro scias, — diris Golumo flanken rigardante al Frodo. — Jes, li scias. Ni promesos al la mastro, se li savos nin. Ni promesos al Ĝi, jes. — Li rampis ĝis la piedoj de Frodo kaj plorĝemis. — Savu min, afabla mastro! Smeagolo promesas al la Trezoro, promesas fideinde. Neniam venos denove, neniam parolos, ne, neniam!

— Ĉu vi estas kontenta? — diris Faramiro.

— Jes, — diris Frodo. — Nome, vi devos aŭ akcepti tiun promeson aŭ plenumi vian leĝon. Nenion pli vi ricevos. Sed mi promesis, ke se li venus al mi, li ne estus difektita. Kaj mi ne volus pruviĝi nefidinda.

Faramiro sidis momente pensante.

— Bone, — li diris fine. — Mi cedas vin al via mastro, al Frodo, filo de Drogo. Li deklaru, kion li faros pri vi!

— Sed, mastro Faramiro, — diris Frodo riverencante, — vi ankoraŭ ne deklaris vian intencon rilate al la nomita Frodo, kaj ĝis tio estos konata, li ne povos formi siajn planojn por si aŭ siaj kunuloj. Via juĝo estis prokrastita ĝis la mateno, sed tiu jam aktualas.

— Do mi deklaras mian juĝon, — diris Faramiro. — Rilate vin, Frodo, tiomgrade kiom mi rajtas sub aŭtoritato pli alta, mi deklaras vin libera en la regno de Gondoro ĝis la plej fora el ĝiaj antikvaj limoj; escepte nur ke nek vi nek iu ajn via akompananto havas permeson veni al tiu ĉi loko neinvitite. Tiu ĉi juĝo daŭros dum unu jaro plus unu tago, kaj tiam ĉesos, krom se antaŭ tiu limdato vi venos al Minaso Tirit kaj prezentos vin al la Mastro kaj Reganto de la Urbo. Tiam mi petos lin konfirmi tion, kion mi faris, kaj igi ĝin tutviva. Dume, iu ajn, kiun vi protektas, estos mia protektato kaj sub la ŝildo de Gondoro. Ĉu al vi estas respondite?

Frodo profunde riverencis.

— Al mi estas respondite, kaj mi deklaras min preta vin servi, se tio iel valoras al iu tiel alta kaj honorinda.

— Ĝi multe valoras, — diris Faramiro. — Kaj nun, ĉu vi prenas tiun ulon, tiun Smeagolon, sub vian protekton?

— Mi jes prenas Smeagolon sub mian protekton, — diris Frodo.

Sam suspiris aŭdeble; kaj ne pro la ĝentilaĵoj, kiujn li, samkiel iu ajn hobito, tute aprobis. Efektive, en la Provinco tia afero postulus multe pli da vortoj kaj riverencoj.

— Do mi diras al vi, — diris Faramiro, sin turnante al Golumo, —

vi estas mortkondamnita; sed dum vi akompanas Frodon vi estas eksterdanĝera rilate nin. Tamen se iam vi estos trovita de ajna homo el Gondoro vaganta sen li, la kondamno eble efektiviĝos. Kaj morto trovi vin rapide, ĉu en ĉu ekster Gondoro, se vi ne servos lin bone. Nun respondu al mi: kien vi volas iri? Li diras, ke vi estis lia gvidanto. Kien vi gvidis lin?

Golumo ne respondis.

— Pri tio mi ne permesas sekretecon, — diris Faramiro. — Respondu, aŭ mi ŝanĝos mian verdikton!

Golumo daŭre silentis.

— Mi respondos anstataŭ li, — diris Frodo. — Li gvidis min ĝis la Nigra Pordego, laŭ mia peto; sed ĝi estis netrapasebla.

— Ne ekzistas aperta pordo en la Sennomano Landon, — diris Faramiro.

— Vidinte tion, ni turniĝis flanken kaj venis laŭ la suda vojo, — Frodo daŭrigis, — ĉar li diris, ke estas, aŭ eble estas, pado proksime al Minaso Itil.

— Minaso Morgul, — diris Faramiro.

— Mi ne scias precize, — diris Frodo; — sed la pado supreniras, laŭ mia opinio, en la montaron ĉe la norda flanko de tiu valo, en kiu staras la malnova urbo. Ĝi supreniras ĝis alta fendaĵo kaj poste suben ĝis... tio, kio estas pretere.

— Ĉu vi konas la nomon de tiu alta pasejo? — demandis Faramiro.

— Ne, — diris Frodo.

— Ĝi nomiĝas Cirito Ungol. — Golumo siblis akre kaj komencis murmuri al si. — Ĉu ne tiel ĝi nomiĝas? — diris Faramiro, sin turnante al li.

— Ne! — diris Golumo, kaj poste li kriĉis, kvazaŭ io pikus lin. — Jes, jes, ni aŭdis unufoje tiun nomon. Sed kiel gravas al ni la nomo? La mastro diras, ke li devas eniri. Do ni devas provi alian vojon. Ne ekzistas alia provebla vojo, ne.

— Ĉu neniu alia vojo? — diris Faramiro. — Kiel vi scias tion? Kaj kiu esploris la tuton de tiu malhela regno? — Li rigardis longe kaj penseme Golumon. Baldaŭ li parolis denove. — Forkonduku tiun ĉi kreaĵon, Anbornon. Traktu lin milde, sed atentu lin. Kaj vi, Smeagolo, ne provu plonĝi en la akvofalon. Tie la rokoj havas tiajn dentojn, kiaj mortigos vin antaŭtempe. Jam lasu nin kaj kunprenu vian fiŝon.

Anbornon eliris, kaj Golumo iris antaŭ li kuntiriĝante. La kurtenon oni tiris trans la alkovon.

— Frodo, ŝajnas al mi, ke vi agas tre malprudente en tio ĉi, — diris Faramiro. — Mi opinias, ke vi ne iru kun tiu kreaĵo. Ĝi estas misega.

— Ne, ne komplete misega, — diris Frodo.

— Eble ne tute, — diris Faramiro, — sed malico mordas ĝin kance-re, kaj la miseco kreskas. Li gvidos vin al nenio bona. Se vi disiĝos de li, mi donos al li sendanĝeran vojon kaj gvidadon al iu ajn punkto ĉe-lime de Gondoro laŭ lia elekto.

— Li tion ne akceptos, — diris Frodo. — Li sekvos nin, kiel li jam longe faris. Kaj mi multfoje promesis protekti lin kaj iri tien, kien li gvidos. Vi ne petos min agi pri li kontraŭpromese, ĉu?

— Ne, — diris Faramiro. — Sed tion petus mia koro. Ĉar ŝajnas malpli malbone konsili al alia persono perfidi sian vorton ol tion fari mem, precipe se oni vidas amikon celanta al propra misfortuno. Sed ne, se li insistas iri kun vi, vi devos jam toleri lin. Sed ŝajnas al mi, ke vi ne estas devigita iri al Cirito Ungol, pri kiu li rakontis al vi malpli, ol li scias. Tion mi klare perceptis en lia menso. Ne iru al Cirito Ungol!

— Kien do mi iru? — demandis Frodo. — Ĉu reen al la Nigra Pordego por transdoni min al la gardistaro? Kion vi scias kontraŭ tiu loko, kio igas ĝian nomon terura?

— Nenion certan, — diris Faramiro. — Ni en Gondoro neniam pasas orienten de la Vojo nuntempe, kaj neniu el ni, pli junaj homoj, iam ajn faris tion, kiel ankaŭ neniu el ni surpaŝis la Montojn de l' Ombro. Pri ili ni konas nur malnovajn raportojn kaj la onidirojn de l' antaŭa epoko. Sed iu malhela terurajo loĝas en la pasejoj super Minaso Morgul. Se Cirito Ungol estas nomata, maljunuloj kaj kleruloj paliĝas kaj silentiĝas. La valo de Minaso Morgul maliciĝis antaŭ tre longe, kaj ĝi jam estis minaco kaj timigo, kiam la forpelita Malamiko ankoraŭ loĝis malproksime, kaj Itilio estis ankoraŭ plejparte sub nia regado. Kiel vi scias, tiu urbo estis iam fortikaĵo, fieraj kaj bela, Minaso Itil, ĝemelo de nia propra urbo. Sed ĝi estis kaptita de krueluloj, kiujn la Malamiko en sia freŝa forto dominis, kaj kiuj vagis senhejme kaj senmastre post lia malvenko. Oni diras, ke iliaj estroj estis homoj el Numenoro, kiuj fariĝis malhele misfaraj; al ili la Malamiko donis potencringojn, kaj li voris ilin: vivaj fantomoj ili fariĝis, teruraj kaj malicegaj. Post lia foriro ili kaptis Minason Itil kaj ekloĝis tie, kaj ili plenigis ĝin kaj la tutan ĉirkaŭan valon je putro: ĝi ŝajnis senhoma kaj ne estis tia, ĉar senforma timo estadis malantaŭ la ruinigitaj muroj. Naŭ princoj estis, kaj post la reveno de ilia mastro, kiun ili helpis kaj preparis sekrete, ili iĝis denove fortaj. Tiam la Naŭ Rajdantoj eliris el

la pordego de hororo, kaj ni ne povis kontraŭstari ilin. Ne proksimiĝu al ilia citadelo. Oni rimarkos vin. Ĝi estas loko de sendorma malico, plena de senpalpebraj okuloj. Ne iru laŭ tiu vojo!

— Sed kien krome vi direktos min? — diris Frodo. — Vi mem ne povas, vi diras, gvidi min al la montoj, ankaŭ ne trans ilin. Sed trans la montojn mi celas, pro solena promeso al la Konsilio, por trovi vojon aŭ pereji dumserĉe. Kaj se mi retroirus, rifuzante la vojon je la amara fino, kien do mi irus inter elfoj kaj homoj? Ĉu vi volas, ke mi venu al Gondoro kun tiu ĉi Aĵo, tiu Aĵo, kiu frenezigis vian fraton per deziro? Kian sorĉon ĝi plenumus en Minaso Tirit? Ĉu estu du urboj Minaso Morgul, rikanante unu la alian trans morta lando plena je putriĝo?

— Tion mi ne volas, — diris Faramiro.

— Do kion vi volas, ke mi faru?

— Mi ne scias. Tamen mi ne volas, ke vi iru al morto aŭ al turmentado. Kaj mi ne opinias, ke Mitrandiro elektus tiun vojon.

— Sed ĉar li jam foriris, mi devas sekvi tiajn vojojn, kiajn mi trovas. Kaj mankas tempo por longa serĉado, — diris Frodo.

— Dura sorto kaj senespera komisio, — diris Faramiro. — Sed almenaŭ memoru mian averton: gardu vin de tiu gvidonto, Smeagolo. Li antaŭe kulpis murdon. Tion mi legas en li. — Li ĝemspiris. — Nu, do ni renkontiĝis kaj disiĝos, Frodo, filo de Drogo. Al vi ne necesas molaj vortoj: mi ne esperas revidi vin je ajna alia tago sub tiu ĉi suno. Sed vi foriros kun mia beno al vi kaj al via tuta popolo. Ripozu iom, dum manĝaĵo estas preparata por vi. Mi volonte ekscius, kiel tiu rampa Smeagolo ekposedis tiun Aĵon, pri kiu ni parolas, kaj kiel li perdis ĝin, sed mi ne ĝenos vin nun. Se iam preterespere vi revenos al la landoj de l' vivantoj, kaj ni rerakontos niajn historiojn, sidante apud muro sub la suno, ridante pri malnovaj zorgoj, tiam vi rakontos al mi. Ĝis tiam, aŭ alia okazo ekster la vidkapablo de la Aŭgur-ŝtonoj de Numenoro, adiaŭ!

Li stariĝis kaj profunde riverencis al Frodo, kaj tirinte la kurtenon forpaŝis en la kavernon.

Ĉapitro 7

VOJAĜO AL LA KRUCVOJO

Frodo kaj Sam reiris al siaj litoj kaj kuŝis tie en silento ripozante dum iom da tempo, dum homoj ekaktivis kaj komenciĝis la aferoj de la tago. Post kelka tempo akvo estis alportita al ili, kaj poste oni kondukis ilin al tablo, sur kiu estis manĝaĵo por tri. Faramiro matenmanĝis kun ili. Li ne dormis deŝta la batalo de l' antaŭa tago, tamen li ne aspektis laca.

Finmanĝinte ili stariĝis.

— Ke neniu malsato ĝenu vin survoje, — diris Faramiro. — Vi havas malmultan provianton, sed mi ordonis, ke stoketon da nutraĵo konvena por vojaĝantoj oni metu en viajn tornistrojn. Ne mankos al vi akvo dum vi vojaĝos en Itilio, sed ne trinku el iu ajn roĵo, kiu fluas de Imlado Morgul, la Valo de Dumviva Morto. Ankaŭ jenon mi devas diri al vi. Miaj skoltoj kaj vaĉantoj jam ĉiuj revenis, eĉ kelkaj kiuj ŝteliris al viddistanco de Moranono. Ĉiuj trovis strangaĵon. La tereno estas malplena. Nenio estas sur la vojo, kaj nenie aŭdiĝas bruoj de piedoj, kornoj, aŭ pafarkaj ŝnuretoj. Atendema silento ŝvebas super la Sennoma Lando. Mi ne scias, kion tio aŭguras. Sed la tempo rapidas al iu granda konkludo. Ŝtormo venas. Rapidu, dum vi povas! Se vi estas pretaj, ni iru. La suno baldaŭ leviĝos super la ombraĵo.

La tornistroj de l' hobitoj estis alportitaj (iom pli pezaj ol antaŭe), kaj ankaŭ du fortaj bastonoj el polurita ligno, ferpintaj kaj kun ĉizitaj supraĵoj, tra kiuj estis treditaj plektitaj ledaj ŝnuroj.

— Mankas al mi taŭgaj donacoj por vi forirantaj, — diris Faramiro; — sed akceptu tiujn ĉi bastonojn. Ili eble servos al tiuj, kiuj marŝas aŭ grimpas en la sovaĝejo. La homoj de l' Blankaj Montoj uzas ilin; tamen ĉi tiuj estas mallongigitaj al via mezuro kaj estas nove ferpintitaj. Ili estas faritaj el la bela arbo *lebetrono*, amata de la lignometiistoj de Gondoro, kaj ili estas sorĉitaj por trovo kaj redono. Ke tiu sorĉo ne tute velku sub la Ombro, en kiun vi iros!

La hobitoj profunde riverencis.

— Plej bonkora gastiginto, — diris Frodo, — Duonelfo Elrondo

diris al mi, ke survoje mi trovos amikecon, sekretan kaj neatenditan. Certe mi atendis nenioman amikecon tiom, kiom vi montris. Trovi ĝin ege rebonigas la mison.

Nun ili pretigis sin por foriro. Golumon oni kondukis el iu angulo aŭ kaŝejo, kaj li ŝajnis pli kontenta pri si ol li estis antaŭe, kvankam li restis proksima al Frodo kaj evitis la rigardon de Faramiro.

— Via gvidisto devas esti blindumita, — diris Faramiro, — sed vin kaj vian serviston Samsaĝo mi liberigas de tio, se vi volas.

Golumo kriĉis, tordiĝis kaj kroĉiĝis al Frodo, kiam oni venis kovri liajn okulojn; kaj Frodo diris:

— Blindumu ĉiujn tri el ni, kaj kovru unuavice miajn okulojn, kaj tiam eble li konstatos, ke damaĝi ne estas la intenco.

Tion oni faris, kaj oni kondukis ilin el la kaverno de Heneto Anun. Trapasinte la koridorojn kaj ŝtuparojn ili sentis la friskan matenan aeron, freŝan kaj dolĉan, ĉirkaŭ si. Ankoraŭ blindumite ili pluiris dum kelka tempo, supren kaj poste malkrute suben. Fine la voĉo de Faramiro ordonis, ke ili estu malblindumitaj.

Ili staris denove sub la branĉoj de arbaro. Neniu bruo de la akvofalo estis aŭdebla, ĉar longa sudenira deklivo nun kuŝis inter ili kaj la ravineto, en kiu fluis la rojo. Okcidente ili vidis lumon trans la arboj, kvazaŭ la mondo tie finiĝus subite, ĉe rando elrigardanta nur al la ĉielo.

— Ĉi tie estas la lasta disiĝo de niaj vojoj, — diris Faramiro. — Se vi akceptos mian konsilon, vi ankoraŭ ne turniĝos orienten. Iru rekte antaŭen, ĉar tiel vi disponos dum multaj mejloj la kaŝon de la arbaro. Okcidente de vi estas rando, kie la tereno descendas en la grandajn valojn, jen subite kaj krute, jen laŭ longaj montflankoj. Restu proksime al tiu rando kaj la limoj de l' arbarego. Komence de via vojaĝo vi povos marŝi sub taglumo, laŭ mia opinio. La lando sonĝas en falsa paco, kaj provizore ĉio misa estas forigita. Fartu bone, dum tio eblas!

Li brakumis tiam la hobitojn, laŭ la maniero de sia popolo, kliniĝante kaj metante siajn manojn sur iliajn ŝultrojn kaj kisante iliajn fruntojn.

— Iru kun la bonvolo de ĉiuj bonuloj! — li diris.

Ili riverencis ĝis la tero. Poste li turnis sin kaj sen retrorigardi li forlasis ilin kaj iris al siaj du gardantoj, kiuj staris iomete for. Ili miris vidante kiel rapide jam moviĝis tiuj verde vestitaj homoj, malaperante preskaŭ en palpebruma daŭro. La arbaro tie, kie staris Faramiro, ŝajnis malplena kaj morna, kvazaŭ forpasus sonĝo.

Frodo suspiris kaj returniĝis suden. Kvazaŭ por signali sian malatenton pri tiaj ĝentilaĵoj, Golumo gratfosis en la humo sube de arbo. “Ĉu denove malsata? — pensis Sam. — Nu, jen ek denove!”

— Ĉu finfine ili foriris? — demandis Golumo. — Fiaj missfaraj homoj! La nuko de Smeagolo daŭre dolorigas lin, jes efektive. Ni iru!

— Jes, ni iru, — diris Frodo. — Sed se vi kapablas paroli nur mise pri tiuj, kiuj indulgis vin, prefere silentu!

— Afabla mastro! — diris Golumo. — Smeagolo nur ŝercis. Ĉiam pardonas efektive, jes, jes, eĉ la truketojn de l' afabla mastro. Ho jes, afabla mastro, afabla Smeagolo!

Frodo kaj Sam ne respondis. Surdorsiginte siajn tornistrojn kaj preninte siajn bastonojn, ili pluiris en la arbarojn de Itilio.

Tiutage ili dufoje ripozis kaj manĝis iomete el la nutraĵo provizita de Faramiro: sekigitaj fruktoj kaj salita viando, sufiĉe por multaj tagoj; kaj sufiĉe da pano por manĝo dum ĝi ankoraŭ freŝis. Golumo manĝis nenion.

La suno leviĝis kaj pasis supre nevidate, kaj komencis malsupreniri, kaj la lumo tra la arboj okcidente iĝis ora; kaj ĉiam ili marŝis en friska verda ombro, kaj ĉie ĉirkaŭ ili estis silento. Ĉiuj birdoj ŝajnis forflugintaj aŭ mutiĝintaj. Mallumo venis frue en la silenta arbaro, kaj antaŭ la noktiĝo ili haltis, lacaj, ĉar ili marŝis sep leŭgojn aŭ pli de Heneto Anun. Frodo kuŝiĝis kaj fordormis la nokton sur la profunda humo sub antikva arbo. Sam apud li estis malpli trankvila: li vekigis multfoje, sed neniam vidiĝis Golumo, kiu forŝteliĝis tuj, kiam la aliaj ekriipozis. Ĉu li dormis izole en iu apuda truo, aŭ vagadis senripoze ŝtelire tra la nokto, tion li ne diris; sed li revenis ĉe la unua ekbrilo de taglumo, kaj vekis siajn kunulojn.

— Necesas stariĝi, jes necesas! — li diris. — Longdistanco ankoraŭ irenda, suden kaj orienten. La hobitoj devas rapidi!

Tiu tago pasis pli-malpli simile al la antaŭa tago, krom ke la silento ŝajnis pli profunda; la aero peziĝis, kaj komencis esti sufoke sub la arboj. Sentiĝis kvazaŭ tondro pretiĝus. Golumo ofte paŭzis, snufante la aeron, kaj poste li murmuradis al si kaj urĝis ilin pli rapidi.

Fine de la tria stadio de ilia taga marŝo, kiam la posttagmezo ekvelkis, la arbaro apertiĝis, kaj la arboj iĝis pli grandaj kaj pli disigitaj. Grandaj ileksoj kun ega ĉirkaŭmezuro staris malhelaj kaj solenaj en larĝaj maldensejoj, kun jen kaj jen inter ili fraksenoj aĝoblankaj, kaj gigantaj kverkoj ĝuste elpuŝantaj siajn brunverdajn sprosojn.

Ĉirkaŭ tiuj etendiĝis longaj gazonoj da verda herbo makulitaj je keli-donioj kaj anemonoj, blankaj kaj bluaj, nun falditaj por dormo; kaj estis akreoj plenplenaj je l' folioj de arbaraj hiacintoj: jam ties glataj sonoriltigoj trapuŝis sin tra la humo. Neniu vivanto, ĉu besta ĉu birda, estis videbla, sed en tiuj apertaj lokoj Golumo ektimis, kaj ili marŝis nun singarde, hastante de unu longa ombro al alia.

La lumo rapide velkis, kiam ili alvenis la arbarofinon. Tie ili sidiĝis sub maljuna tuberoza kverko, kiu sendis siajn radikojn tordiĝantajn kiel serpentoj suben laŭ diseriĝa teramaso. Antaŭ ili kuŝis profunda malklara valo. Aliflanke la arbaro denove densiĝis, blua kaj griza sub la malvigla vespero, kaj marŝis plu suden. Dekstre ardis la Montoj de Gondoro, forege en la okcidento, sub fajrmakula ĉielo. Maldekstre kuŝis mallumo: la altegaj muroj de Mordoro; kaj el tiu mallumo venis la longa valo, subiranta laŭ fendaĵo ĉiam pli larĝa al Anduino. Ĉe ties fundo fluis hasta rivereto: Frodo povis aŭdi ties ŝtonozan voĉon supreniĝanta tra l' silento; kaj apude sur la proksima flanko, vojo serpentumis suben kvazaŭ pala rubando, malsupren al malvarmaj grizaj nebuletoj, kiujn tuŝis neniu ekbrilo de sunsubiro. Tie ŝajnis al Frodo, ke li vidas malproksime, flosantaj kvazaŭ sur ombreca maro, la altajn malklarajn pintojn kaj rompitaĵajn pinaklojn de malnovaj turoj forlasitaj kaj malhelaj.

Li turniĝis al Golumo.

— Ĉu vi scias, kie ni estas?

— Jes, mastro. Lokoj danĝeraj. Tio estas la vojo de la Turego de la Luno, mastro, malsupren ĝis la ruiniĝinta urbo sur la bordoj de l' rivero. La ruiniĝinta urbo, jes, loko tre fia, plena de malamikoj. Ni devis ne akcepti la konsilon de la homoj. La hobitoj deviis longe de l' ĝusta vojo. Necesas iri jam orienten, tien supre. — Li gestis per sia maldikega brako al la malhelaj montoj. — Kaj ni ne povas uzi ĉi tiun vojon. Ho ne! Krueuloj venas ĉi-voje, suben de la Turego.

Frodo rigardis malsupren al la vojo. Ĉiuokaze nenio moviĝis sur ĝi nuntempe. Ĝi aspektis soleca kaj forlasita, fluanta suben al la malplenaj ruinaĵoj en la nebuleto. Sed en la aero estis sento malica, kvazaŭ efektive tien-reen pasus aĵoj, kiujn okuloj ne povas vidi. Frodo ekstre-egis ree rigardante al la foraj pinakloj, jam malaperantaj en la nokton, kaj la bruo de la akvo ŝajnis malvarma kaj kruela: la voĉo de Morgulduino, la poluita roĵo, kiu fluis el la Valo de la Fantomoj.

— Kion ni faru? — li diris. — Ni marŝis longe kaj diste. Ĉu ni serĉu iun lokon en la arbaro, kie ni povos kuŝi kaŝite?

— Ne valoras kaŝiĝi en la mallumo, — diris Golumo. — Ĝuste tage la hobitoj devos kaŝiĝi, jes tage.

— Ho ne! — diris Sam. — Ni devas ripozi iomete, eĉ se ni leviĝos ree meznokte. Tiam restos ankoraŭ horoj da mallumo, sufiĉe da tempo por ke vi konduku nin dum longa marŝo, se vi konas la vojon.

Golumo malvolonte konsentis, kaj li returniĝis al la arboj, celante orienten dum kelka tempo laŭlonge de la ĉifonaj arbarorandoj. Li rifuzis ripozi sur la tero tiel proksime al la malica vojo, kaj post kelka debato ili ĉiuj grimpis al la disbranĉiĝo de granda verda kverko, kies dikaj branĉoj kune saltantaj de la trunko liveris konvenan kaŝlokon kaj sufiĉe komfortan rifuĝejon. Noktiĝis kaj fariĝis tute senlume sub la baldakeno de la arbo. Frodo kaj Sam trinkis iomete da akvo kaj manĝis iom da pano kaj sekigitaj fruktoj, sed Golumo tuj kuntiriĝis kaj ekdormis. La hobitoj ne fermis siajn okulojn.

Verŝajne estis iom post la noktomezo, kiam Golumo vekigis: ili subite konsciiĝis pri liaj palaj okuloj senpalpebre brilantaj al ili. Li aŭskultis kaj snufis, kio ŝajnis, kiel ili pli frue konstatis, lia kutima metodo malkovri la horon de la nokto.

— Ĉu ni ripozis? Ĉu ni bele dormis? — li diris. — Ni iru!

— Nek tio, kaj nek alio, — graŭlis Sam. — Sed ni iros se necese.

Golumo tuj desaltis de la arbobranĉoj kvarpieden, kaj la hobitoj sekvis pli malrapide.

Tuj kiam ili descendis, ili ree pluiris gvidate de Golumo, orienten, supren laŭ la malhela dekliva tereno. Malmulton ili povis vidi, ĉar la nokto estis nun tiel profunda, ke ili apenaŭ konsciis pri la tigoj de l' arboj antaŭ ol stumbli kontraŭ ilin. La tero iĝis pli malglata kaj marŝado estis pli malfacila, sed Golumo ŝajnis neniel ĝenata. Li kondukis ilin tra densejoj kaj rubusdezertoj; foje ĉirkaŭ la randon de profunda fendaĵo aŭ malhela ŝakto, foje suben en nigrajn arbustkaŝitajn kavojn kaj denove elen; sed kiam foje ili iris iomete suben, ĉiam la aliflanka deklivo estis pli longa kaj pli kruta. Ili daŭre supreniris. Ĉe la unua haltejo ili retrorigardis, kaj ili povis malklare percepti la supraĵojn de l' arbaro, kiun ili postlasis, kuŝantaj kiel vasta densa ombro, nokton pli malhelan sub la malhela malplena ĉielo. Ŝajnis troviĝi granda nigreco baŭmanta malrapide el la oriento vorante la malfortajn malklarajn stelojn. Pli poste la sinka luno eskapis el la ĉasantaj nuboj, sed ĝin ĉirkaŭringis malsaneca flava helo.

Finfine Golumo turnis sin al la hobitoj.

— Tago baldaŭ, — li diris. — La hobitoj devas hasti. Ne sendanĝeras resti ekstersirme en tiuj ĉi lokoj. Hastu!

Li rapidigis siajn paŝojn, kaj ili sekvis lin lace. Baldaŭ ili komencis suprengrimpĵi sur grandan teramason. Plejparte ĝin kovris densa kreskaĵo de uleksoj kaj mirteloj, kaj malaltaj fortikaj dornejoj, kvankam ie-tie apertis maldensejoj, cikatroj de lastatempaj fajroj. La uleksoj plioftiĝis ju pli ili proksimiĝis al la suprejo; tre maljunaj kaj altaj ili estis, magraj kaj krurecaj sube sed dikaj supre, kaj jam elmetis flavajn florojn, kiuj ekbriletis en la mallumo kaj dissendis malfortan dolĉan odoron. Tiom altaj estis la pikaj densejoj, ke la hobitoj povis marŝi senkliniĝe sub ili, trapasante longajn sekajn koridorojn tapiŝitajn de profunda pika humo.

Ĉe la fora rando de tiu ĉi teramaso ili ĉesigis sian marŝadon kaj rampis kaŝiĝe sub implikitan nadaĵon de dornoj. Iliaj torditaj branĉoj, kliniĝantaj al la tero, estis superŝutitaj de grimpa labirinto da maljunaj sovaĝaj rozujoj. En la profunda interno troviĝis kavo, kun traboj el mortaj branĉoj kaj rubusoj, kaj tegmentita de l' unuaj folioj kaj sprosoj de l' printempo. Tie ili kuŝis kelkan tempon, ankoraŭ tro lacaj por manĝi; kaj trarigardante la truojn en la kovraĵo ili atendis la malrapidan tagiĝon.

Sed tago ne venis, nur morta bruna krepusko. En la oriento estis malhela ruĝa ardo sub la malalta nubaro: tio ne estis ruĝo aŭrora. Trans la dissternitaj terenoj interaj, la montoj de Efelo Duad malsere ne rigardis al ili, nigraj kaj senformaj sube, kie la nokto densis kaj ne forpasis, dum supre la dentecaj pintoj kaj eĝoj siluetis dure kaj minace antaŭ la fajra ardo. Fore dekstre elstaris granda ŝultro de la montaro, malhela kaj nigra inter la ombroj, puŝiĝante okcidenten.

— Laŭ kiu vojo ni iros de ĉi tie? — demandis Frodo. — Ĉu tio estas la enirejo de... de la Morgula Valo, tie malproksime post tiu nigra maso?

— Ĉu necesas jam pensi pri tio? — diris Sam. — Verŝajne ni ne plu moviĝos dum la nuna tago, se entute temas pri tago, ĉu?

— Eble ne, eble ne, — diris Golumo. — Sed ni devos baldaŭ iri al la Krucvojo. Jes, al la Krucvojo. Jen tie estas la vojo, jes, mastro.

La ruĝa ardo super Mordoro formortis. La krepusko profundiĝis, dum grandaj vaporoj leviĝis en la oriento kaj rampis super ili. Frodo kaj Sam manĝis iomete kaj poste kuŝiĝis, sed Golumo estis malripozema. Li rifuzis manĝi el ilia nutraĵo, sed li trinkis iomete da akvo kaj

poste ĉirkaŭrampadis sub la arbustoj, snufante kaj murmurante. Poste subite li malaperis.

— Iras ĉasi, supozeble, — diris Sam kaj oscedis. Estis lia vico dormi la unua, kaj li baldaŭ profundigis en sonĝon. Li supozis sin denove en la Bag-Enda ĝardeno serĉante ion; sed sur lia dorso estis peza tornistro, kiu devigis lin kliniĝi. Ĉio ŝajnis tute loloplena kaj fetora, kaj dornoj kaj filikoj invadas la bedojn proksime al la malsupra heĝo. “Tasko por mi, mi tion vidas; sed mi tiom lacas, — li ripetadis. Baldaŭ li rememoris, kion li serĉas. — Mia pipo!” — li diris, kaj ĝuste tiam li vekigis.

— Stultulo! — li diris al si, malfermante siajn okulojn kaj scivolante, kial li kuŝas sub la heĝo. — Ĝi estas en via tornistro la tutan tempon! — Poste li konstatis, unue, ke la pipo eble troviĝas en lia tornistro, sed pipherbon li malhavas, kaj poste ke li estas centojn da mejloj de Bag-Endo. Li sidiĝis rekte. Ŝajnis preskaŭ mallume. Kial lia mastro permesis, ke li pludormu ekstervice, plu ĝis la vespero?

— Ĉu vi ne dormis, sinjoro Frodo? — li diris. — Kioma horo estas? Ŝajnas malfrue!

— Ne tiel, — diris Frodo. — Sed la tago malheliĝis anstataŭ heliĝi: pli kaj pli malheliĝas. Laŭ mia scio ankoraŭ ne estas tagmezo, kaj vi dormis nur ĉirkaŭ tri horojn.

— Kio okazas, mi scivolas? — diris Sam. — Ĉu ŝtormo venas? Se jes, ĝi estos la plej terura iam spertita. Mi volas, ke ni estu en profunda truo, ne nur haltigitaj sub heĝo. — Li aŭskultis. — Kio estas tio? Ĉu tondro, tamburoj, aŭ kio ĝi estas?

— Mi ne scias, — diris Frodo. — Ĝi daŭras jam sufiĉe longe. Foje la tero ŝajnas tremo, foje ŝajnas, ke tio estas batado de la peza aero en l' oreloj.

Sam ĉirkaŭrigardis.

— Kie estas Golumo? — li diris. — Ĉu li ankoraŭ ne revenis?

— Ne, — diris Frodo. — Malestis signoj kaj sonoj de li.

— Nu, mi ne povas toleri lin, — diris Sam. — Fakte, mi neniam kunprenis ion dumvojaĝe, kion mi malpli bedaŭrus perdi. Sed tipe de li estus, se post lia multhora akompano li nun perdiĝus, ĝuste kiam ni plej bezonas lin, nome, se li iam utilos al ni, kion mi dubas.

— Vi forgesis pri la marĉejo, — diris Frodo. — Mi esperas, ke nenio malbona okazis al li.

— Kaj mi esperas, ke li ne pretigas trukojn. Kaj ĉiuokaze mi esperas, ke li ne trafos en alies manojn, por tiel diri. Ĉar se tio okazus, ni baldaŭ sidus en kaĉo.

Tiumomente aŭdiĝis denove tambureca subbruo, jam pli laŭta kaj pli profunda. La tero ŝajnis tremi sub iliaj piedoj.

— Mi opinias, ke ni jam sidas en kaĉo, — diris Frodo. — Mi timas, ke nia vojaĝo proksimiĝas al la fino.

— Eble, — diris Sam; — sed *dum oni vivas, ne mankas espero*, kutimis diri mia Avulo, kaj necesas manĝaĵo, li plejofte aldonis. Manĝu iom, sinjoro Frodo, kaj poste dormu iom.

La posttagmezo, kiel Sam supozis ĝin nomenda, pasadis. Elrigardante el la kaŝejo li povis vidi nur grizbrunan senombran mondon, velkantan malrapide al anonima senkolora morno. Estis sufoko sed ne varme. Frodo dormis malkviete, turniĝante kaj tordiĝante kaj foje murmurante. Dufoje Sam ŝajnis aŭdi lin prononci la nomon Gandolfo. La tempo ŝajnis treniĝi senfine. Subite Sam aŭdis siblon malantaŭ si, kaj jen aperis Golumo kvarpiede, gvatante ilin per ekbrilaj okuloj.

— Vekiĝu, vekigu! Vekiĝu, dormemuloj! — li flustris. — Vekiĝu! La tempo urĝas. Ni devas iri, jes, ni devas iri tuj. La tempo urĝas!

Sam rigardis lin suspekteme: li ŝajnis timigita aŭ ekscitita.

— Ĉu iri nun? Kian trukon vi kovas? Ankoraŭ ne estas la ĝusta horo. Ne povas esti eĉ la tetrinka horo, almenaŭ ne en decaj lokoj, kie tetrinka horo ekzistas.

— Stulte! — siblis Golumo. — Ni estas ne en decaj lokoj. Tempo ekmanas, jes, rapide forpasas. La tempo urĝas. Ni devas iri. Vekiĝu, mastro, vekigu! — Li palpskuis Frodon; kaj Frodo, konsternite vekite, sidiĝis subite kaj kaptis lian brakon. Golumo abrupte sin liberigis kaj retroiris.

— Oni ne devas stulti, — li siblis. — Ni devas iri. La tempo urĝas!

Nenion plian ili sukcesis eligi el li. Kie li estis, kaj kion li supozis pretiĝanta kaj hastiginta lin, li rifuzis diri. Sam estis plena je suspektemo kaj tion vidigis; sed Frodo nenium indikon vidigis pri tio, kio trapasas lian menson. Li suspiris, surdorsigis sian tornistron, kaj pretiĝis eliri en la mallumon ĉiam plifortiĝantan.

Tre kaŝiĝeme Golumo gvidis ilin malsupren laŭ la deklivo, laŭeble utiligante kovrejojn, kaj kurante, klinite preskaŭ ĝistere, trans lokojn apertajn; sed la lumo estis jam tiel malhela, ke eĉ akrokula sovaĝa besto apenaŭ povus vidi la hobitojn, kapuĉitajn, en iliaj grizaj manteloj, nek aŭdi ilin marŝantajn tiel singarde, kiel kapablas tiuj etuloj. Sen krako de branĉeto aŭ siblo de folio ili preterpasis kaj malaperis.

Dum ĉirkaŭ unu horo ili pluiris, silente, spalire, deprimitaj pro la morno kaj kompleta senmovo de la tereno, kiun rompis nur de tempo al tempo mallaŭta tondrobruo malproksime aŭ tamburado en iu monteta kavaĵo. Suben de sia kaŝloko ili iris, kaj poste, turniĝinte suden, ili direktiĝis laŭ la plej rekta vojo, kian povis trovi Golumo tra longa malglata deklivo, kiu kliniĝis supren al la montoj. Baldaŭ, ne tre fore, ili vidis arbaran zonon baŭmantan kvazaŭ nigra muro. Kiam ili proksimiĝis, ili konstatis, ke la arboj estis grandaj, ŝajne tre antikvaj, kaj ankoraŭ tre altaj, kvankam iliaj supraĵoj estis nudaj kaj rompitaĵ, kvazaŭ tempestoj kaj fulmoj trabruus ilin, sed malsukcesis mortigi ilin aŭ skui iliajn profundegajn radikojn.

— La Krucvojo, jes, — flustris Golumo, la unuaj parolitaj vortoj, de kiam ili forlasis sian kaŝlokon. — Ni devas iri tien. — Turninte sin orienten, li gvidis ilin supren laŭ la deklivo; kaj tiam subite jen ĝi estis antaŭ ili: la vojo suden, serpentumanta ĉirkaŭ la eksteraj randoj de la montoj, ĝis baldaŭ ĝi plonĝis en la grandan ringon de arboj.

— Tiu ĉi estas la sola vojo, — flustris Golumo. — Neniuj padoj post la ŝoseo. Neniuj padoj. Ni devas iri al la Krucvojo. Sed rapidu! Estu silentaj!

Tiel ŝtelire, kiel skoltoj en malamika bivako, ili kaŝiris suben al la vojo, kaj ŝteliris laŭ ĝia okcidenta rando sub la ŝtonoza teramaso, grizaj kiel la ŝtonoj kaj silentpiedaj kiel ĉasantaj katoj. Fine ili atingis la arbojn, kaj trovis, ke ili staras en granda sentegmenta ringo, meze aperta al la sombra ĉielo; kaj la spacoj inter aliaj trunkoj similis al malhelaj arkaĵegoj de ruiniĝinta halo. Ĝuste en la centro renkontiĝis kvar vojoj. Malantaŭ ili troviĝis la vojo al Moranono; antaŭ ili ĝi eliris denove al sia longa vojado suden; dekstre la vojo el malnova Osgiliado alvenis grimpe, kaj, transirinte, forpasis orienten en la mallumon: la kvara vojo, la vojo irota de ili.

Starante momente tie timoplena, Frodo konsciiĝis, ke brilas lumo; li vidis ĝin ardantan sur la vizaĝo de Sam apude. Turninte sin al ĝi, li vidis post arkaĵo de branĉoj la vojon al Osgiliado etendiĝanta preskaŭ tiel rekte kiel streĉita rubando suben, suben al la okcidento. Tie malproksime post malĝoja Gondoro jam ombre inundita la suno subiris, trovinte finfine la orlon de l' granda malrapide ruliĝanta mortotuko de nuboj kaj falante kiel minaca fajraĵo al la ankoraŭ nemakulita maro. La mallonga ardo trafis enorman sidantan figuron, senmovan kaj solenan kiel la grandaj ŝtonaj reĝoj de Argonato. La jaroj estis maĉintaj ĝin, kaj perfortaj manoj difektis ĝin. Ĝia kapo mankis kaj sur

ties loko estis moke starigita ronda krude ĉizita ŝtono, malzorge farbita per sovaĝaj manoj imite al rikana vizaĝo kun unusola ruĝa okulo meze de la frunto. Sur ĝiaj genuoj kaj la fortika seĝo, kaj ĉie sur la piedstalo estis sencelaj skribaĉaĵoj miksitaj kun la fiaj simboloj, kiujn uzas la larvopopolo de Mordoro.

Subite, trafitan de la ebenaj radioj, Frodo vidis la kapon de l' maljuna reĝo: ĝi kuŝis forruliĝinte apud la vojo.

— Vidu, Sam! — li kriis, paroligite de la konsterno. — Vidu! La reĝo havas denove kronon!

La okuloj estis kavaj kaj la ĉizita barbo estis rompita, sed sur la alta severa frunto estis kronaĵo el arĝento kaj oro. Treniĝa plantaĵo kun floroj kiel blankaj steletoj ligis sin al la brovoj, kvazaŭ honorante la falintan reĝon, kaj en la fendaĵetoj de lia ŝtona hararo briletis flavaj sedoj.

— Ili ne povos por ĉiam venki! — diris Frodo. Kaj tiam subite malaperis la mallonga ekvidaĵo. La suno subiris kaj malaperis, kaj kvazaŭ pro ŝutfermo de lampo venis la nokto.

Ĉapitro 8

LA ŜTUPARO DE CIRITO UNGOL

Golumo tiris la mantelon de Frodo kaj siblis pro timo kaj senpacienco.

— Nepras foriri. Necesas ne stari ĉi tie. Rapidu!

Malvolonte Frodo turnis sian dorson al la okcidento kaj sekvis, kiam lia gvidanto kondukis lin eksteren en la mallumon de la oriento. Ili forlasis la arboringon kaj ŝteliris sur la vojo al la montaro. Ankaŭ tiu vojo direktiĝis rekte dum kelka tempo, sed baldaŭ ĝi komencis forkurbiĝi suden, ĝis ĝi alvenis sub la rokŝultregon, kiun ili jam vidis de malproksime. Nigra kaj forpuŝa ĝi baŭmis super ili, pli malhela ol la malhela ĉielo malantaŭe. Krablante sub ĝia ombro la vojo pluiris, kaj ĉirkaŭinte ĝin saltis denove orienten kaj komencis supreniri krute.

Frodo kaj Sam plandadis plu kun koroj malpezaj, ne plu kapablaj ĝeni sin pri sia endanĝereco. La kapo de Frodo estis klinita; lia ŝarĝo denove kurbigis lin. Tuj kiam la granda Krucvojo estis preterpasita, ĝia pezo, preskaŭ forgesita en Itilio, komencis ree plifortiĝi. Nun, sentante, ke la vojo krutiĝas antaŭ liaj piedoj, li rigardis lacege supren; kaj tiam li vidis ĝin, ĝuste kiel Golumo antaŭdiris: la urbon de la Ringofantomoj. Li kaŭris apud la ŝtonoza rando.

Longdekliva valo, profunda ombrogolfo, retroiris foren en la montaron. Sur la alia flanko, iom distance inter la valaj brakoj, alte sur roka sidloko sur la nigraj genuoj de Efelo Duad, staris la muroj kaj turego de Minas Morgul. Ĉio ĉirkaŭ ĝi estis malhela, tere kaj ĉiele, sed lumo ĝin banis. Ne la enkarcerigita lunlumo antaŭlonge versiĝinta tra la marmoraj muroj de Minas Itil, Turego de la Luno, bela kaj disradia en kavaĵo de la montoj. Pli pala efektive ol la luno velkanta en iu eklipso estis ties lumo nun, flagranta kaj bloviĝanta kiel fetora elspiraĵo de putriĝo, kadavrolumo, lumo kiu nenion prilumis. Sur la muroj kaj turego vidiĝis fenestroj, kiel sennombraj nigraj truoj rigardantaj internen al malpleneco; sed la plej alta etaĝo de la turego turniĝis malrapide, jen laŭ unu direkto jen laŭ l' alia, grandega fantoma kapo

rikananta en la nokton. Momente la tri kunuloj staris tie, kuntiriĝinte, gapante supren per malvolontaj okuloj. Golumo la unua refortiĝis. Ree li urĝe tiris iliajn mantelojn, sed neniun vorton li elparolis. Li preskaŭ trenis ilin antaŭen. Ĉiu paŝo estis kontraŭvola, kaj la tempo ŝajnis malrapidigi sian pasadon, tiel ke dum la intervalo inter levo de piedo kaj ties remeto pasis minutoj de abomeno.

Tiel ili alvenis malrapide al la blanka ponto. Tie la vojo, briletante malforte, transiris rojon meze de la valo, kaj pluiris, serpentumante malrekte supren al la pordo de l' urbo: nigra faŭko, kiu apertis en la ekstera cirklo de la nordaj muroj. Larĝaj ebenaĵoj kuŝis ambaŭrande de l' rojo, ombrecaj herbejoj plenaj je palaj blankaj floroj. Ankaŭ tiuj estis lumantaj, belaj tamen forme hidaj, kiel frenezaj figuroj en mal-kvieta sonĝo; kaj ili disblovis malfortan naŭzan tombodoron; putriĝa fetoro plenigis la aeron. De herbejo al herbejo traarkis la ponto. Figuroj staris tie ĉekape, lerte skulptitaj laŭ formoj homaj kaj bestecaj, sed ĉiuj koruptitaj kaj naŭzaj. La akvo fluanta sube silentis, kaj ĝi vaporis, sed la vaporo leviĝanta de ĝi, kirlanta kaj tordiĝanta ĉirkaŭ la ponton, estis mortige malvarma. Frodo sentis, ke liaj sentumoj vertiĝas kaj lia menso mallumiĝas. Tiam subite, kvazaŭ efikus iu forto alia ol la propra volo, li ekhastis ŝanceliĝe antaŭen, kun la palpaj manoj etenditaj kaj la kapo pendolanta de flanko al flanko. Sam kaj Golumo ambaŭ postkuris lin. Sam kaptis sian mastron per la brakoj, ĝuste kiam li stumblis kaj preskaŭ falis sur sojlo de la ponto.

— Ne tiuvoje! Ne tiuvoje! — flustris Golumo, sed la spiro inter liaj dentoj ŝajnis traŝiri la pezan kvieton kiel fajfilo, kaj li kaŭris teren en teruro.

— Staru firme, sinjoro Frodo! — murmuris Sam en l' oreton de Frodo. — Revenu! Ne tiuvoje. Golumo diras, ke ne, kaj escepte mi konsentas kun li.

Frodo pasigis la manon sur sia frunto kaj forŝiris siajn okulojn de la urbo sur la monteto. La luma turo fascinis lin, kaj li luktis kontraŭ deziro suprenkuri laŭ la brileta vojo al ĝia pordo. Finfine li pene returniĝis, kaj tion farinte li sentis ke la Ringo rezistas, tirante la ĉenon ĉirkaŭ lia kolo; kaj ankaŭ liaj okuloj, kiam li forrigardis, ŝajnis dum momento blindigitaj. La mallumo antaŭ li estis nepenetrebla.

Golumo, rampante tere kvazaŭ timigita besto, jam estis malaperanta en la ombraĵon. Sam subtenante kaj gvidante sian stumblan mastron, sekvis lin laŭeble rapide. Ne malproksime de l' apuda bordo de l' rojo troviĝis breĉo en la ŝtonmuro apud la vojo. Tra tiu ili pasis,

kaj Sam vidis, ke ili estas sur mallarĝa pado, kiu ekbrilis malforte komence, samkiel la ĉefvojo, ĝis grimpinte sur la herbejoj de venenaj floroj ĝi velkis kaj senlumiĝis, serpentumante malnete supren laŭ la nordaj flankoj de la valo.

Laŭlonge de tiu pado la hobitoj plandumis unu apud la alia, nepovante vidi Golumon antaŭ si, krom kiam li sin turnis por fingrovoke instigi ilin. Tiam liaj okuloj briletis per lumo verda-blanka, eble spekulante la fian brilon de Morgulo, aŭ ĉendite de iu responde humoro interne. Pri tiu venena ekbrilo kaj pri la mallumaj okultruoj Frodo kaj Sam senĉese konsciis, re kaj re retrorigardante timplene trans la ŝultrojn kaj ĉiam denove trenante siajn okulojn al trovo de la senluma pado. Malrapide ili penis antaŭen. Dum ili altiĝadis super la fetoron kaj vaporojn de la venena roĵo, ili spiris pli facile kaj iliaj kapoj klariĝis; sed nun iliaj membroj estis lacegaj, kvazaŭ ili marŝus la tutan nokton ŝarĝite, aŭ longe naĝadus kontraŭ peza akvofluo. Finfine ili ne povis pluri senhalte.

Frodo haltis kaj sidiĝis sur ŝtonon. Ili jam grimpis ĝis la supro de granda bulo de nuda monto. Antaŭ ili estis roko en valoflanko, kaj ĉirkaŭ ties supraĵo la vojo pluiris, ne pli ol larĝa breto kun abismo dekstre; trans la apikan sudan facon de la monto ĝi rampis supren, ĝis ĝi malaperis en la mallumo supre.

— Mi devas ripozi iomete, Sam, — flustris Frodo. — Ĝi pezas sur min, knabo Sam, tre pezas. Mi scivolas kiom longe mi povos porti ĝin? Ĉiukaze mi devas ripozi antaŭ ol ni risku nin sur tion. — Li indikis la mallarĝan vojeton antaŭe.

— Ĉit! ĉit! — siblis Golumo rapidante al ili. — Ĉit! — Liaj fingroj estis ĉebuŝe kaj li skuus urĝe la kapon. Tirante la manikon de Frodo, li indikis la padon; sed Frodo rifuzis moviĝi.

— Ankoraŭ ne, — li diris, — ankoraŭ ne. — Laceco kaj pli ol laceco premis lin; ŝajnis kvazaŭ peza sorĉo efikus al li mense kaj korpe. — Mi devas ripozi, — li murmuris.

Je tio la timo kaj konsterno de Golumo tiel fortiĝis, ke li denove parolis, siblante malantaŭ sia mano, kvazaŭ por forbari la bruon de nevidataj aŭskultantoj en la aero.

— Ne ĉi tie, ne. Ne ĉi tie ripozi. Stultuloj! Okuloj povas vidi nin. Kiam ili alvenos la ponton, ili vidos nin. Venu for! Grimpu, grimpu! Venu!

— Venu, sinjoro Frodo, — diris Sam. — Li pravos denove. Ni ne povas resti ĉi tie.

— Bone, — diris Frodo per voĉo distanceca, kvazaŭ de iu parolanta duondorme. — Mi provos. — Lacege li stariĝis.

Sed estis tro malfrue. Tiumomente la roko moviĝis kaj ekstremis sub ili. La forta grumbla bruoj, pli laŭta ol iam antaŭe, ruliĝis en la tero kaj eĥis en la montaro. Poste laŭ brula subito venis granda ruĝa flagro. Tre fore post la orientaj montoj ĝi saltis sur la ĉielon kaj plaŭdiĝis sur la minacajn nudojn karmezinon. En tiu valo de ombro kaj malvarma kruela lumo ĝi ŝajnis netolereble perforta kaj feroce. Ŝtonpintoj kaj firstoj kiel noĉitaj tranĉiloj elsaltis en gapa nigro antaŭ la suprentorenta flamo en Gorgoroto. Poste venis krakego de tondro.

Kaj Minaso Morgul respondis. Vidiĝis flagro de brilegaj fulmoj; forkaj bluflamaj risortiĝis el la turego kaj el la ĉirkaŭaj montoj en la malafablajn nubojn. La tero ĝemis; kaj el la urbo leviĝis kriego. Miksite kun akraj altaj voĉoj kvazaŭ de predantaj birdoj, kaj la kriĉa henado de ĉevaloj freneze koleraj kaj timoplenaj, venis ŝira kriego, trema, rapide leviĝanta ĝis trapika tonalto ekster atingo de l' aŭdado. La hobitoj turniĝis ĝire tiudirekten, kaj jetis sin teren, kovrante permane la orelojn.

Kiam ĉesis la terura kriego, retrofalanta per longa naŭzega veo ĝis silento, Frodo malrapide levis sian kapon. Trans la mallarĝa valo, nun preskaŭ egalnivela kun liaj okuloj, la muroj de l' malica urbo staris, kaj ĝia kaverneca pordo, formita kvazaŭ malfermita buŝo kun brilaj dentoj, gapis malfermite. Kaj tra tiu pordo eliris armeo.

Tiu tuta amaso estis vestita zibele, nigre kiel la nokto. Kontraŭ la palaj muroj kaj la luma pavimo de la vojo Frodo povis vidi ilin, vicon post vico de etaj nigraj figuroj, kiuj marŝis rapide kaj silente, elpasantaj laŭ senfina fluo. Antaŭ ili iris granda rajdistaro moviĝante kiel ordaj ombroj, kaj ĉekape de ili estis unu pli granda ol ĉiuj ceteraj: rajdanto tute nigra, krom ke sur la kapuĉita kapo li portis kronsimilan kaskon, kiu flagris per danĝera lumo. Nun li proksimiĝis al la ponto sube, kaj la gapaj okuloj de Frodo sekvis lin, nekapablaj palpebrumi aŭ forturniĝi. Ĉu tie ne estis la Mastro de l' Naŭ Rajdantoj, reveninta al la tero por konduki sian fian armeon en batalon? Tie, jes efektive tie estis la marasma reĝo, kies frida mano vundis la Ringoportanton per la mortiga tranĉilo. La malnova vundo pulsas dolore kaj granda frostiĝo disvastiĝis al la koro de Frodo.

Ĝuste kiam trapikis lin tiuj pensoj per timego kaj tenis lin ligita kvazaŭ pro sorĉo, subite haltis la Rajdanto, rekte antaŭ la enirejo de la

ponto, kaj post li la tuta amaso staris senmove. Sekvis paŭzo, kompleta silento. Eble la Ringo alvokis la Fantommastron, kaj momente li estis perturbita, sentante iun alian potencon interne de sia valo. Tien kaj tien ĉi turniĝis la malhela kapo kaskita kaj kronita je timo, esplorante la ombrojn per siaj nevideblaj okuloj. Frodo atendis, kiel birdo pro proksimiĝo de serpento, ne kapabla moviĝi. Kaj dum li atendis, li sentis, pli urĝan ol iam ajn antaŭe, la ordonon, ke li surmetu la Ringon. Kvankam forta kiel neniam estis la premo, li jam ne sentis emon cedi al ĝi. Li sciis, ke la Ringo perfidos lin, kaj ke li ne posedas, eĉ se li surmetus ĝin, la potencon fronti al la Morgula reĝo — ankoraŭ ne. Jam ne plu estis respondo al tiu ordono en lia propra volo, kvankam ĝi estis senespere timigita, kaj li sentis sur si nur batadon de forta potenco de ekstere. Tiu kaptis lian manon, kaj dum Frodo mense rigardis, ne volante tion sed provizore retenite (kvazaŭ li rigardus iun malnovan rakonton malproksiman), ĝi movis la manon colon post colo al la ĉeno ĉirkaŭ lia kolo. Tiam lia propra volo ekvigligiĝis; malrapide ĝi devigiĝis la manon reiri kaj serĉi ion alian, ion kaŝitan apud lia brusto. Malvarma kaj malmola ĝi ŝajnis, kiam lia kroĉo ekprenis ĝin: la flakoneton de Galadriela, tiom longe valoritan, kaj preskaŭ forgesitan ĝis tiu horo. Kiam li tuŝis ĝin, dum kelka tempo ĉia pensado pri la Ringo estis forbarita de lia menso. Li suspiris kaj klinis la kapon.

Tiumomente la Fantomreĝo turnis sin, spronis sian ĉevalon kaj rajdis trans la ponton, kaj lia tuta malhela armeo sekvis lin. Eble la elfaj kapuĉoj defiis liajn nevideblajn okulojn, kaj la menso de lia eta malamiko, refortigite, flanketurnis liajn pensojn. Sed li hastis. Jam la horo sonoris, kaj ordonite de sia granda Mastro li devis marŝi milite en la okcidenton.

Baldaŭ li forpasis, kiel ombro en ombron, laŭ la serpentuma vojo, kaj daŭre post li transiris la ponton la nigraj vicoj. Tiel granda armeo neniam eliris el tiu valo post la tagoj de l' potenco de Isilduro; neniu amaso tiel danĝera kaj armile forta ĝis nun atakis la travadejon de Anduino; kaj tamen ĝi estis nur unu kaj ne la plej granda el la armeoj, kiujn Mordoro nun ekspedis.

Frodo ekmoviĝis. Kaj subite lia koro turniĝis al Faramiro. "La ŝtormo finfine komenciĝis, — li pensis. — Tiu granda plenarmaĵo da lancoj kaj glavoj direktiĝas al Osgiliado. Ĉu Faramiro transiros ĝustatempe? Li antaŭvidis tion, sed ĉu li konis la horon? Kaj kiuj nun povas defendi la travadejojn, kiam venos la Reĝo de l' Naŭ Rajdantoj? Kaj

aliaj armeoj venos. Mi tro malfruis. Ĉio estas perdita. Mi prokrastis survoje. Ĉio estas perdita. Eĉ se mia komisio plenumiĝos, neniu ajn iam scios. Al neniu mi povos raporti. Estos vane". Venkite de malforteco li ekploris. Kaj daŭre la armeo de Morgulo transiris la ponton.

Poste je granda distanco, kvazaŭ ĝi venus el memoroj pri la Provinco, iun sunluman frumatenon, kiam vokis la tago kaj pordo malfermiĝis, li aŭdis la voĉon de Sam: "Vekiĝu, sinjoro Frodo! Vekiĝu!" Se la voĉo aldonus: "Via matenmanĝo estas preta", li apenaŭ surpriziĝus. Certe Sam urĝis.

— Vekiĝu, sinjoro Frodo! Ili foriris.

Aŭdiĝis malklara sonoro. La pordego de Minaso Morgul estis fermita. La lasta vico da lancistoj jam malaperis sur la vojo. La turego ankoraŭ rikanis transvale, sed la lumoj en ĝi forvelkis. La tuta urbo retrofalis en malhelan meditan ombrecon kaj silenton. Tamen ankoraŭ ĝi estis plena je gvatemo.

— Vekiĝu, sinjoro Frodo! Ili foriris, kaj ankaŭ ni prefere iru. Ankoraŭ io vivas en tiu loko, io kun okuloj, aŭ vidanta menso, se vi komprenas min; kaj ju pli longe ni restados en unu loko, des pli baldaŭ ĝi malkovros nin. Ek al, sinjoro Frodo!

Frodo levis sian kapon kaj stariĝis. Malespero ne forlasis lin, sed la malforteco forpasis. Li eĉ malgaje ridetis, sentante nun jam tiel klare, kiel antaŭ momento li sentis la malon, ke tion, kion li devos fari, li devos fari, se eble, kaj estas flanka afero, ĉu Faramiro, Aragorno, Elrondo, Galadriela, Gandolfo aŭ iu alia iam scios pri tio. Li kaptis sian bastonon per unu mano, la flakoneton per la alia. Kiam li vidis, ke la klara lumo jam ŝveliĝas tra liaj fingroj, li ŝovis ĝin en sian sinon kaj tenis ĝin kontraŭ sia koro. Poste turninte sin for de la urbo Morgulo, jam ne pli ol griza brilajeto aliflanke de la malhela abismo, li pretiĝis sekvi la vojon supren.

Ŝajne Golumo forrampis laŭ la breto en la mallumon antaŭe, kiam malfermiĝis la pordego de Minaso Morgul, lasinte la hobitojn tie, kie ili kuŝis. Li nun revenis rampe kun klakantaj dentoj kaj klakigitaj fingroj.

— Stulte! Malsaĝe! — li siblis. — Rapidu! Ili ne supozu, ke forpasis la danĝero. Ĝi ne forpasis. Rapidu!

Ili ne respondis, sed ili sekvis lin sur la grimpan breton. Tiu malmulte plaĉis al ambaŭ ili, eĉ ne post frontado al tiomaj aliaj riskoj; sed ĝi ne longe daŭris. Baldaŭ la pado alvenis rondan angulon, kie denove elŝvelis montoflanko, kaj tie ĝi subite eniris mallarĝan aperturon en la

roko. Ili atingis la unuan ŝtuparon, pri kiu Golumo parolis. La malumo estis preskaŭ kompleta, kaj malmulton ili povis vidi post brak-
etendo; sed la okuloj de Golumo brilis pale, plurajn futojn supre, kiam li returnis sin al ili.

— Singarde! — li flustris. — Ŝtupoj. Multaj ŝtupoj. Necesas singardi.

Singardo certe necesis. Frodo kaj Sam komence malstreĉiĝis, havante jam muron ambaŭflanke, sed la ŝtuparo estis preskaŭ tiel kruta kiel eskalo, kaj dum ili grimpis ĉiam pli supren, ili pli kaj pli konsciiĝis pri la longa nigra forfalo malantaŭe. Kaj la ŝtupoj estis malarĝaj, kun malegalaj interspacoj, kaj ofte trompaj: ili estis trivitaj kaj glataj ĉerande, kaj iuj estis rompitaĵoj, kaj iuj fenditaj pro surmetita piedo. La hobitoj baraktis pluen, ĝis fine ili kroĉiĝadis furioze fingre al la ŝtupoj antaŭ ili, kaj devigis siajn dolorajn genuojn kurbiĝi kaj rektiĝi; kaj ĉiam, dum la ŝtuparo tranĉis vojon pli profunden en la apikan monton, la rokmuroj leviĝis pli kaj pli alte super iliaj kapoj.

Finfine, ĝuste kiam ili sentis, ke ili kapablas nenion pli toleri, ili vidis la okulojn de Golumo subenrigardi al ili.

— Ni jam grimpis, — li flustris. — L' unua ŝtuparo jam eksas. La lertaj hobitoj grimpis tiel alten, tre lertaj hobitoj. Nur kelkaj pliaj ŝtupetoj kaj finite, jes.

Kapkirliĝa kaj tre laca Sam kun Frodo en sekvo laŭrampis la lastan ŝtupon, kaj tie ili sidiĝis frotante siajn kruojn kaj genuojn. Ili troviĝis en profunda malhela trapasejo, kiu ŝajnis plu supreniri antaŭ ili, kvankam malpli krute kaj senŝtupe. Golumo ne permesis, ke ili ripozu longe.

— Estas ankoraŭ unu ŝtuparo, — li diris. — Ŝtuparo multe pli longa. Ripozu kiam ni atingos la supron de l' proksima ŝtuparo. Ankoraŭ ne.

Sam ĝemis kaj demandis:

— Ĉu pli longa, vi diris?

— Jes, jess, pli longa, — diris Golumo. — Sed ne tiom malfacila. La hobitoj jam grimpis la Rektan Ŝtuparon. Poste venas la Serpentuma Ŝtuparo.

— Kaj kio poste? — demandis Sam.

— Ni vidos, — diris Golumo mallaŭte. — Ho jes, ni vidos!

— Al mi ŝajnas, ke vi diris, ke troviĝas tunelo, — diris Sam. — Ĉu ne estas tunelo aŭ io trairota?

— Ho jes, troviĝas tunelo, — diris Golumo. — Sed la hobitoj povos ripozi antaŭ ol provi ĝin. Se ili trapasos tiun, ili estos proksimaj al la supro. Tre proksimaj, se ili trapasos. Ho jes!

Frodo tremetis. La grimrado ŝvitigis lin, sed li jam sentis sin malvarma kaj humida, kaj en la trapasejo estis frosta trablovo de la nevideblaj altaĵoj supre. Li stariĝis kaj skuis sin.

— Nu, ni pluiru! — li diris. — Ĉi tie ne estas taŭga sidloko.

La trapasejo ŝajnis etendiĝi tra mejloj, kaj ĉiam la frosta aero transfluis ilin, fortiĝante dum ilia progreso al malvarmega vento. La montoj ŝajnis klopodi per sia venena spiro senkuraĝigi ilin, forturni ilin de l' sekretoj de la altejoj, aŭ forblovi ilin en la mallumon malantaŭe. Ili nur konsciis, ke ili atingis la finon, kiam subite ne plu estis muro dekstre. Ili povis vidi nur tre malmulton. Grandaj nigraj senformaj amasoj kaj profundaj grizaj ombroj baŭmis antaŭ ili kaj ĉirkaŭ ili, sed de tempo al tempo malakra ruĝa lumo flagris supren sub la malalta nubaro, kaj momente ili konsciiĝis pri altaj pintoj, antaŭe kaj ambaŭflanke, kvazaŭ pilastroj apogantaj vastan subfleksigantan tegmenton. Ŝajnis, ke ili suprengrimis multajn centojn da futoj sur larĝan breton. Klifo troviĝis maldekstre kaj abismo dekstre.

Golumo gvidis ilin proksime laŭ la klifo. Provizore ili ne plu grimpis, sed la tereno estis jam pli malglata kaj danĝera en la mallumo, kaj troviĝis sur la vojo blokoj kaj buloj da falintaj ŝtonoj. Ilia irado estis malrapida kaj singardema. Kiom da horoj pasis, post kiam ili eniris la Morgulan Valon, nek Sam nek Frodo povis plu diveni. La nokto ŝajnis senfina.

Finfine ili denove konsciiĝis pri muro baŭmanta, kaj denove malfermiĝis antaŭ ili ŝtuparo. Denove ili haltis, kaj denove ili komencis grimpi. La supreniro estis longa kaj laciga; sed tiu ĉi ŝtuparo ne fosis en la montflankon. Ĉi tie la grandega klifsurfaco kliniĝis malantaŭen, kaj la pado serpentume kurbiĝis tien-reen sur ĝi. Unuloke ĝi flankiĝis dekstren al la rando de l' malhela abismo, kaj Frodo ekrigardante suben vidis sub si kiel vastan profundan ŝakton la grandan ravinon kape de la Morgula Valo. En ties profundo ekbrilis kvazaŭ lumbrika fadeno la fantoma vojo de la mortinta urbo ĝis la Sennoma Pasejo. Li haste forturnis sin.

Pluen kaj supren la ŝtupvojo kurbis kaj rampis, ĝis fine per lasta etendiĝo mallonga kaj rekta ĝi elrampis sur alian nivelon. La pado

estis fortuniĝinta de la ĉefa trapasejo en la granda ravino, kaj ĝi nun sekvis sian propran danĝeran vojon sube de malpli granda fendejo inter la pli altaj regionoj de Efelo Duad. Malklare la hobitoj povis vidi altajn pilierojn kaj akrangulajn pinaklojn el ŝtono ambaŭflanke, inter kiuj estis grandaj fendaĵoj kaj displitaĵo el ŝtono pli nigraj ol la nokto, kies forgesitaj vintroj jam delonge maĉis kaj ĉizelis la sensunan ŝtonon. Kaj nun la ruĝa lumo sur la ĉielo ŝajnis pli forta; kvankam ili ne povis scii, ĉu terura mateno efektive venas al tiu ĉi ombra loko, aŭ ĉu ili vidas nur la flamon de ia granda perfortaĵo de Saŭrono dum la turmentado de Gorgoroto transmontare. Antaŭ si, tre malproksime kaj ankoraŭ tre alte super si, Frodo suprenrigardante vidis, laŭ sia supozo, la veran verton de tiu ĉi malfacilega vojo. Antaŭ la malafabla ruĝo de l' orienta ĉielo estis vidigita fendego sur la plej supra firsto, malvasta, profunde elmordita inter du nigraj ŝultroj; kaj sur ambaŭ ŝultroj estis po korno el ŝtono.

Li paŭzis kaj rigardis pli atente. La korno maldekstra estis alta kaj svelta; kaj en ĝi flamis ruĝa lumo, aŭ eble la ruĝa lumo en la lando transa brilis tra truo. Li nun vidis, ke tio estas nigra turego ŝvebanta super la fora pasejo.

— Al mi ne plaĉas ties aspekto! — diris Sam. — Do tiu ĉi via sekreta vojo estas finfine gardata, — li graŭlis, sin turninte al Golumo. — Kiel vi la tutan tempon sciis, supozeble?

— Ĉiuj vojoj estas gardataj, jes, — diris Golumo. — Kompreneble tiel. Sed la hobitoj devos provi iun vojon. Tiu vojo eble estas malplej gardata. Eble ili ĉiuj foriris al granda batalo, eble!

— Eble, — gruntis Sam. — Nu, ĝi ŝajnas ankoraŭ tre malproksima kaj longa vojo supren, ĝis ni alvenos tien. Kaj troviĝas ankoraŭ la tunelo. Mi opinias, ke nun vi devus ripozi, sinjoro Frodo. Mi ne scias, kioma horo tage aŭ nokte estas, sed ni vojaĝas seninterrompe dum horoj kaj horoj.

— Jes, ni devas ripozi, — diris Frodo. — Ni trovi iun angulon for de la vento kaj renovigu nian forton por la lasta etapo.

Ĉar tia li supozis ĝin. La teruraĵoj de la lando post ĝi kaj la tiea farotaĵo, ŝajnis malaktualaj, ankoraŭ tro foraj por ĝeni lin. Lia tuta menso direktiĝis al traŭro aŭ transiro de tiuj nepenetreblaj muro kaj gardado. Se nur li farus tiun neeblaĵon, poste iel la komisiono estus plenumota, aŭ tiel ŝajnis al li dum tiu malhela horo de laceco, ankoraŭ penante en la ŝtonaj ombroj sub Cirito Ungol.

En malluma fendo inter du grandaj rokpilastroj ili sidiĝis: Frodo kaj Sam iom interne, kaj Golumo kaŭris surtere proksime al la elirejo. Tie la hobitoj englutis tion, kion ili supozis la lasta manĝo antaŭ la descendo en la Sennoman Landon, eble la lasta manĝo, kiun ili iam manĝos kune. Iom el la nutraĵo de Gondoro ili konsumis, kaj oblatojn el la elfa vojpano, kaj ili iom trinketis. Sed pri la akvo ili konservemis kaj prenis nur sufiĉe por malseketigi siajn sekajn buŝojn.

— Mi scivolos, kiam ni denove trovos akvon? — diris Sam. — Sed supozeble tie transe ili ankaŭ trinkas, ĉu? Orkoj trinkas, ĉu ne?

— Jes, ili trinkas, — diris Frodo. — Sed ni ne parolu pri tio. Tia trinkaĵo ne taŭgas por ni.

— Sekve tiom pli necesas plenigi niajn akvujojn, — diris Sam. — Sed ĉi tie ne estas akvo: nek bruon nek tinton mi aŭdis. Kaj ĉiuokaze Faramiro diris, ke ni trinku neniom da akvo en Morgulo.

— Neniu akvo fluanta el Imlado Morgul, estis liaj vortoj, — diris Frodo. — Ni jam ne estas en tiu valo, kaj se ni trovus fonton, tiu fluus en ĝin sed ne el ĝi.

— Mi ne fidus al ĝi, — diris Sam, — ne ĝis mi mortus pro soifo. Tiu ĉi loko sentiĝas mise. — Li snufis. — Kaj odorante, mi konjektas. Ĉu vi rimarkas tion? Strangaodoro, premaera. Mi ne ŝatas ĝin.

— Tute nenion mi ŝatas ĉi tie, — diris Frodo, — nek ŝtupon nek ŝtonon, nek spiron nek oston. Tero, aero kaj akvo ĉiuj ŝajnas malbenitaj. Sed tien kondukas nia vojo.

— Jes, tio estas vera, — diris Sam. — Kaj ni tute ne estus ĉi tie, se ni scius pli pri la loko antaŭ ol ni ekvojaĝis. Sed supozeble okazas ofte tiel. La bravaĵoj en la malnovaj rakontoj kaj kantoj, sinjoro Frodo: aventuroj mi kutime nomis ilin. Mi kutimis pensi, ke tiuj estas aferoj, kiujn la mirindaj personoj en la rakontoj eliris serĉi, ĉar ili deziris ilin, ĉar ili estis stimulaj kaj la vivo estis iom malvigla, speco de sporto, kiel oni povus diri. Sed ne estas tiel en la rakontoj vere gravaj, nek en tiuj, kiuj restas en la menso. Personoj ŝajnis nur hazarde trafi ilin, kutime tien kondukis ilia vojo, kiel vi esprimis tion. Sed mi supozas, ke ili disponis multajn eblecojn, kiel ni, por retroiri, sed tion ne faris. Kaj se ili farus, ni tion ne scius, ĉar ili estus forgesitaj. Ni aŭdas pri tiuj, kiuj simple pluiris, kaj ne ĉiuj al bona fino, komprenu; almenaŭ ne al tia fino, kian la personoj interne de rakonto kaj ne ekstere nomas fino bona. Vi komprenas: veni hejmen kaj trovi ĉion en ordo, kvankam ne tute sama, kiel maljuna sinjoro Bilbo. Sed tiuj ne estas ĉiam la plej preferindaj rakontoj, kvankam ili eble

estas la preferinde partoprenataj rakontoj! Mi scivolos, en kian rakonton ni enfalis.

— Mi scivolos, — diris Frodo. — Sed mi ne scias. Kaj tiel estas en reala rakonto. Pripensu iun ajn, kiun vi ŝatas. Vi eble scias, aŭ divenas, kia rakonto ĝi estas, ĉu feliĉfina ĉu tristfina, sed la personoj en ĝi ne scias tion. Kaj vi ne deziras, ke ili sciuj.

— Ne, sinjoro, kompreneble ne. Bereno, ekzemple, li ja ne supozis, ke li ricevos tiun Silmarilon de la Fera Krono en Tangorodrimo, kaj tamen li jes, kaj tio estis loko pli malbona kaj danĝero pli nigra ol la niaj. Sed tio estas longa rakonto, kompreneble, kaj pludaŭras post la feliĉo kaj en la malĝojon kaj preteren. Kaj la Silmarilo pluiris kaj alvenis Erendilon. Kaj vidu, sinjoro, mi neniam pli frue pensis pri tio! Ni havas... vi ja havas iom el ties lumo en tiu stelvitro, kiun la Damo donis al vi! Nu, pripensinde, ni ankoraŭ estas en la sama rakonto! Ĝi daŭras plu. Ĉu la grandaj rakontoj neniam finiĝas?

— Ne, ili neniam finiĝas kiel rakontoj, — diris Frodo. — Sed la personoj en ili venas kaj foriras, kiam finiĝas ilia parto. Nia parto finiĝos. Pli aŭ malpli baldaŭ.

— Kaj tiam ni povos havi iom da ripozo kaj iom da dormo, — diris Sam. Li ridis malgaje. — Kaj ĝuste tion mi aludas, sinjoro Frodo. Mi aludas senornaman ordinaran ripozon, kaj dormon, kaj vekigon al mateno de laboro enĝardena. Mi timas, ke nur tion mi esperas la tutan tempon. Ĉiuj grandaj gravaj projektoj ne konvenas al miaspekuloj. Tamen, mi scivolos, ĉu ni iam inkluziviĝos en kantoj kaj rakontoj. Ni troviĝas en unu, kompreneble; sed mi volas diri: envortigite, vi scias, rakontite apudfajruje, aŭ voĉlegite el granda librego kun ruĝaj kaj nigraj literoj, jarojn kaj jarojn poste. Kaj oni diros: “Ni aŭdu pri Frodo kaj la Ringo!” Kaj oni diros: “Jes, tio estas unu el miaj plej ŝataj rakontoj. Frodo estis tre kuraĝa, ĉu ne, paĉjo?” — “Jes, knabo mia, la plej fama el la hobitoj, kaj tio estas granda pretendo”.

— Ĝi estas pretendo multe tro granda, — diris Frodo kaj ridis longan klaran ridon el la koro. Tia sono ne estis aŭdita en tiuj lokoj ekde kiam Saŭrono venis al Mez-Tero. Al Sam subite ŝajnis, ke ĉiuj aŭskultas kaj la altaj rokoj kliniĝis super ili. Sed Frodo ne atentis ilin; li ridis denove. — Nu, Sam, aŭdi vin tiel gajigas min, kvazaŭ la rakonto estus jam verkita. Sed vi ellasis unu el la ĉefaj rolantoj: Samsaĝo la bravkora. “Mi volas aŭdi pli pri Sam, paĉjo. Kial oni ne inkluzivis pli el liaj paroloj, paĉjo? Tiu plaĉas al mi, ĝi ridigas min. Kaj Frodo ne progresus tiel bone sen Sam, ĉu ne, paĉjo?”

— Vidu, sinjoro Frodo, — diris Sam, — ne indas moki. Mi parolis serioze.

— Ankaŭ mi, — diris Frodo, — kaj daŭre seriozas. Ni impetas iom tro rapide. Vi kaj mi, Sam, ankoraŭ estas implikitaj en la plej malagrablaj partoj de la rakonto, kaj estas nur tro verŝajne, ke iuj diris ĉi-punkte: “Fermu jam la libron, paĉjo; ni ne volas legi plu”.

— Eble, — diris Sam, — sed ne mi estus tion diranta. Aferoj faritaj, finitaj kaj inkluzivitaj en la grandaj rakontoj estas alispecaj. Nu, eĉ Golumo eble valorus en la rakonto, ĉiuokaze pli valorus, ol kiam li nin apudas. Kaj ankaŭ li mem iam ŝatis rakontojn, laŭ lia propra atesto. Mi scivolas, ĉu li supozas sin heroo aŭ la malbonulo? Golumo! — li vokis. — Ĉu plaĉus al vi esti la heroo; nu, kien li denove malaperis?

Mankis signo pri li ĉe la enirejo de ilia ŝirmejo kaj en la proksimaj ombroj. Li ja rifuzis ilian nutraĵon, kvankam kiel kutime li akceptis buŝplenon da akvo; kaj poste li ŝajnis kunvolviĝi dormonte. Ili supozis, ke almenaŭ unu el liaj celoj dum lia longa foresto dum la antaŭa tago estis ĉasi manĝaĵon propragustan; kaj nun li evidente forŝteligis denove, dum ili parolis. Sed por kio ĉi-foje?

— Al mi ne plaĉas lia forŝteliro senaverta, — diris Sam. — Kaj plej malplaĉas nuntempe. Li certe ne serĉas manĝaĵon ĉi-supre, krom se ekzistas iu roko, kiun li frandas. Vidu, eĉ musko tute mankas.

— Ne valoras zorgiĝi pri li nun, — diris Frodo. — Ni ne povus veni tiel malproksimen, eĉ ne en vidodistanco de la trapasejo, sen li, kaj tial ni devas toleri liajn morojn. Se li perfidemas, li perfidemas.

— Tamen mi preferus, ke li estu videbla, — diris Sam. — Tiom pli, se li perfidemas. Ĉu vi memoras, ke li neniam konsentis diri, ĉu la pasejo estas gardata aŭ ne? Kaj nun ni vidas tie turegon; eble ĝi estas malplena, eble ne. Ĉu vi opinias, ke li iris alkonduki ilin, orkojn, aŭ kio ili estas?

— Ne, tion mi ne supozas, — respondis Frodo. — Eĉ se li okupiĝas pri iu misaĵo, kaj supozeble tio ne malverŝajnas. Mi ne supozas, ke temas pri tio: ne por alkonduki orkojn, aŭ iujn servistojn de l' Mal-amiko. Kial atendi ĝis nun, kaj travivi la penadon de la grimpo, kaj tiom proksimiĝi al la lando, kiun li timas? Li verŝajne povis perfidi nin al la orkoj multfoje de kiam ni renkontis lin. Ne, se estas io, tio certe estas iu privata truketo de li mem, kiun li supozas tute sekreta.

— Nu, supozeble vi pravas, sinjoro Frodo, — diris Sam. — Kvankam tio ne tre konsolas min. Mi certe ne eraras; sendube li transdonus *min* al orkoj, volonte kaj senhezite. Sed mi forgesis lian trezoron. Ne,

mi supozas, ke la tutan tempon temis pri *La trezoro por kompatinda Smeagolo*. Tio estas la sola koncepto de ĉiuj liaj intrigetoj, se tiajn li havas. Sed kiel gvidado de ni ĉi tien helpos lin tiurilate, tion mi ne kapablas diveni.

— Tre probable li mem ne kapablas tion diveni, — diris Frodo. — Kaj mi ne opinias, ke li havas en la konfuzita kapo nur unu klaran projekton. Mi opinias, ke efektive li parte klopodas protekti la trezoron kontraŭ la Malamiko kiel eble plej longe. Ĉar estus fina katastrofo por li, se la Malamiko akirus ĝin. Kaj aliflanke, eble li nur pacience atendas hazardan okazon.

— Jes, Putorulo kaj Fetorulo, kiel mi diris pli frue, — diris Sam. — Sed ju pli ili proksimiĝos al la lando de la Malamiko, des pli simila al Fetorulo iĝos Putorulo. Atentu mian diron: se iam ni alvenos la pasejon, li ne permesos, ke ni efektive translimigu la trezoregon sen iaspeca interveno.

— Ni ankoraŭ ne alvenis tien, — diris Frodo.

— Ne, sed prefere ni sentinelu ĝis tiam. Se ni estos surprizitaj, Fetorulo sufiĉe rapide superulos. Malgraŭ tio, estos sendanĝere, se vi nun dormetos, mastro. Sendanĝere, se vi kuŝos proksime al mi. Mi vere ĝojus vidi vin dormanta. Mi gardos vin; kaj ĉiuokaze, se vi kuŝos proksime, en mia ĉirkaŭbrako, neniuj povos veni al vi palpe sen tio, ke via Sam scios tion.

— Dormi! — diris Frodo kaj suspiris, kvazaŭ en dezerto li vidus miraĝon friske verdan. — Jes, eĉ ĉi tie mi povus dormi.

— Dormu do, mastro! Kuŝigu vian kapon sur mian sinon.

Kaj tiel Golumo trovis ilin horojn poste, kiam li revenis, rampante ŝtelire laŭ la pado el la mallumo antaŭe. Sam sidis apogite de la ŝtono, kun la kapo falinta flanken kaj peza spirado. Sur lia sino kuŝis la kapo de Frodo, droninta en profunda dormo; sur lia blanka frunto kuŝis unu el la brunaj manoj de Sam, kaj la alia kuŝis malpeze sur la brusto de l' mastro. Trankvilo vidiĝis sur ambaŭ vizaĝoj.

Golumo rigardis ilin. Stranga esprimo trapasis lian magran mal-satan vizaĝon. La ekbrilo forvelkis el liaj okuloj, kaj ili iĝis malklaraj kaj grizaj, maljunaj kaj lacaj. Dolorspasmo ŝajnis tordi lin, kaj li forturniĝis, retrogvatante al la pasejo, skuante sian kapon, kvazaŭ okupite de ia interna debato. Poste li revenis, kaj malrapide etendinte la treman manon tre singarde li tuŝis la genuon de Frodo. Tiu tuŝo estis preskaŭ kareso. Dum momenteto, se iu el la dormantoj vidus lin, li

supozus rigardi maljunan lacan hobiton, ŝrumpintan pro la jaroj, kiuj portis lin multe preter lian tempon, preter amikojn kaj parencojn, kaj la kampojn kaj rojojn de l' juneco, maljunan malsatan kompatindulon.

Sed pro tiu tuŝo Frodo ekmoviĝis kaj elkriis mallaŭte dum la dormo, kaj tuj Sam estis vigle maldorma. Lia unua vidaĵo estis Golumo — “palpanta la mastron”, laŭ lia supozo.

— Hej, vi! — li diris malmilde. — Kion vi faraĉas?

— Nenion, nenion, — diris Golumo mallaŭte. — Afabla mastro!

— Sendube, — diris Sam. — Sed kie vi estadis, ŝtelirante foren kaj reen, maljuna kanajlo?

Golumo retiriĝis, kaj verda ekflagro ekbrilis sub liaj pezaj palpebroj. Preskaŭ araneeca li nun aspektis, kaŭrante malantaŭen sur la kurbaj membroj kaj kun elstaraj okuloj. Jam pasis la momenteto, nerevokeble.

— Ŝtelirante, ŝtelirante! — li siblis. — La hobitoj ĉiam tre ĝentilas, jes. Ho, afablaj hobitoj! Smeagolo gvidas ilin laŭ sekretaj vojoj, kiujn neniu alia sciis trovi. Laca li estas, soifa li estas, jes soifa; kaj li gvidas ilin kaj li serĉas padojn, kaj ili diras: *ŝteliri*, *ŝteliri*. Tre afablaj amikoj, ho jes, mia trezoro, tre afablaj.

Sam sentis sin iom rimorsa, tamen ne pli fidema.

— Pardonpete, — li diris. — Mi bedaŭras, sed vi abrupte vekis min. Kaj mi devis ne dormi, kaj tio iom akriĝis min. Sed sinjoro Frodo tiom lacas, ke mi petis lin fermi la palpebrojn, kaj, nu, tia estas la afero. Pardonpete. Sed kie vi efektive estis?

— Ŝteliris, — diris Golumo, kaj la verda ekbrilo ne forlasis liajn okulojn.

— Ho, tre bone, — diris Sam, — laŭ via volo! Supozeble ne malproksime de la vero. Kaj nun ni prefere ĉiuj ŝteliru kune. Kioma horo estas? Ĉu estas hodiaŭ aŭ morgaŭ.

— Estas morgaŭ, aŭ hodiaŭ estis morgaŭ, kiam la hobitoj ekdormis. Tre stulte, tre danĝere, se kompatinda Smeagolo ne ŝtelirus sentinele.

— Mi opinias, ke ni ĉiuj baldaŭ tediĝos pri tiu vorto, — diris Sam. — Sed ne ĝenu vin. Mi vekos la mastron. — Li delikate forpuŝis la hararon de l' frunto de Frodo, kaj kliniĝinte suben alparolis lin mallaŭte.

— Vekiĝu, sinjoro Frodo! Vekiĝu!

Frodo ekmoviĝis kaj malfermis siajn okulojn, kaj ridetis vidante la vizaĝon de Sam klinitan super li.

— Vekas min frue, ĉu ne, Sam? — li diris. — Estas ankoraŭ mal-lume!

— Jes, estas ĉiam mallume ĉi tie, — diris Sam. — Sed Golumo revenis, sinjoro Frodo, kaj li diras, ke estas morgaŭ. Do ni devas marŝi plu. La lasta etapo.

Frodo profunde enspiris kaj sidiĝis.

— La lasta etapo! — li diris. — Saluton, Smeagolo! Ĉu trovis nutraĵon? Ĉu vi entute ripozis?

— Nenian nutraĵon, nenian ripozon, nenion por Smeagolo, — diris Golumo. — Li estas ŝtelirinto.

Sam klakigis la langon, sed bridis sin.

— Ne parolu tiel pri vi, Smeagolo, — diris Frodo. — Tio estas mal-prudenta, ĉu ĝi veras aŭ ne.

— Smeagolo devas akcepti, kion oni donas, — respondis Golumo. — Kaj tiun nomon donis al li afabla mastro Samsaĝo, tre scioplena hobito.

Frodo rigardis al Sam.

— Jes, sinjoro, — li diris. — Mi efektive uzis tiun vorton, subite vekiĝinte kaj tiel plu kaj trovinte lin apuda. Mi diris, ke mi pardon-petas, sed baldaŭ mi ne plu sentos tion.

— Do lasu ĝin, ĉu ne, — diris Frodo. — Sed nun ŝajnas, ke ni venis al la punkto, vi kaj mi, Smeagolo. Diru al mi. Ĉu ni mem povos trovi la ceteran vojon? Ni povas vidi la pasejon, enirvojon, kaj se ni povas jam trovi ĝin, supozeble oni povas diri, ke finiĝis nia interkonsento. Vi faris laŭ via promeso, kaj vi estas libera: libera reiri al nutraĵo kaj ripozo, kien ajn vi volas iri, krom al servistoj de la Malamiko. Kaj iam mi eble rekompencos vin, mi aŭ tiuj, kiuj memoros min.

— Ne, ne, ankoraŭ ne, — Golumo vekriis. — Ho ne! Ili ne povas mem trovi la vojon, ĉu? Ho ne efektive. Venos la tunelo. Smeagolo devas pluiri. Sen ripozo. Sen nutraĵo. Ankoraŭ ne.

Ĉapitro 9

LA FIKUŜEJO DE ŜELOBA

Eble ja estis nun tago, kiel diris Golumo, sed la hobitoj povis vidi malmulte da diferenco, krom, eble, ke la ĉielo supre estis malpli nigrega, pli simila al granda fumtegmento; dum anstataŭ la mallumo profundnokta, kiu plu ŝvebis en fendetoj kaj truoj, griza malklariga ombro vualis la ŝtonan mondon ĉirkaŭ ili. Ili pluiris, Golumo antaŭe kaj la hobitoj unu apud la alia, supren laŭ la longa ravino inter la pilastroj kaj kolonoj el ŝirita kaj veterumita roko starantaj kvazaŭ grandegaj senformaj statuoj ambaŭflanke. Malestis sonoj. Iom antaŭe, eble unu-du mejlojn, estis griza murego, lasta suprenŝovita maso da monta ŝtono. Pli malhela ĝi baŭmis, kaj grade altiĝis, dum ili proksimiĝis, ĝis ĝi turumis alte super ili, barante vidon al ĉio, kio troviĝis poste. Profunda ombro kuŝis antaŭ ĝia subo. Sam snufis la aeron.

— Aĥ! Tiu fetoro! — li diris. — Ĝi pli kaj pli fortiĝas.

Baldaŭ ili estis sub la ombro, kaj tie meze de ĝi ili vidis la enirejon de kaverno.

— Jen la eniro, — diris Golumo mallaŭte. — La eniro de la tunelo.

Li ne prononcis ĝian nomon: Toreĥo Ungol, Fikuŝejo de Ŝeloba. El ĝi venis odoraĉo, ne la malsana putroodoro en la herbejoj de Morgulo, sed naŭza fetoro, kvazaŭ malpuraĵo nenomebla amasiĝus kaj konserviĝus en la interna mallumo.

— Ĉu jen la sola vojo, Smeagolo? — demandis Frodo.

— Jes, jes, — li respondis. — Jes, ni devos iri nun tiuvoje.

— Ĉu vi volas diri, ke vi jam trairis tiun truon? — diris Sam. — Fu! Sed eble ne malplaĉas al vi fiodoroj.

La okuloj de Golumo ekbrilis.

— Li ne scias, kio ne malplaĉas, ĉu, trezoro? Ne, li ne scias. Sed Smeagolo kapablas toleri. Jes. Li trairis, ho jes, tute trairis. Ĝi estas la sola vojo.

— Kaj kio kreas la fiodoron, mi scivolas, — diris Sam. — Ĝi similas... nu, mi ne volonte dirus. Iu besteca truo de la orkoj, mi garantias, kun ilia centjara malpuraĵo interne.

— Nu, — diris Frodo, — kun aŭ sen orkoj, se ĝi estas la sola vojo, ni devos iri ĝin.

Profunde enspirinte ili eniris. Post kelkaj paŝoj ili troviĝis en komplete kaj nepenetrebla mallumo. Post la senlumaj koridoroj de Morio Frodo kaj Sam ne spertis tian malhelon, kaj se eble tiu ĉi estis pli profunda kaj pli densa. Tie troviĝis aero moviĝanta, kaj eĥoj, kaj sento de spaco. Ĉi tie la aero estis senmova, stagna, peza, kaj bruoj mortfalis. Ili marŝis kvazaŭ en nigra vaporo kreita el vera mallumo mem, kiu spirate blindigis ne nur la okulojn, sed ankaŭ la menson, tiel ke eĉ memoro pri koloroj kaj formoj kaj iu ajn lumo forvelkis de la pensado. Nokto ĉiam estis, kaj ĉiam estos, kaj nokto estis ĉio.

Sed dum iom da tempo ili povis ankoraŭ senti, kaj fakte la sentumoj de iliaj piedoj kaj fingroj komence ŝajnis akritigitaj preskaŭ dolore. La muroj sentiĝis, je ilia surprizo, glataj, kaj la planko, escepte de paŝo de tempo al tempo, estis rekta kaj ebena, ĉiam supriĝanta laŭ sendevia kruta deklivo. La tunelo estis alta kaj larĝa, tiel larĝa ke, kvankam la hobitoj marŝis unu apud la alia, nur tuŝante la murojn per la etenditaj brakoj, ili estis disigitaj, izolitaj en la mallumo.

Golumo eniris la unua kaj ŝajnis nur kelkajn paŝojn antaŭe. Dum ili ankoraŭ povis atenti tiajn aferojn, ili povis aŭdi lian spiron siblanta kaj anhelanta ĝuste antaŭ ili. Sed post kelka tempo iliaj sentumoj iĝis malpli fortaj, tiel tuŝado kiel aŭdado ŝajnis sensentiĝi, kaj ili pluiris palpante, marŝante, ĉiam antaŭen, ĉefe pro la forto de la volo, laŭ kiu ili eniris, volo trairi kaj deziro atingi finfine la altan pordon transe.

Antaŭ ol ili progresis tre multe, eble, tamen tempo kaj distanco baldaŭ ĉesis kalkulebli, Sam dekstre, palpante la muron, konsciiĝis pri alia aperturo ĉeflanke: dum momento li rimarkis malfortan spiron de aero malpli densa, kaj poste ili preterpasis ĝin.

— Troviĝas pli ol unu koridoro ĉi tie, — li flustris pene: ŝajnis malfacile sonigi sian spiron. — Tio ĉi estas loko tiel orkeca, kiel loko iam povus esti.

Post tio, unue li dekstre, kaj poste Frodo maldekstre, preterpasis tri-kvar similajn aperturojn, iujn pli larĝajn, iujn pli malgrandajn; sed ankoraŭ la ĉefa vojo estis nedubebla, ĉar tiu estis rekta kaj sendevia, kaj ĝi daŭre supreniris. Sed kiom longa ĝi estis, kiom pli el ĝi ili devos toleri, aŭ povos toleri? La senspireco de la aero plifortiĝis, dum ili supreniris; kaj nun en la blindiga senlumo ili ofte ŝajnis senti ian reziston pli densan ol la fia aero. Dum ili puŝis sin antaŭen, ili sentis ion

ektuŝanta la kapojn, aŭ la manojn, longajn tentaklojn, aŭ pendajn kreskaĵojn eble: ili ne povis konstati, kio estas tio. Kaj daŭre la fiodoro plifortiĝis. Ĝi plifortiĝis, ĝis preskaŭ ŝajnis al ili, ke flaro estas la sola sentumo klara, kiu restas al ili, kaj tio estas por turmenti ilin. Unu horon, du horojn, tri horojn: kiom ili jam pasigis en tiu ĉi senluma truo? Horojn... prefere tagojn, semajnojn. Sam forlasis la tunelflan-kon kaj kuntiriĝis al Frodo, kaj iliaj manoj renkontiĝis kaj kroĉiĝis, kaj tiel ili kune pluiris ankoraŭ.

Fine Frodo, palpante laŭ la maldekstra muro, subite alvenis vak-ejon. Li preskaŭ falis flanken en la malplenon. Tie estis iu aperturo en la roko multe pli larĝa ol iuj en la jam preterpasitaj; kaj el ĝi venis fetoro tiel fia kaj sento pri embuska malico tiel intensa, ke Frodo ŝanceliĝis. Kaj tiumomente ankaŭ Sam skuiĝis kaj falis antaŭen.

Rezistante tiel la naŭzon kiel la timon, Frodo kroĉis la manon de Sam.

— Stariĝu! — li diris per raŭka senvoĉa spiro. — Ĉio originas ĉi tie, la fetoro kaj la danĝero. Venis la tempo! Rapidu!

Utiligante la restaĵon de siaj forto kaj kuraĝo, li trene starigis Samon, kaj devigis moviĝi siajn proprajn membrojn. Sam stumble akompanis lin. Unu paŝon, du paŝojn, tri paŝojn... finfine ses paŝojn. Eble ili jam pasis la teruran nevideblan aperturon, sed ĉu tiel estis aŭ ne, subite estis pli facile moviĝi, kvazaŭ iu malamikeca volo momente liberigus ilin. Ili baraktis antaŭen, ankoraŭ man-en-mane.

Sed preskaŭ tuj ili frontis novan malfacilon. La tunelo disdubiĝis, aŭ tiel ŝajnis, kaj pro la mallumo ili ne sciis, kiu vojo estas pli larĝa, aŭ kiu el ili pluiras pli rekte. Kiun el ili laŭiri, ĉu la dekstran, aŭ la maldekstran? Ili sciis pri neniuj gvidindiko, tamen malĝusta elekto estos preskaŭ certe fatala.

— Laŭ kiu vojo iris Golumo? — anhelis Sam. — Kaj kial li ne atendis?

— Smeagolo! — diris Frodo, klopodante voki. — Smeagolo! — Sed lia voĉo raŭkis, kaj la nomo mortfalis preskaŭ tuj post eliro. Venis neniuj respondo, eĉ ne eĥo, eĉ ne tremeto de l' aero.

— Li vere foriris ĉi-foje, mi kredas, — murmuris Sam. — Mi opinias, ke ĝuste ĉi tien li intencis gvidi nin. Golumo! Se iam mi metos la manojn al vi denove, vi tion bedaŭros.

Baldaŭ, palpante mallerte en la mallumo, ili konstatis, ke la maldekstra aperturo estas barita: aŭ ĝi estis ruzo aŭ iu ŝtonego falis en la koridoron.

— Tio ĉi ne povas esti la vojo, — Frodo flustris. — Prave aŭ malprave ni devos iri laŭ la alia.

— Kaj rapide! — Sam anhelis. — Io pli malbona ol Golumo proksimas. Mi sentas ion, kio rigardas nin.

Ili ne progresis pli ol kelkajn paŝojn, kiam de malantaŭe aŭdiĝis sono, timiga kaj terura en la peza remburita aero: gargara bobela bruo kaj longa malica siblo. Ili abrupte turniĝis sed nenio estis videbla. Ŝtone senmovaj ili staris, gapante, atendente ion nekonatan.

— Embusko! — diris Sam, kaj li metis manon sur la tenilon de sia glavo; kaj farante tion li pensis pri la mallumo en la tumulto, el kiu ĝi venis. “Mi volus, ke maljuna Tom estus nun apude!” — li pensis. Tiam, starante kun mallumo ĉirkaŭe kaj nigro de malespero kaj kolero en sia koro, ŝajnis al li, ke li vidas lumon: lumon en sia menso, unue preskaŭ netolereble brilan, kiel sunradio al la okuloj de iu longe kaŝita en senfenestra ŝakto. Poste la lumo iĝis koloroj: verdo, oro, arĝento, blanko. Tre fore, kvazaŭ en bildeto desegnita de elfaj fingroj, li vidis la Damon Galadriela staranta sur la herbo en Lorieno, kaj en ŝiaj manoj estis donacoj. *Kaj vi, Ringoportanto*, li aŭdis ŝin diri, fore sed klare, *por vi mi preparis tion ĉi*.

La bobela siblo pliproksimiĝis, kaj aŭdiĝis grincado kvazaŭ de iu artikitaĵo, kiu moviĝus lantcele en la mallumo. Fetoro venis antaŭ ĝi.

— Mastro, mastro! — kriis Sam, kaj viglo kaj urĝo revenis al lia voĉo. — La donaco de l’ Damo! La stelvitro! Lumo por vi en lokoj senlumaj, ŝi diris, ke tio ĝi estos. La stelvitro!

— Ĉu la stelvitro? — murmuris Frodo, kvazaŭ respondante el dormo, apenaŭ komprenante. — Nu, jes! Kial mi forgesis ĝin? *Lumo kiam ĉiuj aliaj lumoj estingiĝos!* Kaj nun vere nur lumo povos helpi nin.

Malrapide lia mano iris al lia sino, kaj malrapide li levis la Flakoneton de Galadriela. Dum momento ĝi ardis, malforta kiel supreniranta stelo baraktanta en pezaj terproksimaj nebuletoj, kaj poste kiam ĝia potenco plifortiĝis, kaj espero kreskis en la menso de Frodo, ĝi komencis fajri, kaj ĉendiĝis al arĝenta flamo, eteta kerno de blinduma lumo, kvazaŭ Erendilo mem descendus de la altaj sunsubiraj padoj kun la lasta Silmarilo sur la frunto. La mallumo cedis lokon al ĝi, ĝis ĝi ŝajnis brili en la centro de globo el aereca kristalo, kaj la mano ĝin tenanta flagris je blanka fajro.

Frodo gapis mirigite al tiu mirinda donaco, kiun li tiom longe portadis, ne diveninte ĝiajn plenajn valoron kaj potencon. Malofte li memoris pri ĝi survoje, ĝis ili venis al la Morgula Valo, kaj neniam li uzis ĝin pro timo pri ĝia riveliga lumo.

— *Aiyya Eärendil Elenion Ancalima!* — li kriis kaj ne sciis, kion li prononcis; ĉar ŝajnis, ke alia voĉo parolis per la lia, klara, neĝenata de la fia aero en la ŝakto.

Sed aliaj potencoj troviĝas en Mez-Tero, potencoj de nokto, kaj ili estas malnovaj kaj fortaj. Kaj ŝi, kiu marŝis en la mallumo, aŭdis la elfojn krei tiun krion praprae en la tempoprofundoj, kaj tiam ŝi ignoris ĝin, kaj nun ĝi ne malkuraĝigis ŝin. Eĉ dum Frodo parolis, li sentis grandan malicon direktitan al li, kaj mortigeman rigardon taksantan lin. Ne malproksime en la tunelo, inter ili kaj la aperturo, kie ili ŝanceliĝis kaj stumblis, li konsciiĝis pri okuloj videbliĝantaj, du grandaj garboj de multfenestraj okuloj — la venonta atenco estis finfine senmaskigita. La radiado de la stelvitro estis frakasita kaj resendata de ties mil facetoj, sed malantaŭ la ekbrilo komencis arde interne iu pala mortigema fajro, flamo ĉendita en iu profunda ŝakto de misa pensado. Monstraj kaj abomenindaj estis tiuj okuloj, bestecaj kaj tamen plenaj je intenco kaj je hida ĝojeco, frandante sian predon jam enfermitan sen ajna espero pri eskapo.

Frodo kaj Sam, hororfrapite, komencis malrapide retroiri, kun la propra rigardo kaptita de la terura gapado de tiuj misaŭguraj okuloj; sed dum ili retroiris, samtempe la okuloj venis antaŭen. La mano de Frodo hezitis, kaj malrapide la Flakoneto ekpendis. Tiam subite, liberigite de la retena sorĉo por iom kuri en vana paniko por amuzi la okulojn, ili ambaŭ turnis sin kaj fuĝis kune; sed dum ili kuris, Frodo retrorigardis kaj vidis terurite, ke la okuloj tuj saltante sekvis ilin. La fiodoro de morto nubece ĉirkaŭis ilin.

— Haltu, haltu! — li kriis febre. — Kurado ne utilas.

La okuloj malrapide proksimiĝis.

— Galadriela! — li vokis, kaj streĉante sian kuraĝon li ankoraŭfoje levis la Flakoneton. La okuloj haltis. Momente ties rigardo malstreĉiĝis, kvazaŭ ĝenus ilin ia svaga dubo. Tiam la koro de Frodo flamiĝis en li, kaj ne pensante pri la faro, ĉu tio estis stulto, malespero aŭ kuraĝo, li prenis per la maldekstra mano la Flakoneton, kaj per la dekstra li elingigis sian glavon. Pikilo ekflagris, kaj la akra elfa klingo ekbrilis en la arĝenta lumo, sed ĉe la eĝoj flagris blua fajro. Poste,

tenante alte la stelon kaj kun la glavo antaŭ si, Frodo, hobito el la Provinco, marŝis senŝancele suben renkonte al la okuloj.

Tiuj hezitemis. Dubo aperis en ili, kiam la lumo proksimiĝis. Unu post unu ili malfortiĝis, kaj malrapide retiris sin. Neniu helo tiom terura iam antaŭe afliktis ilin. De suno kaj luno kaj steloj ili estis sekuraj sub la tero, sed nun stelo descendis en la teron mem. Daŭre ĝi proksimiĝis, kaj la okuloj ekŝanceliĝis. Unu post alia ili ĉiuj senlumigis; ili forturniĝis, kaj granda maso, ekster atingo de la lumo, ĵetis sian ombregon intere. Ili estis for.

— Mastro, mastro! — kriis Sam. Li proksimis malantaŭe, kun propra glavo elingigita kaj preta. — Je la steloj kaj gloro! Ja la elfoj faros el tio kanton, se iam ili aŭdos pri ĝi! Ke mi travivu por rakonti ĝin al ili kaj aŭdi ilian kantadon. Sed ne pluiru, mastro! Ne subiru al tiu fikuŝejo! Nun ni disponas pri la sola ebleco. Nun ni foriru el tiu ĉi fia truo!

Kaj sekve ili turniĝis ankoraŭfoje, unue marŝis kaj poste kuris; ĉar dum la iro, la tunela planko supreniris apike, kaj ĉiupaŝe ili grimpis pli alten super la fetorojn de l' nevidebla fikuŝejo, kaj forto revenis al la membroj kaj koroj. Sed daŭre la malamego de l' Rigardanto embuskis malantaŭe, provizore blinda eble, tamen nevenkita, plu celanta mortigon. Kaj nun venis renkonte al ili aerfluo, malvarma kaj maldensa. La aperturo, la tunela ekstremo, finfine troviĝis antaŭ ili. Anhele, sopirante al loko sentegmenta, ili ĵetis sin antaŭen; kaj poste ili mirigite ŝanceliĝis, retrostumblante. La eliron baris iu barilo, sed ne el ŝtono: mola kaj iom cedema ĝi ŝajnis, kaj tamen forta kaj nepenetrebla; aero trafiltiriĝis, sed eĉ ne brileto de lumo. Ankoraŭfoje ili impetis antaŭen kaj estis reĵetitaj.

Alte tenante la Flakoneton, Frodo vidis antaŭ si grizecon, kiun la radiado de la stelvitro ne penetris kaj ne lumigis, kvazaŭ ĝi estus ombro, kiun, ĉar ne kreis ĝin lumo, nenia lumo povas forigi. Tra la larĝo kaj alto de la tunelo vasta araneaĵo estis teksita, orda kiel teksaĵo de iu granda araneo, sed pli dense teksita kaj multe pli granda, kaj ĉiu fadeno dika kiel ŝnurego.

— Araneaĵoj! — Sam ridis malafable. — Ĉu nur tio? Araneaĵoj! Tamen kia araneo! Ek al ili, suben ili!

Furioze li ekhakis ilin per sia glavo, sed la fadeno, kiun li frapis, ne rompiĝis. Ĝi iomete cedis kaj poste resaltis kiel liberigita pafarka ŝnureto, forturnante la klingon kaj suprenĵetante la brakon kaj la

glavon. Trifoje Sam batis per sia tuta forto, kaj fine unu fadeno el la sennombraj fadenoj tratranĉiĝis kaj tordiĝis, kirliĝante kaj vipante tra la aero. Unu el ĝiaj ekstremaĵoj vipis la manon de Sam, kaj li ekkriis pro l' doloro, retrosaltante kaj metante la manon al la buŝo.

— Necesos tagoj por liberigi la vojon tiumaniere, — li diris. — Kion fari? Ĉu revenis tiuj okuloj?

— Ne, nevideblas, — diris Frodo. — Sed mi plu sentas, ke ili rigardas min aŭ pensas pri mi: eble pretigas novan planon. Se tiu ĉi lumo malleviĝus, aŭ se ĝi estingiĝus, ili rapide revenus.

— Kaptitaj en la fino! — amare diris Sam, dum lia kolero fortiĝis denove malgraŭ laco kaj malespero. — Kuloj en reto. La kondamno de Faramiro mordu tiun Golumon kaj mordu lin rapide!

— Tio ĵam ne helpus nin, — diris Frodo. — Ek! Ni vidu, kion kapablas Pikilo. Ĝi estas klingo elfa. Ekzistis araneaĵoj teruraj en la malhelaj ravinoj de Belerlando, kie ĝi estis forĝita. Sed vi devos esti gardanto kaj malhelpi revenon de l' okuloj. Jen, prenu la stelvitron. Ne timu. Alte tenu ĝin kaj sentinelu!

Poste Frodo alpaŝis la grandan grizan reton kaj hakis ĝin laŭ larĝa balaa frapo, trenante l' amaran eĝon rapide tra eskalo de denspendaj kordoj, kaj tuj forsaltis. La blubрила klingo traŝiris ilin kiel falĉilo herbon, kaj ili saltis kaj tordiĝis kaj poste pendis nestreĉite. Granda ŝiraĵo estis kreita.

Baton post bato li faris, ĝis fine la tuta teksaĵo en lia ĝisatingo estis frakasita, kaj la supra parto bloviĝis kaj skuiĝis kiel nefiksita vualo pro la envenanta venteto. La kaptilo estis rompita.

— Venu! — kriis Frodo. — Antaŭen! Antaŭen! — Sovaĝa ĝojo pro ilia eskapo el la faŭko mem de malespero subite plenigis lian tutan menson. Lia kapo turniĝis kvazaŭ pro gluto de fortega vino. Li trasantis, kriante dum la irado.

Ŝajnis lume en tiu malhela lando al la okuloj, kiuj trapasis la fikuŝejon de nokto. La grandaj fumoj jam leviĝis kaj maldensiĝis, kaj pasis la lastaj horoj de tago sombra; la ruĝa ardo de Mordoro jam formortis en subbrula ombreco. Tamen ŝajnis al Frodo, ke li rigardas matenon de subita espero. Preskaŭ li atingis la supraĵon de la muro. Nur iomete pli alten. La fendego Cirito Ungol estis antaŭ li, malklara noĉo en la nigra firsto, kaj la rokaj kornoj nigrumis sur la ĉielo ambaŭflanke. Mallonga vetkuro, sprintista distanco, post kiu li trapasos!

— Al la pasejo, Sam! — li kriis, malatentante la kriĉon de sia voĉo, kiu liberigite de la sufoka aero en la tunelo jam sonoris alte kaj senbride. — Al la pasejo! Kuru, kuru, kaj ni trapasos, trapasos antaŭ ol iu povos malhelpi nin!

Sam venis malantaŭe tiel rapide, kiel eblis urĝi la krurojn; sed kvankam li ĝojis esti libera, li estis maltrankvila, kaj dum li kuris, li ofte retrorigardis al la malhela arkaĵo de l' tunelo, timante vidi la okulojn, aŭ iun figuron neimageblan, elsaltintan persekute. Tro malmulte li kaj lia mastro konis la ruzon de Ŝeloba. Ŝi havis multajn elirojn el sia fikuŝejo.

Tie pralonge ŝi loĝis, malicaĵo en formo araneeca, ĝuste tia, kia antikve loĝis en la Lando de la Elfoj en tiu okcidento nun submara, kian Bereno kontraŭbatalis en la Montoj de Teruro en Doriato, kaj tiel alvenis Lutienan sur la verda herbejo inter la cikutoj antaŭlonge en la lunlumo. Kial Ŝeloba venis tien, fuĝante el ruino, rakontis neniu historio, ĉar el la Malhelaj Jaroj venis nur malmultaj rakontoj. Sed tamen tie troviĝis ŝi, kiu aperis tie antaŭ Saŭrono, kaj antaŭ la unua ŝtono de Baraduro; kaj ŝi servis neniun krom sin mem, trinkante la sangon de elfoj kaj homoj, pufiĝinte kaj grasiĝinte pro senfina kovado de siaj festenoj, teksante araneaĵojn el ombro; ĉar ĉiuj vivantoj estis ŝia nutraĵo, kaj ŝia vomo mallumo. Disvastigante ŝiajn malsuperajn kovaĵojn, bastardoj de l' mizeraj paruloj, la propraj idoj, kiujn ŝi mortigis, disiris de valo al valo, de Efelo Duad ĝis la orientaj montetoj, ĝis Dol Gulduro kaj la fortikaĵoj de Mornarbaro. Sed neniu povis rivali ŝin, Ŝeloban la Grandan, la lastan idon de Ungolianta, kiu ĝenis la malfeliĉan mondon.

Jam antaŭ jaroj Golumo vidis ŝin, Smeagolo kiu ŝteliris en ĉiujn malhelajn truojn, kaj li riverencis kaj adoris ŝin, kaj la malhelo de ŝia malica volo marŝis apud li laŭ ĉiuj vojoj de lia laceco, forbarante lin de lumo kaj de bedaŭro. Kaj li promesis alporti al ŝi manĝaĵon. Sed ŝia avido ne estis lia avido. Malmulton ŝi sciis aŭ zorgis pri turegoj, ringoj aŭ io ajn elpensita mense aŭ mane, kiu deziris nur morton al ĉiuj aliaj, mensan kaj korpan, kaj por si mem troabundon de vivo, sola, pufiĝinta, ĝis la montoj ne plu povus subteni ŝin kaj la mallumo ne povus limigi ŝin.

Sed tiu deziro estis ankoraŭ malproksima, kaj longe jam ŝi estis malsata, embuskante en sia fikuŝejo, dum kreskis la potenco de Saŭrono, kaj lumo kaj vivantoj forlasis lian terenon; kaj la urbo en la

valo estis morta, kaj proksimiĝis neniun elfo aŭ homo, nur la malfeliĉaj orkoj. Nutraĵo malbonkvalita kaj singardema. Sed ŝi devis manĝi, kaj, kiam malgraŭ fortostreĉo ili elfosis novajn serpentumajn koridorojn el la pasejo kaj el sia turego, ĉiam ŝi trovis metodon por kapti ilin. Sed ŝi avidis manĝaĵon pli dolĉan. Kaj Golumo kondukis ĝin al ŝi.

— Ni vidos, ni vidos, — li diris ofte al si, kiam malica humoro plenigis lin, dum li iris la danĝeran vojon de Emin Muilo ĝis la valo Morgul, — ni vidos. Eble okazos, ho jes, eble okazos, ke, kiam ŝi forĵetos la ostojn kaj la malplenajn vestaĵojn, ni trovos ĝin, ni akiros ĝin, la Trezoron, kompensaĵon por kompatinda Smeagolo, kiu alportas agrablan manĝaĵon. Kaj ni savos la trezoron, kiel ni promesis. Ho jes. Kaj kiam ni havos ĝin sekure, tiam ŝi scios tion, ho jes, tiam ni repagos ŝin, mia trezoro. Tiam ni repagos al ĉiuj!

Tiel li pensis en interna ĉambro de sia ruzeco, kiun li ankoraŭ esperis kaŝi de ŝi, eĉ kiam li venis al ŝi denove kaj riverencis profunde antaŭ ŝi, dum liaj kunuloj dormis.

Saŭrono sciis, kie ŝi embuskas. Plaĉis al li, ke ŝi loĝas tie malsata sed ne malpli malica, pli certa gardanto sur tiu antikva pado en lian landon ol iu ajn alia, kiun povus elpensi lia lerto. Kaj orkoj estis utilaj sklavoj, sed li havis ilin abunde. Se de tempo al tempo Ŝeloba kaptis ilin por mildigi sian malsaton, li ne domaĝis tion: li povis malhavi ilin. Kaj kelkfoje, kiel homo kiu ĵetas frandaĵon al sia kato (*sia kato* li nomis ŝin, sed ŝi ne agnoskis lin), Saŭrono sendis al ŝi kaptitojn, por kiuj li ne havis alian uzeblecon: li peligis ilin al ŝia truo kaj ordonis raporti al li la ludon, kiun ŝi elpensis.

Tiel ili ambaŭ vivis, ĝojante pri la propraj amuzaĵoj, kaj timis neniun atakon, nek koleron, nek iun ajn finon de sia malico. Neniam ĝis nun eskapis muŝo el la araneaĵoj de Ŝeloba, kaj tiom pli grandaj nun estis ŝiaj agitiĝo kaj kolero.

Sed neniam pri tiu malico, kiun ili stimulis kontraŭ si, sciis kompatinda Sam, krom ke timo fortiĝas en li, minaco, kiun li ne povis vidi; kaj tiom peza fariĝis tio, ke kuri estis por li ŝarĝo, kaj liaj piedoj ŝajnis plumbaj.

Teruro ĉirkaŭis lin, kaj malamikoj estis antaŭ li en la pasejo, kaj lia mastro fantazihumore kuradis senpripense renkonte al ili. Forturnante siajn okulojn de la ombro malantaŭa kaj la profunda morno sub la klifo maldekstre, li rigardis antaŭen, kaj du aferojn li vidis, kiuj fortigis lian konsternon. Li vidis, ke la glavo, kiun Frodo plu tenis

elingigite, briletas je blua flamo; kaj li vidis, ke la fenestro en la turego ankoraŭ ardas ruĝe.

— Orkoj! — li murmuris. — Ni neniam preteriros tiamaniere. Orkoj ĉeestas, kaj pli malbonaj ol orkoj.

Reirante haste al sia longedaŭra kutimo de sekreteco, li fermis sian manon ĉirkaŭ la valora Flakoneto, kiun li ankoraŭ portis. Ruĝa pro lia propra viva sango, lia mano momente ekbrilis, kaj poste li ŝovis la rivelan lumon profunde en poŝon proksiman al sia sino kaj volvis sin en sia elfa mantelo. Nun li provis rapidigi siajn paŝojn. Lia mastro distanciĝis de li; jam li estis antaŭa ĉirkaŭ dudek paŝojn, flirtante plu kvazaŭ ombro; baldaŭ li ne plu videblos en tiu mondo griza.

Apenaŭ Sam kaŝis la lumon de la stelvitro, jam ŝi venis. Iomete antaŭe kaj maldekstre li subite vidis, eliĝantan el nigra ombrotruo sub la klifo, la plej abomenindan figuron, kiun li iam rigardis, naŭzegan pli ol la teruro de malbonega sonĝo. Ŝi plej similis araneon, sed pli granda ol la grandaj ĉasbestoj, kaj pli timiga ol ili pro la malica intenco en ŝiaj senkompataj okuloj. Tiuj samaj okuloj, kiujn li supozis timigitaj kaj venkitaj, jen ili lumis denove je lumo misaŭgura, grapolitaj sur ŝia antaŭenŝovita kapo. Grandajn kornojn ŝi havis, kaj malantaŭ ŝia mallonga tigsimila kolo estis ŝia grandega ŝvelinta korpo, vasta pufa sako, balanciĝanta kaj sinkanta inter ŝiaj kruroj; ĝia granda supro estis nigra, makulita per grizaj makuloj, sed la ventro sube estis pala kaj fosforeska kaj eligis fiodoron. Ŝiaj kruroj estis kurvaj, kun grandaj nodaj artikoj super ŝia dorso, kaj kun haroj kiuj elstaris ŝtalpikile, kaj ĉe la ekstremo de ĉiu kuro estis pinĉilo.

Tuj kiam ŝi elpuŝis sian molan plaŭdan korpon kaj la kunfalditajn membrojn el la supera eliro de sia fikuŝejo, ŝi moviĝis terure rapide, jen kurante sur la grincaj kruroj, jen farante subitan salton. Ŝi estis inter Sam kaj ties mastro. Aŭ ŝi ne vidis Samon, aŭ ŝi provizore evitis lin kiel lumportinton, kaj direktis sian tutan intencon al unu predo, al Frodo senigita de sia Flakoneto, kuranta senatente laŭ la pado, ankoraŭ senscia pri sia danĝero. Rapide li kuris, sed Ŝeloba pli rapidis; post kelkaj saltoj ŝi kaptos lin.

Sam anhelis kaj kolektis la tutan restantan spiron por krii.

— Gardu vin malantaŭe! — li kriegis. — Atentu, mastro! Mi estas... — sed subite lia krio estis sufokita.

Longa malseketa mano kovris lian buŝon kaj la alia kaptis lian

kolon, dum io volviĝis ĉirkaŭ lian kruron. Surprize kaptite li falis malantaŭen en la brakojn de l' atakinto.

— Kaptis lin! — siblis Golumo kontraŭ lia orelo. — Fine, mia trezoro, ni kaptis lin, jes, la malafablan hobiton. Ni prenas ĉi tiun. Ŝi prenos la alian. Ho jes, Ŝeloba prenos lin, ne Smeagolo: li promesis; li tute ne dolorigos la mastron. Sed vin li havas, vi, malafabla fia ŝteliranto! — Li kraĉis sur la nukon de Sam.

Furiozo pro la perfido kaj feroce pro la malhelpo, kiam lia mastro estis en mortdanĝero, havigis al Sam subitajn perfortemon kaj forton pli grandajn ol Golumo atendis de tiu malhasta stulta hobito, kia supozis lin Golumo. Eĉ Golumo mem ne povus pli rapide aŭ pli feroce tordi sin. Lia teno sur la buŝo de Sam ekglitis, kaj Sam ekkaŭris kaj ree ŝoviĝis antaŭen, klopodante forŝiri sin de la kroĉo ĉe lia kolo. Lia glavvo estis ankoraŭ en la mano, kaj sur lia maldekstra brako, pendante sur ŝnureto, estis la bastono de Faramiro. Feroce li provis turni sin kaj trapiki sian malamikon. Sed Golumo pli rapidis. Lia longa brako elŝoviĝis, kaj li kroĉis la manradikon de Sam: liaj fingroj similis ŝraŭbtenilon; malrapide kaj senkompate li kurbigis malsupren kaj antaŭen la manon, ĝis dolorkrie Sam malkroĉis la glavon kaj ĝi falis teren; kaj la tutan tempon la alia mano de Golumo pli forte premis la gorĝon de Sam.

Tiam Sam provis sian lastan trukon. Per sia tuta forto li fortiris sin kaj firme starigis siajn piedojn; poste li subite puŝegis siajn krurojn kontraŭ la teron kaj tutpotence ĵetis sin malantaŭen.

Ne atendinte de Sam eĉ tiun simplan trukon, Golumo falis kun Sam supre, kaj li ricevis la tutan pezon de l' fortika hobito sur sian ventron. Akra siblo eliĝis el li, kaj momente lia mano ĉe la gorĝo de Sam malstriktiĝis; sed liaj fingroj daŭre tenis la glavon. Sam ŝiris sin antaŭen kaj foren, kaj stariĝis, kaj poste li giris dekstren, pivote laŭ la manradiko tenata de Golumo. Kaptinte la bastonon per sia maldekstra mano, Sam svingis ĝin supren, kaj jen ĝi descendis kun fajfa klako sur la etenditan brakon de Golumo, tuj sub la kubuto.

Kriĉe Golumo malkroĉiĝis. Tiam Sam atakis; sen paŭzo por transdoni la bastonon de maldekstre dekstren li faris alian sovaĝan baton. Serpentrapide Golumo glisis flanken, kaj la bato celinta lian kapon trafis lian dorson. La bastono rompiĝis. Tio sufiĉis al li. Kroĉiĝo de malantaŭe estis malnova manovro lia, kaj malofte li malsukcesis pri tio. Sed ĉi-foje erarigita de malico, li maltrafe parolis kaj frandumis antaŭ ol ambaŭ manoj kaptis la kolon de l' viktimo. Lia bela plano tute

fuŝiĝis, kiam tiu abomena lumo tiel neatendite aperis en la mallumo. Kaj nun li frontis furiozan malamikon ne multe pli malgrandan ol li. Tiu ĉi lukto ne konvenis al li. Sam fulmrapide levis de la tero sian glavon kaj suprenigis ĝin. Golumo kriĉis kaj saltinte flanken li kvarpiede foriĝis per unu raneca saltego. Antaŭ ol Sam povis atingi lin, li foriris, kurante mirinde rapide reen al la tunelo.

Glavenmane Sam sekvis lin. Momente li forgesis ĉion alian krom la ruĝa furiozo en sia cerbo kaj la deziro mortigi Golumon. Sed antaŭ ol li povis atingi lin, Golumo estis for. Tiam dum la senluma truo estis antaŭ li kaj la fiodoro eliĝis renkonte al li, penso pri Frodo kaj la monstro tondrobate trafis la menson de Sam. Li turnis sin kaj kuregis ekscitite laŭ la pado, ĉiam denove vokante la nomon de sia mastro. Sed tro malfrue. Tiugrade la insido de Golumo prosperis.

Ĉapitro 10

LA ALTERNATIVO DE MASTRO SAMSAĜO

Frodo kuŝis dorsaltere, kaj la monstro kliniĝis super li, tiel koncentrita al sia viktimo, ke ŝi malatentis Samon kaj ties kriojn, ĝis li tre proksimis. Alkuregante li vidis, ke Frodo estas jam ligita per ŝnuroj, ĉirkaŭvolvita de maleoloj ĝis ŝultroj, kaj la monstro per siaj grandaj antaŭkruroj komencas duonlevi, duontreni for lian korpon.

Proksime de li kuŝis, brilanta sur la tero, lia elfa klingo, kie ĝi falis senutila el lia mano. Sam ne atendis por cerbumi, ĉu li estas kuraĝa, lojala aŭ kolera. Li saltis antaŭen kriante kaj kroĉis la glavon de l' mastro per la maldekstra mano. Poste li atakis. Neniun atakon pli ferocan iam atestis la sovaĝa mondo de la bestoj, kie iu furioza kreaĵeto armita per etaj dentoj, sola, volonte alsaltas turon el korno kaj felo, kiu staras super ĝia falinta parulino.

Perturbite kvazaŭ dum franda revo per lia krieto, ŝi turnis malrapide la teruran malicon de sia rigardo al li. Sed preskaŭ antaŭ ol ŝi konstatis, ke atakas ŝin furiozo pli granda ol iu ajn, kiun ŝi konis dum sennombraj jaroj, la brila glavo mordis ŝian piedon kaj fortranĉis la pinĉilon. Sam ensaltis en la arkaĵon de ŝiaj kruroj, kaj per vigla suprenŝovo de l' alia mano alpikis la grapolajn okulojn sur ŝia klinita kapo. Unu okulego estingiĝis.

Nun la impertinentulo estis rekte sub ŝi, momente neatingebla per ŝia pikilo kaj ŝiaj pinĉiloj. Ŝia ventregio estis super li kun sia putra lumo, kaj ties fetoro preskaŭ terenbatis lin. Tamen lia furiozo restis por ankoraŭ unu bato, kaj antaŭ ol ŝi povis sinki sur lin, sufokante lin kaj lian tutan impertinentan etan kuraĝon, li tranĉostrekis la brilan elfan klingon trans ŝin kun senespera forto.

Sed Ŝeloba ne estis drakeca, al ŝi mankis parto pli mola ol nur ŝiaj okuloj. Nodoza kaj kavetoza pro putriĝo estis ŝia pramalnova felo, sed daŭre densigita de interne per tavolo post tavolo da fikreskaĵo. La klingo strekis sur ĝi teruran tranĉon, sed tiuj hidaj faldajoj ne estis penetrebaj per ajna homa forto, eĉ se elfo aŭ gnomo forĝus la ŝtalon aŭ la mano de Bereno aŭ de Turino svingus ĝin. Ŝi cedis al la bato, kaj

poste ŝi levegis la grandan sakon de sia ventro alten super la kapo de Sam. Veneno ŝaŭmis kaj bobelis el la vundo. Dismetinte siajn krurojn, ŝi subenŝovis sian enorman bulaĵon al li denove. Tro baldaŭ. Ĉar Sam ankoraŭ staris kaj, lasinte fali sian propran glavon, li per ambaŭ manoj tenis la elfan klingon pintalsupre por forbari tiun naŭzan tegmenton; kaj tial Ŝeloba pro la pela potenco de la propra kruela volo, per forto pli granda ol ajna soldata mano, ŝovis sin sur la fatalan pikilon. Profunden, profunden ĝi pikis, dum Sam estis malrapide premata teren.

Tian doloregon Ŝeloba neniam spertis, aŭ prisonĝis, en la tuta longa mondo de sia malicego. Ne la plej brava soldato el antikva Gondoro, nek la plej sovaĝa kaptita orko, iam ajn frontis ŝin aŭ pikis al ŝia amata karno. Trapasis ŝin tremego. Ree levegante sin, fortirante sin de la doloro, ŝi kurbigis sub si la tordiĝantajn membrojn kaj konvulsie retrosaltegis.

Sam estis surgenua apud la kapo de Frodo, liaj sentumoj kirliĝis pro la fiodoro, dum liaj du manoj daŭre tenis la glavon. Tra la nebulo antaŭ siaj okuloj li malklare konsciis pri la vizaĝo de Frodo, kaj li obstine strebis regi sin kaj sin treni el la sveno, kiu minacis lin. Malrapide li levis sian kapon kaj vidis ŝin, nur kelkajn paŝojn for, okulumanta lin, dum ŝia beko gutigis sputon de veneno, kaj verda ŝlimo fluetis de sub ŝia vundita okulo. Tie ŝi kaŭris, la tikega ventro disŝovita sur la tero, la grandaj arkaĵoj de ŝiaj kruroj tremantaj, dum ŝi kuntiriĝis por nova salto — ĉi-foje por premi kaj piki ĝismorte: neniun mordeto de veneno por senmovigi la baraktadon de ŝia viando; ĉi-foje por mortigi kaj disŝiri.

Ĝuste kiam Sam mem ekkaŭris, rigardante ŝin, vidante sian morton en ŝiaj okuloj, venis al li ekpenso, kvazaŭ parolus iu fora voĉo, kaj li palpserĉis en sia sino per la maldekstra mano, kaj trovis tion, kion li serĉis: malvarma, malmola kaj solida ĝi ŝajnis laŭ lia tuŝo en fantoma mondo de teruro, la Flakoneto de Galadriela.

— Galadriela! — li diris feble, kaj tiam li aŭdis voĉojn malproksimajn tamen klarajn: la kriadon de la elfoj promenantaj sub la steloj en la amataj ombroj de la Provinco kaj la muzikon de la elfoj, kiel tiu penetris lian dormon en la Halo de Fajro en la domo de Elrondo.

Gilthorniel A Elbereth!

Kaj tiam lia lango malligiĝis, kaj lia voĉo kriis en la lingvo, kiun li ne konis:

*A Elbereth Gilthoniel
o menel palan-diriel,
le nallon sí d'nguruthos!
A tiro nin, Fanuilos!*

Kaj post tio li ŝanceliĝe stariĝis kaj denove iĝis hobito Samsaĝo, filo de Hamfasto.

— Nun venu, fiputraĝo! — li kriis. — Vi damaĝis mian mastron, bruto, kaj tion vi kompensas. Ni pluiros; sed unue ni ekvilibrigos la konton ĉe vi. Venu, kaj gustumu ĝin denove.

Kvazaŭ lia nevenkebla spirito funkciigus ĝian potencon, la vitro subite flamis en lia mano kiel blanka torĉo. Ĝi flamis kiel stelo, kiu saltante el la firmamento brogas la malhelan aeron per lumo netolerebla. Neniu teruraĵo el la ĉielo iam pli frue brulis antaŭ la vizaĝo de Ŝeloba. Ties radioj eniris ŝian vunditan kapon kaj trastrekis ĝin netolerebla doloro, kaj la timiga luminfekto disvastiĝis de okulo al okulo. Ŝi retrofalis batante la aeron per siaj antaŭkuroj, ŝia vido estis eksplodita pro internaj fulmoj, ŝia menso agonias. Poste, forturninte sian vunditan kapon, ŝi ruliĝis flanken kaj komencis rampi, pinĉilon post pinĉilo, al la aperturo en la malhela klifo malantaŭe.

Sam pluiris. Li ŝanceliĝis kiel ebrulo, sed li iris antaŭen. Kaj Ŝeloba finfine senkuraĝigita, ŝrumpinta en malvenko, tikegis kaj tremis, dum ŝi klopodis forrapidi de li. Ŝi alvenis la truon, kaj kuntiriĝinte, postlasante spuron el verda-flava ŝlimo, ŝi englis, ĝuste kiam Sam ŝvingis lastan baton al ŝiaj treniĝaj kruroj. Poste li falis teren.

Ŝeloba estis for; kaj ĉu ŝi restis longe en sia fikuŝejo, vartante sian malicon kaj sian mizeron, kaj dum la lantaj jaroj de mallumo kuracis sin de interne, rekonstruante siajn grapolajn okulojn, ĝis kun malsato mortsimila ŝi denove ŝpinis siajn terurajn kaptilojn en la valoj de la Montoj de Ombro, tion ne rakontas tiu ĉi historio.

Sam restis sola. Lacege, dum la vespero de l' Sennoma Lando trafis la lokon de la batalo, li rampis reen al sia mastro.

— Mastro, kara mastro, — li diris, sed Frodo ne parolis. Kiam li kuris antaŭen, entuziasma, ĝoja pri sia libereco, Ŝeloba hide rapide venis malantaŭ li kaj per unu ekbato pikis lin en la kolo. Li kuŝis nun pala, kaj aŭdis neniun voĉon, kaj ne moviĝis.

— Mastro, kara mastro! — diris Sam kaj atendis dum longa silento, aŭskultante vane.

Poste kiel eble plej rapide li fortranĉis la ligantajn ŝnurojn kaj kuŝigis sian kapon sur la bruston de Frodo kaj al ties buŝo, sed neniun vivmoviĝon li povis trovi, nek sentis plej feblan tremeton de la koro. Ofte li frotis la manojn kaj piedojn de sia mastro, kaj tuŝis lian frunton, sed ili estis malvarmaj.

— Frodo, sinjoro Frodo! — li vokis. — Ne lasu min sola ĉi tie! Vokas via Sam. Ne iru, kien mi ne povos sekvi! Vekiĝu, sinjoro Frodo! Ho vekiĝu, Frodo, kara mia, kara mia. Vekiĝu!

Poste kolero inundis lin, kaj li ĉirkaŭkuris la korpon de sia mastro furioze, pikante la aeron, batante la ŝtonojn kaj kriante defiojn. Baldaŭ li revenis, kaj kliniĝinte rigardis la vizaĝon de Frodo, palan sub li en la krepusko. Subite li konstatis, ke li estas en tiu bildo, kiu estis vidigita al li en la spegulo de Galadriela en Lorieno: Frodo kun pala vizaĝo kuŝanta profunde dorma sub alta malhela klifo. Aŭ tiam li supozis profunde dorma.

— Li mortis! — li diris. — Ne dormas, sed mortis! — kaj dum li diris tion, kvazaŭ la vortoj efikigus denove la venenon, al li ŝajnis, ke la vizaĝo iĝis grize verda.

Kaj tiam trafis lin nigra senespero, kaj Sam kliniĝis al la tero, kaj tiris sian grizan kapuĉon sur la kapon, kaj nokto venis al lia koro, kaj nenion pli li konsciis.

Kaj kiam finfine pasis la nigreco, Sam suprenrigardis, kaj ombroj ĉirkaŭis lin; sed dum kiom da minutoj aŭ horoj la mondo treniĝis plu, li ne sciis. Li estis ankoraŭ en la sama loko, kaj ankoraŭ lia mastro kuŝis mortinta apud li. La montoj ne jam diseriĝis, nek la tero ruin-iĝis.

— Kion mi faru, kion mi faru? — li diris. — Ĉu mi akompanis lin tra la tuta vojaĝo vane? — kaj tiam li rememoris sian propran voĉon, dirinta la vortojn, kiujn tiumomente li mem ne komprenis, komence de ilia vojaĝo: *Ion mi devas fari antaŭ la fino. Mi devas ĝisfini ĝin, sinjoro, se vi min komprenas.*

— Sed kion mi povas fari? Certe ne lasi sinjoron Frodo mortinta, neentombigita supre de la montoj, kaj iri hejmen, ĉu? Aŭ pluiri? Ĉu pluiri? — li ripetis, kaj dum momento skuis lin dubo kaj timo. — Ĉu pluiri? Ĉu tion mi devos fari? Kaj forlasi lin, ĉu?

Tiam finfine li komencis plori; kaj irante al Frodo li ordigis ties korpon, kaj kunmetis la malvarmajn manojn sur lia brusto, kaj volvis

lin en lia mantelo; kaj li kuŝigis la propran glavon unuflanke kaj la bastonon donacitan de Faramiro aliflanke.

— Se mi devos pluiri, tiam mi devos kunpreni vian glavon, laŭ via permeso, sinjoro Frodo, sed mi metos tiun ĉi ĉe via flanko, kiel ĝi kuŝis flanke de l' malnova reĝo en la dolmeno; kaj vi havas vian belan mitrilan veston de maljuna sinjoro Bilbo. Kaj vian stelvitron, sinjoro Frodo, vi ja pruntedonis al mi, kaj mi bezonos ĝin, ĉar ĉiam de nun mi estos en mallumo. Ĝi estas tro valora por mi, kaj la Damo donacis ĝin al vi, sed eble ŝi komprenos. Ĉu komprenas vi, sinjoro Frodo? Mi devos pluiri.

Sed iri li ne povis, ankoraŭ ne. Li genuiĝis kaj tenis la manon de Frodo kaj ne povis liberigi ĝin. Kaj la tempo pasis kaj daŭre li genuis, tenante la manon de sia mastro, kaj debatante en sia koro.

Nun li klopodis trovi forton por forŝiri sin kaj iri solecan vojaĝon al venĝo. Se entute li povus iri, lia kolero portus lin sur ĉiuj vojoj de la mondo, persekute, ĝis li trovus finfine lin: Golumon. Tiam Golumo mortus en angulo. Sed li ekvojaĝis ne por fari tion. Ne valorus forlasi sian mastron por tio. Tio ne revenigus lin. Nenio tion kapablus. Prefere ili ambaŭ estu mortaj kune. Kaj ankaŭ tio estis vojaĝo soleca.

Li rigardis la brilan pinton de la glavo. Li pensis pri tiuj lokoj, malantaŭ kiuj estas nigra limo kaj falo en neniecon. Ne eblis eskapi tiuvoje. Tio estus fari nenion, eĉ ne funebri. Li ekvojaĝis ne por tio.

— Kion do mi devas fari? — li denove kriis, kaj jam li ŝajnis konstati la malfacilan respondon: *daŭrigi ĝis la fino*. Alia soleca vojaĝo, kaj la plej malbona.

— Kio? Ĉu mi, sola, iru ĝis la Fendaĵo de Sorto kaj tiel plu? — li hezitis ankoraŭ, sed la decidemo kreskis. — Kio? Ĉu mi forpenu la Ringon de *li*? Ĝin al li donis la Konsilio.

Sed tuj venis la respondo: “Kaj la Konsilio donis al li kunulojn, por ke la komisiono ne malsukcesu. Kaj vi estas la lasta el la Kunularo. Ne devas malsukcesi la komisiono”.

— Mi volus ne esti la lasta, — li ĝemspiris. — Mi volus, ke estu ĉi tie maljuna Gandolfo aŭ iu. Kial mi restas sola por decidi? Mi certe eraros. Kaj ne estas mia tasko portadi la ringon, ŝovante min antaŭen.

— Sed vi ne ŝovis vin antaŭen; vi estas ŝovita antaŭen. Kaj koncerne tion, ke vi ne estas la ĝusta kaj konvena persono, vidu, sinjoro Frodo ne estis, oni povus diri, nek sinjoro Bilbo. Ili ne elektis sin.

— Nu bone, mi devas decidi mem. Mi tion faros. Sed mi certe

eraros: tio estus tipe de Sam Vato. Mi pripensu: se ĉi tie ni estos trovitaj, aŭ sinjoro Frodo estos trovita, kaj tiu Aĵo estos ĉe li, nu, la Malamiko akiros ĝin. Kaj tiel finiĝos ni ĉiuj, kaj Lorieno, kaj Rivendelo, kaj la Provinco kaj ĉio. Kaj la tempo urĝas, aŭ estos ĉiuokaze la fino. La milito komenciĝis, kaj pli ol probable la aferoj jam favoras la Malamikon. Ne eblas reiri kun Ĝi kaj serĉi konsilon aŭ permeson. Ne, aŭ sidi ĉi tie ĝis ili venos kaj mortigos min sur la korpo de la mastro, kaj akiros Ĝin; aŭ preni Ĝin kaj foriri. — Li profunde enspiris. — Do preni Ĝin!

Li kliniĝis. Tre malabrupte li malligis la agrafon ĉe la kolo kaj glitigis sian manon sub la tunikon de Frodo; alimane levante la kapon li kisis la malvarman frunton, kaj milde forigis trans ĝin la ĉeneton. Kaj poste la kapo denove kuŝis trankvile. Neniu ŝanĝiĝo okazis sur la senmova vizaĝo, kaj pro tio pli ol pro ĉiuj aliaj signoj Sam finfine konvinkiĝis, ke Frodo mortis kaj flankenmetis la Serĉadon.

— Adiaŭ, mastro, mia kara! — li murmuris. — Pardonu vian Sam. Li revenos al tiu ĉi loko, kiam la tasko estos plenumita, se li tion kapablos. Kaj poste li ne plu forlasos vin. Ripozu kviete, ĝis mi revenos, kaj neniuj fibesto proksimiĝu al vi! Kaj se la Damo povus aŭdi min kaj realigi ankoraŭ unu deziron, mi dezirus reveni kaj retrovi vin. Adiaŭ!

Poste li klinis sian propran nukon, kaj surmetis la ĉeneton, kaj tuj lia kapo estis klinita al la tero pro la pezo de la Ringo, kvazaŭ granda ŝtono estus pendigita al li. Sed malrapide, kvazaŭ la pezo malpliigis, aŭ nova forto kreskus en li, li levis la kapon, kaj poste per granda fortostreĉo li stariĝis kaj konstatis, ke li povas marŝi kaj porti sian ŝarĝon. Kaj momente li levis la Flakoneton kaj subenrigardis al sia mastro, kaj la lumo brilis jam milde laŭ la malabrupta radiado de l' vespera stelo dum somero, kaj en tiu lumo la vizaĝo de Frodo iĝis ree bela, pala tamen bela laŭ belo elfa, kvazaŭ de iu, kiu jam delonge trapasis la ombrojn. Kaj kun la maldolĉa konsolo de tiu lasta vido Sam turniĝis kaj kaŝis la lumon kaj stumblis antaŭen en la profundigantan malhelon.

Ne necesis, ke li iru longan distancon. La tunelo estis iom malantaŭe; la Fendo ducent paŝojn antaŭe aŭ malpli. La pado videblis en la krepusko, profunda vojsulko elfosita pro epokoj de trapaso, nun malapike supreniris kiel longa kavoj kun klifoj ambaŭflanke. La kavoj rapide mallarĝiĝis. Baldaŭ Sam alvenis longan aron de larĝaj

malprofundaj ŝtupoj. Jam la orka turego estis rekte super li, brovum-anta nigre, kaj en ĝi ardis la ruĝa okulo. Nun li estis kaŝita en la ombroj sub ĝi. Li proksimiĝis al la supro de la ŝtupoj kaj estis finfine en la Fendo.

— Mi decidis, — li ripetadis al si. Sed li ne findecidus. Kvankam li faris sian plejebulon trapensi ĉion, tio kion li faris tute kuspis lian naturon, kaj li murmuris: — Ĉu mi faris erare? Kion mi devis fari?

Kiam la apikaj flankoj de la Fendo ĉirkaŭfermis lin, antaŭ ol li alvenis la efektivan supraĵon, antaŭ ol li rigardis finfine la padon sub-irantan al la Sennoma Lando, li turnis sin. Dum momento, senmova en netolerebla dubemo, li retrorigardis. Li povis ankoraŭ vidi, kiel etan makulon en la profundiganta morno, la elirejon de la tunelo; kaj ŝajnis al li, ke li vidas aŭ divenas la kuŝlokon de Frodo. Li supozis, ke tie sube estas ekbrileto sur la tero, aŭ eble tio estis ia trompo pro liaj larmoj, kiam li gvatis el tiu alta loko ŝtonoza, kie lia vivo ruiniĝis.

— Se mi nur povus realigi mian solan deziron, — li suspiris, — reiri kaj trovi lin! — Poste li finfine sin turnis al la vojo antaŭe kaj iris kelkajn paŝojn, la plej pezajn kaj plej nevolontajn, kiujn li iam faris.

Nur kelkajn paŝojn; kaj jam nur kelkajn pliajn kaj li subeniros kaj neniam plu vidos tiun altan lokon. Kaj tiam subite li aŭdis kriojn kaj voĉojn. Orkajn voĉojn. Li staris ŝtone senmova. Orkoj estis malantaŭ li kaj antaŭ li. Bruo de batantaj piedoj kaj raŭkaj krioj: orkoj proksimiĝis al la Fendo de la fora flanko, eble el iu enirejo de la turego. Piedbatoj kaj krioj malantaŭe. Li rapide turniĝis. Li vidis ruĝajn lumetojn, torĉojn, palpebrumantajn tie sube, kiam ili eliris el la tunelo. Finfine persekutado komenciĝis. La ruĝa okulo de la turego ne estis blinda. Li estis kaptota.

Jam la flagro de venantaj torĉoj kaj la tinto de ŝtalo antaŭe estis tre proksimaj. Post minuto ili alvenos kaj atingos lin. Tro longe li hezitis decidiĝe, kaj jam tio estis superflua. Kiel li povus eskapi, aŭ savi sin, aŭ savi la Ringon? La Ringon. Li ne konsciis pri penso aŭ decido. Li simple trovis, ke li eltiras la ĉeneton kaj enmanigas la Ringon. La ĉefo de la orka bando aperis en la Fendo antaŭ li. Tiam li surfingris ĝin.

La mondo ŝanĝiĝis, kaj unuopa tempero estis plenigita de horo da pensado. Tuj li konstatis, ke aŭdado pliakriĝis, dum vidado malklar- iĝis, sed alie ol en la fikuŝejo de Ŝeloba. Ĉio ĉirkaŭ li nun estis ne mal- hela, sed malpreciza; dum li mem troviĝis en griza nebula mondo,

sola, kvazaŭ nigra solida roketo, kaj la Ringo, subenpremanta lian maldekstran manon, similis globon el varmega oro. Li tute ne sentis sin nevidebla; kaj li sciis, ke serĉas lin la Okulo.

Li aŭdis krakon de ŝtono kaj la murmuron de akvo malproksime en la Morgula Valo; kaj forprofunde sub la roko la bobelan mizeron de palpanta Ŝeloba, vojperdinta en iu senluma koridoro; kaj voĉojn en karceroj de la turego; kaj la kriojn de orkoj venantaj el la tunelo; kaj surdige muĝantajn en liaj oreloj, batadon de la piedoj kaj ŝiran bruegon de la orkoj antaŭ li. Li kuntiriĝis al la klifo. Sed ili marŝis supren kiel bando fantoma, grizaj distorditaj figuroj en nebulo, nur songaĵoj el timo kun palaj flamoj en la manoj. Kaj ili preterpasis lin. Li kaŭris, provante forrampi en iun fendon por kaŝi sin.

Li aŭskultis. La orkoj eltunelaj kaj la aliaj subenmarŝantaj jam ekvidis unuj aliajn, kaj ambaŭ partioj nun rapidis kaj kriis. Li klare aŭdis ambaŭ, kaj li komprenis, kion ili diras. Eble la Ringo havigis komprenon de lingvoj, aŭ simple komprenon, precipe pri la servantoj de ĝia kreinto Saŭrono, tiel ke se li atentis, li komprenis kaj tradukis por si la pensojn. Certe la potenco de la Ringo ege plifortiĝis apud la lokoj de ĝia forĝado; sed unu aferon ĝi ne havigis, kaj tiu estis kuraĝo. Aktuale Sam ankoraŭ pensis nur pri sinkaŝado, pri nevidateco ĝis ĉio ree kvietos; kaj li aŭskultis maltrankvile. Li ne povis diveni, kiel proksimaj estas la voĉoj, la vortoj ŝajnis preskaŭ enorelaj.

— Hola! Gorbago! Kion vi faras ĉi tie? Ĉu jam sufiĉis al vi milito?

— Ordonite, vi plumpulo. Kaj kion faras vi, Ŝagrato? Ĉu laciĝis pri embuskado tie supre? Ĉu ekemas descendi por batali?

— Ordonite al vi. Mi komandas tiun ĉi pasejon. Do parolu ĝentile. Kion vi raportas?

— Nenion.

— Haj! haj! joj! — Krio interrompis la interparolon de la estroj. La orkoj pli sube subite vidis ion. Ili ekkuris. Tion faris ankaŭ la aliaj.

— Haj! Hola! Jen io! Kuŝas meze de la vojo. Spiono, spiono! — aŭdiĝis ululo de graŭlaj kornoj kaj babelo da blekantaj voĉoj.

Per terura bato Sam estis vekita el sia kaŭra humoro. Ili ekvidis lian mastron. Kion ili faros? Li aŭdis tiajn onidirojn pri la orkoj, kiaj koagulus la sangon. Estis netolereble. Li saltleviĝis. Li forĵetis la celon kaj ĉiujn siajn decidojn, kaj kun ili dubemon kaj timon. Li jam sciis, kie estas lia loko kaj estis: apud la mastro, kvankam ne estis klare, kion li povus tie fari. Li retrokuris laŭ la ŝtupoj, suben laŭ la pado al Frodo.

“Kiom da ili estas? — li pensis. — Tridek aŭ kvardek el la turego minimume, kaj multe pli elsube, mi konjektas. Kiom el ili mi povos mortigi, antaŭ ol ili trafos min? Ili vidos la flamon de la glavono tuj, kiam mi elingigos ĝin, kaj pli aŭ malpli frue ili trafos min. Mi scivolas, ĉu iu kanto iam mencias tion: Kiel falis Samsaĝo en la Alta Pasejo kaj starigis muron da kadavroj ĉirkaŭ sia mastro. Ne, neniue kanto. Kompreneble ne, ĉar la Ringo estos trovita, kaj kantoj ne plu estos. Mi ne povas malhelpi tion. Mia loko estas ĉe sinjoro Frodo. Tion devos kompreni Elrondo kaj la Konsilio, kaj la gravaj princoj kaj princinoj en tuta saĝeco. Iliaj planoj fuŝiĝis. Mi ne povas esti ilia Ringoportanto. Ne sen sinjoro Frodo”.

Sed la orkoj jam pasis el lia nebula vidkampo. Li ne disponis tempon pli frue por konsideri sin mem, sed nun li konstatis, ke li estas lacega, lacega preskaŭ ĝis elĉerpiĝo: liaj kruroj ne povis porti lin tiel, kiel li deziris. Li tro malrapidis. La pado ŝajnis mejlojn longa. Kien ili ĉiuj iris en la nebulo?

Jen ili estis denove! Ankoraŭ sufiĉe antaŭe. Grupo da figuroj ĉirkaŭ io kuŝanta sur la tero; kelkaj ŝajnis kuri tien kaj reen, klinitaj kiel hundoj spurantaj. Li provis plirapidi.

— Ek, Sam! Aŭ vi denove tro malfruos. — Li malstrikigis la glavonon en ĝia ingo. Post momento li elingigos ĝin, kaj tiam...

Aŭdiĝis sovaĝa bruego, hupado kaj ridado, kiam io estis levita de la tero.

— Ja hoj! Ja hari hoj! Supren! Supren!

Poste kriis voĉo:

— Jam ek! Laŭ la vojo rapida. Reen al la Subpordejo! Laŭ ĉiuj indikoj ŝi ne ĝenos nin ĉi-nokte. — La tuta orka bando komencis moviĝi. Kvar en la mezo portis la korpon alte sur la ŝultroj. — Ja hoj!

Ili ja forprenis la korpon de Frodo. Ili ekiris. Li ne povis ĝisatingi ilin. Tamen li penis plu. La orkoj alvenis la tunelon kaj eniris. La ŝarĝoportantoj iris la unuaj, kaj post ili okazis sufiĉe multe da luktado kaj interŝovado. Sam pluiris. Li elingigis la glavonon, flagron da bluo en lia mano ŝanceliĝa, sed ili ne vidis ĝin. Ĝuste kiam li alspiregis ĝis ili, la lastaj el ili malaperis en la nigran truon.

Momente li staris, anhelante, premante sian bruston. Poste li viŝis la vizaĝon per sia mano, forigante polvon, ŝviton kaj larmojn.

— Fi al la putraĵo! — li diris kaj saltis post ili en la senlumon.

Ne plu ŝajnis al li tre mallume en la tunelo, prefere tio estis kvazaŭ li elpaŝus el maldensa nebuleto en nebulon pli pezan. Lia laceco kreskis, sed lia volforto tiom pli firmiĝis. Li pensis vidi la lumon de torĉoj iomete antaŭe, sed malgraŭ la klopodado li ne sukcesis ĝisatingi ilin. Orkoj iras rapide en tuneloj, kaj tiun tunelon ili bone konis; ĉar malgraŭ Ŝeloba ili estis devigataj ofte utiligi ĝin kiel la plej rapidan vojon el la Morta Urbo trans la montoj. Dum kiu praa epoko la ĉefa tunelo kaj la ronda ŝaktego estis konstruitaj, kie Ŝeloba ekloĝiĝis en la pratempo, ili ne sciis; sed multajn flankvojojn ili mem fosis ĉirkaŭ ĝi ambaŭflanke, por eviti la fikuŝejon dum sia irado tien-reen pro la aferoj de siaj mastroj. Tiunokte ili ne intencis iri profunden, sed rapidis trovi flankan koridoron, kiu rekondukis al ilia gardoturo sur la klifo. La plimultaj el ili estis jubilaj, ĝojigitaj per tio, kion ili trovis kaj vidis, kaj kurante ili balbutis kaj klaĉadis laŭ siaspeca moro. Sam aŭdis la bruon de iliaj raŭkaj voĉoj, plataj kaj malmolaj en la morta aero, kaj li povis distingi du voĉojn el inter ĉiuj aliaj: tiuj estis pli laŭtaj, kaj pli proksimaj al li. La komandantoj de la du partioj ŝajnis iri ĉe la posto, debatante dumire.

— Ĉu vi povas ĉesigi la bruon de via kanajlaro, Ŝagrato? — gruntis unu. — Ni ne deziras, ke Ŝeloba venu al ni.

— Blage, Gorbago! La viaj kreas pli ol duonon de la bruo, — diris la alia. — Sed lasu ludi la knabojn! Ne necesos ĝeniĝi pri Ŝeloba dum iom da tempo, mi opinias. Ŝi sidigis sur najlon, ŝajne, kaj pri tio ni ne ploros. Ĉu vi ne vidis malpuraĉaĵon la tutan vojon al tiu malbeninda ŝia fendeto? Se ni unufoje ŝtopis ĝin, ni ŝtopis ĝin centfoje. Do lasu ilin ridi. Kaj ni trafis iom da bonŝanco finfine: akiris ion, kion Lugburzo deziras.

— Lugburzo deziras ĝin, ĉu? Kio ĝi estas, laŭ via takso? Elfa ĝi ŝajnis al mi, sed malpli granda. Kia danĝero en tia afero?

— Ne scias, ĝis ni ekrigardos.

— Oho! Do ili ne sciigis al vi, kion atendi? Ili ne sciigis al ni ĉion, kion scias ili, ĉu ne? Eĉ ne duonon. Sed ili povas kulpi erarojn, tion povas eĉ la Superuloj.

— Ĉit, Gorbago! — La voĉo de Ŝagrato mallaŭtiĝis, tiel ke eĉ la akriĝita aŭdo de Sam nur streĉe sukcesis aŭdi ilian parolon. — Povas okazi, sed ĉie ili havas okulojn kaj orelojn; tre probable ankaŭ en mia trupo. Sed tute nedubeble, ili ĝeniĝas pri io. Tiaj estas la nazguloj sube, laŭ via priskribo; kaj ankaŭ Lugburzo estas. Io preskaŭ forglitis.

— Preskaŭ, laŭ vi! — diris Gorbago.

— Bone, — diris Ŝagrato, — sed pri tio ni parolos poste. Atendu ĝis ni alvenos la Subvojon. Tie estas loko, kie ni povos iom interparoli, dum la knaboj pluiros.

Baldaŭ poste Sam vidis malaperon de la torĉoj. Baldaŭ aŭdiĝis muĝa bruo, kaj ĝuste kiam li alrapidis, frapsono. Laŭ lia supozo, la orkoj turniĝis kaj eniris ĝuste tiun aperturon, kiun Frodo kaj li esploris kaj trovis blokita. Ĝi ankoraŭ estis blokita.

Ŝtonego ŝajnis bari la vojon, sed iel la orkoj trairis, ĉar li aŭdis iliajn voĉojn aliflanke. Ili daŭre kuris pluen, pli kaj pli profunden en la monton, reen al la turego. Sam sentis malesperon. Ili ficele forportis la korpon de lia mastro, sed li ne povis sekvi. Li puŝis kaj ŝovis la baraĵon, kaj li ĵetis sin kontraŭ ĝin, sed ĝi rifuzis cedi. Tiam ne malproksime, aliflanke, aŭ tiel ŝajnis al li, li aŭdis denove la voĉojn de la du komandantoj. Li ŝtaris aŭskultante dum iom da tempo, eble esperante ekscii ion utilan. Eble Gorbago, kiu ŝajne apartenis al Minaso Morgul, elvenos, kaj tiam li povus engliti.

— Ne, mi ne scias, — diris la voĉo de Gorbago. — La mesaĝoj tra-iras pli rapide ol io povas flugi, ĝenerale. Sed mi ne esploras, kiel tio efektiviĝas. Malpli danĝere tiel. Grr! Tiuj nazguloj tremigas min. Kaj ili senkorpigas vin tuj ekvidinte vin, kaj lasas vin malvarma en la senlumo aliflanke. Sed Li ŝatas ilin; ili estas Liaj favoratoj nuntempe, do senutilas grumbli. Mi diras al vi, ke ne estas ludo servi tie sube en la urbo.

— Vi vere spertiĝus, ĉi tie supre en Ŝeloba societo, — diris Ŝagrato.

— Mi preferus esti nek ĉi tie, nek tie. Sed la milito jam komenciĝis, kaj kiam ĝi finiĝos, la aferoj eble faciliĝos.

— Ĝi bone progresas, laŭ ili.

— Ili sendube diras tion, — gruntis Gorbago. — Ni vidos. Sed ĉi-
okaze, se ĝi ja progresas bone, supozeble estos pli da spaco. Kiel vi supozas: se ni havos okazon, eble vi kaj mi forŝteliĝu kaj starigu propran entreprenon kun kelkaj fidindaj knaboj, ie kie iom da bona rabaĵo estas ĉemane, kaj mankos trudaj ĉefoj.

— Ha! — diris Ŝagrato. — Kiel en la malnova tempo.

— Jes, — diris Gorbago. — Sed ne dependu de tio. Mi ne trankvilas mense. Kiel vi diris, la trudaj ĉefoj, jes, — lia voĉo preskaŭ flustriĝis, — jes, eĉ la plej ĉefa, povas erari. Io preskaŭ forglitis, laŭ vi. Laŭ mi, io *jam* forglitis. Kaj ni devos atenti. Ĉiam la kompatindaj urukoj devas korekti glitojn, kontraŭ malmulta danko. Sed ne

forgesu: la malamikoj ne amas nin, kiel ili ne amas Lin, kaj se ili submetos Lin, ankaŭ ni estos kaputaj. Sed diru: je kioma horo oni ordonis vian eliron?

— Antaŭ ĉirkaŭ unu horo, ĝuste antaŭ ol vi vidis nin. Mesaĝo venis: *Nazguloj maltrankvilas. Timas pri spionoj sur la Ŝtupoj. Duoblan priatenton. Patrolon al supro de la Ŝtupoj.* Mi venis tuj.

— Afero malbona, — diris Gorbago. — Vidu: niaj Silentaj Vaĉantoj estis maltrankvilaj antaŭ pli ol du tagoj, tion mi scias. Sed mia patrolo ne estis ordonita eliri ĝis post unu plia tago, kiel ankaŭ mesaĝon oni ne sendis al Lugburzo pro tio, ke la Grandan Signalon oni hisis, kaj la ĉefa nazgulo foriris al la milito, kaj ĉio cetera. Kaj poste oni ne povis sufiĉe longe allogi la atenton de Lugburzo, oni diras.

— La Okulo okupiĝis aliloke, mi supozas, — diris Ŝagrato. — Laŭdire okazas gravaj aferoj forokcidente.

— Povas esti, — graŭlis Gorbago. — Sed dume malamikoj supreniris la Ŝtupojn. Kaj pri kio vi okupiĝas? Via tasko estas sentineli, ĉu ne, kun aŭ sen specialaj ordonoj. Por kio vi utilas?

— Sufiĉe! Ne provu instrui al mi mian laboron. Ni estis viglaj efektive. Ni sciis, ke okazas aferoj strangaj.

— Tre strangaj!

— Jes, tre strangaj: lumoj kaj kriado kaj tiel plu. Sed Ŝeloba aktivas. Miaj knaboj vidis ŝin kaj ŝian Ŝteliranton.

— Ĉu ŝian Ŝteliranton? Kio estas tio?

— Vi certe vidis lin: etan maldikan nigrulon, similan al araneo aŭ eble pli al malsata rano. Li estis ĉi tie pli frue. Venis *el* Lugburzo la unuan fojon, kaj de Supre estis la ordono, ke ni permesu al li trapasi. Li ascendis la Ŝtupojn unu-dufoje post tiam, kaj ni lasis lin trankvila: li ŝajnas havi ian interkonsenton kun Ŝia Moŝto. Mi supozas, ke li ne estas manĝinda: ŝi ne ĝenus sin pri ordonoj de Supre. Sed bele vi gardas en la valo: li estis ĉi tie je unu tago antaŭ ĉi tuta tohuvabohuo. Frue hieraŭ nokte ni vidis lin. Ĉiuokaze niaj knaboj raportis, ke Ŝia Moŝto amuzas sin, kaj tio ŝajnis al mi en ordo, ĝis venis la mesaĝo. Mi supozis, ke ŝia Ŝteliranto alportis al ŝi ludilon, aŭ ke vi sendis al ŝi donacon, militkaptiton aŭ ion. Mi ne enmiksiĝas, kiam ŝi ludas. Nenio preterpasas Ŝeloban, kiam ŝi estas ĉasanta.

— Nenio, ĉu vi diras! Ĉu vi ne uzis viajn okulojn tie malantaŭe? Mi diras al vi, ke mi ne trankvilas mense. Kio ajn ascendis la Ŝtupojn, tio ja preterpasis. Ĝi tranĉis ŝian teksaĵon kaj komplete eskapis el la truo. Tio pripensindas!

— Nu, bone, ŝi kaptis lin en la fino, ĉu ne?

— *Kaptis lin? Kaptis kiun? Ĉu tiun ĉi etulon? Sed se li estus la sola, ŝi antaŭlonge trenus lin al sia konservejo, kaj li nun estus tie. Kaj se Lugburzo volus havi lin, ĝuste vi devus iri por akiri lin. Bele por vi. Sed ĉeestis pli ol unu.*

Tiupunkte Sam komencis aŭskulti pli atente kaj premis sian orelon al la ŝtono.

— Kiu tranĉis la ŝnurojn, per kiuj ŝi volvis lin, Ŝagrato? La sama, kiu tranĉis la teksaĵon. Ĉu vi ne vidis tion? Kaj kiu enpikis pinglon en Ŝian Moŝton? La sama, supozeble. Kaj kie estas tiu? Kie li estas, Ŝagrato?

Ŝagrato nenion respondis.

— Konvenas, ke vi pripensu tion, se vi kapablas. Ne estas ridinda afero. Neniu, *neniu* ĝis nun enpikis pinglon en Ŝeloban, kiel vi devus scii mem bone. Tio ne plorindas, sed pripensu: iu ĉirkaŭvagas ĉi tie, kiu pli danĝeras ol iu ajn alia ribelulo iam promeninta ekde la malnovaj misepokoj, depost la granda Sieĝo. Io efektive forglitis.

— Kaj kio do estas tio? — graŭlis Ŝagrato.

— Laŭ ĉiuj signoj, estro Ŝagrato, mi opinias, ke disvagas granda batalisto, plej verŝajne elfo, ĉiuokaze kun elfa glavo, kaj eble ankaŭ hakilo; kaj li vagas interne de viaj limoj, cetere, kaj vi neniam ekvidis lin. Vere tre strange! — Gorbago kraĉis. Sam amare ridetis pro tiu pri-skribo pri li.

— Aĥ, bone, ĉiam vi kutimas akcepti vidpunkton pesimisman, — diris Ŝagrato. — Vi rajtas interpreti la signojn laŭ via bontrovo, sed eble oni povas klarigi ilin alimaniere. Ĉiuokaze mi postenigis ĉie sentinelojn, kaj mi intencas pritrakti la aferojn unuope. Post kiam mi rigardos la ulon, kiun ni fakte kaptis, mi komencos zorgi pri io alia.

— Laŭ mia konjekto vi ne trovos multon en tiu etulo, — diris Gorbago. — Li eble ne koncerniĝis pri la reala misaĵo. La grandulo kun akra glavo ne ŝajnis alte taksi lin ĉiuokaze; li nur lasis tiun kuŝanta: tipe elfa agmaniero.

— Ni vidos. Venu jam. Ni sufiĉe interparolis. Ni iru rigardi la kaptiton.

— Kion vi intencas fari pri li? Ne forgesu, ke mi la unua ekvidis lin. Se okazos ludo, mi kaj miaj knaboj devos partopreni.

— Regu vin, — graŭlis Ŝagrato, — al mi estas ordonite. Kaj koncernos mian ventron, kaj vian, se mi malobeos. Ĉiu senrajta enirinto, trovita de la gardistaro, estu enkarcerigita en la turego. La kaptito

estas nudigenda. Plena priskribo de ĉiu artiklo, vestaĵo, armilo, leterro, ringo, aŭ bagatelaĵo estas sendenda tuj al Lugburzo kaj *nur* al Lugburzo. Kaj la kaptiton oni devas teni sekura kaj nedifektita, kontraŭ mortpuno al ĉiu ano de la gardistaro, ĝis Li iun sendos aŭ venos Mem. Tio estas sufiĉe klara, kaj tion mi intencas fari.

— Ĉu nudigenda? — diris Gorbago. — Ĉu tio inkluzivas dentojn, ungojn, harojn kaj tiel plu?

— Ne, nenion tian. Lin prenos Lugburzo, mi ja diris al vi. Oni volas havi lin sekuran kaj kompletan.

— Vi trovos tion malfacila, — ridis Gorbago. — Jam nun li estas nura kadavraĵo. Kion faros Lugburzo pri tia aĵo, mi ne konjektas. Li samutile enirus kuirpoton.

— Idioto, — graŭlis Ŝagrato. — Vi parolis tre sprite, sed multon vi ne scias, kvankam la plimultaj aliaj tion scias. Vin ricevos la kuirpoto aŭ Ŝeloba, se vi ne gardos vin. Kadavraĵo! Ĉu nur tiom vi konas Ŝian Moŝton? Kiam ŝi ligas per ŝnuroj, ŝi celas viandon. Mortan viandon ŝi ne manĝas, nek suĉas malvarman sangon. Tiu ulo ne estas mortinta!

Sam ŝanceliĝis, kroĉante la ŝtonon. Li sentis, kvazaŭ renversiĝus la tuta malhela mondo. Tiom forta estis la ŝoko, ke li preskaŭ svenis, sed eĉ luktante por reteni sian konscion, profunde interne de si, li konstatis la komenton: “Idioto, li ne estas mortinta, kaj en via koro vi sciis tion. Ne fidu vian kapon, Samsaĝo, ĝi ne estas via plej efika parto. Via problemo estas, ke vi neniam efektive sentis esperon. Nun kion fari?” Momente nenion, krom apogi sin al la senmova ŝtono kaj aŭskulti, aŭskulti la fiajn orkajn voĉojn.

— Ta! — diris Ŝagrato. — Ŝi posedas pli ol unu venenon. Kiam ŝi ĉasas, ŝi nur pikas ilin ĉe la nuko, kaj ili malrigidiĝas kvazaŭ senostigitaj fiŝoj, kaj poste ŝi traktas ilin laŭplaĉe. Ĉu vi memoras la maljunan Ufthakon? Dum tagoj li forestis. Poste ni trovis lin en angulo; li estis pendanta, sed li estis plenkonscia kaj furiozrigarda. Kiom ni ridis! Ŝi forgesis lin, eble, sed ni ne tuŝis lin, ĉar ne valoris entrudiĝi al Ŝi. Ne, tiu eta putraĵo vekigis post kelkaj horoj, kaj krom provizora naŭza sento li estos tute en ordo. Aŭ estus tia, se Lugburzo lasus lin trankvila. Kaj kompreneble li scivolos pri sia troviĝejo kaj pri tio, kio okazis al li.

— Kaj pri tio, kio al li okazos, — ridis Gorbago, — ni povos ĉi-okaze rakonti al li iom, se nenion alian ni rajtos. Supozeble li neniam antaŭe estis en bela Lugburzo, do eble li ŝatos scii, kion atendi. Tio estos pli amuza ol mi supozis. Ni iru!

— Mankos amuziĝo, mi diris al vi, — diris Ŝagrato. — Kaj nepras teni lin sendifekta, aŭ ni frontos la morton.

— Bone! Sed sur via loko mi kaptus la grandulon, kiu ĉirkaŭiras, antaŭ ol sendi raporton al Lugburzo. Ne aŭdiĝos tre bele, se vi diros, ke la katidon vi kaptis, sed lasis eskapi la katon.

La voĉoj komencis formoviĝi. Sam aŭdis la bruon de piedoj forirantaj. La ŝoko forlasis lin, kaj nun sovaĝa furiozo inundis lin.

— Mi komplete eraris! — li kriis. — Mi tion antaŭvidis. Nun ili havas lin, la demonoj! la putraĵoj! Neniam forlasu vian mastron, neniam, neniam: tio estis mia ĝusta regulo. Kaj en mia koro mi sciiis tion. Ke mi estu pardonita! Nun mi devos reatingi lin. Iel, iel!

Li ree elingigis sian glavon kaj batis la ŝtonon per la tenilo, sed ĝi nur redonis obtuzan sonon. La glavo tamen jam brilis tiel hele, ke li povis malklare vidi pro ĝia lumo. Surprizite li rimarkis, ke la blokego estas peze pordforma, kaj altas malpli ol duoble kiom li. Super ĝi estis malhela malplena spaco inter la supra ekstremo kaj la malalta arkaĵo de la aperturo. Ĝi estis probable intencita nur kiel barilo kontraŭ eniro de Ŝeloba, ligita interne per ia klinko aŭ riglilo ekster atingo de ŝia ruzemo. Per sia restanta forto Sam saltis, supergrimpis, kaj lasis sin fali; poste li kuradis freneze kun la glavo flamanta en sia mano, ĉirkaŭ angulon kaj supren tra serpentuma tunelo.

La sciiĝo, ke lia mastro ankoraŭ vivas, stimulus lin al lasta klopodo preter pensoj pri laceco. Li vidis nenion antaŭe, ĉar tiu ĉi nova koridoro tordiĝis kaj turniĝis konstante; sed li opiniis, ke li proksimiĝas al la du orkoj: ties voĉoj denove malforiĝis. Nun ili ŝajnis sufiĉe proksimaj.

— Tion mi intencas fari, — diris Ŝagrato kolere. — Meti lin tute alte en la plej supra ĉambro.

— Por kio? — graŭlis Gorbago. — Ĉu vi ne havas karcerojn sube?

— Li estu neatingebla, mi diras al vi, — respondis Ŝagrato. — Komprenite, ĉu? Li estas valora. Mi ne senescepte fidas miajn knabojn, kaj el la viaj mi fidas neniun; ankaŭ ne vin, kiam vi avidegas amuzajon. Li estos tie, kie mi deziras lin, kaj kien vi ne venos, se vi ne restos ĝentila. Al la supro, mi diras. Tie li estos sekura.

— Ĉu vere? — diris Sam. — Vi forgesas pri la granda elfa batalisto, kiu ĉirkaŭvagas! — Dirinte tion, li kuregis ĉirkaŭ la lastan angulon, nur por konstati, ke pro iu trompo de la tunelo aŭ de la aŭdkapablo havigita de la Ringo li mistaksis la distancon.

La du orkaj figuroj estis ankoraŭ iom antaŭe. Li jam povis vidi ilin, nigrajn kaj stumpajn fone de ruĝa brilego. La koridoro iris rekte finfine, supren laŭ deklivo; kaj ĉe la ekstremo, larĝe malfermita, estis granda pordoparo, kondukanta supozeble al profundaj ĉambroj fore sub la alta korno de la turego. La orkoj kun sia ŝarĝo jam eniris. Gorbago kaj Ŝagrato proksimiĝis al la pordego.

Sam aŭdis eksplodon de raŭka kantado, blekantaj kornoj kaj gongobatado, hida bruego. Gorbago kaj Ŝagrato estis jam sur la sojlo.

Sam kriegis kaj svingis Pikilon, sed lian etan voĉon dronigis la tumulto. Neniu atentis lin.

La granda pordego krake fermiĝis. Bum. La feraj fermstangoj falis en sian pozicion interne. Klak. La pordego estis fermita. Sam ĵetis sin kontraŭ la riglitajn latunajn bendojn kaj falis senkonscia al la tero. Li troviĝis ekstere en la mallumo. Frodo vivis, sed estis kaptita de la malamikoj.

Ĉi tie finiĝas la dua parto de la historio pri la Milito de l' Ringo.

La tria parto rakontas pri la lasta defendo kontraŭ la Ombro, kaj la fino de la misio de la Ringoportanto en LA REVENO DE LA REĜO.

*Ĝi estas la 100a libro
kuneldonita de Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov*

ENHAVO

Resumo 7

LA TRIA LIBRO

1. La forpaso de Boromiro 11
2. La rajdistoj el Rohano 19
3. La uruk-hajoj 45
4. Arbobarbo 62
5. La blanka rajdanto 90
6. La reĝo de l' Ora Halo 110
7. Profundaĵo de Helmo 132
8. La vojo al Isengardo 150
9. Rubo kaj forĵetaĵo 168
10. La voĉo de Sarumano 185
11. La palantiro 198

LA KVARA LIBRO

1. Malsovaĝigo de Smeagolo 215
 2. La trapaso de l' marĉejo 234
 3. La Nigra Pordego estas fermita 252
 4. Pri spicherboj kaj stufita kuniklo 265
 5. La fenestro al la okcidento 281
 6. La malpermesita laĝeto 303
 7. Vojaĝo al la Krucvojo 315
 8. La ŝtuparo de Cirito Ungol 325
 9. La fikuŝejo de Ŝeloba 340
 10. La alternativo de mastro Samsaĝo 352
- Enhavo 368

Джон Рональд Руэл Толкин
“Две крепости”

Приложение к журналу “La Ondo de Esperanto”
Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации
по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций.
Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Сдано в набор 5.05.2007. Подписано в печать 30.05.2007.
Формат 60 × 84/16. Объем 23 п. л. Тираж 500 экз. Заказ
Отпечатано в Литве.

